Allan Kardec



El la franca lingvo tradukis:
L. C. Porto Carreiro Neto
Ismael Gomes Braga

# LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ

# La Libro de la Mediumoj

**EKSPERIMENTA SPIRITISMO**

# La Libro de la Mediumoj

AŬ

**gvidlibro de la mediumoj kaj elvokantoj**

ENHAVANTA

la specialan instruadon de la Spiritoj pri la teorio de ĉiaspecaj manifestiĝoj, la rimedojn de komunikado kun la nevidebla mondo, la disvolviĝon de la mediumeco, la malfacilaĵojn kaj rifojn, kiujn oni povas renkonti en la praktikado de Spiritismo.

**De**

**ALLAN KARDEC**

Kontinuaĵo de
LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

*El la franca 11-a eldono esperantigis*

*L.C. PORTO CARREIRO NETO*
*kaj*
*ISMAEL GOMES BRAGA*

1964

Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL E GRÁFICO
*Rua Souza Valente, 17 — 20941 - 040*
*Rio de Janeiro, RJ* — BRAZILO

# Tabelo de la enhavo

*Pĝ.*

*Parolo de la tradukintoj* .................................................................... 9

*Enkonduko* .................................................................... 11

UNUA PARTO

**Preparaj konoj**

ĈAPITRO I — *Ĉu ekzistas Spiritoj?* .............................................. 15

ĈAPITRO II — *Tio mirakleca kaj tio supernatura* ............................... 22

ĈAPITRO III — *Pri la metodo* ........................................................ 32

ĈAPITRO IV — *Pri la sistemoj* ........................................................ 44

DUA PARTO

**Pri la manifestiĝoj de la Spiritoj**

ĈAPITRO I — *Pri la agado de la Spiritoj sur la materon* ........................ *63*

ĈAPITRO II — *Pri la fizikaj manifestiĝoj. — Pri la turniĝantaj tabloj* .......... 70

ĈAPITRO III — *Pri la inteligentaj manifestiĝoj* .................................... 74

ĈAPITRO IV — *Pri la teorio de la fizikaj manifestiĝoj.* — Movoj kaj leviĝoj. — Bruoj. — Plipeziĝo kaj malplipeziĝo de la korpoj .................................... 78

ĈAPITRO V — *Pri la spontaneaj fizikaj manifestiĝoj.* Bruoj, bruegoj kaj tumultoj. — Ĵetado de objektoj. — Alportoj .................................... 91

ĈAPITRO VI — *Pri la vidmanifestiĝoj.* — Demandoj pri la aperoj. — Teoria disertacio pri la aperoj. — Spirito-globetoj. — Teorio de la halucino ............................... 113

*Pĝ.*

ĈAPITRO VII — *Pri la dukorpeco kaj la transfiguriĝo.* — Aperoj de Spiritoj de vivantoj. — Duoblaj homoj. — Sankta Alfonso el Liguori kaj Sankta Antono el Padovo. — Vespaziano. — Transfiguriĝo. — Nevidebleco ........ 133

ĈAPITRO VIII — *Pri la laborejo de la nevidebla mondo.* Vestoj de la Spiritoj. — Spontanea formiĝo de tuŝeblaj objektoj. — Modifo de la proprecoj de la materio. — Kuraca magneta agado ........ 143

ĈAPITRO IX — *Pri la hantataj lokoj* ........ 151

ĈAPITRO X — *Pri la karaktero de la komunikaĵoj.* — Maldelikataj komunikaĵoj. — Frivolaj komunikaĵoj. — Seriozaj komunikaĵoj. — Instruaj komunikaĵoj 156

ĈAPITRO XI — *Pri la sematologio kaj la tipitologio.* — Lingvo de la signoj kaj de la frapoj. — Alfabeta tiptologio ........ 160

ĈAPITRO XII — *Pri la pneŭmatografio aŭ senpera skribado.* — *Pri la pneŭmatofonio.* — Senpera skribado. Pneŭmatofonio ........ 166

ĈAPITRO XIII — *Pri la psikografio.* — Nerekta psikografio: korboj kaj tabuletoj. — Rekta aŭ mana psikografio ........ 171

ĈAPITRO XIV — *Pri la mediumoj.* — Mediumoj por fizikaj efikoj. — Elektraj homoj. — Sensivaj aŭ impresivaj mediumoj. — Aŭdivaj mediumoj. — Parolivaj mediumoj. — Vidivaj mediumoj. — Somnambulaj mediumoj. — Sanigivaj mediumoj. — Mediumoj-pneŭmatografoj ........ 175

ĈAPITRO XV — *Pri la skribivaj aŭ psikografaj mediumoj.* — Mekanikaj mediumoj. — Intuiciaj mediumoj. — Duonmekanikaj mediumoj. — Inspirataj aŭ pretervolaj mediumoj. — Antaŭsentemaj mediumoj ........ 191

ĈAPITRO XVI — *Pri la specialaj mediumoj.* — Specialaj kapablecoj de la mediumoj. — Sinoptika tabelo de la diversaj specoj de mediumoj: Variaĵoj komunaj al ĉiuj speco de mediumeco. — Variaĵoj specialaj

*Pĝ.*

por la fizikaj efikoj. — Mediumoj specialaj por intelektaj efikoj. — Diversaj kapablecoj. — Variaĵoj de la skribivaj mediumoj. — Neperfektaj mediumoj. — Bonaj mediumoj ........ 196

ĈAPITRO XVII — *Pri la formado de la mediumoj.* — Disvolvado de la mediumeco. — Ŝanĝiĝo de la skribkaraktero. — Perdo kaj interrompo de la mediumeco ........ 214

ĈAPITRO XVIII — *Pri la malbonaĵo kaj danĝeroj de la mediumeco.* — Influo de la praktikado de la mediumeco sur la sanon. — Same sur la cerbon. — Same sur la infanojn ........ 230

ĈAPITRO XIX — *Pri la rolo de la mediumoj en la komunikiĝoj de la Spiritoj.* — Influo de la persona Spirito de la mediumo. — Sistemo de la inertaj mediumoj. — Kapableco de iuj mediumoj por aferoj, kiujn ili ne konas: lingvoj, muziko, desegno k.a. — Disertacio de du Spiritoj pri la rolo de la mediumoj ........ 233

ĈAPITRO XX — *Pri la morala influo de la mediumo.* — Diversaj demandoj. — Disertacio de Spirito pri la morala influo ........ 246

ĈAPITRO XXI — *Pri la influo de la medio* ........ 255

ĈAPITRO XXII — *Pri la mediumeco de la bestoj*........ 258

ĈAPITRO XXIII — *Pri la obsedo.* — Simpla obsedo. — Fascinado. — Subjugigo. — Kaŭzoj de la obsedo. — Rimedoj por kontraŭbatali la obsedon........ 265

ĈAPITRO XXIV — *Pri la identigo de la Spiritoj.* — Eblaj pruvoj de identeco. — Distingo inter la bonaj kaj la malbonaj Spiritoj. — Demandoj pri la naturo kaj la identeco de la Spiritoj ........ 282

ĈAPITRO XXV — *Pri la elvokoj.* — Ĝeneralaj konsideroj. — Spiritoj, kiujn oni povas elvoki. — Maniero de parolado al la Spiritoj. — Utileco de la apartaj elvokoj. — Demandoj pri la elvokoj. — Elvokoj de bestoj. — Elvokoj de vivantoj. — Homa telegrafio ........ 302

*Pĝ.*

ĈAPITRO XXVI — *Pri la demandoj, kiujn oni povas fari al la Spiritoj.* — Enkondukaj rimarkoj. — Demandoj simpatiaj aŭ antipatiaj al la Spiritoj. — Demandoj pri la estonteco. — Demandoj pri la pasintaj kaj estontaj ekzistadoj. — Demandoj pri la moralaj kaj materialaj interesoj. — Demandoj pri la sorto de la Spiritoj. — Demandoj pri la sano. — Demandoj pri la inventoj kaj eltrovoj. — Demandoj pri la kaŝitaj trezoroj. — Demandoj pri la aliaj mondoj ........ 329

ĈAPITRO XXVII — *Pri la malakordoj kaj pri la mistifikoj.* — Pri la malakordoj. — Pri la mistifikoj ........ 346

ĈAPITRO XXVIII — *Pri la trompoj kaj artifikoj. — Pri ĉarlatanismo kaj ĵonglado.* — Profitamaj mediumoj. — Trompoj en la spiritismaj fenomenoj ........ 357

ĈAPITRO XXIX — *Pri la grupoj kaj societoj de spiritistoj.* — Pri la grupoj ĝenerale. — Pri la ĝustasencaj societoj. — Studotemoj. — Konkurado inter la societoj ........ 369

ĈAPITRO XXX — *Regularo de la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj* ........ 389

ĈAPITRO XXXI — *Disertacioj de Spiritoj.* — Pri Spiritismo. — Pri la mediumoj. — Pri la societoj de spiritistoj. — Apokrifaj komunikaĵoj ........ 397

ĈAPITRO XXXII — *Spiritisma glosaro* ........ 427

---

# *Parolo de la tradukintoj*

La unua eldono de ĉi tiu libro aperis en Parizo en Januaro 1861 kaj la dua en Oktobro de la sama jaro. Tiam Spiritismo estis tre nova, ĉar ĝi ja naskiĝis per la fenomenoj en Hydesville, ŝtato Nov-Jorko, la 31-an de Marto 1848. Estas do mirinde, ke Allan Kardec en tia mallonga tempo akiris la necesan sperton, por verki ĉi tiun libron.

Dum la jam forpasintaj pli ol cent jaroj, la mediumeco estis ĉiam studata de eminentaj kleruloj en multaj landoj, kaj multe da aliaj libroj pri la sama temo jam aperis. Kompreneble nun oni scias pli multe pri la mediumeco, ol en la tempo de Allan Kardec, sed nur tre sensignifajn detalojn oni povus ŝanĝi aŭ aldoni en ĉi tiu majstroverko pri la afero.

La kutimoj iom ŝanĝiĝis, ekzemple, pri elvokado de Spiritoj, tiel ofta en tiu tempo kaj nun tute elmodiĝinta: oni jam ne elvokas Spiritojn, sed nur atendas ilian spontanean manifestiĝon.

En la tempo de Allan Kardec oni supozis, ke la penso estas universala lingvo por ĉiuj Spiritoj ; sed nun oni scias, ke tio estas vera nur por Superaj Spiritoj. La ordinaraj loĝantoj de la Tero kaj de ties najbaraj sferoj bezonas homajn lingvojn por interkompreniĝo kaj, same kiel ni, suferas lingvajn barojn kaj grupiĝas laŭ lingvaj regionoj. Ankaŭ tiuj Spiritoj bezonas Esperanton, kaj efektive multaj el ili lernas nian internacian lingvon.

Ankaŭ pri la mortintaj infanoj nun oni scias pli multe, ol en la tempo de la Aŭtoro. Tiam oni estis konvinkita, ke la Spirito de ĉiu infano, tuj post la morto de lia korpo, reakiras la maturecon, kiun li havis en antaŭa enkarniĝo. Nun oni scias, ke nur escepte tio okazas, kiam temas pri superega Spirito en grava misio. La regulo estas la apero

de la mortinta infano en la mondo de la Spiritoj en la sama aĝo de la korpo kaj kun la samaj bezonoj de vartado, kiujn li havis sur la Tero ; kaj nur malrapide li liberiĝas el la infanaj limigoj, truditaj de la reenkarniĝo al lia perispirito.

Pri ektoplasmio aŭ materiiĝoj la studoj post la tempo de Allan Kardec estas multe pli vastaj kaj formas tre riĉan bibliotekon, sed li donas al ni kontentigan teorion ankaŭ pri tio.

Malgraŭ kelkaj detaloj, kiujn la Aŭtoro nun redaktus alimaniere, "La Libro de la Mediumoj" estas ĝis nun la plej bona lernolibro pri mediumeco kaj okupas elstaran lokon en la spiritualisma literaturo de la homaro ; tial la Brazila Spiritisma Federacio, kiu jam eldonis "La Libron de la Spiritoj" kaj "La Evangelion laŭ Spiritismo", de la sama Aŭtoro, nun aperigas ĝin en la lingvo internacia, tradukitan de tiuj samaj esperantistoj, kiuj preparis la du antaŭajn.

Intertempe jam aperis el tiu eldonejo la Esperanta traduko de aliaj pli modernaj libroj, nome "Antaŭ du mil jaroj ...", "En Ombro kaj en Lumo", "Nia Hejmo", "Kristana Agendo", "Ago kaj Reago", kaj espereble tiu biblioteko kreskos ĉiam, ĉar la mediuma literaturo fariĝas ĉiam pli kaj pli impona. Precipe beletraj verkoj, en prozo kaj en verso, atingas ĉiam pli altajn nivelojn.

---

# Enkonduko

*La sperto ĉiutage konfirmas mian opinion, ke la malfacilaĵoj kaj disreviĝoj, kiujn oni renkontas en la praktikado de Spiritismo, venas de la nesciado de la principoj de ĉi tiu scienco; mi do estas feliĉa, ke mi mem konstatis la sukceson de mia klopodo, por antaŭgardi la adeptojn kontraŭ la rifoj de ĉia noviceco, kaj ke multaj povis ilin eviti danke la atentan legadon de ĉi tiu verko* [*]*.*

*Tute natura deziro ĉe la homoj, kiuj sin okupas pri Spiritismo, estas povi mem komunikiĝi kun la Spiritoj, kaj ĝuste por glatigi al tiuj homoj la vojon ĉi tiu verko estas destinita, profitigante al ili la frukton de miaj longaj kaj zorgaj laboroj; efektive oni pri ĉi tiuj farus al si tre malĝustan ideon, se oni pensus, ke por esti kompetenta en ĉi tiu objekto, sufiĉas meti la fingrojn sur tablon, por igi ĝin turniĝi, aŭ teni krajonon, por skribi.*

*Oni erarus ankaŭ pensante, ke oni trovos en ĉi tiu verko ian ĝeneralan kaj nepre efikantan recepton, por fari mediumojn. Kvankam ĉiu homo havas en si mem la ĝermon de tiuj kvalitoj necesaj por fariĝi mediumo, tiaj kvalitoj tamen ekzistas en tre malsamaj gradoj, kaj ilia disvolviĝo rezultas el kaŭzoj, kiujn neniu povas naski laŭplaĉe. La reguloj pri poezio, pentrarto kaj muziko faras nek poetojn, nek pentristojn, nek muzikistojn el homoj sen la koncernaj talentoj, sed estas simplaj gvid-*

---

[*] Ĉi tiun "Enkondukon" la aŭtoro skribis por la dua eldono de la verko. — *La Trad.*

*iloj en la uzado de naturaj kapabloj. Tio sama okazas pri mia verko: ĝi celas montri la rimedojn, por disvolvi mediuman kapablon laŭ la povo de ĉiu kaj precipe direkti utile tiun jam ekzistantan kapablon. Sed ne sole ĉi tion mi celas.*

*Krom la ĝustasencaj mediumoj ĉiutage kreskanta multego da homoj interesiĝas pri manifestiĝoj de Spiritoj; ilin gvidi en iliaj observoj, montri al ili la embarasojn, kiujn ili eble, eĉ nepre renkontos sur tute nova kampo; ilin inici en la manieron, kiel trakti kun la Spiritoj; montri al ili, kiel ricevi bonajn mesaĝojn - jen la programo, kiun mi devas plenumi, ĉar alie mi farus laboron nekompletan. Oni do ne miru, se oni trovos en ĉi tiu verko aferojn, kiuj de la unua rigardo povas ŝajni fremdaj al ĝi: la sperto montros ilian utilecon. Ĝin zorge studinte, oni pli bone komprenos la faktojn, kiujn oni ĉeestos; la parolo de iuj Spiritoj montriĝos malpli stranga. Kiel praktika instruilo, ĉi tiu verko koncernas ne nur mediumojn, sed ankaŭ ĉiujn homojn, kapablajn vidi kaj observi spiritismajn fenomenojn.*

*Kelkaj preferus, ke mi publikigu ian plej malgrandan praktikan lernolibron, kiu per iaj kelke da vortoj indikus, kiel ekrilati kun la Spiritoj; ili opinias, ke, pro sia modera prezo povante esti abunde diskonigata, tia verketo estus forta propagandilo kaj do plimultigus la mediumojn; de mia flanko mi opinias, ke tia verko estus pli malutila ol utila, almenaŭ en la nuna tempo. La praktikado de Spiritismo estas ligita kun multe da malfacilaĵoj kaj ne ĉiam estas sen nekonvenaĵoj, kiujn povas evitigi nur serioza kaj kompleta studado. Estus do timinde, ke ia tro konciza montro instigus iun al senpripensaj eksperimentoj, pri kiuj tiu povus penti; tio estas aferoj, per kiuj estas nek* konvene*, nek prudente ludi, kaj mi pensas, ke mi farus misservon, se mi ilin disponigus al la unua renkontita ventkapulo, kiu konsiderus amuzaĵo la interparoladon kun la mortintoj. Mi turnas min al tiuj homoj, kiuj vidas en Spiritismo seriozan celon, kiuj komprenas ĝian tutan gravecon kaj do ne faras al si ludon el la komunikado kun la nevidebla mondo.*

*Mi iam publikigis* Praktikan Instrulibron *kiel gvid-*

*ilon de la mediumoj, verkon, hodiaŭ elĉerpitan; kvankam skribita por plej grava kaj serioza celo, mi ĝin tamen ne represos, ĉar mi ĝin ne konsideras jam sufiĉe senmanka por prilumi ĉiajn malfacilaĵojn, kiujn oni povas renkonti. Mi ĝin anstataŭigis per ĉi tiu, en kiu mi kolektis ĉiujn elementojn, kiujn longa sperto kaj konscienca studado al mi havigis. Mi esperas almenaŭ, ke ĝi kontribuos, por doni al Spiritismo la seriozan karakteron, kiu estas ties propra esenco, kaj por forigi ĉian penson, vidi en ĉi tiu afero ian objekton de frivola okupo kaj de amuzo.*

*Al ĉi tiuj konsideroj mi aldonas unu tre gravan, nome la malfavoran impreson, kiun faras sur novulojn aŭ strabe rigardantajn homojn vidi eksperimentojn plenumatajn fuŝe kaj sen perfekta konado de la afero; tiaj eksperimentoj havas la malbonaĵon doni pri la mondo de la Spiritoj tre malĝustan ideon kaj esti trafeblaj por mokado kaj ofte fundamentita kritiko; jen kial nekredemuloj el tiuj kunsidoj malofte eliras konvertitaj kaj apenaŭ inklinaj vidi en Spiritismo ian flankon seriozan. La nesciado kaj ventanimeco de iuj mediumoj pli multe, ol kiel oni pensas, malutilis la opinion de multaj homoj.*

*De kelke da jaroj Spiritismo forte progresas, sed ekprogresis gigante de tiam, kiam ĝi ekiris la filozofian vojon, ĉar ĝi komencis esti observata de klarmensaj homoj. Hodiaŭ ĝi ne estas plu ia spektaklo, sed doktrino, pri kiu jam ne ridas tiuj, kiuj mokadis la turniĝantajn tablojn. Klopodante por ĝin starigi kaj tenadi sur ĉi tiu tereno, mi estas konvinkita, ke mi akirigos al ĝi pli da utilaj partianoj, ol trafe aŭ maltrafe naskante manifestiĝojn, kiujn oni povus misuzi. La pruvon pri ĉi tio mi havas ĉiutage laŭ la nombro da adeptoj, kiujn varbis la sola legado de* La Libro de la Spiritoj (*).

*Elvolvinte en* La Libro de la Spiritoj *la filozofian parton de la spiritisma scienco, mi donas en la nuna verko la parton praktikan, kiun uzos tiuj, kiuj deziros sin okupi kun manifestiĝoj, ĉu persone, ĉu por fari al si ideon pri la faktoj, kiujn ili havos okazon ĉeesti. Ili ĉi*

(*) Verko eldonita en Esperanto en 1946. Ĝi estas la "fundamento" de Spiritismo. — *La Trad.*

*tie vidos la renkonteblajn malfacilaĵojn kaj tiel disponos rimedojn por ĉi tiujn antaŭforigi. Tiuj ambaŭ verkoj, kvankam unu estas sekvo de la dua, estas iagrade nedependaj inter si; tamen al ĉiu, deziranta sin* serioze *okupi pri ĉi tiu afero, mi konsilas legi unue* La Libron de la Spiritoj, *ĉar ĝi enhavas la fundamentajn principojn, sen kiuj kelkajn partojn de la nun prezentata verko oni eble malfacile komprenus.*

*Gravaj plibonigoj estas enkondukitaj en ĉi tiun duan eldonon, multe pli plenan ol la unua. Ĝi estas plej zorge korektita de la Spiritoj mem, kiuj aldonis al ĝi grandan nombron da plej interesaj rimarkoj kaj instrukcioj. Ĉar ili ĉion reviziis, aprobis aŭ modifis laŭ sia plaĉo, oni do povas diri, ke ĝi estas pleje verko de ili, ĉar ilia partopreno ne limigis sin sole je la kelke da montritaj artikoloj; mi malkaŝis nomojn nur tiam, kiam ĝi ŝajnis al mi necesa, por karakterizi certajn iom longajn citatojn, kiel laŭtekste venintajn de ili mem; alie mi devus citi ilin preskaŭ sur ĉiu paĝo, precipe ĉe ĉiuj respondoj al faritaj demandoj, kio ne ŝajnis al mi utila. Nomoj, kiel sciate, ne multe gravas en tiaj aferoj: esence estas, ke la tuto de la laboro respondu al la trafota celo. Kvankam la unua eldono estis ne tute perfekta, ĝia akcepto vigligas tamen mian esperon, ke ĉi tiu ne renkontos malpli grandan favoron.*

*Ĉar mi ĉi tie aldonis multe da subjektoj kaj plurajn tutajn ĉapitrojn, mi tial forstrekis kelke da artikoloj, kiuj estis simplaj duoblaĵoj, kiel ekz-e la* Spiritan Hierarkion, *kiu troviĝas jam en* La Libro de la Spiritoj. *Ankaŭ el la* Glosaro *mi elĵetis ĉion, kio propre ne apartenas al la kadro de ĉi tiu verko: tion utile anstataŭas ĉi tie pli praktikaj temoj. Cetere tiu glosaro ne estis kontentiga; mi ĝin iam poste publikigos aparte sub la formo de vortareto de spiritisma filozofio; ĉi tie mi konservis nur tiujn novajn aŭ specialajn vortojn, rilatajn al la nun pritraktata objekto.*

————————

UNUA PARTO

# Preparaj konoj

ĈAPITRO I

## ĈU EKZISTAS SPIRITOJ?

**1.** La dubo pri la ekzisto de la Spiritoj havas kiel unuan kaŭzon la nekonadon de ilia naturo. Oni ordinare ilin imagas al si kiel estulojn apartajn inter la kreitoj, estulojn, kies neceso ne estas ja pruvita. Multaj homoj konas ilin nur el la fantaziaj rakontoj, per kiuj ili estis lulataj, pli-malpli tiel, kiel oni konas la Historion per la romanoj; ne esplorante, ĉu tiuj rakontoj, senigitaj je siaj ridindaj akcesoraĵoj, havas en la fundo ian verecon, ili estas frapataj nur de la flanko absurda; ne penante elŝiri la amaran haŭton, por malkovri la kernon, ili forĵetas ĉion, kiel agas, en la religia sfero, tiuj homoj, kiuj pikitaj de iaj misuzoj, ĉion sendistinge kondamnas.

Kia ajn estas la ideo, kiun oni faras al si pri la Spiritoj, tiu kredo nepre baziĝas sur la ekzisto de ia inteligenta principo, ne dependanta de la materio (*); ĝi estas neakordigebla kun la neado de tiu principo. Mi do prenas kiel deirpunkton la ekziston, transvivon kaj individuecon de la animo, kies teoria kaj dogma pruvo estas la **spiritualismo** kaj kies pruvo videbla estas la Spi-

(*) Oni komprenu: la *kruda*, la *malsubtila* materio, kia tiu de la surtera korpo, ĉar ja la "materio" havas plurajn gradojn da "denseco". El ĉi tiu pli vasta vidpunkto ankaŭ la animo, aŭ Spirito, estas "materia", ĉar efektive nenio estas "nemateria". — *La Trad.*

ritismo. Ni por momento preterlasu la ĝustasencajn manifestiĝojn kaj, indukte rezonante, ni vidu, al kiaj konsekvencoj ni venos.

**2.** Se oni akceptas la ekziston de la animo kaj ĝian individuecon post la morto, oni do devas akcepti ankaŭ ke: 1-e, ĝi havas naturon alian ol la korpo, ĉar, disiĝinte de ĉi tiu, ĝi ne posedas ties proprecojn; 2-e, ĝi havas propran konscion, ĉar oni konsentas al ĝi la kapablon ĝoji aŭ suferi, alie ĝi estus inerta estaĵo, kio por ni valorus tiom same, kiom ĝin ne havi. Se oni ĉi tion akceptas, sekve la animo iras ian lokon: kio estos kun ĝi kaj kien ĝi iras? Laŭ la ordinara kredo ĝi iras en la ĉielon aŭ en la inferon; sed kie situas la ĉielo kaj la infero? Oni pasintatempe diradis, ke la ĉielo sidas supre kaj la infero malsupre; sed kio estas supro kaj malsupro en la Universo, se oni scias, ke la Tero estas ronda, se oni konas la movadon de la astroj, el kio rezultas, ke tio supra en difinita momento fariĝas malsupra post dek du horoj, kaj la senlimecon de la Spacego, en kiun la rigardo penetras ĝis nemezureblaj distancoj? Estas vero, ke sub "malalta loko" oni komprenas ankaŭ la profundojn de la Tero; sed kio fariĝis tiuj profundoj de tiam, kiam geologoj ilin disfosis? Kio ankaŭ estas tiuj samcentraj sferoj, nomataj "ĉielo el fajro", "ĉielo el steloj", se oni ja scias, ke la Tero ne estas la centro de la mondoj, ke nia suno mem estas nur unu el la milionoj da sunoj, brilantaj en la senfina spaco kaj el kiuj ĉiu estas la centro de kirliĝanta amaso da planedoj? Kian gravecon ĉe tio havas la Tero, dronanta en tia vastaĵo? Per kia nepravigebla privilegio ĉi tiu apenaŭ rimarkebla sablero, kiu distingiĝas nek pro sia volumeno, nek pro sia pozicio, nek pro ia aparta rolo, estus la sola mondo, loĝata de prudentaj estuloj? La racio rifuzas akcepti tian senutilecon de la senlimo, kaj ĉio diras al ni ke tiuj mondoj estas ja loĝataj. Se ili estas loĝataj, ili do liveras sian kontingenton al la mondo de la animoj; sed, ankoraŭ unu fojon, kio fariĝas tiuj animoj, se la Astronomio kaj la Geologio detruis la loĝejojn, destinitajn por ili, kaj precipe, se la tiel racia teorio pri la plureco de la mondoj ilin senfine multigis?

Ĉar la doktrino pri la lokado de la animoj ne povas akordi kun la informoj de la scienco, tial pli logika doktrino asignas al ili por kampo ne ian difinitan kaj limitan lokon, sed la universan spacon: ĝi estas tuta mondo nevidebla, en kiu ni vivas, kiu nin ĉirkaŭas, kiu kun ni senĉese kunpuŝiĝas. Ĉu en tio estas io ne ebla, io, kion la racio abomene forpuŝus de si? Tute neniel; kontraŭe, ĉio diras al ni, ke alie esti ne povas. Sed, se tiel estas, kio do fariĝas la estontaj punoj kaj premioj, senigitaj je siaj specialaj lokoj? Rimarku, ke la nekredo je la loko de tiuj punoj kaj premioj originas ordinare de tio, ĉar oni ilin prezentas en neakcepteblaj kondiĉoj: diru, anstataŭ tio, ke la animoj sian feliĉon aŭ malfeliĉon ĉerpas en si mem; ke ilia sorto dependas de ilia morala stato; ke la kunesteco de animoj bonaj kaj sin reciproke simpatiantaj estas fonto de feliĉo; ke, laŭ sia grado da progreso, ĉi tiuj penetras kaj duonvidas aferojn, kiuj restas kaŝitaj antaŭ krudnaturaj animoj, kaj ĉiuj tion senpene komprenos. Diru ankaŭ, ke la animoj atingas la plej supran ŝtupon nur per siaj klopodoj por pliboniĝi kaj post tuta vico da elprovoj, kiuj kunhelpas por ilia elpuriĝo; ke la anĝeloj estas la animoj, venintaj al la lasta ŝtupo, kiun ĉiu povas atingi kun bonvolo; ke tiuj anĝeloj estas la adjutantoj de Dio, komisiitaj por kontroli la plenumadon de Liaj ordonoj en la tuta Universo, kaj feliĉaj, ke ili havas tiajn glorigajn misiojn, kaj vi havigos al la feliĉo de la animoj celon pli utilan kaj allogan, ol tiu de ia eterna kontemplado, kiu estus nenio alia ol senfina senutileco. Diru fine, ke la demonoj ne estas aliaj ol la animoj de la malbonuloj, animoj ankoraŭ ne elpuriĝintaj, sed povantaj iam elpuriĝi, kiel la ceteraj, kaj tio aspektos pli konforma al la justeco kaj boneco de Dio, ol la doktrino, ke ili estus kreitaj por malbono kaj ĉiam sin donantaj al malbono. Mi ripetas: jen kion povas akcepti la plej severa prudento, la plej rigora logiko, unuvorte la natura saĝo.

Nu, tiuj animoj, kiuj priloĝas la Spacon, estas ĝuste tio, kion oni nomas **Spiritoj**; la **Spiritoj** estas do nenio alia, ol la homaj animoj, liberiĝintaj el sia korpa envolvaĵo. Se la Spiritoj estus kreitaĵoj apartaj, ilia ekzis-

to estus pli hipoteza, sed konsentante, ke ekzistas animoj, oni do devas konsenti ankaŭ, ke ekzistas Spiritoj, kiuj estas nenio alia ol animoj; kaj se oni konsentas, ke la animoj troviĝas ĉie, oni do devas same konsenti, ke la Spiritoj sin trovas ĉie. Oni sekve ne povus nei la ekziston de la Spiritoj, ne malkonfesante tiun de la animoj.

**3.** Estas vero, ke ĉi tio estas nur unu teorio pli racionala ol la alia, tamen estas jam multe, ke iun teorion ne refutas la racio nek la scienco; kaj se, krom tio, ĝin konfirmas la faktoj, tiam ĝi havas ĉe si la sankcion de la rezonado kaj de la sperto. Tiujn faktojn ni trovas en la fenomeno de la manifestiĝoj de la Spiritoj, kio estas do la palpebla pruvo de la ekzisto kaj transvivo de la animo. Sed ĉe multaj homoj la kredo ĉi tie metas punkton; ili ja akceptas la ekziston de la animoj, sekve tiun de la Spiritoj, sed neas la eblecon de komunikiĝo kun tiuj, ĉar, ili diras, estuloj nemateriaj ne povas agi sur la materion. Tia dubo baziĝas sur la nesciado de la vera naturo de la Spiritoj, pri kiuj oni ordinare faras malĝustan ideon, ĉar oni erare ilin bildigas al si kvazaŭ abstraktajn, nebulecajn kaj nedifinitajn estulojn, kio estas nevera.

Ni unue prezentu al ni la Spiriton ligitan kun sia korpo: la Spirito estas la precipa estaĵo, ĉar li estas la estulo **pensanta kaj supervivanta**; la korpo estas simpla **akcesoraĵo** de la Spirito, ia envolvaĵo, ia vestaĵo, kiun li demetas, kiam tiu estas eluzita. Krom ĉi tiu materia envolvaĵo la Spirito havas ankaŭ duan, duonmaterian, kiu ligas lin al la unua; ĉe la morto la Spirito demetas ĉi tiun lastan, sed ne la duan, kiun mi nomas **perispirito**. Tiu duonmateria envolvaĵo, kiu prenas sur sin la homan formon, estas, por la Spirito, ia korpo fluideca, vaporeca, tamen, kvankam nevidebla por ni en sia normala stato, ne en malpli alta grado posedanta kelkajn el la proprecoj de la materio. La Spirito estas do ne ia punkto, ia abstraktaĵo, sed estulo limigita kaj difinita, al kiu mankas nur esti videbla kaj palpebla, por ŝajni al ni homa estulo. Kial do li ne povus agi sur la materion?

Ĉu tial, ke lia korpo estas fluideca? Sed ĉu ne inter la malplej densaj fluidoj, tiuj, rigardataj kiel senpezaj, ekz-e la elektro, la homo havas siajn plej potencajn motorojn? Ĉu la senpeza lumo (*) ne agas ĥemie sur la pezan materion? Ni ja ne konas la naturon mem de la perispirito, tamen supozante, ke ĝi konsistas el elektra materio, aŭ el ia alia materio same subtila, kial do ĝi ne havus la saman proprecon, direktate de ies volo?

**4.** Ĉar la bazo de la tuta konstruaĵo estas la ekzisto de la animo kaj de Dio — sekvo unu de la dua —, tial antaŭ ol komenci ĉian diskutadon pri Spiritismo, oni devas certiĝi, ĉu la kunparolanto akceptas ĉi tiun fundamenton. Se al jenaj demandoj: "Ĉu vi kredas je Dio?", "Ĉu vi kredas, ke vi havas ian animon?", "Ĉu vi kredas la postmortan vivon de la animo?", li respondas nee, aŭ eĉ, se li simple diras: **Mi ne scias; mi dezirus, ke tiel estu, sed pri tio mi ne estas certa**, kio plej ofte valoras same kiel ĝentila neado, maskita sub malpli tranĉa formo, por ne tro brutale vundi tion, kion oni nomas "respektindaj antaŭjuĝoj" —, tiam estus tiel vane iri pluen, kiel peni montri la proprecojn de la lumo al blindulo, kiu neus la lumon, ĉar, en la fundo, la manifestiĝoj de la Spiritoj estas nenio alia ol la efikoj de la proprecoj de la animo: kun tia kunparolanto oni devas trakti per tute alia procedo, se ja oni ne volas perdi sian tempon.

Se tiu fundamento estas akceptita, ne kiel ia **probableco**, sed kiel fakto konstatita, nekontestebla, tiam la ekzisto de la Spiritoj tute nature rezultas el ĝi.

**5.** Nun restas ekscii, ĉu la Spiritoj povas komunikiĝi kun la homoj, t.e. ĉu ili povas interŝanĝi pensojn kun ĉi tiuj. Kial do ne? Kio estas la homo, se ne Spirito ligita al korpo? Kial Spirito libera ne povus havi rilatojn kun Spirito mallibera, tiel same, kiel homo libera kun homo katenita? Se iu akceptas la transvivon de la aimo, ĉu do estas racie ne konsenti la trans-

(*) De kelka tempo estas sciate, ke la lumo havas pezon, kiel ĉia materio. — *La Trad.*

ekzistadon de la korligiĝoj? Ĉar la animoj sin trovas ĉie, ĉu tial ne estas nature ekpensi, ke la animo de iu homo, kiu amis nin dum sia vivo, venus al ni, ke ĝi dezirus paroli al ni, kaj ke, por tio, ĝi uzus la disponeblajn rimedojn? Ĉu dum sia vivo ĝi ne agis sur la materion de sia korpo? Ĉu ne ĝi direktis ties movojn? Kial do post la morto de sia karna envolvaĵo, en konsento kun alia Spirito ligita al korpo, ĝi momente ne prenus al si tiun korpon vivantan, por manifesti sian penson, simile kiel mutulo povas uzi la servemon de iu parolkapabla, por sin komprenigi?

**6.** Mi por momento ignoru la faktojn, laŭ kiuj, mi opinias, ĉi tiu teorio estas nekontestebla; mi ĝin akceptu kiel simplan hipotezon; mi petas, ke la nekredantoj pruvu al mi, ne per nura neado, ĉar ilia persona opinio ne povas esti leĝo, sed per nediskuteblaj motivoj, ke tio estas ne ebla. Mi lokas min sur ilia tereno, kaj, ĉar ili volas taksi la spiritismajn faktojn per la leĝoj de la materio, ili do serĉu inter tiu ilaro iun demonstracion matematikan, fizikan, ĥemian, mekanikan, fiziologian, kaj pruvu per **a** plus **b**, nepre deirante de la principo de la ekzisto kaj transtomba vivo de la animo, ke:

1-e, la estulo, kiu pensas pri ni dum la vivo, ne kapablas pensi plu post la morto;

2-e, se li pensas, li ne kapablas pensi nun pri la homoj, kiujn li amis;

3-e, se li pensas pri la homoj, kiujn li amis, li jam ne volas komunikiĝi kun ili;

4-e, se li povas troviĝi ĉie, li tamen ne povas stari apud ni;

5-e, se li staras apud ni, li tamen ne povas paroli al ni;

6-e, per sia fluideca envolvaĵo li ne povas agi sur inertan materion;

7-e, se li povas agi sur la inertan materion, li tamen ne povas agi sur la estulon animitan;

8-e, se li povas agi sur estulon animitan, li tamen ne povas direkti ties manon, por igi tiun skribi;

9-e, povante igi tiun skribi, li tamen ne povas res-

pondi liajn demandojn nek komuniki al li siajn pensojn.

Kiam la kontraŭuloj de Spiritismo pruvos al mi, ke tio ne povas esti, per argumentoj tiel evidentaj, kiel tiuj, per kiuj Galileo Galilei pruvis, ke ne la suno rondiras ĉirkaŭ la Tero, tiam mi povas diri, ke iliaj duboj havas bazon; bedaŭrinde, ilia tuta argumentado ĝis hodiaŭ limiĝas je la jenaj vortoj: **Mi ĝin ne kredas, sekve ĝi estas ne ebla**. Ili sendube diros al mi, ke ja min koncernas pruvi la realecon de tiuj manifestiĝoj; mi ĝin pruvas al ili per la faktoj kaj per la rezonado: se ili akceptas neniun el ĉi tiuj rimedoj, se ili neas eĉ tion, kion ili vidas, tiam ili pruvu, ke mia rezonado estas erara kaj ke la faktoj estas ne eblaj.

———————

ĈAPITRO II

# TIO MIRAKLECA KAJ TIO SUPERNATURA

**7.** Se la kredo pri la Spiritoj kaj iliaj manifestiĝoj estus ia aparta konceptaĵo, la produkto de ia sistemo, oni povus suspekti, kun kelka ŝajno de praveco, ke ĝi estas iluziaĵo; sed mi dezirus, ke oni diru al mi, kial oni vidas ĝin tiel persista ĉe ĉiuj popoloj, ĉu antikvaj, ĉu modernaj, kaj en la sanktaj libroj de ĉiuj konataj religioj? Tiel estas, diras iuj kritikistoj, tial, ĉar en ĉiuj tempoj la homo amis ĉion miraklecan. — Kio do, laŭ via kompreno, estas io mirakleca? — Tio supernatura. - Kion vi komprenas sub "supernatura"? — Tion kontraŭan al la leĝoj de la Naturo. — Ĉu do vi konas tiujn leĝojn tiel bone, ke vi povas streki limon al la povo de Dio? Nu, vi do pruvu, ke la ekzisto kaj la manifestiĝoj de la Spiritoj kontraŭas la leĝojn de la Naturo, kaj ke tio ne estas nek povas esti unu el tiuj leĝoj. Sekvu la Spiritisman Doktrinon kaj vidu, ĉu tia ĉeno da ideoj ne havas ĉiujn karakterojn de mirinda leĝo, kiu solvas ĉion, kion la filozofiaj leĝoj ne povis ĝis hodiaŭ solvi. La pensado estas unu el la propraĵoj de la Spirito; la ebleco agi sur la materion, impresi niajn sentumojn kaj sekve konigi sian penson rezultas, se tiel diri, de lia fiziologia konstruo: ĉi tie do estas nenio supernatura, nenio mirakleca. Se iu homo mortinta, definitive elmortinta, korpe rericevus la vivon; se liaj disŝutitaj membroj rekolektiĝus, por rekunmeti lian korpon —, jen kio mirakleca, supernatura, fabela; tio ja estus efektiva nuligo de la leĝoj, kiun Dio nur mirakle farus; sed en la Spiritisma Doktrino nenio tia estas.

**8.** Tamen, oni diros, vi akceptas, ke iu Spirito pov-

as levi tablon kaj teni ĝin en la aero sen apogo: ĉu tio ne estas ja nuligo de la leĝo pri la pezoforto? — Nuligo ja de la konata leĝo; sed ĉu la Naturo jam diris sian lastan vorton? Antaŭ ol oni provis la suprenmovan forton de iuj gasoj, kiu estus dirinta, ke peza maŝino, portanta plurajn homojn, povas venki la altirforton de la Tero? Ĉu en la okuloj de la vulgarularo ĉi tio ja ne ŝajnus io mirakleca, io diabla? Kiu antaŭ cent jaroj proponus transsendi depeŝon ĝis la distanco de 500 francaj mejloj [*] kaj ricevi respondon je ĝi post kelke da minutoj, tiu estus rigardata kiel frenezulo; se li tion farus, oni kredus, ke li havas la diablon kiel sian servanton, ĉar tiam nur la diablo kapablis tiel rapide iri. Kial do iu nekonata fluido ne havus, en difinitaj cirkonstancoj, la povon kontraŭstari la efikon de la pezoforto, same kiel la hidrogeno kontraŭstaras la pezon de la balono? Ĉi tio, mi preterpase klarigu, estas ne ia similigo, sed komparo, sole nur por tio, por montri, laŭ analogeco, ke tiu fakto ne estas fizike ne ebla. Nu, ĝuste tiam, kiam, observante tiajn fenomenojn, la sciencistoj volis procedi per similigo, ili vojeraris. Cetere la fakto ja ekzistas; ĉia neado ne povas fari, ke ĝi ne ekzistu, ĉar nei ne estas pruvi; laŭ mi ĝi havas nenion supernaturan: jen ĉio, kion mi povas por momento diri per ĝi.

**9.** Se la fakto estas konstatita, iu diros, mi ĝin akceptas, mi akceptas eĉ tiun kaŭzon, pri kiu vi ĵus parolis, nome ian nekonatan fluidon; sed kiu pruvas la enmiksiĝon de la Spiritoj? jen tio mirakleca, tio supernatura.

Estus necesa ĉi tie longa demonstracio, kiu ne estus ĝustaloka kaj kiu cetere estus duoblaĵo, ĉar ĝi elvidiĝas el ĉiuj aliaj partoj de la instruo; tamen, por ĝin resumi per iaj kelke da vortoj, mi diru, ke ĝi estas fondita, teorie, sur jena principo: "ĉia efiko inteligenta certe hav-

[*] La franca mejlo valoras 4 km. La "Dictionnaire Français-Espéranto", de S-roj R. Lèger kaj A. Albaut, proponas la terminon *leŭgo*, ŝajne respondantan al la "franca mejlo" ("lieue"). — *La Trad.*

as ian kaŭzon inteligentan”; praktike, sur tiu observado, ke, doninte pruvon pri inteligenteco, la tiel nomataj spiritismaj fenomenoj certe havas sian kaŭzon ekster la materio; ke, ne estante tiu de la ĉeestantoj — kio rezultas el la sperto —, tiu inteligenteco certe troviĝas ekster ili; kaj ĉar oni ne vidas la agantan estulon, li estas do estulo nevidebla. Tiamaniere, observo post observo oni fine konstatis, ke tia nevidebla estulo, kiun oni nomis “Spirito”, estas nenio alia, ol la animo de homo, kiu vivis en la korpo kaj kiun la morto senigis de lia malsubtila videbla envolvaĵo, lasinte ĉe li nur ian envolvaĵon eterecan, nevideblan en sia normala stato. Jen, plej simpligitaj, tio mirakleca kaj tio supernatura. Se do, kiel konstatite, ekzistas nevideblaj estuloj, ties agado sur la materion rezultas el la konsisto de ilia fluideca envolvaĵo; tia agado estas inteligenta, ĉar ĉe la morto ili perdis nur sian korpon, sed konservis la inteligentecon, kiu estas ilia esenco: jen la ŝlosilo de ĉiuj fenomenoj, misrigardataj kiel supernaturaj. La ekzisto de la Spiritoj estas do ne ia antaŭkonceptita sistemo, ne ia hipotezo, imagita por klarigi la faktojn, sed rezultato de observoj kaj natura sekvo de la ekzisto de la animo; nei tiun kaŭzon estas nei la animon kaj ties propraĵojn. Kiu pensas, ke li povas prezenti pri tiuj inteligentaj efikoj pli racian solvon, povante precipe motivi **ĉiujn faktojn**, tiu bonvolu ĝin fari, kaj tiam oni povos pridiskuti la valoron de ĉiu el liaj argumentoj.

**10.** En la okuloj de la homoj, kiuj rigardas la materion kiel la solan potencon de la Naturo, **ĉio, kio ne povas esti klarigata laŭ la leĝoj de la materio, estas mirakleca aŭ supernatura**; kaj laŭ ili io **mirakleca** estas sinonimo de **superstiĉo**. El ĉi tiu vidpunkto la religio, afero bazita sur la ekzisto de ia nemateria principo, estus teksaĵo el superstiĉoj; tion ili ne kuraĝas diri tute laŭte, sed ili diras murmure, kaj ili kredas, ke ili kontentigas la konvenaĵojn, konsentante, ke estas necesa iu religio por la popolo kaj por saĝigi la infanojn. Nu, unu el ambaŭ: la religia principo estas aŭ vera aŭ malvera; se ĝi estas vera, ĝi do estas tia por ĉiuj; se ĝi estas

malvera, tiam ĝi ne estas pli bona por nekleruloj, ol por instruitoj.

**11.** Tiuj, kiuj atakas Spiritismon, ke ĝi estus mirakleca, sin do apogas ordinare sur la materialisma principo, ĉar, neante ĉian ekstermaterian efikon, ili pro tio mem neas la ekziston de la animo; sondu la fundon de ilia menso, profunde ekzamenu la sencon de iliaj paroloj, kaj vi preskaŭ ĉiam ekvidos tiun principon, se ne kategorie formulitan, almenaŭ sub la ŝajno de ia racia filozofio, per kiu ili ĝin vestas. Forpuŝante kvazaŭ miraklecan ĉion, kio rezultas el la ekzisto de la animo, ili estas do konsekvencaj kun si mem; ne akceptante la kaŭzon, ili ne povas akcepti la efikojn; el tio, ĉe ili, ekestas antaŭdecidita opinio, kiu faras ilin maltaŭgaj por juste juĝi pri Spiritismo, ĉar ili deiras de la principo pri neado de ĉio nemateria. Rilate al ni, ĉu el tio, ke ni akceptas la efikojn, konsekvencon de la ekzisto de la animo, sekvas, ke ni akceptas ĉiajn faktojn, rigardatajn kiel miraklecajn, ke ni estas la korifeoj de ĉiaj revistoj, adeptoj de ĉiaj utopioj, de ĉiaj sistemaj ekstravagancoj? Oni tre malmulte konus Spiritismon, se oni tiel pensus; sed niaj kontraŭuloj ĝin ne tiel proksime rigardas; la neceso koni tion, pri kio ili parolas, estas la plej bagatela el iliaj zorgoj. Laŭ ili, ĉio mirakleca estas absurda; nu, Spiritismo baziĝas sur miraklecaj faktoj, sekve Spiritismo estas absurda: ĉi tio estas senapelacia juĝo. Ili kredas, ke ili kontraŭstaras nin per senredira argumento, per tio, ke, farinte klerulajn esplorojn pri la konvulsiuloj en Sankta Médard, la kamizardoj en Cévennes, aŭ la religiulinoj en Loudun, ili tie eltrovis evidentajn artifikojn, kiujn neniu ja kontestas; sed ĉu ĉi tiuj faktoj estas la evangelio de Spiritismo? Ĉu la partianoj de Spiritismo iam neis, ke ĉarlatanismo ekspluatis certajn faktojn por sia profito, ke la imagemo kreis tiujn faktojn, ke la fanatikeco ilin forte troigis? Spiritismo ne estas pli solidara kun strangaĵoj, kiujn oni povas fari en ĝia nomo, ol kiel la vera scienco kun la misuzoj de nekleruloj kaj la vera religio kun la ekscesoj de fanatikuloj. Multaj kritikistoj juĝas Spiritismon nur laŭ la ferakont-

oj kaj la popolaj legendoj, kiuj estas fikcioj pri ĝi; sam-an valoron tio havus, se oni juĝus pri la Historio laŭ la historiaj romanoj aŭ la tragedioj.

**12.** Laŭ elementa logiko, por pridiskuti iun aferon, oni devas ĝin koni, ĉar la opinio de kritikanto valoras nur en la okazo, se li parolas, ĝin perfekte konante; nur se tiel estas, lia opinio, eĉ se erara, povas esti pesata; sed kian pezon ĝi havas pri iu objekto, kiun li ja ne konas? La vera kritikanto devas elmontri ne nur erudicion, sed ankaŭ profundan sciadon de tiu afero, kiun li pritraktas, saĝan juĝokapablon kaj elprovitan senpartiecon, alie la unua renkontita muzikistaĉo povus arogi al si la rajton juĝi pri Rossini aŭ ia pentrolernanto rajtus riproĉi Rafaelon.

**13.** Spiritismo do neniel akceptas ĉiajn faktojn, rigardatajn kiel miraklecajn aŭ supernaturajn; kontraŭe, ĝi pruvas la neeblecon de multaj el ili kaj la ridindecon de iaj kredoj, kiuj ĝustadire konsistigas la superstiĉon. Estas vero, ke en tio, kion ĝi akceptas, estas aferoj, kiuj, laŭ nekredantoj, estas absolutaj miraklecaĵoj, alivorte superstiĉo: konsentite; sed ili almenaŭ pridiskutu sole nur tiujn punktojn, ĉar pri la ceteraj estas nenio por diri, kaj ili predikus al konvertitoj (*). Atakante tion, kion ĝi mem refutas, ili elmontras sian nekonadon de la afero kaj iliaj argumentoj falas pro manko de fundamento. Sed, oni diros, ĝis kie iras la kredo de Spiritismo? Legu, observu, kaj vi ĝin ekscios. Ĉian sciencon oni akiras nur kun la tempo kaj per studado; nu, Spiritismo, kiu rilatas al la plej gravaj demandoj de la Filozofio, al ĉiuj branĉoj de la socia ordo; kiu entenas same la homon fizikan, kiel la homon moralan, ĝi estas mem tuta scienco, tuta filozofio, kiu, simile kiel ĉia alia scienco, ne povas esti lernata en iaj kelke da horoj; estus ja infanece vidi la tutan Spiritismon ĉe turniĝanta tablo, kiel

(*) "Prediki al konvertitoj", ŝajnas al ni, internacie komprenebla esprimo; laŭvorta traduko de la franca "prêcher des convertis"; ĝi memorigas la proverbojn n. 462, en la "Proverbaro". — *La Trad.*

vidi la tutan Fizikon ĉe certaj infanaj ludiloj. Por ĉiu ajn, kiu ne volas resti sur la supraĵo, ne horoj, sed mo-natoj, sed jaroj estas necesaj, por la sondado de ĉiuj ĝiaj arkanoj. El tio oni juĝu pri la grado da klereco kaj la valoro de la opinio de homoj, kiuj arogas al si la rajton juĝi, ĉar ili ĉeestis unu aŭ du eksperimentojn, plej ofte kiel distraĵon kaj tempopasigilon. Ili sendube dirus, ke ili ne disponas sufiĉe da tempo por ĝin oferi al ĉi tiu studado: konsentite, nenio ĝin trudas al ili; sed kiam oni ne havas tempon por lerni iun aferon, oni sin ne enmiksu kaj ne parolu pri ĝi, des pli oni ĝin ne juĝu, se oni ne volas esti akuzata kiel ventkapulo; nu, ju pli alta la pozicio de iu inter la scienculoj, des malpli par-doninda li estas, ke li facilanime pritraktas aferon, kiun li ne konas.

**14.** Mi resumas ĉion diritan per jenaj propozicioj:

1-a: Ĉiaj spiritismaj fenomenoj havas kiel princi-pon la ekziston de la animo, ĝian transvivon je la korpo kaj ĝiajn manifestiĝojn.

2-a: Baziĝante sur leĝo de la Naturo, tiuj fenomen-oj havas en si nenion **miraklecan** aŭ **supernaturan**, laŭ la ordinara senco de ĉi tiuj vortoj.

3-a: Multaj faktoj estas rigardataj kiel supernatur-aj nur tial, ĉar oni ne konas ilian kaŭzon; atribuante al ili iun kaŭzon, Spiritismo alkalkulas ilin al la naturaj fenomenoj.

4-a: Inter la faktoj, kvalitigitaj kiel supernaturaj, troviĝas multaj, kies neeblecon Spiritismo pruvas kaj kiujn ĝi envicigas en la kadron de la superstiĉaj kredoj.

5-a: Kvankam rekonante en multaj popolaj kredoj ian fundon de vereco, Spiritismo neniel akceptas la so-lidecon de ĉiaj fantaziaj historioj, kreitaj de la homa imagemo.

6-a: Juĝi Spiritismon laŭ la faktoj, kiujn ĝi ne akceptas, estas elmontri neklerecon kaj tute senvalorigi sian opinion.

7-a: La klarigo de la faktoj, akceptataj de Spiritismo, kaj de iliaj kaŭzoj kaj moralaj sekvoj formas tutan sciencon kaj tutan filozofion, kiuj postulas seriozan, persistan kaj profundan studadon.

8-a: Spiritismo povas rigardi kiel seriozan kritikanton nur tiun homon, kiu ĉion vidis, ĉion studis, ĉion ĝisfunde esploris kun la pacienco kaj persisteco de konscienca observanto; kiu konas la aferon tiel bone, kiel ĝia plej klera adepto; kiu do ĉerpis sian sciadon pri ĝi el fontoj aliaj ol la romanoj de la scienco; tiun, al kiu oni povas kontraŭstarigi **nenian fakton** al li nekonatan, nenian argumenton, pri kiu li neniam antaŭe meditis kaj kiun li refutus ne per simpla neado, sed per aliaj pli kategoriaj argumentoj; tiun, fine, kiu povas de la konstatitaj faktoj montri kaŭzon pli logikan, ol tiu, kiun prezentas Spiritismo. Tia kritikanto ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne elpaŝis.

**15.** En la komenco de ĉi tiu ĉapitro mi eldiris la vorton “miraklo”; mallonga rimarko pri tio ne estus malĝustaloka en ĉi tiu ĉapitro pri miraklecaj aferoj.

Laŭ sia primitiva senco kaj laŭ sia etimologio la vorto “miraklo” signifas **aferon eksterordinaran, aferon okulravantan**, sed, kiel ĉe tiom da aliaj vortoj, ĉi tiu primitiva senco perdiĝis kaj hodiaŭ oni komprenas sub “miraklo” (laŭ la Akademio) iun **agon de la dia povo, kontraŭan al la ordinaraj leĝoj de la Naturo**. Jen efektive ĝia vulgara senco; nur por komparo kaj metafore oni ĝin uzas pri ordinaraj aferoj, kiuj nin miregigas kaj kies kaŭzojn oni ne konas. Tute ekster la kadro de miaj konsideradoj staras la demando, ĉu Dio, ĉe iaj cirkonstancoj, trovis utile nuligi tiujn leĝojn, kiujn Li mem kreis; mia celo estas sole nur pruvi, ke la spiritismaj fenomenoj, kiel ajn eksterordinaraj, neniel nuligas tiujn leĝojn kaj havas karakteron neniel miraklecan aŭ supernaturan. Mirakloj ne estas klarigeblaj; la spiritismaj fenomenoj, kontraŭe, estas klarigataj plej racie; ili estas do ne mirakloj, sed simplaj efikoj, kiuj havas sian pravon de ekzisto en la ĝeneralaj leĝoj. La miraklo havas ankoraŭ unu karakteron, nome ĝi estas eksterkutima kaj

unuopa okazaĵo; nu, se iu okazaĵo refariĝas, por tiel diri, laŭplaĉe kaj per pluraj personoj, ĝi do ne povas esti ia miraklo.

La scienco ĉiutage faras miraklojn antaŭ la okuloj de la nekleruloj: jen kiel, pasintatempe, homoj, kiuj pri ĝi sciadis pli ol la vulgaruloj, estis rigardataj kiel sorĉistoj; kaj ĉar oni tiam kredis, ke ĉia superhoma scio venas de la diablo, tial oni ilin bruligadis. Hodiaŭ, kiam oni estas pli civilizita, oni ilin nur simple enŝlosas en frenezulejoj.

Se, kiel mi diris en la komenco, homo efektive mortinta estus revekita en la vivon per dia ago, tio estus vera miraklo, ĉar kontraŭa al la leĝoj de la Naturo. Sed se tiu homo estas nur ŝajne mortinta, se en li estas ankoraŭ resto el **latenta vivoforto**, kaj la scienco aŭ ia magneta ago sukcesas reanimi lin, tio por homoj kleraj estas natura fenomeno, sed de la malklera vulgarularo tia okazaĵo estas rigardata kiel miraklo: ĝia farinto estos persekutata per superĵetataj ŝtonoj aŭ respektegata, laŭ la karaktero de la homoj. Se en certaj kamparoj iu sciencisto altigus en la aeron elektran kajton kaj faligus fulmon sur arbon, pri tia nova Prometeo oni dirus, ke li havas diablan povon; kaj, preterpase dirite, ŝajnas al mi, ke Prometeo longe antaŭiris Franklinon. Sed tio, ke Josuo haltigis la sunon, aŭ pli bone, la Teron, jen vera miraklo, ĉar nenian magnetiziston mi konas, dotitan per tiel granda forto, ke li farus tian miregindaĵon.

El ĉiaj spiritismaj fenomenoj unu el la plej eksterordinaraj estas senkonteste la senpera skribado, kaj unu el tiuj, kiuj plej senteble pruvas la agadon de la kaŝitaj inteligentoj; sed el tio, ke ĝin kaŭzas kaŝitaj estuloj, ne sekvas, ke ĝi estas pli mirakleca ol ĉiaj aliaj fenomenoj, kaŭzataj de nevideblaj estuloj, ĉar tiuj nevideblaj estuloj, priloĝantaj la Spacon, estas unu el la potencoj de la Naturo, potencoj, kies agado fariĝas senĉese, kiel sur la mondon materian, tiel ankaŭ sur la mondon moralan.

Klarigante al ni, kio estas tia potenco, Spiritismo havigas al ni la ŝolsilon de multego da aferoj antaŭe

neklarigitaj kaj neklarigeblaj per alia rimedo kaj kiuj povis pasintatempe esti rigardataj kiel miregindaĵoj. Same kiel magnetismo, ĝi elmontras leĝon, se ne nekonatan, almenaŭ miskomprenatan, aŭ, pli bone dirite, oni konis la efikojn, ĉar ili okazis en ĉiuj tempoj, sed oni ne konis la leĝon, kaj ĝuste de tio, ke oni ne konis la leĝon, naskiĝis la superstiĉo. Ĉe la konado de tiu leĝo ĉio mirakleca disfumiĝas kaj la fenomenoj enviciĝas inter la naturaj aferoj. Jen kial, estigante la movadon de tablo aŭ farante, ke la forpasintoj skribu, la spiritistoj ne faras pli grandan miraklon, ol kuracisto, kiu revivigas mortanton, aŭ fizikisto, kiu faligas fulmon. Iu, kiu per ĉi tiu scienco pretendus **fari miraklojn**, aŭ ne konus la aferon aŭ estus trompisto.

**16.** La spiritismaj fenomenoj, same kiel la fenomenoj magnetismas, antaŭ ol oni konis ilian kaŭzon, devis esti prenataj por miregindaĵoj; nu, ĉar la skeptikuloj, la spiritfortaj, t.e. tiuj, ĝuantaj la ekskluzivan privilegion de la prudento kaj simpla saĝo, ne kredas ion ebla, ĉar ili ĝin ne komprenas, jen ĉiuj faktoj, rigardataj kiel miraklecaj, fariĝas objekto de ilia mokado; kaj ĉar en la religio ekzistas granda nombro da tiaj okazaĵoj, ili tial ne kredas la religion, kaj de tio ĝis la absoluta nekredemo estas nur unu paŝo. Klarigante la plimulton el tiuj faktoj, Spiritismo montras ilian pravon de ekzisto. Ĝi do helpas al la religio, pruvante la eblecon de iuj faktoj, kiuj, kvankam ili perdis sian karakteron miraklecan, tamen estas ja eksterordinaraj, kaj Dio ne fariĝas malpli granda aŭ malpli potenca pro tio, ke Li ne nuligis Siajn leĝojn. De kiom da trivialaj spritaĵoj estis objekto la leviĝoj de Sankta Kuperteno en la aeron! Nu, la levo de pezaj korpoj estas fakto klarigata de Spiritismo; **mi mem vidis ĝin**, kaj S-ro Home, kiel ankaŭ aliaj personoj, al mi konataj, plurajn fojojn refaris tiun fenomenon, okazigitan de Sankta Kuperteno. Ĉi tiu fenomeno apartenas do al la klaso de la naturaj aferoj.

**17.** Inter tiaspecaj faktoj devas okupi la unuan

lokon la aperaĵoj, ĉar pli oftaj. Tiu en La Salette (*), pri kiu malakordas la opinioj eĉ de klerikuloj, havas nenion eksterordinaran. Kun certeco mi ne povas aserti, ke ĝi okazis, ĉar pri ĝi mi havas nenian pruvon materian, tamen laŭ mi ĝi estas ebla, ĉar mi konas milojn da tiaj **freŝdataj** analogaj faktoj; ĉi tiujn mi kredas, ne nur tial, ke mi konstatis ilian verecon, sed precipe tial, ĉar mi perfekte scias, kiel ili fariĝas. Oni bonvolu legi, post kelke da paĝoj, la teorion, kiun mi elvolvas, pri la aperaĵoj, kaj tiam oni vidos, ke tiu fenomeno estas tiel simpla kaj tiel akceptebla, kiel multego da fizikaj fenomenoj, kiuj aspektas miraklecaj nur pro manko de ŝlosilo, kiu ilin klarigus.

Koncerne tiun personon, kiu sin prezentis en La Salette, tio estas alia afero; lia identeco tute ne estas pruvita; mi konfesas nur tion, ke ia aperaĵo eble montriĝis: ĉio cetera kuŝas ekster mia fako. Pri ĉi tio ĉiu rajtas konservi siajn konvinkojn, kaj pri ĝi Spiritismo tute ne zorgas; mi diras nur, ke la spiritismaj faktoj elmontras al ni novajn leĝojn kaj havigas al ni la ŝlosilon de multego da aferoj, kiuj aspektis supernaturaj; se kelkaj el tiuj, iam rigardataj kiel miraklaj, trovas en Spiritismo logikan klarigon, tio estas ja motivo, ke neniu tro rapidu nei tion, kion li ne komprenas.

Kelkaj kontestas la spiritismajn fenomenojn ĝuste tial, ĉar tiuj fenomenoj ŝajnas al ili deflankiĝi de la komuna leĝo kaj por ili estas neklarigeblaj. Oni starigu tiujn faktojn sur racia bazo, kaj la dubo disfumiĝos. En ĉi tiu jarcento, en kiu neniu kontentiĝas per vortoj, la klarigo estas do forta motivo por konvinkiĝo; tial ni ĉiutage vidas homojn, kiuj atestis nenian fakton, kiuj vidis nek iun tablon turniĝi, nek iun mediumon skribi, sed kiuj tamen estas tiel konvinkitaj kiel mi nur pro tio, ĉar ili legis kaj komprenis. Se ni devus kredi nur tion, kion ni vidas mem, tiam ĝis tre malmulte niaj konvinkoj reduktiĝus.

(*) La Salette-Fallavaux, en la komunumo de Izers, arondismento de Grenoble, Francujo. Tie, laŭ la famo, la Sankta Virgulino, en 1846, aperis al du infanoj. — *La Trad.*

ĈAPITRO III

# PRI LA METODO

**18.** Tre natura kaj tre laŭdinda estas, ĉe ĉiuj adeptoj, la ĉiam vigliginda deziro fari prozelitojn. Celante faciligi tiun ilian klopodon, jen mi proponas min por ĉi tie esplori la vojon, kiu ŝajnas al mi la plej sekura, al tiu celo, por ŝparigi al ili senutilajn penojn.

Mi jam diris, ke Spiritismo estas tuta scienco, tuta filozofio; kiu volas ĝin serioze ekkoni, tiu devas do, antaŭ ĉio, esti preta al serioza studado kaj konvinkiĝi, ke, kiel ĉiun alian sciencon, oni ĝin ne povas lerni ludante. Spiritismo — tion mi jam diris — rilatas al ĉiaj demandoj, interesantaj la homaron; ĝia kampo estas vastega, kaj estas konsilinde rigardi ĝin precipe koncerne ĝiajn konsekvencojn. Ĝia bazo estas sendube la kredo pri la Spiritoj, tamen ĉi tiu kredo ne sufiĉas, por fari spiritiston, same kiel la kredo pri Dio ne sufiĉas, por fari teologon. Ni vidu do, kiel konvenas doni tiun instruon por pli certa konvinko.

La adeptojn ne teruru ĉi tiu vorto — instruo: instruo estas donata ne sole el katedro aŭ el tribuno, sed ankaŭ en simpla konversacio. Ĉiu homo, kiu penas konvinki pri io alian, ĉu per klarigoj, ĉu per provoj, instruas. Kion mi deziras, tio estas, ke lia klopodo fruktu, kaj tial mi opinias, ke mi devas doni kelke da konsiloj, de kiuj povas profiti ankaŭ tiuj, kiuj volas memlerni; ĉiuj tiel ektrovos la vojon, por pli sekure kaj rapide atingi la celon.

**19.** Oni ordinare kredas, ke por konvinki sufiĉas montri faktojn; tio efektive ŝajnas la plej logika procedo, tamen la sperto diras, ke ĝi ne ĉiam estas la plej

bona, ĉar oni ofte vidas homojn, kiujn tute ne konvinkis la plej evidentaj fariĝoj. Al kio oni atribuu ĉi tion? Jen kion mi nun provos klarigi.

En Spiritismo la demando pri la Spiritoj estas afero duaranga kaj konsekvenca, ne la deirpunkto; ĝuste ĉi tie kuŝas la eraro, kiun faras multaj adeptoj kaj kiu ilin ofte malsukcesigas ĉe iuj personoj. Ĉar la Spiritoj estas nenio alia, ol la homaj animoj, tial la efektiva deirpunkto estas la ekzistado de la animo. Nu, kiel iu materialisto povas akcepti, ke vivas estuloj ekster la materia mondo, se li kredas, ke li mem estas nur materio? Kiel do li povas kredi, ke ekzistas Spiritoj ekster li, se li ne kredas, ke ekzistas Spirito en li mem? Oni vane akumulus antaŭ liaj okuloj la plej materialajn pruvojn: li ilin ĉiujn kontestus, ĉar li ne akceptas la principon.

Ĉia metoda instruo devas iri de tio konata al tio nekonata; nu, laŭ la materialisto, tio konata estas la materio: deiru do de la materio kaj, igante lin observi ĉi tiun, antaŭ ĉio penu konvinki lin, ke en li ekzistas io, kio ne obeas la leĝojn de la materio. Per unu vorto: **antaŭ ol fari lin SPIRITISTO, penu fari lin SPIRITUALISTO**; sed tio postulas tute alispecajn faktojn, tute specialan instruon, por kiu estas necesaj aliaj rimedoj; paroli al li pri Spiritoj, antaŭ ol li estos konvinkita, ke li havas animon, tio estas komenci tie, kie oni devus fini, ĉar li ja ne povas akcepti la konkludon, ne akceptinte la premisojn. Sekve, antaŭ ol peni konvinki nekredemulon, eĉ per faktoj, estas konsilinde certiĝi pri lia opinio koncerne la animon, t.e. ĉu li kredas ĝian ekziston, ĝian vivon kaj individuecon post la morto de la korpo; se lia respondo estas nea, tiam paroli al li pri Spiritoj estus perdo de tempo. Jen la regulo; mi ne diras, ke ĝi estas senescepta, sed, en ĉi tiu okazo, probable ekzistas alia kaŭzo, kiu faras lin malpli rifuzema.

**20.** Inter la materialistoj estas necese distingi du klasojn: al la unua ni alkalkulas tiujn **sistemajn**; ĉe tiuj nenia dubo ekzistas, ekzistas la neado absoluta, prirezonata laŭ ilia maniero; en iliaj okuloj la homo estas nura maŝino, funkcianta tiel longe, kiel ĝi estas muntita,

difektiĝanta kaj restiganta, post la morto, nur la skeleton. Feliĉe ili estas tre malmultenombraj kaj nenie formas malkaŝe konfesitan skolon. Mi ne bezonas insisti pri la bedaŭrindaj efikoj, kiuj por la socio rezultus el la disvastiĝo de tia doktrino; pri ĉi tiu temo mi elvolvis sufiĉe longan studon en "La Libro de la Spiritoj" (n-ro 147 kaj § III de la Konkludo).

Dirante, ke la dubo de nekredemuloj ĉesas ĉe racia klarigo, mi kompreneble esceptis la materialistojn malmolnukajn, tiujn, kiuj neas ĉian povon kaj ĉian inteligentan principon ekster la materio; la plimulto el tiaj obstinas pro fiero kaj pensas, ke ilia memestimo estas tie implikita, kaj persistas ĉe sia teniĝo; ili persistas spite ĉiujn kontraŭajn pruvojn, ĉar ili ne volas kuŝi sub ies ŝuo. Kun tiaj homoj oni povas fari nenion; oni eĉ ne lasu sin trompi de la falsa mieno de sincereco de tiuj, kiuj diras: igu min vidi, kaj mi kredos. Aliaj estas pli nekaŝemaj kaj diras rekte: eĉ se mi vidus, mi ne kredus.

**21.** La dua klaso da materialistoj, cetere la multe pli grandnombra, ĉar la vera materialismo estas kontraŭnatura sento, enhavas tiujn, kiuj estas materialistoj pro indiferenteco kaj, oni povus diri, **manke de io pli bona**; ili tiaj ne estas intence kaj nenion deziras pli bonan, ol kredi, ĉar la necerteco estas por ili turmento. Ili portas en si ian nedifinitan aspiron al la estonteco, sed tiu estonteco estis al ili prezentita kun tiaj koloroj, kiajn ilia prudento ne povas akcepti; el tio la dubo kaj, sekve de la dubo, la nekredemo. Ĉe ili la nekredemo ne estas do ia sistemo; tial, se oni prezentos al ili ion racian, ili ĝin avide akceptos; tiuj povas do nin kompreni, ĉar ili ja troviĝas pli proksime al ni, ol kiel ili mem sendube pensus.

Al tiuj de la unua klaso parolu nek pri revelacio, nek pri anĝeloj, nek pri la paradizo: ili vin ne komprenus; sed, lokinte vin sur ilia tereno, unue pruvu al ili, ke la leĝoj de la Fiziologio ne kapablas klarigi ĉion: la resto venos poste.

Alie okazas, kiam la nekredemo ne estas antaŭdecidita, ĉar tiam la kredo ne estas tute nula; ĝi estas ia

ĝermo dormanta, sufokita de fiherboj, sed kiun iu fajrero povas revigligi; ia blindulo, al kiu oni rehavigas la vidadon; ia ŝiprompiĝulo, al kiu oni ĵetas tabulon de savo.

**22.** Krom la ĝustasencaj materialistoj ekzistas tria klaso da nekredemuloj, kiuj, kvankam spiritualistoj, almenaŭ laŭnome, ne estas malpli rifuzemaj: tio estas la **malvolontaj nekredemuloj**. Tiujn ĉagrenus kredi, ĉar tio rompus ilian kvietecon ĉe la materiaj ĝuoj; ili timas vidi en tio la kondamnon de ilia ambicio, de ilia egoismo kaj de la homaj vantaĵoj, kiujn ili faras siaj ekstremaj plezuroj; ili fermas siajn okulojn, por ne vidi kaj ŝtopas al si la orelojn, por ne aŭdi. Tiujn oni povas nur bedaŭri.

**23.** Nur por ĝin ne preterlasi, mi nur menciu kvaran klason, kiun mi nomas klaso de la **prointeresaj** aŭ **malsinceraj nekredemuloj**. Ĉi tiuj tre bone scias, kiel ili devas rilati al Spiritismo, tamen ili ĝin malkaŝe kondamnas pro persona intereso. Pri ili nenio estas por diri kaj kun ili nenio estas por fari. Se la pura materialisto eraras, li havas por si, kiel senkulpigon, almenaŭ la bonfidon; oni povas lin reprudentigi, pruvante, ke li eraras. Ĉe tiuj, apartenantaj al ĉi tiu kvara klaso, ekzistas ia antaŭdecido, kontraŭ kiu ĉiaj argumentoj neniiĝas; nur la tempo malfermos al ili la okulojn kaj montros, eble je ilia propra kosto, kie estis iliaj interesoj, ĉar, ne povante malhelpi la disvastiĝon de la vero, ili estos trenataj de la torento kaj, kune kun ili, la interesoj, pri kiuj ili pensis, ke ili tiujn gardas.

**24.** Krom ĉi tiuj diversaj klasoj da oponantoj ekzistas ankoraŭ multego da nuancoj, ekz-e: la **nekredemuloj pro timemo**: tiuj kuraĝiĝos, kiam ili vidos, ke en ĝi ne estas danĝero; la **nekredemuloj pro religia skrupulo**: klariga studo instruos ilin, ke Spiritismo staras sur la fundamentaj bazoj de la religio kaj respektas ĉiajn kredojn; ke unu el ĝiaj efikoj estas tio, ke ĝi inokulas religiajn sentojn al tiuj, kiuj ilin ne havas, kaj ilin fortikigas ĉe tiuj, kies tiaj sentoj ŝanceliĝas; poste,

la **nekredemuloj pro fiero, pro kontraŭemo, pro nezorgemo, pro ventanimeco** k.m.a.

**25.** Mi ne povas preterlasi unu klason, kiun mi nomu klaso de la **nekredemuloj pro disreviĝoj**. Ĝi enkalkulas tiujn homojn, kiuj transiris de tro granda fido al nekredemo, ĉar ili spertis elreviĝojn; tiam, perdinte la kuraĝon, ili ĉion forlasis, ĉion forĵetis. Ili similas iun, kiu neus la bonfidon, ĉar li estis trompita. Ankaŭ tio estas rezulto de nekompleta studado de Spiritismo kaj de manko de sperto. Oni ordinare estas mistifikata de la Spiritoj tial, ĉar oni demandas ilin pri aferoj, pri kiuj ili ne devas aŭ ne povas respondi, aŭ tial, ke oni ne sufiĉe konas la aferon, por distingi inter vero kaj trompo. Cetere multaj homoj vidas en Spiritismo nur ian novan divenrimedon kaj imagas al si, ke la Spiritoj estas kreitaj, por antaŭdiri la sorton de ĉiu; nu, la frivolaj kaj mokemaj Spiritoj ne preterlasas okazon, por sin amuzi pri tiaj homoj: ili antaŭdiras al la junulinoj edzojn, al ambiciulo honorojn, heredaĵojn, kaŝitajn trezorojn, k.t.p. El tio rezultas malagrablaj elreviĝoj, kontraŭ kiuj serioza kaj prudenta homo ĉiam scias sin antaŭgardi.

**26.** Tre multenombra klaso, ja la plej multenombra el ĉiuj, sed kiu ne povus esti alkalkulita al tiu de la oponantoj, estas la klaso de la **hezitantoj**; tiuj ordinare estas principe **spiritualistoj**. La plej multaj havas neprecizan intuicion pri la spiritismaj ideoj, aspiron al io, kion ili ne povas difini; iliaj pensoj bezonas nur kunordigon kaj formuladon. Spiritismo estas por tiuj homoj kvazaŭ lumstrio: ĝi estas lumo, kiu forbalaas nebulegon; tial ili ĝin akceptas avide, ĉar ĝi liberigas ilin el la angoroj de necerteco.

**27.** Nun ĵetante rigardon sur la plurajn klasojn da **kredantoj**, ni vidos unue la **preterkonsciajn spiritistojn**: tio estas ĝustadire variaĵo aŭ nuanco de la antaŭa klaso. Neniam antaŭe aŭdinte ion pri la Spiritisma Doktrino, ili tamen havas la denaskan senton de la grandaj principoj, el ĝi elfluantaj, kaj tiu sento travidiĝas en iuj pecoj de iliaj skribaĵoj kaj paroladoj en tia grado, ke, ilin legante aŭ aŭdante, oni pensus, ke ili estas tute inicitaj.

Multe da tiaj ekzemploj sin trovas ĉe religiaj kaj laikaj verkistoj, ĉe poetoj, oratoroj, moralistoj, antikvaj kaj modernaj filozofoj.

**28.** El inter tiuj, kiujn konvinkis rekta studado, estas distingeblaj jenaj klasoj:

1-a, tiuj, kiuj sole nur kredas la manifestiĝojn. Laŭ ili Spiritismo estas simple observa scienco, ia amaso da pli aŭ malpli kuriozaj faktoj. Tiujn mi nomas **eksperimentantaj spiritistoj**;

2-a, tiuj, kiuj vidas en Spiritismo ion alian, ol faktojn; ili komprenas ties filozofian flankon, admiras la moralon, el tio rezultantan, sed ĉi tiun ili ne praktikas. La influo de tiu moralo sur ilian karakteron estas sensignifa aŭ nula; siajn kutimojn ili neniel ŝanĝas, kaj eĉ unu plezuron ili ne rezignus: avarulo estas plue avara, fierulo estas ĉiam tro memfida; enviulo kaj ĵaluzulo, daŭre malamikemaj. La kristanan karitaton ili rigardas nur kiel ian belan maksimon: tiuj estas la **neperfektaj spiritistoj**;

3-a, tiuj, kiuj ne kontentiĝas per admirado de la spiritisma moralo, sed ĝin praktikas kaj akceptas ĉiujn ĝiajn konsekvencojn. Konvinkitaj, ke la surtera ekzistado estas momenta elprovado, ili penas profiti tiun mallongan tempon, por iri la vojon de progreso, la solan, kiu povas altigi ilin en la hierarkio de la mondo de la Spiritoj, klopodante por fari bonon al ĉiuj kaj bridi siajn malbonajn inklinojn; la rilatoj kun ili estas ĉiam solidaj, ĉar ilia konvinkiteco tenas ilin for de ĉia penso pri malbono; karitato estas en ĉio la regulo de ilia konduto. Tio estas la **veraj spiritistoj**, aŭ pli bone, la **kristanaj spiritistoj**;

4-a, fine, la **tro ardaj spiritistoj**. La homa genro estus perfekta, se ĝi ĉiam prenus la bonan flankon de la aferoj. Troigo estas, en ĉio, malutila; en Spiritismo ĝi havigas tro blindan kaj ofte infanecan fidon pri la aferoj de la nevidebla mondo kaj igas akcepti tro facile kaj sen kontrolo tion, kies absurdecon aŭ neeblecon la meditado kaj ekzamenado pruvus; sed la entuziasmo ne

pensas, sed blindigas. Ĉi tiu klaso da adeptoj estas pli malutila ol utila al la afero Spiritismo; ili estas tiuj malplej taŭgaj por konvinki, ĉar oni prave malkonfidas ilian juĝon; ili bonfide estas trompataj, ĉu de mistifikemaj Spiritoj, ĉu de homoj, kiuj celas ekspluati ilian kredemecon. Ne tute malbone estus, se ili solaj devus suferi la sekvojn de sia kredemeco; la plej malbona estas, ke ili pretervole havigas armilojn al la nekredemuloj, kiuj ja serĉas al si okazon prefere por mokado, ol por konvinkiĝo, kaj kiuj nepre imputas al ĉiuj la ridindecon de kelkaj. Tio sendube estas nek justa, nek racia; sed kiel sciate, la kontraŭuloj de Spiritismo rekonas kiel bonkvalitan nur sian propran prudenton, kaj profunde koni tion, pri kio ili parolas, estas afero, kiu ilin malplej zorgigas.

**29.** La konvinkrimedoj estas treege diversaj laŭ la individuoj: kio konvinkas unujn, tio neniom efikas sur aliajn; A konvinkiĝis pro iaj materialaj manifestiĝoj, B dank'al inteligentaj komunikaĵoj, la plej multaj per rezonado. Oni povas eĉ diri, ke, laŭ la plimulto el la homoj, kiuj sin ne preparis per rezonado, la materialaj fenomenoj malmulte pezas. Ju pli eksterordinaraj estas tiaj fenomenoj kaj ju pli malproksimaj ili estas de la konataj leĝoj, des pli da kontraŭstaro ili renkontas, kaj tio pro tre simpla kaŭzo, nome, ĉar oni nature inklinas dubi ĉion, kio ne ricevas racian sankcion. Tion ĉiu rigardas el sia vidpunkto kaj klarigas al si laŭ sia maniero: la materialisto vidas en ĝi pure fizikan kaŭzon aŭ ĵonglaĵon; la neklerulo kaj superstiĉulo, kaŭzon diablan aŭ supernaturan, dum antaŭa klarigo havas kiel efikon disbati antaŭjuĝojn kaj montri, se ne la realecon, almenaŭ la eblecon de la koncernata afero: ĉi tiun oni komprenas, antaŭ ol vidi; nu, se estas konfesita la ebleco, estas do atingitaj tri kvaronoj de la konvinkiteco.

**30.** Ĉu estas utile peni konvinki obstinan nekredemulon? Mi jam diris, ke tio dependas de la kaŭzoj kaj de la speco de lia nekredemeco; la insista klopodo por lin konvinki ofte igas lin kredi sian personan gravecon kaj estas por li motivo por ankoraŭ pli forta obstinado.

Se iu konvinkiĝis nek per rezonado, nek per faktoj, tiel estas tial, ke li ankoraŭ devas trapasi la provon de nekredemo: oni transdonu al la Providenco la zorgon alporti al li pli favorajn cirkonstancojn; multaj sopiras nur al lumo, ke oni ne perdu sian tempon, klopodante ĉe homoj, kiuj ĝin forpuŝas de si. Turnu vin do al la homoj bonvolemaj, kies nombro estas pli granda, ol kiom oni pensas, kaj ilia ekzemplo, multobliĝante, venkos pli da baroj ol paroloj. La vera spiritisto neniam sin detenas fari bonon: faciligi afliktitajn korojn, doni konsolojn, kvietigi malesperojn, fari moralajn reformojn — jen lia misio; ankaŭ en tio li trovas sian efektivan plezuron. Spiritismo ŝvebas en la aero; ĝi disvastiĝas dank'al la forto mem de la okazaĵoj kaj ĉar ĝi feliĉigas siajn adeptojn. Kiam ĝiaj sistemaj kontraŭuloj aŭdos ĝin resonanta ĉirkaŭ ilin, eĉ ĉe iliaj amikoj, ili ekkomprenos sian izolitecon kaj estos devigitaj aŭ eksilenti aŭ kapitulaci.

**31.** Por alpreni, en la instruado de Spiritismo, procedojn similajn al tiuj uzataj en la ordinaraj sciencoj, oni devus pririgardi ĉiajn fenomenojn, kiuj povas fariĝi, ekde la plej simplaj ĝis la plej kompleksaj; nu, ĉi tio estas ne ebla, ĉar oni ne povus fari kurson de eksperimenta Spiritismo tiel same, kiel oni instruas Fizikon aŭ Ĥemion. En la natursciencoj oni agas sur la senvivan materion, kiun oni manipulas laŭplaĉe, kaj oni preskaŭ ĉiam estas certa, ke oni povas reguligi la rezultatojn de la eksperimentoj; en Spiritismo oni traktas kun liberiĝintaj inteligentoj, kiuj sur ĉiu paŝo montras al ni, ke ili ne estas submetitaj al niaj kapricoj: oni devas do observi, atendi la rezultatojn kaj ĉi tiujn preterpase ekkapti. Tial mi laŭte kaj bone aŭdeble diras, ke **ĉiu ajn, kiu flatus al si, ke li laŭvole rikoltas rezultatojn sur ĉi tiu kampo, tute certe estas nescianto aŭ trompisto**; jen do, kial la **vera** Spiritismo neniel faras el si ian spektaklon kaj neniam suriros iun foiran scenejon. Eĉ iom nelogike estas supozi, ke Spiritoj venus paradi kaj sin submeti al esplorado kvazaŭ kuriozaĵoj. La fenomenoj povas do aŭ ne fariĝi, kiam bezone, aŭ montriĝi tute alie, ol kiel oni ilin deziras. Mi aldiru, ke por ilin

ricevi, estas necesaj homoj, dotitaj per specialaj kapabloj, kaj ke tiuj kapabloj estas senlime diversaj laŭ la individua talento; nu, ĉar treege malofte unu sama persono havas ĉiajn kapablojn, jen tial ankoraŭ unu malfacilaĵo, ĉar oni devus ĉiam havi sub la mano efektivan kolekton da mediumoj, kio estas apenaŭ atingebla.

La rimedo, por antaŭforigi ĉi tiun malbonaĵon, estas tre simpla, nome komenci de la teorio; tie ĉiaj fenomenoj estas ekzamenataj; ili estas klarigataj, oni povas kontroli ilian verecon, kompreni ilian eblecon, ekscii la kondiĉojn, ĉe kiuj ili povas okazi, kaj la barojn, kiuj ilin eble trafos. Kia ajn do la ordo, laŭ kiu la cirkonstancoj ilin okazigas, ili enhavas nenion, kio povus alporti surprizon. Ĉi tiu vojo prezentas ankoraŭ unu bonaĵon, t.e. ŝparigi al la eksperimentanto multegon da elreviĝoj; antaŭgardinte sin kontraŭ la malfacilaĵoj, li povas tenadi sin atenta kaj evitigi al si spertiĝon je sia propra kosto.

Estus por mi malfacile diri, kiom da personoj, de kiam mi ekokupis min je Spiritismo, venis al mi, kaj inter ĉi tiuj kiom da ili mi vidis ĉiam ankoraŭ indiferentaj aŭ nekredantaj ĉe la plej evidentaj faktoj kaj poste konvinkitaj nur per rezonata klarigo; kiom da aliaj la rezonado antaŭinklinigis al la konvinkiĝo; fine, kiom da ankoraŭ aliaj konvinkiĝis, vidinte nenion, sed nur tial ke ili komprenis. Mi do parolas el sperto kaj ankaŭ el sperto mi diras, ke la plej bona metodo por instruado de Spiritismo estas turni sin al la prudento antaŭ ol al la okuloj. Ĝi estas la metodo, kiun mi sekvas en miaj lecionoj kaj pri kiu mi devas nur gratuli min (*).

**32.** Ankoraŭ unu bonaĵon havas la antaŭe farita studado de la teorio: ĝi tuj montras la grandecon de la celo kaj la amplekson de ĉi tiu scienco; kiu enpaŝas en la aferon, vidante tablon turniĝantan aŭ frapantan, tiu inklinas pli al mokado, ĉar li apenaŭ imagas al si, ke el tablo povus elŝpruci ia doktrino, kiu revirtigus la hom-

---

(*) Mia teoria kaj praktika instruado estas ĉiam senpaga. — *Noto de la Aŭtoro*.

aron. Mi ĉiam rimarkis, ke tiuj, kiuj kredas, antaŭ ol esti vidintaj, nur tial, ke ili legis kaj komprenis, tute ne estas supraĵemaj, sed kontraŭe ili estas homoj, kiuj la plej profunde meditis pri la afero. Atendante prefere la fundon ol la formon, ili rigardas kiel la ĉefan punkton la parton filozofian, dum la ĝustadiraj fenomenoj estas en iliaj okuloj akcesoraĵo. Ili diras, ke eĉ se tiuj fenomenoj ne ekzistus, tamen restus filozofio, kiu sola solvas problemojn ĝis hodiaŭ nesolveblajn, kiu sola donas pri la pasinteco kaj la estonteco de la homo la plej racionalan teorion; nu, ili preferas doktrinon, kiu klarigas, ol tiujn, kiuj klarigas nenion aŭ klarigas malbone.

Kiu ajn ĝuste pesas la aferojn, tiu tre bone komprenas, ke oni povus ne konsideri la manifestiĝojn, sen kiuj la Doktrino ne malpli firme starus; la manifestiĝoj ĝin plisolidigas, ĝin konfirmas, sed ne estas ĝia esenca bazo; serioza observanto ilin ne repuŝas, kontraŭe, sed atendas la favorajn cirkonstancojn, kiuj permesos al li ilin ĉeesti. La pruvo de ĉi tiu mia asertaĵo estas tio, ke antaŭ ol aŭdi pri manifestiĝoj, multe da homoj jam havis intuicion pri ĉi tiu Doktrino, kiu sole nur havigis al iliaj ideoj korpon, kunligitecon.

**33.** Cetere ne estus ĝuste diri, ke tiuj, kiuj komencas de la teorio, ne havas objektojn por praktika observado; kontraŭe, ili havas tiajn, kiuj en iliaj okuloj eĉ devas valori pli multe ol tiuj, kiujn oni povus aperigi antaŭ ili, nome la multenombrajn okazojn de **spontanea manifestiĝo**, pri kiuj mi parolos en la sekvantaj ĉapitroj. Malmultaj personoj ne konas tiajn faktojn, almenaŭ laŭ la famo; multaj vidis kelke da ili, sed apenaŭ atentis. La teorio havas la efikon ilin klarigi. Kiam apogitaj sur nerefuteblaj atestoj, tiuj faktoj havas grandan gravecon, ĉar tiam oni ne povas supozi iajn antaŭaranĝojn aŭ sekretan interkonsenton. Eĉ se ne ekzistus la okazigitaj fenomenoj, la fenomenoj spontaneaj tamen plue fariĝus, kaj estus ja multe, se Spiritismo simple donus pri ili racionalan solvon. Tial la plimulto el la homoj, kiuj antaŭe legis, rememoras tion legitan, vidante tiujn faktojn, kiuj en iliaj okuloj estas jesigo de la teorio.

**34.** Tiu strange erarus pri mia maniero vidi la aferojn, kiu pensus, ke mi konsilas forĵeti la faktojn: mi venis al la teorio ĝuste per la faktoj. Estas vero, ke ĝis tio estis por mi necesaj plurjara konstanta laborado kaj miloj da observoj; sed, ĉar la faktoj al mi servis kaj ĉiutage servas, mi tial estus nekonsekvenca kun mi mem, se mi kontestus ilian gravecon precipe nun, kiam mi verkas libron, destinitan por ilin diskonigi. Mi diras nur tion, ke, sen rezonado, ili ne sufiĉas por konvinko, kaj ke antaŭe donita klarigo, forviŝante antaŭjuĝojn kaj montrante, ke ili neniel kontraŭas la racion, **inklinigas** la personon ilin akcepti. Des pli vera ĉi tio estas, ĉar el dek absolutaj novuloj, kiuj ĉeestus eksperimentoseancon, eĉ la plej kontentigan por la adeptoj, naŭ elirus el tie ne konvinkite, kaj kelkaj eĉ malpli kredante ol antaŭe, ĉar la eksperimentoj ne respondis al ilia atendo. Tute alie estas kun tiuj, kiuj povas kompreni la aferon per antaŭa teoria ekkonado; por tiuj la teorio estas kontrolrimedo, kaj nenio ilin surprizas, eĉ iu malsukceso, ĉar ili ja scias, ĉe kiaj kondiĉoj la faktoj okazas kaj ke de ĉi tiuj oni devas peti nur tion, kion ili povas doni. La antaŭa kompreno de la faktoj preparas do tiujn personojn por klarigi al si ĉiajn anomaliojn kaj ankaŭ ebligas al ili kapti multegon da detalaĵoj, da ofte tre delikataj nuancoj, kiuj por ili estas konvinkrimedoj, sed kiujn nescianto ne vidas. Jen la motivoj, kiuj devigas min akcepti en miajn eksperimentoseancojn nur tiujn personojn, kiuj havas preparajn konojn sufiĉajn, por kompreni, kio tie fariĝas; tiel mi agas, ĉar la aliaj tie perdus sian tempon aŭ igus nin perdi la nian.

**35.** Al tiuj, kiuj volus havigi al si tiujn preparajn konojn, legante miajn verkojn, mi konsilas jenan ordon:

1-a: **Kio estas Spiritismo**? Ĉi tiu broŝuro, el nur ĉirkaŭ cent paĝoj, estas resuma raporto pri la principoj de la Spiritisma Doktrino, ĝeneraltrajta ekrigardo, kiu ebligas al la leganto ĉirkaŭpreni la tutaĵon en malvasta kadro. Per malmulte da vortoj oni tie vidas la celon kaj oni povas juĝi pri la amplekso de tiu doktrino. Oni en ĝi ankaŭ trovas respondon al la precipaj demandoj aŭ

kontraŭparoloj, kiujn la novuloj nature inklinas prezenti. Tiu unua legado, kiu postulas nur malmulte da tempo, estas enkonduko, kiu faciligas pli profundan studadon.

2-a: **La Libro de la Spiritoj**. Ĝi enhavas la tutan doktrinon, diktitan de la Spiritoj mem, kun la tuta filozofio kaj ĉiuj moralaj sekvoj de tiu doktrino; tio estas la malkaŝo de la destino de la homo, la ekkonado de la naturo de la Spiritoj kaj de la misteroj de la transtomba vivo. Legante ĝin, oni komprenas, ke Spiritismo havas celon seriozan, ne estas ia frivola tempopasigilo.

3-a: **La Libro de la Mediumoj**. Ĝi estas destinita por la direktado sur la praktika tereno de la manifestiĝoj, konigante la plej taŭgajn rimedojn por la komunikiĝado kun la Spiritoj; ĝi estas gvidilo ne nur de mediumoj, sed ankaŭ de elvokantoj, kaj la komplemento de **La Libro de la Spiritoj**.

4-a: La **Revue Spirite**. Ĝi estas diverskonsista kolekto da faktoj, da teoriaj klarigoj kaj da unuopaj pecoj, kiuj kompletigas tion diritan en la du laste nomitaj verkoj, kaj iamaniere aplikado de ĉi tiuj libroj. Ĝia legado povas esti samtempa kun tiuj verkoj, tamen ĝi estus pli profita kaj komprenebla precipe, post kiam oni legis **La Libron de la Spiritoj**.

Jen, kio min koncernas. Kiu volas koni ĉion pri ĉiu ajn scienco, tiu nepre devas legi pri tiu objekto ĉion, aŭ almenaŭ ĝiajn ĉefajn punktojn, kaj ne limigi sin je unu sola aŭtoro; li eĉ devas legi la por kaj la kontraŭ, mallaŭdojn, same kiel laŭdojn, kaj plene sciiĝi pri la diversaj sistemoj, por povi juĝi per komparado. En ĉi tiu rilato, mi rekomendas aŭ malaprobas nenian verkon, ĉar mi tute ne volas influi la opinion, kiun pri ĝi oni povus formi al si. Alportinte mian ŝtonon por la konstruaĵo, mi prenas al mi lokon en la vicoj de la batalantoj. Ne estas mia rolo esti unutempe juĝanto kaj interesato, kaj mi ne havas la ridindan pretendon, ke nur mi disverŝus la lumon. La leganton koncernas apartigi bonan de malbona, veran de malvera.

ĈAPITRO IV

# PRI LA SISTEMOJ

**36**. Kiam la strangaj spiritismaj fenomenoj komencis fariĝi, aŭ pli bone, denove aperis en la lasta tempo, la unua sento, kiun ili naskis, estis dubo pri ilia realeco mem, kaj pli forta dubo pri ilia kaŭzo. Kiam ilian verecon pruvis nekontesteblaj atestoj kaj provoj, kiujn ĉiu povis fari mem, montriĝis, ke ĉiu interpretadis ilin laŭ sia maniero, laŭ siaj ideoj personaj, siaj kredoj aŭ siaj antaŭjuĝoj; el tio elkoviĝis diversaj sistemoj, kiujn atenta observado devis redukti al ilia ĝusta valoro.

La antagonistoj de Spiritismo opiniis, ke ili trovis ĉe tiu malsameco de juĝoj argumenton, nome, dirante, ke la spiritistoj mem ne akordas inter si. Ĉi tio estis ja mizera motivo, se nur oni pripensas, ke la paŝoj de ĉia apenaŭ naskiĝinta scienco estas nepre ŝanceliĝaj, ĝis la tempo ebligos kolekti kaj kunordigi la faktojn, sur kiuj ia opinio povos firme sidi; laŭgrade kiel la faktoj kompletigas unu alian kaj estas pli bone observataj, la tro fruaj ideoj disfumiĝas kaj unueco stariĝas, almenaŭ pri la fundamentaj punktoj, se ne en ĉiuj detaloj. Tio estis ankaŭ kun Spiritismo: ĝi ne povis eviti la ĝeneralan leĝon kaj, pro sia propra naturo, eĉ devis, pli ol ĉia alia afero, esti kampo taŭga por diverseco de interpretoj. Oni eĉ povas en ĉi tiu rilato diri, ke ĝi progresis pli rapide, ol aliaj pli malnovaj sciencoj, ekzemple Medicino, kies plej grandaj scienculoj ankoraŭ hodiaŭ disharmonias inter si.

**37.** Laŭ metoda ordo, por sekvi la gradan iradon de la ideoj, konvenas loki en la fronto de la sistemoj tiujn, kiujn oni povas nomi **sistemoj de neado**, t. e. tiujn

de la kontraŭuloj de Spiritismo. Mi jam refutis ties kontraŭparolojn en la Enkonduko kaj en la Konkludo de **La Libro de la Spiritoj** kaj ankaŭ en verketo, titolita **Kio estas Spiritismo?** Estus do superflue refari ĉi tie mian argumentadon; mi nur rememorigos per iaj kelke da vortoj la motivojn, sur kiuj ili sin apogas.

La spiritismaj fenomenoj prezentas du specojn: la efikojn fizikajn kaj la efikojn inteligentajn. Ĉar la kontraŭuloj ne konsentas la ekziston de Spiritoj, pro tio, ke ili akceptas nenion ekster la materio, oni tial komprenas, ke ili neas la inteligentajn efikojn. Koncerne la fizikajn efikojn, ili tiujn komentarias el sia punkto de vidado, kaj iliaj argumentoj povas esti resume entenataj en la sekvantaj kvar sistemoj.

**38. Sistemo de ĉarlatanismo**. El la antagonistoj de Spiritismo multaj atribuas tiujn efikojn al artifikado, ĉar kelkaj el tiuj fenomenoj povis esti imititaj. Laŭ ĉi tiu supozo ĉiuj spiritistoj estus mistifikatoj kaj ĉiuj mediumoj estus mistifikistoj, kaj neniom valorus la socia rango, la karaktero, la klereco kaj la digno de la homoj. Se ĝi meritus ian respondon, mi dirus, ke ankaŭ iuj fenomenoj de la Fiziko estas imitataj de prestidigitatoroj, kio neniel estas pruvo kontraŭ la vera scienco. Cetere ekzistas personoj, kies karaktero fortenas ĉian suspekton pri friponaĵoj, kaj oni ja devus esti tute sentakta kaj malĝentila, ke oni dirus al ili en la vizaĝon, ke ili kunkulpas kun ĉarlatanoj.

En tre respektinda salono, al pretende bonedukita sinjoro, kiu permesis al si fari similan rimarkon, la domomastrino diris: “Sinjoro, ĉar vi ne estas kontenta, via mono tial estos redonita al vi ĉe la pordo”; kaj per gesto ŝi komprenigis al li, kion plej bonan li faru. Ĉu el tio oni asertu, ke neniam okazis misuzo? Por tion kredi, oni devus akcepti, ke la homoj estas perfektaj. Oni misuzas ĉion, eĉ la plej sanktajn aferojn; kial do oni ne misuzus Spiritismon? Sed la eventuala misuzado de iu afero ne rajtigas antaŭjuĝon kontraŭ tiu afero mem; la kontrolo, kiun oni ja povas ricevi, de la bonfido de la homoj, kuŝas en la motivoj, kiuj diktas ilian kon-

duton. Kie ekspluato ne estas, tie ĉarlatanismo havas nenion por fari.

**39. Sistemo de frenezo.** Kelkaj, pro komplezemo, bonvolas formeti la suspekton pri friponado kaj asertas, ke kiuj ne trompas, tiuj estas trompataj mem; ĝi estas tio sama, kiel alnomi tiujn personojn stultuloj. Kiam la nekredantoj agas ne tiel laŭetikete, ili tute simple diras, ke la kredantoj estas fenezuloj, kaj tiel ili senceremonie asignas al si la privilegion de la komuna saĝo. Tio estas la granda argumento de homoj, kiuj havas nenian fortan motivon por kontraŭmeti. Cetere ĉi tiu atakprocedo fariĝis ridinda pro sia banaleco kaj ne indas perdon de tempo, ke oni ĝin refutus. La spiritistoj ja ĉe ĝi ne konsterniĝas; ili brave tenas sian decidon kaj konsoliĝas ĉe la penso, ke ili havas kiel malfeliĉajn samsortanojn multe da personoj, kies merito ne povus esti kontestata.

Oni devas efektive konfesi, ke tia frenezo — se ia frenezo ja ekzistas — havas tre kuriozan karakteron, nome, ke ĝi trafas prefere la kleran klason, en kiu Spiritismo ĝis hodiaŭ enkalkulas la grandegan plimulton de siaj adeptoj. Se inter la adeptoj montriĝas iaj strangaĵoj, tio ne estas kontraŭ ĉi tiu Doktrino atesto pli peza, ol kontraŭ la religio, la muziko kaj la matematikoj iliaj praktikantoj, kiuj freneziĝis pro ili. Ĉiaj ideoj ekhavis fanatikulojn, kaj oni devus esti dotita per tre malsubtila prudento, por miksi la troigon de iu afero kun la afero mem.

Por pli ampleksaj klarigoj pri ĉi tiu objekto, mi rekomendas al la leganto mian broŝuron **Kio estas Spiritismo?** kaj **La Libron de la Spiritoj** (Enkonduko, § XV).

**40. Sistemo de halucino.** Ankoraŭ unu opinio, ja malpli ofenda, ĉar ĝi havas ian sciencan koloron, konsistas en tio, atribui ĉi tiujn fenomenojn al senseraro; la observanto estus do tre bonfidema homo, li nur kredus, ke li vidas ion, kion li ja ne vidas. Kiam li vidas tablon leviĝi kaj sin teni en la aero senapoge, efektive la tablo ne elmoviĝis: li vidas ĝin en la aero dank'al ia miraĝo aŭ refrakto simila al tiu, kiu vidigas astron aŭ objekton en akvo ekster ĝia reala pozicio. Ĉi tio rigor-

sence estus ebla, sed ĉiuj, kiuj ĉeestis tiun fenomenon, povis konstati, ke la tablo apartiĝis de la planko, pasante sub ĝi, pendanta en la aero, kio ŝajnas malfacile farabla, se tiu apartiĝo ne estus okazinta. Krom tio la tablo, ĉe sia falo, ofte rompiĝis: ĉu oni dirus, ke ankaŭ ĉi tio estas nenio alia ol optikefekto?

Bone konata fiziologia kaŭzo sendube povas igi iun pensi, ke li vidas turniĝanta objekton, kiu ja ne moviĝas, aŭ ke li turniĝas mem, kvankam li troviĝas senmove; sed kiam pluraj homoj ĉirkaŭ tablo estas trenataj de tiel rapida movo, ke ili apenaŭ povas sekvi ĝin, eĉ iafoje estas renversataj, ĉu oni dirus, ke ili ĉiuj estas atakitaj de kapturniĝo, simile kiel ebriulo pensas, ke li vidas sian domon preterpasanta antaŭ li?

**41. Sistemo de la krakanta muskolo.** Se oni tiel interpretadis la vidadon, ne alie povus esti rilate la aŭdadon; tamen, kiam tuta kunsidantaro aŭdas frapojn, tiam ne estus prudente atribui ilin al iluzio. Mi memkomprenble flanken metas ĉian penson pri artifiko kaj supozas, ke atenta observado konstatis, ke ilin naskis nenia okaza aŭ materiala kaŭzo.

Estas vero, ke klera kuracisto donis pri tiu fenomeno klarigon, laŭ lia opinio, nediskuteblan (*). "Ĝia kaŭzo — li diris — kuŝas en la volaj aŭ pretervolaj kuntiriĝoj de la tendeno de la peronea muskolo." Pri ĉi tiu temo li enprofundiĝas en la plej etajn detalojn anatomiajn, por elmontri, per kia meĥanismo tiu tendeno povas fari tiujn bruegojn, imiti ruladon de tamburoj kaj eĉ ludi ritmajn ariojn; el tio li konkludas, ke tiuj homoj, kiuj pensas, ke ili aŭdas frapojn en tablo, estas trompataj aŭ de mistifiko aŭ de iluzio.

Ĉi tiu fakto, per si mem, ne estas novaĵo; malfeliĉe por la aŭtoro de tiu pretendita eltrovo, lia teorio ne pov-

(*) Tio estis S-ro Jobert (el Lamballe). Per ĝustaj vortoj mi diru, ke tiun eltrovon faris S-ro Schiff; S-ro Jobert elvolvis ĝiajn sekvojn antaŭ la Akademio de Medicino, por doni la finofaran baton al la frapantaj Spiritoj. En la Revue Spirite, numero de Junio 1859, troviĝas ĉiuj detaloj de la klarigo de S-ro Jobert. — *Noto de la Aŭtoro*.

as klarigi ĉiujn okazojn. Mi diru antaŭ ĉio, ke tiuj, kiuj havas la eksterordinaran kapablon laŭvole krakigi sian peronean muskolon aŭ iun alian muskolon, aŭ per ĉi tiu rimedo ludi ariojn, estas escepte renkontataj individuoj, dum tiujn, kiuj krakigas tablojn, oni renkontas ofte, sed ne ĉiuj ĉi lastaj, se nur ekzistas unu tia, havas la unue diritan kapablon. Due, la klera doktoro forgesis klarigi, kiel la muskola krakado de homo senmova kaj troviĝanta malproksime de tablo povas en ĉi tiu naski vibrojn senteblajn por ĉiu, kiu ĝin ektuŝas; kiel tiu brueto povas, laŭ la volo de la ĉeestantoj, refariĝi ĉe la diversaj partoj de la tablo, ĉe aliaj mebloj, sur la muroj, sur la plafono k. a; kiel, fine, la agado de tiu muskolo povas atingi tablon, kiun neniu tuŝas, kaj movi ĝin. Cetere tiu klarigo — se nur ĝi estus klarigo — malkonfirmus nur la fenomenon de la frapoj, sed ne povas koncerni ĉiujn aliajn manierojn de komunikiĝado. Ni do el tio konkludu, ke li juĝis nenion vidinte, aŭ vidinte ne ĉion kaj ne klare. Estas ĉiam bedaŭrinde, ke scienculoj tro rapidas doni pri io, kion ili ne konas, klarigojn, kiujn la faktoj povas neigi. Ilia klereco mem devus fari ilin des pli singardemaj pri siaj juĝoj, ke ĝi forŝovas antaŭ ili la limojn de la nekonataĵo.

**42. Sistemo de la fizikaj kaŭzoj.** Ĉi tie ni eliras el la sistemo de la absoluta neado. Ĉe la konstato de la realeco de la fenomenoj, la unua ideo, kiu venis al la spirito de iliaj rekonintoj, estis atribui tiujn movojn al magnetismo, al elektro, aŭ al la agado de ia fluidaĵo, unuvorte, al iu absolute fizika kaj materia kaŭzo. Ĉi tiu opinio havis en si nenion neracian kaj estus venkinta, se la fenomeno sin limigus al pure mekanikaj efikoj. Ŝajnas ja, ke unu cirkonstanco ĝin konfirmis, nome, en iuj okazoj, la pligrandiĝo de la aganta forto, rekte proporcia al la nombro de la ĉeestantoj; ĉiu el ĉi tiuj povus do esti rigardata kiel ia homa elektra pilo.

Kio karakterizas veran teorion, mi jam diris, tio estas, ke ĝi povas motivi ĉion; sed, se eĉ unu sola fakto ĝin kontraŭdiras, tiam ĝi estas malvera, nekompleta aŭ tro absoluta. Nu, ĝuste tio baldaŭ montriĝis pri ĉi tiu

teorio. Tiuj movoj kaj tiuj frapoj donis inteligentajn signojn, obeante ies volon kaj respondante al ies penso: ili devis do havi kaŭzon inteligentan. Se do la efiko jam ne estis pure fizika, la kaŭzo, pro tio mem, devis sekve esti alia; tial la sistemo de la **ekskluziva** agado de ia materia efikanto estis forlasita kaj hodiaŭ estas subtenata nur de homoj, kiuj juĝas apriore kaj nenion vidinte. La ĉefa punkto estas do konstati la inteligentan agadon, kaj pri tio povas konvinkiĝi ĉiu, kiu volas doni al si la penon fari observojn.

**43. Sistemo de la reradiado.** Se do oni konfesas ekzistanta la inteligentan agadon, restis ekscii, kio estas la fonto de tiu inteligento. Oni supozis, ke ĝi povas esti la inteligento de la mediumo aŭ de la ĉeestantoj, kiu reradius simile al la lumo kaj la sonondoj. Ĉi tio estis ja ebla: nur la sperto povos diri sian lastan vorton. Sed antaŭ ĉio ni rimarku, ke ĉi tiu sistemo jam tute deklinîĝas de la pure materialisma ideo; efektive, por ke la inteligento de la ĉeestantoj povu rebildiĝi per nerekta vojo, oni ja devus akcepti, ke en la homo ekzistas ia principo ekster lia organismo.

Se la manifestiĝanta penso estus ĉiam la penso de la ĉeestantoj, estus do konfirmita la teorio de la reradiado; nu, eĉ reduktita al tia grandeco, ĉu tiu fenomeno ne estus plej interesa? Ĉu tio, ke la penso reradius de inerta korpo kaj montriĝus per movo kaj bruo, ne estus io tre rimarkinda? Ĉu ĉi tie ne ekzistus io, kio ekscitus la scivolemon de la scienculoj? Kial do ili ignoris tiun teorion, ili, kiuj sin korpe kaj anime fordonas al la esplorado de nerva fibro?

Nur la sperto sola, mi diras, povos pravigi aŭ malpravigi ĉi tiun teorion, kaj la sperto ĝin malpravigis: la sperto sur ĉiu paŝo kaj per plej kategoriaj faktoj pruvas, ke la penso ne nur povas esti fremda al la penso de la ĉeestantoj, sed eĉ ofte estas tute kontraŭa al ties penso; ke tiu penso neigas ĉiajn antaŭjuĝojn kaj vanigas ĉiajn antaŭkalkulojn: efektive, se mi pensas pri "blanka", sed oni respondas "nigra", estas por mi malfacile akcepti, ke tiu respondo venis de mi mem.

Por subteni ĉi tiun teorion, oni sin apogas sur okazoj de identeco de la eldirita penso kun la penso de la

ĉeestantoj; sed kion ĝi pruvas alian ol tion, ke la ĉeestantoj povas pensi tiel, kiel la komunikiĝanta inteligento? Nenie estas dirite, ke la opinioj de ambaŭ flankoj devas ĉiam malakordi inter si. Se, dum konversacio, via kunparolanto eldirus penson analogan al via, ĉu vi dirus, ke ĝi venis de via menso? Sufiĉas kelke da ja konstatitaj kontraŭaj ekzemploj, por pruvi, ke ĉi tiu teorio ne povas esti absoluta. Efektive, kiel klarigi, per la reradiado de la penso, skribaĵon faritan de homoj, ne povoscientaj skribi; respondojn kun la plej alta filozofia graveco, ricevitajn per neinstruitaj homoj; respondojn pri demandoj mensaj aŭ faritaj en lingvo nekonata al la mediumo, kaj multegon da aliaj faktoj, kiuj ne povas allasi dubon pri la nedependeco de la manifestiĝanta inteligento? Kontraŭa opinio povas esti nur montro de nesufiĉa observado.

La ĉeeston de fremda inteligento pruvas morale la naturo de la respondoj kaj materiale la senpera skribado, t. e. tiu skribaĵo ricevita propramove, sen plumo aŭ krajono, sen ia kontakto, kaj spite ĉiujn antaŭzorgojn kontraŭ ĉia artifiko. La intelekta karaktero de ĉi tiu fenomeno ne estus dubebla, sekve tie fariĝas io krom ia fluidaĵa agado. Eĉ plue: la spontaneeco de la manifestita penso for de ĉia atendo, for de ĉiu proponita demando, ne allasas, ke oni ĉi tie vidu ian reradiadon de la penso de la ĉeestantoj.

La sistemo de la reradiado iufoje ĝislimas la malĝentilecon; kiam, en kunsido de honestaj homoj, neatendite elsaltas iu komunikaĵo, plej profunde indigniga pro sia trivialeco, tiam estus tre bele imputi ĝin al iu el la ĉeestantoj, kaj estus probable, ke ĉiu el ili rapidus ĝin forpuŝi de si. (Vd. **La Libron de la Spiritoj**, Enkonduko, § XVI.)

**44. Sistemo de la kolektiva animo.** Ĉi tiu estas variaĵo de la antaŭa. Laŭ ĉi tiu sistemo, manifestiĝas nur la animo de la mediumo, sed, identiĝinte kun tiu de pluraj aliaj vivantoj, ĉu apudaj, ĉu foraj, ĝi formas **ko-**

**lektivan tutaĵon**, kie kunekzistas la kapabloj, la inteligenteco kaj la scioj de ĉiu. Kvankam titolita **La Lumo** (*), la broŝuro, en kiu estas elvolvita ĉi tiu teorio, ŝajnis al mi tre malklare redaktita; mi konfesas, ke mi ĝin apenaŭ komprenis, kaj mi ĝin mencias kiel simplan informon. Ĝi estas cetere, kiel multe da aliaj, persona opinio, kiu ricevis malmulte da prozelitoj. Per la nomo **Émah Tirpsé** la aŭtoro nomas la kolektivan estaĵon, kiun li imagis al si. Kiel epigrafon li prenis jenan sentencon: **Nenio estas nesciata, kio neniam estu sciata**. Ĉi tiu aserto estas evidente erara, ĉar ja ekzistas multego da aferoj, kiujn la homo ne povas kaj ne devas scii; tre aroganta iu estus, kiu pretendus penetri ĉiujn sekretojn de Dio.

**45. Sistemo somnambulisma.** Ĉi tiu ricevis pli da adeptoj kaj eĉ ankoraŭ havas kelke da partianoj. Kiel la antaŭa, tiel ĝi akceptas, ke ĉiuj inteligentaj komunikaĵoj originas el la animo aŭ spirito de la mediumo; sed, por klarigi, kiel la mediumo estas kapabla pritrakti aferojn ekster la kampo de liaj scioj, anstataŭ imagi en li ian opan animon, ĝi atribuas tiun kapablon al momenta superekscitiĝo de la mensaj fakultoj, al ia somnambula aŭ ekstaza stato, kiu ekzaltas kaj kreskigas lian inteligenton. Oni ja ne povas, ĉe iuj okazoj, nei la influon de ĉi tiu kaŭzo, sed, kiu vidis, kiel procedas la plimulto el la mediumoj, tiu konvinkiĝas, ke ĝi ne povas solvi ĉiujn faktojn kaj ke ĝi estas ne la regulo, sed la escepto. Oni povus pensi, ke tiel estas, se la mediumo ĉiam mienus kavazaŭ ia inspirito aŭ ekstazulo, kion cetere li povus tute bone ŝajnigi, se li volus ludi komedion; sed kiel supozi ian inspiron tiam, kiam la mediumo skribas kvazaŭ maŝine, eĉ la plej malmulte ne konsciante, kion li ricevas, sen ia emocio, ne zorgante, kion li faras, rigardante aliloken, ridante kaj konversaciante pri tio kaj alia? Ia

(*) Komunio. La lumo de la fenomeno de la Spirito. Parolantaj tabloj, somnambuloj, mediumoj, mirakloj. Spirita magnetismo: potenco de la praktikado de la fido. De *Émah Tirpsé*, kolektiva animo, skribanta pere de tabuleto. Bruselo, 1858, ĉe Devroye. — *Noto de la Aŭtoro*.

superekscitiĝo de la ideoj estas komprenebla, sed oni ja ne komprenas, ke ĝi povas igi skribi iun, kiu ne povoscias skribi, kaj des malpli tiam, kiam la komunikaĵoj estas farataj per frapoj aŭ pere de tabuleto aŭ korbo. Tra ĉi tiu verko ni vidos la parton, kiu devas koncerni la influon de la ideoj de la mediumo; tamen la faktoj, en kiuj la fremda inteligento elmontriĝas per nekontesteblaj signoj, estas tiel multenombraj kaj tiel evidentaj, ke ili povas allasi nenian dubon en ĉi tiu rilato. La eraro de la plej multaj sistemoj, aperintaj en la unua tempo de Spiritismo, kuŝas en tio, ke ili ĉerpis ĝeneralajn konkludojn el kelke da unuopaj faktoj.

**46. Sistemo pesimisma, diabla aŭ demona.** Ni ĉi tie enpaŝas en novan klason da ideoj. Konstatinte la partoprenon de ia fremda inteligento, oni devus nun ekscii la naturon de tiu inteligento. La plej simpla rimedo sendube estis pridemandi ĝin, sed iuj personoj opiniis, ke tia procedo ne prezentos sufiĉan garantion, kaj decidis vidi ĉe ĉiuj manifestaĵoj sole nur ian diablan verkon: en iliaj okuloj nur la diablo aŭ la demonoj povas komunikiĝi. Kvankam ĉi tiu sistemo hodiaŭ trovas malfortan resonon, tamen ĝi momente ĝuis kelkan fidatecon ĝuste dank'al la karaktero de tiuj, kiuj klopodis por ĝia venko. Mi tamen rimarkigu, ke la partianoj de la demona sistemo ne devas esti alkalkulataj al la kontraŭuloj de Spiritismo, tute kontraŭe. Ĉu demonoj aŭ anĝeloj estas la komunikiĝantaj estuloj, ili ja estas ĉiam senkorpaj estuloj; nu, konsenti la manifestiĝon de la demonoj estas en ĉiu okazo konsenti la eblecon de komunikiĝo kun la nevidebla mondo aŭ almenaŭ kun ia parto de ĉi tiu mondo.

La kredo, kiel ajn neracia, ke nur la demonoj komunikiĝas, povis ne ŝajni neebla tiam, kiam oni rigardadis la Spiritojn kiel estulojn kreitajn ekster la homaro; sed, de kiam oni scias, ke la Spiritoj estas nenio alia ol la animoj de vivintaj homoj, ĝi perdis sian tutan prestiĝon kaj, oni eĉ povus diri, sian tutan verŝajnecon, ĉar el ĝia vereco sekvus, ke ĉiuj tiuj animoj estas demonoj, ĉu de patro, de filo aŭ de amiko, kaj ke ni mem, mortinte,

fariĝos demonoj, doktrino ne tre flata kaj apenaŭ konsola por multaj homoj. Tre malfacile estus konvinki patrinon, ke ŝia kara infano, kiun al ŝi forrabis la morto kaj kiu nun venas elmontri al ŝi sian amon kaj memecon, estas ia satelito de Satano. Estas ja vero, ke inter la Spiritoj ekzistas kelkaj forte malicaj kaj ne pli meritaj, ol la tiel nomataj **demonoj**, pro tre simpla kaŭzo, nome, ke ekzistas tre malbonaj homoj kaj tiujn la morto ne tuj ŝanĝas en malpli perversajn. La demando kuŝas en tio, scii, ĉu nur ili povas komunikiĝi kun ni. Al tiuj, kiuj tiel pensas, mi metas jenajn demandojn:

1-a: Ĉu ekzistas bonaj kaj malbonaj Spiritoj?

2-a: Ĉu Dio estas pli potenca, ol la malbonaj Spiritoj, aŭ, se vi ilin tiel volas nomi, la demonoj?

3-a: Aserti, ke nur la malbonaj Spiritoj komunikiĝas, kuntrenas la konsekvencon, ke la bonaj tion ne povas fari. Se tiel estas, unu el ambaŭ: ĉi tio okazas aŭ laŭ la volo, aŭ kontraŭ la volo de Dio; se kontraŭ Lia volo, la malbonaj Spiritoj estas do pli potencaj ol Li; se laŭ Lia volo, kial do, laŭ Sia boneco, Li ne permesus al la bonaj komunikiĝi, por kontraŭpezi la influon de tiuj aliaj?

4-a: Kian pruvon vi povas prezenti de tio, ke la bonaj Spiritoj ne povas komunikiĝi?

5-a: Kiam oni kontraŭmetas al vi la saĝecon de kelkaj komunikaĵoj, vi rebatas dirante, ke la demono surmetas ĉiajn maskojn, por pli efike logi. Ni ja scias, ke ekzistas hipokritaj Spiritoj, kiuj ŝmiras sian parolon per surtavolaĵo da saĝeco; sed ĉu vi konsentas, ke la senklereco povus falsi la veran klerecon, kaj malica naturo povus artifike imiti la veran virton, lasante malkaŝiĝi nenion, kio povus elmontri la trompon?

6-a: Se nur la demono komunikiĝas, kial do, estante malamiko de Dio kaj de la homoj, li rekomendas al iuj preĝi al Dio, submetiĝi al Ties volo, senmurmure traelporti la ĉagrenojn de la vivo, ambicii nek honor-

aĵojn nek riĉaĵojn, praktikadi karitaton kaj ĉiujn maksimojn de la Kristo, unuvorte: fari ĉion necesan, por disbati la potencon de li mem? Se tiajn konsilojn donas ja la demono, estas do konfesende, ke, kiel ajn ruza, li estas tre mallerta, ke li liveras armilojn kontraŭ si mem (*).

7-a: Se, kiel ja vere, la Spiritoj komunikiĝas kun ni, Dio do ĝin permesas; ĉu antaŭ bonaj kaj malbonaj komunikaĵoj ne estas pli logike konsenti, ke Dio permesas la unujn, por nin elprovi, kaj la aliajn, por nin admoni al bono?

8-a: Kia vi opinius patron, kiu lasus sian infanon sub la potenco de malvirtigaj ekzemploj kaj konsiloj, kiu forigus de li kaj malpermesus al li vidi tiujn personojn, kiuj povus forklini lin de malbono? Ĉu oni permesus al si pensi, ke Dio, kiu estas la Boneco mem, farus malpli por Siaj infanoj, ol farus iu bona patro ĉe la homoj?

9-a: La Eklezio rekonas kiel aŭtentikajn iajn manifestiĝojn de la Sankta Virgulino kaj de aliaj sanktuloj, ĉe aperaĵoj, vizioj, parolaj komunikaĵoj k. a.: ĉu tiu ĉi kredo ne kontraŭdiras la doktrinon pri la ekskluziva komunikiĝo de la demonoj?

Mi pensas, ke iuj personoj konfesis ĉi tiun teorion bonfide, sed mi pensas ankaŭ, ke pluraj tiel agis nur por tio, por deteni aliajn okupi sin pri tiaj aferoj, dank'al la malbonaj komunikaĵoj, kiujn oni riskas ricevi. Dirante, ke nur la diablo manifestiĝas, ili intencis dissemi teruron, simile kiel oni diras al infano: "Ne tuŝu tion,

(*) Ĉi tiu demando estas pritraktita en *La Libro de la Spiritoj* (§ 128 k. sekv.), sed rilate al ĉi tiu temo, kiel ankaŭ al ĉio, kio koncernas la religian parton, mi rekomendas la broŝuron titolitan: *Letero de katoliko pri Spiritismo*, de D-ro Grand, ekskonsulo de Franclando (ĉe Ledoyer; oktavo; prezo 1 fr.), kaj ankaŭ tiun, kiun mi estas publikigonta sub la titolo: LA KONTRAŬDIRANTOJ DE SPIRITISMO *el la vidpunkto de la religio, de la scienco kaj de la materialismo.* — *Noto de la Aŭtoro.*

ĉar ĝi brulvundas!”. La intenco povas esti laŭdinda, sed la celo ne estas trafita, ĉar la sola malpermeso ekscitas la scivolemon kaj la timo al la diablo ja detenas tre malmulte da personoj: oni volas vidi lin, almenaŭ por ekscii, kiel li aspektas, kaj oni ja miregas ĉe la konstato, ke li ne estas tiel malbela, kiel oni lin prezentas al si.

Ĉu oni ne povus trovi ankoraŭ unu motivon por tiu teorio, privilegiinta la diablon? Kelkaj homoj opinias malprava ĉiun, kiu ne dividas ilian pensmanieron; nu, ĉu tiuj, kiuj asertas, ke ĉiuj komunikaĵoj estas verko de la demono, ne estus al tio pelataj de la timo, ke la Spiritoj ne akordos kun ili pri ĉiuj punktoj, precipe pri tiuj punktoj, rilatantaj pli al la interesoj de ĉi tiu mondo, ol al la interesoj de la transtomba? Ne povante nei la faktojn, ili volis ĉi tiujn prezenti per timegiga bildo, sed ĉi tiu rimedo ne estis baro pli efika ol la ceteraj. Kiam la moktimo montriĝas senpova, tiam oni rezignacie lasu pasi la aferojn.

Muzulmano, kiu aŭdus Spiriton, parolantan kontraŭ iuj leĝoj de la Korano, certe pensus, ke tio estas malbona Spirito; same estus kun judo koncerne iajn formalaĵojn de la leĝo de Moseo. Inter la katolikoj mi aŭdis de unu, ke la komunikiĝanta Spirito ne povis ne esti la **diablo**, ĉar tiu permesis al si opinii alie ol li pri la materia povo de la papo, kvankam entute tiu Spirito predikis nur karitaton, toleremon, amon al la proksimulo kaj rezignon pri la aferoj de ĉi tiu mondo, kiuj ĉiuj estas maksimoj, instruitaj de la Kristo.

Ĉar la Spiritoj estas neniaj aliaj estuloj, ol la animoj de la homoj, kaj ĉar la homoj ne estas perfektaj, tial ekzistas ankaŭ neperfektaj Spiritoj, kies karaktero elmontriĝas en iliaj komunikaĵoj. Ĝi estas nekontestebla veraĵo, ke inter ili sin trovas malicaj, ruzaj, treege hipokritaj, kontraŭ kiuj oni devas sin garde tenadi; tamen, ĉar oni en la mondo renkontas maliculojn, ne tial oni foriĝus de ĉia societo. Dio donis al ni prudenton kaj saĝon, por taksi kiel la homojn, tiel ankaŭ la Spiritojn. La plej bona rimedo sin antaŭgardi kontraŭ la malbonaĵoj, kiujn povas prezenti la praktikado de Spiritismo, estas ne malpermesi, sed igi kompreni. Imaga timo im-

presas nur por momento kaj ne ĉiujn trafas; la realeco, klare pruvita, estas de ĉiuj komprenata.

**47. Sistemo optimisma.** Tute aliaj ol tiuj, kiuj vidas en ĉi tiuj fenomenoj nur la agadon de la demonoj, estas tiuj, kiuj vidis nur la agadon de la bonaj Spiritoj: ili supozis, ke, liberiĝinte el la materio, la animo jam havas antaŭ si nenian vualon, kaj ke ĝi certe posedas la plej plenan sciadon kaj la plej altan saĝon. Ilia blinda fido al tiu absoluta supereco de la estuloj de la nevidebla mondo estis ĉe multaj homoj fonto de ne malmulte da elreviĝoj; tiuj per sia propra kostopago lernis malfidi certajn Spiritojn, tiel same kiel certajn homojn.

**48. Sistemo unuspirita.** Variaĵo de la optimisma sistemo estas la kredo, ke komunikiĝas kun la homoj nur unu Spirito kaj ke tiu sola estas la Kristo, la protektanto de la Tero. Ĉe komunikaĵoj de plej fia trivialeco, de indigniga malĝentileco, stampita per malbonvolo kaj malico, estus profanado kaj senpieco supozi, ke ili povas veni de la Spirito de bono en ĝia plej alta grado. Se la homoj, tion kredantaj, estus ĉiam ricevintaj nur senriproĉajn komunikaĵojn, oni ja komprenus ilian iluzion; sed la plimulto konfesas, ke ili ricevis kelkajn tre malbonajn, kion ili klarigas dirante, ke tio estas provo, al kiu la bona Spirito ilin submetas, diktante al ili absurdaĵojn. Tiel do, dum unuj atribuas ĉiujn komunikaĵojn al la diablo, kiu povas paroli saĝe, por tenti, aliaj pensas, ke nur Jesuo manifestiĝas kaj ke li povas diri malbonajn aferojn, por elprovi la homojn. Inter ĉi tiuj du tiel interkontraŭaj opinioj, kiu decidos? la simpla saĝo kaj la sperto. Mi diras, ke la sperto, ĉar estas ja ne eble, ke la konfesantoj de tiel ekskluzivaj ideoj ĉion vidis kaj bone vidis.

Kiam oni kontraŭstarigas al ili la okazojn de identeco, kiuj atestas la ĉeeston de parencoj, amikoj aŭ konatoj per la manifestiĝoj skribaj, vidaj aŭ aliaj, tiam ili respondas, ke tio estas ĉiam la sama Spirito, nome la diablo laŭ unuj, la Kristo laŭ aliaj, kiu prenas sur sin ĉiajn formojn; sed ili ne diras, kial la ceteraj Spiritoj ne povas komunikiĝi kaj por kio la Spirito de Vero

venas trompi nin, prezentante sin sub ŝajna formo, erarigi kompatindan patrinon, false kredigante al ŝi, ke li estas ŝia priplorata infano. La prudento ja rifuzas akcepti, ke la plej pura Spirito inter ĉiuj malaltiĝus al la ludado de simila komedio. Cetere, ĉu nei la eblecon de ĉiu alia komunikiĝo ne estus senigi Spiritismon je tio, kion ĝi havas plej mildan, nome la konsoladon de la afliktitoj? Ni diru do tute simple, ke tia sistemo estas kontraŭracia kaj ne povas elteni seriozan ekzamenon.

**49. Sistemo multespirita.** Ĉiuj sistemoj, kiujn ni ĝis ĉi tie trarigardis, ne esceptinte tiujn kun nea senco, baziĝas sur kelkaj sed nekompletaj aŭ misinterpretitaj observoj. Se iu domo estas ruĝa sur unu flanko kaj blanka sur la dua, kiu vidis nur unu ĝian flankon, tiu diras, ke ĝi estas ruĝa, kaj alia, ke ĝi estas blanka: ambaŭ pravas kaj malpravas; sed kiu vidis la domon de ĉiu ĝia flanko, tiu diras, ke ĝi estas ruĝa kaj blanka, kaj nur tiu pravas. Tio sama estas kun la opinio, kiun oni faras al si pri Spiritismo: ĝi povas esti vera en kelkaj rilatoj, kaj malvera, se oni ĝeneraligas ion, kio estas nur parta, se oni prenas kiel regulon ion, kio estas nur escepto, kiel tuton ion, kio estas nur parto. Tial mi diras, ke kiu volas serioze studi ĉi tiun sciencon, tiu devas observadi multe kaj longatempe: nur la tempo ebligos al li kapti la detalaĵojn, rimarki la delikatajn nuancojn, esplori multegon da karakterizaj faktoj, kiuj estos por li lumstrioj; sed se li restos sur la supraĵo, tiam li riskas fari tro fruan, sekve eraran juĝon.

Jen la ĝeneralaj sekvoj, deduktitaj el kompleta observado kaj nun konsistigantaj la kredon, se tiel diri, de ĉiuj spiritistoj, ĉar la limigaj sistemoj estas simplaj unuopaj opinioj.

1-a: La spiritismajn fenomenojn okazigas eksterkorpaj inteligentoj aŭ, per aliaj vortoj, Spiritoj.

2-a: La Spiritoj konsistigas la nevideblan mondon; ili estas ĉie; ili okupas la senfinan spacon; ĉirkaŭ ni ĉiam staras kelkaj, kun kiuj ni kontaktas.

3-a: La Spiritoj senĉese agadas kiel sur la fizikan, tiel sur la moralan mondon, kaj estas unu el la potencoj de la Naturo.

4-a: La Spiritoj estas ne apartaj estuloj inter la Kreitaĵaro, sed la animoj de tiuj, vivintaj sur la Tero

aŭ en aliaj mondoj kaj demetintaj sian korpan envolvaĵon; el ĉi tio sekvas, ke la animoj de la homoj estas enkarniĝintaj Spiritoj kaj ke ni, mortinte, fariĝas Spiritoj.

5-a: Ekzistas Spiritoj kun ĉiuj gradoj da boneco kaj maliceco, da klereco kaj senklereco.

6-a: Super ili ĉiuj regas la leĝo de progreso kaj ĉiuj povas atingi la perfektecon, sed, havante liberan volon, ili tial ĝin atingas post pli aŭ malpli longa tempo, laŭ siaj penoj kaj sia volo.

7-a: Ili estas feliĉaj aŭ malfeliĉaj laŭ la bono aŭ malbono, kiun ili faris dum sia enkorpa vivo kaj la grado da progreso, kiun ili atingis. La absoluta, senmiksa feliĉeco estas ekskluziva destinitaĵo de tiuj Spiritoj, venintaj al la plej supera grado da perfekteco.

8-a: Ĉiuj Spiritoj, en oportunaj cirkonstancoj, povas manifestiĝi al la homoj; la nombro de tiuj, kiuj povas komunikiĝi, estas nedifinita.

9-a: La Spiritoj komunikiĝas pere de mediumoj, kiuj servas al ili kiel iloj kaj interpretantoj.

10-a: Oni rekonas la superecon aŭ malsuperecon de la Spiritoj laŭ ilia parolo; la bonaj konsilas nur bonon kaj parolas nur por nia utilo: ĉio ĉe ili atestas noblecon; la malbonaj trompas kaj ĉiuj iliaj vortoj portas la stampon de neperfekteco kaj senklereco.

La diversaj ŝtupoj, kiujn la Spiritoj trairas, estas montritaj en la **Spirita hierarkio** (**La Libro de la Spiritoj**, Dua parto, Ĉap. I, § 100). La studado de tiu klasifiko estas nepre necesa, por ke oni prijuĝu la naturon de la manifestiĝantaj Spiritoj, iliajn bonajn kaj malbonajn kvalitojn.

**50. Sistemo de la materia animo.** Ĉi tiu konsistas nur en aparta opinio pri la plej profunda naturo de la animo. Laŭ ĉi tiu opinio la animo kaj la perispirito ne diferencas unu de la dua, aŭ pli bone, la perispirito estas la animo mem, grade puriĝanta per serio da transmigradoj, simile kiel la alkoholo puriĝadas per sinsekvaj

distiladoj, dum la Spiritisma Doktrino rigardas la perispiriton kiel nuran fluidaĵan envolvaĵon de la animo aŭ de la Spirito. Ĉar la perispirito estas materio, kvankam tre etereca, tial la animo havus naturon materian, pli aŭ malpli fluidecan, laŭ la grado de sia puriĝo.

Ĉi tiu sistemo neigas neniun el la fundamentaj principoj de la Spiritisma Doktrino, ĉar ĝi neniom ŝanĝas la destinon de la animo; la kondiĉoj de ties estonta feliĉeco estas ĉiam ankoraŭ la samaj; ĉar animo kaj perispirito formas unuaĵon sub la nomo Spirito, simile kiel ĝermo kaj perispermo estigas tutaĵon, nomatan frukto, tial la demando resume konsistas en tio, konsideri la tutaĵon homogena, anstataŭ kunmetita el du apartaj elementoj.

Kiel oni vidas, ĉi tio estas bagatela afero, kaj mi ĝin ne estus tuŝinta, se mi ne scius pri homoj inklinaj vidi novan skolon en tio, kio en la fino estas simpla interpreto de vortoj. Ĉi tiu opinio, cetere reganta en tre malvasta rondo, eĉ se ĝi estus plivastiĝinta, ne prezentus inter la spiritistoj skismon pli grandan, ol inter la fizikistoj la du teorioj pri la propagado de la lumo, ĉu per emisio aŭ ondado. Kiuj volus pro tia infaneca demando fari apartan grupon, tiuj nur pro tio montrus, ke ili atribuas pli grandan gravecon al akcesoraĵo, ol al ĉefaĵo, kaj ke ili estas pelataj al malpaco inter si de Spiritoj, kiuj ne povas esti bonaj, ĉar ja la bonaj Spiritoj neniam enblovas galhumoron aŭ malamikecon. Mi tial admonas ĉiujn verajn spiritistojn gardi sin kontraŭ tiaj sugestoj kaj al iaj detaloj ne doni pli da graveco, ol kiom ili meritas: la esenca afero estas la fundo.

Mi tamen pensas, ke mi devas diri per kelke da vortoj, sur kio baziĝas la opinio de tiuj, kiuj distingas inter la animo kaj la perispirito. Ĝi havas kiel fundamenton la instruadon de Spiritoj, kiuj neniam malakordis en ĉi tiu rilato; mi parolas pri la kleraj Spiritoj, ĉar ekzistas Spiritoj, kiuj ne scias pli, kaj eĉ scias malpli, ol la homoj, dum la kontraŭa teorio estas homa koncepto. Ne mi elpensis aŭ supozis la ekziston de la perispirito, por klarigi tiujn fenomenojn; tiun ekziston konigis al mi la Spiritoj kaj ĝin al mi konfirmis mia observado

(**La Libro de la Spiritoj**, § 93). Subtenas ĝin ankaŭ la studado de la sensacoj ĉe la Spiritoj (**La Libro de la Spiritoj**, § 257) kaj precipe la fenomeno de palpeblaj aperaĵoj, kiu kuntrenus, laŭ la nomita opinio, la solidiĝon kaj poste la diseriĝon de la partoj, konsistigantaj la animon, kaj sekve ties eldetruon. Estas necese, krom tio, akcepti, ke tiu materio, kiu povas trafi niajn sentumojn, estas mem la intelekta principo, kio estas ne pli racia, ol intermiksi la korpon kun la animo aŭ la veston kun la korpo. Koncerne la naturon mem de la animo, ĝin ni ja ne konas. La aserton, ke la animo estas **nemateria**, oni komprenu ne laŭ la absoluta, sed laŭ la relativa senco, ĉar la absoluta nematerieco estus la nenio; nu, la animo, aŭ Spirito, estas ja io. Per tia kvalitigo oni volas diri, ke ĝia naturo estas tiel rafinita, ke ĝi prezentas nenion analogan kun tio, kion ni nomas materio, kaj tial en niaj okuloj ĝi estas nemateria (**La Libro de la Spiritoj**, §§ 23 kaj 82).

**51.** Jen la respondo, kiun donis unu Spirito pri ĉi tiu temo:

“Tio, kion unuj nomas **perispirito**, estas tio sama, kion aliaj nomas “fluidaĵa materia envolvaĵo”. Por ke oni min pli logike komprenu, mi diru, ke en tiu fluidaĵo kuŝas la perfektiĝado de la sentumoj, la pliampleksiĝo de la vidado kaj de la ideoj; mi ĉi tie parolas pri la altklasaj Spiritoj. Al la malsuperaj Spiritoj la surteraj fluidaĵoj estas ankoraŭ absolute esence propraj, sekve, kiel vi vidas, la perispirito estas materio; el tio venas la turmentoj de malsato, de malvarmo k. a., turmentoj, kiuj ne povas trafi la Superajn Spiritojn, ĉar la surteraj fluidaĵoj troviĝas plipurigitaj ĉirkaŭ la pensado, t. e. ĉirkaŭ la animo. Por progresi, la animo ĉiam bezonas ian aganton; sen ia aganto la animo estas por vi kiel nenio aŭ, pli bone dirite, ne estas konceptebla por vi. La perispirito, por ni vagantaj Spiritoj, estas la aganto, per kiu ni komunikiĝas kun vi, ĉu nerekte, per via korpo aŭ via perispirito, ĉu rekte al via animo; tio klarigas la senliman diversecon de mediumoj kaj de komunikaĵoj. Nun restas la scienca vidpunkto, t. e. la naturo mem de la perispirito; ĉi tio estas io tute alia. Komprenu la

aferon unue morale. Restas nur diskuti pri la naturo de la fluidaĵoj, kio por momento estas neklarigebla; la scienco ankoraŭ ne scias sufiĉe, sed ĝi atingos la kernon de la afero, se nur ĝi volos marŝi kune kun Spiritismo. La perispirito povas ĝis senfineco diversi kaj ŝanĝiĝi. La animo estas la pensado: ĝi ne ŝanĝas sian naturon. Pri ĉi tio ne iru pluen: ĝi estas punkto neklarigebla. Ĉu vi pensas, ke, same kiel vi, mi mem ne traserĉas? Vi, vi elserĉas la perispiriton, ni nunmomente, ni elserĉas la animon. Atendu do.

LAMENNAIS."

Tiel do, al Spiritoj, kiujn oni povas konsideri progresintaj, ankoraŭ ne prosperis sondi la naturon de la animo: kiel ni mem povus ĝin fari? Estas sekve perdi sian tempon voli esplori la komencon de ĉio ekzistanta, kio, kiel dirite en **La libro de la Spiritoj** (§§ 17, 49), estas unu el la sekretoj de Dio. Pretendi serĉfosi, kun la helpo de Spiritismo, ion, ne apartenantan al la kadro de la homaro, estas deturni ĉi tiun Doktrinon for de ĝia efektiva celo, estas agi kiel infano, kiu volus scii tiel multe, kiel maljunulo. La homo profitu Spiritismon por sia morala pliboniĝo, jen la plej ĉefa afero; la ceteraĵo estas nur senfrukta kaj ofte aroganta scivolemo, kies kontentigo alportus al li nenian progreson. La sola rimedo paŝi antaŭen estas fariĝi pli bona. La Spiritoj, diktintaj tiun libron, kiu portas ilian nomon, montris sian saĝecon tenante sin, koncerne la principojn de la aferoj, en la limoj, kiujn Dio ne permesas transiri, kaj lasante al la sistememaj kaj tro memfidaj Spiritoj la respondecon por la antaŭtempaj kaj eraraj teorioj, pli allogaj ol solidaj, kaj kiuj iam falos ĉe la prudento, kiel falis tiom da aliaj, elkovitaj el la homaj cerboj. Ili diris nur tion ĝuste necesan, por ke la homo komprenu la estontecon, kiu lin atendas, kaj, per tio mem, por kuraĝigi lin al la praktikado de bono. (Vd. en la tuj sekvanta Dua Parto la Ĉapitron I-an, **Agado de la Spiritoj sur la materion.**)

———————

DUA PARTO

# Pri la manifestiĝoj de la Spiritoj

## ĈAPITRO I

### PRI LA AGADO DE LA SPIRITOJ SUR LA MATERION

**52.** Post la forĵeto de la materialista opinio, kiun kondamnas kiel la racio, tiel ankaŭ la faktoj, ĉio nun resume konsistas en tio, ekscii, ĉu la animo, post la morto, povas manifestiĝi al la vivantoj. Sub tia plej simpla formo, la demando estas multe pli faciligita. Antaŭ ĉio estus ĝuste demandi, kiel inteligentaj estuloj, iel vivantaj en nia medio, kvankam nevideblaj dank'al sia naturo, ne povus en ia maniero sciigi pri sia ĉeesto. La simpla prudento diras, ke en tio estas nenio ne ebla, kio jam estas io. Cetere ĉi tiu kredo havas por si la konsenton de ĉiuj popoloj, ĉar oni ĝin trovas en ĉiuj lokoj kaj en ĉiuj tempoj; nu, nenia intuicio povas esti tiel ĝenerala kaj transvivi jaraĝojn, se ĝi ne havas ian apogon. Krom tio ĝin sankcias la atesto de la sanktaj libroj kaj de la Patroj de la Eklezio; estis necesaj la skeptikismo kaj la materialismo de nia jarcento, por ke ĝi estu forĵetita inter la superstiĉajn ideojn. Se ni eraras, tiam eraras ankaŭ tiuj aŭtoritatuloj.

Sed ĉi tio estas konsideroj nur en la morala sfero. Precepe unu kaŭzo kunhelpis, por plifortigi la dubon, en tempo tiel pozitiva kiel nia, kiam ĉiu nepre volas klarigi al si ĉion, kiam oni deziras ekscii la kialon kaj la kielon de ĉiu afero: tiu kaŭzo estas la nescio pri la naturo de la Spiritoj kaj pri la rimedoj, per kiuj ili pov-

as manifestiĝi. Kiam oni tion ekscios, la manifestiĝoj jam havos nenion mirigan kaj estos alkalkulataj al la naturaj faktoj.

**53.** La ideo, kiun oni kreas al si pri la Spiritoj, faras, ĉe la unua rigardo, nekomprenebla la fenomenon de la manifestiĝoj. Ĉar tiuj manifestiĝoj povas okazi nur per la agado de la Spirito sur la materion, tial tiuj homoj, kiuj pensas, ke Spirito estas absoluta ne-materio, demandas sin, kun ia ŝajna praveco, kiel do li povas agi materie. Nu, jen la eraro, ĉar Spirito estas ne ia abstraktaĵo, sed difinita kaj limigita estulo. La Spirito, enkarniĝinta en la korpo, konsistigas la animon; forlasante la korpon, ĉe la morto, li ne eliras sen ia envolvaĵo. Ili ĉiuj diras al ni, ke ili konservas la homan formon, kaj, efektive, kiam ili aperas antaŭ ni, ili sin prezentas ĝuste sub tiu ilia formo, kiun ni konis.

Ni ilin atente observu en tiu momento, kiam ili ĵus forlasis la vivon: ili troviĝas konsternitaj; ĉio ĉirkaŭ ili estas malklara; ili vidas sian korpon sanan aŭ kripligitan, laŭ la speco de la morto; de alia flanko, ili sin vidas mem kaj sentas sin vivantaj; io diras al ili, ke tiu korpo apartenas al ili, kaj ili ne komprenas, kiel ili estas apartigitaj de ĝi. Ili sin ankoraŭ vidas sub sia antaŭa formo, kaj tiu vido ĉe kelkaj naskas strangan iluzion, kiu iom longe daŭras: ili pensas, ke ili ankoraŭ vivas; ili devas ankoraŭ sperti sian novan staton, por konvinkiĝi pri la realaĵo. Post tiu unua momento de konfuziteco, la korpon ili rigardas kiel ian eluzitan veston, kiun ili demetis de si kaj kiun ili tute ne resopiras; ili jam ne suferas de la fizikaj doloroj kaj estas tute feliĉaj, ke ili povas altiĝi, traflugi la aeron tiel, kiel, ankoraŭ vivante, ili ofte faradis en sonĝo (*). Kvankam nun sen

---

(*) Se iu bonvolos sin turni al ĉio, kion mi diris en *La Libro de la Spiritoj* pri la sonĝoj kaj la stato de la Spirito dum la dormo (§§ 400 ĝis 418), tiu komprenos, ke tiuj sonĝoj, kiujn preskaŭ ĉiuj havas kaj dum kiuj oni vidas sin transportata tra la aero kaj kvazaŭ fluganta, estas nenio alia, ol rememoro pri la sensaco, kiun spertis la Spirito tiam, kiam, dum la sonĝo, li momente forlasis sian materian korpon, kunportante nur sian korpon fluidaĵan, tiun, kiun li konservos post la morto. Tiuj sonĝoj povas do havigi al ni ian

la korpo, ili tamen konstatas sian personecon: ili havas formon, sed formon, kiu ilin ne ĝenas kaj ne embarasas; ili fine konscias pri sia "mi" kaj sia individueco. Kion do ni konkludu el ĉio ĉi? ke la animo ne forlasas ĉion en la tombo, ke ĝi kun si portas ion.

**54.** Multenombraj observoj kaj nemalkonfeseblaj faktoj, pri kiuj mi poste parolos, kondukis al ĉi tiu konkludo, nome, ke ĉe la homo ekzistas tri elementoj: 1-a, la animo, aŭ Spirito, inteligenta principo, en kiu sidas la prudento; 2-a, la korpo, malsubtila, materia envolvaĵo, per kiu li kelkatempe sin vestas, por plenumi certajn providencajn ordonojn; 3-a, la perispirito, fluidaĵa, duonmateria envolvaĵo, servanta kiel ligilo inter la animo kaj la korpo.

La morto estas la detruiĝo, aŭ pli bone dirite, la diseriĝo de la malsubtila envolvaĵo, de tiu envolvaĵo, kiun la animo forlasas; la dua envolvaĵo disiĝas de ĉi tiu kaj kompanias al la animo, kiu do havas ĉiam iun envolvaĵon. Ĉi tiu lasta, kvankam fluidaĵa, etereca, vaporeca, nevidebla por ni en sia normala stato, estas tamen ja materio, malgraŭ tio, ke ni ĝis hodiaŭ ne povis ĝin preni kaj submeti al analizo.

Tiu dua envolvaĵo de la animo, aŭ **perispirito**, ekzistas do dum la enkorpa vivo; ĝi estas la perilo de ĉiuj sensacioj, kiujn la Spirito ricevas, tio, per kio la Spirito transigas sian volon en la eksteran medion kaj agas sur la korporganojn. Por fari materialan komparon, mi diru, ke ĝi estus elektra kondukilo, destinita por la ricevo kaj transsendo de la penso; ĝi estas, unuvorte, tiu mistera, nekaptebla aganto, nomata "nerva fluidaĵo", kiu ludas tiel gravan rolon en la organa ekonomio kaj kiun oni ankoraŭ ne sufiĉe prenas en kalkulon ĉe la fiziologiaj kaj patologiaj fenomenoj. Konsiderante sole nur la peseblan materian elementon, la Medicino, ĉe la observado de la faktoj, formetas mem de si senĉesan kaŭzon de

---

ideon pri la stato de la Spiritoj, kiam li liberiĝos el la malhelpaĵoj, kiuj retenas lin sur la tero. — *Noto de la Aŭtoro.*

agado. Sed ne ĉi tiu estas la loko por la ekzamenado de tiu demando; mi rimarkigu nur tion, ke la konado de la perispirito donas la ŝlosilon de multego da ĝis hodiaŭ ne solvitaj problemoj.

La perispirito tute ne estas unu el tiuj hipotezoj, per kiuj la scienco kelkafoje helpas al si, por klarigi iun fakton; ĝia ekzisto ne estas nur konigita de la Spiritoj, sed estas ja frukto de observoj, kiel mi havos la okazon ĝin pruvi. Por la momento kaj por ne antaŭveni al la faktoj, kiujn mi raportos, mi limigas min dirante, ke, ĉu dum sia ligiteco kun la korpo, ĉu post sia disiĝo de ĉi tiu, la animo neniam apartiĝas de sia perispirito.

**55.** Oni diris, ke la Spirito estas ia flamo, ia fajrero; ĉi tion oni komprenu rilate al la Spirito mem, kiel intelekta kaj morala principo, al kiu oni ne povus havigi difinitan formon. Tamen, kiu ajn la ŝtupo, sur kiu li staras, li estas ĉiam tegita de ia envolvaĵo, aŭ perispirito, kies naturo fariĝas ĉiam pli etereca, laŭgrade kiel li puriĝadas kaj altiĝas en la hierarkio; tiamaniere, laŭ mia sento, la ideo pri formo estas nedisigebla de la ideo pri la Spirito, kaj mi ne konceptas unu sen la dua. La perispirito estas do integraliga parto de la Spirito tute same, kiel la korpo estas esenca parto de la homo; sed la sola perispirito ne estas la Spirito, kiel ankaŭ la sola korpo ne estas la homo, ĉar la perispirito ne pensas: ĝi estas rilate al la Spirito tio, kio estas la korpo rilate al la homo, t. e. la aganto aŭ la ilo de la agado de la Spirito.

**56.** La perispirito havas formon homan, kaj kiam ĝi aperas al ni, tiu formo estas ordinare tiu, sub kiu ni konis la Spiriton dum lia surtera vivo. Oni el tio povus pensi, ke, liberiĝinte el ĉiuj partoj de la korpo, la perispirito sin iagrade modeligus laŭ ĉi tiu kaj konservus ties stampon, sed ne ŝajnas, ke tiel estas. Kun la diferenco de kelkaj detaletoj kaj esceptinte la organajn modifojn, postulatajn de la medio, kie la estulo devas vivi, la homa formo aperas ĉe la loĝantoj de ĉiuj mondoj; almenaŭ la Spiritoj tion asertas. Ĝi estas la

formo ankaŭ de ĉiuj Spiritoj ne enkarniĝintaj kaj havantaj nur la perispiriton; ĝi estas tiu, sub kiu oni en ĉiuj tempoj reprezentis la anĝelojn, aŭ purajn Spiritojn. El ĉio ĉi ni devas konkludi, ke la formo homa estas la tipa formo de ĉiuj homaj estuloj, kia ajn ilia grado da evolucio. Sed la subtila materio de la perispirito ne estas tiel tenaca kaj rigida kiel la kompakta materio de la korpo; ĝi estas, se tiel diri, fleksebla kaj ekspansia, el kio rezultas, ke la formo, kiun ĝi prenas sur sin, kvankam modeligita laŭ la formo de la korpo, estas ne absoluta, sed alkonformiĝas al la volo de la Spirito, kiu povas doni al ĝi tian aŭ tian alian aspekton laŭplaĉe, dum la solida envolvaĵo kontraŭstaras al ĝi per nevenkebla forto. Liberiĝinte el tiu ĝenaĵo, kiu ĝin premadis, la perispirito pliampleksiĝas aŭ kuntiriĝas, aliiĝas; unuvorte, ĝi akceptas ĉiajn metamorfozojn, laŭ la volo, aganta sur ĝin. Ĝuste dank'al tiu propreco de sia fluideca envolvaĵo la Spirito, kiu volas sin rekonigi, povas, kiam necese, preni sur sin tiun plenan aspekton, kiun li havis dum sia surtera vivo, eĉ kune kun la korpaj kriplaĵoj, kiuj povas taŭgi kiel identigiloj.

La Spiritoj, kiel oni vidas, estas do estuloj al ni similaj, formantaj ĉirkaŭ ni tutan popolon, nevideblan en sia normala stato; mi diras "en sia normala stato", ĉar, kiel ni vidos, tiu nevidebleco estas ne absoluta.

**57.** Ni ree konsideru la naturon de la perispirito, ĉar tio estas esenca por la klarigo, kiun mi donos pri la afero. Mi diris, ke, kvankam fluideca, la perispirito estas tamen ia materio, kio rezultas el la fariĝo de la palpeblaj aperaĵoj, pri kiuj mi ankoraŭ parolos. Oni vidis aperi sub la influo de iaj mediumoj manojn kun ĉiuj proprecoj de manoj vivaj, manojn, kiel ĉi tiuj, varmajn, kiujn oni povas palpi, kiuj estas firmaj kiel solida korpo, kaptas la kunsidantojn kaj subite aerdisiĝas kvazaŭ ombro. La inteligenta agado de tiuj manoj, kiuj evidente obeas ian volon, farante certajn movojn, eĉ ludante ariojn sur instrumento, pruvas, ke ili estas la videbla parto de nevidebla inteligenta estulo. Ilia tuŝebleco, ilia temperaturo, unuvorte, la impreso, kiun ili faras sur la sentumojn, ĉar oni ja vidis ilin postlasi premsignojn

sur la haŭto, doni dolorajn batojn aŭ delikate karesi, pruvas, ke ili estas el ia ajna materio. Ilia subita malapero pruvas, krom tio, ke tia materio estas pleje subtila kaj kondutas tiel same, kiel iuj substancoj, kiuj povas alterne transiri de la stato solida en la staton fluidan, kaj inverse.

**58.** La kerna naturo de la Spirito mem, t. e. de la pensanta estulo, estas al ni tute nekonata; li elmontriĝas al ni nur per siaj agoj, kaj liaj agoj povas frapi niajn materiajn sentumojn nur per iu materia peranto. La Spirito bezonas do ian materion, por agi sur la materion. Kiel senperan ilon de sia agado li havas sian perispiriton tiel same, kiel la homo havas sian korpon; nu, kiel ni ĵus vidis, perispirito estas materio. Kiel sian perilon li havas ankaŭ la universan fluidaĵon, ian specon de transsendilo, sur kiun li agas, kiel ni agas sur la aeron, por estigi certajn efikojn per dilato, premado, impulsado aŭ vibroj.

Konsiderata en ĉi tiu maniero, la agado de la Spirito sur la materion estas facile imagebla; oni el tio komprenas, ke ĉiuj efikoj, el ĝi rezultantaj, apartenas al la kadro de la naturaj faktoj kaj havas nenion miraklecan. Ili ŝajnis supernaturaj nur tial, ĉar oni ne konis ilian kaŭzon; se oni scias la kaŭzon, disfumiĝas do ĉio mirakleca, kaj tiu kaŭzo troviĝas tuta en la duonmateria esteco de la perispirito. Tio estas nova klaso da faktoj, kiujn klarigas nova leĝo kaj kiun post kelka tempo neniu jam miros, same kiel hodiaŭ neniu plu miras, ke oni en kelke da minutoj korespondas kun alia persono trans grandan distancon per la elektro.

**59.** Oni eble demandus, kiel kun la helpo de tia subtila materio la Spirito povas agi sur pezajn kaj kompaktajn korpojn, levi tablojn k. t. p. Similan kontraŭdiron certe ne prezentus scienculo, ĉar, jam ne parolante pri la nekonataj proprecoj, kiujn tiu nova aganto eble havas, ĉu ni ne vidas antaŭ niaj okuloj analogajn ekzemplojn? Ĉu ne ĉe la plej maldensigitaj gasoj, ĉe la nepeseblaj fluidaĵoj la industrio kreas al si siajn plej potencajn motorojn? Se ni vidas la aeron renversi kons-

truaĵojn, la vaporon delokigi grandegajn masojn, la pulv-on gasigitan levi rokojn, la elektron rompi arbojn kaj fendi murojn, kio do absurda tio estus, akcepti, ke Spi-rito, per helpo de sia perispirito, povas levi tablon, des pli, ĉar oni scias, ke tiu perispirito povas fariĝi videbla, tuŝebla, kaj agadi simile al solida korpo?

———————

ĈAPITRO II

# PRI LA FIZIKAJ MANIFESTIĜOJ. PRI LA TURNIĜANTAJ TABLOJ

**60.** Oni donas la nomon "fizikaj manifestiĝoj" al tiuj, kiuj elmontriĝas per senseblaj efikoj, kiel bruoj, movado kaj delokigo de solidaj korpoj. Unuj estas spontaneaj, t. e. dependantaj de nenies volo; aliaj povas esti okazigataj. Mi pritraktos unue nur ĉi tiujn lastajn.

La plej simpla efiko, ja unu el la unuaj observataj, estas la cirkla movo, komunikata al tablo. Ĉi tiu efiko fariĝas ankaŭ ĉe aliaj objektoj, sed, ĉar tablo estis tiu, kun kiu, pro ĝia oportuneco, oni faradis tiajn eksperimentojn, tial estis fine elektita la nomo **turniĝantaj tabloj** por tiu fenomeno.

Dirante, ke ĉi tiu efiko estis unu el la unuaj observataj, mi volas paroli pri la lasta tempo, ĉar sendube ĉiaj manifestiĝoj estis konataj ekde la plej malproksimaj tempoj, kaj alie ja ne povus esti; efektive, ĉar ili estas naturaj efikoj, ili tial nepre okazadis en ĉiaj tempoj. Tertuliano eksplicite traktis pri la turniĝantaj kaj la parolantaj babloj.

Dum kelka tempo ĉi tiu fenomeno nutris la vidamon de la salonoj; poste oni tediĝis de ĝi kaj sin ekokupis pri aliaj distraĵoj, ĉar oni ĝin rigardadis kiel simplan amuzaĵon. Du kaŭzoj kunhelpis por la forlaso de la turniĝantaj tabloj. Inter la frivolaj homoj tio estis la modo, ĉar tiaj homoj malofte dediĉas al sama amuzo du vintrojn, kaj tamen, al ilia granda miro mem, ili dediĉis al tiu afero tri aŭ kvar. La saĝaj kaj observemaj homoj rimarkis, ke el tiu fenomeno elŝprucis io serioza, kio ekstaris sur pli alta loko; ili ne plu atentis la turniĝantajn

tablojn, ĉar ili sin ekokupis pri la sekvoj de tiu fenomeno, sekvoj kun tute alia graveco. Ili forlasis la alfabeton por la scienco: jen la tuta sekreto de tiu ŝajna forlaso, pro kiu tiel bruas la mokŝercistoj.

Kiel ajn ĝi estas, la turniĝantaj tabloj estas ja la deirpunkto de la Spiritisma Doktrino, kaj pro tiu ilia merito ni ŝuldas al ili kelkajn klarigojn, des pli ke, prezentante la fenomenojn en ilia plej granda simpleco, la studado de ties kaŭzoj plifaciliĝas, kaj, unu fojon starigita, la teorio havigos al ni la ŝlosilon de la plej komplikitaj efikoj.

**61.** Por ke okazu la fenomeno, estas necesa la kunhelpo de unu aŭ pluraj personoj, dotitaj per speciala kapablo kaj kiujn oni nomas **mediumoj**. La nombro de la kunhelpantoj estas indiferenta, escepte se inter ili eble troviĝas kelke da nekonataj mediumoj. Pri tiuj kunsidantoj, kiuj ne posedas mediumecon, ilia ĉeesto neniom influas aŭ eĉ povas esti pli malutila ol utila, dank'al la humoro, kiun ili ofte kunportas al la seancoj.

En ĉi tiu rilato la mediumoj ĝuas pli aŭ malpli grandan povon kaj sekve okazigas pli aŭ malpli fortajn efikojn; ofte unu sola persono, potenca mediumo, faras multe pli ol dudek aliaj kune: sufiĉas, ke li ektuŝis la tablon per la manoj, kaj jen, en tiu sama momento, la tablo ekmoviĝas, leviĝas, renversiĝas, saltadas aŭ furioze turniĝas.

**62.** Ekzistas nenia signo, kiu elmontrus la mediumecon ĉe iu: nur la sperto povas konigi tiun kapablon. Kiam, en seanco, oni volas eksperimenti, sufiĉas sidiĝi ĉirkaŭ tablo kaj plate surkuŝigi la manojn, sen premo kaj muskola streĉeco. En la komenco, ne konante la kaŭzojn de la fenomeno, oni indikis plurajn antaŭzorgojn, pri kiuj oni poste konstatis, ke ili estas tute senutilaj; tia ekzemple la alternado de la seksoj; ankaŭ la kontakto de la malgrandaj fingroj de la kunsidantoj tiel, ke formiĝis kontinua ĉeno. Ĉi tiu lasta aranĝo ŝajnis necesa tiam, kiam oni kredis la agadon de ia elektra fluo; poste la sperto montris ĝian senutilecon. La sola rigore deviga preskribo estas enpensiĝo, absoluta silento

kaj precipe pacienco, se la efiko malfruas. La fenomeno povas aŭ fariĝi en kelke da minutoj aŭ prokrastiĝi ĝis duonhoro aŭ unu horo: tio dependas de la mediuma potenco de la kunsidantoj.

**63.** Mi aldiru, ke la formo de la tablo, la materialo, el kiu ĝi estas farita, la ĉeesto de metaloj, de silko en la vestoj de la kunsidantoj, tago, horo, senlumeco aŭ heleco k. a. estas tiel indiferentaj, kiel pluvo aŭ belvetero. Nur la pezon de la tablo oni devas preni en kalkulon, sed sole en tia okazo, se la mediuma potenco estas nesufiĉa, por venki ĝian reziston; alie unu sola homo, eĉ infano, povas igi leviĝi centkilograman tablon, dum, en malpli favoraj kondiĉoj, dek du homoj ne sukcesas movi eĉ la plej malpezan unupiedan tableton.

Ĉe tiu staro de la aranĝoj, kiam la efiko komencas elmontriĝi, tiam oni tre ofte ekaŭdas kraketon en la tablo; oni eksentas ian tremetadon, kiu estas la komencaĵo de la moviĝado; oni havas la impreson, kvazaŭ la tablo penas delokiĝi; poste la turniĝado plifortiĝas kaj fariĝas tiel rapida, ke la ĉeestantoj faras la plej grandajn fortostreĉojn por ĝin sekvi (*). Kiam la moviĝado ricevis sian plenrapidecon, tiam oni povas foriĝi de la tablo, ĉar ĉi tiu plue moviĝadas en plurajn flankojn, sen ia kontakto.

Ĉe aliaj okazoj la tablo leviĝas kaj ekstaras jen sur unu piedo, jen sur alia, kaj poste delikate revenas al sia norma pozicio. Aliajn fojojn ĝi balanciĝas, imitante tangadon aŭ ruliĝadon de ŝipo. Aliajn fojojn, fine, sed por tio estas necesa granda mediuma potenco, ĝi tute disiĝas de la planko kaj sin ekvilibre tenas en la aero sen ia apogo, kaj iafoje eĉ leviĝas ĝis la plafono tiel, ke oni povas pasi sub ĝi; poste ĝi malrapide malsupreniĝas, balanciĝante kvazaŭ paperfolio, aŭ abrupte falas kaj rompiĝas, kio evidente pruvas, ke la ĉeestantojn ne trompas ia optika iluzio.

**64.** Ankoraŭ unu fenomeno, kiu tre ofte okazas,

---

(*) Ofte tiu movado estas malrapida ĝis la fino de la eksperimento. — *La Trad.*

laŭ la naturo de la mediumo, konsistas en frapoj en la strukturo mem de la ligno, sen ia movo de la tablo; tiuj frapoj, jen tre malfortaj, jen tre fortaj, aŭdiĝas ankaŭ en la ceteraj mebloj de la ĉambro, en la pordoj, sur la muroj kaj sur la plafono. Ni baldaŭ revenos al ĉi tiu temo. Kiam ili fariĝas en la tablo, ili kaŭzas vibradon tre senteblan por la fingroj kaj tre klaran precipe tiam, se oni surmetas la orelon sur la tablon.

———————

ĈAPITRO III

# PRI LA INTELIGENTAJ MANIFESTIĜOJ

**65.** En tio, kion ni ĵus vidis, nenio efektive elmontras la kunagadon de ia kaŝita potenco; tiujn efikojn oni povus tre bone klarigi per la agado de ia magneta aŭ elektra fluo, aŭ, ankaŭ, de ia alia fluidaĵo. Tio estis ja la unua solvo, kiu estis donita pri tiuj fenomenoj, kaj kiu povis prave esti rigardata kiel tre logika. Ĝi nediskuteble estus venkinta ĉiujn ceterajn, se ne estus okazintaj aliaj faktoj, kiuj pruvis ĝian nesufiĉecon; tiuj faktoj estas la montroj de inteligenteco, kiujn ili donis; nu, ĉar ĉiu inteligenta efiko devas havi ian inteligentan kaŭzon, tial fariĝis evidente, ke, eĉ se oni konsentus, ke la elektro aŭ ia alia fluidaĵo tie agas, alia kaŭzo tamen tien enmiksiĝas. Kio ĝi estas? kio estas tiu inteligento? Tion malkaŝis la pluaj observoj.

**66.** Por ke iu manifestiĝo estu inteligenta, ne estas necese, ke ĝi estu elokventa, sprita aŭ klera; sufiĉas, se ĝi elmontras liberan kaj memvolan agadon, kiu esprimas ian intencon aŭ respondas ian penson. Sen ia dubo, kiam oni vidas ventoflagon agitatan de la vento, tiam oni estas tute certa, ke ĝi obeas simplan mekanikan impulson; sed se oni konstatus en ĝiaj movoj intencajn signojn, se ĝi turniĝus jen dekstren, jen maldekstren, foje rapide, foje malrapide laŭ komando, tiam oni ja devus konfesi, ne ke la ventoflago estas inteligenta, sed ke ĝi obeas ian inteligenton. Tio sama estis kun la tablo.

**67.** Ni vidis, ke la tablo moviĝas, leviĝas, frapadas sub la influo de unu aŭ pluraj mediumoj. La unue

observita inteligenta efiko estis, ke tiuj movoj obeadis ordonon; fakte, sen translokiĝo, la tablo alterne leviĝadis, tenante sin sur la elektita piedo; poste, falante, ĝi frapadis sur la plankon per difinita nombro da frapoj, respondante iun demandon. Ĉe aliaj okazoj, sen ies kontakto, ĝi tute sola trakuradis la ĉambron, dekstren aŭ maldekstren, antaŭen aŭ malantaŭen, farante diversajn movojn laŭ la ordono de la ĉeestantoj. Memkompreneble mi flanken metas ĉian supozon pri ia artifiko kaj konsentas la perfektan lojalecon de la kunsidantoj, certigitan de ilia honesteco kaj absoluta neprofitemeco. Mi poste pritraktos la trompojn, kontraŭ kiuj estas prudente sin gardi.

**68.** Per frapoj kaj precipe per internaj kraketoj, pri kiuj mi ĵus parolis, oni ricevas ankoraŭ pli inteligentajn efikojn; tiaj estas: imitado de la diversaj rulbruoj de la tamburo, bataleto per vica aŭ plotona pafado, kanonado; ankaŭ grincado de segilo, martelfrapoj, ritmo de diversaj arioj k. a. Tio estis, kiel mi ja komprenas, vasta kampo por esplorado. Oni ekpensis, ke, ĉar en tio troviĝas ia kaŝita inteligento, ĝi tial nepre povis respondi demandojn, kaj ĝi efektive respondis "jes" aŭ "ne" per antaŭkonsentita nombro da frapoj. Ĉar tiuj respondoj estis tro bagatelaj, tial oni ekhavis la ideon, ke la tablo signigu per frapoj la diversajn literojn, tiamaniere kunmetante vortojn kaj frazojn.

**69.** Ĉi tiuj faktoj, laŭplaĉe refojigataj de miloj da homoj kaj en ĉiuj landoj, povis allasi nenian dubon pri la inteligenta naturo de la manifestiĝoj. Tiam ekaperis nova sistemo, laŭ kiu tiu inteligento estus ne alia, ol tiu de la mediumo, de la eldemandanto aŭ eĉ de la ĉeestantoj. Malfacile estis klarigi, kiel tiu inteligento povas agi sur la tablon kaj sin esprimi per frapoj; ĉe la konstato, ke ne la mediumo frapas, tion do probable faras la pensado; nu, frapado de la pensado estus fenomeno ankoraŭ pli miregiga ol ĉiuj, kiujn oni vidis. Ne longe daŭris, kaj la sperto pruvis ne akceptebla tiun opinion. Fakte, la respondoj tre ofte kontraŭis formale la penson de la ĉeestantoj, troviĝis ekster la inteligent-

eco de la mediumo, kaj eĉ estis donataj en lingvoj, ne-konataj al li, aŭ rilatantaj al faktoj, kiujn neniu el la kunsidantoj konis. La ekzemploj estas tiel multenombraj, ke estas preskaŭ ne eble, ke ilin ofte ne ĉeestis ĉiu ajn, kiu eĉ malmulte sin okupis pri komunikiĝoj de Spiritoj. Mi nun citos unu solan, kiun rakontis al mi vidinto.

**70.** Sur ŝipo de la franca imperia mararmeo, en krozado sur la maroj de Ĉinujo, ĉiujn, de la ŝipanoj ĝis la staboficiroj, okupis la penso paroligi tablojn. Oni ekhavis la ideon elvoki la Spiriton de leŭtenanto, kiu iam servis sur tiu sama ŝipo kaj kiu mortis antaŭ du jaroj. Li ja venis, kaj post diversaj komunikaĵoj, kiuj mirigis ĉiujn, li diris per frapoj jenon: "Mi tre petas vin pagi al la ŝipestro la sumon de ... (li diris tiun sumon), kiun mi ŝuldas al li kaj pri kiu mi bedaŭras, ke mi ne povis pagi ĝin, antaŭ ol morti." Neniu konis tiun fakton; la ŝipestro mem estis forgesinta tiun ŝuldon, cetere tre malgrandan, sed, traserĉante siajn kontojn, li tie trovis noton pri tiu ŝuldo de la leŭtenanto, kun cifero tute egala al tiu nomita. Mi demandas: de kies penso tiu sciigo povis esti la rebildiĝo?

**71.** Oni plibonigis la arton ricevi komunikaĵojn per alfabetaj frapoj, sed tiu rimedo ĉiam ankoraŭ postuladis multe da tempo; oni tamen ricevis kelkajn iom longajn kaj ankaŭ interesajn sciigojn pri la mondo de la Spiritoj. Ĉi tiuj konsilis aliajn rimedojn, kaj al ili oni ja ŝuldas la procedon de la skribaj komunikaĵoj.

La unuajn tiajn komunikaĵojn oni ricevis almetante krajonon al la piedo de malpeza tablo, staranta sur folio da papero. Ekmoviĝinte per la influo de mediumo, la tablo komencis streki literojn, poste vortojn kaj frazojn. Iom post iom oni plisimpligis ĉi tiun procedon per tabletoj de la grandeco de la mano, faritaj speciale por tiu celo; poste oni ekuzis korbojn, kartonkestojn kaj fine simplajn tabuletojn. La skribado fariĝis tiel flue, tiel rapide kaj tiel facile, kiel per la mano. Oni poste konstatis, ke ĉiuj ĉi objektoj, en la fino, estis nuraj akcesoraĵoj, efektivaj krajoningoj, kiujn oni tute ne bezonis, ĉar la krajonon la mediumo mem povis teni. Devigata

al pretervola moviĝado, la mano skribadis sub la impulso de la Spirito, sen la volo kaj sen la pensado de la mediumo. De tiam la komunikaĵoj el la transmondo fariĝis senlimaj tiel same, kiel la ordinara korespondado inter vivantoj.

Mi ankoraŭ pritraktos tiujn diversajn rimedojn, por ilin pli detale klarigi; mi ilin nur skizis en ĝeneralaj trajtoj, por montri la sinsekvon de la faktoj, kiuj kondukis la homon al la konstato, ke en tiuj fenomenoj partoprenas kaŝitaj inteligentoj aŭ, alivorte, Spiritoj.

———————

ĈAPITRO IV

# PRI LA TEORIO DE LA FIZIKAJ MANIFESTIĜOJ

*Movoj kaj leviĝoj. Bruoj. Plipeziĝo kaj malplipeziĝo de la korpoj*

**72.** Post la pruvo, per la rezonado kaj la faktoj, pri la ekzisto de la Spiritoj kaj pri ilia kapablo agadi sur la materion, la demando estas nun, kiel okazas tiu agado kaj kiel ili procedas, por fari, ke moviĝu la tabloj kaj aliaj inertaj korpoj.

Ideo prezentiĝas tute nature, kaj pri ĉi tiu demando mi havis unu; ĉar ĝin refutis la Spiritoj, donante tute alian klarigon, kiun mi absolute ne atendis, tio evidente pruvas, ke ilia teorio ne estis ia eĥo de mia opinio. Nu, tiun unuan ideon ĉiu povus havi, kiel mi; pri la teorio, starigita de la Spiritoj, mi ne kredas, ke ĝi iam venis en ies kapon. Oni senpene konstatos, kiel supera — kvankam malpli simpla — ĝi estas ol mia, ĉar ja ĝi solvas multegon da aliaj faktoj, kiuj en mia ne trovis klarigon.

**73.** Ekkoninte la naturon de la Spiritoj, ilian homan formon, la duonmaterian estecon de la perispirito, la mekanikan agadon, kiun ĉi tiu povas fari sur la materion; vidinte, en okazoj de aperaĵoj, fluidecajn, eĉ palpeblajn manojn, ekpreni kaj transporti objektojn, estis do nature supozi, ke la Spirito tute simple uzadas siajn manojn, por turni la tablon, kaj ke li ĝin levas en la aeron per brakforto. Sed, se tiel estas, kial do estas necesa ia mediumo? Ĉu do la Spirito ne kapablas agi per si mem? ĉar la mediumo, kiu plej ofte apogas la manojn sur la tablo en senco kontraŭa al ties moviĝado, aŭ eĉ ilin tute ne surmetas, evidente ne povas kunhelpi

la Spiriton per ia ajn muskola agado. Sed ni lasu, ke unue parolu la Spiritojn, kiujn mi demandis pri ĉi tiu temo.

**74.** La sekvantajn respondojn donis al mi la Spirito Sankta Ludoviko kaj poste konfirmis multe da aliaj.

I. Ĉu la universa fluidaĵo estas eliĝaĵo de Dio?

"Ne."

II. Ĉu ĝi estas kreaĵo de Dio?

"Ĉio estas kreita, escepte de Dio."

III. Ĉu la universa fluidaĵo estas samtempe la universa elemento?

"Jes; ĝi estas la elementa principo de ĉiuj ekzistaĵoj."

IV. Ĉu ĝi havas ian rilaton al la elektra fluidaĵo, kies efikojn ni konas?

"Ĝi estas ties elemento."

V. En kia stato la universa fluidaĵo sin prezentas al ni en sia plej simpla formo?

"Por ĝin trovi en ĝia absoluta simpleco, estas necese supreniri ĝis la Spiritoj puraj; en via mondo ĝi troviĝas ĉiam pli aŭ malpli modifita, por konsistigi la kompaktan materion, kiu vin ĉirkaŭas; vi tamen povas diri, ke la stato plej proksima al tiu simpleco estas tiu de la fluidaĵo, kiun vi nomas **animala magneta fluidaĵo**."

VI. Oni diris, ke la universa fluidaĵo estas la fonto de la vivo; ĉu ĝi estas ankaŭ la fonto de la inteligento?

"Ne, tiu fluidaĵo animas nur la materion."

VII. Ĉar la perispirito konsistas ĝuste el tiu fluidaĵo, tial ŝajnas, ke ĉi tiu tie troviĝas en kvazaŭa kondensostato, kiu ĝin iamaniere similigas al la ĝustasenca materio: ĉu tiel?

"Jes, iamaniere, kiel vi diras, ĉar ĝi ne havas ĉiujn proprecojn de la materio; ĝi estas pli aŭ malpli densa laŭ la mondoj."

VIII. Kiel iu Spirito povas estigi la movadon de solida korpo?

"Kombinante parton de la universa fluidaĵo kun la fluidaĵo, taŭga por tiu efiko, kiun la mediumo elĵetas el si."

IX. Ĉu la Spiritoj levas tablon per siaj propraj membroj, iom solidigitaj?

“Ĉi tiu respondo ankoraŭ ne alportos tion, kion vi deziras. Kiam tablo moviĝas sub viaj manoj, la elvokita Spirito ĉerpas el la universa fluidaĵo ion, per kio li kvazaŭ animas la tablon per nenatura vivo. Tiel preparinte la tablon, la Spirito ĝin altiras al si kaj movas sub la influo de sia propra fluidaĵo, kiun li ellasas per sia volo. Kiam la maso, kiun li volas movi, estas por li tro peza, li helpe vokas aliajn Spiritojn, kies kondiĉoj estas tiel samaj kiel liaj. Dank’al sia etereca naturo la Spirito mem ne povas agi sur la malsubtilan materion sen ia perilo, t. e. sen la elemento, liganta lin kun la materio; tiu ligilo, kiu estas tio, kion vi nomas perispirito, havigas al vi la ŝlosilon de ĉiuj materiaj spiritismaj fenomenoj. Mi pensas, ke mi respondis sufiĉe klare, por esti ĝuste komprenata.”

*Rimarko.* Mi atentigas la leganton pri la unua frazo de ĉi tiu respondo, nome: *Ĉi tiu respondo ANKORAŬ ne alportos tion, kion vi deziras.* La Spirito perfekte komprenis, ke ĉiujn antaŭajn demandojn mi faris, nur por veni al ĉi tiu, kaj aludas mian penson, kiu ja atendis tute alian respondon, t. e. la jesigon de mia ideo pri la maniero, kiel Spirito movas tablon.

X. Ĉu la Spiritoj, kiujn li helpe vokas, estas malsuperaj ol li? ĉu al lia dispono?

“Ili preskaŭ ĉiam estas samrangaj kiel li: ili ofte venas memvole.”

XI. Ĉu ĉiuj Spiritoj kapablas okazigi tiajn fenomenojn?

“La Spiritoj, kiuj okazigas tiajn efikojn, estas ĉiam malsuperaj Spiritoj, kiuj ankoraŭ ne liberiĝis de ĉiu materia influo.”

XII. Ni komprenas, ke la Superaj Spiritoj ne okupas sin pri aferoj, kiuj staras tre malalte rilate al ili; sed ni demandas, ĉu, dank’al sia pli subtila esteco, ili kapablus okazigi tiujn fenomenojn, se tio estus ilia volo?

“La Superaj Spiritoj havas la forton moralan, kiel la ceteraj havas la forton fizikan; kiam ili bezonas ĉi tiun forton, tiam ili servigas al si tiujn, kiuj ĝin havas.

Ĉu oni jam ne diris al vi, ke ili uzas malsuperajn Spiritojn, kiel vi uzas ŝarĝoportistojn?”

*Rimarko.* Estas dirite, ke la “denseco” de la perispirito — se oni povas uzi tian esprimon — diversas laŭ la stato de la mondoj; ŝajnas, ke ĝi diversas ankaŭ en la sama mondo laŭ la individuoj. Ĉe la *morale* progresintaj Spiritoj la perispirito estas pli subtila kaj similas tiun de la altklasaj Spiritoj; ĉe la malsuperaj Spiritoj, kontraŭe, ĝi similas la materion, kaj ĝuste pro tio la malaltklasaj Spiritoj tiel longe konservas la iluziojn de sia surtera vivo: tiuj pensas kaj agas, kvazaŭ ili ankoraŭ vivus; ili nutras la samajn dezirojn kaj, oni eble povus diri, la saman voluptamon. Tiu malsubtileco de la perispirito, havigante al ĉi tiu pli da *parencеco* kun la materio, faras la malsuperajn Spiritojn pli taŭgaj por la fizikaj manifestiĝoj. Pro tiu sama kaŭzo iu societa homo, sin donanta al intelektaj verkoj kaj kies korpo estas malfortika kaj delikata, ne povas levi pezan ŝarĝaĵon, kiel ĝin faras ŝarĝoportisto. Ĉe tiu homo la materio estas iel malpli kompakta, la organoj estas malpli fortikaj; li havas malpli da nerva fluidaĵo. Ĉar la perispirito rilatas al la Spirito, kiel la korpo al la homo, kaj ĉar ĝia denseco estas rekte proporcia al la klaso de la Spirito, tial la pli granda denseco de la perispirito ĉe la malsuperaj Spiritoj anstataŭas la muskolan forton, t. e. havigas al ĝiaj fluidaĵoj, necesaj por la manifestiĝoj, pli grandan potencon, ol ĉe tiuj, kies naturo estas pli etereca. Dezirante fari tiajn efikojn, altklasa Spirito agas tiel, kiel inter ni la malfortikaj homoj: li venigas por tio *Spiriton-metiiston*.

XIII. Se ni bone komprenis, kion vi diris, la vivoprincipo troviĝas en la universa fluidaĵo; la Spirito ĉerpas el tiu fluidaĵo la duonmaterian envolvaĵon, el kiu konsistas lia perispirito, kaj ĝuste per tiu fluidaĵo li agas sur la inertan materion. Ĉu estas ja tiel?

“Jes; efektive li animas la materion per ia nenatura vivo: la materio estas animita de la animala vivo. La tablo, kiu sin movas sub viaj manoj, vivas simile al animalo; ĝi per si mem obeas la inteligentan estulon. Ne ĉi tiu ĝin pelas, kiel homo movas ŝarĝaĵon; kiam la tablo leviĝas, ne la Spirito ĝin levas materiale, sed tio estas la tablo animita, kiu obeas la impulson de la Spirito.”

XIV. Kia estas la rolo de la mediumo en tiu fenomeno?

“Mi ĝin jam diris: la propra fluidaĵo de la mediumo kombiniĝas kun la universa fluidaĵo, kiun la Spirito kolektas al si; estas necesa la kuniĝo de ĉi tiuj du fluidaĵoj, t. e. de la fluidaĵo animaligita kun la universa fluidaĵo, por ke la tablo ricevu vivon. Sed ja rimarku, ke tia vivo estas nur momenta: ĝi estingiĝas kune kun la agado kaj ofte antaŭ ol ĉi tiu finiĝas, tuj kiam la kvanto da fluidaĵo jam ne sufiĉas, por ĝin tenadi.”

XV. Ĉu Spirito povas agadi sen la kunhelpo de mediumo?

“Li povas agadi sen la konscio de la mediumo, t. e. multaj homoj, ĉe iuj fenomenoj, servas preterkonscie kiel helpantoj al la Spirito. La Spirito ĉerpas el tiuj, kiel el fonto, la animaligitan fluidaĵon, kiun li bezonas; tial la kunhelpo de iu mediumo, kiel vi ĝin komprenas, ne ĉiam estas necesa, kio okazas precipe ĉe la spontaneaj fenomenoj.”

XVI. Ĉu, animita, la tablo agadas inteligente? ĉu ĝi pensas?

“Tiel same kiel bastono, per kiu vi faras inteligentan signon. Kio okazas estas ja tio, ke la vivipovo, per kiu ĝi estas animita, ebligas al ĝi obei la impulson de iu inteligento. Notu do bone al vi, ke tablo moviĝanta ne fariĝas **Spirito** kaj per si mem havas nek pensokapablon nek volon.”

*Rimarko.* En la ordinara parolado ni ofte uzas analogan esprimon; pri rado, rapide turniĝanta, ni diras, ke ĝi estas *animita* per rapida movado.

XVII. Kiu estas la pli influa kaŭzo por la okazigo de tiu fenomeno: ĉu la Spirito aŭ la fluidaĵo?

“La Spirito estas la kaŭzo, la fluidaĵo estas la ilo: ambaŭ estas necesaj.”

XVIII. Kian rolon ludas do la volo de la mediumo en tiu okazo?

“Ĝi altiras la Spiritojn kaj ilin kunhelpas ĉe la impulso, kiun ili donas al la fluidaĵo.”

— Ĉu la agado de la volo estas ĉiam nepre necesa?

“Ĝi pligrandigas la forton, sed ĝi ne ĉiam estas necesa, ĉar la moviĝado povas fariĝi kontraŭ, eĉ malgraŭ

tiu volo, kio pruvas, ke ekzistas ia kaŭzo, nedependanta de la mediumo.”

*Rimarko.* La kontakto de la manoj ne ĉiam estas necesa por la movado de iu objekto. Ĝi plej ofte estas necesa nur por la unua impulso, sed, unu fojon animita, la objekto povas obei la volon de la Spirito sen ia materia kontakto; ĉi tio dependas, aŭ de la potenco de la mediumo, aŭ de la naturo de la Spirito. Eĉ iu unua kontakto ne ĉiam estas nepre necesa, kion pruvas spontaneaj movoj kaj delokigoj, kiujn neniu ekpensis estigi.

XIX. Kial ne ĉiuj homoj egale kapablas al sama efiko, kaj kial la mediumoj ne havas ĉiuj saman potencon?

“Tio dependas de la indiviudua organa strukturo kaj de la pli aŭ malpli granda facileco, kun kiu povas fariĝi la interkombiniĝo de la fluidaĵoj; plue, la Spirito de la mediumo pli aŭ malpli simpatias kun la aliaj Spiritoj, kiuj trovas ĉe li la necesan fluidaĵan potencon. Fariĝas kun tiu potenco tio sama, kio fariĝas kun tiu de la magnetizistoj, kiuj ĝin ne posedas en egala grado. En ĉi tiu rilato estas personoj tute ne magnetizeblaj; aliaj, ĉe kiuj la kombiniĝo fariĝas nur per peno de ilia volo; aliaj, fine, ĉe kiuj ĝi fariĝas tiel nature kaj facile, ke ili tion eĉ ne rimarkas kaj servas kiel ilo preterkonscie, kiel mi antaŭe diris.” (Vd. tuj post ĉi tiu ĉapitro la ĉapitron pri la **Spontaneaj manifestiĝoj**.)

*Rimarko.* La magnetismo sendube estas la principo de ĉi tiuj fenomenoj, sed ne tia, kia oni ordinare ĝin komprenas; tion pruvas la fakto, ke tre potencaj magnetizistoj ne igus moviĝi unupiedan tableton kaj ke al iuj personoj, nekapablaj magnetizi iun ajn, eĉ infanon, sufiĉas surmeti la fingrojn sur pezan tablon, por ke ĝi agitiĝu. Sekve, se la mediuma potenco ne estas proporcia al la potenco magneta, ekzistas do ia alia kaŭzo.

XX. Ĉu la tiel kvalitigataj “elektraj” homoj povas esti rigardataj kiel mediumoj?

“Tiaj homoj ĉerpas el si mem la fluidaĵon necesan por la okazigo de la fenomeno kaj povas agadi sen la kunhelpo de aliaj Spiritoj. Ili do ne estas mediumoj laŭ

la senco, kiun oni atribuas al ĉi tiu vorto; tamen ankaŭ povas okazi, ke iu Spirito ilin helpas kaj uzas iliajn naturajn kapablojn.”

*Rimarko.* Ŝajnas, ke fariĝas kun tiaj homoj tio sama, kio kun la somnambuloj, kiuj povas agadi kun aŭ sen la kunhelpo de iu alia Spirito. (Vd., en la ĉapitro pri la *Mediumoj*, la parton rilatan al la somnambuloj-mediumoj.)

XXI. Ĉu la Spirito, kiu agas sur la solidajn korpojn, por ilin movi, troviĝas en la substanco mem de tiuj korpoj aŭ ekster ĝi?

“Okazas ambaŭ aferoj. Ni jam diris, ke la materio prezentas nenian baron al la Spiritoj; ili penetras ĉion; ia parto de la perispirito kvazaŭ identiĝas kun la objekto, kiun ĝi penetras.”

XXII. Kiel la Spirito helpas al si, por frapi? Ĉu li ekprenas ian materian objekton?

“Ne, same kiel li ne uzas siajn brakojn, por levi tablon. Vi ja scias, ke li nenian martelon havas je sia dispono. Lia martelo estas la kombinaĵo el fluidaĵoj, kiun li agigas per sia volo, por movi aŭ por frapi. Kiam li movas ion, la lumo vidigas al vi la movojn; kiam li frapas, la aero aŭdigas al vi la sonon.”

XIII. Mi komprenas, ke tiel estas, kiam li frapas malmolan korpon; sed kiel li povas aŭdigi bruon aŭ artikitajn sonojn en la fluideca maso de la aero?

“Ĉar li agas sur la materion, tial li agas sur la aeron, tiel same bone kiel sur la tablon. Rilate la artikitajn sonojn, li povas ilin imiti, kiel ĉiajn aliajn bruojn.”

XXIV. Vi diras, ke la Spirito ne uzas la manojn por deloki la tablon, tamen, ĉe iuj vidmanifestiĝoj, oni vidis manojn, kies fingroj flugadis sur klavaro, frapadis la klavojn kaj aŭdigadis sonojn. Ĉu ne ŝajnas, ke en ĉi tiu okazo la movadon de la klavoj kaŭzas la premado de la fingroj? Ĉu tiu premado ne estas ankaŭ rekta kaj reala tiam, kiam ĝi sentebliĝas sur ni mem, kiam tiuj manoj postlasas premsignojn sur la haŭto?

“La naturon de la Spiritoj kaj ilian agmanieron vi povas kompreni sole per komparoj, kiuj pri ambaŭ aferoj havigas al vi nur neplenan ideon, kaj estas eraro

ĉiam voli similigi iliajn procedojn al viaj. Iliaj procedoj devas respondi al ilia propra strukturo. Ĉu mi jam ne diris al vi, ke la fluidaĵo de la perispirito penetras la materion kaj kun ĉi tiu identiĝas, ke ĝi animas la materion per nenatura vivo? Nu! kiam la Spirito metas la fingrojn sur la klavojn, li ilin efektive tien metas kaj eĉ movas la klavojn; sed ne per muskola forto li premas la klavon: li animas la klavon, kiel li animas la tablon, kaj la klavo, obeante lian volon, moviĝas kaj frapas la kordon. Eĉ okazas ĉi tie io, kion vi malfacile komprenos: iuj Spiritoj estas tiel malmulte progresintaj kaj, en komparo kun la altklasaj Spiritoj, tiel materiecaj, ke ili ankoraŭ portas la iluziojn de la surtera vivo kaj kredas, ke ili agas tiel same, kiel en la tempo, kiam ili havis sian korpon; ili ne konscias la veran kaŭzon de la efikoj, kiujn ili estigas, pli klare, ol kiel kamparano komprenas la teorion de la sonoj, kiujn li aŭdigas; demandu ilin, kiel ili ludas pianon, kaj ili respondos, ke ili frapas la klavojn per siaj fingroj, ĉar ili ja kredas, ke ili frapas. Ĉe ili la efiko estiĝas sen tio, ke ili scius kiel, kaj tamen per ilia volo. Tio sama okazas, kiam ili sin esprimas per vortoj."

*Rimarko.* El ĉi tiuj klarigoj elfluas la konkludo, ke la Spiritoj povas okazigi ĉiajn efikojn, kiujn ni mem okazigas, sed per rimedoj propraj al ilia strukturo; kelkaj fortoj, propraj al ili, anstataŭas la muskolojn, kiujn ni bezonas por agadi, tiel same, kiel la gesto, ĉe mutulo, anatataŭas la parolon, mankantan al li.

XXV. Inter la fenomenoj, citataj kiel pruvantaj la agadon de ia kaŝita potenco, estas kelkaj, kiuj evidente kontraŭas ĉiujn konatajn leĝojn de la Naturo: ĉu en tiuj okazoj la dubo ne ŝajnas pravigebla?

"Tiel estas, ĉar al homo ankoraŭ multe mankas, ĝis li konos ĉiujn leĝojn de la Naturo; se li ilin ĉiujn konus, li estus Supera Spirito. Ĉiu tago kontraŭasertas tiujn, kiuj, opiniante sin ĉiosciantoj, pretendas trudi limojn al la Naturo, kaj malgraŭ tio ili ne fariĝas malpli arogantaj. Senĉese senvualigante novajn misterojn, Dio avertas la homon, ke ĉi tiu devas malfidi siajn konojn, ĉar

venos tago, kiam la klereco de la plej klera estos konfuzita (*). Ĉu vi ĉiutage ne havas ekzemplojn de tio, vidante korpojn en movado kapabla venki la pezoforton? Ĉu kuglego, pafita en la aeron, ne superas momente tiun forton? Kompatindaj homoj, vi, kiuj konsideras vin tre kleraj kaj kies malsaĝa vantamo ĉiumomente fiaskas, eksciu do, ke vi estas ankoraŭ tre malgrandaj.”

**75.** Ĉi tiuj respondoj estas klaraj, kategoriaj kaj ne dubasencaj; el ili rezultas ĉi tiu plej grava punkto, nome, ke la universa fluidaĵo, en kiu sidas la principo de la vivo, estas la ĉefa aganto de la manifestiĝoj, kaj ke tiu aganto sian impulson ricevas de la Spirito, ĉu tiu ĉi estas enkarniĝinta, ĉu vaganta. Plidensigita, tiu fluidaĵo konsistigas la perispiriton aŭ duonmaterian envolvaĵon de la Spirito. Kiam ĉi tiu estas enkarniĝinta, tiam la perispirito estas ligita al la materio de la korpo; kiam la Spirito vagas, tiam la perispirito estas libera. Kiam la Spirito sin trovas en la karno, la substanco de la perispirito troviĝas pli aŭ malpli forte ligita, se tiel diri, pli aŭ malpli adherinta. Ĉe iuj homoj, dank'al ilia strukturo, tiu fluidaĵo kvazaŭ eliĝas, kaj ĝuste tiuj homoj estas la mediumoj por fizikaj influoj. La eliĝado de la animaligita fluidaĵo povas esti pli aŭ malpli granda, kaj ties kombiniĝo pli aŭ malpli facila: el tio la pli aŭ malpli potencaj mediumoj; cetere tiu eliĝado ne estas konstanta, kio klarigas la intermitecon de la mediuma potenco.

**76.** Ni faru komparon. Kiam iu ekdeziras agi materie sur iom malproksiman punkton, tion volas la pensado, sed la pensado sola ne iros kaj frapos tiun punkton; ĝi bezonas ian perilon, kiun ĝi direktas: bastonon, ĵetaĵon, aerblovon aŭ alian. Rimarku ankaŭ, ke la pensado ne agas rekte sur la bastonon, car, se ĉi tiu ne estos tuŝita, ĝi ne agos mem. La pensado, kiu estas nenio alia, ol la Spirito enkarniĝinta en nin, estas ligita al la

(*) Ĉe Jesaja, 44: 25: “Mi estas la Eternulo, kiu... repuŝas la saĝulojn malantaŭen kaj malsaĝigas ilian scion”. — *La Trad.*

korpo pere de la perispirito. Nu, ĝi ne povas agi sur la korpon sen la perispirito, tiel same, kiel ĝi ne povas agi sur la bastonon sen la korpo; ĝi agas sur la perispiriton, ĉar ĉi tiu estas la substanco, al kiu ĝi estas pli parenca; la perispirito agas sur la muskolojn, la muskoloj ekprenas la bastonon, kaj la bastono frapas la celitan punkton. Kiam la Spirito ne estas enkarniĝinta, tiam fariĝas necesa ia fremda helpilo; tia helpilo estas fluidaĵo, per kiu li faras la objekton taŭga por obei la impulson de lia volo.

**77.** Sekve, kiam iu objekto estas ekmovata, levata aŭ ĵetata en la aeron, tio ne signifas, ke la Spirito ĝin ekprenas, pelas kaj levas, kiel ni tion farus per la mano: la Spirito, por tiel diri, **saturas** ĝin per sia fluidaĵo, kombinita kun tiu de la mediumo, kaj la objekto, tiamaniere momente vivigita, agas, kiel agus vivanta estaĵo, nur kun tiu diferenco, ke, ne havante propran volon, ĝi obeas la impulson de la volo de la Spirito.

Ĉar la vivofluidaĵo, kiun la Spirito iamaniere elĵetas, havigas al la inertaj korpoj ian nenaturan momentan vivon, kaj ĉar la perispirito estas nenio alia ol tiu sama vivofluidaĵo, tial sekvas, ke, kiam enkarniĝinta, tio estas la Spirito mem, kiu havigas vivon al sia korpo pere de sia perispirito, al kiu li estas ligita tiel longe, kiel tion ebligas la organismo; kiam li foriĝas, tiam la korpo mortas. Nun, se anstataŭ tablo, oni eltranĉas el la ligno statuon kaj agadas sur tiun statuon, simile kiel sur la tablon, oni ricevas statuon, kiu moviĝas, kiu frapas, kiu respondas per movoj kaj per frapoj; oni do havas, unuvorte, statuon, momente animitan de nenatura vivo; kiel oni paroladis pri "parolantaj tabloj"; tiel ankaŭ nun oni parolus pri "parolantaj statuoj". Kiom da lumo ĉi tiu teorio verŝas sur multegon da fenomenoj, ĝis tiam ne solvitaj! Kiom da alegorioj kaj da misteraj efikoj ĝi klarigas!

**78.** Malgraŭ tio la nekredemuloj kontraŭparolas, dirante, ke la levado de la tabloj sen apogo estas ne ebla, ĉar ĝi estas kontraŭa al la leĝo de la pezoforto. Mi respondas al ili, dirante, unue, ke ilia neado ne est-

as pruvo; due, ke, se la fakto ja ekzistas, ĝi vane kontraŭus ĉiujn konatajn leĝojn, kio pruvas unu aferon, nome, ke ĝi fariĝas laŭ leĝo nekonata, kaj la neantoj ne povas vante pretendi, ke ili konas ĉiujn leĝojn de la Naturo. Mi ĵus klarigis tiun leĝon, sed tio ne estas motivo, ke ili ĝin akceptus ĝuste tial, ĉar ĝin malkaŝis Spiritoj, kiuj demetis sian surteran vestaĵon, anstataŭ Spiritoj, kiuj ankoraŭ portas tiun vestaĵon kaj sidas en la Akademio. Tiel do, se la Spirito de Arago (*), vivanta sur la Tero, estus koniginta tiun leĝon, tiam ili ĝin estus akceptintaj kun fermitaj okuloj, sed konigita de la Spirito Arago, kiel homo mortinta, ĝi estas ja utopio — kial? ĉar ili pensas, ke, se Arago mortis, sekve ĉio en li ankaŭ mortis. Mi tute ne intencas ilin deadmoni de ilia opinio; tamen, ĉar tiu kontraŭdiro povus konfuzi iujn homojn, mi provos respondi al ili, rigardante la aferon el ilia vidpunkto, t. e. por momento flanken metante la teorion de la nenatura animado.

**79.** Kiam oni senaerigas la kloŝon de vakupumpilo, tiu kloŝo algluiĝas al la plataĵo tiel forte, ke estas ne eble levi ĝin dank'al la pezo de la aerkolono, kiu ĝin premas. Se oni enlasas la aeron, oni povas plej facile levi la kloŝon, ĉar la aero interna kontraŭpezas la aeron eksteran; sed, se ĝi estos sen aero, ĝi restados plue sur la plataĵo laŭ la leĝo de la pezoforto. Nun, oni premu la internan aeron, ke ĝi fariĝu pli densa ol tiu ekstera: la kloŝo leviĝos malgraŭ la pezoforto; se la aerfluo estos rapide kaj ekstreme forta, la kloŝo povos esti tenata en la aero sen ia **videbla** apogo, simile al tiuj homfiguretoj, kiujn oni igas turniĝadi sur akvoŝprucaĵo. Kial do la universa fluidaĵo, **kiu estas la elemento de ĉia materio**, amasigite ĉirkaŭ la tablo, ne havus la povon malpliigi aŭ pliigi ties relativan specifan pezon, simile kiel la aero faras rilate la kloŝon de la vakupumpilo, kiel

(*) Francisko Arago, franca astronomo kaj fizikisto, 1786-1853. Liaj laboroj pri la polarizo de la lumo, la mezurado de la refraktindicoj de la gasoj kaj de la rapideco de la sono, kaj liaj eksperimentoj pri la elektromagnetismo fariĝis famaj. — *La Trad.*

faras la hidrogeno en la balonoj, por kio ne estas necese nuligi la leĝojn de la pezoforto? Ĉu vi konas ĉiujn proprecojn kaj la tutan potencon de tiu fluidaĵo? Ne; nu bone, vi do ne malkonfesu fakton nur tial, ĉar vi ne povas ĝin klarigi.

**80.** Ni revenu al la teorio de la movado de la tablo. Se, per la montrita rimedo, Spirito povas levi tablon, li do povas levi ĉian alian objekton, ekzemple brakseĝon. Se li povas levi brakseĝon, li do povas, per sufiĉa forto, levi ĝin ankaŭ tiam, se sur ĝi sidas homo. Jen do la klarigo de tiu fenomeno, kiun S-ro Home cent fojojn okazigis sur si kaj sur aliaj homoj; li ĝin ripetis dum sia vizito en Londono, kaj por pruvi, ke la spektatorojn ne trompas ia optika iluzio, li per krajono faris markon sur la plafono kaj oni pasis sub li. Oni scias, ke S-ro Home estas potenca mediumo por fizikaj efikoj: en tiu okazo li estis samtempe la efika kaŭzo kaj la objekto.

**81.** Mi ĵus parolis pri la ebla pligrandiĝo de la pezo; tio estas ja fenomeno, kiu kelkafoje okazas kaj kiu havas nenion pli eksterordan, ol la miriga rezisto de la kloŝo sub la premo de la atmosfera kolono. Oni jam vidis, sub la influo de certaj mediumoj, ke tre malpezaj objektoj kontraŭstaras per sama rezisto kaj poste subite cedas al plej malgranda peno. Ĉe la supre dirita eksperimento la kloŝo, en la realeco, ne pezas mem pli aŭ malpli multe, sed ĝi ŝajnas pli peza pro la efiko de la ekstera kaŭzo, aganta sur ĝin; tio sama kredeble okazas ĉi tie. La tablo ĉiam havas la saman propran pezon, ĉar ĝia maso ne pligrandiĝis, sed ia ekstera forto kontraŭstaras ĝian movadon: tiu kaŭzo povas troviĝi en la ĉirkaŭaj fluidaĵoj, kiuj penetras en la tablon, kiel en la aero troviĝas la kaŭzo, kiu ŝajne pliigas aŭ malpliigas la pezon de la kloŝo. Se vi faros la eksperimenton kun la kloŝo de la vakupumpilo antaŭ neklera vilaĝano, ne komprenanta, ke tio, kio agas, estas la aero, kiun li ne vidas, ne estos por vi malfacile konvinki lin, ke tio estas la diablo.

Oni eble diros, ke, se tiu fluidaĵo estas senpeza, ĝia plidensiĝo ne povas do pliigi la pezon de iu objekto:

konsentite; sed rimarku, ke mi uzis la vorton **plidensiĝo** nur por komparo, sed ne por absoluta identigo kun la aero. Ĝi estas senpeza: tiel estu; nenio tamen tion pruvas; ĝia intima naturo estas al ni nekonata, kaj ni ankoraŭ staras malproksime de tio, ke ni konus ĉiujn ĝiajn proprecojn. Antaŭ ol eksperimenti pri la pezo de la aero, oni ne supozis la efikojn de tiu sama pezo. Ankaŭ la elektron oni alkalkulas al la senpezaj fluidaĵoj, tamen iu korpo povas esti retenata de elektra fluo kaj forte kontraŭstari al iu, kiu ĝin volas levi: ĝi do fariĝis ŝajne pli peza. El tio, ke oni ne vidas ian subtenilon, estus nelogike konkludi, ke ĝi ne ekzistas. Spirito povas do disponi levilojn, al ni nekonatajn: la Naturo ĉiutage pruvas al ni, ke ĝia potenco ne havas siajn limojn ĉe la atesto de la homaj sentumoj.

Nur el simila kaŭzo oni povas klarigi tiun kuriozan fenomenon, de kiu oni vidis plurajn ekzemplojn, ke malforta kaj delikata homo per du fingroj kaj senpene, kvazaŭ plumon, levis fortikan kaj korpulentan viron kune kun la seĝo, sur kiu tiu sidis. Kio pruvas ian kaŭzon fremdan al iu, tio estas la intermiteco de lia kapablo okazigi la fenomenojn.

———————

ĈAPITRO V

# PRI LA SPONTANEAJ FIZIKAJ MANIFESTIĜOJ

*Bruoj, bruegoj kaj tumultoj. Ĵetado de objektoj. Alportoj*

**82.** La fenomenoj, kiujn mi ĵus pritraktis, estas okazigataj sed iafoje ili havas lokon spontanee, sen la partopreno de ies volo, eĉ kontraŭ ĉies volo, ĉar ili ofte fariĝas tre ĝenaj. Kio cetere forigas la supozon, ke ili povas esti efiko de imagemo superekscitita de la spiritismaj ideoj, tio estas, ke ili okazas ĉe homoj, kiuj pri tio neniam aŭdis, kaj en momento, kiam ili tion tute ne atendis. Ĉi tiuj fenomenoj, kiujn oni povus nomi "natura praktika Spiritismo", estas tre gravaj, ĉar ili ne allasas suspekton pri ia sekreta interkonsento; tial mi rekomendas al ĉiu, kiu sin okupas pri spiritismaj fenomenoj, rikolti ĉiujn tiajn faktojn, kiujn li ekscios, sed precipe zorge konstati ilian realecon, per detala studado de la cirkonstancoj, por certiĝi, ke lin ne trompas ia iluzio aŭ mistifiko.

**83.** El ĉiuj manifestiĝoj de Spiritoj la plej simplaj kaj plej oftaj estas bruoj kaj frapoj; precipe ĉe tiuj oni devas antaŭgardi sin kontraŭ ia iluzio, ĉar multego da naturaj kaŭzoj povas ilin okazigi: la vento, kiu siblas aŭ agitas iun objekton, iu korpo, kiun oni preterkonscie movas, iu akustika efiko, iu kaŝita besto, iu insekto k. a., eĉ petolaĵoj de trivialaj ŝercemuloj. Cetere la bruoj, farataj de Spiritoj, havas tute apartan karakteron, kun tre diversaj intenseco kaj tembro, kiuj faras ilin facile rekoneblaj kaj ne ebligas, ke oni ilin intermiksu kun la kraketado de ligno, la krepitado de la fajro aŭ la mo-

notona tiktako de horloĝo; ili estas sekaj frapoj, jen surdaj, malfortaj kaj delikataj, jen klaraj, netaj, iafoje tondraj, aŭdiĝantaj ne ĉiam en sama loko kaj ripetiĝantaj sen ia mekanika reguleco. El ĉiuj kontrolrimedoj la plej efika, tiu, kiu povas allasi nenian dubon pri ilia origino, estas la obeado al la volo de iu, kiu ilin observas. Se la frapoj aŭdiĝas en iu antaŭdifinita loko, se ili per sia nombro aŭ intenseco respondas al la penso, oni do ne povas malkonfesi ĉe ili ian inteligentan kaŭzon; tamen la neobeado ne ĉiam estas kontraŭa pruvo.

**84.** Nun ni konsentu, ke per detala konfirmado oni ricevas la certecon, ke la bruoj, aŭ ĉiaj aliaj efikoj, estas manifestiĝoj realaj: ĉu estas racie timiĝi ĉe ili? Certe ne, ĉar en nenia okazo ekzistas en ili eĉ la plej malgranda danĝero; nur tiaj homoj, kiujn oni konvinkas, ke tio estas la diablo, povas esti malagrable impresitaj de ili, simile al la infanoj, kiujn oni timigas per la lupfantomo aŭ la ogro. Ĉi tiuj manifestiĝoj, oni devas konsenti, en iuj cirkonstancoj ekprenas malagrablajn amplekson kaj persiston, de kiuj oni nature ekdeziras liberiĝi. Ĉi tiu temo necesigas klarigon.

**85.** Mi diris, ke la fizikaj manifestiĝoj celas turni nian atenton al io kaj konvinki nin pri la ĉeesto de ia forto supera ol la homo. Mi diris ankaŭ, ke la altklasaj Spiritoj sin ne okupas pri tiaj manifestiĝoj: por ĉi tiuj ili servigas al si malsuperajn Spiritojn tiel same, kiel ni uzas servantojn por maldelikataj taskoj, kaj tio por la celo, kiun mi ĵus montris. Kiam tiu celo estas trafita, la materia manifestiĝo ĉesas, ĉar jam nenecesa. Unu aŭ du ekzemploj pli bone komprenigos la aferon.

**86.** Antaŭ pluraj jaroj, ĉe la komenco de mia studado pri Spiritismo, unu vesperon okupite de iu laboro pri ĉi tiu objekto, mi ekaŭdis ĉirkaŭ mi frapojn, kiu daŭris kvar sinsekvajn horojn. Tio estis la unua fojo, ke al mi okazis io simila; mi konstatis, ke ili havis ne ian okazan kaŭzon, sed en tiu momento mi ne povis ekscii pli ol tion. En tiu tempo mi ofte vidiĝis kun bonega skribiva mediumo. Jam la sekvantan tagon mi

demandis la Spiriton, kiu komunikiĝadis per li, pri la kaŭzo de tiuj frapoj. **Tio estis**, li respondis al mi, **unu el viaj familiaraj Spiritoj, kiu volis paroli al vi**. — Kaj kion li volis diri al mi? Respondo: Vi mem povas pridemandi lin, ĉar li estas ĉi tie. — Kiam mi do pridemandis lin, li konigis sin sub alegoria nomo. (Mi poste eksciis de aliaj Spiritoj, ke li apartenas al tre alta ordo kaj ke li sur la Tero ludis gravan rolon.) Li signis eraroj en mia laboraĵo, montrante al mi **la liniojn**, sur kiuj ili troviĝis, donis al mi utilajn kaj saĝajn konsilojn, kaj aldiris, ke li estos ĉiam apud mi kaj venos ĉe mia alvoko ĉiam, kiam mi deziros demandi lin pri io. Efektive, de tiam tiu Spirito min neniam forlasis. Multe da pruvoj li donis al mi pri granda supereco, kaj lia kunlaborado **bonvola** kaj **efika** estis por mi evidenta en la aferoj, kiel de la materiala vivo, tiel ankaŭ koncernantaj la metafizikan sferon. De post nia unua renkontiĝo la frapoj ĉesis. Kion do li ja celis? Regule komunikiĝi kun mi, kaj por tio li bezonis avizi min. Post kiam estis farita kaj klarigita la avizo kaj starigitaj la regulaj interrilatoj, la frapoj fariĝis jam senutilaj, kaj tial ili ĉesis. Oni ne plu frapas la tamburon, por veki la soldatojn, se ili jam estas sur la piedoj.

Iom simila fakto okazis al unu el miaj amikoj. De kelka tempo lia ĉambro tondradis de diversaj bruoj, kiuj jam fariĝis tre tedaj. Ricevinte la oportunan okazon, por pridemandi per skribiva mediumo la Spiriton de sia patro, li eksciis, kion tiu deziras, faris tion, kio estis al li rekomendita, kaj de tiam li nenion pli aŭdis. Oni notu al si, ke la homoj, kiuj disponas ian regulan kaj facilan rimedon, por komunikiĝi kun la Spiritoj, multe pli malofte ricevas tiaspecajn manifestiĝojn, kaj ĉi tio estas memkomprenebla.

**87.** La spontaneaj manifestiĝoj ne ĉiam limiĝas je bruoj kaj frapoj; ili iafoje degeneras en efktivan bruegon kaj en tumultojn: mebloj kaj diversaj objektoj estas renversataj, ĉiaspecaj aĵoj estas ĵetataj de ekstere, pordoj kaj fenestroj estas malfermataj kaj fermataj de nevideblaj manoj, kaheloj estas disrompataj; ĉion ĉi oni ne povas atribui al ia iluzio.

La renverso estas ofte ja efektiva, sed iafoje ĝi estas nur ŝajna. En apuda ĉambro aŭdiĝas tumulta bruego, krakado de vazaro, kiu falas kaj laŭte frakasiĝas, ruliĝado de ŝtipoj sur la planko; oni plej rapide enkuras, sed oni trovas ĉion kvieta kaj en ordo; poste, oni apenaŭ eliris, jen la tumulto rekomenciĝas.

**88.** Tiaj manifestiĝoj estas nek maloftaj, nek novaj; kredeble malmulte da lokaj kronikoj ne raportas ion similan. La timemo sendube troigis multe da faktoj, kiuj de unu buŝo en alian certe ekprenis treege ridindan amplekson; kun la helpo de la superstiĉo, la domoj, kie ili okazis, estis rigardataj kiel lokoj vizitataj de la diablo, kaj de tio originis ĉiaj supernaturaj aŭ teruraj rakontoj pri reaperantoj. De sia flanko, la trompistoj ne preterlasis tian belan okazon por ekspluati la homan kredemon, ofte profite al personaj interesoj. Cetere oni facile imagas al si, kian impreson tiaj faktoj, eĉ en la limoj de la realeco, povas fari sur homoj kun malforta karaktero kaj dank'al la edukado antaŭinklinaj al superstiĉaj ideoj. La plej trafa rimedo, por antaŭforigi la eblajn malbonaĵojn de tiaj manifestiĝoj, ĉar ties fariĝon oni ne povas malhelpi, estas konigi la veron. La plej simplaj aferoj prenas timegigan aspekton, kiam oni ne konas ilian kaŭzon. Kiam la homoj familiariĝos kun la Spiritoj kaj tiuj, al kiuj tiuj Spiritoj manifestiĝas, ne kredos, ke ili havas aferon kun ia legio da demonoj, ili ne timos plu la Spiritojn.

En la **Revue Spirite** oni povas legi pri pluraj ĉi-specaj aŭtentikaj faktoj, inter kiuj, ekzemple, la historio de frapanta Spirito, en Bergzabern, kies malicaj petolaĵoj daŭris pli ol ok jarojn (n-roj de Majo, Junio kaj Julio 1858); tiu en Dibbelsdorf (Aŭgusto 1858); tiu de la panisto en Grandes-Ventes, proksime de Dieppe (Marto 1860); tiu ĉe la strato Noyers, en Parizo (Aŭgusto 1860); tiu de la Spirito en Castelnaudary, titolita **Historio de damnito** (Februaro 1860); tiu de la fabrikisto en Petersburgo (Aprilo 1860) kaj multe da aliaj.

**89.** Tiaspecaj faktoj ofte aspektas kiel efektivaj persekutoj. Mi konas ses fratinojn, kiuj loĝis en sama

domo, kaj kiuj dum pluraj jaroj ĉiumatene trovadis siajn vestojn dislokitaj, kaŝitaj eĉ sur la tegmento, dis-ŝiritaj kaj dispecigitaj, kiel ajn ili antaŭzorgis, enŝlosante siajn vestojn. Ofte okazis al homoj, kuŝantaj sur siaj litoj kaj **tute ne dormantaj**, vidi, ke oni agitas iliajn kurtenojn, abrupte fortiras iliajn litotukojn kaj kapkusenojn, levas ilin sur la matracoj, kaj eĉ oni ilin elĵetas el la litoj. Tiaj faktoj estas pli oftaj, ol kiel oni pensas, sed plej ofte tiuj homoj, kiuj suferas de ili, ne kuraĝas paroli pri tio pro moktimo. Estas konata al mi la iama kredo, ke oni povas resanigi homojn de tio, kion oni rigardadis kiel halucinojn, kuracante ilin, simile kiel la alienulojn, kio faris ilin efektive frenezaj. La Medicino ne povas kompreni ĉi tiujn aferojn, ĉar ĝi akceptas en ties kaŭzoj sole nur la elementon materian, el kio rezultas ofte pereigaj eraroj. La Historio iam rakontos iujn kuracprocedojn, uzatajn dum la dek-naŭa jarcento, kiel oni rakontas hodiaŭ iujn tiajn procedojn dum la Mezepoko.

Mi plene konsentas, ke iuj faktoj estas pikantaj petolaĵoj aŭ malicaĵoj, sed se ĉion bone konstatinte, oni venos al la konkludo, ke ili estas verko ne de homoj, oni devas ja konsenti, ke ili estas faroj aŭ de la diabloj, kiel diras unuj, aŭ de Spiritoj, kiel ni asertas: sed de kiaj Spiritoj?

**90.** La Superaj Spiritoj, simile kiel ĉe ni la dignaj kaj seriozaj homoj, ne faras al si amuzon el tumultado. Mi ofte venigis al mi tiajn bruemajn Spiritojn, por demandi ilin, kia motivo ilin instigas tiel malhelpi la alian trankvilecon. La plej multaj celas simple nur amuziĝi; tiuj estas Spiritoj prefere frivolaj, ol malicaj, kiuj ridas la ektimojn, kiujn ili naskas, kaj la senutilajn esplorojn, kiujn oni faras, por ektrovi la kaŭzon de la tumulto. Ili ofte alligiĝas al iu homo, kiun ili turmentetadas por plezuro kaj kiun ili persekutadas de unu loĝejo en alian; kelkaj alkroĉiĝas al iu loko, havante nenian motivon krom sia kaprico. Kelkafoje tio estas venĝo kontraŭ iu, kiel ni havos la okazon vidi.

Ĉe kelkaj okazoj ilia intenco estas pli laŭdinda: ili deziras altiri sur sin la atenton kaj ekrilati kun iu, ĉu

por fari utilan avizon al tiu persono, al kiu ili sin turnas, ĉu por peti ion por si mem. Kiel mi mem vidis, multaj petis preĝojn; aliaj petis, ke oni en ilia nomo plenumu ian promeson, kiun ili ne povis mem plenumi; aliaj, fine, por la intereso de sia trankvileco, deziras kompensi ian malbonan agon, kiun ili faris, kiam ankoraŭ vivantaj sur la Tero.

Entute estas eraro ilin timi; ilia ĉeesto eble estas ĝena, sed ne danĝera. Estas cetere komprenebla la deziro liberigi sin de ili, sed por tio oni faras ĝuste la malon de tio, kio estus necesa. Se tiuj estas amuziĝantaj Spiritoj, ju pli serioze oni rigardas la aferon, des pli ili persistas, simile kiel petolemaj infanoj des pli incitetas tiujn, kiujn ili vidas jam perdintaj la paciencon, kaj timigas malbravulojn. Se oni prenus la saĝan decidon ridi iliajn malbonajn pecojn, ili fine laciĝus kaj kvietiĝus. Mi konas homon, kiu, anstataŭ koleri, ilin ekscitadis kaj spite invitadis fari ion aŭ tion, en tia maniero, ke post kelke da tagoj ili ne revenis plu. Sed, kiel mi jam diris, aliaj tiel agas pro malpli frivola motivo; tial estas ĉiam utile ekscii, kion ili volas. Se ili petas ion, oni povas esti certa, ke de la momento, kiam ilia deziro estos kontentigita, iliaj vizitoj ĉesos. La plej bona rimedo eskcii tion estas elvoki la Spiriton pere de bona skribiva mediumo; laŭ liaj respondoj oni tuj vidas, kun kiu oni rilatas, kaj oni agas konsekvence. Se li estas malfeliĉa Spirito, la karitato ordonas, ke oni traktu lin laŭ la estimo, kiun li meritas; se li estas triviala ŝercemulo, oni povas agi kun li senceremonie; se li estas maliculo, oni petu Dion plibonigi lin. Ĉiaokaze la preĝo rezultas ĉiam bone; sed la seriozeco de la ekzorcizaj formuloj vekas ĉe ili ridon kaj al tiuj ili alligas nenian gravecon. Se oni povas ekrilati kun ili, estas necese malfidi la burleskajn kaj timegigajn titolojn, kiujn ili iafoje donas al si mem, por amuzi sin pri la homa kredemeco.

Mi pli detale revenos al ĉi tiu temo kaj pritraktos la kaŭzojn, kiuj ofte faras la preĝojn senefikaj, en la ĉapitroj pri la **hantataj lokoj** kaj pri la **obsedo**.

**91.** Kvankam realigataj de malsuperaj Spiritoj, ĉi tiuj fenomenoj tamen ofte estas iniciatoj de altklasaj

Spiritoj, kiuj celas konvinki nin pri la ekzisto de sen-korpaj estuloj kaj de ia potenco supera ol la homo. La postefiko, kiu el tio rezultas, la timo mem, kiun tio vekas, turnas al si ĉies atenton kaj fine malfermos la okulojn al la plej nekredemaj. Ĉi tiuj trovas pli oportune atribui ĉi tiujn fenomenojn al imagemo, klarigo simplaĉa kaj nenecesiganta aliajn; tamen, kiam objektoj estas malordigataj aŭ ĵetataj sur ies kapon, oni devus ja havi tre komplezeman imagpovon, por prezenti al si, ke tiaj aferoj ne estas realaj, dum tamen ili tiaj estas.

Se oni rimarkas ian ajn efikon, tiu efiko nepre havigas ian kaŭzon. Se **malvarma kaj trankvila** observado montras al ni, ke tiu efiko tute ne dependas de homa volo kaj de materiala kaŭzo, se, krom tio, ĝi donas al ni **evidentajn** signojn de inteligento kaj libera volo, **kio estas ĝia plej karakteriza trajto**, oni do ja devas atribui ĝin al ia kaŝita inteligento. Kiuj estas tiuj misteraj estuloj? Tion la spiritismaj studoj en la malplej kontestebla maniero instruas al ni, per la rimedoj, kiujn ili havigas al ni, por la komunikiĝado kun tiuj estuloj. Tiuj studoj instruas nin ankaŭ distingi tion veran de tio malvera, aŭ troigita, en la fenomenoj, kiujn ni ne ĉeestis mem. Ĉe iu stranga fakto, ekzemple bruo, movado, eĉ aperaĵo, la unua penso, kiu devas veni en nian kapon, estas tio, ke ĝi havas tute naturan kaŭzon, ĉar ĉi tiu estas la plej probabla. Ĉiaokaze oni devas plej zorge serĉi tiun kaŭzon kaj nur plenscie konsenti, ke en tio partoprenas Spiritoj: jen la sola, per kio oni ne faras al si iluziojn. Se iu homo, ekzemple, al kiu estus alproksimiĝinta neniu alia, ricevus survangon aŭ bastonbatojn sur la dorso, kion oni ja vidis, li ne povus dubi la ĉeeston de iu nevidebla estulo.

Oni devas gardi sin ne sole kontraŭ rakontoj, kiuj povas esti almenaŭ makulitaj per troigo, sed ankaŭ kontraŭ siaj propraj impresoj, kaj ne alkalkuli ian kaŝitan kaŭzon al ĉio, kion ajn oni ne komprenas. Multego da tre simplaj kaj tre naturaj kaŭzoj povas rezultigi efikojn ĉe la unua ekrigardo strangajn, kaj estus efektiva superstiĉo vidi ĉie Spiritojn okupitajn per renversado de mebloj, per disrompado de la teleraro, unuvorte per la

tuta vico da hejmaj malordoj, kiujn estus pli racie atribui al mallerteco.

**92.** La klarigo pri la movado de la inertaj korpoj nature aplikiĝas al ĉiuj spontaneaj faktoj, kiujn ni ĵus pritraktis. La bruoj, kvankam pli fortaj ol la frapoj en la tablo, venas de sama kaŭzo; ĵetas aŭ delokigas objektojn tiu sama forto, kiu levas ian ajn objekton. Cetere unu cirkonstanco ja subtenas ĉi tiun teorion. Oni povus demandi sin, kie en tiu cirkonstanco troviĝas ia mediumo. La Spiritoj sciigis min, ke en tia okazo ĉiam sin trovas iu, kies influo fariĝas sen lia konscio. La spontaneaj manifestiĝoj tre malofte okazas en senhomaj lokoj; ili okazas preskaŭ ĉiam en loĝataj domoj kaj dank'al la ĉeesto de iaj homoj, kiuj ilin influas preterkonscie. Tiaj homoj estas efektivaj mediumoj, kiuj tamen ne scias pri tiu sia naturdoto, kaj tial mi nomas ilin **naturaj mediumoj**; ili rilatas al la aliaj mediumoj, kiel la somnambuloj naturaj al la somnambuloj magnetaj, kaj estas tiel same observindaj kiel la aliaj.

**93.** La memvola aŭ pretervola partopreno de iu homo, dotita per speciala kapablo por la estigo de tiuj fenomenoj, ŝajnas necesa en la plimulto el la okazoj, kvankam la Spirito kelkafoje ŝajne agas per si mem; sed tiam li ĉerpus la animaligitan fluidaĵon el alia fonto, ol iu ĉeestanta homo. Ĉi tio klarigas, kial la nin ĉiam ĉirkaŭantaj Spiritoj ne en ĉiu momento nin ĝenas. Estas necese unue, ke la Spirito tion volu, ke li havu ian celon, ian motivon, sen kio li nenion faras. Estas ofte necese ankaŭ, ke li trovu ĝuste en tiu loko, kie li volas agadi, iun homon kapablan lin helpi, kuntrafiĝo tre malofta. Se tia homo subite ekaperas, li profitas ties servemon. Eĉ tiam, se ĉiuj cirkonstancoj estas favoraj, la Spirito okazeble povus esti malhelpata ĉe sia agado dank'al ia superforta volo, kiu ne permesus al li agadi laŭplaĉe. Li povas ankaŭ ricevi la permeson agadi nur en difinitaj limoj kaj tiam, kiam tiuj manifestiĝoj estus konsiderataj utilaj, ĉu kiel konvinkrimedo, ĉu kiel elprovo por la persono, kiun tiuj manifestiĝoj celas.

**94.** Pri ĉi tiu temo mi citu nur la dialogon, kiun

naskis faktoj, okazintaj en Junio 1860 ĉe la strato Noyers, en Parizo. Detalojn de tiuj faktoj oni trovos en la **Revue Spirite**, numero de Aŭgusto 1860.

Dialogo kun Sankta Ludoviko:

I. Ĉu vi volus havi la bonecon diri al mi, ĉu estas realaj tiuj faktoj, laŭ la famo okazintaj ĉe la strato Noyers? Ilian eblecon mi ne dubas.

"Jes, tiuj faktoj estas realaj; nur la homa imagemo ilin eble troigas, ĉu el timo, ĉu el ironiemo, sed, mi ripetas, ili estas veraj. Tiujn manifestiĝojn aperigas Spirito, kiu sin iom amuzas pri la loĝantoj de tiu loko."

II, Ĉu en tiu domo logas iu homo, kiu kaŭzus tiujn manifestiĝojn?

"Ilin kaŭzas ĉiam la ĉeesto de la celata homo. Tiel estas, ĉar la malordigema Spirito volas venĝi al la loĝanto de tiu loko kaj fari al li malicaĵojn aŭ eĉ penas devigi lin transloĝiĝi."

III. Mi demandas, ĉu inter la domanoj estas iu, kiu kaŭzas tiujn fenomenojn per ia spontanea kaj pretervola mediuma influo?

"Tio estas nepre necesa, **alie tiu fakto ne povus okazi**. Spirito loĝas lokon, kiun li preferas; li restas senokupa tiel longe, ĝis aperos en tiu loko iu homo konvena al li; kiam tia homo venas, tiam li kiom eble sin amuzas."

IV. Ĉu estas nepre necesa la ĉeesto de tia homo en la loko mem?

"Ĝi estas la plej ordinara okazo, kaj ĝi estas ĝuste tiu, kiun vi citis; tial mi diris, ke alie la fakto ne okazus. Sed mi ne celis ĝeneraligi; ĉe certaj okazoj la materiala ĉeesto ne estas necesa."

V. Ĉar tiuj Spiritoj apartenas ĉiam al malsupera ordo, ĉu tial estas supozo nefavora por iu homo ties kapablo servi al ili kiel helpanto? ĉu tio signas ian simpation por tiaj estuloj?

"Ne, ne precize tiel, ĉar ita kapablo estas ligita kun la organa strukturo; tamen, tio tre ofte signas ian materian inklinon, kiun oni preferinde ne havus, ĉar ju pli morale alta estas la homo, des pli li altiras al si la bonajn Spiritojn, kiuj sekve fortenas la malbonajn."

VI. Kie la Spirito ekprenas la objektojn kiujn li ĵetas?

"Tiujn diversajn objektojn li plej ofte ekprenas el tiuj samaj lokoj, kie okazas la fenomenoj, aŭ el la najbaraĵo; ia forto, naskita de iu Spirito, ĵetas la objektojn tra la aero, kaj tiuj falas en la lokon difinitan de tiu Spirito."

VII. Ĉar la spontaneaj manifestiĝoj estas ofte permesitaj kaj eĉ okazigitaj, por konvinki la homojn, tial ŝajnas al mi, ke se iuj nekredemuloj ilin spertus mem, tiuj estus ja devigitaj cedi al la evidenteco. Ili kelkafoje plendas, ke ili ne povis ĉeesti konkludigajn faktojn: ĉu do ne dependus de la Spiritoj igi doni al ili ian senseblan pruvon?

"Ĉu la ateistoj kaj la materialistoj ĉiumomente ne ĉeestas la efikojn de la povo de Dio kaj de la penso? Tio ne malhelpas al ili nei Dion kaj la animon. Ĉu la mirakloj de Jesuo konvertis ĉiujn liajn samtempulojn? Ĉu al la fariseoj, kiuj diradis al li: "Majstro, ni deziras vidi signon de vi" (*), ne similas tiuj, kiuj hodiaŭ petas vin vidigi al ili manifestiĝojn? Se ili ne konvinkiĝis per la mirindaĵoj de la Kreitaĵaro, ili do ne konvinkiĝus eĉ tiam, se Spiritoj aperus antaŭ ili en la plej senduba maniero, ĉar la fiero faras ilin kvazaŭ kalcitremaj ĉevaloj. Se ili serĉus bonfide, ne mankus al ili oportuna okazo por vidi; tial Dio ne trovas konvene fari por ili pli, ol Li faras por tiuj, kiuj penas kleriĝi, ĉar Li rekompencas nur la bonvolemajn homojn. Ilia nekredemeco ne malhelpos, ke plenumiĝos la volo de Dio; vi ja vidas, ke ĝi ne detenis la Doktrinon disvastiĝi. Ne plu do zorgigu vin ilia opono, kiu estas rilate al la Doktrino tio, kio la ombro al la bildo: la unua plireliefigas la duan. Kian meriton ili havus, konvinkite per forto? Dio ŝarĝas ilin per la tuta respondeco por sia obstineco, kaj tiu respondeco estas pli terura, ol kiel vi pensas. "Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis, kaj tamen kredas" (**), diris Jesuo, ĉar tiuj ne dubas la povon de Dio."

(*) Mateo, 12: 38. — *La Trad.*

(**) Johano, 20: 29. — *La Trad.*

VIII. Ĉu vi pensas, ke estus utile elvoki tiun Spiriton, por peti de li kelke da klarigoj?

"Elvoku lin, se vi volas, sed li estas malsupera Spirito, kiu donos al vi nur sensignifajn respondojn."

**95.** Dialogo kun la malordiganta Spirito ĉe la strato Noyers.

I. Elvoko.

"Kia ideo tio estis, ke vi min vokis? Ĉu vi volas ian hajlon da ŝtonoj? Tiam ni vidus belan sinpeladon de piedoj malgraŭ via bravaĉa mieno!"

II. Eĉ se vi ĵetus ĉi tien ŝtonojn, tio nin ne timigus; ni eĉ formale demandas vin, ĉu vi povas enĵeti kelkajn.

"Ĉi tie mi eble ne povus, ĉar vi havas gardanton, kiu vigle zorgas pri vi."

III. Ĉu ĉe la strato Noyers estis iu homo, kiu kunhelpis vin, por faciligi la malbonajn pecojn, kiujn vi faradis al tiuj domanoj?

"Jes, certe; mi trovis bonan ilon kaj nenian scioplenan, kleran kaj prudan Spiriton, kiu min malhelpus. Mi estas gajema, mi amas min kelkafoje amuzi."

IV. Kiu servis al vi kiel ilo?

"Servistino."

V. Ĉu ŝi helpadis al vi preterkonscie?

"Ho, jes, la malfeliĉa! ŝi estis la plej forte terurita!"

VI. Ĉu vi tiel agadis malamike?

"Mi, mi havis nenian malamikan intencon, sed la homoj, kiuj ĉion proprigas al si, faros ĝin turniĝi al ilia profito."

VII. Kion vi parolas? mi ne komprenas vin.

"Mi celis nur amuzi min; sed vi, homoj, vi studos la aferon kaj havos ankoraŭ unu fakton, kiu montros, ke ni ja ekzistas."

VIII. Vi diras, ke vi ne havis malamikan intencon, tamen vi disrompis ĉiujn kahelojn de la domo; vi do faris efektivan malutilon.

"Tio estas bagatelo."

IX. Kie vi ekprenis tiujn objektojn, kiujn vi enĵetis?

"Tiuj estas tre ordinaraj objektoj; mi ilin trovis en

la korto kaj en la najbaraj ĝardenoj."

X. Ĉu vi ilin ĉiujn trovis aŭ faris mem kelkajn? (Vd. poste la Ĉapitron VII-an.)

"Mi kreis nenion, mi kunmetis nenion."

XI. Se vi ilin ne estus trovinta, ĉu vi povus mem fari ilin?

"Tio estus malpli facila; sed, se nepre necese, oni kunmiksas materialojn kaj tio formas ian tutaĵon."

XII. Nun diru al ni, kiel vi ilin ĵetis?

"Ha, tio estas pli malfacile direbla. Mi helpis al mi per la elektra naturo de tiu junulino kune kun la mia, kiu estas malpli materia; ni tiel povis duope transporti la diversajn objektojn."

XIII. Vi ja bonvolus, mi esperas, doni al ni kelke da informoj pri via persono. Diru do al ni, unue, ĉu vi mortis antaŭ longe?

"Antaŭ tre longe; mi pensas, antaŭ kvindek jaroj."

XIV. Kio vi estis sur la Tero?

"Ia sentaŭgulo; mi estis ĉifonisto en tiu kvartalo; oni iafoje ŝercmokadis min, ke mi tro amis tiun ruĝan vinbersukon, kiun plezure drinkadis la bonanima Noa; tial mi volonte ilin ĉiujn ekspedus en la inferon."

XV. Ĉu per vi mem kaj tute volonte vi respondis miajn demandojn?

"Mi havis instruanton."

XVI. Kiu estas tiu instruanto?

"Via bona reĝo Ludoviko."

*Rimarko.* Ĉi tiun demandon levis la naturo de iuj respondoj, kiuj ŝajne translimis la kapablecon de tiu Spirito laŭ la fundo de la ideoj kaj eĉ laŭ la formo de la parolo. Estas do nenio miriga, ke li estis helpata de pli klarmensa Spirito, kiu deziris uzi la spontanean okazon, por nin instrui. Ĉi tio estas tre ordinara fakto, sed reliefinda aparta punkto en tiu cirkonstanco estas tio, ke la influo de tiu alia Spirito elmontriĝis en la skribkaraktero mem: la skribo, en kiu partoprenis tiu alia, estas pli regula kaj pli fluanta; tiu de la ĉifonisto estas anguleca, dika, neregula, ofte apenaŭ legebla, kaj havas tute alian karakteron.

XVII. Kion vi faras nun? ĉu vi zorgas pri via estonteco?

"Ankoraŭ ne; mi vagadas. Oni tiel malmulte pensas pri mi sur la Tero, ke neniu preĝas por mi: tial mi ne estas helpata, mi ne laboras."

*Rimarko.* Oni vidos poste, kiom oni povas kunhelpi por la progresado kaj la animfaciligo de la malsuperaj Spiritoj per preĝoj kaj konsiloj.

XVIII. Kia estis via nomo sur la Tero?

"Jeannet."

XIX. Nu, Jeannet, ni preĝos por vi. Diru al ni, ĉu nia elvoko faris al vi plezuron aŭ ĉagrenon?

"Pli bone plezuron, ĉar vi estas simplanimuloj, gajvivantoj, kvankam iom morrigoraj; tute egale, vi aŭdis min, mi estas kontenta.

JEANNET."

## Alportoj

**96.** Ĉi tiu fenomeno diferencas de tiu, kiun mi ĵus pritraktis, nur per la bondezira intenco de la Spirito, kiu ĝin okazigas, per la speco de la objektoj, preskaŭ ĉiam graciaj, kaj per la dolĉa, ofte delikata maniero, en kiu ili estas alportataj. Ĝi konsistas en la spontanea envenigo de objektoj, ne ekzistantaj en tiu loko, kie oni troviĝas; ili estas plej ofte floroj, kelkafoje fruktoj, bombonoj, juveloj k. a.

**97.** Mi antaŭ ĉio diru, ke ĉi tiu fenomeno estas unu el tiuj plej facile imiteblaj kaj ke sekve oni devas gardi sin kontraŭ ia friponaĵo. Oni ja scias, ĝis kie povas iri arto de prestidigitado en tiaj eksperimentoj; sed, eĉ ne havante aferon kun iu fakisto, oni povus esti facile trompita per lerta kaj interesata manovro. La plej bona el ĉiuj garantioj kuŝas en la **karaktero**, la **ĉiukonata honesteco**, la **absoluta neprofitemo** de la persono, kiu atingas tiajn efikojn; due, en la atenta ekzamenado de ĉiuj cirkonstancoj, ĉe kiuj okazas la faktoj; fine, en la profunda konado de Spiritismo, kiu sola povas malkaŝi tion, kio estus suspekta.

**98.** La teorio de la alportoj kaj entute de la fizikaj

manifestiĝoj troviĝas, en rimarkinda resumo, en la sekvanta disertacio de Spirito, kies ĉiuj komunikaĵoj portas nekontesteblan stampon de profundeco kaj logikeco. Plurajn el liaj komunikaĵoj oni legos tra ĉi tiu verko. Li konatigis sin sub la nomo **Erasto**, disĉiplo de Sankta Paŭlo, kaj kiel protektanto de la mediumo, kiu servis al li kiel perilo. Jen tiu disertacio:

"Por sukcesi ĉe tiaspecaj fenomenoj oni nepre devas havi apud si mediumojn, kiujn ni nomas **sensivaj**, t. e. homojn, altgrade dotitajn per mediumaj kapabloj de disvastiĝo kaj penetrado, ĉar la facile ekscitebla nerva sistemo de tiaj mediumoj ebligas al ili, per iaj vibroj, abunde disradii en la ĉirkaŭaĵon sian animaligitan fluidaĵon.

"La impresiĝemaj temperamentoj, la homoj, kies nervoj vibras ĉe la plej malgranda ektuŝo, ĉe la plej eta sensacio; tiuj homoj, kiujn morala aŭ fizika influo, ĉu interna, ĉu ekstera, sensivigas, estas individuoj tre taŭgaj por fariĝi bonegaj mediumoj por fizikaj efikoj de tuŝebleco kaj alportoj. Efektive, preskaŭ tute sen la neinfluebla envolvaĵo, kiu ĉe la plumulto el la aliaj enkarnuloj ĝin izolas, la nerva sistemo de tiaj homoj ilin kapabligas por la okazigo de tiuj diversaj fenomenoj. Sekve de tio, per homo kun tia organismo kaj kies kapabloj ne kontraŭstarus la ektrancadon, oni pli facile sucesigas la fenomenojn de tuŝebleco, la frapojn sur la muroj kaj en la mebloj, la **inteligentajn** movojn kaj eĉ la levon de la plej peza inerta materio en la aeron. Des pli prave tiuj rezultatoj sukcesas, se anstataŭ unu mediumo oni disponas plurajn, egale bone dotitajn.

"Sed inter la efektivigo de tiuj fenomenoj kaj la atingo de la alportoj ekzistas granda diferenco, ĉar por ĉi tiuj lastaj ne nur la laboro de la Spirito estas pli komplikita, pli malfacila, sed, precipe, la Spirito povas agadi nur pere de unu sola mediuma perilo, t. e. pluraj mediumoj ne povas kune labori por unu sama fenomeno. Eĉ okazas, kontraŭe, ke la ĉeesto de iuj personoj antipatiaj al la aganta Spirito radikale malhelpas lian laboron. Al ĉi tiuj motivoj, kiuj, kiel vi vidas, estas ne malgravaj, ni aldonu tion, ke la alportoj ĉiam postulas

pli grandan sinkoncentradon kaj samtempe pli intensan disradiadon de iuj fluidaĵoj, kaj ankaŭ ke ili povas sukcesi nur per la plej bone dotitaj mediumoj kies **elektromediuma** organismo la plej kontentige taŭgas por tio.

“Ĝenerale dirite, la alportoj estas nun kaj plue estos treege maloftaj. Mi ne bezonas pruvi al vi, kial ili estas kaj estos malpli oftaj, ol aliaj fenomenoj de tuŝebleco: el tio, kion mi diras, vi povos mem tiri konkludon. Cetere tiuj fenomenoj estas tiaspecaj, ke ne sole ne ĉiuj mediumoj taŭgas por kunhelpi al ili, sed ankaŭ ne ĉiuj Spiritoj mem povas ilin okazigi. Efektive, inter la Spirito kaj la influata mediumo devas ekzisti kelka afineco, kelka analogeco, unuvorte, kelka simileco, kiu ebligus al la ekspansia parto de la **perispirita** fluidaĵo (*) de la enkarnulo sin miksi, sin kunigi, kombiniĝi kun tiu de la Spirito, kiu volas fari la alporton. Ĉi tiu kunfandiĝo devas esti tia, ke la rezultinta forto fariĝu, por tiel diri, **unu**, tute same kiel, agante sur karbon, elektra fluo naskas unu solan lumfonton. Kial tiu kuniĝo, kial tiu kunfandiĝo, vi demandus? Tial, ĉar por tiu fenomenoj estas necese, ke la esencaj proprecoj de la aganta Spirito ricevu la aldonon de kelkaj el tiuj de la trancanto; ĉar la **vivofluidaĵo**, nepre necesa por la efektivigo de ĉiaj mediumaj fenomenoj estas **ekskluziva** propraĵo de la enkarnuloj, kaj tial la aganta Spirito nepre devas esti sorbigita de ĝi. Nur tiam li povas, dank’al iaj de vi nekonataj proprecoj de via medio, izoli, nevidebligi kaj movi materiajn objektojn, eĉ enkarniĝintojn.

“Nunmomente ne estas al mi permesite senvualigi antaŭ vi tiujn apartajn leĝojn, kiujn obeas la gasoj kaj aliaj fluidaĵoj, vin ĉirkaŭantaj; sed antaŭ ol kelke da jaroj estos forpasintaj, antaŭ ol forkonsumiĝos unu ekzistado de homo, la klarigo de tiuj leĝoj kaj de tiuj

(*) Oni vidas, ke kiam oni devas esprimi tiun novan ideon, por kiu la lingvo ne havas terminon, la Spiritoj tute bone scias krei neologismojn. Tiujn vortojn *elektromediuma* kaj *perispirita* ne mi ilin elpensis. Tiuj, kiuj riproĉis min, ke mi kreis la vortojn *spiritisma*, *spiritisto*, *Spiritismo*, *perispirito*, kiuj ne havis analogaĵojn, povus same severe kritiki la Spiritojn. — *Noto de la Aŭtoro*.

fenomenoj estos al vi revelaciita, kaj vi vidos ekaperi kaj naskiĝi novan tipon de mediumoj, homoj, kiuj venas en ian katalepsian staton, se nur ili estas ektranciĝintaj.

“Vi do vidas, kun kiom da malfacilaĵoj estas ligita la okazigo de la alportoj; vi povas el tio tre logike konkludi, ke tiaj fenomenoj estas treege maloftaj, kiel mi jam diris, kaj des pli, ke la Spiritoj ne volonte konsentas ilin okazigi, ĉar tio trudas al ili kvazaŭmaterian penon, kio ilin tedas kaj lacigas. Aliflanke okazas ankoraŭ, ke tre ofte, malgraŭ ilia energio kaj volo, la stato de la mediumo mem kontraŭstarigas al ili netranspaseblan baron.

“Estas do evidente, kaj, mi ĝin ne dubas, via rezonado tion jesigas, ke la tuŝeblaj faktoj, kiel frapoj, movoj kaj levado, estas fenomenoj simplaj, okazantaj pro la densiĝo kaj dilatiĝo de iuj fluidaĵoj kaj povantaj esti okazigataj kaj atingataj per la volo kaj la laboro de la mediumoj kapablaj al tio, kiam ĉi tiuj estas helpataj de amikaj kaj bondezirantaj Spiritoj; dum la alportoj estas multoblaj, komplikitaj, postulas kuntrafiĝon de specialaj cirkonstancoj, povas fariĝi nur per unu sola Spirito kaj unu sola mediumo, kaj necesigas, ekster la postuloj de la tuŝebleco, tute specialan kombiniĝon, por izoli kaj nevidebligi la objekton aŭ objektojn, materialon de la alporto.

“Vi ĉiuj, spiritistoj, komprenas miajn klarigojn kaj tute klare prezentas al vi tiun koncentriĝon de specialaj fluidaĵoj por la delokiĝo kaj palpebleco de la inerta materio; vi tion kredas same tiel, kiel vi kredas la elektrajn kaj la magnetismajn fenomenojn, al kiuj la mediumaj faktoj estas tre proksime parencaj kaj de kiuj tiuj faktoj estas jesigo kaj disvolviĝo. Pri la nekredemuloj kaj la kleruloj — ĉi tiuj pli obstinaj ol tiuj —, ne mia afero estas ilin konvinki kaj pri ili mi ne zorgas; ilin iam konvinkos la forto de la evidenteco, ĉar ili ja devos kliniĝi antaŭ la unuanima atesto de la spiritismaj faktoj tiel same, kiel ili estis devigitaj cedi ĉe tiom da aliaj faktoj, kiujn ili komence forpuŝis de si.

“Resume: la faktoj de tuŝebleco estas oftaj, sed la alportoj estas tre maloftaj, ĉar tre malfacile kontent-

igeblaj estas la kondiĉoj, postulataj de ĉi tiuj lastaj; sekve nenia mediumo povas diri: "Je la tioma horo, en tia aŭ tia momento mi venigos alporton", ĉar ofte la Spirito mem estas malhelpata tion fari. Mi devas aldiri, ke tiuj fenomenoj estas duoble malfacilaj antaŭ la publiko, ĉar preskaŭ ĉiam tie troviĝas forte rezistemaj elementoj, kiuj paralizas la penojn de la Spirito kaj tiom pli la agadon de la mediumo. Estu, kontraŭe, certaj, ke tiuj fenomenoj okazas preskaŭ ĉiam en intima rondo, spontanee, plej ofte sen la scio de la mediumoj kaj sen antaŭpenso, kaj fine tre malofte, kiam la mediumoj estas avizitaj pri ili. El ĉi tio vi konkludu, ke ekzistas efektiva motivo de suspekto ĉiam, kiam iu mediumo flatas al si, ke li okazigas tiujn fenomenojn laŭplaĉe, aŭ alivorte, ke li donas ordonojn al la Spiritoj tiel bone, kiel al siaj servistoj, kio estas simple absurdo. Rigardu ankaŭ kiel ĝeneralan regulon, ke la spiritismaj fenomenoj ne fariĝas, por esti prezentataj kiel spektakloj aŭ por amuzi vidamulojn. Se kelkaj Spiritoj volonte faras tiajn aferojn, ĉi tiuj povas esti nur simplaj fenomenoj, sed ne tiuj, kiuj postulas esceptajn kondiĉojn, kiel la alportoj kaj similaj.

"Memoru, vi spiritistoj, ke se estas absurdo sisteme repuŝi ĉiajn transtombajn fenomenojn, ne estas saĝe ilin ĉiujn akcepti blinde. Kiam iu okazo de tuŝebleco, apero, videbleco aŭ alporto prezentiĝas spontanee kaj momente, akceptu ĝin; sed, mi ĉiam ankoraŭ ripetas, akceptu nenion blinde. Ĉiu fakto estu submetita al detala, profunda, severa ekzameno, ĉar, kredu, Spiritismo, tiel riĉa per superbelaj kaj grandiozaj fenomenoj, neniom gajnus de tiuj sensignifaj manifestiĝoj, kiujn lertaj prestidigitatoroj povas imiti.

"Mi ja scias, kion vi diros al mi: tiuj fenomenoj utilas, por konvinki la nekredemajn; sed eksciu, ke se vi ne disponus aliajn konvinkrimedojn, vi hodiaŭ ne nombrus eĉ la centonon de la ekzistantaj spiritistoj. Parolu al la koro: jen la vojo, per kiu vi atingos la plej multajn seriozajn konvertiĝojn. Se vi opinios utile, ĉe iuj personoj, agadi per materialaj faktoj, prezentu ĉi tiujn almenaŭ ĉe tiaj cirkonstancoj, ke ili povus allasi nenian

falsan interpreton, kaj plej precipe ne flankiĝu de la normalaj kondiĉoj de tiuj faktoj, ĉar, misprezentite, ili liveras kontraŭargumentojn al la nekredemaj, anstataŭ ĉiujn konvinki.

ERASTO.”

**99.** Ĉi tiu fenomeno havas la kuriozan trajton, nome tion, ke iuj mediumoj ĝin efektivigas nur en la somnambula stato, kio estas facile klarigebla. Ĉe somnambulo fariĝas ia natura malligiĝo, ia izoliĝo de la Spirito kaj perispirito for de la korpo, deapartiĝo, kiu certe faciligas la interkombiniĝon de la necesaj fluidaĵoj. Tiel estis kun la alportoj, kiujn mi ĉeestis.

La sekvantaj demandoj estis direktitaj al la Spirito, kiu faris tiujn alportojn, sed liaj respondoj ie kaj ie suferas je la nesufiĉeco de liaj scioj; mi ilin submetis al la Spirito **Erasto**, teorie multe pli instruita, kiu alplenigis ilin per tre saĝaj rimarkoj. Unu estas la metiisto, la dua estas la klerulo, kaj la komparado mem de tiuj du intelektoj estas instrua studo, ĉar ĝi montras, ke ne sufiĉas esti Spirito, por ĉion scii.

I. Bonvolu diri al ni, mi petas, kial la alportoj, kiujn vi faras, okazas nur dum la magneta dormo de la mediumo?

“Tio rilatas kun la naturo de la mediumo; la faktojn, kiujn mi okazigas, kiam mia mediumo dormas, mi povus ilin okazigi ankaŭ per ne dormanta mediumo.”

II. Kial vi tiel longe malfruigas la alporton de la objektoj kaj kial vi ekscitas la avidemon de la mediumo, vigligante lian deziron ekhavi la promesitan objekton?

“Tiun tempon mi bezonas, por prepari la fluidaĵojn, kiuj servas por la alporto; koncerne la ekscitadon, tiu ofte celas nur amuzi la ĉeestantojn kaj la somnambulon.”

*Rimarko de Erasto.* La respondanta Spirito ne scias pli ol tion; li ne faras al si ĝustan ideon pri la motivo de tiu avidemo, kiun li instinkte ekscitas, ne komprenante la efikon de tiu ekscitado; li pensas, ke li amuzas la personojn, sed en la realeco li preterkonscie elvokas pli fortan ellason de fluidaĵo. Tio estas sekvo de la malfacileco de la fenomeno, malfacileco, kiu ĉiam estas pli granda, kiam tiu fenomeno ne estas spontanea, precipe per certaj mediumoj.

III. Ĉu la okazigo de tiu fenomeno dependas de la speciala naturo de la mediumo kaj ĉu tiu fenomeno povus okazi pli facile kaj rapide per aliaj mediumoj?

"La okazigo dependas de la naturo de la mediumo, kaj la fenomeno povas efektiviĝi nur per interrespondaj naturoj; koncerne la rapidecon, la kutimo, kiun ni akiras, ofte komunikiĝi per la unu sama mediumo, estas por ni granda helpo."

IV. Ĉu la ĉeestantoj iel influas la fenomenon?

"Kiam inter ili ekzistas nekredemo, kontraŭemo, ili povas nin forte ĝeni; ni preferas labori antaŭ kredantoj kaj homoj profunde konantaj Spiritismon; tamen mi sub tio ne diras, ke malbonvolo povus nin tute paralizi."

V. Kie vi elprenis la florojn kaj la bombonojn, kiujn vi alportis?

"La florojn mi deŝiras en la ĝardenoj, tie, kie ili plaĉas al mi."

VI. Kaj la bombonojn? la komercisto certe konstatis ilian mankon.

"Mi ilin prenas tie, kie ĝi plaĉas al mi; la komercisto tion tute ne rimarkis, ĉar mi tiujn anstataŭigis per aliaj."

VII. Sed la fingroringoj estas iom valoraj: kie vi ilin prenis? Ĉu tio ne malprofitigis la homon, de kiu vi ilin prenis?

"Mi ilin prenis en lokoj nekonataj al ĉiuj kaj en tia maniero, ke neniu povu de tio ricevi malprofiton."

*Rimarko de Erasto*. Mi pensas, ke tiu fakto estas nesufiĉe klarigita dank'al la neplena kapableco de la respondinta Spirito. Jes, fakte povas el tio rezulti efektiva malprofito, sed la Spirito ne volis esti akuzita, ke li ion forprenis. Iun objekton oni povas anstataŭigi nur per alia identa objekto, samforma kaj samvalora; sekve, se iu Spirito kapablus anstataŭigi tiun objekton, kiun li forprenas, per iu simila objekto, li do ne havus motivon por tiun forpreni kaj devus doni tiun alian.

VIII. Ĉu estas eble alporti florojn el iu alia planedo?

"Ne, por mi ĝi ne estas ebla."

— (Al Erasto) Ĉu tion povus fari aliaj Spiritoj?

"Ne, tio ne estas farebla pro la malsameco de la medioj.

IX. Ĉu vi povus alporti florojn de la alia hemisfero, ekzemple el la tropikoj?

"Se nur sur la Tero, mi povas."

X. Ĉu la objektojn, kiujn vi alportis, vi povus malaperigi de antaŭ ni kaj returne forporti?

"Kiel mi ilin venigis, tiel ankaŭ mi povas ilin laŭplaĉe forporti returne."

XI. Ĉu la alportado de objektoj ne estas por vi iom peniga, ne kaŭzas al vi kelkan embarason?

"Ĝi estas por ni neniom peniga, se nur ni havas la permeson ĝin okazigi; tre peniga ĝi povus esti por ni tiam, se ni volus fari tian laboron sen la necesa rajtigo."

*Rimarko de Erasto*. Le ne volas konfesi sian penon, kvankam efektivan, ĉar li estas devigita fari kvazaŭ materialan laboron.

XII. Kiajn malfacilaĵojn vi renkontas?

"Nenian, krom malinklinaj fluidaĵoj, kiuj povas nin kontraŭi."

XIII. Kiel vi alportas la objekton? ĉu en la manoj?

"Ne, ni ĝin envolvas en nin mem."

*Rimarko de Erasto*. Li ne kontentige klarigas sian laboron: li ne tegas la objekton per sia persono. Kio okazas estas tio, ke, ĉar lia persona fluidaĵo estas dilatebla kaj penetripova, tial li kombinas parton de tiu fluidaĵo kun parto de la animaligita fluidaĵo de la mediumo, kaj ĝustadire en tiu kombinaĵo li kaŝas kaj transportas la prieksperimentan objekton. Ne estas do ĝuste diri, ke li envolvas la objekton en si mem.

XIV. Ĉu vi same facile alportus multepezan objekton, ekzemple de kvindek kilogramoj?

"Pezo al ni tute ne gravas; ni alportas florojn, ĉar tio eble plaĉas pli, ol grandvolumena maso."

*Rimarko de Erasto*. Ĝuste; li povas alporti cent aŭ ducent kilogramojn da objektoj, ĉar la pezoforto, ekzistanta por vi, ne ekzistas por li; sed ankaŭ ĉi tie li ne faras al si klaran ideon pri la okazaĵo. La maso de la interkombinitaj fluid-

aĵoj estas proporcia al la maso de la objektoj; alivorte, la forto devas rilati rekte al la rezisto. El tio sekvas, ke se la Spirito alportas nur floron aŭ malpezan objekton, tiel estas ofte, ĉar li ne trovas ĉe la mediumo, aŭ en si mem, la elementojn necesajn por pli granda peno.

XV. Ĉu oni atribuu al Spiritoj la malaperon de objektoj, kelkafoje okazantan, oni ne scias kiel?

"Tio tre ofte okazas, pli ofte, ol kiel vi pensas, sed tion oni povus rebonigi petante la Spiriton porti returne la malaperintan objekton."

*Rimarko de Erasto*. Vere, sed iafoje kio estas forprenita, tio restas plue forprenita, ĉar tiaj objektoj, kiujn oni neniam retrovas, estas ofte forportataj tre malproksimen. Tamen, ĉar la forpreno de objektoj postulas preskaŭ tiajn samajn fluidaĵajn kondiĉojn, kiel la alportoj, tial ĝi povas okazi nur pere de mediumoj, dotitaj per specialaj kapabloj; tial la malapero de iu objekto estas pli probable sekvo de via malzorgo, ol ago de Spiritoj.

XVI. Ĉu faktoj, rigardataj kiel naturaj fenomenoj, estas efektive faroj de iuj Spiritoj?

"Viaj tagoj estas plenaj de tiaj faktoj, kiujn vi ne komprenas, ĉar vi neniam pensis pri ili, sed kiujn iom da meditado igus vin klare vidi."

*Rimarko de Erasto*. Ne alkalkulu al Spiritoj tion, kio estas faro de homo, sed kredu ilian kaŝitan, konstantan influon, kiu naskas ĉirkaŭ vi multegon da cirkonstancoj, multegon da incidentoj necesaj por la plenumo de viaj agoj, de via ekzistado.

XVII. Ĉu el la objektoj, alportataj de la Spiritoj, kelkaj ne povas esti preparataj de ĉi tiuj, t. e. ĉu ili ne povas estiĝi mem per la modifoj, kiujn la Spiritoj kapablas ricevigi al la fluidaĵo aŭ al la universa elemento?

"Tion fari mi mem ne povas, ĉar por tio mi ne havas la permeson; tion povas nur altklasa Spirito."

XVIII. Kiel vi antaŭ kelke da tagoj enportis tiujn objektojn, se la ĉambro estis fermita?

"Mi ilin venigis kun mi, por tiel diri, envolvitajn en mian substancon; mi pli ne povas diri, ĉar tio estas neklarigebla."

XIX. Kiel vi procedis, por videbligi tiujn objektojn, kiuj antaŭ momento estis nevideblaj?

"Mi deprenis la materion, kiu ilin envolvis."

*Rimarko de Erasto*. Kio ilin envolvas, tio estas ne la ĝustasenca materio, sed fluidaĵo, ĉerpita duone el la perispirito de la mediumo, duone el la perispirito de la aganta Spirito.

XX. (Al Erasto) Ĉu iu objekto povas esti enportata en absolute fermitan lokon, alivorte: ĉu iu Spirito povas fluidecigi iun materian objekton, ke ĉi tiu povus penetri en la materion?

"Ĉi tiu demando estas komplikita. La alportatajn objektojn la Spirito povas fari nevideblaj, sed ne penetripovaj; li ne povas rompi la agregatiĝon de la materio, kio estus la detruiĝo de la objekto. Farinte nevidebla tiun objekton, li povas alporti ĝin, kiam li tion volas, kaj ellasi ĝin nur en la momento oportuna, por ĝin reaperigi. Alie okazas pri tiuj, kiujn ni kunmetas; ĉar en ĉi tiujn ni enmetas nur la elementojn de la materio kaj tiuj elementoj estas esence penetripovaj, kaj ĉar ni penetras mem kaj trapasas eĉ la plej densajn korpojn tiel facile, kiel la sunradioj trairas vitroplataĵojn, tial ni ja povas diri, ke ni enkondukas la objekton en eĉ hermetike fermitan lokon; sed tio nur en ĉi tiu okazo."

NOTO. Pri la spontanea estiĝo de la objektoj vidu poste la ĉapitron titolitan: *Laborejo de la nevidebla mondo*.

———————

ĈAPITRO VI

# PRI LA VIDMANIFESTIĜOJ

*Demandoj pri la aperoj. Teoria disertacio pri la aperoj. Spirito-globetoj. Teorio de la halucino.*

**100.** El ĉiaj manifestiĝoj de Spiritoj la plej interesaj estas nekontesteble tiuj, en kiuj la Spiritoj povas fariĝi videblaj. El la klarigo de ĉi tiu fenomeno oni konstatos, ke ĝi estas ne pli supernatura ol la ceteraj. Mi unue prezentos la respondojn, kiujn la Spiritoj donis pri ĉi tiu temo.

I. Ĉu la Spiritoj povas fariĝi videblaj?

"Jes, precipe dum la dormo; tamen iuj homoj vidas ilin ne dormante, sed malofte."

*Rimarko.* Dum la korpo ripozas, la Spirito deŝiriĝas de la materiaj ligiloj; li tiam estas pli libera kaj povas pli facile vidi la aliajn Spiritojn, kun kiuj li ekrilatas. Sonĝo estas nur rememoro de tiu stato; kiam oni nenion memoras, oni diras, ke oni ne sonĝis, sed la animo tamen ja ion vidis kaj ĝuis sian liberecon. Ĉi tie ni pritraktas pli speciale la aperojn dum maldormo (*).

II. Ĉu la Spiritoj, kiuj manifestiĝas al la okuloj, apartenas pli al unu klaso, ol al alia?

"Ne; ili povas aparteni al ĉiuj klasoj, kiel al la pli altaj, tiel ankaŭ al la pli malaltaj."

III. Ĉu estas konsentite al ĉiuj Spiritoj manifestiĝi videble?

(*) Vd., por pli da detaloj pri la stato de la Spirito dum la dormo, *La Libron de la Spiritoj*, ĉap. *Liberiĝo de la animo*, paragrafo 409. — *Noto de la Aŭtoro.*

"Ĉiuj ĝin povas, sed ili por tio ne ĉiam havas la permeson nek deziron."

IV. Kion celas la Spiritoj, kiuj manifestiĝas videble?

"Tio dependas; laŭ ilia naturo, la celo povas esti bona aŭ malbona."

V. Kiel do oni povas doni al ili la permeson por tio, kiam la celo estas malbona?

"En ĉi tiu okazo tio estas por elprovi tiujn homojn, antaŭ kiuj ili aperas. La intenco de la Spirito povas esti malbona, sed la rezulto povas esti bona."

VI. Kio povas esti la celo de Spiritoj, kiuj fariĝas videblaj en malbona intenco?

"Timigi kaj ofte venĝi."

— Kion celas tiuj Spiritoj, kiuj portas bonan intencon?

"Konsoli la homojn, kiuj ilin resopiras; pruvi, ke ili ankoraŭ ekzistas kaj staras apud vi; doni konsilojn kaj iafoje peti helpi ilin mem."

VII. Kia malbonaĵo tio estus, se la ebleco vidi Spiritojn estus konstanta kaj ĝenerala ĉe la homoj? Ĉu tio ne estus rimedo, por forigi la dubojn de la plej fortaj nekredemuloj?

"La homo estas ja ĉiam ĉirkaŭita de Spiritoj, sed ilin senĉese vidi konfuzus lin, ĝenus liajn agojn kaj en la plej multaj okazoj forprenus lian iniciativon, dum pensante, ke li troviĝas sola, li agas pli libere. Koncerne la nekredemulojn, tiuj disponas multe da rimedoj por konvinkiĝi, se nur ili volas profiti tiujn rimedojn kaj ne estas blindigitaj de la fiero. Vi ja scias, ke ekzistas homoj, kiuj vidis, sed kiuj tamen ne kredas, ĉar ili diras, ke ĉio tio estas iluzioj. Ne faru al vi zorgon pro tiaj homoj: pri ili zorgas Dio."

*Rimarko*. Tiel nebone estus senĉese vidi la Spiritojn, kiel vidi la aeron, kiu nin ĉirkaŭas, aŭ la miriadojn da mikroskopaj bestetoj, kiuj svarmas ĉirkaŭ kaj sur ni. El ĉi tio ni devas konkludi, ke ĉia faritaĵo de Dio estas perfekta kaj ke Li pli bone ol ni scias, kio al ni estas utila.

VIII. Se vidi la Spiritojn estas malutile, kial do tio estas permesita ĉe iuj okazoj?

"Tiel estas, por pruvi al la homo, ke ne ĉio mortas kune kun la korpo kaj ke la animo konservas sian individuecon post la morto. Tiu nedaŭra vidado sufiĉas, por tion pruvi kaj atesti la ĉeeston de viaj amikoj apud vi, sed ĝi ne havas la malbonaĵojn de la konstanta vidado."

IX. Ĉu en la mondoj, pli progresintaj ol nia, la Spiritoj estas pli ofte vidataj, ol ĉe ni?

"Ju pli multe la homo alproksimiĝas al la spirita naturo, des pli facile li ekrilatas kun la Spiritoj; tio estas la malsubtileco de via envolvaĵo, kio faras pli malfacila kaj pli malofta la vidadon je la eterecaj estuloj."

X. Ĉu estas racia la terursento ĉe la apero de iu Spirito?

"Kiu havas klaran kapon, tiu certe komprenas, ke iu Spirito, kiu ajn li estas, estas malpli danĝera ol ĉiu vivanto. Cetere la Spiritoj iras ĉien, kaj oni ne bezonas vidi ilin, por scii, ke oni povas havi ilin apud si. Spirito, kiu volus malbonagi, povas tion fari nevidate kaj eĉ pli senriske; li estas danĝera ne tial, ke li estas Spirito, sed pro la influo, kiun li povas havi sur la menson, deturnante la homon for de la bono kaj lin instigante al la malbono."

*Rimarko*. La personoj, kiuj en soleco aŭ en mallumo eksentas timon, malofte klarigas al si la kaŭzon de sia timo; ili ne povus diri, kion ili timas, sed certe ili devus pli timi renkonti homojn ol Spiritojn, ĉar malbonfaranto estas pli danĝera, kiam vivanta, ol post sia morto. Unu sinjorino, konata al mi, ekvidis unu vesperon, en sia ĉambro, tiel klare difinitan aperaĵon, ke ŝi havis la impreson, kvazaŭ staras antaŭ ŝi iu homo, kaj ŝia unua sento estis de teruro. Certiĝinte, ke tie neniu troviĝas, ŝi diris al si mem: "Ŝajnas, ke *tio estas nur iu Spirito*; mi povas do dormi trankvile".

XI. Ĉu iu, antaŭ kiu aperis Spirito, povas ekparoli al li?

"Jes, certe, kaj ja tion oni ĉiam devas fari en similaj okazoj, demandante la Spiriton, kiu li estas, kion li deziras kaj per kio oni povas esti al li utila. Se li estas malfeliĉa kaj suferanta Spirito, la kompato, kiun oni montras al li, faciligas lian staton; se li estas bon-

deziranta Spirito, li venas eble en la intenco doni bonajn konsilojn.”

— Kiel, en ĉi tiu okazo, la Spirito povas respondi?

“Li tion faras kelkafoje per artikitaj sonoj same, kiel iu vivanto; plej ofte fariĝas transiĝo de pensoj.”

XII. Ĉu la Spiritoj, aperantaj kun flugiloj, ilin efektive portas, aŭ ĉu tiuj flugiloj estas nur simbola ŝajnaĵo?

“La Spiritoj portas neniajn flugilojn, kaj ja nenion similan ili bezonas, ĉar ili povas iri ĉien kiel Spiritoj. Ili aperas en tia formo, kiel ili volas impresi la personon, antaŭ kiu ili sin prezentas: unuj aperas en la ordinaraj vestoj, aliaj en drapiraĵoj, triaj kun flugiloj, atributo de la kategorio da Spiritoj, kiujn ili reprezentas.

XIII. Ĉu la homoj, kiujn oni vidas en sonĝo, estas ĉiam tiuj samaj, kiel ili aspektas?

“Ili estas preskaŭ ĉiam tiuj homoj mem, al kiuj via Spirito iras aŭ kiuj venas al vi renkonte.”

XIV. Ĉu la mokemaj Spiritoj ne povus preni sur sin la aspekton de niaj karuloj, por konduki nin en eraron?

“Falsajn aspektojn ili prenas sur sin nur por sin amuzi pri vi; sed ekzistas aferoj, pri kiuj ili ne havas la permeson sin amuzi.”

XV. Ĉar la penso estas ia elvoko, tial estas kompreneble, ke ĝi venigus la koncernatan Spiriton; sed kiel klarigi, ke ofte tiuj personoj, pri kiuj ni plej streĉe pensas, kiujn ni plej varme deziras vidi, neniam sin montras al ni en sonĝo, dum tamen ni vidas homojn, kontraŭ kiuj ni estas indiferentaj kaj pri kiuj ni tute ne pensas?

“La Spiritoj ne ĉiam havas la eblon manifestiĝi videble, eĉ en sonĝo, kaj malgraŭ via deziro ilin vidi; tion povas malhelpi kaŭzoj ne dependantaj de ilia volo. Ĝi ofte estas ankaŭ elprovo, el kiu eĉ la plej varmega deziro ne sukcesas liberiĝi. Koncerne tiujn homojn, kontraŭ kiuj vi estas indiferentaj, eble ili pensas pri vi. Cetere vi ne povas imagi al vi la societajn rilatojn en la mondo de la Spiritoj: tie vi renkontas multegon da intimaj konatoj, iamaj aŭ freŝdataj, pri kiuj vi faras al vi nenian ideon, kiam vi ne dormas.”

*Rimarko*. Kiam oni disponas nenian rimedon, por certiĝi pri vizioj aŭ aperaĵoj, oni povas ilin sendube alkalkuli al halucinoj; sed kiam okazoj ilin konfirmas, tiam oni ilin ne povus atribui al imagemo, ekzemple: la apero, kiun oni vidas en sonĝo aŭ maldormo, de homoj, pri kiuj oni tute ne pensas, venantaj, en la momento de sia morto, per diversaj signoj sciigi la tute neatenditajn cirkonstancojn de sia fino. Oni ofte vidis ĉevalojn baŭmi kaj rifuzi iri pluen antaŭ aperaĵoj, kiuj ekteruris siajn rajdantojn (*). Se la imagemo ludas ian rolon ĉe la homoj, ĝi certe ludas nenian ĉe la bestoj. Cetere, se la figuroj, kiujn oni vidas en sonĝo, estus ĉiam efiko de la antaŭaj zorgoj, ne estus do klarigeble, kial ofte okazas, ke oni neniam sonĝas pri aferoj, pri kiuj oni la plej multe pensas.

XVI. Kial iuj vizioj estas pli oftaj dum malsaneco?

"Ili same okazas dum perfekta saneco, sed ja dum malsaneco la materiaj ligiloj malstreĉiĝas; la malfortikeco de la korpo havigas pli da libereco al la Spirito, kiu do pli facile ekkomunikiĝas kun la aliaj Spiritoj."

XVII. Ŝajnas, ke la spontaneaj manifestiĝoj estas pli oftaj en certaj landoj. Ĉu iuj popoloj havas pli taŭgajn naturdotojn, ol aliaj, por la ricevo de tiaj manifestiĝoj?

"Ĉu vi protokolas ĉiun aperon de Spiritoj? La aperoj, la bruoj, unuvorte, ĉiaj manifestiĝoj de Spiritoj okazas egale ĉie sur la Tero, sed ili havas distingiĝajn karakterojn laŭ la popoloj, ĉe kiuj ili fariĝas. Ĉe tiuj, ekzemple, kiuj ne multe uzas la skribadon, ne ekzistas skribivaj mediumoj; ĉe aliaj, tiaj mediumoj abundas; aliloke fariĝas prefere bruoj kaj movoj, ol inteligentaj komunikaĵoj, ĉar ĉi tiuj estas malpli ŝatataj kaj dezirataj."

XVIII. Kial la aperoj estas pli oftaj nokte? Ĉu tio ne ŝajnas efiko de la silento kaj de la mallumo sur la imagpovo?

"Tiel estas pro tiu sama motivo, kiu al vi ebligas vidi nokte la stelojn, kiujn vi ne vidas en hela tago. Forta lumeco povas forvelkigi palan aperaĵon, sed estus

(*) Vd. la epizodon de la azenino de Bileam: Nombroj, 22: 21 – 33. — *La Trad.*

eraro supozi, ke la nokto havas kun tio ion komunan. Demandu la homojn, kiuj vidis aperaĵojn, kaj vi konstatos, ke la plej multaj ilin vidis tage."

*Rimarko.* La aperoj estas multe pli oftaj kaj ĝeneralaj, ol kiom oni pensas, sed multaj homoj ilin ne konfesas pro moktimo kaj aliaj atribuas ilin al iluzio. Se ili ŝajnas pli multenombraj ĉe iuj popoloj, tiel okazas, ĉar tiuj popoloj pli zorge konservas la tradiciojn, verajn aŭ malverajn, preskaŭ ĉiam pligrandigitajn de la logpovo de ĉio mirakleca, por kio taŭgas la aspekto de la lokoj. La kredemo igas tiam vidi supernaturajn faktojn en la plej ordinaraj fenomenoj: la silento de la soleco, la kruteco de la ravinoj, la muĝado de la arbaro, la ventopuŝoj de la tempesto, la eĥo de la montaroj, la fantomeca formo de la nuboj, la ombroj, la miraĝoj, ĉio donas materialon por iluzio al simplaj kaj naivaj mensoj, kiuj bonafide rakontas tion, kion ili vidis aŭ laŭ sia kredo vidis. Sed flanke de la fikcio ekzistas la realeco; al la liberigo de la realeco el ĉiuj ridindaj akcesoraĵoj de la superstiĉo kondukas ĝuste la serioza studado de Spiritismo.

XIX. Ĉu oni vidas Spiritojn en sia normala stato aŭ en ia stato ekstaza?

"Oni vidas ilin en sia tute normala stato; tamen tiuj personoj, kiuj ilin vidas, tre ofte troviĝas en ia stato neordinara, proksima al ekstazo, kiu havigas al ili kvazaŭ duoblan vidadon." (**La Libro de la Spiritoj**, § 447)

XX. Ĉu tiuj personoj, kiuj vidas Spiritojn, vidas ilin per siaj okuloj mem?

"Ili tiel pensas, sed Spiritojn efektive vidas la animo: ĝin pruvas tio, ke oni tiujn estulojn vidas kun okuloj fermitaj."

XXI. Kiel iu Spirito povas fariĝi videbla?

"La principo de tio estas tiu sama, kiel tiu de ĉiaj manifestiĝoj: ĝi kuŝas en la proprecoj de la perispirito, kiu povas sperti plurajn modifojn laŭ la plaĉo de la Spirito."

XXII. Ĉu la Spirito povas fariĝi videbla mem aŭ ĉu nur kun la helpo de la perispirito?

"En via materia stato la Spiritoj povas manifestiĝi nur kun la helpo de sia duonmateria envolvaĵo: ĉi tiu estas la perilo, per kiu ili agas sur viajn sentumojn.

Ĝuste en tiu envolvaĵo ili kelkafoje aperas sub homa aŭ tute alia formo, aŭ en la sonĝoj, aŭ eĉ dum maldormo, kiel en lumo, tiel ankaŭ en mallumo."

XXIII. Ĉu oni povus diri, ke iu Spirito fariĝas videbla per la densiĝo de la fluidaĵo de la perispirito?

"Densiĝo ne estas la ĝusta vorto; ĝi esprimus prefere ian similigon, kiu povas helpi, por ke vi komprenu la fenomenon, ĉar ne fariĝas efektiva densiĝo. Per la interkombiniĝo de la fluidaĵoj ekestas en la perispirito ia tute propra strukturo, kiu ĉe vi ne havas analogaĵon, strukturo, kiu ĝin videbligas."

XXIV. Ĉu la aperantaj Spiritoj estas ĉiam nekapteblaj kaj nepalpeblaj?

"En sia normala stato ili estas nekapteblaj, kiel en sonĝo, tamen ili povas impresi la palposenson kaj postlasi signojn de sia ĉeesto, eĉ, en iuj okazoj, fariĝi momente tuŝeblaj, kio pruvas, ke inter ili kaj vi ekzistas io materia."

XXV. Ĉu ĉiuj kapablas vidi Spiritojn?

"Dum la dormo, jes, sed ne en maldormo. Dum la dormo la animo vidas senpere; en maldormo ĝi estas ĉiam pli aŭ malpli influata de la organoj. Tial ne tute samaj estas la kondiĉoj en la du okazoj."

XXVI. En kio kuŝas la kapableco vidi Spiritojn en maldormo?

"Ĉi tiu kapableco dependas de la homa strukturo; ĝi kuŝas en la pli aŭ malpli granda facileco de la fluidaĵo de la vidanto, kombiniĝi kun tiu de la Spirito. Tial ne sufiĉas, ke la Spirito volas montriĝi, sed estas necese, ke li trovu en la homo, al kiu li volas sin vidigi, la necesan kapablecon."

— Ĉu ĉi tiu kapableco povas kreski per ekzercigado?

"Jes, kiel ĉiuj aliaj kapablecoj, sed ĝi estas unu el tiaj, kies naturan kreskadon oni prefere atendu, anstataŭ instigi, por ne riski supereksciti la imagemon. La ĝenerala kaj konstanta vidado je la Spiritoj estas escepta kapableco kaj ne troviĝas en la normalaj kondiĉoj de la homo."

XXVII. Ĉu oni povas aperigi Spiritojn?

"Ĉi tion oni povas iafoje, sed tre malofte; tiu apero estas preskaŭ ĉiam spontanea. Por tio estas necesa speciala kapableco."

XXVIII. Ĉu la Spiritoj povas fariĝi videblaj sub alia aspekto, ol la formo homa?

"La formo normala estas la formo homa; la Spirito povas ŝanĝi ĝian aspekton, sed ĝi ĉiam alkonformiĝas al la homa tipo."

— Ĉu ili ne povas manifestiĝi sub la formo de flamo?

"Ili povas naski flamojn, lumetojn, kiel ĉiajn aliajn efikojn, por elmontri sian ĉeeston; sed tio estas ne la Spiritoj mem. La flamo estas ofte nura miraĝo aŭ emanaĵo de la perispirito; ĉiaokaze ĝi estas nur parto de la perispirito: ĉi tiu aperas tuta nur en la vizioj."

XXIX. Kion pensi pri la kredo, kiu atribuas la vaglumojn al la ĉeesto de animoj aŭ Spiritoj?

"Superstiĉo, naskita de senklereco. Estas bone konata la kaŭzo fizika de la vaglumoj."

— Ĉu la blua flamo, kiu, laŭ la famo, ekaperis super la kapo de Servio Tulio, en lia infaneco, estas fabelo aŭ ĉu ĝi estis reala?

"Ĝi estis reala; estigis ĝin familiara Spirito, kiu deziris averti lian patrinon pri io. Kiel vidipova mediumino, tiu patrino ekrimarkis disradiadon de la Spirito, protektanto de ŝia infano. Kiel viaj skribivaj mediumoj ne skribas ĉiuj unu saman aferon, tiel ankaŭ la vidivaj mediumoj ne vidas en sama grado. Tiu patrino vidis nur flamon, dum alia mediumo povus esti vidinta la korpon mem de la Spirito."

XXX. Ĉu la Spiritoj povus prezenti sin sub la formo de bestoj?

"Ĉi tio povas ja okazi, sed tian aspekton prenas sur sin ĉiam nur tre malsuperaj Spiritoj. Tio estus ĉiaokaze nur momenta eksteraĵo, ĉar estus absurdo kredi, ke ĉia ajn vera besto povus esti la enkarniĝinta figuro de iu Spirito. Bestoj estas ĉiam nur bestoj, nenio alia." (*)

---

(*) Tiun respondon oni komprenu en la senco de "homa

*Rimarko.* Nur la supersiĉo povas kredigi, ke iuj bestoj estas animitaj de Spiritoj; oni devas havi tre komplezeman aŭ forte afekciitan imagemon, por vidi ion supernaturan en la iom strangaj cirkonstancoj, en kiuj la Spiritoj iafoje sin prezentas; sed timo foje vidigas tion, kio ne ekzistas. Ne ĉiam timo naskas tian ideon. Mi konis sinjorinon, cetere tre inteligentan, kiu supermezure amis grandan nigran katon, ĉar ŝi kredis, ke ĝi havas naturon superbestan; tamen ŝi antaŭe neniam aŭdis pri Spiritismo; se ŝi ĉi tiun konus, ĝi igus ŝin kompreni la ridindecon de la kaŭzo de ŝia amo, pruvante al ŝi la neeblecon de tia metamorfozo.

## Teoria disertacio pri la aperoj

**101.** La plej ordinaraj aperantaj manifestiĝoj okazas dum la dormo, per sonĝoj: ili estas la vidaĵoj. La kadro de ĉi tiu mia studo ne povas enteni la ekzamenon de ĉiuj apartaĵoj, kiujn la sonĝoj povas prezenti; tial mi mallonge diras, ke ili povas esti: aktuala vidaĵo de ĉeestantaj aŭ forestantaj aferoj; retrospektiva vidaĵo de la pasinteco; kaj, en kelkaj esceptaj okazoj, antaŭsento de la estonteco. Ili estas ofte ankaŭ alegoriaj bildoj, kiujn la Spiritoj preterpasigas antaŭ niaj okuloj, por fari al ni utilajn avizojn kaj doni al ni edifajn konsilojn, se ili estas bonaj Spiritoj; aŭ por konduki nin en eraron kaj flati niajn pasiojn, se neperfektaj Spiritoj. La tuj sekvanta teorio aplikiĝas kiel al sonĝoj, tiel ankaŭ al ĉiuj ceteraj okazoj de aperado de Spiritoj. (Vd. **La Libron de la Spiritoj**, § 400 k. sekv.)

Mi opinias, ke mi ofendus la saĝon de miaj legantoj, refutante, kiom da absurda kaj ridinda ekzistas en tio, kion oni ordinare nomas la signifoklarigo de la sonĝoj.

**102.** La ĝustadiraj aperoj okazas en maldormo, tiam, kiam oni plene kaj tute libere ĝuas sian mensan kapablecon. La aperaĵoj ordinare montriĝas sub vaporeca kaj diafana formo, iafoje malpreciza kaj nedifinita; ofte tio estas komence duonblanka lumeto, kies konturoj bildiĝas iom post iom. Ĉe aliaj okazoj la formoj estas

spirito", ĉar ankaŭ la bestoj havas spiriton: ili ja ne estas nur materio. — *La Trad.*

klare difinitaj kaj oni distingas la plej etajn trajtojn de la vizaĝo en tia grado, ke oni povas ĝin tre precize priskribi. La sintenado, la aspekto estas similaj al tiuj de la Spirito, kiam sur la Tero.

Povante preni ĉiajn eksteraĵojn, la Spirito sin prezentas en tiu, kiu la plej bone faras lin rekonebla, se tia estas lia deziro. Tial, kvankam kiel Spirito li havas nenian korpan difekton, li sin montras kripla, lama, ĝiba, vundita, kun cikatroj, se tio estas necesa por la pruvo de lia identeco. Ezopo, ekzemple, kiel Spirito ne estas misforma, sed se oni elvokos lin kiel Ezopon, eĉ se li havis plurajn ekzistadojn post tiam, kiam li estis tiel nomata, li aperos malbela kaj ĝiba, en siaj tradiciaj vestoj.

Rimarkinde estas, ke, esceptinte specialajn cirkonstancojn, la malplej netaj partoj estas la malsupraj membroj, dum la kapo, la trunko, la brakoj kaj la manoj ĉiam precize bildiĝas; tial la Spiritojn oni vidas preskaŭ neniam paŝi, sed gliti kiel ombroj. Koncerne la veston, ĝi plej ordinare konsistas en drapiraĵo, finiĝanta per longaj ondantaj faldoj. Tiuj Spiritoj, kiuj neniun konservis el la surteraj aferoj, aperas almenaŭ kun onda kaj gracia hararo; sed la ordinaraj Spiritoj, tiuj, kiujn oni konis, portas plej ofte tiun veston, kiun ili uzadis dum la lasta fazo de sia ekzistado.

Ili ofte kunportas la atributojn, kiuj karakterizas ilian hierarkian ŝtupon, kiel aŭreolon, aŭ flugilojn ĉe tiuj, kiujn oni povas rigardi kiel anĝelojn, dum aliaj havas ĉe si la signojn, kiuj memorigas iliajn iamajn surterajn okupojn; tiel, militisto povos aperi kun sia armaĵo, klerulo kun siaj libroj, murdisto kun sia ponardo, k. t. p. La Superaj Spiritoj havas figuron belan, noblan kaj serenan; la pli malaltaj mienas iel sovaĝe kaj bestie, kaj iuj ankoraŭ portas la postesignojn de la faritaj krimoj aŭ de la travivitaj turmentoj. La demando pri la vesto kaj pri ĉiuj akcesoraj objektoj estas eble tiu, kiu plej forte mirigas; mi ĝin repritraktos en speciala ĉapitro, ĉar ĝi estas ligita kun aliaj tre gravaj faktoj.

**103.** Mi diris, ke la aperaĵoj havas ion vaporecan. Ĉe certaj okazoj oni povus kompari ilin al bildoj sur vitroplato, bildoj, kiuj malgraŭ sia neteco ne malhelpas

travidi ion malantaŭ ili. Tiel la vidivaj mediumoj ordinare vidas la aperaĵojn; ili vidas ĉi tiujn iradi tien kaj reen, eniri en iun ĉambron aŭ eliri el tie, pasadi inter la amaso de la vivantoj, ŝajnante, almenaŭ rilate al la ordinaraj Spiritoj, aktive partopreni en ĉio, kio okazas ĉirkaŭ ili, interesiĝi pri ĉio ĉi kaj aŭskulti, kion oni diras. Oni ilin ofte vidas alproksimiĝi al iu homo, blovi en lin pensojn, influi lin, konsoli lin, se ili estas bonaj, moki lin, se ili estas malicaj, montriĝi malĝojaj aŭ kontentaj de la rezultatoj, kiujn ili atingas. Tio estas unuvorte la duoblaĵo de la enkorpa mondo.

Tia estas tiu kaŝita mondo, nin ĉirkaŭanta, en kiu ni senkonscie vivas, tiel same, kiel ni, ankaŭ senkonscie, vivas meze de miriadoj da estaĵoj de la mikroskopa mondo. La mikroskopo malkaŝis al ni la mondon de la supermezure malgrandaj estaĵoj, pri kiuj ni tute ne konjektis; Spiritismo, helpata de la vidivaj mediumoj, malkaŝis al ni la mondon de la Spiritoj, kiu ankaŭ estas unu el la agantaj fortoj de la Naturo. Per la helpo de la vidivaj mediumoj ni povis studi la nevideblan mondon, ekkoni ĝiajn morojn same tiel, kiel popolo el blinduloj povus studi la videblan mondon per la helpo de kelke da vidantoj. (Vd. poste, en la ĉapitro pri la mediumoj, la artikolon rilatan al la vidivaj mediumoj.)

**104.** La Spirito, kiu volas aŭ povas aperi, iafoje prenas ankoraŭ pli netan formon, kun ĉiuj ŝajnoj de solida korpo, en tia grado, ke li faras absolutan iluzion kaj kredigas, ke oni havas antaŭ si enkorpan estulon. Ĉe kelkaj okazoj fine, kaj en iaj cirkonstancoj, la tuŝebleco povas fariĝi reala, t. e. oni povas tuŝi, palpi, senti tian saman reziston, tian saman varmecon, kiel ĉe vivanta korpo, kio ne malhelpas ĝin fulmrapide disneniiĝi. Tiam la aperaĵon oni konstatas ne sole per la vidado, sed ankaŭ per la palpado.

Se oni povus atribui al iluzio aŭ al ia fascinado la simple videblan aperaĵon, nenia dubo estas konsentebla tiam, kiam ni povas ĝin ekpreni kaj palpi, kiam ĝi mem nin ekprenas kaj ĉirkaŭbrakas.

La tuŝeblaj aperoj estas tiuj plej maloftaj, sed tiuj, kiuj okazis en la laste pasinta tempo per la influo de

kelkaj potencaj mediumoj (*) kaj kiujn aŭtentikigas nerifuzeblaj atestantoj, pruvas kaj klarigas tiujn, kiujn la Historio rakontas pri homoj, post sia morto sin montrintaj kun ĉiuj signoj de realeco. Tamen, kiel mi diris, kiel ajn eksterordinaraj estas tiaj fenomenoj, ĉio mirakleca disfumiĝas, se nur oni scias, kiel ili fariĝas, kaj oni komprenas, ke, anstataŭ nuligo de la leĝoj de la Naturo, ili estas aplikaĵo de tiuj leĝoj.

**105.** Laŭ sia naturo kaj en sia normala stato la perispirito estas nevidebla; tian saman karakteron havas multego da fluidaĵoj, kies ekziston ni scias, sed kiujn ni tamen neniam vidis. Sed same, kiel iaj fluidaĵoj, ĝi povas sperti modifojn, kiuj ĝin videbligas, aŭ per ia densiĝo, aŭ per ŝanĝo de ĝia molekula aranĝo: tiam ĝi aperas al ni sub vaporeca formo. La densiĝo (oni ne prenu ĉi tiun vorton laŭlitere; mi uzas ĝin manke de alia kaj kiel komparon), la densiĝo, mi diras, povas esti tia, ke la perispirito havigas al si la proprecojn de solida kaj tuŝebla korpo, kun la kapablo momente repreni sian eterecan kaj nevideblan staton. Ni povas kompreni ĉi tion per komparo kun la vaporo, kiu povas transiri de sia nevidebla stato en la staton nebulecan, poste en la likvan, fine en la solidan, kaj returne.

Tiuj diversaj statoj de la perispirito rezultas el la volo de la Spirito, sed ne el ia fizika kaŭzo ekstera, kiel okazas al niaj gasoj. Kiam la Spirito aperas antaŭ ni, tiel estas tial, ke li transigis sian perispiriton en la staton necesan, por fari ĝin vedebla; sed por tio lia volo sola ne sufiĉas, ĉar la modifo de la perispirito fariĝas per ties kombiniĝo kun la propra fluidaĵo de la mediumo; nu, ĉi tiu kombiniĝo ne ĉiam estas efektivigebla, kio klarigas, kial la videbleco de la Spiritoj ne estas ĝenerala. Sekve ne sufiĉas, ke la Spirito volu sin montri; ankaŭ ne sufiĉas, ke iu homo volu vidi lin; estas necese, ke ambaŭ fluidaĵoj povu interkombiniĝi, ke inter ili ekzistu ia reciproka inkliniĝo, eble ankaŭ ke la elverŝo de la fluidaĵo de la persono estu sufiĉe granda, por fari la transformiĝon de la perispirito, kaj probable necesaj

(*) Inter aliaj S-ro Home. — *Noto de la Aŭtoro.*

estas ankoraŭ aliaj kondiĉoj, kiujn ni ne konas; fine, estas necese, ke la Spirito havu la permeson vidigi sin al iu difinita persono, kio ne ĉiam estas al li konsentita aŭ nur en certaj cirkonstancoj, por motivoj, kiujn ni ne povas prijuĝi.

**106.** Ankoraŭ unu propreco de la perispirito, kiu ĝin havas dank'al sia etereca strukturo mem, estas la penetripovo. Nenia materio baras ĝian vojon: ĝi trapasas ĉion same facile, kiel la lumo trairas la diafanajn korpojn. Tial nenia ĉirkaŭfermejo povas kontraŭstari la eniron de la Spiritoj; ili vizitas malliberulon en lia karcero tiel facile, kiel homon en la kamparo.

**107.** La aperoj en maldormo estas nek maloftaĵo, nek novaĵo; ili okazis en ĉiuj tempoj; la Historio raportas grandan nombron da ili; sed, ne irante returne tiel malproksimen, en la nuna tempo ili estas tre oftaj, kaj multe da homoj ilin vidis, sed prenis ilin, en la unua momento, kiel tion, kion oni interkonsente nomis halucinoj. Ili estas oftaj precipe ĉe la morto de forestantaj homoj, kiuj venas viziti siajn parencojn aŭ amikojn. Ili ofte havas nenian difinitan celon, sed oni povas diri, ke la aperantaj Spiritoj estas ordinare altirataj de simpatio. Se ĉiu sondos sian memoron, tiam oni konstatos, ke ne malmultaj homoj eksciis pri kelke da tiaj faktoj, kies aŭtentikecon neniu povus dubi.

**108.** Al la supraj konsideroj mi nun aldonos la ekzamenon de kelkaj optikefikoj, kiuj naskis la kuriozan sistemon de la **Spiritoj-globetoj**.

La aero ne ĉiam estas absolute klara, kaj en certaj cirkonstancoj oni okulvideble konstatas ĝian fluadon kaj agitiĝadon kiel efikon de la varmo. Iuj homoj prenis tion kvazaŭ amason da Spiritoj, agitiĝantaj en la spaco; la sola elmontro de ĉi tiu opinio ĝin kondamnas. Sed ĉi tie fariĝas alispeca ne malpli stranga iluzio, kontraŭ kiu estas bone sin gardi.

La akva humoro de la okulo prezentas apenaŭ rimarkeblajn punktojn, kiuj perdis iom de sia travidebleco. Tiuj punktoj estas kvazaŭ maldiafanaj korpoj, suspens-

antaj en la likvaĵo, kies movojn ili sekvas. Dank'al pligrandigo kaj refrakto ili aspektas, en la ĉirkaŭa aero kaj de malproksime, kvazaŭ disketoj de unu ĝis dek milimetroj en la diametro, ŝajnantaj ŝvebi en la atmosfero. Mi vidis homojn, kiuj prenis tiujn diskojn por Spiritoj, ilin ĉien sekvantaj kaj akompanantaj, kaj kiuj, en sia entuziasmo, rigardis kiel figurojn la nuancojn de la irizado de la lumo, kio estas pli aŭ malpli tiel racia, kiel vidi figuron en la luno. Simpla observado de la flanko de tiuj homoj mem ilin rekondukos sur la terenon de la realeco.

Tiuj diskoj aŭ medalionoj, ili diras, ne nur akompanas ilin, sed sekvas ĉiujn iliajn movojn: tiuj iras dekstren, maldekstren, supren, malsupren, aŭ haltas, laŭ la movoj de la kapo. Tio ne estas miriga: ĉar la ŝajno sidas sur la okulglobo, tial ĝi devas sekvi la movojn de la okulo. Se tio estus Spiritoj, oni devus ja konsenti, ke ili estus limigitaj al rolo tro mekanika por inteligentaj kaj liberaj estuloj, rolo tre teda eĉ por malsuperaj Spiritoj kaj, des pli prave, neakordigebla kun la ideo, kiun ni faras al ni pri la Superaj Spiritoj. Kelkaj homoj, estas vero, prenas por malbonaj Spiritoj la nigrajn punktojn aŭ amaŭrozajn makulojn.

Tiuj diskoj, kiel ankaŭ la nigraj makuloj, havas oscilan movadon, kiu neniam translimas la amplitudon de certa angulo, kaj kunhelpas al la iluzio tiu fakto, ke ili ne abrupte sekvas la movojn de la vidlinio. La kaŭzo de ĉi tio estas ja tre simpla. La maldiafanaj punktoj de la akva humoro, kiel mi diris, kvazaŭ suspensas kaj ĉiam inklinas malsupreniri; ili supreniras instigite de la movo de la okulo de malsupre supren, sed kiam ili atingas certan alton, se oni ne plu movas la okulon, tiam oni konstatas, ke la diskoj malsupreniras mem kaj poste haltas. Ilia moviĝemo estas grandega, ĉar sufiĉas plej malgranda movo de la okulo, por igi ilin ŝanĝi sian direkton kaj rapide laŭiri la tutan arkon en la spaco, kie fariĝas la bildo. Tiel longe ĝis ne estos pruvite, ke iu bildo havas propran, spontanean kaj inteligentan movadon, oni ne povas vidi en tio ion alian, ol nuran optikan aŭ fiziologian fenomenon.

Same estas kun la stelumaĵoj, kiuj iafoje ekaperas kun la aspekto de iom kompaktaj garboj aŭ faskoj, dank'al la kuntiriĝo de la okulmuskoloj, kaj kiuj ordinare ne translimas la rondon de la iriso.

Tiaj iluzioj povas esti nenio krom la rezultato de nekompleta observado. Kiu ajn serioze studis la naturon de la Spiritoj per ĉiaj rimedoj, kiujn la praktika scienco disponigas al la homo, tiu komprenas, kiom da infaneca enhavas tiuj iluzioj. Kiel ni kontraŭbatalas la senpripensajn teoriojn, per kiuj oni atakas la manifestiĝojn, kiam tiuj teorioj baziĝas sur la nekonado de la faktoj, tiel same ni devas peni detrui la malverajn ideojn, kiuj elmontras pli da entuziasmo, ol da konsideremo, kaj kiuj, pro tio mem, pli malutilas, ol utilas, rilate la nekredemulojn, jam mem inklinantajn elserĉi la ridindan flankon de ĉio.

**109.** La perispirito, kiel oni vidas, estas la principo de ĉiaj manifestiĝoj. De kiam oni ĝin ekkonis, oni ekhavis la ŝlosilon de multego da fenomenoj. Tiu konado ebligis al la spiritisma scienco fari grandegan paŝon kaj kondukis ĉi tiun novan vojon, liberigante ĝin el ĉiu supernatura karaktero. De la Spiritoj mem, ĉar bone notu al vi, ke tio estis ili, kiuj indikis al mi la vojon, mi ricevis la klarigon de la agado de la Spiritoj sur la materion, de la movado de la inertaj korpoj, de la bruoj kaj de la aperoj. Tie oni trovas ankaŭ la klarigon de pluraj aliaj fenomenoj, kiujn mi ankoraŭ devas ekzameni, antaŭ ol transiri al la studado de la ĝustadiraj komunikaĵoj. Ĉi tiujn oni komprenos des pli klare, ju pli bone oni konos la unuajn kaŭzojn. Kiu ĝuste komprenis tiun principon, tiu facile ĝin aplikos al la diversaj faktoj, kiuj povos sin prezenti al lia observado.

**110.** For de mi estas la pretendo rigardi la ĵus prezentitan teorion kiel absolutan kaj kiel la lastan vorton; ĝin sendube kompletigos aŭ korektos kun la tempo novaj studoj, sed, kiel ajn nekompleta aŭ neperfekta ĝi estas ankoraŭ hodiaŭ, ĝi tamen povas kunhelpi al la ekscio pri la ebleco de la faktoj el kaŭzoj, kiuj havas nenion supernaturan. Se ĝi estas hipotezo, oni tamen ne povas

ne rekoni en ĝi la meriton de racieco kaj probableco, kaj ĝi ja valoras tiom, kiom ĉiuj klarigoj, kiujn donas la neigantoj, por pruvi, ke en la spiritismaj fenomenoj ĉio estas nur iluzio, fantasmagorio kaj artifiko.

## Teorio de la halucino

**111.** Kiuj ne konsentas la ekziston de la senkorpa kaj nevidebla mondo, tiuj pensas, ke ili klarigas ĉion per la vorto **halucino**. La difino de ĉi tiu vorto estas konata al ĉiu, nome: eraro, iluzio de iu homo, kiu kredas, ke li havas perceptojn, kiujn li efektive ne havas. La origina vorto estas la latina **hallucinari** (erari), kiu siavice venas de **ad lucem**. Sed, kiom mi scias, la scienculoj ĝis hodiaŭ ne eldiris ĝian fiziologian kaŭzon.

Se, kiel ŝajnas, ili malkaŝis ĉiujn sekretojn de la optiko kaj de la fiziologio, kial do ili ankoraŭ ne klarigis la naturon kaj la fonton de la bildoj, kiuj montriĝas al la spirito en iaj cirkonstancoj?

Ili volas klarigi ĉion laŭ la leĝoj de la materio: nu, bone; ili do, laŭ tiuj samaj leĝoj, starigu ian teorion de la halucino: ĉu bona, ĉu malbona, ĝi estus tamen ia klarigo.

**112.** La kaŭzon de la sonĝoj la scienco neniam eldiris; la scienco atribuas la sonĝojn al ia efiko de la imagemo, sed ĝi ne difinas la imagemon kaj ankaŭ ne, kiel ĉi tiu formas tiujn tiel klarajn kaj tiel netajn bildojn, kiuj iafoje sin montras al ni. Tio estas klarigo de unu nekonata afero per alia same nekonata: la demando restas do ĉe la sama staro. La sonĝoj, oni diras, estas rememoraĵo el la hieraŭaj zorgoj; sed eĉ se oni akceptus ĉi tiun solvon, kiu solvo ja ne estas, restus ankoraŭ ekscii, kio estas tia magia spegulo, kiu tiele konservas la stampon de la aferoj; kiel klarigi precipe tiujn vidojn de aĵoj realaj, kiujn oni neniam vidis en maldormo kaj pri kiuj oni neniam antaŭe pensis? Nur Spiritismo povis doni al ni la ŝlosilon de tiu kurioza fenomeno, kiun ni tute ne atentas ĝuste dank'al ĝia ordinareco mem, kiel ĉiujn mirindaĵojn de la Naturo, kiujn ni malŝate taŭzas.

La scienculoj konsideris la halucinon ne inda je ilia atento; ĉu reala, ĉu ne, ĝi estas tamen fenomeno, kiun la fiziologio devas kapabli klarigi, ĉar alie ĝi konfesus sian nesufiĉan kompetentecon. Se iu scienculo iam entreprenos doni de la halucino ne ian difinon, ni nin interkomprenu, sed fiziologian klarigon, ni vidos, ĉu lia teorio solvas ĉiajn okazojn; li ne prisilentu precipe la tiel ordinarajn aperojn de homoj ĉe la momento de ties morto; li diru, kial kuntrafiĝas la apero kun la morto de la homo.

Se tio estus ia unuopa fakto, oni povus alkalkuli ĝin al hazardo, sed ĝi estas tro ofta, ke oni atribuu ĝin al la hazardo, kiu ja ne faras tiajn ripetojn. Se almenaŭ la imagemon de tiu, kiu vidas aperaĵon, ekfrapus la penso, ke tiu homo estis tuj mortonta, konsentite; sed la aperanto estas plej ofte tiu homo, pri kiu oni la plej malmulte pensas: sekve la imagemo neniel partoprenas en tio. Ankoraŭ malpli kontentige oni povas klarigi per la imagemo la tute nekonatajn cirkonstancojn de ies morto.

La halucinismanoj eble diros, ke la animo (se nur ili akceptas la ekziston de ia animo) travivas momentojn de superekscitiĝo, kiam ĝiaj kapabloj estas ekzaltitaj: mi konsentas; sed kiam tio, kion ĝi vidas, estas reala, tiam ĝi jam ne estas iluzio. Se en sia ekzaltiteco la animo vidas ion forestantan, ĝi do transportiĝas tien; sed se nia animo povas transportiĝi al forestanta homo, kial do la animo mem de ĉi tiu ne povus transportiĝi al ni? En sia teorio de la halucino ili bonvolu konsideri ĉi tiujn faktojn kaj ne forgesi, ke iu teorio, kontraŭ kiu oni povas prezenti neigantajn faktojn, estas nepre malvera aŭ nekompleta.

Atendante de ili la necesan klarigon, mi nun provos eldiri kelke da ideoj en ĉi tiu rilato.

**113.** La faktoj pruvas, ke okazas efektivaj aperoj de Spiritoj, kiujn la spiritisma teorio perfekte klarigas kaj kiujn povas nei nur tiuj homoj, kiuj akceptas nenion ekster la organa korpo; sed, krom la efektivaj vidoj, ĉu okazas ankaŭ halucinoj laŭ la ordinara senco de ĉi tiu vorto? Ili estas eksterdubaj. Kia estas ilia fonto? La

Spiritoj mem ja kondukas nin sur la ĝustan vojon, ĉar la klarigo, ŝajnas al mi, troviĝas tuta en la respondoj, donitaj al la jenaj demandoj:

— Ĉu la vidaĵoj estas ĉiam realaj? Ĉu iafoje ili ne estas efiko de halucino? Kiam, en sonĝo aŭ en alia okazo, oni vidas ekzemple la diablon aŭ aliajn neekzistantajn fantaziaĵojn, ĉu tio ne estas ia kreaĵo de la imagemo?

"Ĝi estas tia kreaĵo kelkafoje; kiam la menson frapas iaj impresaj legaĵoj aŭ rakontoj pri sorĉaĵoj, tiam oni ilin rememoras kaj kredas, ke oni vidas tion, kio ja ne ekzistas. Sed ni jam diris ankaŭ, ke la Spirito, en sia duonmateria envolvaĵo, povas preni sur sin ĉiajn formojn, por manifestiĝi. Ia mokŝercema Spirito povas do aperi kun kornoj kaj ungegoj, se tio plaĉas al li, por sin amuzi pri la homa kredemeco, tiel same, kiel bona Spirito povas montriĝi kun flugiloj kaj brilradia aspekto."

— Ĉu oni povas rigardi kiel aperaĵojn la figurojn kaj aliajn bildojn, ofte montriĝantajn en nia duondormo aŭ simple tiam, kiam ni fermas la okulojn?

"De la momento, kiam la sentumoj malvigliĝas, la Spirito liberiĝas kaj povas vidi, malproksime aŭ proksime, tion, kion li ne povus vidi per la okuloj mem. Tiuj bildoj estas ofte vidaĵoj, sed ili povas esti ankaŭ efiko de la impresoj, kiujn la vidado de iaj objektoj postlasis en la cerbo, kiu konservas iliajn postesignojn tiel same, kiel ĝi konservas tiujn de la sonoj. Liberiĝinte, la Spirito tiam vidas en sia propra cerbo tiujn stampojn, kiuj tie fiksiĝis kvazaŭ sur dagerotipa plato. Ilia diverseco kaj konfuziteco formas strangajn kaj nedaŭrajn tutaĵojn, kiuj preskaŭ tuj disfumiĝas, malgraŭ la penoj, kiujn oni faras, por ilin reteni. Al iu simila kaŭzo oni devas atribui iajn fantaziajn aperaĵojn, kiuj estas neniel realaj kaj ofte sin prezentas dum malsaneco."

Estas konstatite, ke la memoro estas la rezultato de la impresoj konservataj de la cerbo; sed per kia stranga fenomeno tiuj impresoj, tiel diversaj, tiel multeformaj, ne intermiksiĝas? Jen mistero nepenetrebla, sed ne pli stranga, ol tiu de la sonondoj, kiuj kruciĝas en la aero, tamen ne fariĝante malpli klare aŭdeblaj. En sana kaj bone organizita cerbo tiuj impresoj estas netaj

kaj precizaj; ĉe malpli favora stato ili paliĝas kaj intermiksiĝas: el tio rezultas ilia perdo el la memoro aŭ la konfuziteco de la ideoj. Ĉi tio aspektas ankoraŭ malpli eksterordinara, se oni akceptas, kiel en la frenologio, ke al ĉiu parto, eĉ al ĉiu fibro de la cerbo, estas destinita ia speciala funkcio.

Veninte en la cerbon tra la okuloj, la vidaĵoj tie postlasas impreson, dank'al kiu oni memoras iun bildon, kvazaŭ oni havus ĝin antaŭ si; sed tio estas ĉiam nur demando de memoro, ĉar oni ĝin ne vidas. Nu, en certa stato de liberiĝo la animo rigardas en la cerbon kaj tie ĝi retrovas tiujn vidaĵojn, precipe tiujn, kiuj ĝin plej forte frapis, laŭ la naturo de la zorgoj aŭ la inklinoj de la spirito. Ĝi tiele retrovas la stampon de scenoj religiaj, diablaj, dramaj, mondaj, de la figuroj de strangaj bestoj, kiujn ĝi iam vidis en pentraĵoj aŭ eĉ en rakontoj, ĉar ja ankaŭ la rakontoj postlasas premsignojn. La animo do vidas reale, sed ĝi vidas nur bildon, stampitan en la cerbo. En normala stato tiuj bildoj estas forpasemaj kaj efemeraj, ĉar ĉiuj partoj de la cerbo funkcias libere; dum malsaneco la cerbo ĉiam estas iom senfortiĝinta, jam ne ekzistas ekvilibro inter ĉiuj organoj: nur kelkaj konservas sian aktivecon, dum aliaj estas iel paralizitaj. El tio originas la persistado de iaj bildoj, kiujn jam ne forviŝas la zorgoj de la ekstera vivo, kiel en la normala stato. Jen la vera halucino kaj la unua kaŭzo de la fiksaj ideoj.

Kiel oni vidas, mi klarigis ĉi tiun anomalion per tre konata principo tute fiziologia, nome tiu pri la cerbaj stampoj, sed mi devis ĉiam partoprenigi en tio la animon; nu, la materialistoj ankoraŭ ne povis prezenti kontentigan solvon por ĉi tiu fenomeno, ĉar ili ne volas konsenti la ekziston de la animo; tial ili diros, ke mia klarigo estas malbona, ĉar mi levis ĝis principo ion kontestatan. De kiu ĝi estas kontestata? De ili, sed akceptita de la grandega plimulto de la homoj, de kiam homoj ekzistas sur la Tero; la neado de kelkaj ne povas fari leĝon.

Ĉu mia klarigo estas bona? Mi donas ĝin laŭ ĝia ebla valoro manke de alia kaj, se oni preferas, oni pov-

as ĝin preni kiel nuran hipotezon en atendo de io pli bona. Ĉu tia, kia ĝi estas, ĝi donas pravon de ekzisto al ĉiaj okazoj de tia vidado? Certe ne; tamen mi spite invitas ĉiujn fiziologojn prezenti eĉ unu solan, kiu laŭ ilia ekskluziva vidpunkto solvus ilin ĉiujn, ĉar, dirinte siajn ritajn vortojn "superekscitiĝo" kaj "ekzaltiteco", ili ja diris nenion. Sekve, se ĉiuj teorioj de la halucino estas nesufiĉaj, por klarigi ĉiujn faktojn, ekzistas do io alia ol la halucino mem. Mia teorio estus malvera, se mi aplikus ĝin al ĉiaj okazoj de vidado, ĉar kelkaj ĝin kontraŭdiras; se limigita al iuj efikoj, ĝi povas esti ĝusta.

———————

ĈAPITRO VII

# PRI LA DUKORPECO KAJ LA TRANSFIGURIĜO

*Aperoj de Spiritoj de vivantoj. Duoblaj homoj. Sankta Alfonso el Liguori kaj Sankta Antono el Padovo. Vespaziano. Transfiguriĝo. Nevidebleco*

**114.** Ĉi tiuj du fenomenoj estas variaĵoj de la vid-manifestiĝoj, kaj kiel ajn miraklecaj ili ĉe la unua ek-rigardo povas ŝajni, oni facile konstatas laŭ la klarigo, kiun oni povas doni pri ili, ke ili troviĝas en la kadro de la naturaj fenomenoj. Ambaŭ baziĝas sur la principo, ke ĉio, dirita pri la proprecoj de la perispirito post la morto, aplikiĝas al la perispirito de la vivantoj. Ni scias, ke dum la dormo la Spirito parte rericevas sian liberecon, t. e. apartiĝas de la korpo, kaj ĝuste en ĉi tiu stato mi ofte havis okazon lin observi. Sed la Spirito, ĉu la homo estas mortinta, ĉu vivanta, ĉiam portas sian duonmaterian envolvaĵon, kiu, pro la samaj kaŭzoj, pri kiuj mi parolis, povas fariĝi videbla kaj tuŝebla. Efektive pozitivaj faktoj allasas nenian dubon en ĉi tiu rilato. Mi citos nur kelkajn, kiujn mi mem konas kaj kies verecon mi povas garantii; ĉiu povas mem rikolti similajn el la arkivo de sia memoro.

**115.** La edzino de unu mia amiko plurfoje vidis nokte eniri en ŝian ĉambron, ĉu estis lume aŭ ne, frukto-vendistinon el la najbaraĵo, virinon, kiun ŝi konis nur vizaĝe, al kiu ŝi do neniam antaŭe parolis. Tiu aperaĵo ŝin ekteruris, des pli forte, ĉar ŝi tiam tute ne konis Spiritismon kaj tiu fenomeno multajn fojojn ripetiĝis. Nu, tiu vendistino estis ja vivanta kaj en tiu tempo de la nokto kredeble dormis; tiel do, dum ŝia materia korpo

ripozis en ŝia domo, ŝia Spirito kun sia fluidaĵa korpo troviĝis en la domo de tiu sinjorino: kiakaŭze? tion oni ne scias. En tia okazo ĉiu spiritisto, bone konanta tiajn aferojn, estus eldemandinta la aperaĵon, sed pri tio la sinjorino ne ekpensis. Ĉiufoje la aperaĵo eklipsiĝis, sed ŝi ne sciis kiel, kaj ankaŭ ĉiufoje, post la disfumiĝo, ŝi iradis al ĉiuj pordoj, por certiĝi, ke ili estas ja ŝlositaj kaj tiel neniu homo povis esti penetrinta en ŝian ĉambron. Ĉi tiu antaŭzorgo pruvis al ŝi, ke ŝi tiam tute ne dormas kaj ne estas trompata de ia sonĝo.

Aliajn fojojn ŝi en sama maniero ekvidis sinjoron, kiun ŝi ne konis, sed unu tagon ŝi vidis sian fraton, kiu tiam loĝis en Kalifornio; li havis tian aspekton de reala persono, ke en la unua momento ŝi kredis, ke li revenis, kaj ekdeziris paroli al li, sed li malaperis, ne ebliginte al ŝi tion fari. Letero, kiun ŝi post kelka tempo ricevis, pruvis, ke li ne estas mortinta. Tiu sinjorino estis tio, kion oni povas nomi natura vidiva mediumino, sed tiam, kiel mi diris, ŝi antaŭe neniam aŭdis pri iaj mediumoj.

**116.** Alia sinjorino, loĝanta en provinco, estante serioze malsana, ekvidis unu vesperon, ĉirkaŭ la deka horo, maljunan sinjoron, kiu loĝis en la sama urbo kaj kiun ŝi kelkafoje renkontis en societaj rondoj, sed sen ia intimeco inter ambaŭ. Tiu sinjoro ekaperis sidanta sur brakseĝo ĉe la pieda parto de ŝia lito kaj de tempo al tempo ekflaradis preneton da tabako; li aspektis, kvazaŭ li ŝin prizorgas. Mirante pro tia vizito en tia tempo de la tago, ŝi ekvolis demandi lin, kial li tie troviĝas, sed li faris geston, ke ŝi ne parolu kaj dormu; ŝi plurajn fojojn volis direkti al li la parolon, sed ĉiun fojon tiu sama rekomendo. Ŝi fine ekdormis. Post kelke da tagoj, jam resaniĝinte, ŝin vizitis tiu sama sinjoro, sed en pli oportuna tempo, kaj ĉi tiun fojon tio estis li mem: li portis tiun saman veston, tenis tiun saman flartabakujon kaj havis tute tiujn samajn manierojn. Konvinkite, ke li venis al ŝi dum ŝia malsaneco, ŝi dankis lin por tiu lia klopodo; forte surprizite, la sinjoro diris al ŝi, ke li jam de longe ne havis la plezuron ŝin vidi. La sinjorino, kiu konis la spiritismajn fenomenojn, ekkom-

prenis la aferon, sed, ne dezirante ĝin klarigi al li, diris nur, ke ŝi kredeble sonĝis. Jen, kio estas probabla, dirus la nekredemuloj, la "fortaspirituloj", kio, laŭ ilia opinio, estas sinonimo de sprituloj; sed estas konstatite, ke ĉi tiu sinjorino tute ne dormis, tiel same, kiel tiu alia, antaŭe priparolita. — Nu, tiam ŝi sonĝis, tute ne dormante; alivorte, ŝi spertis halucinon. — Jen la savanta vorto, la universala klarigo de ĉio, kion oni ne komprenas. Ĉar mi jam sufiĉe refutis ĉi tiun kontraŭdiron, tial mi daŭrigos miajn konsiderojn, turnante min al tiuj homoj, kiuj povas min kompreni.

**117.** Jen nun ankoraŭ unu fakto, ĉi tiu pli trafa, kaj mi estas scivola ekscii, kiel oni povus ĝin klarigi per la sola elturniĝo de la imagemo.

Unu provincano neniam volis edziĝi, spite la insistadon de sia familio, precipe en rilato al junulino, kiu loĝis en najbara urbo kaj kiun li neniam antaŭe vidis. Unu tagon, en sia ĉambro, li estis forte frapita de la surprizo vidi antaŭ si junulinon, blanke vestitan kaj kun florkrono ĉirkaŭ la kapo. Ŝi diris al li, ke ŝi estas lia fianĉino, kaj eletendis al li la manon, kiun li ekprenis en la sian; sur unu el ties fingroj li vidis ringon. Post kelke da sekundoj ĉio ĉi malaperis. Miregante tiun aperaĵon kaj certiĝinte, ke li tute ne dormis, li informiĝis, ĉu iu venis en la domon dum tiu tago; oni repondis al li, ke oni vidis neniun. Post unu jaro, cedinte al pluaj petoj de iu parencino, li decidiĝis vidi tiun junulinon, kiun oni al li proponis. Li venis en ŝian urbon en la tago de la Kristokorpa festo; oni estis revenanta post la procesio, kaj unu el la unuaj homoj, kiuj montriĝis antaŭ liaj okuloj, enirante en la domon, en kiu li gastis, estis junulino, kiun li tuj rekonis kiel tiun, kiu iam aperis al li; ŝi estis same vestita, ĉar la tago de la apero estis ankaŭ la tago de tiu festo. Li perpleksiĝis, kaj siaflanke la junulino ellasis krion de surprizo kaj eksentis sin nebone. Rekonsciiĝinte, ŝi diris, ke ŝi jam vidis tiun sinjoron en egala tago de la pasinta jaro. Oni intertraktis ilian geedziĝon. Tio okazis ĉirkaŭ la jaro 1835, kiam ankoraŭ ne ekzistis ia demando pri Spiritoj;

cetere ili ambaŭ estas ekstreme pozitivaj homoj, havantaj la malplej ekzaltitan imagemon en la mondo.

Oni eble diros, ke la spiritoj de ambaŭ estis frapitaj de la penso pri la proponita ligiĝo kaj ke tiu absorba zorgo kaŭzis halucinon; sed oni ne forgesu, ke la edzo estis tiel indiferenta por tia ligiĝo, ke li pasigis unu jaron, ne irante al sia estonta edzino. Eĉ akceptante ĉi tiun hipotezon, restus klarigi la duoblan aperon, la samecon de la du vestoj: de la aperaĵo kaj de la fraŭlino mem, kaj fine la reciprokan materialan rekonadon de homoj, neniam antaŭe vidintaj unu la duan, cirkonstancoj, kiuj ne povas esti kreaĵo de la imagemo.

**118.** Antaŭ ol iri pluen, mi devas tuj respondi iun demandon, kiun oni certe faros, nome, kiel la korpo povas vivi, se la Spirito estas for de ĝi. Mi povus diri, ke la korpo povas vivi la organan vivon, kiu ne dependas de la ĉeesto de la Spirito, kaj la pruvo de tio estas, ke la vegetaĵoj vivas kaj tamen ne havas spiriton; sed mi devas aldiri, ke dum sia surtera vivo la Spirito neniam tute apartiĝas de la korpo. Kiel iuj vidivaj mediumoj, tiel same la Spiritoj rekonas la Spiriton de vivanta homo laŭ luma strio, kiu kuntuŝiĝas kun ties korpo; tio neniam okazas, kiam la korpo estas mortinta, ĉar tiam la disiĝo estas kompleta. Ĝuste per tia komunikilo la Spirito de homo, kiel ajn malproksime li troviĝas, ricevas tujan avizon, ke la korpo bezonas lian ĉeeston, kaj tiam li al ĝi revenas fulmrapide (*). El ĉi tio sekvas, ke la korpo neniel povas morti dum tiu kelkatempa foresto de la Spirito kaj ke neniam povas okazi, ke ĉi tiu, reveninte, trovus la pordon fermita, kiel asertas kelkaj romanistoj en historioj, verkitaj por plezurigo. (**La Libro de la Spiritoj**, §§ 400 k. sekv.)

**119.** Ni reprenu nian temon. Izoliĝinte de la korpo, la Spirito de vivanto povas, kiel tiu de mortinto, aperi

(*) La "spirita distanco" estus ĝustadire "vibra distanco", sekve malsama ol la "spaca distanco", de la klasika Fiziko. Pri tia "distanco" oni legu la verkon "Nia Hejmo", pĝ. 219, 220. — *La Trad.*

kun la plena aspekto de realeco; krom tio, pro tiuj samaj kaŭzoj, kiujn mi prezentis, li povas fariĝi momente tuŝebla. Ĉi tiu fenomeno, konata sub la nomo **dukorpeco**, estis tio, kio donis materialon por la historioj pri la duoblaj homoj, t. e. homoj, kies ĉeesto estis konstatita samtempe en du malsamaj lokoj. Jen du ekzemploj, ĉerpitaj ne el la popolaj legendoj, sed el la eklezia historio.

Sankta Alfonso el Liguori estis kanonizita antaŭ la difinita tempo, ĉar li sin montris samtempe en du malsamaj lokoj, kion oni konsideris miraklo.

Sankta Antono el Padovo (*) estis predikanta en Italujo, kiam lia patro, en Lisbono, akuzita pri murdo, estis torturota. Ĉe la momento de la ekzekuto Sankta Antono ekaperis, pruvis la senkulpecon de sia patro kaj denuncis la efektivan kriminton, kiu poste ricevis la punon. Estis konstatite, ke ĉe tiu momento Sankta Antono ne estis forlasinta Italujon (**).

De ni elvokite kaj demandite pri ĉi tiu fakto, Sankta Alfonso respondis jene:

I. Ĉu vi povus klarigi ĉi tiun fenomenton?

"Jes. Kiam pro sia virteco la homo sukcesis kvazaŭ tute formeti de si la krudan materion kaj altigis sian animon ĝis Dio, li povas aperi samtempe en du lokoj: jen kiel. Sentante, ke la dormo jam venas, la enkarna Spirito povas peti de Dio la permeson iri al tiu aŭ tiu loko. Lia Spirito, aŭ lia animo, kiel vi volas nomi tiun estaĵon, tiam forlasas sian korpon kune kun **parto** de sia perispirito kaj restigas la malpuran materion en stato proksima al morto. Mi diras **proksima** al morto, ĉar en la korpo estas plu ia ligilo, kiu tenadas la perispiriton kaj la animon ĉe la materio, ligilo, kiu ne povas esti difinita. La korpo do aperas en la pripetita loko. Mi pensas, ke ĉi tio estas ĉio, kion vi deziras scii."

II. Tio ne klarigas al ni la videblecon kaj la tuŝeblecon de la perispirito.

---

(*) Nomata ankaŭ "Sankta Antono el Lisbono". — *La Trad*.

(**) La Aŭtoro diras resp. "Hispanujo" kaj "Padovo", sed ni trovis nian devon reguŝtigi la faktojn. *La Trad*.

"Troviĝante for de la materio, laŭ sia ŝtupo en la hierarkio, la Spirito povas fariĝi tuŝebla por la materio."

III. Ĉu la dormo de la korpo estas nepre necesa, por ke la Spirito aperu en aliaj lokoj?

"La animo povas dividiĝi, kiam ĝi sin sentas portata al iu loko alia ol tiu, en kiu ĝia korpo troviĝas. Povas okazi, ke la korpo tiam ne dormas, kvankam ĉi tio estas tre malofta; en ĉi tiu okazo la korpo neniam troviĝas en tute normala stato, sed ĉiam en stato pli aŭ malpli ekstaza."

*Rimarko*. La animo ne dividiĝas, laŭ la litera senco de la vorto: ĝi disradias en plurajn flankojn, tial ĝi povas manifestiĝi en pluraj lokoj, ne dividiĝinte. Estas kun ĝi tiel same, kiel kun la lumo, kiu povas rebrili de pluraj speguloj.

IV. Kio okazus, se oni subite vekus homon dormantan, dum lia Spirito sin montras aliloke?

"Ĉi tio ne okazus; se iu intencus veki lin, la Spirito flugus returne al la korpo kaj antaŭiĝus al ties intenco, ĉar la Spirito legas en la menso."

Tute egalan klarigon plurfoje donis al mi la Spiritoj de mortintoj aŭ vivantoj. Sankta Alfonso klarigas la duoblan ĉeeston, sed ne donas la teorion de la videbleco kaj de la tuŝebleco.

**120.** Tacito raportas analogan fakton:

Dum la monatoj, kiujn Vespaziano pasigis en Aleksandrio, atendante la periodan revenon de la someraj ventoj kaj de la tempo, kiam la maro fariĝas sendanĝera, okazis pluraj miregindaĵoj, per kiuj montriĝis la favoreco de la ĉielo kaj la intereso, kiun la dioj laŭŝajne havis por tiu imperiestro...

Tiuj miregindaĵoj pligrandigis ĉe Vespaziano la deziron viziti la sanktan loĝejon de la dio, por konsulti lin pri aferoj de la imperio. Li ordonis fermi la templon kontraŭ ĉiu ajn; enirinte kaj kun la atento streĉe turnita al tio, kion parolos la orakolo, jen li ekvidis post si unu el la plej eminentaj egiptoj, nomatan Bazilido, pri kiu li sciis, ke tiun retenas malsaneco en loko kelke da tagoj malproksima de Aleksandrio. Li demand-

is la pastrojn, ĉu Bazilido tiun tagon venis en la templon; ankaŭ de preterpasantoj li petis la informon, ĉu ili vidis tiun eminentulon en la urbo; fine li sendis rajdantojn, kaj certiĝis, ke en tiu momento de la apero Bazilido troviĝis en la distanco de okdek mejloj. Tiam li jam ne dubis, ke la vidaĵo estis supernatura kaj la nomon de Bazilido li konsideris orakolo. (Tacito: **Historioj**, Parto IV, ĉap. 81 kaj 82. Traduko de Burnouf.)

**121.** La homo, kiu sin montras samtempe en du lokoj, havas do du korpojn, sed el tiuj du korpoj nur unu estas reala, la dua estas nura ŝajnaĵo. Oni povas diri, ke la unua vivas la vivon organan kaj la dua la vivon de la animo; ĉe la vekiĝo de la homo ambaŭ korpoj kuniĝas kaj la vivo de la animo revenas en la materian korpon. Ĝi ne ŝajnas al mi ebla — almenaŭ mi pri tio havas nenian ekzemplon kaj la racio, kiom mi komprenas, tion pruvas —, ke, kiam ili troviĝas unu for de la dua, la du korpoj povas samtempe kaj en egala grado ĝuadi aktivan kaj inteligentan vivon. Krom tio, el tio, kion mi ĵus diris, rezultas, ke la korpo reala ne povus morti, dum la korpo ŝajna restus videbla, ĉar la alproksimiĝo de la morto ĉiam revokas la Spiriton al la korpo, eĉ se por momento. El tio rezultas ankaŭ, ke la ŝajna korpo ne povus esti mortigita, ĉar ĝi ne havas organojn, ne konsistas el karno kaj ostoj: ĝi malaperus en tiu sama momento, kiam oni volus ĝin mortigi [*].

**122.** Mi nun pritraktos la duan fenomenon, nome la **transfiguriĝon**: ĝi konsistas en la aliaspektiĝo de vi-

---

(*) Vd, en la *Revue Spirite* la sekvantajn artikolojn: Januaro 1859: *La Bajona Koboldo*; Februaro 1859: *La ageneruloj* (**); *mia amiko Hermann*; Majo 1859: *La ligilo inter la Spirito kaj la korpo*; Novembro 1859: *La vaganta animo;* Januaro 1860: *La Spirito unuflanke kaj la korpo aliflanke*; Marto 1860: *Studoj pri la Spirito de vivantoj*; *doktoro V. kaj fraŭlino I.*; Aprilo 1860: *La Petersburga fabrikisto*; *tuŝeblaj aperaĵoj*; Novembro 1860: *Historio de Maria Agreda*; Julio 1861: *Providenca apero*. — *Noto de la Aŭtoro*.

(**) *Agenera*: Vd, glosaron. — *La Trad.*

vanta korpo. Jen pri tio fakto, kies aŭtentikecon mi povas garantii, okazinta en la jaroj 1858 kaj 1859, en la ĉirkaŭaĵo de Sankt-Stefano.

Unu junulineto, aĝanta ĉirkaŭ dek kvin jarojn, havis la strangan kapablon transfiguriĝi, t. e. ĉe iuj momentoj ekpreni la plenan aspekton de tiu aŭ alia mortinta homo; la iluzio estis tiel perfekta, ke ĉiu kredis, ke li havas antaŭ si tiun homon mem, tiel similaj estis la trajtoj de la vizaĝo, la rigardo, la sono de la voĉo, eĉ la ĵargono. Ŝi plurajn fojojn ekprenis la aspekton de sia frato, mortinta antaŭ kelke da jaroj: ŝi rebildigis ne nur lian vizaĝon, sed ankaŭ lian staturon kaj korpodikecon. Unu tiea kuracisto, kiu plurajn fojojn ĉeestis tiujn strangajn faktojn, dezirante certiĝi, ĉu li ne estas trompata de ia iluzio, faris jenan provon. Tiujn faktojn mi eksciis de li mem, de la patro de la junulino kaj de pluraj aliaj alte estimindaj kaj fidindaj vidintoj. Li elpensis la ideon pesi la junulinon en ŝia normala stato, poste dum ŝia transfiguriĝo, tiam, kiam ŝi aspektis kvazaŭ sia frato, mortinta dudekkelk-jara, junulo multe pli alta kaj pli fortika ol ŝi. Nu, li konstatis, ke en tiu dua stato la pezo estis preskaŭ duobla. La provo estis konkludiga, kaj ne eble estis atribui tiun aspekton al simpla optika iluzio.

Mi provu klarigi ĉi tiun fakton, kiun oni iam rigardis kiel miraklon, sed kiun mi nomas tute simple fenomeno.

**123.** La transfiguriĝo, en iuj okazoj, povas havi kiel kaŭzon simple ian muskolan kuntiriĝon, kiu povas tute alimienigi la fizonomion ĝis tia grado, ke ĝi faras la homon preskaŭ nerekonebla. Mi ofte konstatis transfiguriĝon ĉe iuj somnambuloj, sed ĉe tiu okazo la transfiguriĝo ne estas radikala; ekzemple, iu virino povas aspekti juna aŭ maljuna, bela aŭ malbela, sed ŝi estas ĉiam ankoraŭ virino kaj precipe ŝia pezo ne pligrandiĝas nek malpligrandiĝas. En la afero, kiun mi nun pritraktas, estas ankoraŭ io; la teorio de la perispirito kondukos nin al ĝia kompreno.

Estas konsentite en principo, ke la Spirito kapablas havigi al sia perispirito ĉiajn aspektojn; ke, modifante

la molekulan aranĝon, li povas fari ĝin vedebla, tuŝebla kaj sekve **opaka**; ke la perispirito de vivanto, kiam ĝi estas apartiĝinta de la korpo, povas sperti tiajn samajn aliiĝojn; ke ĉi tiu statoŝanĝiĝo fariĝas per interkombin-iĝo de la fluidaĵoj. Ni nun prezentu al ni, ke la peris-pirito de iu vivanto ne estas for de la korpo, sed dis-radias ĉirkaŭ ĉi tiun en tia maniero, ke ĝi envolvas la korpon kvazaŭ vaporo; en ĉi tiu stato ĝi povas ricevi tiajn samajn modifojn, kiajn ĝi ricevus, se ĝi troviĝus for de la korpo; se ĝi perdas sian travideblecon, la kor-po povas malaperi, fariĝi nevidebla kaj esti vualita, kva-zaŭ ĝi dronus en nebulego. Ĝi povas eĉ ŝanĝi sian as-pekton, fariĝi brilanta, se tion volas aŭ kapablas la Spirito. Alia Spirito, kombinante sian propran fluidaĵon kun tiu de la unua, povas havigi al ĉi tiu kombinaĵo sian propran aspekton en tia maniero, ke la reala korpo malaperas sub ekstera fluidaĵa tego, kies aspekto povas varii laŭ la plaĉo de la Spirito. Jen, ŝajnas, la vera kaŭzo de la stranga kaj, estas necese diri, malofta feno-meno nomata transfiguriĝo.

Koncerne la ŝanĝiĝon de la pezo, ĝi estas ĉi tie klar-igata tiel same, kiel pri la inertaj korpoj. La pezo pro-pra de la korpo ne ŝanĝiĝis, ĉar ankaŭ la kvanto da materio ne ŝanĝiĝis. La korpo ricevas la influon de eks-tera aganto, kiu povas pligrandigi aŭ malpligrandigi la pezon relativan, kiel mi klarigis supre, §§ 78 k. sekv. Estas do kredeble, ke se la transfiguriĝo fariĝus kun la aspekto de infano, la pezo estus proporcie malpliiĝinta.

**124.** Estas imageble, ke la korpo povas preni eks-teraĵon pli aŭ same grandan; sed kiel ĝi povus prezenti malpli grandan, ekzemple de infano, kiel mi ĵus diris? Ĉu en ĉi tiu okazo la korpo reala ja ne translimus la amplekson de la korpo ŝajna? Tial mi ne diras, ke tiu fakto ja okazis; mi nur volis montri, menciante la teo-rion de la specifa pezo, ke la ŝajna pezo eble malpliiĝis. Rilate la fenomenon mem, mi asertis nek ĝian fareblecon, nek ĝian nefareblecon; sed en la okazo, se ĝi fariĝus, de tio, ke oni ne povus pri ĝi doni kontentigan solvon, ne sekvŭ, ke ĝi ne okazas. Oni ja ne forgesu, ke ni

apenaŭ ekpaŝis en ĉi tiun sciencon kaj ke ankoraŭ multe mankas, ĝis ĝi diros sian lastan vorton. Cetere la elstarantaj partoj povus tute bone fariĝi nevidelaj.

La teorio de la nevidebleco elfluas tute nature el la antaŭaj klarigoj kaj el tiuj, donitaj pri la alportoj, §§ 96 k. sekv.

**125.** Restus al ni paroli pri la stranga fenomeno de la **ageneruloj**, kiu, kiel ajn eksterordinara ĝi povas ŝajni ĉe la unua ekrigardo, tamen ne estas pli supernatura ol la ceteraj. Sed, ĉar mi klarigis ĝin en la **Revue Spirite** (Februaro 1859), tial mi pensas senutile ĉi tie represi ĝiajn detalojn. Mi diras nur tion, ke ĝi estas variaĵo de la tuŝebla aperaĵo; ĝi estas la stato de iaj Spiritoj, kiuj momente povas preni sur sin la formojn de vivanta homo en tia grado, ke ili faras perfektan iluzion. (El la greka lingvo: seniga prefikso **a** kaj verbo **geine**, **geinomai**, generi: kiu ne estas generita.)

———————

ĈAPITRO VIII

# PRI LA LABOREJO DE LA NEVIDEBLA MONDO

*Vestoj de la Spiritoj. Spontanea formiĝo de tuŝeblaj objektoj. Modifo de la proprecoj de la materio. Kuraca magneta agado.*

**126.** Mi diris, ke la Spiritoj sin prezentas en tunikoj, en drapiraĵoj aŭ eĉ en tiaj ordinaraj vestoj, kiajn ili iam portis sur la Tero. Laŭŝajne la drapiraĵoj estas la ĝenerala vesto en la mondo de la Spiritoj; sed oni demandas sin, kie ili ekprenas vestojn tute similajn al tiuj iamaj, kun ĉiuj akcesoraĵoj de la tualeto. Estas eksterdube, ke ili ne kunportis tiujn aĵojn, ĉar la realaj aĵoj ankoraŭ troviĝas antaŭ niaj okuloj; el kie do venas tiuj, kiujn ili portas sur si en la Transmondo? Ĉi tiu afero ĉiam forte vekis scivolon, sed por multaj ĝi estas simpla kuriozaĵo; ĝi tamen konfirmis tre gravan demandon de principo, ĉar ĝia solvo kondukis nin sur la vojon de ĝenerala leĝo, aplikebla ankaŭ al nia enkorpa mondo. Pluraj faktoj poste komplikis ĝin kaj pruvis la nesufiĉecon de la teorioj, per kiuj oni provis ĝin klarigi.

Ĝis ioma grado oni povus komprenigi al si la veston, ĉar oni povas konsideri ĝin kiel ielan parton de la homo, sed ne same estas pri la akcesoraj objektoj, kiel ekzemple la flartabakujo de tiu sinjoro, kiu vizitis la malsanan sinjorinon, pri kio mi parolis en la § 117. Ni rimarku, en ĉi tiu rilato, ke tie la afero estis ne pri mortinto, sed pri vivanto, kaj ke tiu sinjoro, kiam li revenis en propra persono, tenis tute similan flartabakujon. Kie do lia spirito trovis tiun objekton, kiun li tenis tiam, kiam li sidis ĉe la pieda parto de la lito de la

malsanulino? Mi povus citi grandan nombron da okazoj, kiam Spiritoj de mortintoj aŭ de vivantoj aperis kun diversaj objektoj, kiel bastonoj, armiloj, pipoj, lanternoj, libroj k.a.

Tiam mi ekhavis unu ideon, nome, ke la inertaj korpoj havus eterecajn analogaĵojn en la nevidebla mondo; ke la densa materio, kiu konsistigas la objektojn, havus ian kvintesencan parton, ne trafeblan por niaj sentumoj. Ĉi tiu teorio ne estis tute neverŝajna, sed ne kapablis pravigi ciajn faktojn: ekzistas unu, kiu laŭŝajne nepre fiaskigus ĉiujn interpretojn. Ĝis tiam la afero estis nur pri bildoj aŭ ŝajnaĵoj. Ni ja vidis, ke la perispirito povas ricevi la proprecojn de la materio kaj fariĝi tuŝebla, sed tiu tuŝebleco estas nur momenta, kaj la solida korpo disfumiĝas kiel ia ombro. Tio estas jam eksterordinara fenomeno, sed multe pli eksterordinaraj estas la ellaborado de daŭra solida materio, kion pruvas multenombraj aŭtentikaj faktoj, kaj precipe la senpera skribo, kiun mi detale pritraktos en speciala ĉapitro. Tamen, ĉar ĉi tiu lasta fenomeno intime rilatas kun la nuna temo kaj estas unu el ties plej pozitivaj aplikaĵoj, tial mi inversigos la ordon kaj tuj pritraktos ĉi tiun fenomenon.

**127.** La senpera skribo, aŭ **pneŭmatografio**, estas tiu, kiu fariĝas spontanee, sen la helpo de la mano de mediumo aŭ de krajono. Sufiĉas preni blankan folion da papero, kion oni povas fari kun ĉiuj necesaj antaŭzorgoj, por certiĝi, ke oni ne povos esti trompita de ia artifiko, ĝin faldi kaj lasi en ia ajn loko, en iu tirkesto aŭ simple sur iu meblo. Tiam, se ekzistas la konvenaj kondiĉoj, post kelka, pli aŭ malpli longa tempo, oni trovas sur la papero literojn, diversajn signojn, vortojn, frazojn, eĉ disertaĵojn, plej ofte per grizeta substanco, simila al grafito, aliajn fojojn per ruĝa krajono, ordinara inko, eĉ presa inko.

Jen la fakto en sia tuta simpleco, kies okazigo, kvankam nemulte ordinara, tamen ne estas malofta, ĉar ĝin tre facile atingas pluraj personoj. Se oni almetus krajonon al la papero, oni povus supozi, ke la Spirito estus ĝin uzinta, por skribi; sed se apud la papero, kuŝas

nenio alia, estas do evidente, ke la skribon iu faris per ia substanco surmetita: kie la Spirito ekprenis tiun substancon? Jen la demando, al kies solvo min kondukis la tabakujo, pri kiu mi antaŭ nelonge parolis.

**128.** Tiun solvon donis al mi la Spirito Sankta Ludoviko per la sekvantaj respondoj:

I. Mi citis okazon de apero de la Spirito de vivanto. Tiu Spirito havis kun si flartabakujon kaj snufis la tabakon. Ĉu el tio li ĝuis tian saman sensaĵon, kiel homo, tion faranta?

"Ne."

II. Tiu flartabakujo havis tian saman formon, kiel tiu, kiun li ordinare uzadis kaj kiu ja troviĝis en lia domo. Kio estis tiu flartabakujo en la manoj de la aperaĵo?

"Ŝajnaĵo. Tiel estis, por ke tiu cirkonstanco estu rimarkita, kiel ĝi ja estis, kaj la aperaĵo ne estu rigardata, kiel ia halucino el la sanstato de la vidantino. La Spirito volis, ke tiu sinjorino kredu la realecon de lia ĉeesto kaj tial li prenis sur sin la plenan aspekton de la realeco."

III. Vi diras, ke tio estis ŝajnaĵo, sed ŝajnaĵo havas nenion realan, ĝi estas kvazaŭ optika iluzio. Mi dezirus ekscii, ĉu tiu flartabakujo estis nura nereala bildo, aŭ ĉu en ĝi troviĝis io materia?

"Certe; ĝuste per la helpo de tiu materia principo la perispirito prenas sur sin la ŝajnon de vestoj similaj al tiuj, kiujn la homo portadis sur la Tero."

*Rimarko*. Estas evidente, ke la vorton "ŝajnaĵo" oni ĉi tie devas kompreni en la senco de "aspekto, imitaĵo". La reala flartabakujo ne tie troviĝis; tiu, kiun la Spirito tenis, estis nura reprezentaĵo: ĝi estis do, rilate la originalon, simpla ŝajnaĵo, kvankam el materia principo.

La sperto intruas nin, ke ni devas ne ĉiam konsideri laŭlitere iujn esprimojn, uzatajn de la Spiritoj; interpretante ilin laŭ niaj ideoj, ni riskas grandajn erarojn. Tial estas necese profunde esplori la sencon de iliaj paroloj ĉiam, kiam ĝi estas eĉ plej malmulte duba; ĉi tio estas rekomendo, kiun senĉese faras al ni la Spiritoj mem. Sen tiu klarigo, kiun

mi elvokis, la vorto ŝajnaĵo, ĉiumomente uzata en analogaj okazoj, povus naski malĝustan interpreton.

IV. Ĉu la inerta materio dupartiĝas? Ĉu en la nevidebla mondo ekzistas ia esenca materio, kiu prenus sur sin la formon de la objektoj, kiujn ni vidas? Unuvorte, ĉu tiuj objektoj havas sian **eterecan duoblaĵon** en la nevidebla mondo simile, kiel la homoj estas tie reprezentataj de la Spiritoj?

"Ne tiel okazas la aferoj. Sur la materiaj elementoj, dissemitaj ĉie en la spaco, en via atmosfero, la Spirito havas tian potencon, kian vi tute ne suspektas. Li povas do laŭplaĉe plidensigi tiujn elementojn kaj doni al ili la ŝajnan formon, taŭgan por liaj projektoj.

*Rimarko*. Ĉi tiu demando, kiel oni vidas, estis la vortigo de mia penso, t. e. de la ideo, kiun mi estis al mi kreinta pri la naturo de tiuj objektoj. Se la respondoj de la Spiritoj estus, kiel kelkaj pretendas, ĉiam la rebildiĝo de la homa penso, mi estus ricevinta la konfirmon de mia teorio anstataŭ teorio kontraŭa al mia.

V. Mi denove formulas la demandon, nun kategorie, por antaŭforigi ĉiun miskomprenon: ĉu la vestoj, kiuj envolvas la Spiritojn, estas ja io?

"Ŝajnas al mi, ke mia antaŭa respondo solvas la demandon. Ĉu vi ne scias, ke la perispirito mem estas ja io?

VI. El ĉi tiu klarigo sekvas, ke la Spiritoj spertigas al la etereca materio transformojn laŭplaĉe kaj ke, tiel, ekzemple en rilato al la flartabakujo, la Spirito ne trovis ĝin tute preta: li ĝin faris mem por la momento, kiam li bezonis ĝin, per agado de sia volo, kaj poste li povis ĝin malfari. Tiel same kredeble estas kun ĉiaj objektoj, kiel vestoj, juveloj k. a. Ĉu tiel?

"Nu, evidente."

VII. Tiu flartabakujo estis tiel klare videbla por tiu sinjorino, ke ĝi kaŭzis ĉe ŝi la iluzion, kvazaŭ reala flartabakujo. Ĉu la Spirito kapablus fari ĝin tuŝebla por ŝi?

"Jes, li kapablus."

VIII. Ĉe okazo, ĉu tiu sinjorino povus preni ĝin en la manojn, kredante, ke ŝi tenas veran tabakujon?

“Jes.”

IX. Se ŝi malfermus ĝin, ŝi kredeble trovus tie tabakon; se ŝi flarus ĉi tiun, ĉu la tabako igus ŝin terni?

“Jes.”

X. Ĉu do Spirito povas ne sole formi objekton, sed ankaŭ havigi al ĝi specialajn proprecojn?

“Se nur li tion volas; ĝuste el ĉi tiu principo mi respondis jese la antaŭajn demandojn. Vi ricevos pruvojn de la potenca agado de Spiritoj sur la materion, agado, kiun vi tute ne suspektas, kiel mi jam diris al vi.”

XI. Ni do prezentu al ni la okazon, ke li volus kunmeti venenan substancon kaj ke iu homo glutus iom da ĝi: ĉu tiu estus venenita?

“Li tion povus, sed li ne farus; tio ne estus permesita al li.”

XII. Ĉu li havus la povon fari kuracan substancon, kiu efikus kiel resanigilo? Ĉu tio jam okazis?

“Jes, tre ofte.”

XIII. Li povus do tute bone fari nutran substancon; ni do imagu, ke li faris frukton, ian ajn manĝaĵon: ĉu iu povus ĝin manĝi kaj satiĝi?

“Jes ja; sed vi ne faru al vi tiom da klopodoj en serĉado, por trovi tion, kio estas tiel facile komprenebla. Sufiĉas unu radio de la suno, por fari percepteblaj por viaj maldelikataj organoj tiujn materiajn eretojn, kiuj plenigas la spacon, en kiu vi, homoj, vivas. Ĉu vi ne scias, ke la aero enhavas akvovaporon? Kondensu tiun vaporon kaj vi revenigos ĝin en ĝian naturan staton; forte malvarmigu ĝin, kaj jen tiuj nepalpeblaj kaj nevideblaj gutetoj kunaranĝiĝos en solidan, ja tre solidan korpon; kaj tiel estas kun multaj aliaj substancoj, el kiuj la kemiistoj ellaboras al vi ankoraŭ pli ravantajn miregindaĵojn. Sed la Spirito disponas ilojn pli perfektajn ol viaj: la volon kaj la permeson de Dio.”

*Rimarko.* La demando pri la sateco estas tre grava. Kiel iu substanco, kies ekzistado kaj proprecoj estas momentaj kaj kvazaŭ konvenciaj, povas satigi homon? Tiel, ke per sia kontakto kun la stomako tiu substanco naskas la *sensaĵon*

de sateco, sed ne la satecon mem, rezultantan el la pleneco de la stomako. Se tia substanco povas efiki sur la ekonomio kaj modifi iun malsanecon, ĝi do tute same povas agi sur la stomakon kaj tie fari impreson de sateco. Mi tamen petas sinjorojn apotekistojn kaj mastrojn de restoracioj ne eksenti pro tio ĵaluzon pri siaj interesoj kaj ne pensi, ke la Spiritoj intencas konkurenci kontraŭ ili: ĉi tiuj okazoj estas maloftaj, esceptaj kaj neniam dependas de la homa volo; alie oni sin nutrus kaj sin resanigus plej malkarege.

XIV. Ĉu la objektoj, kiuj per la volo de Spirito fariĝis videblaj, povus esti daŭraj kaj stabilaj, ke ili estus uzeblaj?

"Tio povus esti, **sed tion oni ne faras**: ĝi troviĝas ekster la leĝoj."

XV. Ĉu la Spiritoj havas ĉiuj egalan kapablecon, por fari tuŝebaljn objektojn?

"Estas certe, ke ju pli alte sidanta, des pli facile la Spirito sukcesas en tio, sed ankaŭ tio dependas de iaj cirkonstancoj: tian kapablecon povas posedi ankaŭ malsuperaj Spiritoj."

XVI. Ĉu Spirito ĉiam konscias pri la maniero, kiel li faras, ĉu siajn vestojn, ĉu la objektojn, kies aspekton li prezentas?

"Ne; li kunhelpas por ilia farado ofte per instinkta ago, kiun li mem ne komprenas, se li ne estas sufiĉe klerigita pro tio."

XVII. Se Spirito povas ĉerpi el la universa elemento la materialojn, por fari ĉion ĉi, kaj havigi al tiuj aĵoj kelkatempan realecon kune kun iliaj proprecoj, li tute same povas ĉerpi el tiu elemento ankaŭ tion necesan por skribado, kaj sekve tio laŭŝajne donas al ni la ŝlosilon de la senpera skribado. Ĉu tiel?

"Jen vi fine trafis la celon."

*Rimarko*. Ĉi tien efektive mi volis veni per ĉiuj miaj antaŭaj demandoj. Ĉi tiu respondo pruvas, ke la Spirito legis mian penson.

XVIII. Se la materio, kiun Spirito uzas, estas nedaŭrema, kiel do la strekoj el la senpera skribado ne forviŝiĝas?

“Ne disfendu harojn; mi komence ne diris “neniam”. Tie la afero estis pri grandmasa materia objekto; ĉi tie tio estas strekoj, kiujn estas utile konservi, kaj oni ja ilin konservas. Mi volis diri, ke la objektoj, tiel faritaj de Spirito, ne povas fariĝi objektoj uzeblaj, ĉar en ili ne ekzistas agregatiĝinta materio, kiel en viaj solidaj korpoj.”

**129.** La supre elvolvitan teorion oni povas resumi jene. La Spirito agas sur la materion; el la kosma materio li ĉerpas la elementojn necesajn, por laŭplaĉe fari objektojn kun la aspekto de la diversaj surteraj korpoj. Li povas ankaŭ, per sia volo, spertigi al la elementa materio intiman transformiĝon, kiu havigas al ĝi difinitajn proprecojn. Tia kapablo estas esence propra al la naturo de la Spirito, kiu ĝin ofte agigas en instinkta maniero, kiam necese, tion ne konsciante. La objektoj, faritaj de la Spirito, havas kelkatempan ekzistadon, dependantan de la volo aŭ de la bezono; li povas ilin fari kaj malfari laŭplaĉe. Ĉe iuj okazoj tiuj objektoj povas antaŭ la okuloj de la vivantoj havi la tutan aspekton de realaĵoj, t. e. momente fariĝi videblaj kaj eĉ tuŝeblaj. Okazas farado, sed ne kreado, ĉar Spirito kapablas nenion eltiri el la nenio.

**130.** La ekzisto de unu sola elementa materio estas hodiaŭ preskaŭ ĝenerale akceptita de la scienco kaj, kiel ni vidis, estas konfirmita de la Spiritoj. Ĉiuj korpoj de la Naturo naskiĝas el tiu materio, kiu, per la transformoj, kiujn ĝi ricevas, rezultigas ankaŭ la diversajn proprecojn de tiuj korpoj; saniga substanco povas tial fariĝi venena dank’al simpla modifo: pri ĉi tio la Ĥemio prezentas al ni multenombrajn ekzemplojn. Ĉiu scias, ke du nemalutilaj substancoj, interkombinitaj laŭ difinita proporcio, povas kunmeti alian, kiu estas malsaniga. Unu atomo de oksigeno kaj du atomoj de hidrogeno, elementoj sendanĝeraj, estigas la akvon; per aldono de unu atomo de oksigeno oni ricevas korodan likvaĵon. Sen ŝanĝo de la reciproka proporcio, sufiĉas ofte simpla ŝanĝo de la molekula aranĝo, por ke la proprecoj aliiĝu; ekzemple, opaka korpo povas fariĝi travidebla, kaj inverse.

Ĉar la Spirito, per sia sola volo, faras tian fortan agon sur la elementan materion, tial estas imageble, ke li povas ne nur estigi substancojn, sed ankaŭ ŝanĝi ties proprecojn: por ĉi tio lia volo efikas kvazaŭ ia reakciilo.

**131.** Ĉi tiu teorio donas al ni la solvon de fakto tre konata en la magnetizarto, sed ĝis hodiaŭ ne klarigita, nome la ŝanĝiĝo de la proprecoj de la akvo per la ago de la volo. La aganta Spirito estas tiu de la magnetizanto, plej ofte helpata de fremda Spirito. Li faras la ŝanĝon pere de la magnetiza fluidaĵo, kiu, kiel dirite, estas la substanco plej simila al la kosma materio, aŭ universa elemento. Se li povas iel modifi la proprecojn de la akvo, li do povas ankaŭ agadi simile sur la fluidaĵojn de la homa organismo, el kio sekvas la saniga efiko de la magnetiza agado, konvene direktata.

Oni scias, kian gravegan rolon ludas la volo en ĉiuj fenomenoj de la magnetizarto; sed kiel klarigi la materian agadon de tia subtila aganto? La volo ne estas ia estaĵo, ia substanco, eĉ ne ia propreco de la plej etereca materio, ie ajn ekzistanta; la volo estas la esenca eco de la Spirito, t. e. de la pensokapabla estulo. Per ĉi tiu ilo li agas sur la elementan materion, kaj, per sinsekva agado, li agas sur ties komponaĵojn, kies plej internaj proprecoj tiele povas esti ŝanĝitaj.

La volo estas atributo kiel de la Spirito libera, tiel ankaŭ de la Spirito enkarniĝinta; de tio la povo de la magnetizanto, povo, kiu, kiel sciate, rilatas rekte al la forto de la volo. Povante agi sur la elementan materion, la enkarniĝinta Spirito povas do ankaŭ aliigi ĝiajn proprecojn en certaj limoj; tiel estas klarigata la kapableco por resanigo per la kontakto kaj surmeto de la manoj, kapableco, kiun kelkaj homoj en grado pli aŭ malpli granda posedas. (Vd. en la ĉapitro pri la **Mediumoj** la artikolon rilatan al la **Kuracivaj mediumoj**. Vd. ankaŭ la **Revue Spirite**, de Julio 1859, paĝ. 184 kaj 189: **La zuavo en Magenta**; **Unu oficiro de la armeo de Italujo**.)

———————

ĈAPITRO IX

# PRI LA HANTATAJ LOKOJ

**132.** La spontaneaj manifestiĝoj de Spiritoj, okazintaj en ĉiuj tempoj, kaj la persistado de kelkaj Spiritoj, donadi malkaŝajn signojn de sia ĉeesto en iuj lokoj, estis la fonto de la kredo pri hantataj lokoj. La sekvantaj respondoj estis donitaj pri demandoj en ĉi tiu rilato.

I. Ĉu la Spiritoj alligiĝas nur al homoj aŭ ankaŭ al aĵoj?

"Tio dependas de ilia hierarkia ŝtupo. Iuj Spiritoj povas alkroĉiĝi al surteraj objektoj; ekzemple avaruloj, kiuj kaŝis siajn trezorojn kaj kiuj ankoraŭ ne sufiĉe liberiĝis el la materio, povas plue vigli super ili kaj ĉe ili gardostari."

II. Ĉu la liberaj Spiritoj inklinas prefere al iuj lokoj?

"Ankaŭ al ĉi tio la sama principo estas aplikebla. Tiuj Spiritoj, kiuj jam ne estas alkroĉitaj al la Tero, iras tien, kie ili havas la oportunan okazon elmontri sian amon. Ilin altiras pli bone la homoj, ol la materiaj objektoj; tamen eventuale iuj dum kelka tempo preferas certajn lokojn, sed tio ĉiam estas malsuperaj Spiritoj."

III. Ĉar la alligiĝo de Spiritoj al iu loko estas signo de malsupereco, ĉu tial ĝi estas ankaŭ pruvo, ke ili estas malicaj Spiritoj?

"Certe ne; iu Spirito povas esti nemulte progresinta, tamen ne malica. Ĉu tio sama ne estas inter la homoj?"

IV. Ĉu la kredo, ke la Spiritoj vizitadas prefere la ruinojn, havas ian fundamenton?

"Nenian; la Spiritoj vizitas tiujn lokojn, kiel ĉiajn ajn. Nur la homa imagemo, frapita de la terurveka mieno

de iuj lokoj, atribuas al la ĉeesto de Spiritoj tion, kio plej ofte estas nur tre natura fakto. Kiel ofte la timemo faris el la ombro de arbo fantomon, el la krio de iu besto aŭ el la blovado de la vento spektrojn! La Spiritoj amas la societon de la homoj, kaj tial ili pli volonte vizitas lokojn loĝatajn, ol lokojn senhomajn."

— Tamen, kiom mi scias pri la diverseco de karaktero de la Spiritoj, kelkaj el ili kredeble estas mizantropoj, kiuj preferus la solulecon.

"Pro tio mem mi ne respondis en maniero absoluta ĉi tiun demandon. Mi diris, ke ili povas viziti senhomajn lokojn, kiel ĉiajn ajn, kaj estas evidente, ke, se kelkaj sin tenas for de ĉia societo, tiel estas, ĉar tio plaĉas al ili; sed tio ne estas motivo, ke la ruinoj nepre estus lokoj, kiujn ili preferus: certe ekzistas da Spiritoj multe pli multe en la urboj kaj palacoj, ol en la fundo de la arbaroj."

V. La popolaj kredoj havas, ĝenerale, ian fundon de vereco: kio eble elkovis la kredon pri la hantataj lokoj?

"La fundo de vereco estas la manifestiĝo de la Spiritoj, pri kiu la homo instinkte kredis de nememorebla tempo; sed, kiel mi diris, la mieno de la terurvekaj lokoj frapas lian imagemon kaj nature starigas tie la estulojn, kiujn li rigardas kiel supernaturajn. Tiun superstiĉan kredon, krom tio, nutras la rakontoj de la poetoj kaj la fabeloj, per kiuj oni lulas lian infanaĝon."

VI. Ĉu la Spiritoj, kiuj kutime kolektiĝas, preferas por tio iajn tagojn kaj horojn?

"Ne; la tagoj kaj la horoj estas kontroliloj de la tempo, por la uzado de la homoj kaj por la enkorpa vivo: tiajn la Spiritoj ne bezonas nek prizorgas."

VII. El kio kreiĝis la ideo, ke la Spiritoj venas prefere nokte?

"El la impreso, kiun sur la imagemo faras silento kaj mallumo. Ĉiuj tiuj kredoj estas superstiĉoj, kiujn la racia konado de Spiritismo certe disbatos. Tio sama estas rilate la tagojn kaj la horojn, kiujn oni kredas pli oportunaj por la Spiritoj; kredu ja, ke la influo de noktomezo neniam ekzistis, escepte en la rakontoj."

— Se tiel estas, kial do iuj Spiritoj anoncas sian venon kaj siajn manifestiĝojn por tiu tempo kaj por difinitaj tagoj, ekzemple vendredo?

“Tio estas Spiritoj, kiuj ekspluatas la homan kredemon kaj pri tio sin amuzas. El tiu sama kaŭzo kelkaj diras, ke ili estas la diablo aŭ donas al si mem inferajn nomojn. Komprenigu al ili, ke vi ne estas ilia mokataĵo, kaj ili ne plu faros tion.”

VIII. Ĉu la Spiritoj revenas prefere apud la tombojn, kie kuŝas iliaj korpoj?

“La korpo estis nenio alia ol vesto; tiun envolvaĵon, kiu igis ilin suferi, ili ne rigardas kiel pli ŝatindan, ol kiel malliberulo siajn katenojn. La memoro de iliaj karuloj estas la sola, kio valoras en iliaj okuloj.”

— Ĉu la preĝoj, kiujn oni faras ĉe la tomboj de iliaj korpoj pli plaĉas al ili kaj altiras ilin tien prefere, ol al alia loko?

“La preĝo, vi ja scias, estas elvoko, kiu altiras la Spiritojn. Des pli efika la preĝo estas, ju pli varma kaj sincera; nu, apud respektata tombo oni estas pli profunde enmemiĝinta, kaj la konservado de piaj relikvoj estas atesto pri amo, kiun oni faras al la Spirito kaj kiu lin ĉiam tuŝas. Kio agas sur la Spiriton, tio estas ĉiam la penso, sed ne materiaj objektoj; pli ol la Spiriton, tiuj objektoj influas la preĝanton, fiksante ties atenton.”

IX. Laŭ ĉi tio ŝajnas, ke la kredo pri hantataj lokoj estas ne tute malvera.

“Ni diris, ke iuj Spiritoj povas esti altirataj de materiaj aĵoj; povas ilin altiri ankaŭ iuj lokoj, kie ili laŭŝajne prenas al si loĝejon tiel longe, ĝis ĉesos la cirkonstancoj, kiuj kondukis ilin tien.”

— Kiaj cirkonstancoj povas konduki ilin al tiuj lokoj?

“Ilia simpatio por kelkaj el la vizitantoj de tiuj lokoj aŭ la deziro komunikiĝi kun tiuj homoj. Tamen iliaj intencoj ne ĉiam estas tiel laŭdindaj; se ili estas malicaj Spiritoj, ili eble volas fari venĝon kontraŭ iuj homoj, kontraŭ kiuj ili portas motivon por ia resento. La restado en iu difinita loko povas esti ankaŭ, rilate kelkajn, puno, al ili trudita, precipe tiam, se ili tie krimis, por

ke tiun krimon ili konstante havu antaŭ siaj okuloj [*].

X. Ĉu tiujn lokojn hantas ĉiam iamaj loĝantoj de tiuj ejoj?

"Kelkafoje, sed ne ĉiam, ĉar se la iama loĝanto estas progresinta Spirito, li tiel malmulte da zorgoj faras al si pro sia surtera loĝejo, kiel pro sia korpo. La Spiritoj, hantantaj iujn lokojn, ofte havas por tio nenian alian motivon, ol kapricon, escepte se ilin altiras simpatio por iuj homoj."

— Ĉu ili povas restadi en iu loko por la celo protekti iun homon aŭ ties familion?

"Jes, certe, se nur ili estas bonaj Spiritoj, sed en ĉi tiu okazo ili neniam manifestas sian ĉeeston per malagrablaj rimedoj."

XI. Ĉu ekzistas io reala en la historio pri la Blanka Sinjorino?

"Tio estas rakonto, verkita el multego da faktoj veraj."

XII. Ĉu estas racia la sento de teruro en hantataj lokoj?

"Ne; tiuj Spiritoj, kiuj hantas iujn lokojn kaj tie bruegas, celas prefere amuziĝon pri la homa kredemo kaj malkuraĝeco, ol fari ian malbonon. Cetere memoru, ke Spiritoj sin trovas ĉie kaj ke, kie ajn vi troviĝas, ili senĉese staras apud vi, eĉ en la plej pacaj domoj. Ofte ili hantas iujn loĝejojn nur tial, ke ili trovas okazon elmontri tie sian ĉeeston."

XIII. Ĉu ekzistas ia rimedo, por ilin elpeli el tie?

"Jes, sed tio, kion oni faras por tiu celo, plej ofte ilin altiras, anstataŭ ilin forigi. La plej bona rimedo, forpeli malicajn Spiritojn, estas altiro al si de la bonaj. Altiru do la bonajn Spiritojn, farante kiel eble plej multe da bono, kaj la malicaj foriĝos: bono kaj malbono ne akordas. Estu ĉiam bonaj, kaj nur bonaj Spiritoj staros apud vi."

— Tamen kelkaj tre bonanimaj homoj turmentiĝas en klopodoj kun ĉikanoj de malicaj Spiritoj: kial?

---

[*] Vd. en la *Revue Spirite*, de Februaro 1860: "Historio de damnito". — *Noto de la Aŭtoro*.

“Se tiuj homoj estas efektive bonanimaj, tio eble estas elprovo, por ekzerci ilian paciencon kaj instigi ilin esti ankoraŭ pli bonaj; sed estu certa, ke ne tiuj, kiuj trumpetas pri sia virteco, estas la plej virtaj. Kiu posedas realajn bonajn ecojn, tiu ilin nescias mem aŭ pri ili ne parolas.”

XIV. Kion oni pensu pri la efikeco de ekzorcado, por forpeli la malicajn Spiritojn el la hantataj lokoj?

“Ĉu vi jam ofte vidis la sukceson de ĉi tiu rimedo? Ĉu vi ne vidis, kontraŭe, ke la bruegado fariĝas pli terura post la ekzorcaj ceremonioj? Tiel estas, ĉar tiuj turmentantaj Spiritoj sin amuzas, ke oni prenas ilin por la diablo.

"La Spiritoj, kiuj venas ne en malbona intenco, povas sciigi pri sia ĉeesto ankaŭ per bruoj kaj eĉ fariĝante videblaj, sed ili neniam faras ĝenan tumulton. Tio ofte estas suferantaj Spiritoj, kies aflikton vi povas faciligi, preĝante por ili; aliaj estas eĉ bondezirantaj Spiritoj, kiuj volas montri, ke ili staras apud vi; aliaj estas frivolaj Spiritoj, kiuj nur gaje petolas. Ĉar tiuj, kiuj maltrankviligas la ripozon per bruado, preskaŭ ĉiam estas sin amuzantaj Spiritoj, tial la plej bona, kion oni farus, estas ridi la okazaĵon; ili laciĝas, konstatinte, ke ili sukcesas nek teruri, nek senpaciencigi.” (Vd. antaŭe la Ĉap. V: **Pri la spontaneaj fizikaj manifestiĝoj**.)

El la supre donitaj klarigoj sekvas, ke iuj Spiritoj alligiĝas al certaj lokoj, en kiuj ili prefere restadas, sed ili tamen ne bezonas sciigi pri sia ĉeesto per senseblaj efikoj. Ia ajn loko povas esti la trudita aŭ preferata restadejo de iu Spirito, eĉ malica, kaj tamen tie nenia manifestiĝo iam okazis.

Neniu el la Spiritoj, kiuj alteniĝas al lokoj aŭ al la materiaj aĵoj, estas el la Superaj Spiritoj; tamen, ne estante superaj, eble ili ne estas malicaj kaj neniel portas malbonan intencon; kelkaj estas eĉ kunvivantoj pli utilaj ol malutilaj, ĉar se ili interesiĝas pri la tieaj personoj, ili do povas tiujn protekti.

———————

ĈAPITRO X

# PRI LA KARAKTERO DE LA KOMUNIKAĴOJ

*Maldelikataj, frivolaj, seriozaj, instruaj komunikaĵoj*

**133.** Mi diris, ke ĉia efiko, elmontranta en sia kaŭzo ian agon de libera volo, kiel ajn sensignifa estas tiu ago, atestas pro tio mem ian inteligentan kaŭzon. Ekzemple, simpla movo de tablo, kiu respondas al nia penso aŭ prezentas intencan karakteron, povas esti konsiderata kiel inteligenta manifestiĝo. Se la rezultato devus limiĝi je tio, ĝi havus por ni nur flankan intereson: tamen ĝi estus jam io, kio pruvus al ni, ke en tiuj fenomenoj ekzistas io alia, ol pure materia ago, sed la el tio veninta praktika utilo estus por ni nula aŭ almenaŭ tre limita. Tute alia estas la okazo, se tiu inteligento ricevas tian amplekson, kiu ebligas regulan kaj kontinuan interŝanĝon de pensoj: tiam tio estas jam ne nuraj inteligentaj manifestiĝoj, sed efektivaj **komunikaĵoj**. La rimedoj, kiujn ni hodiaŭ disponas, ebligas ricevi komunikaĵojn tiel longajn, tiel klarajn kaj tiel rapidajn, kiel tiuj inter la homoj.

Kiu, laŭ la **spirita hierarkio** ("La Libro de la Spiritoj", § 100), bone scias pri la senlima diverseco de la Spiritoj en la duobla rilato al inteligenteco kaj moraleco, tiu facile imagas al si, ke devas ekzisti diferenco en iliaj komunikaĵoj; ke ĉi tiuj devas travidigi la noblecon aŭ la malnoblecon de iliaj pensoj, ilian klerecon aŭ senklerecon, iliajn virtojn aŭ malvirtojn; ke, unuvorte iliaj konmunikaĵoj ja ne estus pli similaj inter si, ol la lingvoj de la homoj, ekde la sovaĝulo ĝis la plej klera eŭropano. La nuancoj de tiuj komunikaĵoj povas

grupiĝi en kvar ĉefajn kategoriojn; laŭ siaj plej reliefaj trajtoj, ili estas: **maldelikataj**, **frivolaj**, **seriozaj**, **instruaj**.

**134.** La **maldelikataj komunikaĵoj** estas tiuj, formulitaj per esprimoj, kiuj vundas la decregulojn. Ili povas veni nur de feĉklasaj Spiritoj, ankoraŭ makulitaj de ĉiuj malpuraĵoj de la materio, kaj neniom diferencas de tiuj, kiujn donus malvirtaj kaj vulgaraj homoj. Ili naŭzas ĉiun homon, kiu havas, eĉ la plej malmulte, delikatecon de sentoj, ĉar, laŭ la karaktero de la Spirito, ili estas trivialaj, malĉastaĉaj, obscenaj, insolentaj, arogantaj, malicaj kaj eĉ malpiaj.

**135.** La **frivolaj komunikaĵoj** venas de ventanimaj, de mokemaj aŭ de petolemaj Spiritoj, pli malicetaj, sed ne ja malicaj, neniel zorgantaj pri tio, kion ili diras. Entenante nenion maldecan, iliaj komunikaĵoj plaĉas al iuj homoj, kiuj sin amuzas ĉe ili kaj kiuj plezuras ĉe tiaj bagatelaj konversacioj, en kiuj oni multe parolas, dirante nenion. Tiuj Spiritoj kelkafoje elpaŝas kun spritaj kaj mordaj atikaĵoj, kaj inter banalaj ŝercoj ili ofte parolas krudajn veraĵojn, kiuj preskaŭ ĉiam trafas ilian celon. Tiuj frivolaj Spiritoj svarmas apud ni. Ili uzas ĉiajn okazojn, por enŝoviĝi en la komunikaĵoj; la vero, jen kio ilin la plej malmulte zorgigas, kaj tial ili malicete plezuras, mistifikante tiujn homojn, kiuj estas sufiĉe cedemaj kaj iafoje sufiĉe pretendemaj por ilin fidplene kredi. La homoj, kiuj plezuras ĉe tiaj komunikaĵoj, nature allasas al si frivolajn kaj trompemajn Spiritojn. La serozaj Spiritoj sin tenas for de ili same, kiel ĉe ni la seriozaj homoj staras malproksime de la societo de ventkapuloj.

**136.** La **seriozaj komunikaĵoj** estas solidaj, kiel laŭ la temo, tiel ankaŭ pri la formo. Ĉia komunikaĵo, en kiu forestas frivoleco kaj maldelikateco, kaj kiu havas utilan celon, eĉ se kun privata intereso, estas, pro tio mem, serioza; tamen, eĉ pro tio, ĝi ne ĉiam estas libera de eraroj. La seriozaj Spiritoj ne estas egale kleraj; ekzistas multaj aferoj, kiujn ili ne scias kaj pri kiuj ili povas bonafide erari; tial la vere Superaj Spiritoj sen-

ĉese rekomendas al ni submeti ĉiajn komunikaĵojn al la kontrolado de la prudento kaj de la plej severa logiko.

Estas do necese distingi inter la **seriozaj-veraj** kaj la **seriozaj-malveraj** komunikaĵoj, kio ne ĉiam estas facila, ĉar sub la masko mem de la seriozeco de la parolo iuj vantamaj aŭ pseŭdo-kleraj Spiritoj penas trudi la plej malverajn ideojn kaj la plej absurdajn sistemojn; kaj por doni al si pli da fidindeco kaj da graveco, ili ne sentas skrupulon paradi per la plej respektindaj kaj eĉ plej respektegataj nomoj. Ĉi tio estas unu el la plej grandaj rifoj de la praktika scienco; mi en oportuna tempo revenos al ĉi tiu temo, donante al ĝi la tutan elvolviĝon, kiun postulas tiel grava afero, kaj samtempe mi konigos la rimedojn, per kiuj oni sin antaŭgardu kontraŭ la danĝereco de la malveraj komunikaĵoj.

**137.** La **instruaj komunikaĵoj** estas tiuj seriozaj komunikaĵoj, havantaj kiel ĉefan celon ian instruon, donitan de la Spiritoj pri la natursciencoj, la moralo, la filozofio k. a. Ili estas pli aŭ malpli profundaj, laŭ la hierarkia rango kaj la grado da **liberiĝo el la materio** de la Spirito. Por ke el tiuj komunikaĵoj oni kolektu realajn fruktojn, ili devas esti regulaj kaj persiste kontinuaj. La seriozaj Spiritoj alligiĝas al tiuj homoj, kiuj volas kleriĝi, kaj al tiuj ili helpas, kaj lasas al la frivolaj Spiritoj la taskon amuzi tiujn homojn, kiuj en tiuj manifestiĝoj vidas nur kelkatempan distrilon. Nur laŭ la reguleco kaj ofteco de tiuj komunikaĵoj oni povas taksi la moralan kaj intelektan valoron de la Spiritoj, kun kiuj oni rilatas, kaj la tiomon da fidindeco, kiun ili meritas. Se sperto estas necesa, por juĝi la homojn, kredeble ankoraŭ pli multe da ĝi estas necesa, por juĝi la Spiritojn.

Kvalitigante tiujn komunikaĵojn kiel **instruajn**, ni supozas, ke ili estas **veraj**, ĉar io **ne vera** ne povus esti **instrua**, eĉ se dirata per la plej imponaj paroloj. Al ĉi tiu kategorio ni do ne povus alkalkuli iajn instruojn, kiuj da serioza ofte havas nenion krom ŝvelaĉa kaj emfaza formo, per kiu la Spiritoj, pli tro memfidaj ol kleraj, kiuj ilin diktas, esperas mistifiki la homojn; sed, ne

povante havigi al siaj komunikaĵoj la mankantan fundon, tiuj Spiritoj ne povus longe ludadi sian rolon: ili baldaŭ elperfidas sian malfortan flankon, se eĉ plej multe da interligo havas iliaj komunikaĵoj, aŭ se oni scios ilin repuŝi ĝis iliaj lastaj redutoj.

**138.** La komunikrimedoj estas tre diversaj. Agante sur niajn organojn kaj sur ĉiujn niajn sentumojn, la Spiritoj povas manifestiĝi al la okuloj kiel aperaĵoj, al la palpado per tuŝeblaj impresoj, ĉu kaŝitaj, ĉu videblaj, al la orelo per bruoj, al la flarado per odoroj sen ia konata kaŭzo. Ĉi tiu lasta maniero de manifestiĝo, kvankam ja reala, estas nekontesteble la malplej certa pro la multenombraj kaŭzoj, kiuj povas konduki en eraron; tial mi kun ĝi ne perdos tempon. Kion ni devas zorge ekzameni, tio estas la diversaj rimedoj, por ricevi komunikaĵojn, t. e. regulan kaj kontinuan interŝanĝon de pensoj. Tiuj rimedoj estas: **frapoj**, **parolo** kaj **skribado**. Mi ilin elvolvos en specialaj ĉapitroj.

———————

ĈAPITRO XI

# PRI LA SEMATOLOGIO KAJ LA TIPTOLOGIO

*Lingvo de la signoj kaj de la frapoj. Alfabeta tiptologio*

**139.** La unuaj inteligentaj manifestiĝoj okazis per frapoj, t. e. per la "tiptologio". Ĉi tiu primitiva rimedo, kiu suferis de la infanaĝo de la arto, donadis nur tre limitan helpon; ĉe la komunikaĵoj la respondoj estis simplaj unusilabaj vortoj, nome "jes" aŭ "ne", laŭ konvencia nombro da frapoj. Oni poste plibonigis ĝin, kiel mi diris.

La frapoj fariĝas en du manieroj, per specialaj mediumoj; por ĉi tiu plenumado estas ordinare necesa certa kapableco por fizikaj manifestiĝoj. La unua maniero, kiu povus esti nomata **baskula tiptologio**, konsistas en la moviĝo de la tablo, kiu leviĝas ĉe unu flanko kaj poste falas returne, frapante la plankon per unu piedo. Sufiĉas pro tio, ke la mediumo metu la manojn sur la randon de la tablo; se li deziras konversacii kun iu difinita Spirito, estas necese elvoki ĉi tiun; se ne, manifestiĝas tiu, kiu venis la unua, aŭ kiu kutimas aperi. Per la interkonsento, ke ekzemple unu frapo signifas **jes** kaj du frapoj **ne**, aŭ inverse, tute egale, oni direktas al la Spirito la deziratajn demandojn; ni vidos poste, de kiaj demandoj estas saĝe sin deteni. La malbonaĵo kuŝas en la mallongeco de la respondoj kaj en la malfacileco formuli tian demandon, kiu kuntrenos "jes" aŭ "ne". Ekzemple, se oni demandus la Spiriton: "Kion vi deziras?", li povus respondi nur per frazo; oni devas do demandi: "Ĉu vi deziras tian aferon?" "Ne." "Ĉu tian alian?" "Jes." Kaj tiel plu.

**140.** Estas rimarkinde, ke ĉe la praktikado de ĉi tiu rimedo la Spirito aldonas al la frapoj ian **mimikon**, t. e. li esprimas la energion de la jesado aŭ de la neado per la forteco de la frapoj. Li esprimas ankaŭ la karakteron de la sentoj, kiuj lin instigas: malmoderecon per la krudeco de la movoj; koleron kaj senpaciencon, per ripetata forta frapado, kiel homo, ekscitite frapanta per la piedo, kaj iafoje li ĵetas teren la tablon. Se li estas bonanima kaj ĝentila, li ĉe la komenco kaj ĉe la fino de la seanco klinas la tablon, kvazaŭ salutante la ĉeestantojn. Se li volas sin turni aparte al iu el tiu rondo, li direktas al tiu la tablon dolĉe aŭ malmilde, laŭ tio, ĉu li deziras elmontri al tiu korinklinon aŭ antipation. Tio estas, ĝustadire, la **sematologio**, aŭ signolingvo, kiel la **tiptologio** estas la fraplingvo. Jen rimarkinda ekzemplo de la spontanea praktikado de la sematologio.

Unu tagon, en sia salono, kie pluraj homoj sin okupis pri manifestiĝoj de Spiritoj, iu mia konato ricevis de mi leteron. Dum li ĝin legis, la tableto, uzata en la eksperimentoj, subite kuris apud lin. Fininte la legadon de la letero, li iris al la alia fino de la salono, por meti la leteron sur tablon, tie starantan; la tableto sekvis lin kaj direktiĝis al la tablo, kie nun kuŝis la letero. Miregante tiun koincidon, li ekpensis, ke ekzistas ia rilato inter tiu movado kaj la letero; li demandis la Spiriton kaj ĉi tiu respondis, ke li estas unu el miaj familiaraj Spiritoj. Informite de la sinjoro pri tiu okazaĵo, mi miavice petis tiun Spiriton eldiri la motivon de la vizito, kiun li faris al la sinjoro; li respondis: "Estas nature ke mi vizitas viajn konatojn, por ke, ĉe okazo, mi povu doni al vi, kiel ankaŭ al ili, la necesajn avizojn".

Estas do evidente, ke la Spirito volis turni sur sin la atenton de tiu sinjoro kaj serĉis al si oportunan okazon, por sciigi al tiu, ke li tie estas. Mutulo ne pli bone estus al si helpinta.

**141.** Ne longe daŭris, kaj la tiptologio perfektiĝis kaj pliriĉiĝis per pli efika komunikrimedo, nome la **alfabeta tiptologio**, kiu konsistas en tio, ke oni signigas la literojn de la alfateto per frapoj; oni tiam povis ricevi vortojn, frazojn, eĉ tutajn paroladojn. Laŭ tiu metodo

la tablo frapas tiom da fojoj, kiom necese por ĉiu litero, t. e. unu frapo signifas **a**, du signifas **b**, k. t. p.: dum tio iu skribas la literojn, laŭgrade kiel ili estas signataj. La Spirito sentigas, ke li finis sian laboron, uzante ian interkonsentitan signalon.

Kiel oni vidas, ĉi tiu procedo estas tre malrapida kaj postulas tro multe da tempo por iom longaj komunikaĵoj; tamen kelkaj homoj estis sufiĉe paciencaj kaj uzis ĝin, ricevante plurpaĝajn diktatojn; sed la praktiko kondukis al la elpenso de mallongigaj rimedoj, kiuj ebligis pli grandan rapidecon. Tiu plej uzata konsistas en tio, ke oni tenas antaŭ si tutan alfabeton kaj la serion de la ciferoj. Dum la mediumo sidas ĉe la tablo, alia homo sinsekve montras al la literoj, se temas pri iu vorto, aŭ al la ciferoj, se pri iu nombro. Kiam oni venas al la koncerna litero, la tablo frapas mem kaj oni skribas tiun literon; poste oni rekomencas la procedon por la dua, la tria k. t. p. Se oni eraris pri iu litero, la Spirito avertas per pluraj frapoj aŭ per movo de la tablo, kaj oni rekomencas. Per la praktikado oni atingas grandan rapidecon; sed oni ŝparas multe da tempo, precipe konjektante la finon de iu komencita vorto, kiun konigas la senco de la frazo; se oni estas en dubo, oni demandas la Spiriton, ĉu ja tian vorton li volis dikti, kaj li respondas "jes" aŭ "ne".

**142.** Ĉiujn efikojn, kiujn mi ĵus pritraktis, oni povas ricevi en ankoraŭ pli simpla maniero, nome per frapoj, kiuj aŭdiĝas en la ligno mem de la tablo, sen ia movado, procedo, kiun mi jam priskribis en la ĉapitro pri la fizikaj manifestiĝoj, § 64: tio estas la **interna tiptologio**. Ne ĉiuj mediumoj taŭgas por ĉi tiu maniero de komunikado; kelkaj ricevas la frapojn nur per la baskulado; tamen per ekzerciĝado la plimulto el ili fine sukcesos. Ĉi tiu maniero havas la duoblan plibonecon, ke ĝi estas pli rapida kaj malpli facile allasas suspekton, ol la baskulado, kiun oni povas atribui al vola premo. Estas vero, ke ankaŭ la internaj frapoj povas esti imitataj per trompemaj mediumoj. La plej bonaj aferoj povas esti falsataj, kio tamen neniel atestas kontraŭ ili.

(Vd. en la fino de ĉi tiu verko la ĉapitron titolitan: **Trompoj kaj artifikoj — Ĉarlatanismo kaj ĵonglado**.)

Kiaj ajn la plibonigoj, kiujn oni sukcesi fari en ĉi tiu procedo, ĝi neniel povas atingi la rapidecon kaj facilecon de la skribado, kaj tial hodiaŭ oni ĝin tre malmulte uzas; ĝi tamen estas kelkafoje tre interesa rilate la fenomenon mem, precipe por la novuloj, kaj antaŭ ĉio havas la meriton nerefuteble pruvi la absolutan sendependecon de la pensado de la mediumo. En ĉi tiu maniero oni ofte ricevas tiel neatenditajn, tiel ĝustatempe trafajn respondojn, ke estus necesa klare difinita antaŭjuĝo, por ke oni ne cedu antaŭ la evidenteco; cetere, kvankam ĝi estas por multaj forta motivo por konvinkiĝo, tamen per ĉi tiu rimedo, kiel per la ceteraj, la Spiritoj ne volontas servi al la kapricoj de sciemuloj, kiuj volas ilin elprovi per malkonvenaj demandoj.

**143.** Por pli bone garantii la sendependecon de la penso de la mediumo, oni elpensis diversajn instrumentojn similajn al ciferplatoj, sed sur kiuj oni skribas la literojn, laŭ la maniero de la elektraj telegrafoj. Movebla nadlo, kiun la influo de la mediumo movas per drato kaj rulbloko, montras sur la literojn. Tiajn instrumentojn mi konas nur per la desegnaĵoj kaj priskriboj, publikigitaj en Ameriko, tial mi povas doni pri ilia indo nenian opinion; tamen mi pensas, ke ilia komplikiteco mem estas maloportunaĵo; ke la sendependecon de la mediumo tute bone atestas la internaj frapoj, kaj ke ankoraŭ pli bone, ol ĉiaj materiaj rimedoj, konfirmas ĝin la neantaŭvidita flanko de la respondoj. Krom tio, la nekredemuloj, ĉiam inklinaj vidi ĉie artifikojn kaj aranĝojn, ankoraŭ pli volontas supozi ties ekziston en ia speciala mekanismo, ol en la unue renkontita tablo sen ia akcesoraĵo.

**144.** Aparato pli simpla, sed kiun la trompistoj povas misuzi, kiel ni vidos en la ĉapitro pri la trompoj, estas tiu, kiun mi nomas **Girardin'a tablo**, memore de la uzado, kiun el ĝi faris la edzino de S-ro Emilo Girardin ĉe la multenombraj komunikaĵoj, kiujn ŝi ricevadis kiel mediumino; ĉar S-ino Girardin, kvankam sprita virino,

havis la malfortan flankon kredi la Spiritojn kaj iliajn manifestiĝojn. Tiu aparato konsistas el movebla plataĵo de tableto, de tridek ĝis kvardek centimetroj en la diametro, libere kaj facile turniĝanta ĉirkaŭ sia akso simile al ruleto. Sur ĝia supraĵo, ĉe la cirkonferenco, estas strekitaj, kiel sur ciferplato, la literoj, la ciferoj kaj la vortoj **jes** kaj **ne**. En la centro troviĝas fiksa nadlo. La mediumo apogas siajn fingrojn sur la rando de la tableto, kaj tiam la plataĵo turniĝas kaj haltas, kiam la dezirita litero troviĝas sub la nadlo. Oni notas la montritajn literojn kaj tiel oni tre rapide kunmetas vortojn kaj frazojn.

Estas rimarkinde, ke la plataĵo ne glitas sub la fingroj de la mediumo; tenante sin apogitaj sur ĝi, la fingroj sekvas ĝian movadon. Eble al iu potenca mediumo povus prosperi sendependa movado; mi kredas ĝin ebla, sed mi ĝin neniam ĉeestis. Se la eksperimento povus esti farata en ĉi tiu maniero, ĝi estus multege pli konkludiga, ĉar ĝi forigus ĉiun eblon de artifiko.

**145.** Restas al mi nuligi tre disvastiĝintan eraron, nome tion, intermiksi ĉiujn Spiritojn, kiuj komunikiĝas per frapoj, kun la frapantaj Spiritoj. La tiptologio estas komunikrimedo, kiel ĉia alia, kaj ne malpli inda je la Superaj Spiritoj, ol la skribado aŭ la parolo. Ĉiuj Spiritoj, ĉu bonaj, ĉu malbonaj, povas do uzi ĝin tute same, kiel la ceterajn manierojn. Kio karakterizas la Superajn Spiritojn, tio estas la nobleco de la penso, sed ne la ilo, kiun ili uzas, por ĝin konigi. Sendube ili preferas la plej oportunajn rimedojn kaj precipe tiujn plej rapidajn; sed manke de krajono kaj papero ili ne sentas skrupulon uzi la ordinaran parolantan tablon, kaj tion pruvas la ricevo, per ĝi, de la plej superbelaj diktaĵoj. Ĉi tiun procedon mi do ne uzas mem ne tial, ĉar mi konsiderus ĝin malŝatinda, sed ja nur tial, ke, kiel fenomeno, ĝi jam instruis min pri ĉio, kion mi povus scii, ke do ĝi povus nenion aldoni al miaj konvinkoj kaj ke la longeco de la komunikaĵoj, kiujn ni ricevas, postulas rapidecon, kiun la tiptologio ne povas kontentigi.

Ne ĉiuj Spiritoj, kiuj manifestiĝas per frapoj, estas

do ĝustadiraj "frapantaj" Spiritoj; ĉi tiu kvalitigo devas esti rezervata por tiuj, kiujn oni povas nomi "profesiaj frapantoj", kaj kiuj, en ĉi tiu maniero, plezuras ĉe petolaĵoj, por amuzi aŭ per sia tedado inciti iujn personojn. De ili oni povas atendi kelkafoje spritajn diraĵojn, sed neniam profundajn parolojn; estus do perdo de tempo direkti al ili demandojn kun iagrada graveco naturscienca aŭ filozofia. Pro sia senklereco kaj malsupereco ili tute prave ricevis de aliaj Spiritoj la alnomon histrionoj aŭ foiraj ĵonglistoj de la mondo de la Spiritoj. Mi aldiru, ke ili ofte ne nur agadas, dependante de neniu, sed ankaŭ estas iloj, kiujn uzas la Superaj Spiritoj, kiam ĉi tiuj volas okazigi materiajn efikojn.

———————

ĈAPITRO XII

# PRI LA PNEŬMATOGRAFIO AŬ SENPERA SKRIBADO. PRI LA PNEŬMATOFONIO

## Senpera skribado

**146.** La **pneŭmatografio** estas la skribado farata rekte de Spirito sen ia peranto; ĝi diferencas de la **psikografio** per tio, ke ĉi tiu lasta estas la transiĝo de la penso de Spirito ankaŭ per skribado, sed kun la helpo de la mano de mediumo.

La senpera skribado estas neneigeble unu el la plej eksterordinaraj fenomenoj en Spiritismo; sed, kiel ajn anomalia ĝi ŝajnas ĉe la unua ekrigardo, ĝi hodiaŭ estas fakto konstatita kaj nekontestebla. Se ia teorio estas necesa, por ke oni komprenigu al si la eblecon de la spiritismaj fenomenoj estute, des pli ĝi estas necesa en ĉi tiu okazo, unu el la plej strangaj iam ajn aperintaj, sed ne plu ŝajnanta supernatura, se nur oni komprenas ĝian principon.

Ĉe la unua fariĝo de ĉi tiu fenomeno la superstaranta impreso estis dubo; en la kapon de ĝiaj ĉeestantoj venis tuj la ideo de ia artifiko; efektive, ĉiu konas la proprecon de la tiel nomataj "sekretaj" inkoj, kies strekoj, komence tute nevideblaj, ekaperas sub la efiko de taŭgaj agantoj. Oni eble uzadis tiun procedon, por ekspluati la homan kredemon, kaj mi ne asertas, ke oni ĝin neniam uzis; mi eĉ estas konvinkita, ke iuj homoj, ĉu por mono, ĉu nur pro memestimo kaj por kredigi pri sia kapableco, uzadis artifikojn. (Vd. la ĉapitron pri trompoj.)

Sed el tio, ke oni povas imiti ion, estus absurdo kon-

kludi, ke tio ne ekzistas. Ĉu en la lasta tempo oni ne elpensis rimedon por imiti la somnambulan klarvidecon en tia grado, ke ĝi kaŭzis iluzion? Kaj el tio, ke tiaj ĵonglaĵoj montriĝis en ĉiuj foiroj, oni devus konkludi, ke ne ekzistas veraj somnambuloj? Ĉar iuj komercistoj vendas falsitajn vinojn, ĉu tial ne ekzistas vino pura? Tio sama estas kun la senpera skribado; la antaŭzorgoj por la certiĝo pri la realeco de la fakto estis cetere tre simplaj kaj tre facilaj, kaj dank'al tiuj antaŭzorgoj ĝi hodiaŭ ne estas objekto de eĉ la plej malgranda dubo.

**147.** Ĉar la eblo skribi sen ia peranto estas unu el la atributoj de la Spirito; ĉar Spiritoj ekzistas de ĉiam kaj ankaŭ de ĉiam okazigadas la diversajn fenomenojn al ni konatajn, ili do kredeble ankaŭ faris la senperan skribadon kiel en la antikveco, tiel en la nuneco; kaj tial oni povas klarigi la aperon de la tri vortoj en la banked-salono de Belŝacar. La Mezepoko, tiel riĉa per mireg-indaĵoj kaŝitaj, sed sufokataj per la fajro de la ŝtiparoj, ankaŭ certe konis la senperan skribadon, kaj eble en la teorio pri la modifoj, kiujn la Spiritoj povas ricevigi al la materio, teorio, kiun mi pritraktis en la Ĉapitro VIII, sin trovas la principo de la kredo pri la transmu-tacio de la metaloj.

Kiaj ajn la rezultatoj, atingitaj en diversaj tempoj, nur de post la vulgarigo de la manifestiĝoj de la Spiritoj oni serioze rigardis la demandon pri la senpera skribado. Laŭŝajne la unua homo, kiu ĝin konigis en la lastaj jar-oj en Parizo, estis sinjoro barono de Guldenstubbe, kiu pri ĉi tiu temo publikigis tre interesan verkon, kiu en-havas grandan nombron da faksimiloj de la skribaĵoj, kiujn li ricevis (*). Ĉi tiu fenomeno jam de kelka tempo estis konata en Ameriko. La socia pozicio de S-ro de Guldenstubbe, lia sendependeco, la estimo, kiun li ĝuas en la plej alta mondumo nekontesteble forigas ĉiun sus-pekton pri memvola trompo, ĉar nenia intereso povas

(*) *La realeco de la Spiritoj kaj de iliaj manifestiĝoj*, pruvita per la senpera skribado. De Barono de Guldenstubbe. 1 oktava volumo, kun 15 gravuraĵoj kaj 93 faksimiloj. — *Noto de la Aŭtoro*.

instigi lin al tio. Plej volonte konsentite, oni povus kredi, ke li mem estis trompita de ia iluzio, sed tion formale rebatas unu fakto, nome, ke aliaj homoj atingis tiun saman fenomenon, armante sin per ĉiaj zorgoj necesaj, por antaŭforigi ĉiun artifikon kaj ĉiun kaŭzon de eraro.

**148.** La senperan skribadon oni ricevas, kiel ĝenerale la plimulton el la **ne spontaneaj** manifestiĝoj de Spiritoj, per enmemiĝo, per preĝado kaj per elvoko. Ili ofte okazis en preĝejoj, sur tomboj, ĉe la piedo de statuoj aŭ de la figuroj de personoj elvokitaj. Sed estas evidente, ke la loko mem havas nenian influon, krom naski pli grandan enmemiĝon kaj pli profundan koncentriĝon de la pensado, ĉar estas konstatite, ke tiu fenomeno okazas sen tiaj akcesoraĵoj kaj en la plej ordinaraj lokoj, sur simpla meblo, se oni troviĝas en la postulataj moralaj kondiĉoj kaj oni posedas la necesan mediumecon.

En la unua tempo oni pensis, ke oni tien devas meti krajonon kune kun la papero; tiel la fakto povus esti iel klarigita. Oni scias, ke la Spiritoj movas kaj delokas objektojn, ilin kelkafoje ekprenas kaj ĵetas tra la aero; ili do ankaŭ povus ja ekpreni la krajonon kaj uzi ĝin, por streki literojn; ĉar ili movas ĝin per la mano de mediumo, per tabuleto k. a., ili povus tute same tion fari senpere. Sed oni baldaŭ konstatis, ke krajono estas ne bezona kaj sufiĉas nura peco da papero, faldita aŭ ne: post kelke da minutoj oni tie trovas literojn. Nun la fenomeno ricevas tute alian aspekton kaj kondukas nin en tute novan klason da aferoj. Tiuj literoj estas strekitaj per ia substanco; nu, ĉar neniu havigis tiun substancon al la Spirito, li do mem ĝin faris, ĝin kunmetis: kie li ĝin ĉerpis? Jen la problemo.

Kiu bonvolos turni sin al la klarigoj, donitaj en la Ĉapitro VIII, §§ 127 kaj 128, tiu trovos tie la kompletan teorion de ĉi tiu fenomeno. Por tia skribado la Spirito uzas nek niajn substancojn, nek niajn ilojn: li faras mem la materion kaj la ilojn, kiujn li bezonas, prenante siajn materialojn el la universa primitiva elemento, kiun li per sia volo tiele modifas por la celata efiko. Li do povas ankaŭ fari ruĝan krajonon, presan inkon aŭ ordinaran

inkon tute same, kiel nigran krajonon, eĉ tipografiajn literojn sufiĉe solidajn, por reliefigi premsignojn, kiel pri tio mi vidis ekzemplojn. La filino de unu sinjoro el miaj konatoj, knabino kun la aĝo de 12 ĝis 13 jaroj, ricevis tutajn paĝojn, skribitajn per ia substanco simila al paŝtelo.

**149.** Ĉi tio estas la rezultato, al kiu kondukis nin tiu fenomeno pri la flartabakujo, kiun mi raportis en la Ĉapitro VII, § 116, kaj kiun mi longe pritraktis, ĉar ni tie havis la okazon profunde esplori unu el la plej gravaj leĝoj de Spiritismo, leĝon, kies konado povas klarigi pli ol unu misteron eĉ de la videbla mondo. Jen kiel el iu fakto, laŭŝajne ordinara, povas elŝpruci lumo; la tuta demando konsistas en zorga observado, kaj ĉi tion ĉiu povas mem fari, kiel mi, se nur oni ne kontentigas sin vidi la efikojn, ne elserĉante iliajn kaŭzojn. Se mia fido kun ĉiu tago plifortikiĝas, tiel estas tial, ke mi komprenas: igu do kompreni, se vi volas gajni seriozajn prozelitojn. La kompreno de la kaŭzoj havas ankoraŭ unu rezulton, nome streki dividlinion inter vero kaj superstiĉo.

Rigardante la senperan skribadon laŭ la profitoj, kiujn ĝi povas havigi, mi diras, ke ĝis hodiaŭ ĝia plej ĉefa utileco estis la materia konstato de grava fakto: la partopreno de ia kaŝita potenco, kiu per ĝi trovas novan rimedon por manifestiĝi. Tamen tiaj komunikaĵoj malofte estas longaj: ili ordinare estas spontaneaj kaj limiĝas je vortoj, sentencoj, ofte je nekompreneblaj signoj. Oni ilin ricevis en ĉiuj lingvoj: greka, latina, siria, per hieroglifaj figuroj k. a., sed ili ankoraŭ ne taŭgis por kontinuaj kaj rapidaj disertacioj, kiujn ebligas la psikografio, t. e. skribado per mediumoj.

## Pneŭmatofonio

**150.** Povante okazigi bruojn kaj frapojn, la Spiritoj povas ankaŭ aŭdigi ĉiaspecajn kriojn, voĉajn sonojn, kiuj imitas la homan voĉon, ĉu apud ni, ĉu en la vastaĵo de la aero; ĉi tiun fenomenon oni nomas **pneŭmatofonio**. Laŭ tio, kion ni konas pri la naturo de la Spiritoj, ni povas

supozi, ke iuj el ili, se el malsupera klaso, faras al si iluzion, kredante, ke ili parolas same, kiel iam sur la Tero. (Vd. en **Revue Spirite**, Februaro 1858: **Historio de la fantomo de F-ino Clairon**.)

Oni tamen devus sin gardi preni kiel kaŝitajn voĉojn ĉiajn sonojn sen ia konata kaŭzo, aŭ nurajn tintadojn en la oreloj, kaj precipe doni ian valoron al la popola kredo, ke tintanta orelo avertas nin, ke oni tiam ie parolas pri ni. Tiuj tintadoj, kies kaŭzo estas pure fiziologia, havas ja nenian signifon, dum la pneŭmatofoniaj sonoj esprimas pensojn, kaj nur pro tio oni povas konstati, ke ili havas ne okazan, sed inteligentan kaŭzon. Oni povas starigi kiel principon, ke la **evidente inteligentaj** efikoj estas la solaj, kiuj povas atesti la partoprenon de Spiritoj; koncerne la ceterajn, ekzistas minimume cent ŝancoj kontraŭ unu, ke ili havas akcidentan kaŭzon.

**151.** Tre ofte okazas, ke en duondormo oni klare aŭdas vortojn, nomojn, eĉ kelkafoje tutajn frazojn, tiel nete, ke oni vekiĝas forte emociita. Kvankam en iuj okazoj tio povas efektive esti ia manifestiĝo, tamen ĉi tiu fenomeno havas nenion sufiĉe pozitivan, por ke oni povu alkalkuli ankaŭ ĝin al kaŭzo analoga al tiu, kiun ni vaste pritraktis en la teorio de la halucino, Ĉap. VI, §§ 111 k. sekv. Kion oni tiel aŭdas, tio cetere havas nenian sekvon. Tute alia estas la okazo, se oni tute ne dormas, ĉar tiam, se tio estas iu Spirito, kiu parolas, oni preskaŭ ĉiam povas kun li interŝanĝi ideojn kaj tenadi regulan konversacion.

La spiritismaj, aŭ pneŭmatofoniaj, sonoj okazas en du klare diferencaj manieroj: kelkafoje tio estas ia voĉo interna, kiu resonas en nia konscienco; sed, kvankam klaraj kaj netaj, la paroloj tamen havas nenion materialan; aliajn fojojn ili venas el ekstere kaj estas tiel distingiĝe artikitaj, kiel se ilin eldirus iu apud ni.

Kiel ajn ĝi fariĝas, la pneŭmatofonia fenomeno estas preskaŭ ĉiam spontanea kaj nur tre malofte povas esti okazigita.

———————

ĈAPITRO XIII

# PRI LA PSIKOGRAFIO

*Nerekta psikografio: korboj kaj tabuletoj. Rekta aŭ mana psikografio*

**152.** La spiritisma scienco progresis, kiel ĉiuj ceteraj, kaj pli rapide ol ili, ĉar ja nur kelke da jaroj forpasis de tiu tempo, kiam estis uzataj tiuj primitivaj kaj nesufiĉaj rimedoj, vulgare nomataj "parolantaj tabloj", kaj jam nun oni povas komunikiĝi kun la Spiritoj tiel facile kaj rapide, kiel la homoj inter si, kaj per samaj rimedoj: skribado kaj parolo. La skribado havas precipe la plibonecon pli materiale atesti la partoprenon de ia kaŝita potenco kaj postlasi strekojn, kiujn oni povas konservi, kiel ni faras pri niaj propraj korespondaĵoj. La unua rimedo uzata konsistis el tabuletoj kaj korboj, provizitaj per krajono. Jen ilia aranĝo.

**153.** Mi jam diris, ke homo, dotita per ia speciala kapablo, povas komuniki rotacian movon al tablo aŭ ia ajn objekto. Anstataŭ tablo ni prenu korbeton de dek kvin ĝis dudek centimetroj en la diametro, tute egale ĉu el ligno aŭ el vimeno; la substanco ne gravas. Se tra la fundo de tiu korbo oni trapasigas krajonon, kiun oni tie solide fiksas, kun la pinto turnita eksteren kaj malsupren; se tiun tutaĵon oni tenas en ekvilibro sur la pinto de la krajono, kiu tuŝas folion da papero, kaj se nun oni apogas la fingrojn sur la randoj de la korbo, ĉi tiu ekmoviĝas; sed anstataŭ turniĝi, ĝi kondukas la krajonon en diversajn flankojn sur la papero, farante sensignifajn strekojn aŭ literojn. Se oni elvokas iun Spiriton, kaj se li volas komunikiĝi, li respondas, jam ne

per frapoj, kiel en la tiptologio, sed per skribaj vortoj. La movado de la korbo jam ne estas aŭtomata, kiel ĉe la turniĝantaj tabloj, sed fariĝas inteligenta. Per ĉi tiu aranĝo la krajono, veninte al la ekstremo de la linio, ne revenas al la antaŭa rando de la papero, por komenci novan linion, sed ĝi ĉiam ankoraŭ moviĝas ronde en tia maniero, ke la skriblinio formas spiralon, kaj tial oni devas plurfoje turni la paperon, por legi tion skribitan. La tiel ricevita skribaĵo ne ĉiam estas tre legebla, ĉar la vortoj estas kunligitaj, sed la mediumo, per ia intuicio, ĝin facile deĉifras. Por ŝpari materialon, oni povas anstataŭigi la paperon per ardezplato kaj la krajonon per grifelo. Tian korbon mi nomas **korbo-turbo**. Iafoje, anstataŭ la korbo oni uzas kartonon tre similan al tiu de la bombonujoj; la krajono prezentas ĝian akson, kiel en la turnoludilo.

**154.** Plurajn aliajn aranĝojn oni elpensis, por trafi ĉi tiun celon. La plej oportuna, kiun mi nomas **beko-korbo**, estas tiel konstruita, ke oni almetas al la korbo klinitan lignan stangeton, kiu elstaras dek ĝis dek kvin centimetroj unuflanke, en la pozicio de busprito. Tra truo, borita ĉe la fino de tiu stangeto, aŭ beko, oni trametas krajonon sufiĉe longan, por ke ĝia pinto tuŝu la paperon. La mediumo metas la fingrojn sur la randon de la korbo, kaj jen la tuta aparato ekagitiĝas kaj la krajono skribas, kiel en la antaŭa okazo, kun tiu diferenco, ke la skribaĵo ordinare estas pli legebla, la vortoj estas nekunigitaj kaj la linioj jam ne faras spiralojn, sed sekvas unu alian, kiel en la ordinara skribado, ĉar la mediumo povas facile konduki la krajonon de sur unu linio sur la suban. En tia maniero oni ricevas plurpaĝajn disertaciojn tiel rapide, kiel se oni manskribus.

**155.** La aganta inteligento ofte manifestiĝas per aliaj nedubasencaj signoj. Veninte al la fino de la folio, la krajono spontanee faras ekmovon por ĝin turni; se la estulo deziras referenci al iu antaŭa peco de la skribaĵo, sur la sama aŭ alia folio, li ĝin serĉas per la pinto de la krajono tiel same, kiel oni agus per la fingro, kaj substrekas ĝin. Se, fine, la Spirito volas sin turni al iu

el la ĉeestantoj, la fino de la ligna stangeto direktiĝas al tiu persono. Por malplilongigi sian parolon, li ofte esprimas la vortojn **jes** kaj **ne** per signoj resp. de jesado aŭ neado, kiujn ni faras per la kapo. Se li volas esprimi koleron aŭ senpaciencon, li brutale frapadas la paperon per la pinto de la krajono kaj ne malofte rompas tiun pinton.

**156.** Anstataŭ korbo kelkaj personoj uzas ian tableton, faritan speciale, longan dek du ĝis dek kvin centimetrojn kaj larĝan kvin ĝis ses centimetrojn, kun tri piedoj, al unu el kiuj oni adaptas krajonon; la du ceteraj estas rondformaj aŭ provizitaj per ebura sfereto, por facile gliti sur la papero. Aliaj personoj uzas simple **tabuleton** de dek kvin ĝis dudek kvadrataj centimetroj, triangulan, oblongan aŭ ovalan; ĉe unu punkto de la rando ekzistas **oblikva** truo, por trameti la krajonon. Lokita por la skribado, ĝi staras nerekte kaj apogas sur la papero unu el siaj flankoj; ĉi tiu flanko iafoje havas du rulilojn por faciligo de la movado. Oni cetere komprenas, ke ĉiuj ĉi aranĝoj havas neniel absolutan karakteron: la plej bona estas tiu plej oportuna.

Uzante ĉiun ajn el ĉi tiuj aranĝoj, oni devas agadi preskaŭ ĉiam duope, sed ne estas necese, ke la dua homo havu mediumecon: tiu simple helpas, tenante la ekvilibron kaj ŝparigante al la mediumo tro da laciĝo.

**157.** Mi nomas **nerekta psikografio** la skribadon, efektivigatan per unu el la supre prezentitaj aranĝoj, kontraŭe al la **rekta psikografio**, plenumata de la mediumo mem. Por kompreni ĉi tiun lastan procedon, oni devas fari al si klaran ideon pri tio, kiel fariĝas la unua: jen kiel. La komunikiĝanta Spirito agas sur la mediumon; ĉi tiu, sub tiu influo, **maŝine** ekmovas la brakon kaj la manon, por skribi, tute ne konsciante, kion li skribas (ĉi tiu estas almenaŭ la ordinara okazo); la mano agas sur la korbon, kaj la korbo sur la krajonon. Tiel do **la korbo ne fariĝas inteligenta**, sed ja estas nura ilo, direktata de iu inteligento; ĝi efektive estas nenio krom ia krajoningo, ia aldono al la mano, ia perilo inter la mano kaj la krajono. Oni forigu tiun perilon kaj metu

la krajonon inter la fingrojn, kaj oni ricevos tian saman rezultaton per multe pli simpla meĥanismo, ĉar la mediumo tiam skribas tiel, kiel li skribas ordinare. Sekve ĉiu, kiu skribas kun la helpo de korbo, tabuleto aŭ alia objekto, povas skribi rekte.

El ĉiuj komunikrimedoj la **manskribado**, kiun kelkaj nomas **pretervola skribado**, estas sendube la plej simpla, la plej facila kaj la plej oportuna, ĉar ĝi postulas nenian preparadon kaj taŭgas, kiel la fluanta skribado, por la plej vastaj elvolviĝoj. Mi ankoraŭ pritraktos ĝin, kiam mi parolos pri la mediumoj.

**158.** En la unua tempo de la manifestiĝoj de Spiritoj, tiam, kiam oni pri ĉi tiu afero faradis al si malpli precizan ideon, multe da skribaĵoj estis publikigitaj sub titoloj, kiel: **Komunikaĵoj de korbo**, **Komunikaĵoj de tabuleto**, **Komunikaĵoj de tablo** k. s. Hodiaŭ oni komprenas, kiom da nesufiĉa aŭ erara havas tiuj esprimoj, jam ne parolante pri ilia malmulte serioza karaktero. Efektive, kiel ni ĵus vidis, la tabloj, tabuletoj kaj korboj estas nuraj iloj **neinteligentaj**, kvankam momente animitaj per nenatura vivo, kiuj nenion povas komuniki per si mem; alie tio estus, kiel preni la efikon por la kaŭzo, la instrumenton por la principo; tio estus, kiel se iu aŭtoro deklarus sur la titolpaĝo de sia libro, ke ĉi tiun verkis metala aŭ anasa plumo. Tiuj iloj cetere ne esceptas aliajn; unu mia konato anstataŭ la **korbo-turbo** uzadis funelon, tra kies kolo li trametis la krajonon; oni do povus ricevi komunikaĵojn de funelo, kaj tute same de kaserolo aŭ de salatujo. Se ili fariĝas per frapoj kaj por tiuj frapoj oni uzus seĝon aŭ bastonon, oni havus jam ne ian parolantan tablon, sed ian seĝon aŭ bastonon parolantan. Estas grave koni ne la strukturon mem de la ilo, sed la manieron ricevi la komunikaĵojn: se ĉi tiuj fariĝas per skribado, kia ajn estas la krajoningo, tio estas laŭ ni **psikografio**; se per frapoj, ĝi estas **tiptologio**. Ricevante la amplekson de scienco, Spiritismo ja bezonas sciencan terminaron.

———————

ĈAPITRO XIV

# PRI LA MEDIUMOJ

*Mediumoj por fizikaj efikoj. Elektraj homoj. Sensivaj aŭ impreseblaj mediumoj. Aŭdivaj mediumoj. Parolivaj mediumoj. Vidivaj mediumoj. Somnambulaj mediumoj. Sanigivaj mediumoj. Mediumoj-pneŭmatografoj*

**159.** Ĉiu homo, kiu iagrade sentas la influon de la Spiritoj, estas pro tio mem mediumo. Ĉi tiu kapablo estas propra al la homo, sekve ĝi estas nenies privilegio; tial malmultaj estas tiuj homoj, kiuj ĝin ne posedas eĉ en rudimenta stato. Oni do povas diri, ke ĉiuj estas, en pli aŭ malpli forta grado, mediumoj; tamen ĉi tiu kvalitigo aplikiĝas, en la ordinara parolo, nur al tiuj homoj, ĉe kiuj la mediumeco elmontriĝas nete kaj manifestiĝas per evidentaj, iom intensaj efikoj, kio do dependas de pli aŭ malpli sensiva organa strukturo. Krom tio estas rimarkinde, ke ĉi tiu kapablo ne en sama maniero elaperas ĉe ĉiuj; la mediumoj ordinare havas unu kapablon specialan por tia aŭ tia el la specoj de fenomenoj; el kio rezultas, ke ekzistas tiom da variaĵoj de mediumoj, kiom da specoj de manifestiĝoj. La ĉefaj klasoj estas: **mediumoj por fizikaj efikoj; sensivaj** aŭ **impreseblaj mediumoj; aŭdivaj; parolivaj; vidivaj; somnambulaj; sanigivaj; pneŭmatografaj; skribivaj** aŭ **psikografaj**.

### 1. Mediumoj por fizikaj efikoj

**160. La mediumoj por fizikaj efikoj** estas pli speciale kapablaj por okazigi materiajn fenomenojn, kiel

movadoj de inertaj korpoj, bruoj k. a. Oni povas ilin dividi en **memagantajn mediumojn** kaj **pretervolajn mediumojn**. (Vd. la 2-an Parton, Ĉap. II kaj IV.)

La **memagantaj mediumoj** estas tiuj, kiuj konscias pri sia povo kaj okazigas spiritismajn fenomenojn per la agado de sia volo. Kvankam propra al la homa genro, kiel mi jam diris, ĉi tiu kapablo tute ne en egala grado ekzistas ĉe la mediumoj; sed se ekzistas malmulte da homoj, ĉe kiuj ĝi estas absolute nula, tamen ankoraŭ pli malmultenombraj estas tiuj kapablaj okazigi grandajn efikojn, kiel levo de pezaj korpoj en la aeron, transporto tra la aero kaj precipe aperaĵoj. La plej simplaj efikoj estas la turnado de objekto, frapoj, fariĝantaj pro la levo de tiu objekto aŭ en ĝia substanco mem. Kvankam mi ne rigardas tiujn fenomenojn kiel plej gravajn, mi admonas, ke oni ilin ne flanken metu; ili povas havigi oportunajn okazojn por interesaj observoj kaj kunhelpi por konvinko. Sed estas rimarkinde, ke la kapableco okazigi materiajn efikojn malofte ekzistas ĉe tiuj mediumoj, kiuj disponas pli perfektajn rimedojn por komunikado, kiel skribado aŭ parolo. La mediumeco ordinare malfortiĝas sur unu flanko laŭgrade, kiel ĝi kreskas sur alia.

**161.** La **pretervolaj** aŭ **naturaj mediumoj** estas tiuj, kies influo efektiviĝas sen ilia konscio. Ili tute ne konscias sian kapablecon, kaj kio anomalia okazas ĉirkaŭ ili, tio ofte neniel ŝajnas al ili eksterordinara; tio estas parto de ili mem, tute tiel, kiel la duobla vidado ĉe homoj, kiuj eĉ ne suspektas, ke ili ĝin posedas. Tiaj homoj estas tre indaj je observado, kaj oni ne devas sin deteni rikolti kaj studi tiaspecajn faktojn, kiuj eventuale konatiĝas al ĉiu. Tiaj faktoj efektiviĝas en ĉiu aĝo kaj ofte ĉe tre junaj infanoj. (Vd. supre, en la Ĉap. V: **Pri la spontaneaj manifestiĝoj**.)

Tia kapableco, per si mem, ne estas signo de ia patologia stato, ĉar ĝi ne estas neakordigebla kun perfekta saneco. Se ĝia posedanto suferas ian malsanon, ĉi tiu havas kaŭzon tute alian, kaj tial terapeŭtikaj rimedoj estas senpovaj kontraŭ ĝi. Tiu kapableco povas, en iuj

okazoj, esti sekvo de ioma organa malforteco, sed ĝi neniam estas efika kaŭzo. Ne estus do saĝe fari el ĝi motivon por maltrankviliĝo el la higiena vidpunkto; ĝi estus malutila nur en tiu okazo, se la homo, fariĝinte memaganta mediumo, ĝin trouzus, ĉar tiam el li elverŝiĝus tro multe da vitala fluidaĵo kaj sekve malfortiĝus liaj organoj.

**162.** La prudento indignas ĉe la penso pri la moralaj kaj korpaj torturoj, al kiuj la scienco iafoje submetis malfortikajn kaj delikatajn homojn, por certiĝi, ĉu tiuj uzas iajn artifikaĵojn. Tiaj **eksperimentoj**, plej ofte farataj malbonintence, ĉiam malutilas al sensivaj organismoj; el ili povus rezulti gravaj malordoj en la organa ekonomio; fari tiajn elprovojn estas ludi kun la vivo. Bonafida observanto ne bezonas tiajn rimedojn; kiu profunde konas tiajn fenomenojn, tiu cetere scias, ke ili apartenas prefere al la morala sfero, ol al la kampo fizika, kaj ke oni vane elserĉus ilian solvon en niaj ekzaktaj sciencoj.

Ĝuste pro tio, ke tiaj fenomenoj rilatas kun la morala sfero, oni devas kun skrupula zorgo eviti ĉion, kio povus supereksciti la imagemon. Oni scias, kiajn akcidentojn la timo povas kaŭzi, kaj oni estus malpli malprudenta, se oni konus ĉiujn okazojn de frenezo kaj epilepsio, kiuj originis el rakontoj pri lupkoboldoj kaj infanmanĝantoj; kio do estus, se oni konvinkiĝus, ke tio estas la **diablo**? Kiuj enblovas tiajn ideojn, tiuj ne scias la respondecon, per kiu ili sin ŝarĝas: **ili povas mortigi**. Nu, la danĝero ne pendas nur super li, sed ankaŭ super ĉiuj ĉirkaŭ li, homoj, kiujn povas teruri la penso, ke ilia domo fariĝis ia nestego de demonoj. Tiu pereiga konvinko estis ja la kaŭzo de tiom da kruelegaĵoj en la tempoj de senklereco; tamen kun iom pli da kriterio oni ja devus esti pensinta, ke, bruligante la korpon, kiun oni supozis posedita de la diablo, oni la diablon mem ne bruligus; ĉar oni volis liberiĝi de la diablo, ja lin, ne alian, estis necese mortigi. Klarigante al ni la veran kaŭzon de ĉiuj tiuj fenomenoj, la Spiritisma Doktrino donas al la diablo sian finofaran baton. **Anstataŭ do el-**

**kovi tian penson, oni devas — kaj ĝi estas ja devo de moraleco kaj humaneco — ĝin kontraŭbatali ĉie, kie ĝi ekzistas**.

Kion oni devas fari, kiam tia kapablo spontanee disvolviĝas ĉe iu homo, tio estas lasi la fenomenon iradi sian naturan vojon: la Naturo estas pli prudenta ol la homoj; cetere la Providenco havas siajn planojn kaj ĝiajn plej grandajn projektojn povas plenumi la plej malgranda el la homoj. Sed, oni konfesu, ĉi tiu fenomeno kelkafoje rivevas amplekson lacigan kaj neoportunan por ĉiuj (*). Jen do, kion oni devas fari en ĉiuj okazoj. En la Ĉapitro V — **Pri la spontaneaj fizikaj manifestiĝoj** — mi jam donis kelke da konsiloj en ĉi tiu rilato dirante, ke oni devas peni komunikiĝi kun la Spirito, por de li ekscii, kion li volas. La sekvanta rimedo ankaŭ baziĝas sur observado.

La nevideblaj estuloj, kiuj elmontras sian ĉeeston per senseblaj efikoj, ordinare estas Spiritoj, apartenantaj al malsupera klaso kaj kiujn oni povas superregi per mo-

(*) Unu el la plej eksterordinaraj tiaspecaj faktoj, pro la diverseco kaj strangeco de la fenomenoj, estas nekontesteble tiu, kiu okazis en 1852, en Palatinato (rejna Baviero), en Bergzabern, proksime de Vesemburgo. Ĝi estas des pli rimarkinda, ĉar ĝi montras ĉe unu sama homo ĉiujn specojn de spontaneaj manifestiĝoj: bruegoj, skuegantaj la domon, renversado de mebloj, ĵetado de objektoj el malproksime fare de nevideblaj manoj, vidaĵoj kaj aperaĵoj, somnambulismo, ekstazo, katalepsio, elektra altiro, krioj kaj sonoj tra la aero, senkontakta ludado de instrumentoj, inteligentaj komunikaĵoj k. a., kaj, ne malplej grave, tio, ke tiujn faktojn konstatis dum ĉirkaŭ du jaroj multenombraj vidintoj, fidindaj pro sia klereco kaj socia rango. La aŭtentika raporto estis en tiu tempo publikigita de pluraj germanaj gazetoj kaj precipe en broŝuro, hodiaŭ elĉerpita kaj tre malofta. En la *Revue Spirite*, de 1858, oni legas la kompletan tradukon de tiu broŝuro, kune kun la necesaj komentarioj kaj klarigoj. Tiu, kiom mi scias, estas la sola franclingva publikigaĵo de tiu broŝuro. Krom la pasiiga intereso, kiun tiuj fenomenoj vekas, ili estas treege instruaj el la vidpunkto de la praktika studado de Spiritismo. — *Noto de la Aŭtoro*.

rala aŭtoritateco; ĝuste tian aŭtoritatecon oni devas peni havigi al si.

Por atingi tian aŭtoritatecon, estas necese transirigi la individuon de la stato de **mediumo natura** en la staton de **mediumo memaganta**. Estiĝas tiam efiko analoga al tiu, kiu okazas en somnambulismo. Oni scias, ke la somnambulismo natura ordinare ĉesas tiam, kiam ĝin anstataŭas la somnambulismo magnetiza. Oni ne forprenas la liberiĝan kapablon de la animo: oni donas al ĝi alian direkton. Ĉi tio sama estas kun la mediuma kapableco. Por tio, anstataŭ malhelpi la fenomenojn, kion oni malofte atingas kaj kio ne ĉiam estas sendanĝera, estas necese instigi la mediumon ilin laŭplaĉe okazigi, imponante al la Spirito; en ĉi tiu maniero li sukcesas regi la Spiritojn kaj el iafoje superpotencanta tirano li faras submetiĝeman kaj ofte tre obeeman estulon. Notinda fakto, konfirmita de la sperto, estas tio, ke, en tia okazo, infano havas tiom kaj ofte pli da aŭtoritato ol plenaĝulo: ankoraŭ unu pruvo, subtenante ĉi tiun plej ĉefan punkton de la Doktrino, nome, ke la Spirito estas infano nur laŭ la korpo kaj ke li mem posedas disvolviĝon nepre antaŭan rilate sian nunan enkarniĝon, disvolviĝon, kiu povas havigi al li aŭtoritatecon super Spiritoj, starantaj sur ŝtupo pli malalta ol lia.

La moralinstruo de Spirito per la konsiloj de krompersono influhava kaj sperta, se nur la mediumo ĝin ne kapablas fari, ofte estas tre efika rimedo. Mi poste repritraktos ĉi tiun temon.

**163.** Povus ŝajni, ke al ĉi tiu kategorio da mediumoj apartenus homoj, dotitaj per ioma natura elektro, efektivaj **homaj torpedoj**, farantaj per nura kontakto ĉiujn efikojn de altirado kaj repuŝado. Sed eraro estus rigardi ilin kiel **mediumojn**, ĉar la vera mediumeco implicas la rektan partoprenon de iu Spirito; nu, en la nuna okazo konkludigaj eksperimentoj pruvas, ke la sola aganto en tiuj fenomenoj estas la elektro. Tia stranga kapablo, kiun oni tolereble povas kvalitigi ia malsano, povas iafoje aliĝi al la mediumeco, kiel oni facile vidas en la historio de la **Bergzabern'a frapanta Spirito**; sed

ĝi ofte tute ne dependas de ia mediumeco. Kiel mi diris, la sola pruvo pri la partopreno de la Spiritoj estas la inteligenta karaktero de la manifestiĝoj; ĉiam, kiam ne ekzistas tia karaktero, oni havas fundamenton, por ilin alskribi al ia kaŭzo pure fizika. La demando kuŝas en tio, scii, ĉu la **elektraj homoj** estus pli kapablaj fariĝi **mediumoj por fizikaj efikoj**; mi tiel pensas, sed nur la sperto dirus la lastan vorton.

## 2. Sensivaj aŭ impreseblaj mediumoj

**164.** Oni tiel nomas tiujn homojn, kapablajn eksenti la ĉeeston de la Spiritoj per nepreciza impreso, per ia tuŝeto sur ĉiujn membrojn, sensaĵo, kiun ili ne povas klarigi al si. Ĉi tiu variaĵo ne havas absolute difinitan karakteron. Ĉiuj mediumoj estas nepre impreseblaj, kaj tial la impresebleco estas kvalito prefere ĝenerala, ol speciala: ĝi estas la plej elementa kapablo, nepre necesa al la disvolviĝado de ĉiuj ceteraj. Ĝi estas malsama ol la pure fizika kaj nerva impresebleco, kun kiu oni ne devas ĝin intermiksi, ĉar ekzistas homoj, kiuj, ne havante delikatajn nervojn, tamen pli aŭ malpli forte sentas la efikon de la ĉeesto de Spiritoj, kaj, kontraŭe, aliaj tre incitiĝemaj ilin tute ne sentas.

Ĉi tiu kapablo disvolviĝas per la kutimo kaj povas ekhavi tian subtilecon, ke ĝia posedanto, laŭ la impreso, kiu lin trafis, scias ne nur pri la bona aŭ malbona naturo de la Spirito apud li, sed ankaŭ pri ties individueco, tute same, kiel blindulo per ia nekaptebla "io" konstatas la alproksimiĝon de tia aŭ tia homo: li do, rilate la Spiritojn, fariĝas efektiva sensitivo. Bona Spirito faras ĉiam mildan kaj agrablan impreson; la impreso de malbona Spirito, kontraŭe, estas aflikta, angora kaj malagrabla: oni kvazaŭ sentas odoron de ia malpuraĵo.

## 3. Aŭdivaj mediumoj

**165.** Ĉi tiuj aŭdas la voĉon de la Spiritoj. Tio estas, kiel mi diris, traktante pri la pneŭmatofonio, kelkajn

fojojn ia interna voĉo, kiu aŭdiĝas el la profundo de la animo; aliajn fojojn ĝi estas voĉo ekstera, klara kaj neta, kiel de vivanto. La aŭdivaj mediumoj povas tiel ekkonversacii kun la Spiritoj. Kiam ili kutimas komunikiĝi kun certaj Spiritoj, ili tiujn tuj rekonas per la karaktero de ties voĉo. Kiam oni mem ne estas dotita per ĉi tiu kapablo, oni ankaŭ povas komunikiĝi kun iu Spirito pere de aŭdiva mediumo, kiu tiam plenumas la rolon de interpretanto.

Ĉi tiu kapablo estas tre agrabla, kiam la mediumo aŭdas nur bonajn Spiritojn aŭ sole tiujn, kiujn li elvokas; sed tiel same ne estas tiam, kiam ia malbona Spirito alkroĉiĝas al li kaj ĉiumomente aŭdigas al li la aferojn plej malagrablajn kaj iafoje plej nekonvenajn. Li devas tiam peni liberiĝi de tia Spirito per la rimedoj, kiujn mi indikos en la ĉapitro pri la **Obsedo**.

## 4. Parolivaj mediumoj

**166.** La aŭdivaj mediumoj, kiuj faras nenion, krom transdiri tion, kion ili aŭdis, ne estas ĝustadire **parolivaj mediumoj**. Ĉi tiuj lastaj tre ofte aŭdas nenion; ĉe ili la Spirito agas sur la parolorganojn same, kiel li agas sur la manon de la skribivaj mediumoj. Dezirante komunikiĝi, la Spirito uzas tiun organon, kiun li trovas plej fleksebla ĉe la mediumo: de unu li prenas la manon; de alia, la parolorganojn; de tria, la orelon. La paroliva mediumo parolas ordinare ne konsciante, kion li diras, kaj ofte li diras aferojn, starantajn tute ekster lia kutimaj pensoj, for de liaj scioj kaj eĉ trans la limoj de lia inteligenteco. Eĉ se li tute ne dormas kaj troviĝas en sia normala stato, li malofte konservas memoron pri tio, kion li diris. Unuvorte, la parolo estas ĉe li ia ilo, kiun uzas la Spirito, kun kiu alia homo povas komunikiĝi, kiel pere de aŭdiva mediumo.

La pasiveco de la paroliva mediumo ne ĉiam estas tiel absoluta; iuj el tiuj mediumoj havas la intuicion pri tio, kion ili diras, ĝuste en la momento, kiam ili eldiras la vortojn. Mi revenos al ĉi tiu speco de mediumoj, kiam mi traktos pri la intuiciaj mediumoj.

## 5. Vidivaj mediumoj

**167.** La vidivaj mediumoj estas dotitaj per la kapablo vidi la Spiritojn. Estas tiaj, kiuj ĝuas ĉi tiun kapablon en sia normala stato, tute ne dormante, kaj konservas perfektan memoron pri tio, kion ili vidis; aliaj havas tiun kapablon nur en stato somnambula aŭ preskaŭ somnambula. Ĉi tiu kapablo estas malofte seninterrompa; preskaŭ ĉiam ĝi estas efiko de momenta krizo. Oni povas alkalkuli al la kategorio da vidivaj mediumoj ĉiujn homojn, dotitajn per duobla vidado. La ebleco vidi Spiritojn en sonĝo sendube rezultas el ia mediumeco, sed tia homo ne estas ĝustadire vidiva mediumo. Mi klarigis ĉi tiun fenomenon en la Ĉapitro VI: **Pri la vidmanifestiĝoj**.

La vidiva mediumo pensas, ke li vidas per la okuloj same, kiel tiuj dotitaj per duobla vidado; sed, en efektiveco, tio estas la animo, kiu vidas, kaj tial ili vidas egale per okuloj fermitaj, kiel per okuloj malfermitaj; el tio oni konkludas, ke blindulo povas vidi Spiritojn tiel bone, kiel sendifekta vidanto. Pri ĉi tiu lasta demando konvenus fari interesan studon, nome scii, ĉu tiu kapablo estas pli ofta ĉe la blinduloj. Spiritoj, kiuj sur la Tero estis blinduloj, diris al mi, ke tiam ili per la animo perceptis iujn objektojn kaj do ili ne dronis en ia nigra mallumo.

**168.** Estas necese distingi inter la vido de okazaj kaj spontaneaj aperoj, unuflanke, kaj la ĝustasenca kapablo vidi Spiritojn, aliflanke. La unua estas ofta, precipe ĉe la momento de la morto de homoj, kiujn oni amis aŭ konis, venintaj, por sciigi, ke ili jam ne apartenas al ĉi tiu mondo. Sennombraj estas la ekzemploj de tiaspecaj faktoj, jam ne parolante pri vidaĵoj dum la dormo. Povas okazi ankaŭ, ke tio estas parencoj aŭ amikoj, kiuj, kvankam de pli aŭ malpli longe mortintaj, aperas, ĉu por averti pri ia danĝero, ĉu por doni ian konsilon aŭ peti ian komplezon. Tia komplezo, kiun Spirito povas peti, estas ordinare la plenumo de iu afero, kiun li ne povis fari, kiam sur la Tero, aŭ la helpo de preĝoj. Tiuj

aperaĵoj estas unuopaj faktoj, kiuj ĉiam havas individuan, personan karakteron kaj kiuj ne kuntrenas la posedon de ia ĝustasenca kapableco. Tiu kapableco konsistas en la ebleco, se ne konstanta, almenaŭ tre ofta, vidi iun ajn Spiriton aperintan, eĉ se tute fremdan al la vidanto. Ĝuste en tiu kapableco propre konsistas la vidiva mediumeco.

El la vidivaj mediumoj kelkaj vidas nur la elvokitajn Spiritojn, kies figuron ili povas priskribi kun detala ekzakteco; ili plendetale pentras ties gestojn, la esprimon de la mieno, la trajtojn de la vizaĝo, la veston, eĉ la sentojn, kiujn laŭŝajne tiuj Spiritoj portas. Ĉe aliaj tiu kapableco estas ankoraŭ pli ampleksa: ili vidas la tutan ĉirkaŭan aron da Spiritoj, irantaj tien kaj reen kaj, oni povus diri, okupitaj pri siaj aferoj.

**169.** Unu vesperon mi ĉeestis la ludadon de la opero **Obéron** en kompanio de tre bona vidiva mediumo. Estis en la salono tre granda nombro da vakantaj lokoj, sed el kiuj multaj estis okupitaj de Spiritoj, kiuj mienis, kvazaŭ ili partoprenas en la spektaklo; kelkaj iradis apud iujn spektatorojn kaj ŝajnis aŭdi ilian konversacion. Sur la scenejo okazis alia sceno: malantaŭ la geaktoroj pluraj gajhumoraj Spiritoj amuzis sin, moke imitante ilin per groteska kopiado de iliaj gestoj; aliaj, pli seriozaj, ŝajnis inspiri la gekantantojn kaj klopodi, por enblovi en ilin energion. Unu el ili senĉese staradis apud unu el la ĉefaj kantistinoj; ni pensis, ke liaj intencoj estas iom neseriozaj kaj tial post la falo de la kurteno ni alvokis lin; li venis kaj iom severe riproĉis nian senfundamentan juĝon: "Mi ne estas tio, kion vi pensas — li diris —; mi estas ŝia Gvidanto kaj Protektanta Spirito; al mi estas komisiita ŝia direktado." Post kelke da minutoj da tre serioza konversacio li foriris de ni, dirante: "Adiaŭ; ŝi estas en sia buduaro; mi devas zorgi pri ŝi." Ni tuj poste alvokis la Spiriton Weber, la aŭtoro de tiu opero, kaj demandis lin, kiel ŝajnas al li la ludado de lia verko. "Ne tute malbona — li respondis —, sed senenergia; la geaktoroj kantas, jen ĉio; inspiro ne estas. Atendu — li aldonis —, mi penos havigi al ili iom de la

sankta fajro.” Post nelonge oni vidis lin en la scenejo, ŝvebantan super la geaktoroj; ia efluvo kvazaŭ elfluis el li kaj disverŝiĝis sur ilin; tiam ĉe ili fariĝis sentebla pliintensiĝo de energio.

**170.** Jen ankoraŭ unu fakto, kiu pruvas la influon de la Spiritoj sur la homoj sen ties scio. Mi ĉeestis, kiel en tiu vespero, teatran ludadon kune kun alia vidiva mediumo. Dum konversacio kun iu **Spirito-spektatoro**, ĉi tiu diris al ni: “Vi ja vidas tiujn du solajn sinjorinojn en tiu unuavica loĝio; nu, mi klopodas por igi ilin forlasi la salonon.” Tuj poste la mediumo ekvidis lin iri sin loki en tiu loĝio kaj paroli al la du sinjorinoj; subite ĉi tiuj, kiuj streĉe atendadis la spektaklon, rigardis unu la duan, kvazaŭ sin reciproke konsultis, poste foriris kaj ne plu reaperis. La Spirito tiam faris al ni komikan geston, por montri, ke li plenumis sian parolon; sed ni lin plu ne vidis, por peti de li pli detalan klarigon pri la afero. Jen kiel mi plurajn fojojn ĉeestis la rolon de la Spiritoj inter la homoj. Mi ilin observis en diversaj kunvenejoj, en baloj, en koncertoj, dum predikoj, dum enterigoj, dum edziĝoj k. a., kaj ĉie mi vidis ilin ekscitantaj malnoblajn pasiojn, enblovantaj malkonkordon, instigantaj al malpaco kaj ĝojantaj pri siaj fiaj faroj; aliaj, kontraŭe, kontraŭbataladis tiun pereigan influon, sed tiujn oni nur malofte elaŭdis.

**171.** La kapablo vidi la Spiritojn povas sendube disvolviĝi, sed ĝi estas unu el tiuj, pri kiuj estas konsilinde atendi ilian naturan evoluadon, sen perforto, se nur oni ne volas elmeti sin al la risko esti ludilo de sia propra imagemo. Kiam ekzistas la ĝermo de iu kapablo, tiam ĉi tiu manifestiĝas per si mem; en principo ni devas kontentiĝi per tiuj, kiujn Dio al ni konsentis, ne serĉante neeblaĵon, ĉar tiam, avidante tro multe, ni riskas perdi tion havatan.

Kiam mi diris, ke la okazoj de spontaneaj aperoj estas oftaj (§ 107), mi ne intencis diri, ke ili estas tre ordinaraj. Rilate la ĝustasencajn vidivajn mediumojn, tiuj estas ankoraŭ pli malmultaj, kaj oni devas ja forte malfidi tiujn, kiuj flatas al si, ke ili ĝuas tian kapablon:

estas prudente fidi ilin nur per pozitivaj pruvoj. Mi eĉ iomete ne parolas pri tiuj, kiuj faras al si la ridindan iluzion, kvazaŭ ili vidas la Spiritojn-globetojn, kiujn mi menciis en la § 108, sed mi parolas nur pri tiuj, kiuj pretendas vidi la Spiritojn en racia maniero. Iuj homoj sendube povas erari bonafide, sed aliaj povas ŝajnigi tian kapablecon pro memestimo aŭ pro intereso. En ĉi tiu okazo oni devas speciale preni en kalkulon la karakteron, la moralecon kaj la kutiman sincerecon; sed precipe en la cirkonstancoj de detaloj oni povas trovi la plej certan kontrolon, ĉar ekzistas cirkonstancoj, kiuj ne povas allasi dubon, kiel ekzemple la ĝusteco de la portreto de Spiritoj, kiujn la mediumo neniam antaŭe konis kiam ili vivis sur la Tero. La sekvanta fakto apartenas al ĉi tiu kategorio.

Unu vidvino, kies edzo ofte komunikiĝas kun ŝi, troviĝis foje kune kun vidiva mediumo, kiu ŝin ne konis kaj des malpli ŝian familion; ĉe unu momento la mediumo diris al ŝi: — Mi vidas Spiriton apud vi. — Ha! — rediris la sinjorino —; tio sendube estas mia edzo, kiu min preskaŭ neniam forlasas. — Ne — respondis la mediumo —, tio estas grandaĝa virino; ŝi portas strangan hararanĝon; ŝi havas blankan platan harfaskon sur la frunto.

Laŭ ĉi tiu apartaĵo kaj aliaj priskribaj detaloj la sinjorino, sen ia eblo de eraro, rekonis sian avinon, pri kiu ŝi en tiu momento tute ne pensis. Se la mediumo volus ŝajnigi tiun kapablecon, estus al li facile konfirmi la opinion de la sinjorino, dum anstataŭ la edzo, kiu okupis ŝian menson, li vidis virinon kun tute propra hararanĝo, kiun nenio povus sugesti al li. Ĉi tiu fakto pruvas ankoraŭ unu aferon, nome, ke la vidaĵo, ĉe tiu mediumo, estis rebildo de nenia fremda penso. (Vd. § 102.)

## 6. Somnambulaj mediumoj

**172.** La somnambulismo povas esti rigardata kiel ia variaĵo de la mediumeco, aŭ pli bone dirite, ili estas du specoj de fenomenoj, kiuj ofte troviĝas kunigitaj.

La somnambulo agas sub la influo de sia propra Spirito; ĝi estas lia animo, kiu, en la momentoj de sia libereco, vidas, aŭdas kaj perceptas ekster la limoj de liaj sentumoj; kion li esprimas, tion li ĉerpas el si mem; liaj ideoj ordinare estas pli ĝustaj, ol en lia normala stato, liaj scioj estas pli ampleksaj, ĉar lia animo troviĝas libera; unuvorte, li anticipe vivas la vivon de la Spiritoj. La mediumo, kontraŭe, estas ilo de fremda inteligento; li estas pasiva, kaj kion li diras, tio ne de li venas. Resume, la somnambulo esprimas sian propran penson, kaj la mediumo esprimas penson aliulan. Sed Spirito, kiu komunikiĝas per ordinara mediumo, tute same povas tion fari per somnambulo; eĉ ofte la libereco de la animo, dum la somnambulismo, plifaciligas tiun komunikiĝon. Multe da somnambuloj vidas la Spiritojn perfekte kaj ilin priskribas tiel precize, kiel la vidivaj mediumoj; ili povas konversacii kun tiuj estuloj kaj transdiri al ni ties penson; kion ili diras ekster la kadro de siaj personaj scioj, tio ofte estas al ili inspirata de aliaj Spiritoj. Jen rimarkinda ekzemplo, en kiu la duopa agado de la Spirito de la somnambulo kaj de la fremda Spirito elmontriĝas en la plej senduba maniero:

**173.** Unu mia amiko havis kiel somnambulon junuleton en la aĝo de 14 ĝis 15 jaroj, kun tre ordinara inteligenteco kaj ekstreme limita instruiteco; tamen en la somnambula stato, li donis pruvojn pri eksterordinara klarvideco kaj granda sagaceco. Li montriĝis plej lerta precipe en la arto de kuracado kaj sukcesis ĉe granda nombro da malsanoj, kies resanigo estis konsiderata nefarebla. Unu tagon, kiam lin konsultis malsanulo, li plej ĝuste priskribis ties malsanon. — Tio ne sufiĉas — oni diris al li —, nun vi devus indiki la medikamenton. — Mi ne povas — li rediris — **mia anĝelo-kuracisto ne estas ĉi tie**. — Kiun vi komprenas sub via "anĝelo-kuracisto"? — Tiun, kiu diktas al mi la medicinaĵojn. — Ĉu do ne vi ja vidas la medicinaĵojn? — Ho ne; mi ja diras al vi, ilin al mi diktas mia anĝelo-kuracisto.

Tiel do, ĉe tiu somnambulo la ago **vidi** la malsanon estis afero de lia propra Spirito, kiu por tio bezonis

nenian helpon; sed la medikamentojn al li indikis alia: se tiu alia ne troviĝus tie, li do povus diri nenion. Sola, li estis nur **somnambulo**; helpata de tiu, kiun li nomis sia anĝelo-kuracisto, li estis **somnambulo-mediumo**.

**174.** La somnambula klarvideco estas kapablo, kiu havas sian radikon en la organismo kaj kiu tute ne dependas de la rango, de la progreso kaj eĉ de la moraleco de la individuo. Somnambulo povas do esti tre klarvida, sed nekapabla solvi iajn demandojn, se lia Spirito estas nemulte progresinta. Tiu, kiu parolas per li, povas do diri bonajn aŭ malbonajn, ĝustajn aŭ malĝustajn aferojn, uzi pli aŭ malpli da delikateco kaj da skrupulo en siaj procedoj, laŭ la grado da supereco aŭ da malsupereco de sia propra Spirito. La helpado de iu fremda Spirito povas plenigi liajn mankojn. Sed somnambulo, kiel same la mediumoj, povas havi apud si Spiriton mensogeman, frivolan, eĉ malican; precipe en ĉi tiu okazo la moralaj ecoj havas grandan influon, por altiri la bonajn Spiritojn. (Vd.: **La Libro de la Spiritoj**, "Somnambulismo", § 425, kaj, ĉi tie, la ĉapitron "Pri la morala influo de la mediumo".)

## 7. Sanigivaj mediumoj

**175.** Nur por ĝin ne tute prisilenti, mi ĉi tie parolas pri ĉi tiu speco de mediumoj, ĉar ĉi tiu temo postulus traktadon tro grandan por la kadro de ĉi tiu libro; cetere mi scias, ke unu mia amiko, kuracisto, intencas pritrakti ĝin en speciala verko pri la intuicia Medicino. Mi diras sole nur, ke ĉi tiu speco de mediumeco konsistas precipe en la naturdoto de iuj homoj, resanigi per nura ektuŝo, per la rigardo, eĉ per gesto, sen la helpo de iaajn medikamentado. Oni sendube diros, ke tio estas nenio alia, ol magnetizarto. Evidente la magneta fluidaĵo ĉi tie ludas gravan rolon, sed, zorge ekzamenante ĉi tiun fenomenon, oni senpene rekonas, ke en ĝi ekzistas ja io pli.

La ordinara magnetizarto estas efektiva kuracado kontinua, regula kaj metoda; en la nuna okazo la aferoj

fariĝas tute alie. Ĉiuj magnetizistoj estas pli aŭ malpli kapablaj sanigi, se nur ili scias konvene helpi al si, dum ĉe la sanigivaj mediumoj la kapableco estas spontanea, kaj eĉ kelkaj ĝin posedas, neniam antaŭe aŭdinte pri ia magnetizarto. La partopreno de ia kaŝita potenco, tio, en kio ja konsistas la mediumeco, evidentiĝas ĉe iuj cirkonstancoj, precipe tiam, se oni konsideras, ke la plej multaj homoj, kiujn oni prave povas kvalitigi sanigivaj mediumoj, helpas al si per la preĝo, kiu estas efektiva elvoko. (Vd. supre, § 131.)

**176.** Jen la respondoj, kiujn la Spiritoj donis al la demandoj, kiujn mi adresis al ili pri ĉi tiu temo.

I. Ĉu oni povas konsideri la homojn, dotitajn per magneta forto, ia variaĵo de mediumoj?

"Tion vi ne povas dubi."

II. Tamen mediumo estas peranto inter la Spiritoj kaj la homo; nu, ĉu ne ŝajnas, ke, ĉerpante sian forton el si mem, la magnetizanto estas peranto de nenies fremda potenco?

"Tio estas eraro; la magneta forto sendube kuŝas en la homo, tamen ĝi kreskas per la agado de la Spiritoj, kiujn li helpe alvokas. Se vi magnetizas, ekzemple, por iun resanigi, kaj vi elvokas bonan Spiriton, kiu interesiĝas por vi kaj por via malsanulo, li pligrandigas vian forton kaj volon, li direktas vian fluidaĵon kaj havigas al ĉi tiu la necesajn kvalitojn."

III. Ĉu tamen ekzistas tre bonaj magnetizistoj, kiuj ne kredus la Spiritojn?

"Ĉu do vi pensas, ke la Spiritoj agas nur sur tiujn homojn, kiuj ilin kredas? Tiuj, kiuj magnetizas por bono, estas helpataj de bonaj Spiritoj. Ĉiu homo, kiu portas la deziron de bono, preterkonscie elvokas bonajn Spiritojn, tiel same, kiel, el la deziro de malbono kaj por malbonaj intencoj, li elvokas la malicajn."

IV. Ĉu iu, kiu, havante magnetan forton, kredus la partoprenon de la Spiritoj, agus pli efike?

"Li farus aferojn, kiujn vi konsiderus mirakloj."

V. Ĉu iuj homoj efektive havas la naturdoton

resanigi per nura ektuŝo, ne uzante magnetajn manmovojn?

“Certe; ĉu vi ne havas pri tio grandnombrajn ekzemplojn?”

VI. Ĉu en tiu okazo ekzistas magneta agado aŭ nur influo de la Spirito?

“Ambaŭ. Tiaj homoj estas efektivaj mediumoj, ĉar ili agas sub la influo de la Spiritoj, sed tio ne signifas, ke ili estas kvazaŭ skribivaj mediumoj, kiel vi tiajn komprenas.”

VII. Ĉu tiu povo estas transigebla?

“Ne la povo, sed la konado de la aferoj necesaj por ĝin efektivigi, se oni ĝin posedas. Ekzistas tiaj, kiuj ne konscius, ke ili havas tiun povon, se ili ne kredus, ke ĝi estas al ili transigita.”

VIII. Ĉu oni povas rebonigi la sanon per sola preĝado?

“Jes, kelkafoje, se Dio ĝin permesas; sed eble la bono de la malsanulo konsistas en plua suferado, kaj tiam vi pensas, ke via preĝo ne estas aŭdita.”

IX. Ĉu por tio ekzistas iaj preĝoformuloj pli efikaj ol aliaj?

“Nur superstiĉo povas alligi ian efikecon al certaj paroloj, kaj nur malkleraj aŭ mensogemaj Spiritoj povas nutri tiajn ideojn, preskribante formulojn. Tamen povas okazi, ke, ĉe homoj ne instruitaj kaj nekapablaj kompreni la pure spiritajn aferojn, la uzo de iu formulo kunhelpas, por havigi al ili pli da konfido; en ĉi tiu okazo ne la formulo estas efika, sed la fido, kiu pligrandiĝas dank’al la ideo ligita kun la uzo de la formulo.”

## 8. Mediumoj-pneŭmatografoj

**177.** Oni tiel nomas tiujn mediumojn kapablajn ricevi rektan skribadon, kio ne estas konsentita al ĉiuj skribivaj mediumoj. Ĉi tiu kapableco ĝis hodiaŭ estas tre malofta; ĝi kredeble disvolviĝas per ekzerciĝado; sed, kiel mi diris, ĝia praktika utileco limiĝas je evidenta konstato de la partopreno de iu kaŝita potenco en la manifestiĝoj. Nur la sperto povas sciigi iun, ĉu li ĝin

posedas; oni do povas provi kaj cetere oni povas pri tio demandi iun protektantan Spiriton per la aliaj komunikrimedoj. Laŭ la pli aŭ malpli granda povo de la mediumo oni ricevas nurajn strekojn, literojn, vortojn, frazojn, eĉ tutajn paĝojn. Ordinare sufiĉas kuŝigi falditan folion da papero sur ia ajn loko aŭ alia, difinita de la Spirito, dum dek minutoj aŭ kvaronhoro, iafoje pli longe. Preĝo kaj enmemiĝo estas esencaj kondiĉoj; tial oni povas konsideri ne eble ricevi ion en kunsido de homoj nemulte seriozaj aŭ ne portantaj simpatiajn kaj favorajn sentojn. (Vd. la teorion de la rekta skribado, Ĉapitro VIII, **Pri la laborejo de la nevidebla mondo**, §§ 127 k. sekv., kaj Ĉapitron XII, **Pneŭmatografio**.)

Mi en speciala maniero traktos pri la skribivaj mediumoj en la sekvantaj ĉapitroj.

———————

ĈAPITRO XV

# PRI LA SKRIBIVAJ AŬ PSIKOGRAFAJ MEDIUMOJ

*Mediumoj mekanikaj, intuiciaj, duonmekanikaj, inspirataj aŭ pretervolaj, antaŭsentemaj.*

**178.** El ĉiuj komunikrimedoj la manskribado estas la plej simpla, la plej oportuna kaj precipe la plej kompleta. Al ĝi devas ja strebi ĉiuj klopodoj, ĉar ĝi ebligas starigi kun la Spiritoj rilatojn tiel konstantajn kaj regulajn, kiel tiuj ekzistantaj inter ni. Al ĝi oni devas sin doni des pli diligente, ĉar ĝuste per ĝi la Spiritoj la plej bone elmontras sian naturon kaj la gradon de sia perfekteco aŭ malsupereco. Pro la facileco esprimi sin per ĝi, ili konigas al ni siajn intimajn pensojn kaj ebligas al ni juĝi ilin kaj taksi ilian indon. Krom tio la kapableco skribi estas la plej facile disvolvebla por mediumo per ekzerciĝado.

## Mekanikaj mediumoj

**179.** Kiu ekzamenas iujn efikojn, okazantajn en la movadoj de la tablo, de la korbo aŭ de la tabuleto, tiu ne povas dubi pri ia rekta agado de Spirito sur tiujn objektojn. La korbo iafoje agitiĝas tiel forte, ke ĝi deliberiĝas de la manoj de la mediumo; aliajn fojojn ĝi direktiĝas al certaj ĉeestantoj, por ilin bati; aliajn fojojn ĝiaj movoj elmontras aman senton. Tio sama okazas al la krajono, tenata de la mano: ĝi ofte estas krude ĵetata malproksimen, aŭ la mano, kiel la korbo, konvulsie agitiĝas kaj kolere frapas la tablon, eĉ tiam, kiam

la mediumo estas plej trankvila, mirante, ke li sin ne regas. Mi preterpase diru, ke tiaj efikoj ĉiam signas la ĉeeston de neperfektaj Spiritoj; la efektive superaj Spiritoj estas konstante trankvilaj, dignaj kaj bondezirantaj; se ili ne estas konvene aŭskultataj, tiam ili foriras, kaj aliaj ilin anstataŭas. La Spirito povas do rekte esprimi sian penson, ĉu per la movado de iu objekto, al kiu la mano de la mediumo servas nur kiel apogpunkto, ĉu per sia agado sur la manon mem.

Rekte agante sur la manon, la Spirito donas al ĝi impulson, tute ne dependantan de la volo de la mediumo. Ĝi moviĝas seninterrompe kaj malgraŭ la mediumo tiel longe, kiel la Spirito havas ion dirotan, kaj haltas, kiam la Spirito diris sian lastan vorton.

Kio en ĉi tiu okazo karakterizas la fenomenon, tio estas, ke la mediumo absolute ne konscias, kion li skribas; en ĉi tiu okazo la absoluta senkonscio difinas la tiel nomatajn **pasivajn** aŭ **mekanikajn mediumojn**. Ĉi tiu kapableco estas altvalora pro tio, ĉar ĝi povas allasi nenian dubon pri la sendepenceco de la menso de la skribanto.

## Intuiciaj mediumoj

**180.** La transsendo de la penso fariĝas ankaŭ per la Spirito de la mediumo, aŭ pli bone, per lia animo, ĉar tiel ni nomas la Spiriton enkarniĝintan. La fremda Spirito, en ĉi tiu okazo, ne agas sur la manon, por igi ĝin skribi; li ĝin ne ekprenas, ĝin ne direktas: li agas sur la animon, kun kiu li identiĝas. La animo, sub tiu instigo, direktas la manon, kaj la mano direktas la krajonon. Ni ĉi tie rimarku gravan aferon, nome, ke la fremda Spirito ne substituiĝas al la animo, ĉar li ĝin ne povas deloki: li ĝin superregas sen ĝia scio, li trudas al ĝi sian volon. En ĉi tiuj kondiĉoj la rolo de la animo ne estas absolute pasiva: ĝi ricevas la penson de la fremda Spirito kaj ĝin vortigas. En ĉi tiu situacio la mediumo konscias tion, kion li skribas, kvankam tio ne estas lia propra penso. Jen kion oni nomas **intuicia mediumo**.

Se tiel estas, oni diros, nenio pruvas, ke tio estas ia fremda Spirito, kiu skribas, sed ne tiu de la mediumo. Efektive, la distingo estas iafoje tre malfacila, sed okazeble tio estas nemulte grava. Oni povas tamen rekoni la inspiritan penson per tio, ke ĝi neniam estas antaŭteksita: ĝi elkrepuskiĝas sammomente kiel la skribado, kaj ofte estas kontraŭa al la antaŭa ideo, kiun oni faris al si; ĝi eĉ povas troviĝi ekster la scioj kaj la kapabloj de la mediumo.

La rolo de mekanika mediumo estas tiu de maŝino; intuicia mediumo agas same, kiel interpretisto. Ĉi tiu, efektive, por transigi la penson, devas ĝin kompreni, ĝin iel alproprigi al si, por ĝin fidele vortigi, kaj tamen tiu penso estas ne lia: ĝi faras nenion, krom trapasi lian cerbon. Jen, ĝuste, la rolo de intuicia mediumo.

## Duonmekanikaj mediumoj

**181.** Ĉe la pure mekanika mediumo la movado de la mano ne dependas de lia volo; ĉe la intuicia mediumo tiu movado estas vola. La duonmekanika mediumo havas samtempe ambaŭ karakterojn: li sentas, ke lia mano estas impulsata kontraŭ lia volo, sed li samtempe konscias tion, kion li skribas laŭgrade, kiel la vortoj kunmetiĝas. Ĉe la unua la penso sekvas la skribadon; ĉe la dua ĝi ĉi tiun antaŭas; ĉe la tria, ĝi ĉi tiun akompanas. Ĉi tiuj lastaj mediumoj estas la plej multenombraj.

## Inspirataj mediumoj

**182.** Ĉiu, kiu, ĉu en sia normala stato, ĉu en ekstazo, ricevas tra la menso komunikaĵojn fremdajn al liaj antaŭaj ideoj, povas esti enkalkulita en la kategorion de inspirataj mediumoj. Ĉi tio estas, kiel oni vidas, variaĵo de la intuicia mediumeco, kun tiu diferenco, ke la partopreno de ia kaŝita potenco tie estas ankoraŭ multe malpli sentebla, ĉar, ĉe la inspirato, estas ankoraŭ pli malfacile distingi la penson propran de la penso sugestita. Kio karakterizas la inspiritan penson, tio estas precipe ĝia spontaneeco. La inspiro venas al ni de la

Spiritoj, kiuj influas nin por bono aŭ malbono, sed ĝi prefere estas faro de tiuj, kiuj deziras nian bonon kaj kies konsilojn ni tre ofte erare ne sekvas. Ĝi aplikiĝas al ĉiaj cirkonstancoj de la vivo, ĉiam, kiam oni volas fari ian decidon. Laŭ ĉi tiu aspekto oni povas diri, ke ĉiuj estas mediumoj, ĉar neniu ekzistas, kiu ne havas siajn protektantajn kaj familiarajn Spiritojn, kiuj ĉion eblan faras, por enblovi en la menson de siaj protektatoj edifajn pensojn. Se ĉiu estus profunde konvinkita pri ĉi tiu veraĵo, li pli ofte petus la inspiron de sia gardanta anĝelo en la momentoj, kiam li ne scias, kion diri aŭ kion fari. Oni do **fervore kaj konfide** lin elvoku en okazoj de bezono, kaj oni plej ofte miros pri la pensoj, kiuj kvazaŭ sorĉe elŝprucas, ĉu la afero estas pri ia farenda decido, ĉu pri io, kion oni devas verki. Se nenia penso ekaperas, tiel estas, ĉar oni devas atendi. La pruvo, ke la veninta penso estas ja ne de la persono mem, estas tio, ke se ĝi jam troviĝus en lia menso, li do ĝin ĉiam mastrus, kaj motivo ne ekzistus, kial ĝi ne manifestiĝus laŭ la volo de tiu persono. Kiu ne estas, blinda, tiu bezonas nur malfermi la okulojn, por vidi ĉiam, kiam li volas; same, kiu havas ideojn proprajn, tiu ilin ĉiam disponas; se ili ne venas al li laŭ lia volo, tiel estas tial, ke li ja devas ilin ĉerpi aliloke, ol en la profundo de sia "mi".

Oni povas alkalkuli al ĉi tiu kategorio ankaŭ tiujn homojn, kiuj, ne dotitaj per ia eksterordinara inteligenteco kaj ne elirante el sia normala stato, ekhavas fulmbrilojn de intelekta klarvideco, kiu momente donas al ili nekutiman facilecon de konceptado kaj parolado, kaj, en iuj okazoj, la antaŭsenton de okazaĵoj. Ĉe tiuj momentoj, kiujn oni prave nomas de inspiro, la pensoj abundas, sekvas unuj post aliaj, interligiĝas, por tiel diri, per si mem, per pretervola, kvazaŭ febra impulsado. Ŝajnas al ni, ke ia supera inteligento venas helpi nin kaj ke nia spirito estas libera de ia ŝarĝo.

**183.** La ĉiaspecaj geniuloj: artistoj, scienculoj, literatoroj, estas sendube progresintaj Spiritoj, kapablaj mem kompreni kaj koncepti grandajn aferojn; nu, ĝuste

tial, ke ili estas juĝataj kapablaj, la Spiritoj, kiuj volas la plenumon de iuj laboraĵoj, inspiras al ili la necesajn pensojn; kaj tiel ili plej ofte estas **nekonsciaj mediumoj**. Ili tamen havas ian neklaran intuicion pri ia fremda helpo, ĉar ja kiu vokas inspiron, tiu faras nenion alian, ol elvokon: se li ne esperus, ke li estus aŭskultata, kial do li tiel ofte ekkrius: "Mia bona genio, venu helpe al mi!"?

La sekvantaj respondoj konfirmas ĉi tiun aserton.

— Kio estas la unua kaŭzo de la inspiro?

"Spirito, kiu komunikiĝas per la pensado."

— Ĉu la inspiro ne celas nur la malkaŝon de grandaj aferoj?

"Ne, ĝi ofte rilatas kun la plej ordinaraj cirkonstancoj de la vivo. Ekzemple, vi volas iri ien: ia sekreta voĉo diras al vi, ke vi ne iru, ĉar danĝero vin spionas; aŭ ĝi konsilas al vi fari ion, pri kio vi ne pensis: tio estas inspiro. Tre malmulte da homoj ne estis pli aŭ malpli inspiritaj ĉe iuj momentoj."

— Ĉu iu verkisto, aŭ pentristo, iu muzikisto, ekzemple, ĉe la momentoj de inspiro povus esti rigardata kiel mediumo?

"Jes, ĉar ĉe tiuj momentoj lia animo estas pli libera, kvazaŭ malligiĝinta de la materio; ĝi reakiras parton de siaj kapabloj de Spirito kaj pli facile ricevas la komunikaĵojn de aliaj Spiritoj, ĝin inspirantaj."

## Antaŭsentemaj mediumoj

**184.** Antaŭsento estas malpreciza intuicio pri estontaj okazaĵoj. Ĉi tiu kapablo ekzistas ĉe iuj homoj en pli aŭ malpli forta grado. Ĝi povas origini el ia duobla vidado, kiu ebligas al tiuj homoj duonvidi la sekvojn de la nuntempaj aferoj kaj la interrilaton de la okazaĵoj; sed ĝi ofte estas ia formo de kaŝitaj komunikaĵoj, kaj precipe en ĉi tiu okazo oni povas nomi tiujn, kiuj ĝin posedas, **antaŭsentemaj mediumoj**, kiuj estas variaĵo de la **inspirataj mediumoj**.

———————

ĈAPITRO XVI

# PRI LA SPECIALAJ MEDIUMOJ

*Specialaj kapablecoj de la mediumoj. Sinoptika tabelo de la diversaj specoj de mediumoj*

**185.** Krom la kategorioj da mediumoj, kiujn mi ĵus denombris, la mediumeco prezentas senlimajn nuancojn, al kiuj apartenas la tiel nomataj "specialaj mediumoj", kun ankoraŭ ne difinitaj kapablecoj, ne enkalkulante la ecojn kaj la sciojn de la manifestiĝanta Spirito.

La karaktero de la komunikaĵoj ĉiam rilatas al la naturo de la Spirito kaj portas la stampon de lia altrangeco aŭ malsupereco, de lia klereco aŭ senklereco; sed ĉe egaleco de meritoj, el la hierarkia vidpunkto, nekontesteble ekzistas en li ia inklino okupi sin pri iu afero prefere, ol pri alia, ekzemple: la frapantaj Spiritoj neniam eliras el la rondo de fizikaj manifestiĝoj; kaj inter tiuj, kiuj donas intelektajn manifestiĝojn, ekzistas Spiritoj poetoj, muzikistoj, desegnistoj, moralistoj, scienculoj, kuracistoj k. a. Mi parolas pri mezklasaj Spiritoj, ĉar, kiam ili atingas certan ŝtupon, la kapablecoj kuniĝas en la unueco de la perfekteco. Sed, krom la kapableco de la Spirito, ekzistas ankaŭ tiu de la mediumo, kiu estas por la manifestiĝanto ilo pli aŭ malpli oportuna, pli aŭ malpli fleksebla, en kiu li trovas specialajn ecojn, kiujn ni ne povas taksi.

Ni faru komparon. Tre lerta muzikisto havas en sia dispono plurajn violonojn, kiuj ĉiuj, por la vulgara homo, estas bonaj instrumentoj, sed tre diferencaj inter si por sperta artisto; ĉi tiu kaptas ĉe ili ekstreme delikatajn nuancojn, laŭ kiuj li elektas unujn kaj flanken

metas aliajn, nuancojn, kiujn li perceptas intuicie prefere, ol kiel li povus ilin difini.

Tio sama okazas rilate la mediumojn. Ĉe egalaj kondiĉoj koncerne la mediuman potencon, la Spirito preferas unu aŭ alian, laŭ la speco de komunikaĵo, kiun li volas fari. Tiel ekzemple kelkaj homoj skribas, kiel mediumoj, mirindajn poeziaĵojn, kvankam, en normalaj kondiĉoj, ili neniam povis aŭ sciis verki du versojn; aliaj, kontraŭe, estas poetoj, sed, kiel mediumoj, neniam povis skribi alie, ol en prozo, malgraŭ sia deziro skribi poeziaĵojn. Same fariĝas pri desegno, muziko k. a. Kelkaj, ne posedante mem sciencajn sciojn, ĝuas kapablecon pli specialan por ricevi sciencajn komunikaĵojn: aliaj taŭgas por historiaj temoj; ankoraŭ aliaj pli facile servas kiel interpretantoj al moralinstruaj Spiritoj. Unuvorte, kia ajn la flekseblеco de mediumo, la komunikaĵoj, kiujn li la plej facile ricevas, ordinare portas stampon specialan; kelkaj eĉ ne foriĝas de certa rondo da ideoj, kaj kiam ili ĝin forlasas, ili ricevas nur nekompletajn, lakonajn, ofte mensogajn komunikaĵojn. Ekster la kaŭzoj de kapableco la Spiritoj komunikiĝas ankaŭ, pli aŭ malpli volonte, per tia aŭ tia peranto, laŭ siaj simpatioj; tiel, ĉe egalaj kondiĉoj, la sama Spirito sin multe pli klare esprimas per iuj mediumoj sole nur tial, ke tiuj pli bone konvenas al li.

**186.** Oni do erarus, se, nur pro tio, ke oni disponas bonan mediumon, eĉ se ĉi tiu plej facile skribus, oni pretendus ricevi per li bonajn komunikaĵojn ĉiaspecajn. La unua kondiĉo nekontesteble estas certiĝi pri la fonto, el kiu ili originas, t. e. pri la ecoj de la inspiranta Spirito; sed ne estas malpli necese konsideri la kvalitojn de la ilo, kiun oni donas al la Spirito. Estas do necese esplori la naturon de la mediumo same, kiel oni esploras la naturon de la Spirito, ĉar tio estas la du elementoj esencaj por la atingo de kontentiga rezultato. Ekzistas tria elemento, kiu ludas egale gravan rolon: tiu estas la intenco, la intima penso, la pli aŭ malpli laŭdinda sento de la eldemandanto, kaj ĉi tion oni ja komprenas, t. e.: **Por ke iu komunikaĵo estu bona, estas necese, ke**

**ĝi venu de bona Spirito; por ke tiu bona Spirito POVU dikti ĝin, li bezonas bonan perilon; por ke li VOLU dikti ĝin, estas necese, ke la celo konvenu al li**. Legante en la penso, la Spirito pesas, ĉu la proponita demando indas seriozan respondon kaj ĉu la proponinto indas ricevi ĝin; alie li ne perdas sian tempon, ĵetante bonajn semojn sur ŝtonojn, kaj tiam frivolaj kaj mokemaj Spiritoj enpaŝas, ĉar, malmulte zorgante pri la vero, ili ĝin ne rigardas tiel respekte kaj estas sufiĉe senskrupulaj, ĉu pri la celo, ĉu pri la rimedoj.

Mi ĉi tie resumos la ĉefajn specojn de mediumeco, iamaniere aranĝante sinoptikan tabelon de ĉiuj, inkluzive de tiuj, kiujn mi pritraktis en la antaŭaj ĉapitroj, kaj indikante la paragrafojn, en kiuj ili estis detale prezentitaj.

Mi grupigis la diversajn specojn de mediumoj laŭ la analogeco de kaŭzoj kaj efikoj, sed tia klasigo havas nenion absolutan. Kelkaj renkontiĝas ofte; aliaj, kontraŭe, estas maloftaj kaj eĉ esceptaj, kion mi havos la zorgon mencii. Ĉiujn ĉi tiujn lastajn informojn donis al mi la Spiritoj mem, kiuj ja tiun tabelon reviziis kun aparta skrupulo kaj kompletigis per multenombraj rimarkoj kaj novaj kategorioj en tia maniero, ke tiu tabelo estas, por tiel diri, verko de ili. Kiam mi opiniis, ke mi devas reliefigi iliajn tekstajn rimarkojn, mi ĉi tiujn signigis per citiloj. Tiujn rimarkojn pleje faris **Erasto** kaj **Sokrato**.

**187.** Oni povas dividi la mediumojn en du grandajn kategoriojn:

**Mediumoj por fizikaj efikoj**: tiuj, kiuj havas la kapablon okazigi materiajn efikojn aŭ videblajn manifestiĝojn. (§ 160.)

**Mediumoj por intelektaj efikoj**: tiuj, kiuj taŭgas pli speciale por ricevi kaj konigi intelektajn komunikaĵojn. (§§ 65 k. sekv.)

Ĉiuj ceteraj specoj pli aŭ malpli rekte rilatas kun ĉi tiuj du kategorioj; kelkaj apartenas al ambaŭ. Se oni analizos la diversajn fenomenojn, okazantajn sub la mediuma influo, oni vidos, ke en ili ĉiuj ekzistas ia fi-

zika efiko kaj ke, samtempe kiel la fizikaj efikoj, plej ofte fariĝas iu inteligenta efiko. La limo inter la du kategorioj kelkafoje estas malfacile strekebla, sed tio estas neniel grava. Sub la nomo **mediumoj por intelektaj efikoj** mi komprenas tiujn, kiuj povas pli speciale servi kiel perantoj por la regulaj kaj kontinuaj komunikaĵoj. (§ 133.)

### 188. Variaĵoj komunaj al ĉiuj specoj de mediumeco

**Mediumoj sensivaj**: homoj kapablaj senti la ĉeeston de Spiritoj per impreso ĝenerala aŭ loka, malpreciza aŭ materia. La plimulto el ili distingas inter la bonaj kaj la malicaj Spiritoj laŭ la kvalito de la impreso. (§ 163.)

"La delikataj kaj tre sensivaj mediumoj devas deteni sin de komunikiĝo kun Spiritoj krudmanieraj aŭ farantaj malagrablan impreson, pro la el tio rezultanta laciĝo."

**Mediumoj naturaj aŭ preterkonsciaj**: tiuj, per kiuj la fenomenoj okazas spontanee, sen ia partopreno de ilia volo, kaj plej ofte sen ilia konscio.

**Mediumoj memagantaj**: tiuj, kiuj havas la povon okazigi la fenomenojn per agado de sia volo. (§ 160.)

"Eĉ se tre forta tiu volo, ili povas fari nenion, se la Spiritoj rifuzas sian partoprenon, kio pruvas la kunhelpon de ia fremda potenco."

### 189. Variaĵoj specialaj por la fizikaj efikoj

**Mediumoj-tiptologoj**: tiuj, sub kies influo okazas bruoj kaj frapoj. Tre ordinara variaĵo, kun aŭ sen la partopreno de la volo.

**Mediumoj-motoroj**: tiuj, kiuj okazigas la movadon de inertaj korpoj. Tre ordinaraj. (§ 61.)

**Mediumoj por transportoj kaj levoj**: tiuj, kiuj okazigas transportojn tra la aero kaj levojn de inertaj korpoj en la aeron sen apogo. Kelkaj povas levi sin mem. Pli aŭ malpli maloftaj, laŭ la amplekso de la fenomeno;

tre malmultaj tiuj, kiuj sin levas mem. (§§ 75 k. sekv.; § 80.)

**Mediumoj por muzikaj efikoj**: ĉi tiuj okazigas ludadon sur iuj muzikaj instrumentoj sen ia kontakto. Tre malmultaj. (§ 74, demando 24.)

**Mediumoj por aperoj**: tiuj, kiuj povas okazigi fluidecajn aŭ tuŝeblajn aperaĵojn, videblajn por la ĉeestantoj. Tre esceptaj. (§ 100, demando 27; § 104.) (*)

**Mediumoj por alportoj**: tiuj, kiuj povas servi kiel helpantoj al la Spiritoj, por alporti materiajn objektojn. Variaĵo de la mediumoj-motoroj kaj de la mediumoj por delokado. Esceptaj. (§ 96.)

**Mediumoj en mallumo**: tiuj, per kiuj certaj fizikaj efikoj fariĝas nur en mallumo. Jen la respondo de Spirito al la demando scii, ĉu oni povas konsideri ĉi tiujn mediumojn ia variaĵo:

"Oni povas sendube fari el ili ian specialaĵon, sed ĉi tiu fenomeno rilatas prefere kun la kondiĉoj de la ejo, ol kun la naturo de la mediumo aŭ de la Spiritoj; mi devas aldiri, ke kelkaj mediumoj estas liberaj de tiu influo de la medio kaj ke la plimulto el la mediumoj, agantaj en mallumo, povus per ekzerciĝado atingi la kapablon agi tiel bone en lumo, kiel en mallumo. Ĉi tiu variaĵo de mediumoj estas nemultenombra. Kaj, estas necese ja diri, dank'al ĉi tiu kondiĉo, kiu plene ebligas la uzadon de artifikoj, de la ventroparolado kaj de akustikaj tuboj, ĉarlatanoj tre ofte ekspluatis la homan kredemon, farante sin rigardataj kiel mediumoj, por rikolti iaj kelke da groŝoj. Sed kio do grava ĝi estas? la ĉambraj ĵonglistoj, same kiel la placaj ĵonglistoj, estos kruele senmaskigitaj, kaj la Spiritoj montros al ili, ke ne bona afero estas sin enmiksi en iliajn laborojn. Jes ja, mi ripetas, iuj ĉarlatanoj ricevos sufiĉe severan punon, por igi ilin abomeni la oficon de malveraj mediumoj. Cetere ĉio ĉi nelonge daŭros.

ERASTO."

(*) Tiaj mediumoj estas hodiaŭ nomataj "mediumoj por materiigoj". — *La Trad.*

**Mediumoj-pneŭmatografoj**: tiuj, per kiuj fariĝas la rekta skribado. Fenomeno tre malofta kaj precipe tre facile imitebla per ĵonglado. (§ 177.)

*Rimarko.* La Spiritoj, kontraŭ mia opinio, insistis, ke la rekta skribado apartenas al la fizikaj fenomenoj, ĉar, ili diris: "La inteligentaj efikoj estas tiuj, por kiuj la Spirito uzas cerbajn materialojn de la mediumo, kio ne estas la okazo ĉe la rekta skribado; la agado de la mediumo ĉi tie estas tute materia, dum ĉe la skribiva mediumo, eĉ se tute mekanika, la cerbo ĉiam ludas aktivan rolon."

**Mediumoj sanigivaj**: tiuj, kiuj havas la povon sanigi aŭ malplisuferigi malsanulojn per la sola surmeto de la manoj aŭ per preĝado.

"Ĉi tiu kapableco ne estas esence mediuma: posedas ĝin ĉiaj veraj kredantoj, ĉu mediumoj aŭ ne; ĝi ofte estas nur ekzaltiĝo de la magneta forto, plipotencigita, ĉe bezono, de la kunhelpo de bonaj Spiritoj." (§ 175.)

**Mediumoj ekscitantaj**: homoj, havantaj la povon per sia influo kreskigi ĉe aliaj la kapablon skribi.

"Tio estas prefere ia magnetiza efiko, ol okazo de ĝustasenca mediumeco, ĉar nenio pruvas la partoprenon de iu Spirito. Ĉiuokaze ĝi apartenas al la kadro de la fizikaj efikoj. (Vd. la ĉapitron **Pri la formado de mediumoj**.)

### 190. Mediumoj specialaj por intelektaj efikoj. Diversaj kapablecoj

**Mediumoj aŭdivaj**: tiuj, kiuj aŭdas la Spiritojn. Tre ordinaraj. (§ 165.)

"Multaj prezentas al si, ke ili aŭdas tion, kio estas nur en ilia imagemo."

**Mediumoj parolivaj**: tiuj, kiuj parolas sub la influo de la Spiritoj. Tre ordinaraj. (§ 166.)

**Mediumoj vidivaj**: tiuj, kiuj, ne dormante, vidas Spiritojn. La okaza vidado je iu Spirito en ia aparta cirkonstanco estas tre ofta, sed vidi Spiritojn kutime aŭ laŭvole, sendistinge, estas escepta afero. (§ 167.)

"Tio estas kapableco, kiun kontraŭas la nuna stato

de la organoj; tial estas saĝe ne ĉiam plenfide kredi tiujn, kiuj asertas, ke ili vidas Spiritojn."

**Mediumoj inspirataj**: tiuj, en kiujn, plej ofte sen ilia konscio, la Spiritoj enblovas pensojn, ĉu pri la ordinaraj aferoj de la vivo, ĉu pri la grandaj verkoj de la intelekto. (§ 182.)

**Mediumoj antaŭsentemaj**: homoj, kiuj en iuj cirkonstancoj havas ian malprecizan intuicion pri ordinaraj estontaj okazaĵoj. (§ 184.)

**Mediumoj-profetoj**: variaĵo de la mediumoj inspirataj aŭ antaŭsentemaj; kun la permeso de Dio ili ricevas, pli precize ol la antaŭsentemaj mediumoj, la revelacion de estontaj ĝeneralinteresaj aferoj, por kies diskonigo al la homoj ili estas komisiitaj, celante ties instruadon.

"Ekzistas ja profetoj veraj, sed multe pli da malveraj, kiuj prenas la revojn de sia imagemo kiel revelaciojn, se nur ili ne estas trompistoj, kiuj volas esti rigardataj kiel tiaj el ambicio." (Vd. en "La Libro de la Spiritoj", § 624: **Kia estas la vera profeto** ?)

**Mediumoj somnambulaj**: tiuj, kiuj en somnambulisma stato estas helpataj de Spiritoj. (§ 172.)

**Mediumoj ekstazantaj**: tiuj, kiuj en ekstazo ricevas revelaciojn de la Spiritoj.

"Multe da ekstazuloj estas ludilo de sia propra imagemo kaj de mokemaj Spiritoj, kiuj ekspluatas ilian ekzaltiĝon. Tre malmultaj estas tiuj, kiuj meritas absolutan konfidon.

**Mediumoj-pentristoj kaj mediumoj-desegnistoj**: tiuj, kiuj pentras, aŭ desegnas, sub la influo de Spiritoj. Mi parolas pri tiuj, kiuj ricevas aferojn seriozajn, ĉar oni ne povus tiel nomi iujn mediumojn, kiujn mokemaj Spiritoj igas verki groteskajn fuŝaĵojn, kiuj diskreditus la plej mallertan lernejanon.

La frivolaj Spiritoj estas imitemaj. En la tempo, kiam aperis la rimarkindaj desegnaĵoj pri Jupitero, montriĝis granda nombro da sin titolantaj mediumoj-desegnistoj, pri kiuj mokemaj Spiritoj sin amuzis, instigante ilin fari la plej ridindajn bildojn. Unu el ili, inter aliaj, dezirante eklipsi la desegnojn pri Jupitero, almenaŭ laŭ la amplekso, se ne laŭ la kvalito, igis mediumon desegni

monumenton, kiu okupis sufiĉe grandan nombron da folioj da papero, por atingi la altecon de du etaĝoj. Multe da aliaj instigis fari supozatajn portretojn, kiuj estis efektivaj karikaturoj. (**Revue Spirite**, Aŭgusto 1858.)

**Mediumoj-muzikistoj**: tiuj, kiuj ludas, komponas aŭ skribas muzikaĵojn sub la influo de la Spiritoj. Ekzistas mediumoj-muzikistoj mekanikaj, duonmekanikaj, intuiciaj kaj inspirataj, kiaj ekzistas por literaturaj komunikaĵoj. (Vd.: **Mediumoj por muzikaj efikoj**.)

## VARIAĴOJ DE LA SKRIBIVAJ MEDIUMOJ

### 191. 1-e: Laŭ la maniero de plenumado

**Mediumoj skribivaj aŭ psikografaj**: tiuj, kiuj havas la kapablon skribi mem sub la influo de la Spiritoj.

**Mediumoj skribivaj mekanikaj**: tiuj, kies mano ricevas pretervolan impulson kaj kiuj tute ne konscias tion, kion ili skribas. Tre malmultaj. (§ 179.)

**Mediumoj duonmekanikaj**: tiuj, kies mano moviĝas pretervole, sed kiuj tuj konscias la vortojn kaj frazojn, laŭgrade kiel ili skribas. La plej multaj. (§ 181.)

**Mediumoj intuiciaj**: tiuj, kun kiuj la Spiritoj komunikiĝas per la pensado kaj kies mano estas direktata laŭ la volo de la mediumo. Ili diferencas de la inspirataj mediumoj per tio, ke ĉi tiuj lastaj ne bezonas skribi, dum la intuicia mediumo tuj skribas la penson, al li sugestitan, pri iu difinita kaj elektita temo.

"Ili estas tre ordinaraj, sed ankaŭ tre elmetitaj al eraroj, ĉar ili ofte ne povas distingi tion, kio venas de la Spiritoj, de tio, kio estas ilia propra kreaĵo."

**Mediumoj diverseskribaj**: tiuj, kies skribo ŝanĝiĝas laŭ la komunikiĝanta Spirito aŭ kapablaj reprodukti la skriban karakteron de la Spirito, kiam homo. La unua okazo estas tre ordinara; la dua, tiu de la identeco de skribo, estas pli malofta. (§ 219.)

**Mediumoj-poliglotoj**: tiuj, kiuj kapablas paroli aŭ skribi en lingvoj fremdaj por ili. Tre malmultaj.

**Mediumoj analfabetaj**: tiuj, kiuj kiel mediumoj, skribas, ne sciante legi nek skribi en la ordinara stato.

"Pli malmultaj ol la antaŭaj: estas pli granda materiala malfacileco por venki."

### 192. 2-e: Laŭ la disvolvo de la kapableco

**Mediumoj novicaj**: tiuj, kies kapableco ankoraŭ ne estas tute elvolviĝinta kaj al kiuj mankas la necesa sperto.

**Mediumoj neproduktivaj**: tiuj, kiuj sukcesas ricevi nur sensignifajn aferojn, unusilabajn vortojn, strekojn aŭ literojn sen interligo. (Vd. la ĉapitron **Pri la formado de mediumoj**.)

**Mediumoj maturaj aŭ plenlertaj**: tiuj, kies mediuma kapableco estas plene elvolviĝinta kaj kiuj facile, rapide kaj senhezite transsciigas la komunikiĝojn. Oni komprenas, ke ĉi tiun rezultaton la mediumo povas atingi nur per la kutimo, dum ĉe la **novicaj mediumoj** la komunikaĵoj estas malrapidaj kaj malfacilaj.

**Mediumoj lakonaj**: tiuj, kies komunikaĵoj, kvankam facile ricevataj, estas mallongaj kaj sen disvolvado.

**Mediumoj plenelvolvantaj**: la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas, havas la tutan amplekson kaj la tutan vastecon, kiujn oni povas atendi de perfekta verkisto.

"Ĉi tiu kapableco rezultas el la ekspansio kaj el la facileco de interkombiniĝo de la fluidaĵoj. La Spiritoj ilin serĉas, por pritrakti aferojn, kiuj ebligas vastan priparoladon."

**Mediumoj spertaj**: La facileco de skribado estas demando pri la kutimo, kiun oni ofte atingas post nelonge, dum la sperto estas la rezulto de serioza studado de ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj montriĝas en la praktikado de Spiritismo. La sperto havigas al la mediumo la takton necesan, por taksi la naturon de la manifestiĝantaj Spiritoj, juĝi iliajn bonajn aŭ malbonajn ecojn laŭ la plej detalaj signoj, malkovri la ruzecon de la trompemaj Spiritoj, kiuj sin maskas per ŝajno de vereco. Oni facile komprenas la gravecon de ĉi tiu kvalito, sen kiu ĉiuj ceteraj havas nenian realan utilecon. Malbone estas, ke multaj mediumoj intermiksas sperton, frukton de studado, kun kapableco, produkto de la fizika strukturo; ili

opinias sin jam majstroj, ĉar ili skribas facile; ili repuŝas de si ĉiujn konsilojn kaj fariĝas do kaptaĵo de mensogemaj kaj hipokritaj Spiritoj, kiuj ilin enlogas al si, flatante ilian fierecon. (Vd. Poste la ĉapitron **Pri la obsedo**.)

**Mediumoj flekseblaj**: tiuj, kies kapableco facile adaptiĝas al la diversaj specoj de komunikaĵoj kaj per kiuj ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj Spiritoj povas manifestiĝi, ĉu memvole, ĉu per elvoko.

"Ĉi tiu variaĵo de mediumoj estas tre proksima al tiu de la sensivaj mediumoj."

**Mediumoj ekskluzivaj**: tiuj, per kiuj manifestiĝas prefere unu sola Spirito, eĉ esceptante ĉiujn ceterajn kaj respondante por ĉiuj, vokitaj per la helpo de la mediumo.

"Ĉi tion ĉiam kaŭzas manko de fleksebleco. Se la Spirito estas bona, li povas ligiĝi al la mediumo pro simpatio kaj en laŭdinda intenco; se malbona, li ĉiam celas subigi la mediumon. Tio estas prefere malbonaĵo, ol bonaĵo, kaj tre proksima al obsedo." (Vd. la ĉapitron **Pri la obsedo**.)

**Mediumoj por elvokoj**: la flekseblaj mediumoj estas nature la plej taŭgaj por ĉi tiu speco de komunikado kaj por la demandoj pri detaloj, kiujn oni povas fari al la Spiritoj. En ĉi tiu rilato ekzistas tute specialaj mediumoj.

"Iliaj respondoj preskaŭ ĉiam enteniĝas en limita kadro, neakordigebla kun la elvolviĝado de la ĝeneralaj temoj."

**Mediumoj por spontaneaj diktaĵoj**: ĉi tiuj ricevas prefere spontaneajn komunikiĝojn de Spiritoj, sin prezentantaj nevokite. Kiam ĉi tiu kapableco estas speciala ĉe iu mediumo, tiam estas malfacile, iafoje eĉ ne eble, fari per li elvokon.

"Tamen ili estas pli bone ilprovizitaj, ol tiuj el la antaŭa klaso. Komprenu, ke tia ilaro signifas ĉi tie cerbajn materialojn, ĉar estas necesa ofte — mi eĉ diras ĉiam — pli granda kapitalo da inteligento por la spontaneaj diktaĵoj, ol por la elvokoj. Komprenu ĉi tie sub "spontaneaj diktaĵoj" tiujn, kiuj efektive meritas ĉi tiun nomon, sed ne iajn kelke da nekompletaj frazoj aŭ da

banalaj pensoj, nuraj stereotipaĵoj, ekzistantaj en ĉiuj homaj paperkolektoj.”

### 193. 3-e: Laŭ la speco kaj la specialeco de la komunikaĵoj

**Mediumoj-versistoj**: pli facile, ol aliaj, ili ricevas versajn komunikaĵojn. Tre ordinaraj por malbonaj versaĵoj; tre malmultaj por la bonaj.

**Mediumoj poetaj**: ne estante mem versaĵoj, la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas, havas ion vaporecan, sentimentalan; nenio tie elspiras krudecon. Pli ol aliaj, ili taŭgas por la esprimado de karesaj kaj koraj sentoj. Ĉio tie estas nebula; estus senutile peti ilin pri precizaj ideoj. Tre ordinaraj.

**Mediumoj pozitivaj**: iliaj komunikaĵoj ordinare havas stampon de neteco kaj precizeco, kiu tre taŭgas por plej etaj detaloj, por tute ĝustaj raportoj. Tre malmultaj.

**Mediumoj-literatoroj**: iliaj komunikaĵoj havas nek la malprecizecon de tiuj de la poetaj mediumoj, nek la vulgarecon de tiuj de la pozitivaj mediumoj, sed ili skribas sagace; ilia stilo estas korekta, eleganta kaj ofte rimarkinde elokventa.

**Mediumoj malkorektaj**: ili povas ricevi bonegajn aferojn, pensojn kun neriproĉinda moraleco, sed ilia stilo estas tedlonga, malkorekta, superŝarĝita per ripetoj kaj malĝustaj terminoj.

“La materia malkorekteco de la stilo estas ordinare ligita kun la manko de intelekta kulturo de la mediumo, kiu por la Spirito ne estas bona ilo en ĉi tiu rilato. Al tio la Spirito atribuas malmulte da graveco; por li la esenca afero estas ja la penso: li komisias al vi la konvenan formon. Tio sama ne okazas pri la malveraj kaj senlogikaj ideoj, kiujn iu komunikaĵo povas enteni; tiaj ideoj ĉiam estas signo de malsupereco de la manifestiĝanta Spirito.”

**Mediumoj-historiistoj**: tiuj, kiuj havas kapablecon specialan por historiaj disertacioj. Ĉi tiu kapableco, kiel ĉiuj ceteraj, ne dependas de la scioj de la mediumo, ĉar

oni renkontas seninstruajn homojn, eĉ infanojn, kiuj pritraktas temojn super ilia komprenpovo. Malofta variaĵo de la pozitivaj mediumoj.

**Mediumoj sciencaferaj**: mi ne diras mediumoj-scienculoj, ĉar ili povas esti tre malkleraj, sed malgraŭ tio ili tre speciale taŭgas por sciencrilataj komunikaĵoj.

**Mediumoj-receptistoj**: ilia specialaĵo estas pli facile servi kiel interpretantoj al la Spiritoj por medicinaj preskriboj. Oni ilin ne intermiksu kun la sanigivaj mediumoj, ĉar ili sole nur sciigas la penson de la Spirito, neniom influante en tio. Tre ordinaraj.

**Mediumoj religiaj**: ĉi tiuj ricevas prefere komunikaĵojn kun religia karaktero aŭ rilatajn al religiaj demandoj, malgraŭ siaj kredoj aŭ kutimoj.

**Mediumoj-filozofoj** kaj **mediumoj-moralistoj**: la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas, havas kiel temon ordinare demandojn pri moralo kaj alta filozofio. Tre ordinaraj koncerne la moralon.

"Ĉiuj ĉi nuancoj estas variaĵoj de kapablecoj de bonaj mediumoj. Rilate tiujn, kiuj havas kapablecon specialan por sciencaj, historiaj, medicinaj aŭ aliaj komunikiĝoj, super ilia nuna komprenpovo, konvinkiĝu, ke ili posedis tiujn sciojn en iu alia ekzistado, sciojn, kiuj restis ĉe ili en latenta stato, kiel parto de la cerbaj materialoj, necesaj al la manifestiĝanta Spirito; tiuj scioj estas la elementoj, kiuj al la Spirito faciligas la vojon por la komunikado de liaj propraj pensoj, ĉar ĉi tiuj mediumoj estas por li iloj pli inteligentaj kaj pli flekseblaj ol ia senklerulo.

ERASTO."

**Mediumoj, ricevantaj trivialajn kaj obscenajn komunikaĵojn**: ĉi tiuj vortoj montras la specon de komunikaĵoj, kiujn kelkaj mediumoj kutime ricevas, kaj la naturon de la Spiritoj, kiuj ilin enblovas. Kiu ajn studis la mondon de la Spiritoj sur ĉiuj ŝtupoj de ilia hierarkio, tiu scias, ke ekzistas Spiritoj, kies perverseco egalas tiun de la plej fiaj homoj kaj kiuj plezuras ĉe la esprimado de siaj pensoj per la plej krudaj vortoj. Aliaj, malpli abomenindaj, kontentiĝas per trivialaj esprimoj.

Estas kompreneble, ke tiuj mediumoj sopiras formeti de si la preferon de tiaj Spiritoj por ili kaj ke ili certe envias tiujn, kiuj en la ricevataj komunikaĵoj neniam skribas ian maldecan vorton. Estus necesaj stranga deflankiĝo de ideoj kaj fremdiĝo for de la natura saĝo, por ke oni kredu, ke tia esprimomaniero povus esti parolo de bonaj Spiritoj.

## 194. 4-e: Laŭ la fizikaj ecoj de la mediumo

**Mediumoj trankvilaj**: ili ĉiam skribas iom malrapide kaj sentante nenian agitiĝon.

**Mediumoj rapidaj**: ili skribas pli rapide, ol kiel ili memvole povus skribi en sia ordinara stato. La Spiritoj komunikiĝas per ili fulmrapide, kvazaŭ en tiuj mediumoj ekzistus ia superabundeco de fluidaĵo, kiu ebligas al ili tuj identiĝi kun la Spirito. Ĉi tiu kvalito iafoje prezentas malbonaĵon, nome, ke la rapideco de la skribado faras ĉi tiun tre malfacile legebla por alia persono, ol la mediumo mem.

"Ĝi estas eĉ tre laciga, ĉar ĝi senutile foruzigas tro multe da fluidaĵo."

**Mediumoj konvulsiaj**: ĉi tiuj sin tenas en kvazaŭ febra stato de superekscitiĝo; ilia mano kaj iafoje ilia tuta korpo agitiĝas en tremado, kiun ili ne povas regi. La nuna kaŭzo de ĉi tiu fakto sendube troviĝas en la organismo de la mediumoj, sed ĝi multe dependas ankaŭ de la naturo de la Spiritoj, kiuj komunikiĝas per ili: la bonaj kaj favoraj Spiritoj faras impreson ĉiam mildan kaj agrablan; la malicaj, kontraŭe, impresas ĝene.

"Ĉi tiuj mediumoj nur malofte devas uzi sian mediuman kapablecon, kies tro ofta uzado povus afekcii ilian nervan sistemon." (Ĉapitro **Pri la identeco de la Spiritoj**, distingo inter la bonaj kaj la malicaj Spiritoj.)

## 195. 5-e: Laŭ la moralaj ecoj de la mediumo

Mi ilin sendetale mencias, nur por ilin ne prisilenti kaj por kompletigi la tabelon, ĉar ili estos plene pritraktataj poste, en la ĉapitroj: **Pri la morala influo de**

**la mediumo, Pri la obsedo, Pri la identeco de la Spiritoj** kaj aliaj, sur kiujn mi turnas apartan atenton de la leganto. Tie oni vidos la influon, kiun la bonaj ecoj kaj la strangaĵoj de la mediumoj povas fari sur la garantion de la komunikaĵoj, kaj kiajn oni povas prave konsideri neperfektaj mediumoj aŭ bonaj mediumoj.

## 196. Neperfektaj mediumoj

**Mediumoj obseditaj**: tiuj, kiuj ne povas liberiĝi de tedaj kaj trompemaj Spiritoj, sed ne iluziiĝas.

**Mediumoj fascinitaj**: tiuj, kiuj estas iluziataj de trompemaj Spiritoj kaj iluziiĝas pri la karaktero de la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas.

**Mediumoj subjugigitaj**: tiuj, kiuj suferas moralan, ofte materialan, superpotencadon de malicaj Spiritoj.

**Mediumoj frivolaj**: tiuj, kiuj ne prenas serioze sian kapablecon, kaj uzas ĝin nur kiel amuzilon aŭ por bagatelaĵoj.

**Mediumoj indiferentaj**: tiuj, kiuj ĉerpas nenian moralan profiton el la instruoj, kiujn ili ricevas, kaj neniel modifas sian konduton kaj siajn kutimojn.

**Mediumoj tromemfidaj**: tiuj, kiuj flatas al si, ke nur ili solaj rilatas kun Superaj Spiritoj. Ili kredas sian neeraremon kaj rigardas kiel malsuperan kaj eraran ĉion, kio ne de ili venas.

**Mediumoj fieraj**: tiuj, kiuj sin gloras pro la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas; ili opinias, ke ili jam nenion havas por lerni en Spiritismo, kaj ne prenas por si la lecionojn, kiujn ili ofte ricevas de la Spiritoj. Ili ne kontentiĝas per la kapabloj, kiujn ili jam posedas: ili volas havi ilin ĉiujn.

**Mediumoj ofendiĝemaj**: variaĵo de la fieraj mediumoj. Ili ofendiĝas ĉe la kritikoj, kies objekto povas esti iliaj komunikaĵoj; ili koleras ĉe la plej malgranda kontraŭparolo, kaj, se ili montras tion, kion ili ricevis, tiel ili agas, por ke oni ĝin admiru, sed ne petante pri ĝi juĝon. Ĝenerale ili abomenas la homojn, kiuj ilin ne aplaŭdas senkondiĉe, kaj evitas kunvenojn, kie ili ne povas imponi kaj superregi.

“Lasu, ke ili pavu aliloke kaj serĉu pli komplezemajn orelojn aŭ retiriĝu en solulecon; la kunvenoj, al kiuj ili rifuzas sian ĉeeston, ne multe perdas per tio.

ERASTO.”

**Mediumoj ekspluatemaj**: tiuj, kiuj ekspluatas sian kapablecon.

**Mediumoj ambiciaj**: tiuj, kiuj, ne komercante per sia kapableco, tamen esperas ian profiton el ĝi.

**Mediumoj trompemaj**: tiuj, kiuj, posedante efektivajn kapablojn, tamen ŝajnigas tiujn kapablojn, kiujn ili ne posedas, por afekti ian gravecon. Oni ne povas nomi mediumo homon, kiu, havante nenian mediuman kapablon, okazigas fenomenojn nur per ĵonglado.

**Mediumoj egoistaj**: tiuj, kiuj uzas sian kapablecon nur por sia persona intereso kaj konservas por si la komunikaĵojn, kiujn ili ricevas.

**Mediumoj enviemaj**: tiuj, kiuj strabe rigardas aliajn mediumojn, kiuj estas pli estimataj kaj ja superaj ol ili.

Ĉiuj ĉi malbonaj ecoj necese havas sian kontraŭaĵon en bono.

## 197. Bonaj mediumoj

**Mediumoj seriozaj**: tiuj, kiuj uzas sian kapablecon nur por bono kaj por efektive bonaj aferoj; ili opinias, ke ili ĝin profanus, uzante ĝin por kontentigi sciemajn kaj indiferentajn homojn aŭ por bagatelaĵoj.

**Mediumoj modestaj**: tiuj, kiuj tute sin ne gloras pri la komunikaĵoj, kiujn ili ricevas, kiel ajn belaj tiuj estas; ili sin konsideras fremdaj al tiuj skribaĵoj kaj ne pensas, ke ili, mediumoj, estas liberaj de mistifikoj. Ili tute ne evitas opiniojn sen kaŝita intereso, sed, kontraŭe, ili petas kritikon.

**Mediumoj abnegaciaj**: tiuj, kiuj komprenas, ke la vera mediumo havas plenumendan mision kaj devas, kiam necese, oferi siajn gustojn, kutimojn, plezurojn, tempon, eĉ materiajn interesojn, por aliula bono.

**Mediumoj fidindaj**: tiuj, kiuj krom facile skribi, an-

kaŭ meritas plenan konfidon dank'al sia propra karaktero kaj la alta kategorio de la Spiritoj, ilin helpantaj; ili do malplej riskas trompojn. Ni vidos poste, ke tia sekureco tute ne dependas de la pli aŭ malpli respektindaj nomoj, sub kiuj la Spiritoj sin prezentas.

"Estas nekontesteble, vi ĝin bone komprenas, ke, resume prezentante la bonajn ecojn kaj strangaĵojn de la mediumoj, kiel farite, tio vekos ĉe kelkaj kontraŭparolojn kaj eĉ antipation; sed kio da grava ĝi estas? La mediumeco kun ĉiu tago pli kaj pli disvastiĝas, kaj medium, kiu rigardus kiel ofendajn ĉi tiujn konsiderojn, montrus unu aferon, nome, ke li ne estas bona mediumo, t. e. ke apud li staras malicaj Spiritoj. Cetere, kiel mi diris, ĉio ĉi estas forpasema, kaj la malbonaj mediumo, tiuj, kiuj ekspluatas aŭ misuzas siajn kapablojn, suferos el tio bedaŭrindajn sekvojn, kiel jam okazis al kelkaj; ili je sia propra kalkulo lernos, kiom kostas turni al la profito de siaj surteraj pasioj naturdoton, kiun Dio al ili konsentis por ilia morala progresado. Se vi ne povas ilin rekonduki sur la bonan vojon, bedaŭru ilin, ĉar, mi povas diri, Dio ilin juĝos.

ERASTO."

"Ĉi tiu tabelo estas tre grava, ne nur por la sinceraj mediumoj, kiuj, legante ĝin, bonafide penas sin ŝirmi kontraŭ la rifoj, al kiuj ili estas elmetitaj, sed ankaŭ por ĉiuj, kiuj uzas la servemon de mediumoj; ĉar ĝi donas al ili la mezuron de tio, kion ili povas racie de ĝi atendi. Ĝi devus troviĝi konstante antaŭ la okuloj de ĉiu, kiu ajn sin okupas pri manifestiĝoj de Spiritoj, tiel same, kiel la **hierarkio de la Spiritoj**, kies komplemento ĝi estas. Tiuj du tabeloj entenas ĉiujn principojn de la Doktrino kaj kunhelpos, pli multe, ol kiel vi imagas, por konduki Spiritismon sur ĝian veran vojon.

SOKRATO."

**198.** Ĉiuj ĉi variaĵoj de mediumoj prezentas senlimajn gradojn koncerne sian intensecon; pluraj, ĝustadire, estas nuraj nuancoj, sed, eĉ tiaj, ili ja estas efiko

de specialaj kapablecoj. Oni komprenas, ke ja tre malofte la kapableco de iu mediumo limiĝus je unu sola speco; unu sama mediumo sendube povas havi plurajn kapablecojn, sed unu el tiuj superstaras, kaj tiun unu li devas diligente praktikadi, se nur ĝi estas utila. Grava eraro estas voli spite ĉion pliampleksigi neekzistantan kapablon. Oni devas kulturi ĉiujn, kies ĝermon oni konstatas en si; sed peni ekhavi la ceterajn estas unue perdi sian tempon kaj due eble perdi, certe malfortigi tiujn, per kiuj oni estas dotita.

"Kiam ekzistas la principo, la ĝermo de iu kapablo, ĉi tiu ĉiam elmontriĝas per sendubaj signoj. Limigante sin je sia specialeco, la mediumo povas esti bonega kaj ricevi grandajn kaj belajn komunikaĵojn; okupante sin pri ĉio, li nenion bonan atingas. Rimarku preterpase, ke la deziro senfine vastigi la rondon de siaj kapabloj estas impertinenta pretendo, kiun la Spiritoj neniam sin detenas puni; la bonaj ĉiam forlasas tromemfidan mediumon, kiu do fariĝas ludilo de mensogemaj Spiritoj. Bedaŭrinde oni malofte vidas mediumojn, kiuj kontentiĝas per la naturdotoj, kiujn ili ricevis, kaj kiuj aspiras, el memestimo, aŭ ambicio, posedi esceptajn kapablojn, kiuj ilin rimarkindigus; tia pretendo senigas ilin je la plej altvalora eco, nome tiu de fidindaj mediumoj.

SOKRATO."

**199.** La studado de la specialeco de la mediumoj estas necesa ne nur por ili, sed ankaŭ por la elvokanto. Laŭ la naturo de la Spirito, kiun oni deziras elvoki, kaj la demandoj, kiujn oni volas fari al li, oni devas elekti tiun mediumon plej taŭgan por la koncernata afero; ekpreni tiun unuan renkontitan estas elmeti sin al nekompletaj aŭ eraraj respondoj. Ni faru komparon el inter la kutimaj faktoj. Neniu konfidus la redaktadon de iu afero, eĉ nuran kopiadon, al la unua homo, kiu sin prezentis, nur tial, ke tiu povoscias skribi. Muzikisto volas ludigi kantopecon el unu sia komponaĵo; li disponas plurajn kantistojn, el kiuj ĉiuj estas lertaj; tamen li ne hazarde ilin prenas, sed elektas kiel sian interpretanton tiun, kies voĉo, sento, unuvorte tiun, kies kvalitoj

respondas ĉiuj plej bone al la speco de tiu peco. La Spiritoj same agas pri la mediumoj, kaj niaflanke ni devas konduti kiel la Spiritoj.

Oni krom tio rimarku, ke la nuancoj, kiujn la mediumeco prezentas kaj al kiuj oni povus aldoni aliajn, ne ĉiam rilatas kun la karaktero de la mediumo; ekzemple, iu nature gajhumora, sangvina mediumo povas kutime ricevi gravajn, eĉ severajn komunikaĵojn, kaj inverse. Ĉi tio estas ankoraŭ unu pruvo, ke li agas sub la impulso de ia fremda influo. Mi repritraktos ĉi tiun temon en la ĉapitro **Pri la morala influo de la mediumo**.

___________

ĈAPITRO XVII

# PRI LA FORMADO DE LA MEDIUMOJ

*Disvolvado de la mediumeco. Ŝanĝiĝo de la skribkaraktero. Perdo kaj interrompo de la mediumeco.*

**200.** Mi ĉi tie parolos speciale pri la skribivaj mediumoj, ĉar ĉi tiu estas la plej multenombra speco de mediumeco, kaj ankaŭ tial, ke ĝi estas samtempe la plej simpla, la plej oportuna, tiu, kiu havigas la plej kontentigajn kaj kompletajn rezultatojn; ĝi estas ankaŭ tiu, kiun ĉiuj aspiras. Bedaŭrinde ĝis hodiaŭ ekzistas nenia procedo, kiu povus eĉ priksimume montri, ke iu posedas ĉi tiun kapablon; la fizikaj signoj, laŭ kiuj iuj homoj pensis, ke ili estas iaj indikaĵoj, havas nenion certan. Ĝi ekzistas ĉe infanoj kaj maljunuloj, ĉe viroj kaj virinoj, kiaj ajn la temperamento, la sanstato, la grado da intelekta kaj morala evoluo. Ekzistas nur unu rimedo por konstati ĝian ĉeeston, nome provi.

Oni povas ricevi skribaĵon, kiel ni vidis, per korboj kaj tabuletoj, aŭ rekte per la mano; estante la plej facila kaj, oni povas diri, la sola, hodiaŭ uzata, ĉi tiu lasta maniero estas tiu, kiun mi rekomendas al la prefero de ĉiuj. Ĉi tiu estas el la plej simplaj: ĝi konsistas sole nur en tio, ekpreni krajonon kaj paperon, sidante kiel iu, kiu skribas, sen ia alia preparo; tamen por sukcesa rezultato estas necesaj pluraj rekomendoj.

**201.** Kiel materian aranĝon mi rekomendas eviti ĉion, kio povas ĝeni la liberan movadon de la mano; eĉ preferinde la mano ne tute sin apogu sur la papero. La pinto de la krajono devas tuŝi sufiĉe por streki, sed ne tiel peze, ke ĝi renkontus kontraŭstaron. Ĉiuj ĉi

antaŭzorgoj fariĝas senutilaj, kiam oni jam flue skribas, ĉar tiam nenia baro povas haltigi la manon; tio estas nur preparaj elementoj por komencanto.

**202.** Estas indiferente uzi plumon aŭ krajonon. Iuj mediumoj preferas la plumon, sed ĝi povas konveni nur al tiuj maturaj kaj kiuj skribas kviete; kelkaj skribas tiel rapide, ke la uzado de plumo estus preskaŭ ne ebla aŭ almenaŭ tre maloportuna. Tio sama okazas tiam, kiam la skribado estas intermita kaj neregula aŭ kiam oni rilatas kun krudmanireraj Spiritoj, kiuj frapas la paperon per la pinto de la plumo, rompante la pinton kaj ŝirante la paperon.

**203.** La natura deziro de ĉiu, kiu aspiras al mediumeco, estas povi konversacii kun la Spiritoj de siaj karuloj; sed li devas moderigi sian senpaciencon, ĉar la komunikado kun iu difinita Spirito ofte prezentas materiajn malfacilaĵojn, kiuj faras ĝin ne ebla por komencanto. Por ke iu Spirito povu komunikiĝi, estas necese, ke ekzistu inter li kaj la mediumo interrilatoj de fluidaĵoj, kiuj ne ĉiam stariĝas momente; nur laŭmezure, kiel la kapableco kreskas, la mediumo iom post iom akiras la lertecon necesan, por ekrilati kun iu ajn veninta Spirito. Povas do okazi, ke tiu, kun kiu la mediumo deziras komunikiĝi, ne troviĝas en la kondiĉoj favoraj por tio, **kvankam li tie staras**, kiel ankaŭ povas okazi, ke al li estas ne eble aŭ ne permesite kontentigi la elvokinton. Tial estas konsilinde, ke oni komence ne obstinu en la elvoko de iu difinita Spirito, esceptante ĉiun alian, ĉar ofte okazas, ke ne kun tiu la interrilatoj de la fluidaĵoj pli facile stariĝas, kiel ajn granda la simpatio, kiun oni portas por li. Antaŭ ol ekpensi ricevi mesaĝojn de tia aŭ tia Spirito, la komencanto devas do disvolvi sian kapablecon, kaj por tio li devas fari ĝeneralan elvokon kaj turni sin precipe al sia gardanta anĝelo.

Por tio ekzistas nenia rita formulo; kiu ajn pretendus rekomendi iajn parolojn, tiun oni povas sentime alnomi ĉarlatano, ĉar por la Spiritoj formo estas nenio. Tamen la elvoko devas ĉiam esti farata en la nomo de Dio. Oni povas ĝin fari per jenaj vortoj aŭ samvaloraj:

**Mi petas Dion ĉiopovan permesi al iu bona Spirito komunikiĝi kun mi kaj ebligi al mi skribi; mi petas ankaŭ mian anĝelon-gardanton volonti helpi min kaj forigi la malicajn Spiritojn**. Oni tiam atendas la manifestiĝon de iu Spirito, kiu igus skribi ion. Povas okazi, ke li estas tiu dezirata aŭ ankaŭ iu nekonata Spirito aŭ la zorganta anĝelo; ĉiuokaze li ordinare rekonigas sin, skribante sian nomon. Nun prezentiĝas la demando pri la identigo, unu el tiuj, kiuj postulas plej grandan sperton, ĉar ne malmultaj novuloj riskas esti trompataj. Tiun demandon mi pritraktos poste, en speciala ĉapitro.

Kiam oni volas elvoki difinitajn Spiritojn, estas ja esence, en la komenco, turni sin nur al tiuj, pri kiuj oni scias, ke ili estas bonaj kaj simpatiaj, kaj kiuj povus havi ian motivon por veni, kiel parencoj aŭ amikoj. En ĉi tiu okazo la elvokon oni povas formuli jene: **En la nomo de Dio ĉiopova mi petas la Spiriton de tia persono komunikiĝi kun mi**; aŭ: **Mi petas Dion ĉiopovan permesi al la Spirito de tia persono komunikiĝi kun mi**; aŭ alia povas esti la formulo, respondanta al sama penso. Ne malpli necese estas, ke la unuaj demandoj tekstu tiel, ke la respondo estu simple jes aŭ ne, ekzemple: — **Ĉu vi estas ĉi tie? — Ĉu vi volas respondi al mi? — Ĉu vi povas igi min skribi?** k. a. Kun la tempo ĉi tiu zorgo fariĝas senutila. En la komenco la afero estas starigo de rilatoj. Esenca punkto estas, ke la demando ne estu frivola, ke ĝi havu nenian montron de privata intereso kaj precipe, ke ĝi estu la esprimo de bonvola kaj simpatia sento por la Spirito, al kiu oni sin turnas. (Vd. poste la ĉapitron specialan pri la **Elvokoj**.)

**204.** Io, kion oni devas observi ankoraŭ pli streĉe, ol la maniero de elvoko, tio estas la trankvileco kaj la enmemiĝo kune kun varma deziro kaj solida volo sukcesi. Sub "volo" mi komprenas ĉi tie ne ian volon efemeran, agantan intermite kaj ĉiuminute interrompatan de aliaj zorgoj, sed volon seriozan, persistan, kontinuan, **sen senpacienco kaj febreca deziro**. La enmemiĝon favoras la soluleco, la silento kaj la foriĝo for de ĉio, kio povas kaŭzi distriĝon. Tiam restas fari nur unu aferon,

nome, ĉiutage refari sian provon maksimume dek minutojn aŭ kvaronhoron, ĉiufoje, dum dek kvin tagoj, unu monato, du monatoj kaj pli, se necese. Mi konas mediumojn, kiuj fariĝis lertaj nur post ses monatoj da ekzerciĝado, dum aliaj skribas flue tuj je la unua fojo.

**205.** Por ne fari senutilajn provojn, oni povas per alia mediumo konsulti seriozan kaj altklasan Spiriton; sed oni rimarku, ke kiam oni demandas la Spiritojn, ĉu oni estas aŭ ne estas mediumo, ili preskaŭ ĉiam respondas jese, kio ne malhelpas, ke la provoj ofte estas senfruktaj. Ĉi tio havas naturan klarigon. Oni adresas al la Spirito demandon ĝeneralan; li do respondas ankaŭ ĝenerale; nu, kiel sciate, nenio estas pli elasta ol la mediumeco, ĉar ja ĝi povas prezentiĝi sub la plej diversaj formoj kaj en tre diversaj gradoj. Oni do povas esti mediumo, ĝin ne sciante kaj en iu senco alia, ol tiu, pri kiu oni pensas. Al ĉi tiu malpreciza demando: — Ĉu mi estas mediumo? la Spirito povas respondi: — Jes; al ĉi tiu, pli preciza: — Ĉu mi estas mediumo skribiva? li eble respondos: — Ne.

Oni devas preni en kalkulon ankaŭ la naturon de la Spirito, kiun oni pridemandas; ekzistas Spiritoj tiel frivolaj kaj senkleraj, ke ili respondas trafe aŭ maltrafe, kiel efektivaj ventkapuloj. Tial mi konsilas turni sin al klarmensaj Spiritoj, kiuj ordinare respondas volonte al tiuj demandoj kaj indikas la plej bonan vojon sekvendan, se nur ekzistas ia eblo sukcesi.

**206.** Rimedo, kiu tre ofte donas bonan rezultaton, konsistas en tio, preni bonan skribivan mediumon, flekseblan, spertan, kiel ĉeokazan helpanton. Se tiu mediumo apogos la manon aŭ la fingrojn sur la mano de tiu, kiu deziras skribi, malofte ĉi tiu ne komencos tuj skribi. Oni komprenas, kio okazas en ĉi tiu cirkonstanco: la mano, tenanta la krajonon, iamaniere fariĝas aldono al la mano de la mediumo, kia estus korbo aŭ tabuleto. Sed ĉi tio ne malhelpas, ke tiu ekzerciĝado estas tre utila, kiam oni povas uzi ĝin, ĉar, ofte kaj regule ripetata, ĝi kunhelpas por venki la materian kontraŭaĵon kaj estigas la disvolviĝon de la kapablo. Iafoje sufiĉas

forte magnetizi, en ĉi tiu intenco, la brakon kaj la manon de tiu, kiu volas skribi; eĉ ofte la magnetizanto nur apogas la manon sur ties ŝultro: mi vidis tiun senprokraste skribi sub tiu influo. Saman efikon oni povas atingi sen ia kontakto, nur el la volo de la helpanto. Oni facile komprenas, ke la fido de la magnetizanto je sia propra povo, por sukcesi, devas ĉi tie ludi grandan rolon, kaj ke ne fidanta magnetizanto malmulte, eĉ neniom helpus.

La helpo de sperta gvidanto estas, krom tio, tre utila, por ke la komencanto observu multegon da detalaj antaŭzorgoj, kiujn li ofte ne atentas je la malprofito de la rapideco de sia progresado; ĝi celas precipe instrui lin pri la konsisto de la unuaj demandoj kaj pri la maniero ilin fari. La rolo de tiu gvidanto estas tiu de instruanto, kiun la komencanto ne plu bezonas, kiam li estas jam sufiĉe lerta.

**207.** Ankoraŭ unu rimedo, kiu ankaŭ povas kunhelpi por la disvolviĝo de tiu kapablo, konsistas en tio, kolekti kelke da homoj, kiuj ĉiuj portus saman deziron kaj saman intencon; nun ĉiuj samtempe, en absoluta silento kaj religia enpensiĝo, provu skribi, post kiam ĉiu elvokis sian gardantan anĝelon aŭ iun ajn simpatian Spiriton. Aŭ unu el ili povas, sen speciala elekto kaj por ĉiuj kunsidantoj, fari ĝeneralan elvokon al bonaj Spiritoj, dirante ekzemple: **En la nomo de Dio ĉiopova ni petas bonajn Spiritojn volonti komunikiĝi per ĉi tieaj personoj**. Malofte el ĉi tiuj kelkaj ne donas tuj montron de mediumeco aŭ eĉ ne skribas flue post nelonge.

Oni facile komprenas, kio fariĝas en ĉi tiu okazo. Personoj, kuniĝintaj per sama intenco, konsistigas tutaĵon, kies potenco kaj sensiveco estas pligrandigitaj de ia magneta influo, kiu helpas al la disvolviĝo de la kapablo. Inter la Spiritoj, altiritaj de tiu kolekto da voloj, kelkaj estas, kiuj trovos ĉe la ĉeestantoj la ilon konvenan al ili; se ne ĉe tiu, tiam ĉe tiu alia, kaj ili uzos ties servemon.

Ĉi tiu rimedo devas esti uzata precipe en tiuj spiritistaj grupoj, kiuj ne havas mediumojn aŭ da ili havas ne sufiĉe.

**208.** Oni de longe serĉas procedojn por la formado de mediumoj, kiel ankaŭ signojn de mediumeco, sed ĝis hodiaŭ mi konas neniun pli efikan ol tiuj, kiujn mi indikis. Konvinkite, ke la baro al la disvolviĝo de tiu kapablo estas tute materia rezisto, iuj homoj pretendas superi ĝin per ia gimnastiko, kiu preskaŭ senartikigas brakojn kaj kapon. Mi ne priskribos ĉi tiun procedon, venintan al mi el trans Atlantiko, ne nur tial, ke mi havas nenian pruvon pri ĝia efikeco, sed ankaŭ pro mia konvinko, ke ĝi povas esti danĝera por delikataj kompleksioj pro la afekcio de la nerva sistemo. Se ne ekzistas eĉ rudimentoj de tiu kapablo, nenio povus ĝin havigi, eĉ ne elektrizo, kiun oni sensukcese uzis por ĉi tiu celo.

**209.** Ĉe la mediumo-lernanto la fido ne estas nepra kondiĉo; ĝi sendube helpas liajn penojn, sed ne estas absolute necesa: sufiĉas pureco de intenco, deziro kaj bonvolo. Oni vidis tute nekredemajn homojn, miregantajn, ke ili skribas, ne sciante kiel, dum sinceraj kredantoj tute ne sukcesas: ĉi tio pruvas, ke ĉi tiu kapablo dependas de organa antaŭinklino.

**210.** La unua signo pri inklino skribi estas ia tremeto de la brako kaj de la mano; iom post iom la mano estas trenata de impulso, kiun ĝi ne povas regi. Ofte ĝi en la komenco faras nur sensignifajn strekojn; poste la literoj ĉiam pli nete desegniĝas, kaj la skribado fine ricevas la rapidecon de la fluanta skribado. Ĉiaokaze oni devas lasi la manon moviĝi nature, ĝin ne kontraŭstarante aŭ antaŭenpuŝante.

Kelkaj mediumoj skribas flue kaj facile tuj de la komenco, eĉ iafoje jam ĉe la unua seanco, kio estas tre malofta; aliaj dum tre longa tempo faras strekojn kaj efektivajn skribekzercojn; la Spiritoj klarigas tion dirante, ke ĝi estas por malrigidigi ilian manon. Se tiuj ekzercoj tro daŭras aŭ fariĝas ridindaj signoj, oni ne dubu, ke tio estas sin amuzanta Spirito, ĉar la bonaj Spiritoj neniam igas iun fari ion senutilan; en ĉi tiu okazo oni devas pli fervore alvoki la helpon de ĉi tiuj. Se, malgraŭ tio, la irado ne ŝanĝiĝas, oni devas halti,

konstatinte, ke nenio serioza estas atingebla. Oni povas rekomenci la provon ĉiutage, sed estas konsilinde ĝin ĉesigi ĉe la unuaj suspektindaj signoj, por ne fari tiun plezuron al la mokemaj Spiritoj.

Al ĉi tiuj observoj unu Spirito aldonas: "Ekzistas mediumoj, kies kapableco ne povas translimi tiujn signojn. Kiam post kelke da monatoj ili sukcesas fari nur sensignifajn aferojn, nur **jes** aŭ **ne**, aŭ literojn sen interligo, ili senutile ŝmirus plu paperon; ili estas ja mediumoj, sed **mediumoj neproduktivaj**. Cetere, la unuaj ricevitaj komunikaĵoj devas esti konsiderataj kiel ekzercoj, por kiuj oni komisias ne altklasajn Spiritojn; tial oni devas atribui al ili negrandan gravecon, en vido de la Spiritoj, kiuj ricevas la taskon, tiel diri, de skribinstruantoj, por malkrudigi la komencantan mediumon. Efektive, ne kredu, ke altklasaj Spiritoj iam penus, ke iu mediumo faru tiajn preparajn ekzercojn; okazas nur tio, ke se la mediumo ne celas ion seriozan, tiuj ne altklasaj Spiritoj restadas plu kaj ligiĝas al li. Preskaŭ ĉiuj mediumoj trapasis tiun hardfornon, por lertiĝi; estas ilia afero fari tion necesan, por havigi al si la simpation de la vere superaj Spiritoj."

**211.** La rifo, kiun la plimulto el la komencantaj mediumoj renkontas, estas ilia afero kun malsuperaj Spiritoj, kaj ili devas konsideri sin feliĉaj, se tiuj ne estas frivolaj Spiritoj. Ilia tuta atento devas celi ne lasi tiujn Spiritojn preni starejon apud ili, ĉar se tiuj jam alkroĉiĝis, ne ĉiam facile oni liberiĝas de ili. Ĉi tio estas tiel gravega punkto, precipe en la komenco, ke sen la necesaj antaŭzorgoj oni povas perdi la frukton de la plej belaj kapabloj.

La unua kondiĉo estas, ke la mediumo kun sincera fido sin metu sub la protekton de Dio kaj petu la helpon de sia gardanta anĝelo; ĉi tiu estas ĉiam bona, dum la familiaraj Spiritoj, simpatiante la bonajn aŭ la malbonajn ecojn de la mediumo, povas esti frivolaj aŭ eĉ malicaj.

La dua kondiĉo estas kun skrupula zorgo diligenti por ekscii per ĉiuj signoj, kiujn la sperto havigas, la

naturon de la unuaj komunikiĝantaj Spiritoj, al kiuj estas ĉiam prudente malkonfidi. Se tiuj signoj estas suspektindaj, oni devas fari varman alvokon al sia gardanta anĝelo kaj per ĉiuj siaj fortoj repuŝi la malican Spiriton, montrante al li, ke oni ne estas lia mokataĵo, por lin senkuraĝigi. Jen kial oni nepre devas antaŭ ĉio studi la teorion, se oni volas eviti la nedisigeblajn malbonaĵojn de la sensperteco; pri ĉi tiu temo oni trovos tre vaste elvolvitajn instrukciojn en la ĉapitroj **Pri la obsedo** kaj **Pri la identeco de la Spiritoj**. Mi ĉi tie diras sole nur, ke krom la parolo povas esti rigardataj kiel **nepraj** pruvoj pri la malsupereco de la Spiritoj ankaŭ jenaj: ĉiaj signoj, figuroj, senutilaj aŭ infanecaj emblemoj; ĉia skribo stranga, intermita, tordita, kvazaŭ desegnita, tro granda, aŭ prenanta ridindajn kaj eksterkutimajn formojn. La skribo povas esti tre malbona, eĉ apenaŭ legebla, kio estas neniel eksterordinara, ĉar ĝi estas afero de la mediumo, sed ne de la Spirito. Mi vidis mediumojn kun tiaj falsaj ideoj, ke ili taksadis la superecon de la Spiritoj laŭ la grandeco de la literoj kaj atribuadis grandan gravecon al literoj formitaj kiel presliteroj, infanaĵo evidente neakordigebla kun efektiva supereco.

**212.** Se estas grave pretervole ne fali sub la potencon de la malicaj Spiritoj, ankoraŭ pli grave estas sin memvole ne meti sub ilian manon. Estas necese, ke iu senbrida deziro skribi ne kredigu, ke estas indiferente sin turni al la unua veninta Spirito, escepte se tio estas, por poste sin liberigi de li, se ĝi ne konvenas, ĉar oni ne senpune petas la helpon, por kio ajn, de malica Spirito, kiu povas kare pagigi siajn servojn.

Kelkaj homoj, en la senpacienca sopiro vidi la disvolviĝon de sia mediumeco, laŭ ilia opinio tro malrapidan, ekpensas elvoki, por ilin helpi, ian ajn Spiriton, eĉ malican, esperante lin tuj forpeli. Pluraj estis ja plene kontentigitaj kaj tuj skribis; sed la Spirito, ne zorgante pri tio, ke li estas akceptita, ĉar neniu pli bona aperis, montriĝis malpli cedema por foriri, ol por veni. Mi konas mediumojn, punitajn pro sia vanta pretendo kredi sin sufiĉe fortaj, por laŭvole forpeli tiajn Spirit-

ojn, per jaroj da ĉiaspecaj obsedoj, per la plej ridindaj mistifikoj, per persista fascinado kaj eĉ per **materiaj** malfeliĉoj kaj la plej kruelaj disreviĝoj. La Spirito montriĝis komence tute malkaŝe malica, poste hipokrita, por igi kredi aŭ lian konvertiĝon aŭ la pseŭdopovon de lia subjugigito, lin laŭvole forpuŝi.

**213.** La skribaĵo estas kelkafoje tre legebla, la vortoj kaj la literoj tute disligitaj unu de alia, sed ĉe iuj mediumoj estas malfacile por alia, ol ili mem, deĉifri, kion ili skribis, ĝis oni alkutimiĝis al ilia skribo. Ĝi ofte estas formata el grandaj strekoj: la Spiritoj ne kutimas ŝpari paperon. Kiam iu vorto aŭ frazo estas apenaŭ legebla, oni petas la Spiriton bonvoli rekomenci, kion li ordinare faras volonte. Kiam la skribo estas kutime nelegebla, eĉ por la mediumo, ĉi tiu preskaŭ ĉiam sukcesas skribi pli nete per oftaj kaj longedaŭraj ekzercoj, **oferante al ili fortan volon** kaj varme petante la Spiriton agi pli laŭregule. Kelkaj Spiritoj ofte alprenas konvenciajn signojn, kiuj fariĝas uzaĵoj en la kutimaj seancoj. Por esprimi, ke iu demando malplaĉas al ili kaj ke ili tiujn ne volas respondi, ili faras ekzemple longan strekon aŭ ion alian samsignifan.

Kiam la Spirito finis tion dirotan aŭ ne volas respondi plu, la mano senmoviĝas kaj la mediumo, kiel ajn grandaj lia povo kaj lia volo, eĉ ne unu vorton plue ricevas. Kontraŭe, tiel longe ĝis la Spirito ne finis, la krajono moviĝas sen ia eblo por la mano sin deteni. Se iu Spirito volas propra iniciate diri ion, la mano konvulsie ekprenas la krajonon kaj komencas skribi, ne povante tion kontraŭstari. Cetere la mediumo preskaŭ ĉiam sentas en si tion, kio diras al li, ĉu la halto estas momenta aŭ ĉu la Spirito venis al la fino. Malofte li ne sentas la momenton, kiam la Spirito foriris.

Jen la plej ĉefaj klarigoj, kiujn mi devis doni, tuŝante la disvolviĝon de la psikografio. La sperto konigos, en la praktiko, iujn detalojn, kiujn estus senutile elvolvi ĉi tie kaj por kiujn koni oni sin gvidos laŭ la ĝeneralaj principoj. Multaj provu, kaj oni trovos pli da mediumoj, ol kiel oni pensas.

**214.** Ĉio, kion mi ĵus diris, aplikiĝas al la mekanika skribado. Ĝi estas tiu, kiun ĉiuj mediumoj prave penas ekhavi, sed la mekanikeco pura estas tre malofta: kun ĝi tre ofte miksiĝas pli aŭ malpli da intuicio. Konsciante, kion li skribas, la mediumo nature ekdubas pri sia kapableco; li ne scias, ĉu tio venas de li aŭ de alia Spirito. Li tute ne maltrankviliĝu pro tio kaj eĉ tiel iru pluen. Se li sin zorge observos, li facile konstatos en sia skribaĵo multegon da aferoj, kiuj ne troviĝis en lia menso kaj kiuj estas eĉ kontraŭaj al ĝi: ĉi tio estas evidenta pruvo, ke tiuj aferoj ne de li venis. Li do daŭrigu sian laboron, kaj la dubo disfumiĝos per la sperto.

**215.** Se al mediumo ne estas konsentite, ke li estu ekskluzive mekanika, ĉiaj provoj por ĉi tiu rezultato estos senfruktaj, kaj tamen li malprave pensus, ke li ne ricevis kapablon por skribi. Se li estas dotita nur per intuicia mediumeco, li ja devas kontentiĝi per ĝi, kaj ĝi certe faros al li eminentajn servojn, se li scios ĝin utile profiti kaj ĝin ne forpuŝos.

Se post senutilaj provoj, sinsekve farataj dum kelka tempo, vidiĝas nenia montro de pretervola movo aŭ se tiuj movoj estas tre malfortaj, por doni ian rezultaton, la mediumo ne hezitu skribi la unuan enblovitan penson, ne farante al si zorgon, ĉu ĝi venas de li mem aŭ el alia fonto: la sperto instruos lin distingi. Cetere tre ofte okazas, ke la mekanika movado disvolviĝas post iom da tempo.

Mi supre diris, ke estas okazoj, en kiuj estas indiferente scii, ĉu la penso venas de la mediumo aŭ de alia Spirito; tiel estas precipe tiam, kiam iu pure intuicia aŭ inspirata mediumo faras ian imagoverkon por si mem. Ne multe gravas, ke li atribuas al si iun penson, kiu estus sugestita al li: se venas al li bonaj pensoj, li danku por tio sian bonan genion, kaj aliaj estos al li ankoraŭ alportataj. Tia estas la inspiro de la poetoj, filozofoj kaj scienculoj.

**216.** Ni nun prezentu al ni la mediumecon tute dis-

volviĝinta; ke la mediumo skribas facile, ke li estas, unuvorte, tio, kion oni nomas matura mediumo. Li forte erarus pensante, ke li bezonas jam nenian pluan instruon: li nur transpasis materian kontraŭstaron; jen tiam komenciĝas por li la efektivaj malfacilaĵoj kaj li pli ol ĉiam bezonas konsilojn de la prudento kaj sperto, se li ne volas enkaptiĝi en la multego de la retoj, kiujn oni metos kontraŭ li. Se li pretendos tro frue flugi per siaj propraj flugiloj, li baldaŭ fariĝos ludilo de mensogemaj Spiritoj, kiuj penos ekspluati lian tromemfidon.

**217.** Kiam la mediumeco estos plene disvolviĝinta, estas plej ĉefa afero, ke la mediumo ĝin ne trouzu. La plezuro, kiun ĝi havigas al iuj novuloj, naskas ĉe ili tian entuziasmon, kiun estas tre grave moderigi. Ili devas memori, ke ĝi estas donita al ili por la bono, sed ne por la kontentigo de ia vanta sciemo. Ili do uzu ĝin nur en la oportunaj okazoj, sed ne ĉiumomente; la Spiritoj ne estas konstante je ilia ordono, kaj tial ili riskas trompon de mistifikantoj. Estas rekomendinde por tio difini tagojn kaj horojn, ĉar tiel ili donas sin al la laboro en humoro de pli profunda enpensiĝo kaj la Spiritoj, kiuj volas veni, estas avizitaj kaj sekve faras por tio siajn disponojn.

**218.** Se malgraŭ ĉiaj provoj, la mediumeco tute ne montriĝas, oni devas ja rezigni ĝin, simile kiel oni rezignas kanti, se oni ne havas voĉon por tio. Kiel tiu, kiu ne povoscias iun lingvon, uzas la servemon de tradukanto, tiel same tiu, kiu ne estas mediumo, petas la helpon de mediumo. Ĉe manko de mediumo oni tamen ne opiniu sin ne helpata de la Spiritoj. La mediumeco estas por ĉi tiuj esprimrimedo, sed ne ekskluziva rimedo, per kiu ili estus altirataj; tiuj, kiuj amas nin, staras apud ni, ĉu ni estas aŭ ne estas mediumoj. Patro ne forlasas sian infanon, ĉar ĉi tiu, surda kaj blinda, ne povas lin aŭdi kaj vidi, sed lin ĉirkaŭigas per sia prizorgado. Tiel same agas la Spiritoj: se ili ne povas materie komuniki al ni sian penson, ili helpas al ni per inspiro.

## Ŝanĝiĝo de la skribkaraktero

**219.** Tre ordinara fenomeno ĉe la skribivaj mediumoj estas la ŝanĝiĝo de la skribkaraktero laŭ la komunikiĝantaj Spiritoj; kaj la plej rimarkinda estas tio, ke unu skribkaraktero konstante refariĝas ĉe la sama Spirito kaj ĉe kelkaj okazoj estas tiu sama, kiun li havis sur la Tero. Ni poste vidos la konsekvencojn, kiujn oni povas ĉerpi el tio koncerne la identecon de la Spiritoj. La ŝanĝiĝo de la skribkaraktero okazas nur ĉe la mekanikaj aŭ duonmekanikaj mediumoj, ĉar ĉe tiuj la movado de la mano estas pretervola kaj direktata de la Spirito. Ĉi tio ne fariĝas ĉe la pure intuiciaj mediumoj, ĉar ĉe tiuj la Spirito agas sole nur sur la menson kaj la mano estas direktata de la volo de la mediumo, kiel en la ordinaraj cirkonstancoj. Sed la unuformeco de la skribkaraktero, eĉ ĉe iu mekanika mediumo, tute neniel atestas kontraŭ lia kapableco, ĉar la dirita ŝanĝiĝo ne estas ia absoluta kondiĉo en la manifestiĝo de la Spiritoj; ĝi estas ligita kun speciala kapableco, per kiu ne ĉiuj mediumoj, eĉ ne la plej mekanikaj, estas dotitaj. Tiujn, kiuj posedas tian kapablecon, mi nomas **diverseskribaj mediumoj**.

## Perdo kaj interrompo de la mediumeco

**220.** La mediumeco estas elmetita al iom longaj intermitoj kaj interrompoj, ĉu por la fizikaj manifestiĝoj, ĉu por la skribado. Jen la respondoj de la Spiritoj al kelkaj demandoj pri ĉi tiu afero:

I. Ĉu la mediumoj povas perdi sian kapablecon?

“Ĉi tio ofte okazas, kia ajn la speco de tiu kapableco; sed ĝi ofte estas ankaŭ nur kelkatempa interrompo, kiu ĉesas kune kun sia kaŭzo.”

II. Ĉu la kaŭzo de la perdo de la mediumeco kuŝas en la elĉerpiĝo de la fluidaĵo?

“Kia ajn estas la kapablo, kiun la mediumo havas, li povas fari nenion sen la simpatia kunlhelpo de la Spiritoj; kiam li plu nenion ricevas, ne ĉiam tiel estas, ĉar

la kapableco mankus al li, sed ofte tial, ke la Spiritoj ne plu volas aŭ ne plu povas uzi lian servemon."

III. Kio povas kaŭzi, ke la Spiritoj forlasas iun mediumon?

"Kio plej forte influas la bonajn Spiritojn, tio estas la uzado, kiun la mediumo faras el sia kapableco. Ni povas forlasi lin, kiam li uzas ĝin por frivolaĵoj aŭ por ambiciaj celoj; aŭ kiam li rifuzas dissciigi pri nia parolo aŭ niaj faroj la enkarniĝintojn, kiuj sin turnas al li aŭ kiuj bezonas vidi, por konvinkiĝi. Ĉi tiun naturdoton Dio konsentas al mediumo ne por ties plezuro kaj des malpli por servi al ties ambicio, sed celante ties propran pliboniĝon kaj por konigi la veron al la homoj. Se la Spirito konstatas, ke la mediumo jam ne respondas al liaj deziroj kaj ne profitas de liaj instruoj kaj avertoj, li sin retiras, por iri al pli inda protektato."

IV. Ĉu la Spirito, kiu sin retiras, ne povas esti anstataŭita, kaj, en ĉi tiu okazo, oni ne komprenus la interrompon de la mediumeco?

"Ne mankas Spiritoj, kiuj nenion pli bonan deziras, ol komunikiĝi, kaj kiuj estas ĉiam pretaj anstataŭi tiujn, kiuj sin retiras; sed kiam la mediumon forlasas iu bona Spirito, povas okazi, ke ĉi tiu lin forlasas nur momente, por kelkatempe senigi lin je ĉia komunikaĵo, por ke ĉi tio servu al li kiel leciono kaj por pruvi al li, ke lia kapableco **ne dependas de li, mediumo**, kaj do, ke li ne sin gloru pro ĝi. Tiu kelkatempa nepovado celas ankaŭ pruvi al la mediumo, ke li skribas sub aliula influo, ĉar, se ne tiel ne fariĝus interrompoj.

"Cetere interrompo de la kapableco ne ĉiam signifas punon; ĝi iafoje estas signo de la zorgado de la Spirito pri la mediumo, kiun li amas; li deziras ĝuigi al tiu iom da materia ripozo, kiun li opinias necesa, kaj tiam li ne permesas al aliaj Spiritoj lin anstataŭi."

V. Oni tamen vidas mediumojn, morale parolante, tre meritajn, kiuj sentas nenian bezonon ripozi kaj tial forte ĉagreniĝas pri tiuj interrompoj, kies celon ili ne komprenas.

"Tiel estas, por elprovi ilian paciencon kaj por taksi ilian persistemon; tial la Spiritoj ordinare ne difinas lim-

tempon al tiu interrompo: ili volas vidi, ĉu la mediumo senkuraĝiĝas. Ĝi ofte estas ankaŭ por konsenti al la mediumoj tempon, por mediti pri la instruoj, al ili donitaj; laŭ tiu meditado pri niaj instruoj ni ja rekonas la vere seriozajn spiritistojn. Tiel nomi ni ne povas tiujn, kiuj en la realeco estas nuraj amantoj de komunikaĵoj."

VI. Ĉu do, en ĉi tiu okazo, la mediumo ja devas daŭrigi siajn provojn skribi?

"Se la Spirito tion konsilas al li, jes; se la Spirito diras al li, ke li sin detenu de tio, ne."

VII. Ĉu ekzistas ia rimedo, por malplidaŭrigi tian elprovon?

"Rezignacio kaj preĝo. Cetere, sufiĉas fari ĉiutage provon dum kelke da minutoj, ĉar estus senutile perdi tempon en senfruktaj provoj. La provo havas nenian alian celon, ol sciiĝi, ĉu la kapableco estas jam rericevita.

VIII. Ĉu la interrompo de la kapableco kuntrenas la forestadon de tiuj Spiritoj, kiuj kutime komunikiĝas?

"Tute neniel. La mediumo tiam sin trovas en la situacio de iu homo, kiu kelkatempe perdis la vidadon: tiu havas ankoraŭ siajn amikojn apud si, kvankam li ne povus ilin vidi. La mediumo povas do, eĉ devas, konversaciadi plu, per la penso, kun siaj familiaraj Spiritoj kaj esti konvinkita, ke li estas de ili aŭskultata. Se la interrompo de la mediumeco povas senigi lin de la malkaŝaj komunikoj kun iuj Spiritoj, ĝi tamen lin ne povas senigi de la mensaj komunikoj."

IX. Ĉu do la interrompo de la mediumeco ne ĉiam signifas ian riproĉon de la Spiritoj?

"Sendube, ĉar ĝi povas esti montro de bonvolemo."

X. Laŭ kia signo oni povas vidi ian riproĉon en tiu interrompo?

"La mediumo pridemandu sian konsciencon kaj demandu sin mem pri la uzado, kiun li faris el sia kapablo, pri la bono, kiu venis el ĝi por liaj proksimuloj, pri **la profito, kiun li ĉerpis de la konsiloj, al li donitaj**, kaj li ricevos la respondon."

XI. Ĉu la mediumo, kelkatempe ne povanta skribi, ne povas peti la helpon de alia mediumo?

"Ĉi tio dependas de la kaŭzo de la interrompo; ĉi tiu ofte havas kiel motivon fari, ke vi kelkatempe ne ricevu komunikaĵojn, post kiam oni donis al vi konsilojn, por ke vi ne kutimiĝu ĉion fari nur per ni; en ĉi tiu okazo la mediumo ne havas pli grandan ŝancon sukcesi, petante la helpon de alia mediumo. Tio havas ankoraŭ unu celon, nome montri, ke la Spiritoj estas liberaj kaj ke ne de vi dependas, ke ili kondutus laŭ via plaĉo. Ankaŭ pro ĉi tiu sama motivo homoj ne-mediumoj ne ĉiam ricevas ĉiajn komunikaĵojn, kiujn ili deziras."

*Rimarko*. Oni efektive rimarku, ke iu, kiu petas la helpon de krompersono, por ricevi komunikaĵojn, kvankam li mem estas mediumo, ofte ekhavas nenion kontentigan, dum aliajn fojojn la respondoj estas tre eksplicitaj. Ĉi tio tiel multe dependas de la volo de la Spirito, ke oni gajnas nenion, ŝanĝante la mediumon; ŝajnas, ke en ĉi tiu rilato la Spiritoj havas ian interkonsenton, ĉar kion oni ne ricevas de unu, tion oni ankaŭ ne ricevas de alia. Oni tiam sin detenu insisti kaj senpacienciĝi, se oni ne volas fariĝi mokataĵo de trompemaj Spiritoj, kiuj respondos, se oni tion volas por ĉiu prezo, kaj la bonaj Spiritoj lasas tiujn fari ĝin, por nin puni pro nia insistado.

XII. Por kia celo la Providenco dotis iujn homojn per la mediumeco en speciala maniero?

"Tio estas misio, por kiu ili estas komisiitaj kaj pri kiu ili estas feliĉaj. Ili estas la interpretantoj inter la Spiritoj kaj la homoj."

XIII. Al iuj mediumoj tamen nur naŭzas la praktikado de sia kapableco.

"Tiuj estas mediumoj neperfektaj; ili ne scias la valoron de tiu favoro, al ili konsentita."

XIV. Se tio estas misio, kiel do klarigi, ke ĝi ne estas privilegio de la virtaj homoj kaj ke tian kapablon ricevas homoj, kiuj meritas nenian estimon kaj kiuj povas ĝin misuzi?

"Tiaj homoj ricevas ĝin, ĉar ili ĝin bezonas por sia propra pliboniĝo, por ke ili havu la eblon ricevi bonajn instruojn; se ili ne profitos de ĝi, ili do suferos la sekvojn de tiu sia konduto. Ĉu Jesuo ne adresis sian parolon

prefere al pekuloj, dirante, ke "ne la sanuloj bezonas kuraciston, sed la malsanuloj"? (*)

XV. Ĉu la homoj, forte dezirantaj skribi kiel mediumoj, sed ne sukcesantaj, povas konkludi el tio ion, kio ilin mem kondamnus, tuŝante la bonvolemon de la Spiritoj por ili?

"Ne, ĉar eble Dio rifuzis al ili tiun kapablon, simile kiel la talenton por poezio aŭ muziko; se ili ne ĝuas tiun favoron, ili eble ricevis aliajn."

XVI. Kiamaniere iu homo povas perfektiĝi per la instruado de la Spiritoj, kiam li havas nek per si mem, nek per mediumoj, la rimedojn por senpere ricevi tiun instruadon?

"Ĉu li ne disponas la librojn, kiel kristano la Evangelion? Por praktiki la moralon de Jesuo, la kristano ne bezonas esti aŭdinta liajn parolojn, elirantajn el lia buŝo."

———————

(*) Mateo, 9: 12; Marko, 2: 17. — *La Trad.*

ĈAPITRO XVIII

# PRI LA MALBONAĴOJ KAJ DANĜEROJ DE LA MEDIUMECO

*Influo de la praktikado de la mediumeco sur la sanon. Same sur la cerbon. Same sur la infanojn.*

**221.** I. Ĉu la mediumeco estas indikaĵo de ia patologia aŭ nur anomalia stato?

"Anomalia kelkafoje, sed ne patologia; ekzistas mediumoj kun fortika sano; tiuj malsanaj tiaj estas el aliaj kaŭzoj."

II. Ĉu la praktikado de la mediumeco povas kaŭzi laciĝon?

"La tro daŭra praktikado de ĉia kapablo kuntrenas laciĝon; la mediumeco apartenas ĉi tien, precipe tiu rilata al fizikaj efikoj; ĝi necese naskas elspezon de fluidaĵo, kio kaŭzas laciĝon, sed kion oni rebonigas per ripozo."

III. Ĉu la praktikado de la mediumeco povas, per si mem, enhavi malbonaĵojn el la higiena vidpunkto, flanke lasante ĝian trouzadon?

"Ĉe iuj okazoj estas prudente, eĉ necese, deteni sin de ĝi aŭ almenaŭ ĝin moderigi; tio dependas de la fizika kaj morala stato de la mediumo. Cetere la mediumo ordinare sentas tiun neceson, kaj kiam li konstatos laciĝon, li devas reteniĝi."

IV. Ĉu al iuj homoj tiu praktikado alportas pli da malprofitoj, ol al aliaj?

"Mi jam diris, ke tio dependas de la fizika kaj morala stato de la mediumo. Ekzistas homoj, al kiuj oni devas ŝparigi ĉian kaŭzon de superekscitiĝo, kaj tiu praktikado estas unu el tiuj kaŭzoj." (§§ 188 kaj 194.)

V. Ĉu la mediumeco povas okazigi frenezon?

"Ne pli ol ĉia alia afero, se nur oni ne antaŭinklin-

as al tio, danke cerban malfortecon. La mediumeco ne okazigas frenezon, se ties ĝermo jam antaŭe ne ekzistas; sed se ĝi ekzistas, kion oni facile konstatas laŭ la morala stato, la natura saĝo diras, ke oni devas konduti prudente en ĉiuj rilatoj, ĉar ĉia kaŭzo de afekcio povas esti malutila.”

VI. Ĉu estas malutile disvolvi la mediumecon ĉe infanoj?

“Jes, sendube, kaj mi ja asertas, ke tio estas tre danĝera, ĉar tiuj malfortikaj kaj delikataj organismoj estus tro afekciitaj kaj la junaj imagemoj estus tro superekscititaj. Tial iliaj saĝaj gepatroj devas forbati de ili tiajn ideojn aŭ almenaŭ paroli al ili pri tio nur el la vidpunkto de la moralaj sekvoj.”

VII. Iuj infanoj tamen estas de naturo mediumoj, ĉu por fizikaj efikoj, ĉu por skribado kaj vidado: ĉu tio estas same malkonsilinda?

“Ne; kiam la mediumeco estas denaska ĉe infano, tiam ĝi apartenas al ties naturo, kaj ties strukturo taŭgas por tio; sama ne estas la okazo, se ĝi estas vekita kaj superekscitita. Rimarku, ke infano, kiu vidas Spiritojn, ordinare ne estas impresita de tio; ĝi ŝajnas al li tute natura afero, al kiu li apenaŭ ligas ian gravecon kaj kiun li ofte forgesas; poste, kiam li estas pli aĝa, la fakto revenas en lian memoron kaj li ĝin facile klarigas, se li konas Spiritismon.”

VIII. En kia aĝo oni povas, sen malutilo, okupi sin pri mediumeco?

“Ne ekzistas ia difinita aĝo; ĉi tio tute dependas de la fizika disvolviteco kaj ankoraŭ pli multe de la disvolviteco morala; dekdujaraj infanoj, ekzemple, povas esti malpli afekciitaj de tio, ol iuj maturaj homoj. Mi parolas pri la mediumeco entute; tiu por fizikaj efikoj estas pli laciga koncerne la korpon; la skribado havas alian malbonaĵon, kiu rilatas kun la sensperteco de la infano en la okazo, se li sen la helpo de iu sperta volus doni sin al tiu afero kaj el ĝi fari ian amuzaĵon.”

**222.** La praktikado de Spiritismo, kiel ni vidos poste, postulas grandan takton, por vanigi la ruzaĵojn de

la trompemaj Spiritoj; se maturaj homoj povas fariĝi ilia mokataĵo, des pli ankoraŭ infanoj kaj junuloj, pro sia sensperteco, riskas enkaptiĝi en iliajn retojn. Oni krom tio scias, ke la anima koncentriĝo estas kondiĉo, sen kiu oni ne povas havi aferon al seriozaj Spiritoj; la elvokoj, ventkape kaj ŝerce fariaj, estas efektiva profanado, kiu malfermas facile traireblan pordon al la mokemaj aŭ malicaj Spiritoj; ĉar oni ne povas atendi de infano la seriozecon necesan al tia akto, tial estas timinde, ke li farus el ĝi ian amuzilon, se li estus forlasita al si mem. Eĉ en la plej favoraj kondiĉoj estas dezirinde, ke infano, dotita per mediumeco, praktiku ĝin nur sub la kontrolanta rigardo de spertaj homoj, kiuj lin instruus ekzemple pri la respekto, kiun oni ŝuldas al la animoj de tiuj, kiuj vivis en la mondo. Oni el tio vidas, ke la demando pri aĝo dependas de la cirkonstancoj, kiel koncerne la temperamenton, tiel ankaŭ rilate al la karaktero. Kio tamen klare rezultas el la supre donitaj respondoj, estas tio, ke oni ne devas vigligi la disvolviĝon de tiu kapablo ĉe la infanoj, kiam ĉi tiu ne estas spontanea, kaj ke, en ĉiaj okazoj, oni devas uzi ĝin tre prudente; ankaŭ tio, ke oni devas ĝin nek eksciti, nek vigligi ĉe malfortikaj homoj. Estas necese per ĉiaj eblaj rimedoj deteni de ĝia praktikado ĉiun, kiu montrus eĉ la plej malgrandajn simptomojn de ekscentreco de pensoj aŭ malfortiĝon de la mensaj fakultoj, ĉar ĉe tiuj homoj ekzistas evidenta antaŭinklino al frenezo, kiun ĉia superekscitanta kaŭzo povas kreskigi. En ĉi tiu rilato la spiritismaj ideoj ne havas pli grandan influon, ol aliaj, sed, elrompiĝinte, la frenezo ekprenus la karakteron de superreganta absorba zorgo, simile kiel ĝi ekprenus religian karakteron, se la persono sin supermezure fordonus al la praktikado de piaj aferoj, sed oni tamen respondigus por tio Spiritismon. La plej bona, kion oni faru kun ĉiu homo, kiu montrus inklinon al fiksa ideo, tio estas forturni liajn zorgojn en alian flankon, por havigi ripozon al liaj malfortiĝintaj organoj.

Pri ĉi tiu temo mi petas la atenton de miaj legantoj al la § XII de la “Enkonduko” de la **Libro de la Spiritoj**.

ĈAPITRO XIX

# PRI LA ROLO DE LA MEDIUMOJ EN LA KOMUNIKIĜOJ DE LA SPIRITOJ

*Influo de la persona Spirito de la mediumo. Sistemo de la inertaj mediumoj. Kapableco de iuj mediumoj por aferoj, kiujn ili ne konas: lingvoj, muziko, desegno k. a. Disertacio de du Spiritoj pri la rolo de la mediumoj.*

**223.** I. Ĉu en la momento de la praktikado de sia kapablo la mediumo troviĝas en sia normala stato?

"Li iafoje troviĝas en pli aŭ malpli forta krizo: jen kio lin lacigas kaj jen kial li bezonas ripozon; sed lia stato pleje ne diferencas senteble de lia normala stato, precipe ĉe la skribivaj mediumoj."

II. Ĉu la skribaj aŭ voĉaj komunikaĵoj povas deveni de la Spirito mem, enkarniĝinta en la mediumon?

"La animo de la mediumo povas komunikiĝi tiel same, kiel ĉiu alia; se ĝi ĝuas ioman gradon da libereco, ĝi reakiras siajn ecojn de Spirito. Vi havas pruvon pri tio en la vizitoj, kiujn faras al vi la animoj de vivantoj, komunikiĝante kun vi per skribado, ofte ne vokite de vi. Ĉar, eksciu, inter la Spiritoj, kiujn vi elvokas, kelkaj estas enkarniĝintaj sur la Tero; **ili tiam parolas al vi kiel Spiritoj**, sed ne kiel homoj. Kial ne same estus kun la mediumo?"

— Ĉu ne ŝajnas, ke ĉi tiu klarigo konfirmas la opinion de tiuj homoj, kiuj pensas, ke ĉiaj komunikaĵoj fontas el la Spirito de la mediumo, sed ne de aliaj Spiritoj?

"Tiuj malpravas nur tial, ke ili parolas en senco

absoluta, ĉar sendube la Spirito de la mediumo povas agi memstare; sed tio ne estas motivo, ke aliaj ne agus ankaŭ per li.”

III. Kiel scii, ĉu la Spirito, kiu respondas, estas tiu de la mediumo aŭ iu alia Spirito?

“Laŭ la konsisto de la komunikaĵoj. Esploru la cirkonstancojn kaj la parolon, kaj vi distingos unu de la dua. La Spirito de la mediumo manifestiĝas precipe en stato de somnambulismo aŭ de ekstazo, ĉar tiam li estas pli libera; en la normala stato estas pli malfacile. Cetere iujn respondojn oni ne povas atribui al li. Tial mi konsilas al vi studi kaj observi.”

*Rimarko.* Kiam iu persono al ni parolas, ni facile distingas tion, kio venas de li, de tio, kion li nur ripetas de alia; same okazas rilate la mediumojn.

IV. Ĉar la Spirito de la mediumo eble akiris, dum antaŭaj ekzistadoj, sciojn, kiujn li forgesis en sia korpa envolvaĵo, sed kiujn li memoras kiel Spirito, ĉu tial li ne povas ĉerpi el sia propra profundo la ideojn, kiuj laŭŝajne troviĝas ekster la limoj de lia instruiteco?

“Tio ofte okazas en la somnambula aŭ ekstaza stato, sed ankoraŭ ĉi tie estas cirkonstancoj, kiuj allasas nenian dubon: studu **longe** kaj meditu.”

V. Ĉu la komunikaĵoj, venantaj de la Spirito de la mediumo, estas ĉiam malsuperaj ol tiuj, kiujn povus doni aliaj Spiritoj?

“Ne ĉiam, ĉar alia Spirito povas esti el klaso malsupera ol tiu de la mediumo kaj do paroli malpli saĝe. Tion oni vidas en somnambulismo, ĉar tie, plej ofte, ĝuste la Spirito de la somnambulo manifestiĝas, iafoje parolante tamen tre bonajn aferojn.”

VI. Ĉu la Spirito, kiu komunikiĝas per mediumo, konigas sian penson rekte aŭ ĉu tiu penso havas kiel peranton la Spiriton, enkarniĝintan en la mediumon?

“La interpretanto estas la Spirito de la mediumo, ĉar li estas ligita al la korpo, uzata por la parolo, kaj ĉar estas necesa ia ĉeno inter vi kaj la komunikiĝantaj Spiritoj, same kiel necesa estas tiu elektra drato, por transsendi malproksimen iun sciigon, kaj ĉe la ekstrem-

aĵo de la drato iu inteligenta homo, kiu ĝin ricevus kaj diskonigus (*).”

VII. Ĉu la Spirito, enkarniĝinta en la mediumon, iel influas la komunikaĵojn, kiujn li devas konigi, venintajn de aliaj Spiritoj?

“Jes, ĉar se li ne simpatias kun ili, li povas ŝanĝi iliajn respondojn kaj identigi ĉi tiujn kun siaj propraj ideoj kaj inklinoj, sed **li ne influas la Spiritojn mem**: li estas nur misinterpretanto.”

VIII. Ĉu tio estas la kaŭzo, kial la Spiritoj preferas tiajn aŭ tiajn mediumojn?

“Nenia alia estas; la Spiritoj serĉas tian interpretanton, kiu plej simpatias kun ili kaj kiu plej ĝuste esprimus ilian penson. Ĉe neekzistado de reciproca simpatio, la Spirito de la mediumo estas antagonisto, kiu iom rezistas al ili, kaj fariĝas malbonkvalita kaj ofte nefidela interpretanto. Same okazas inter vi, homoj, kiam la opinio de scienculo estas konigita per la voĉo de ventkapa aŭ malsincera homo.”

IX. Oni tion komprenas pri la mediumoj intuiciaj, sed ne pri tiuj mekanikaj.

“Vi ne tute ĝuste prezentas al vi la rolon de la mediumo; ekzistas leĝo, kiun vi ankoraŭ ne enprenis al vi. Memoru, ke por movi inertan korpon, la Spirito bezonas iom da animala fluidaĵo, kiun li ĉerpas el la mediumo, por momente animi tiun korpon, por ke ĉi tiu obeu lian volon. Nu, komprenu ankaŭ, ke por komunikaĵo inteligenta li bezonas peranton inteligentan, kaj ke tia peranto estas la Spirito de la mediumo.”

— Ĉi tio ne ŝajnas aplikebla al tio, kion oni nomas “parolantaj tabloj”, ĉar, kiam objektoj **inertaj** kiel tabloj, tabuletoj kaj korboj, donas inteligentajn respondojn, tiam ŝajnas, ke la Spirito de la mediumo neniel partoprenas en tio.

“Tio estas eraro; la Spirito povas havigi al la inerta korpo momentan nenaturan vivon, sed ne inteligenton;

(*) Memkompreneble, en la tempo de Kardec ankoraŭ ne ekzistis la sendrataj rimedoj de elektra komunikado. — La Trad.

neniam ajn inerta korpo estis inteligenta. Tio estas do la Spirito de la mediumo, kiu preterkonscie ricevas la penson kaj ĝin grade transigas kun la helpo de diversaj periloj.”

X. El ĉi tiuj klarigoj, ŝajnas, rezultas, ke la Spirito de la mediumo neniam estas absolute pasiva.

“Li estas pasiva, kiam li ne miksas siajn proprajn ideojn kun tiuj de la komunikiĝanta Spirito, sed li neniam estas ia absoluta nulo; lia kunhelpo estas ĉiam necesa kiel peranto, eĉ ĉe tiuj, kiujn vi nomas mekanikaj.

XI. Ĉu ne ekzistas pli granda garantio de sendependeco ĉe la mediumo mekanika, ol ĉe la mediumo intuicia?

“Sendube tia ekzistas, kaj por iaj komunikaĵoj estas preferinda iu mekanika mediumo; sed kiam oni konas la kapablojn de intuicia mediumo, tio estas indiferenta, laŭ la cirkonstancoj. Mi volas diri, ke iuj komunikiĝoj postulas malpli grandan precizecon.”

XII. Inter la diversaj sistemoj, prezentitaj por klarigi la spiritismajn fenomenojn, unu konsistas en la supozo, ke la efektivan mediumecon havas tute inerta korpo, ekzemple korbo aŭ kartono, kiu servas kiel ilo; ke la manifestiĝanta Spirito identiĝas kun tiu objekto, farante ĝin ne nur vivanta, sed ankaŭ inteligenta; el tio venas la nomo **inertaj mediumoj**, donita al tiuj objektoj. Kiel ŝajnas al vi tia sistemo?

“Pri ĝi mi diras sole nur tion, ke se la Spirito estus enblovinta inteligenton en la kartonon, kune kun vivo, la kartono skribus memstare, sen la kunhelpo de la mediumo. Estus ja strange, se la homo, inteligenta estulo, fariĝus maŝino kaj se iu inerta objekto ricevus inteligenton. Tio estas unu el tiuj multenombraj sistemoj, elkovitaj de antaŭjuĝoj kaj kiuj fiaskas ĉe la sperto kaj la observado.”

XIII. Tre konata fenomeno povus pravigi la opinion, ke la animitaj inertaj korpoj havas pli ol vivon, t. e. ankaŭ inteligenton, nome tiu de la tabloj, korboj k. a., kiuj per siaj movoj esprimas koleron aŭ amon: ĉu tiel?

"Kiam iu homo kolere svingas bastonon, ne la bastono koleras, ankaŭ ne la mano, kiu tenas la bastonon, sed ja la penso, kiu direktas la manon. La tabloj kaj la korboj ne estas pli inteligentaj ol la bastono; ili havas neniom da inteligenta sento, sed ja obeas ian inteligenton. Unuvorte, la Spirito ne transformiĝas en korbon kaj ankaŭ ne enloĝiĝas en ĝin."

XIV. Se ne estas racie atribui inteligenton al tiuj objektoj, ĉu oni povas konsideri ilin ia variaĵo de mediumoj, nomante ilin **inertaj mediumoj**?

"Ĉi tio estas demando pri vortoj, kiu al ni ne multe gravas, se nur vi interkompreniĝas. Vi estas sufiĉe liberaj, por doni la nomon homo al marioneto."

XV. La Spiritoj posedas nur la lingvon de la penso, ne disponas la artikitan parolon; tial por ili ekzistas nur unu sola lingvo (*). Ĉu do iu Spirito povus per mediumo esprimi sian penson en lingvo, kiun li neniam parolis, kiam sur la Tero, kaj, en ĉi tiu okazo, kie li ĉerpus la vortojn, kiujn li uzas?

"Vi mem ĵus respondis vian demandon dirante, ke la Spiritoj posedas nur unu solan lingvon, nome la penson; ĉi tiun lingvon ĉiu komprenas, kiel la Spiritoj, tiel ankaŭ la homoj. Libera Spirito, turnante sin al la enkarniĝinta Spirito de mediumo, parolas al li nek france, nek angle, sed en la universala lingvo, nome en tiu de la penso. Por esprimi siajn pensojn en artikita, transigebla lingvo, li ĉerpas siajn vortojn el la vortoprovizo de la mediumo."

XVI. Se tiel estas, la Spirito certe ne povus esprimi siajn pensojn en lingvo alia, ol la lingvo de la mediumo; tamen kelkaj skribas en lingvoj nekonataj al la mediumo. Ĉu en tio ne estas ia memkontraŭdiraĵo?

"Rimarku unue, ke la mediumoj ne estas egale taŭgaj por ĉi tiu speco de ekzerciĝado, kaj due, ke la Spiritoj nur okaze estas pretaj tion fari, kiam ili opinias, ke tio povas esti iel utila. Por la komunikiĝoj ordinaraj kaj

(*) Tiel estas nur inter la Superaj Spiritoj; la malpli altaj parolas inter si, ankaŭ al ni, per efektivaj vortoj. — *La Trad.*

iom longaj ili prefere uzas iun lingvon familiaran al la mediumo, ĉar ĝi antaŭmetas al ili malpli grandan materialan kontraŭstaron.”

XVII. Ĉu la kapableco de iuj mediumoj, por skribi en lingvo por ili fremda, ne venus de tio, ke tiu lingvo estis al ili familiara en alia ekzistado kaj ke ili konservas pri ĝi ian memoron?

“Tio sendube povas okazi, sed ĝi ne estas ĝeneralaĵo; la Spirito povas kun iom da peno momente superi la materialan kontraŭstaron, kiun li renkontos. Same okazas, kiam la mediumo skribas, en sia propra lingvo, vortojn, kiujn li ne konas.”

XVIII. Ĉu analfabeto povus skribi kiel mediumo?

“Jes, sed tiam, kompreneble, leviĝas ankoraŭ pli granda mekanika baro, ĉar al la mano mankas la kutimo necese moviĝi por streki la literojn. Tio sama estas kun la mediumoj-desegnistoj, kiuj ne povoscias desegni.”

XIX. Ĉu iu tre malmulte inteligenta mediumo povus transsciigi komunikiĝojn de alta kategorio?

“Jes, pro tiu sama kaŭzo, kial mediumo povas skribi en lingvo, nekonata al li. La mediumeco mem ne dependas de la inteligenteco, kiel ankaŭ ne de la moralaj ecoj; ĉe manko de pli bona ilo la Spirito povas uzi tiun, kiun li tiam disponas; tamen estas kompreneble, ke, por komunikiĝoj de certa kategorio, li ja preferas tian mediumon, ĉe kiu li renkontas malplej da materialaj baroj. Eĉ plue: idioto ofte estas idioto nur pro la neperfekteco de siaj organoj, sed lia Spirito povas esti pli progresinta, ol kiel vi kredas; pri ĉi tio vi havas pruvon ĉe iaj elvokoj de idiotoj, ĉu mortintaj, ĉu vivantaj.”

*Rimarko.* Ĉi tio estas fakto, konstatita de la sperto. Mi kelkafoje elvokis vivantajn idiotojn, kiuj donis klarajn pruvojn pri sia identeco kaj en maniero tre saĝa kaj eĉ altnivela. Tia stato estas puno por la Spirito, kiu suferas de la ĝeno, en kiu li troviĝas. Idiota mediumo povas do iafoje liveri al la Spirito, kiu volas manifestiĝi, pli multe da rimedoj, ol kiel oni kredas. (Vd., en *Revue Spirite*, Julio 1860, artikolojn pri la *Frenologio* kaj pri la *Fiziognomiko*).

XX. El kio venas la kapableco de iuj mediumoj,

skribi versaĵojn, kvankam ili nenion scias pri poezio?

"Poezio estas lingvo. Ili povas skribi verse tiel same, kiel en lingvo, kiun ili ne konas; krom tio, ili eble estis poetoj en alia ekzistado, kaj, kiel mi jam diris al vi, la akiritajn sciojn la Spirito neniam perdas, ĉar li devas atingi perfektecon en ĉiaj aferoj. Kion do ili iam sciis, tio havigas al ili preterkonscie facilecon, kiun ili ne disponas en sia ordinara stato."

XXI. Ĉu tio sama okazas al tiuj, kiuj havas kapablecon specialan por desegno kaj por muziko?

"Jes; ankaŭ desegno kaj muziko estas manieroj esprimi la penson. La Spiritoj uzas tiujn ilojn, kies manipulado estas por ili la plej facila."

XXII. Ĉu la esprimo de la penso per poezio, desegno aŭ muziko dependas sole nur de la speciala kapableco de la mediumo aŭ de tiu de la komunikiĝanta Spirito?

"Jen de la mediumo, jen de la Spirito. La Superaj Spiritoj havas ĉiajn kapablecojn; la malsuperaj Spiritoj havas limitajn sciojn."

XXIII. Kial homo de eksterordinara talento en unu ekzistado ĝin plu ne havas en iu sekvanta ekzistado?

"Ne ĉiam tiel estas, ĉar ofte li plibonigas en unu ekzistado tion, kion li komencis en iu antaŭa; povas okazi, ke iu eksterordinara kapablo kelkan tempon dormetas, por lasi alian libere disvolviĝi. Tiu estas kvazaŭ latenta ĝermo, kiu poste reaperos kaj el kiu ĉiam restas iuj postesignoj aŭ almenaŭ ia malpreciza intuicio."

**224.** La libera Spirito sendube komprenas ĉiujn lingvojn, ĉar la lingvo estas la esprimo de la penso kaj la Spirito komprenas per la penso; sed por konigi tiun penson, li bezonas ian ilon: tia ilo estas la mediumo. La animo de la mediumo, kiu ricevas ies komunikaĵon, povas transkonigi ĝin nur per la organoj de la korpo; nu, tiuj organoj ne povas esti por iu nekonata lingvo egale flekseblaj, kiel por tiu lingvo familiara al ili. Mediumo, povoscianta nur la francan lingvon, ja okaze povas doni respondon ekzemple en la angla, se tio plaĉas al la Spirito; sed la Spiritoj, kiuj ja trovas la homan

parolon tro malrapida kompare kun la rapideco de la penso — des pli vere, ke ili ĝin kiom eble mallongigas —, senpacienciĝas pro la mekanika kontraŭstaro, kiun ili renkontas; tial ili ne ĉiam tion faras. Ankaŭ tial iu komencanta mediumo, kiu skribas malfacile kaj malrapide, eĉ en sia propra lingvo, ordinare ricevas nur mallongajn kaj ne disvolvitajn respondojn; tial la Spiritoj rekomendas fari per tia mediumo nur demandojn simplajn. Por demandoj profundaj estas necesa iu matura mediumo, ĉe kiu la Spirito trovus nenian mekanikan malfacilaĵon. Neniu prenus por sia antaŭleganto ian lernejanon, kiu nur silabus. Bona metiisto ne volonte uzas malbonajn ilojn.

Mi aldonu ankoraŭ unu konsideradon tre gravan koncerne la fremdajn lingvojn. Tiaj provoj estas ĉiam farataj el scivolemo kaj por eksperimentado; nu, nenio estas pli antipatia al la Spiritoj ol la eksperimentoj, al kiuj oni provas ilin submeti. La Superaj Spiritoj ĉiam rifuzas esti elprovataj kaj forlasas tian medion tuj, kiam oni volas ekiri tiun vojon. Kiel ili plezuras ĉe aferoj utilaj kaj seriozaj, tiel ili abomenas okupi sin pri aferoj frivolaj kaj sencelaj. Tiuj provoj, diros la nekredemuloj, celas konvinki nin, kaj tiu celo estas utila, ĉar ĝi povas varbigi adeptojn al la afero de la Spiritoj. Al ĉi tio la Spiritoj respondas: "Nia afero ne bezonas homojn sufiĉe fierajn, ke ili opinias sin nepre necesaj; ni vokas al ni **tiujn, kiujn ni volas**, kaj tiuj estas ofte la plej malgrandaj kaj plej humilaj. Ĉu Jesuo faris la miraklojn, pri kiuj la skribistoj petis lin? Kaj per kiaj homoj li helpis al si, por ŝanĝi la ordon de la mondo? Se vi volas konvinkiĝi, vi disponas rimedojn aliajn, ol perfortaĵoj; antaŭ ĉio submetu vin: tio ne estas laŭ la natura ordo, ke instruato trudus sian volon al sia instruanto."

El tio sekvas ke, ekster kelkaj esceptoj, la mediumo esprimas la penson de la Spirito per la mekanikaj rimedoj, kiujn li disponas, kaj ke la esprimado de tiu penso povas, eĉ devas ofte suferi de la neperfekteco de tiuj rimedoj. Ekzemple, neklerulo, kamparano, povas diri la plej belajn aferojn, esprimi la plej altajn, la plej filozofiajn pensojn, parolante kiel kamparano, ĉar, kiel ja

sciate, laŭ la Spiritoj la penso superregas ĉion. Ĉi tio respondas al la kontraŭdiro de iuj kritikantoj rilate la malkorektaĵojn de stilo kaj ortografio, pri kiuj oni povas riproĉi la Spiritojn, sed kiujn povas fari kiel la Spirito, tiel ankaŭ la mediumo mem. Alkroĉiĝi al tiaj aferoj estas montri ventkapecon. Ne malpli infanece estas doni al si la penon kun detala ekzakteco transskribi tiujn malkorektaĵojn, kiel mi kelkafoje vidis. Oni do povas ilin sen ia skrupulo rebonigi, escepte se ili karakterizas la komunikiĝantan Spiriton, okazo en kiu estas bone ilin restigi, kiel pruvon de identeco. Tiel ekzemple, mi vidis, ke iu Spirito ĉiam skribis **Jule** (sen la fina “s”), parolante al sia nepo, ĉar kiel homo lin ĝin tiel skribadis, kvankam la nepo, kiu servis kiel mediumo, perfekte sciis skribi sian nomon.

**225.** La sekvanta disertacio, memvole donita de du Superaj Spiritoj, kiuj manifestiĝis per plej altnivelaj komunikaĵoj, plej klare kaj komplete resumas la demandon pri la rolo de la mediumo:

“Kia ajn estas la speco de la skribivaj mediumoj, ĉu mekanikaj, ĉu duonmekanikaj, ĉu simple intuiciaj, niaj procedoj de komunikiĝado per ili ne esence diversas. Efektive, ni komunikiĝas kun la enkarniĝintaj Spiritoj mem tiel same, kiel kun la ĝustasencaj Spiritoj, per la sola disradiado de nia penso.

“Niaj pensoj ne bezonas la vestaĵon de la parolo, por esti komprenataj de la Spiritoj, kaj ĉiuj Spiritoj kaptas la penson, kiun ni deziras komuniki al ili, per tio sola, ke ni direktas al ili tiun penson, kaj tio dank’al iliaj intelektaj fakultoj; t. e. tia penso povas esti komprenata de tiaj aŭ tiaj Spiritoj, laŭ ilia progreso, dum por tiaj aliaj ĝi ne estas perceptebla, ĉar ĝi ĉe tiaj vekas nenian memoron, nenian scion, dormantan en la profundo de ilia koro aŭ cerbo. En ĉi tiu okazo la enkarniĝinta Spirito, kiu servas al ni kiel mediumo, pli taŭgas por transigi nian penson al la aliaj enkarniĝintaj, kvankam li ĝin ne komprenas, ol iu elkarniĝinta kaj malmulte progresinta, se ni estus devigitaj nin turni al ties helpo;

tiel estas, ĉar terano metas sian korpon, kiel ilon, al nia dispono, kion fari libera Spirito ne povas.

“Kiam do ni trovas en iu mediumo la cerbon provizita per scioj, akiritaj dum lia nuna ekzistado, kaj lian Spiriton riĉa per latentaj antaŭaj scioj, taŭgaj por faciligi niajn komunikaĵojn, ni prefere uzas lian kapablecon, ĉar per li la komunikiĝo estas por ni multe pli facila, ol per iu mediumo, kies inteligenteco estas malvasta kaj kies antaŭaj scioj atingis nur malaltan gradon. Ni komprenigos nin per kelke da klaraj kaj precizaj vortoj.

“Per mediumo, kies nuna aŭ iama inteligenteco estas disvolviĝinta, nia penso tuj komunikiĝas de Spirito al Spirito, per kapablo propra al la esenco de la Spirito mem. En ĉi tiu okazo ni trovas en la cerbo de la mediumo la elementojn taŭgajn, por havigi al nia penso la vestaĵon de la parolo, respondanta al tiu penso, kaj tio ĉu la mediumo estas intuicia, ĉu duonmekanika, ĉu pure mekanika. Tial, kia ajn la diverseco de la Spiritoj, kiuj komunikiĝas per mediumo, la diktaĵoj, kiujn li ricevas, kvankam venintaj de diversaj Spiritoj, portas pri formo kaj koloro la stampon personan de la mediumo. Efektive, kvankam la penso estas al li tute fremda, kvankam la temo ne apartenas al la medio, kie li havas sian ordinaran aktivecon, kvankam tio, kion ni volas diri, tute ne venas de li, tamen li ja influas la formon pro la ecoj propraj al lia individueco. Ĝi estas tute sama fakto, kiel tiu, se vi rigardas diversajn lokojn per okulvitroj nuancaj, verdaj, senkoloraj aŭ bluaj; kvankam la rigardataj lokoj aŭ objektoj troviĝas sur tute kontraŭaj flankoj kaj tute ne dependas unu de alia, ili tamen ja ĉiam ricevas la nuancon, naskitan de la koloro de la koncerna vitro. Aŭ pli bone, ni komparu la mediumojn kun tiuj bokaloj plenaj de travideblaj koloraj likvaĵoj, kiujn oni vidas en la montroŝrankoj de la apotekaj laborejoj. Nu, ni estas kvazaŭ lumoj, kiuj prilumas iajn moralajn, filozofiajn aŭ internajn lokojn per bluaj, verdaj aŭ ruĝaj mediumoj, tiamaniere, ke niaj lumradioj, devigite trairi vitrojn pli aŭ malpli bone facetitajn, pli aŭ malpli travideblajn, t. e. pli aŭ malpli inteligentajn mediumojn, venas al tiuj objektoj, kiujn ni volas prilumi, nur preninte

la koloron, aŭ pli bone, la apartan formon propran al tiuj mediumoj. Ni finu per lasta komparo: ni, Spiritoj, estas kvazaŭ muzikokomponistoj, kiuj verkis aŭ volas improvizi arion kaj kiuj disponas nur aŭ pianon aŭ violonon aŭ fluton aŭ fagoton aŭ ducendan fajfilon. Senkonteste sur la piano, la fluto aŭ la violono ni ludos nian pecon en maniero tre komprenebla por niaj aŭdantoj; kvankam la sonoj el la piano, la fagoto kaj la fluto estas esence diferencaj unu de alia, nia komponaĵo tamen estas ja idente la sama, ne parolante pri la sononuancoj. Sed se ni disponas nur ducendan fajfilon aŭ tubistan funelon, jen staras antaŭ ni io malfacila.

“Efektive, kiam ni devas servigi al ni nelertajn mediumojn, nia laboro fariĝas multe pli longa kaj peniga, ĉar tiam ni devas uzi nekompletajn esprimojn, kio estas komplikaĵo por ni; tiam ni ja devas diserigi niajn pensojn kaj dikti vorton post vorto, literon post litero, kio estas enuiga kaj laciga por ni kaj efektiva kontraŭstaro al la rapideco kaj elvolviĝo de niaj manifestaĵoj.

“Tial ni estas feliĉaj trovi mediumojn ĝuste alkonformajn, taŭge alpreparitajn, provizitajn per materialoj pretaj funkcii, unuvorte, bonajn instrumentojn, ĉar tiam nia perispirito, agante sur la perispiriton de tiu, kiun ni ektrancigas, sole nur impulsas la manon, kiu servas al ni kiel plumingo aŭ krajoningo; kontraŭe, per nesufiĉe lertaj mediumoj ni estas devigataj fari laboron analogan al tiu, kiun ni faras, kiam ni komunikiĝas per frapoj, t. e. kunmetante, litero post litero, vorto post vorto, ĉiun el la frazoj, esprimantaj la pensojn, kiujn ni volas komuniki.

“Ĝuste pro ĉi tiuj motivoj ni prefere nin turnis al la klarmensaj kaj instruitaj klasoj por la disvastigo de Spiritismo kaj por la disvolvado de la mediumaj skribokapabloj, kvankam ĝuste al tiaj klasoj apartenas la homoj plej nekredemaj, plej ribelemaj kaj plej malmoralaj. Tiel estas tial, ke, kiel ni hodiaŭ lasas al la ĵonglemaj kaj malmulte progresintaj Spiritoj la plenumadon de la materialaj komunikiĝoj per frapoj kaj alportoj, tiel same la nemulte seriozaj homoj inter vi preferas la spektaklon de la fenomenoj, kiuj frapas al ili la okulojn kaj

orelojn, ol la pure spiritajn, pure psikologiajn fenomenojn.

“Kiam ni volas procedi per meminiciataj diktatoj, ni agas sur la cerbon, sur la arkivojn de la mediumo, kaj kunmetas niajn materialojn el la elementoj, kiujn li liveras al ni, kaj tio tute sen lia konscio; tio estas, kvazaŭ ni prenus el lia monujo la tie ekzistantajn sumojn kaj aranĝus la monerojn laŭ la ordo, kiu ŝajnus al ni la plej konvena.

“Sed kiam la mediumo mem volas pridemandi nin en tia aŭ tia maniero, estas bone, ke li serioze meditu pri tiu paŝo, por fari siajn demandojn metode, tiel faciligante nian penon respondi al ili. Tiel estu, ĉar, kiel ni diris al vi en antaŭa instruo, en via cerbo ofte regas terure implika malordo, kaj por ni estas ne nur malfacile, sed ankaŭ penige, moviĝi en la labirinto de viaj pensoj. Kiam demandojn faros krompersonoj, estas bone, estas utile, ke la serio de la demandoj estu antaŭe konigita al la mediumo, por ke ĉi tiu identiĝu kun la Spirito de la elvokonto kaj, por tiel diri, estu sorbigita per li; por ni tiam estos multe pli facile respondi, dank’al la agordeco inter nia perispirito kaj la perispirito de la mediumo, servanta al ni kiel interpretanto.

“Sendube ni povas paroli pri matematiko per mediumo, ĝin tute ne scianta; sed ofte la Spirito de tiu mediumo posedas sciojn pri tiu afero en latenta stato, t. e. kiel propraĵon ne de la enkarniĝinta estulo, sed de la estulo fluidaĵa, ĉar lia nuna korpo estas ilo malvolontema aŭ kontraŭa al tiuj scioj. Tiel same estas pri astronomio, poezio, medicino kaj la diversaj lingvoj, kiel ankaŭ pri ĉiuj ceteraj scioj propraj al la homa genro.

“Fine, ni disponas ankoraŭ la rimedon de la peniga ellaborado, uzatan en la okazo de mediumoj tute fremdaj al la koncerna afero, nome la kunmetadon de la literoj kaj vortoj, kiel en tipografio.

“Kiel ni diris, la Spiritoj ne bezonas vesti siajn pensojn; ili kaptas kaj komunikas la penson pro tio sola, ke ĝi ekzistas en ili. La enkorpaj estuloj, kontraŭe, povas kapti la penson, se nur ĉi tiu portas ian veston. Dum litero, vorto, substantivo, verbo, unuvorte, la frazo, est-

as al vi necesaj, por ke vi eĉ mense perceptu la ideojn, por ni estas necesa nenia videbla aŭ tuŝebla formo.

ERASTO kaj TIMOTEO.”

*Rimarko*. Ĉi tiu analizo de la rolo de la mediumoj kaj de la procedoj, per kiuj la Spiritoj komunikiĝas, estas tiel klara, kiel logika. El ĝi sekvas tiu principo, ke la Spirito ĉerpas *ne siajn ideojn*, sed la materialojn necesajn por ilin esprimi, el la cerbo de la mediumo, kaj ke ju pli riĉa per materialoj estas tiu cerbo, des pli facila estas la komunikiĝo. Kiam la Spirito esprimas sian penson en lingvo familiara al la mediumo, li trovas en ĉi tiu tute pretaj la vortojn, por vesti la ideon; se en lingvo fremda al la mediumo, li en ĉi tiu trovas ne la vortojn, sed nur la literojn; tial la Spirito estas devigata dikti, por tiel diri, literon post litero, ĝuste same, kiel se iu volus, ke skribu germane homo, scianta de ĉi tiu lingvo eĉ ne unu vorton. Se la mediumo scias nek legi, nek skribi, li eĉ la literojn ne posedas; estas do necese konduki lian manon, kiel oni agas kun novica lernejano, kaj jen ankoraŭ pli granda baro, kiun la Spirito devas formovi. Ĉi tiuj fenomenoj povas do fariĝi kaj pri ili estas multenombraj ekzemploj; sed oni komprenas, ke tia procedo ne tre alkonformiĝas al la amplekso kaj rapideco de komunikaĵoj kaj ke la Spiritoj devas preferi la plej facilajn ilojn, aŭ, kiel ili diras, tiujn mediumojn bone alpreparitajn al ilia celo.

Se tiuj, kiuj postulas ĉi tiujn fenomenojn kiel konvinkrimedon, estus antaŭe studintaj la teorion, ili do scius, en kiaj esceptaj kondiĉoj okazas tiuj faktoj.

———————

ĈAPITRO XX

# PRI LA MORALA INFLUO DE LA MEDIUMO

*Diversaj demandoj. Disertacio de Spirito pri la morala influo*

**226.** I. Ĉu la disvolviteco de la mediumeco iel rilatas kun la morala nivelo de la mediumo?

"Ne; la kapablo mem dependas de la organismo, sed ne de la morala nivelo de la mediumo; ne same estas pri ĝia uzado, kiu povas esti bona aŭ malbona, laŭ la ecoj de la mediumo."

II. Oni ĉiam diras, ke la mediumeco estas ia donaco de Dio, ia graco, ia favoro; kial do ĝi ne estas privilegio de la virtaj homoj kaj kial oni vidas homojn malnoblajn, kiuj ĝin plej altgrade havas, sed misuzas?

"Ĉiaj kapabloj estas favoroj, por kiuj oni devas danki Dion, ĉar ekzistas homoj, kiuj ilin ne ricevis. Vi povus demandi ankaŭ, kial Dio donas bonan vidadon al malbonfarantoj, lertecon al friponoj, elokventecon al homoj, kiuj ĝin uzas por malica parolo. Tiel same pri la mediumeco: malestimindaj homoj ĝin ricevis, ĉar pli ol la ceteraj ili bezonas ĝin, por sin korekti. Ĉu vi pensas, ke Dio rifuzas savrimedojn al la kulpuloj? Li ilin malavare disĵetas sur ties vojon; **Li ilin metas en ties manojn**, kaj tiujn koncernas profiti de ili. Ĉu Judas, la perfidinto, ne faris miraklojn kaj ne resanigis malsanulojn kiel apostolo? Dio permesis, ke li havu tiun kapablecon, por fari lian perfidon pli abomeninda."

III. Ĉu la mediumoj, kiuj misuzas sian kapablon, kiuj ne uzas ĝin por bono aŭ kiuj rikoltas el ĝi nenian profiton por sia klereco, suferas la sekvojn de tia konduto?

“Se ili ĝin misuzas, ili do estos duoble punitaj, ĉar ili havas ankoraŭ unu rimedon por sin instrui, sed profitas de ĝi neniom. Homo klare vidanta, kiu stumblas, estas pli riproĉinda ol blindulo, kiu falas en foson.”

IV. Per kelkaj mediumoj estas nepetite kaj preskaŭ konstante donataj komunikaĵoj pri unu sama temo, ekzemple pri iuj moralaj demandoj, pri iuj malbonaĵoj: ĉu tio havas ian celon?

“Jes, kaj tia celo estas instrui ilin pri iu ofte ripetata objekto aŭ korekti al ili iajn malbonaĵojn; tial al unu la Spiritoj senĉese parolas pri fiero, al alia pri karito; nur ĝissata tamburado povas fine malfermi al ili la orelojn. Nenia mediumo, kiu misuzas sian kapablon, ĉu el ambicio, ĉu el intereso, aŭ kiu kompromitas ĝin pro iu gravega malperfektaĵo, kiel fiero, egoismo, ventanimeco k. a., iam kaj iam ne ricevas de la Spiritoj kelke da admonoj; malbone estas, ke ili tiujn admonojn pleje ne rilatigas al si mem.”

*Rimarko.* La Spiritoj ofte uzas takton en siaj lecionoj; ĉi tiujn ili donas nerekte, por ke havu pli da merito tiu, kiu scias apliki kaj profiti el iliaj instruoj; sed iuj homoj estas sufiĉe blindaj kaj fieraj, por ne rekoni, ke ili apartenas al la kadro antaŭ siaj okuloj. Eĉ plue: se la Spirito komprenigas al ili, ke pri ili mem estas la afero, ili koleras kaj kvalitigas lin mensogulo aŭ triviala ŝercemulo. Ĉi tio sufiĉas por pruvi, ke la Spirito pravas.

V. Ĉu en la lecionoj, diktitaj al la mediumo en maniero ĝenerala, sen ia persona aplikado, la mediumo ne agas kiel pasiva ilo, por instruado de aliulo?

“Tiuj avertoj kaj konsiloj estas ofte diktataj, celante ne lin persone, sed ja aliajn, al kiuj ni povas nin turni sole per tiu mediumo; li tamen devas el ili preni sian parton, se memestimo lin ne blindigas.

“Ne pensu, ke mediumeco estas donata, por korekti nur unu aŭ du homojn; ho ne! La celo estas pli ampleksa: temas pri la homaro. Mediumo estas ilo tro malmulte grava kiel individuo; tial, kiam ni donas instruojn, kiuj devas utili al ĉiuj homoj, ni uzas la servemon de tiuj, kiuj posedas la necesan ekzercitecon. Sed estu

certa, ke venos tempo, kiam bonaj mediumoj ekzistos en tia granda nombro, ke la bonaj Spiritoj ne bezonos uzi netaŭgajn ilojn.”

VI. Ĉar la moralaj ecoj de la mediumo tenas malproksime la neperfektajn Spiritojn, kiel do mediumo, dotita per bonaj ecoj, transdiras malverajn aŭ maldelikatajn respondojn?

“Ĉu vi konas ĉiujn faldojn de lia animo? Cetere, eĉ se li ne estas malvirta, li eble estas ventanima kaj frivola; krom tio li iafoje devas lerni lecionon, por tenadi sin garde.”

VII. Kial la Superaj Spiritoj permesas, ke homoj, dotitaj per potenca mediumeco kaj kiuj povus fari multe da bono, estu iloj de eraro?

“Ili penas influi tiujn homojn, sed kiam tiuj konsentas esti kondukataj sur malbona vojo, ili lasas tiujn iradi. Tial ili kun naŭzo uzas ties servemon, ĉar **vero ne povas esti interpretata de mensogo**.”

VIII. Ĉu estas absolute ne eble ricevi bonajn komunikaĵojn per neperfekta mediumo?

“Neperfekta mediumo povas iafoje ricevi bonajn aferojn, ĉar, se li posedas belan kapablon, bonaj Spiritoj en speciala okazo povas helpi al si per li manke de alia; sed tio estas ciam por momento, ĉar tuj kiam ili trovas iun pli taŭgan, ili tiun preferas.”

*Rimarko*. Estas rimarkinde, ke kiam la bonaj Spiritoj konstatas, ke iu mediumo jam ne ricevas bonan influon kaj per siaj malperfektaĵoj fariĝas havo de trompemaj Spiritoj, ili preskaŭ ĉiam estigas cirkonstancojn, kiuj senvualigas liajn mizeraĵojn kaj forigas lin for de la seriozaj kaj bonintencaj homoj, kies bonfidon li povus ekspluati. En ĉi tiu okazo, kiaj ajn liaj kapabloj, lia foriĝo ja ne estas bedaŭrinda.

IX. Kia la mediumo, kiun oni povus nomi perfekta?

“Perfekta, ho ve! vi ja scias, ke perfekteco ne ekzistas sur la Tero, alie vi ĉi tie ne estus; diru do “bona mediumo”, kaj tio jam estas multe, ĉar tiajn oni malofte trovas. Perfekta mediumo estus tiu, kiun malicaj Spiritoj estus neniam **kuraĝintaj** provi trompi. La plej

bona estas tiu, kiu, simpatiante nur kun la bonaj Spiritoj, estas la malplej ofte trompita."

X. Se li simpatias nur kun bonaj Spiritoj, kiel do ili povas permesi, ke li estu trompata?

"La bonaj Spiritoj iafoje permesas, ke tio okazu eĉ al la plej bonaj mediumoj, por ekzerci ilian juĝadon kaj instrui ilin distingi tion veran de tio malvera; plue, kiel ajn bona estas mediumo, li neniam estas tiel perfekta, ke li ne povus esti atakita ĉe ia malforta flanko: tio devas servi al li kiel leciono. La malveraj komunikaĵoj, kiujn li de tempo al tempo ricevas, estas avertoj, por ke li ne kredu sin neerarema kaj ne fieriĝu, ĉar ja mediumo, kiu ricevas la plej rimarkindajn komunikaĵojn, havas nenian motivon por sin glori per ili, tiel same, kiel gurdisto, kiu sonigas belajn ariojn, turnante la krankon de sia instrumento."

XI. Kiaj la kondiĉoj necesaj, por ke la parolo de la Superaj Spiritoj venu al ni libera de ĉia ŝanĝo?

"Voli bonon; forpuŝi **egoismon** kaj **fieron**: ambaŭ kondiĉoj estas ja necesaj."

XII. Se la parolo de la Superaj Spiritoj venas al ni nur en malfacile haveblaj kondiĉoj, ĉu do tio ne estas baro al la diskonigo de la vero?

"Ne, ĉar la lumo ĉiam atingas ĉiun, kiu volas ĝin ricevi. Ĉiu ajn, kiu volas ricevi lumon, devas foriĝi de mallumo, kaj mallumo sidas en la malpureco de la koro.

"Tiuj Spiritoj, kiujn vi rigardas kiel la personiĝon de bono, ne volonte alkuras al la voko de homoj, kies koron makulas fiero, profitamo kaj manko de karito.

"Ĉiu do, kiu volas instruiĝi, demetu de si ĉian homan vantamon kaj humiligu sian prudenton antaŭ la senlima potenco de la Kreinto: ĉi tio estas la plej bona pruvo de lia sincereco, kaj ĉi tiun kondiĉon ĉiu povas plenumi."

**227.** Se la mediumo, koncerne la plenumadon, estas nenio krom ia ilo, li tamen en rilato morala havas tre grandan influon. Ĉar, por komunikiĝi, la libera Spirito identiĝas kun la Spirito de la mediumo, tial tiu identiĝo povas fariĝi nur en la okazo, se inter ili ekzistas simpatio kaj, se tiel diri, agordiĝemo. La animo agas sur

la liberan Spiriton, lin iel altirante aŭ repuŝante, laŭ la grado de ilia simileco aŭ malsimileco: nu, la bonaj agord-as kun la bonaj, kaj la malbonaj kun la malbonaj; el tio sekvas, ke la moralaj ecoj de la mediumo havas plej ĉefan influon sur la specon de la Spiritoj, kiuj komu-nikiĝas per li. Se li estas malvirta, la malsuperaj Spi-ritoj alamasiĝas ĉirkaŭ lin kaj ĉiam estas pretaj okupi la lokon de la bonaj Spiritoj, kiujn oni elvokis. Tiuj ecoj, kiuj prefere altiras la bonajn Spiritojn, estas: bon-eco, bonvolo, simpleco de koro, amo al la proksimulo, indiferenteco pri la materiaj aferoj; la malbonaĵoj, kiuj ilin repuŝas, estas: fiero, egoismo, envio, ĵaluzo, malamo, profitamo, voluptemo kaj ĉiuj pasioj, kiuj sklavigas la homon al la materio.

**228.** Ĉiuj moralaj malperfektaĵoj estas iaj aliaj pordoj, malfermitaj al la malicaj Spiritoj; sed tiu, kiun ili la plej lerte ekspluatas, estas fiero, ĉar ĉi tiun oni la malplej volonte konfesas al si mem. Fiero jam pereigis multe da mediumoj, posedantaj la plej belajn kapablojn kaj kiuj, sen ĝi, povus fariĝi rimarkindaj kaj tre utilaj iloj; ĉe ilia falo sub la potencon de mensogemaj Spiritoj, iliaj kapabloj unue difektiĝis, poste nuliĝis, kaj pli ol unu el tiaj mediumoj estis humiligitaj de la plej amaraj disreviĝoj.

Fiero ĉe la mediumoj elmontriĝas per sendubaj sign-oj, sur kiujn estas des pli necese turni la atenton, ĉar ĝi estas unu el la malvirtoj, kiuj plej forte devas inspiri malkonfidon al la vereco de iaj komunikaĵoj. La unua signo estas blinda konfido al la supereco de tiuj komu-nikaĵoj kaj al la neeraremo de la Spirito, kiu ilin donas; el tio sekvas ia malŝato al ĉio, kio ne per ili venas, ĉar ili opinias sin la privilegiuloj de la vero. La prestiĝo de la laŭtaj nomoj, per kiuj paradas la Spiritoj, iliaj su-pozataj protektantoj, ilin blindigas, kaj ĉar ilian mem-estimon vundas la konfeso, ke ili estas trompataj, tial ili repuŝas ĉian konsilon; ili eĉ evitas ĝin, foriĝante de siaj amikoj kaj de ĉiu, kiu ajn povus malfermi al ili la okulojn; se ili bonvolas aŭskulti iun, ili neniel atentas ties opinion, ĉar dubi la superecon de la Spirito, kiu per

ili manifestiĝas, estus kvazaŭ profanado. Ili ofendetiĝas ĉe la plej malgranda kontraŭparolo, ĉe simpla kritika observo, kaj eĉ ekmalamas tiujn homojn mem, kiuj faris al ili servojn. Profitante tiun apartiĝon, estigitan de la Spiritoj, kiuj ne volas antaŭ si kontraŭparolantojn, tiuj samaj Spiritoj povas facile nutri iliajn iluziojn kaj igi ilin preni kiel superegajn aferojn la plej frapantajn absurdaĵojn. Sekve, absoluta konfido al la supereco de tio, kion ili ricevas, malŝato al ĉio, kio ne per ili venas, senpripensa graveco, atribuata al laŭtaj nomoj, forpuŝo de konsiloj, malica rilato al ĉia kritiko, foriĝo for de tiuj, kiuj povas eldiri opiniojn sen kaŝita intereso, kredo je sia lerteco malgraŭ nesufiĉa sperto: tiaj la karakterizaĵoj de la fieraj mediumoj.

Oni konsentu ankaŭ, ke la fieron ĉe mediumo ofte vekas lia kutima ĉirkaŭantaro. Se li posedas iom eksterordinarajn kapablojn, li estas serĉata kaj gloregata; li opinias sin nepre necesa kaj baldaŭ afektas memsufiĉecon kaj malŝaton, kiam li kunlaboras. Pli ol unu fojon mi havis kaŭzon por bedaŭri miajn laŭdojn al iuj mediumoj, en la intenco ilin kuraĝigi.

**229.** Flanke de tio, mi elmontru la bildon de la efektive bona mediumo, de tiu, al kiu oni povas konfidi. Mi antaŭ ĉio imagas, ke li havas sufiĉe grandan facilecon de laborado, por ebligi al la Spiritoj komunikiĝi libere, renkontante nenian materialan baron. Plue, kion plej multe gravas konsideri, tio estas la naturo de la Spiritoj, kiuj lin kutime influas, kaj pri tio ne al la nomo, sed al la parolo li devas atenti. Li devas neniam forgesi, ke la simpatio, kiun li akiros al si inter inter la bonaj Spiritoj, estas en rekta rilato al tio, kion li faros por forpeli la malicajn. Konvinkite, ke lia kapablo estas naturdoto, donacita al li por bono, li neniel penas profiti el ĝi, tute ne sin gloras per ĝi. Li akceptas la bonajn komunikaĵojn, al li donitajn, kiel favoron, pri kiu li devas peni fariĝi inda je ĝi per sia boneco, bonvolo kaj modesteco. La unua fieras pro siaj rilatoj kun la Superaj Spiritoj; ĉi tiu humiliĝas ĉe tio, ĉar li opinias sin tro malalta rilate tiun favoron.

**230.** La sekvantan instruon pri ĉi tiu temo donis al mi unu Spirito, de kiu mi jam konigis plurajn komunikaĵojn:

"Ni jam diris: la mediumoj, nur kiel mediumoj, havas sur la komunikiĝojn de la Spiritoj influon nur duarangan; ilia rolo estas tia sama, kiel tiu de elektra aparato, kiu transsendas telegrafajn depeŝojn el unu loko al alia malproksima sur la Tero. Tiel, kiam ni volas dikti komunikaĵon, ni agas sur la mediumon same, kiel la telegrafisto manipulas sian aparaton; t. e. kiel la tiktako de la telegrafo desegnas, en la distanco de miloj da mejloj sur paperstrio, la signojn, kiuj reproduktas la depeŝon, same, tra la grandegaj distancoj inter la mondoj videbla kaj nevidebla, inter la mondoj senmateria kaj enkarna, ni komunikas tion, kion ni volas instrui al vi, per la mediuma aparato. Sed ankaŭ, kiel la atmosferaj influoj agas kaj iafoje malhelpas la transsendojn de la elektra telegrafo, same la morala influo de la mediumo agas kaj iafoje malhelpas la transsendon de niaj transtombaj depeŝoj, ĉar ni estas devigataj igi ilin trapasi medion, kiu ilin kontraŭas. Tamen tian influon plej ofte nuligas nia energio kaj volo, kaj montriĝas nenia malhelpa ago. Efektive, la diktaĵoj kun alta filozofia signifo, la komunikiĝoj kun perfekta moraleco, estas iafoje transigataj per mediumoj ne tute taŭgaj por tiaj superaj instruoj, dum, aliflanke, malmulte edifaj komunikiĝoj venas ankaŭ iafoje per mediumoj, kiuj forte hontas, ke ili servis kiel kondukilo al tiaj paroloj.

"Kiel ĝeneralan tezon oni povas aserti, ke la Spiritoj altiras al si la Spiritojn similajn al ili kaj ke la Spiritoj el la altaj plejadoj malofte komunikiĝas per malbonaj kondukiloj, se ili disponas bonajn aparatojn, alivorte, bonajn mediumojn.

"La ventanimaj kaj nemulte seriozaj mediumoj altiras do samnaturajn Spiritojn; tial iliajn komunikaĵojn stampas banalaĵoj, frivolaĵoj, ideoj sen intersekvo kaj ofte forte heterodoksaj, spiritisme parolante. Sendube ili povas diri, kaj iafoje diras, ion utilan, sed precipe en ĉi tiu okazo estas necesa severa kaj skrupula ekzameno,

ĉar inter tiujn utilajn aferojn iuj hipokritaj Spiritoj lerte kaj kun antaŭplanita perfidemo enŝovas pure fantaziajn faktojn, mensogajn asertojn, por trompi la bonfidon de siaj aŭskultantoj. Oni tiam devas senindulge forstreki ĉian vorton, ĉian frazon dubasencajn kaj el la diktaĵo konservi nur tion, kion la logiko akceptas aŭ kion la Doktrino jam instruis. Tiaj komunikaĵoj estas timindaj nur rilate la spiritistojn, kiuj laboras solaj, kaj la grupojn nove fonditajn aŭ nemulte instruitajn pri la afero, ĉar en medioj, kie la adeptoj estas pli progresintaj kaj akiris al si sperton, la korniko vane paradas per la plumoj de la pavo: ĝi ĉiam estas senkompate elpelata el tiu medio.

"Mi ne parolos pri tiaj mediumoj, kiuj plezuras petante kaj aŭskultante obscenajn komunikiĝojn: ni lasu ilin ĝuadi la societon de la cinikaj Spiritoj. Cetere iaj komunikiĝoj serĉas mem al si solulecon kaj izolitecon; ĉiaokaze ili povus veki nur malŝaton kaj naŭzon ĉe la anoj de la filozofiaj kaj seriozaj grupoj. Sed la morala influo de la mediumo fariĝas efektive sentebla tiam, kiam la mediumo anstataŭigas per siaj personaj ideoj la ideojn de la Spiritoj, kiuj penas ilin enblovi en lin, kaj ankaŭ tiam, kiam li ĉerpas el sia imagpovo fantaziajn teoriojn, pri kiuj li mem bonafide kredas, ke ili estas rezultato de ia intuicia komunikiĝo. Tiam oni ofte povas veti mil kontraŭ unu, ke tio estas nura rebildiĝo de la persona Spirito de la mediumo; eĉ okazas ĉi tiu kurioza fakto, ke la mano de la mediumo iafoje moviĝas preskaŭ mekanike, pelata de ia duaranga mokema Spirito. Jen kontraŭ ĉi tiun provilon rompiĝas la ardaj imagemoj, ĉar, trenataj de la impetiĝo de siaj propraj ideoj, de la falsbrileco de siaj literaturaj scioj, la mediumoj ignoras la modestan diktaton de tiu saĝa Spirito kaj, forlasante la kaptitaĵon por ĝia ombro, anstataŭigas tiun parolon per ŝvelaĉa parafrazo. Ankaŭ ĉe tia timeginda rifo fiaskas ambiciaj personoj, kiuj, manke de komunikiĝoj, kiujn la bonaj Spiritoj al ili rifuzas, prezentas siajn proprajn verkojn kiel verkon de tiuj Spiritoj mem. Jen kial la estroj de spiritistaj grupoj devas havi delikategan takton kaj eksterordinaran sagacecon, por distingi la aŭtentik-

ajn komunikaĵojn de tiuj, kiuj tiaj ne estas, kaj por ne vundi la mediumojn, kiuj mem faras al si iluzion.

“Ĉe dubo, detenu vin, diras unu el viaj malnovaj proverboj; akceptu do nenion, kio en viaj okuloj ne estas evidente certa. Se aperas nova opinio, kiel ajn malmulte dubinda ĝi ŝajnas al vi, provu ĝin en la fandujo de la racio kaj logiko; kion la racio kaj la natura saĝo malaprobas, tion decideme forĵetu: pli bone estas rifuzi dek veraĵojn, ol akcepti eĉ unu solan mensogon, eĉ unu solan malveran teorion. Efektive, sur tia teorio vi povus konstrui tutan sistemon, kiu falegus ĉe la unua blovo de la vero, simile kiel monumento, starigita sur moviĝema sablo, dum se vi hodiaŭ malakceptos iujn veraĵojn, ĉar ili ne logike kaj ne klare estas pruvitaj al vi, post kelka tempo iu forte frapanta fakto aŭ iu nerefutebla pruvo jesigos ilian aŭtentikecon.

“Memoru tamen, ho spiritistoj, ke ne eblaj por Dio kaj por la bonaj Spiritoj estas sole nur maljusteco kaj malbonago.

“Hodiaŭ Spiritismo estas sufiĉe disvastiĝinta inter la homoj kaj jam sufiĉe moraligis la sincerajn adeptojn de sia sankta doktrino, por ke la Spiritoj ne estu devigitaj uzi malbonajn ilojn, neperfektajn mediumojn. Se do nun iu mediumo, kia ajn li estas, donas, pro sia konduto aŭ moroj, pro sia fiereco, pro sia manko de amo kaj de karito, veran temon por suspekto, forpuŝu, forpuŝu liajn komunikaĵojn, ĉar ia serpento kaŝiĝas en la herbejo. Jen mia konkludo pri la morala influo de la mediumoj.

ERASTO.”

———————

ĈAPITRO XXI

# PRI LA INFLUO DE LA MEDIO

**231.** I. Ĉu la medio, kie troviĝas la mediumo, havas ian influon sur la manifestiĝojn?

"Ĉiuj Spiritoj, starantaj apud la mediumo, helpas lin kiel por bono, tiel ankaŭ por malbono."

II. Ĉu la Superaj Spiritoj ne povas superforti la malbonvolon de la enkarna Spirito, kiu servas al ili kiel interpretanto, kaj de tiuj Spiritoj, starantaj apud la mediumo?

"Ili tion povas, kiam ili trovas ĝin utila kaj laŭ la intenco de la persono, kiu sin turnas al ili. Ni jam diris: la pli altrangaj Spiritoj iafoje povas komunikiĝi el speciala favoro, malgraŭ la neperfekteco de la mediumo kaj de la medio, sed tiam ĉi tiuj tute ne partoprenas en la okazaĵoj."

III. Ĉu la Superaj Spiritoj klopodas por konduki la frivolajn kunsidojn al pli serioza ideoj?

"La Superaj Spiritoj ne venas al tiaj kunsidoj, pri kiuj ili scias, ke ilia ĉeesto estas tie senutila. Al la medioj nemulte instruitaj, sed en kiuj ekzistas sincereco, ni volonte venas, eĉ tiam, se ni tie trovus nur nemulte taŭgajn ilojn; sed al la instruitaj medioj, kie regas ironio, ni ne venas. En ĉi tiuj lastaj estas necese paroli al la okuloj kaj al la oreloj: tio estas la rolo de la frapantaj kaj trompemaj Spiritoj. Estas bone, ke homoj, kiuj pavas pro sia klereco, estu humiligitaj de Spiritoj malpli instruitaj kaj malpli progresintaj."

IV. Ĉu la veno al seriozaj kunsidoj estas malpermesita al la malsuperaj Spiritoj?

"Ne, ili iafoje tie staras, por profiti de la instruoj,

al vi donataj; sed ili silentas, **simple kiel stultuloj en kunveno de saĝuloj**.”

**232.** Estus eraro pensi, ke iu devas esti mediumo, por altiri al si la estulojn el la nevidebla mondo. La spaco estas plena de ili: sendisiĝe ili staras ĉirkaŭ kaj apud ni, ili nin vidas, nin observas, sin enmiksas en niajn kunvenojn, nin sekvas aŭ foriĝas de ni, laŭ tio, ĉu ni ilin altiras aŭ repuŝas. La mediumeco ne partoprenas en tio: ĝi estas nenio krom komunikrimedo. El tio, kion ni vidis pri la kaŭzoj de simpatio aŭ antipatio de la Spiritoj, oni facile komprenus, ke sendube ni estas ĉirkaŭitaj de tiuj, kiuj agordas kun nia propra Spirito, laŭ tio, ĉu ĉi tiu estas nobla aŭ malnobla. Ni nun konsideru la moralan staton de nia planedo, kaj oni komprenos, kia speco de Spiritoj el tiuj liberaj certe estas la plej multenombraj apud ni. Se ni konsideros ĉiun popolon aparte, ni povos, laŭ ilia superreganta karaktero, iliaj okupoj, iliaj pli aŭ malpli moralaj kaj **homamaj** sentoj, diri, al kiaj klasoj apartenas la plimulto el la Spiritoj inter ni.

Deirante de ĉi tiu principo, ni imagu kolektiĝon de homoj ventanimaj, senkonsideraj, okupitaj de siaj plezuroj: kiaj Spiritoj tie troviĝas en plej granda nombro? Tiuj sendube ne estus Superaj Spiritoj, tiel same, kiel niaj scienculoj kaj filozofoj tien ne irus, por pasigi sian tempon. Tiel, kie ajn homoj kolektiĝas, tie sin trovas kaŝita aro da estuloj, kiuj simpatias iliajn bonajn aŭ malbonajn ecojn, kaj tio **ekster ĉia penso pri elvokado**. Ni nun akceptu, ke ili havas la eblon konversacii kun la estuloj de la nevidebla mondo pere de iu interpretanto, t. e. per iu mediumo: kiaj respondos al ilia elvoko? Evidente tiuj, kiuj tie staras, tute pretaj, kaj kiuj elserĉas al si ĉian okazon, por komunikiĝi. Se en frivola societo oni elvokos iun Superan Spiriton, li eble venos kaj eĉ diros kelke da saĝaj vortoj, same kiel bona paŝtisto alkuras al la alvoko de siaj devojiĝintaj ŝafoj; sed se li konstatas, ke li tie ne estas komprenata, nek aŭskultata, li foriras, same, kiel farus ĉiu el ni, kaj la aliaj povas agi tute libere.

**233.** Ne ĉiam sufiĉas, ke iu societo estas serioza,

por ricevi altajn komunikaĵojn; ekzistas homoj, kiuj neniam ridas, kaj tamen ilia koro ne estas pura; nu, la bonajn Spiritojn altiras precipe la koro. Nenia morala kondiĉo esceptas la komunikiĝojn de la Spiritoj, sed se ies kondiĉo estas malbona, tiu komunikiĝas kun la Spiritoj, siaj similuloj, kaj tiuj sin ne detenas trompi lin kaj karesi liajn antaŭjuĝojn.

Oni el tio vidas la grandegan influon de la medio sur la konsiston de la inteligentaj manifestiĝoj; sed tiu influo ne fariĝas tiel, kiel pretendis kelkaj homoj tiam, kiam oni ankoraŭ ne konis, kiel hodiaŭ, la mondon de la Spiritoj, kaj antaŭ ol pli konkludigaj eksperimentoj klarigis la dubojn. Kiam komunikaĵoj akordas kun la opinio de la ĉeestantoj, tiel estas ne tial, ke tiu opinio rebildiĝus en la Spirito de la mediumo, kvazaŭ sur ia spegulo, sed tial, ĉar apud la ĉeestantoj staras Spiritoj, simpatiantaj kun ili kiel por bono, tiel por malbono, kaj tute same opiniantaj kiel ili. Pruvas ĝin tio, ke se ili havas sufiĉan forton por altiri al si aliajn Spiritojn, ol tiuj, starantaj apud ili, tiu sama mediumo sin turnos al ili per tute alia parolo kaj diros al ili aferojn, kiuj havas nenian rilaton kun iliaj ideoj kaj konvinkoj.

Resume: la kondiĉoj de la medio estas des pli bonaj, ju pli da interkonsenteco ekzistas por bono, ju pli da puraj kaj noblaj sentoj, ju pli da sincera deziro instruiĝi sen kaŝita penso.

———————

ĈAPITRO XXII

# PRI LA MEDIUMECO DE LA BESTOJ

**234.** Ĉu la bestoj povas esti mediumoj? Ĉi tiu demando estas ofte farata, kaj iaj faktoj laŭŝajne respondas jese. Kio precipe povis konfirmi ĉi tiun opinion, tio estas la rimarkindaj signoj de inteligento ĉe kelkaj dresitaj birdoj, kiuj ŝajnas diveni la penson, prenante el amaso da kartoj tiujn, kiuj povas ĝuste respondi al proponita demando. Mi observis kun aparta atento tiujn eksperimentojn, kaj kion mi plej forte admiris, tio estis la arto, kiu certe devis esti uzita por la dresado de tiuj birdoj.

Oni sendube ne povas nei ĉe ili kelkan relativan inteligentecon, sed oni devus konsenti, ke, en ĉi tiu cirkonstanco, ilia sagaceco tre superus tiun de la homo, ĉar neniu homo povus flati al si, ke li farus tion, kion ili faras; oni eĉ devus, por iaj eksperimentoj, supozi ĉe ili ian duan vidadon, pli fortan ol tiu de la plej klarvidaj somnambuloj. Efektive, oni scias, ke la klarvideco estas mem ŝanĝiĝema kaj elmetita al oftaj intermitoj, dum ĉe la birdoj ĝi estus konstanta kaj funkcius ĉe la oportuna momento kun tiaj reguleco kaj precizeco, kiajn oni vidas en nenia somnambulo. Unuvorte, ĝi ĉe la birdoj neniam mankus.

La plej multaj eksperimentoj, kiujn mi ĉeestis, estas el tiaj, farataj de la prestidigitatoroj, kaj povis ĉe mi postlasi nenian dubon pri la uzado de kelkaj el ties rimedoj, precipe de tiu de la devigitaj kartoj. La prestidigitarto konsistas en la maskado de tiuj rimedoj, sen kio la efekto perdus sian sorĉan karakteron. Eĉ redukt-ita ĝis ĉi tiu proporcio, la fenomeno tamen estas tre

interesa, kaj ĉiam estas admirindaj kiel la talento de la instruanto, tiel ankaŭ la inteligenteco de la instruato, ĉar la ĉi tie venkenda malfacilaĵo estas multe pli granda, ol se la birdo agus nur dank'al siaj propraj kapabloj. Nu, igi ĝin fari aferojn, kiuj translimas tion eblan por la homa inteligento, estas pruvi, per tio sola, la uzadon de ia sekreta procedo. Cetere unu fakto ĉiam okazas, nome, ke la birdoj atingas tiun gradon da lerteco nur post kelka tempo kaj per specialaj kaj persistaj zorgoj, kio ne estus necesa, se tiujn aferojn prenus sur sin ilia inteligenteco sola. Ne estas pli eksterordinare instrui ilin elpreni kartojn, ol kutimigi ilin ripetadi ariojn aŭ vortojn.

Same okazis, kiam la prestidigitado volis imiti la duan vidadon; oni devigis la subjekton iri ĝis la ekstremeco, por ke la iluzio longe daŭru. De la unua fojo, kiam mi ĉeestis tiaspecan seancon, mi vidis nenion alian, ol tre neperfektan imitadon de somnambulismo, imitadon, kiu montris nekonadon de la plej esencaj kondiĉoj de tiu kapablo.

**235.** Kiel ajn estas koncerne la supre diritajn eksperimentojn, la ĉefa demando restas tia, kia ĝi estas, el alia vidpunkto, ĉar kiel la imitado de somnambulismo ne malhelpas, ke la kapablo ekzistas, tiel ankaŭ la imitado de la mediumeco per birdoj neniom pruvas kontraŭ la ebleco de ia analoga kapablo ĉe tiuj aŭ aliaj bestoj. La demando estas, ĉu la bestoj taŭgas, simile al la homoj, kiel perantoj de la Spiritoj por ties inteligentaj komunikiĝoj. Ŝajnas eĉ tre logike supozi, ke iu vivanta estaĵo, havanta iom da inteligento, estus pli taŭga por tiu efiko, ol ia inerta, senviva korpo, kiel ekzemple iu tablo; ne tio tamen okazas.

**236.** La demando pri la mediumeco de la bestoj troviĝas plene solvita en la sekvanta disertacio, farita de unu Spirito, kies profundecon kaj sagacecon la leganto povis konstati el la citado, kiun mi faris, de iuj liaj instruoj. Por ke oni bone komprenu la valoron de lia demonstracio, estas plej grave rememorigi al si la klarigon,

kiun li donis pri la rolo de la mediumo kaj kiun mi supre reproduktis. § 225).

Tiun komunikaĵon li donis post diskutado, okazinta pri ĉi tiu objekto en la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj.

"Mi hodiaŭ pritraktos la demandon pri la mediumeco de la bestoj, levita kaj defendata de unu el viaj plej fervoraj samdoktrinanoj. Laŭ ĉi tiu aksiomo: **Kiu riveron tranaĝas, tiu rivereton travadas**, li pretendas, ke ni povas ektrancigi la birdojn kaj la ceterajn bestojn kaj uzi ilin ĉe niaj komunikiĝoj kun la homa genro. Ĝi estas tio, kion vi nomas en Filozofio, aŭ plibone, en Logiko, pure kaj simple sofismo. "Vi animas — li diras — la inertan materion, t. e. tablon, seĝon, pianon; des pli vi devas povi animi la materion jam animitan kaj precipe birdojn". Nu, en la normala stato de Spiritismo, ne tiel estas, tio esti ne povas.

"Antaŭ ĉio ni ĝuste interkonsentu pri niaj faroj. Kio estas ja mediumo? Tio estas tiu estulo, tiu individuo, kiu servas kiel kunigilo al la Spiritoj, por ke ĉi tiuj povu facile komunikiĝi kun la homoj, la enkarniĝintaj Spiritoj. Sekve, sen mediumo fariĝas neniaj komunikaĵoj tuŝeblaj, mensaj, skribaj, fizikaj, unuvorte neniaj ajn.

"Ekzistas unu principo, kiun, mi estas certa, ĉiuj spiritistoj akceptas, nome, ke similuloj agas kune kun siaj similuloj kaj kiel iliaj similuloj. Nu, kiaj estas la similuloj de la Spiritoj, se ne la Spiritoj enkarniĝintaj aŭ ne enkarniĝintaj? Ĉu ĉi tion ni devus al vi senĉese ripetadi? Nu, mi ĝin ankoraŭ unu fojon ripetos al vi: via perispirito kaj la nia estas prenitaj el unu sama medio, estas laŭnature identaj, estas, unuvorte, similaj unu al la dua; ili posedas kapablecon por pli aŭ malpli disvolviĝinta asimilado, por pli aŭ malpli forta magnetigo, kiu ebligas al ni, elkarniĝintaj kaj enkarniĝintaj Spiritoj, tre rapide kaj tre facile ekinterrilati kun aliaj. Fine, kio estas propra al la mediumoj, kio estas apartenaĵo de la esenco mem de ilia individueco, tio estas ia speciala agordiĝemo kaj samtempe ia tute persona ekspansioforto, kiuj nuligas ĉe ili ĉiun rezistemon kaj estigas inter ili kaj ni ian ĉenon, ian kunfandiĝon, kiu faciligas niajn

komunikiĝojn. Cetere, ne alia, ol tiu rezistemo de la materio, malhelpas la disvolviĝon de la mediumeco ĉe la plimulto el la ne-mediumoj.

"La homoj montriĝas ĉiam inklinaj troigi ĉion: unuj — mi ĉi tie ne parolas pri la materialistoj — neas la ekziston de ia animo ĉe la bestoj; aliaj asertas, ke la bestoj tian havas, por tiel diri, similan al nia. Kial voli tiel intermiksi tion perfekteblan kun tio neperfekteblan? Ne, ho ne, konvinkiĝu: la fajro, kiu animas la bestojn, la blovo, kiu igas ilin agi, moviĝi, paroli en sia lingvo, havas, laŭ la ĝisnuna kompreno, nenian kapablecon por miksiĝi, unuiĝi, kunfandiĝi kun la dia blovo, kun la etereca animo, unuvorte kun la Spirito, kiu animas la esence perfekteblan estulon, nome la homon, la reĝon de la kreitaĵaro. Nu, ĉu ne en tiu fundamenta kondiĉo de perfekteblеco konsistas la supereco de la homa genro kontraŭ la ceteraj estaĵoj de la Tero? Konfesu do, ke oni povas similigi al la homo, kiu sola kapablas perfektigi sin mem kaj siajn verkojn, nenian alian surteran individuon.

"Ĉu la hundo, kiu dank'al sia supera inteligenteco fariĝis la amiko kaj kunvivanto de la homo, estas perfektebla propravole kaj el sia individua iniciativo? Tion neniu kuraĝus aserti, ĉar hundo ne progresigas hundon; kaj eĉ la plej lerta estis ja dresita de sia mastro, kiel ĉiuj aliaj. De la komenco de la mondo la lutro ĉiam konstruis sian neston ĉe la akvoj laŭ la samaj ampleksoj kaj senŝanĝaj reguloj; la najtingaloj kaj la hirundoj neniam alie faris siajn nestojn, ol iliaj prapatroj. Nesto de antaŭdiluvaj paseroj, same kiel nesto de paseroj nuntempaj, estas ĉiam nesto de paseroj, konstruita laŭ la samaj kondiĉoj kaj la sama procedo de interplektado de herberoj kaj rompitaĵoj, kolektitaj en printempo, en la tempo de pariĝo. La abeloj kaj la formikoj, kiuj formas mastrumaĵajn regnetojn, neniam ŝanĝis siajn kutimojn de sinprovizado, sian konduton, siajn morojn, siajn produktaĵojn. Fine, la araneo ĉiam sammaniere teksis sian reton.

"Aliflanke, se vi serĉos la kabanojn el foliaro kaj la tendojn de la unuaj epokoj de la Tero, vi trovos ansta-

taŭe la palacojn kaj kastelojn de la moderna civilizacio; la vestojn el kruda felo sekvis la oraj kaj la silkaj vestoj; unuvorte, sur ĉiu paŝo vi trovas la elmontron de tiu senĉesa irado de la homaro al la progreso.

"El tiu konstanta, nevenkebla, nerefutebla progresado de la homa genro kaj el tiu senfina starado de la bestoj konkludu kun mi, ke se ja ekzistas principoj komunaj al ĉio, kio vivas kaj sin movas sur la Tero, nome la blovo kaj la materio, ne malpli vere estas, ke nur vi, enkarniĝintaj Spiritoj, estas submetitaj al tiu senŝanĝa leĝo de progreso, kiu vin nepre pelas antaŭen kaj ĉiam antaŭen. Dio lokis la bestojn apud vi kel helpantojn, por ke ili vin nutru, liveru al vi vestaĵojn, al vi servu. Li donis al ili kelkan inteligenton, ĉar, por helpi vin, ili devis kompreni, kaj Li proporciigis tiun inteligenton al la servoj, al kiuj ili estas vokataj; sed laŭ Sia saĝo Li ne volis, ke ili estu submetataj al la sama leĝo de progreso; kiaj ili estas kreitaj, tiaj ili restis kaj restos ĝis sia plena estingiĝo.

"Oni diris: la Spiritoj ektrancigas kaj igas moviĝi la inertan materion: seĝojn, tablojn, pianojn; ili igas moviĝi, jes, sed ektrancigas, ne, ĉar, ni ankoraŭ unu fojon diras, sen ia mediumo neniu el tiuj fenomenoj povas fariĝi. Kio eskterordinara tio estas, ke ni per la helpo de unu aŭ pluraj mediumoj igas moviĝi la inertan, pasivan materion, kiu, ĝuste danke sian inertecon, sian pasivecon, taŭgas por ricevi la movojn kaj impulsojn, kiujn ni deziras doni al ili? Por ĉi tio ni ja bezonas mediumojn, estas pozitive; sed ne estas necese, ke la mediumo troviĝu apude aŭ estu **konscia**, ĉar ni povas labori per la elementoj, kiujn li preterkonscie kaj de ekstere havigas al ni, precipe por faroj de tuŝebleco kaj alportado. Nia fluidaĵa envolvaĵo, pli malpeza kaj subtila, ol la plej malpeza kaj subtila el viaj gasoj, unuiĝante, kunfandiĝante, kombiniĝante kun la fluidaĵa, sed **animaligita** envolvaĵo de la mediumo, envolvaĵo, kies kapablecon por etendiĝi kaj penetri viaj malsubtilaj sentumoj ne povas percepti kaj kiu estas apenaŭ klarigebla por vi, ebligas al ni movi meblojn kaj eĉ ilin rompi en neloĝataj ĉambroj.

"Sendube la Spiritoj povas fariĝi videblaj kaj tuŝeblaj por bestoj, kaj ofte la subitan teruron, kiu ilin atakas kaj kiu ŝajnas al vi senkaŭza, ĝin naskas la vido je unu aŭ pli multe da Spiritoj, portantaj malican intencon kontraŭ ĉeestantaj homoj aŭ kontraŭ la mastroj de la bestoj. Tre ofte ĉevaloj rifuzas iradi pluen aŭ posteniĝi, aŭ baŭmas antaŭ ia imaga baro; nu, estu certaj, ke tia imaga baro ofte estas iu Spirito aŭ grupo da Spiritoj, kiuj plezuras malhelpante ilin sin movi. Rememorigu al vi la azeninon de Bileam (*), tiun beston, kiu, ekvidinte antaŭ si anĝelon kaj timante lian elingigitan glavon, forturniĝis de la vojo; tiel estis tial, ĉar, antaŭ ol videble manifestiĝi al Bileam, la anĝelo volis fariĝi videbla nur por la besto. Sed, mi ripetas, ni ektrancigas rekte nek la bestojn, nek la inertan materion; ni ciam bezonas la **konscian** aŭ **nekonscian** kunhelpon de iu homa mediumo, ĉar estas por ni necesa la unuiĝo de fluidaĵoj inter si similaj, kion ni trovas nek ĉe la bestoj, nek en la senviva materio.

"S-ro T., li diris, magnetizis sian hundon; al kio li venis? Li ĝin mortigis: la kompatinda besto mortis, falinte en ian atonion, ian konsumitecon, sekvon de ĝia magnetiziĝo. Efektive, saturinte ĝin per fluidaĵo, ĉerpita el esenco supera, ol la esenco propra al besto, li ĝin frakasis kaj agis sur ĝin, kvankam pli malrapide, simile al fulmo. Sekve, ĉar tute ne eble estas por la fluidaĵa envolvaĵo de la bestoj asimili nian perispiriton, tial ni ilin tuj frakasus, se ni ilin ektrancigus.

"Ĉe tiu ĉi konstato, mi ja konfesas, ke ĉe la bestoj ekzistas diversaj kapablecoj; ke ĉe ili disvolviĝas certaj sentoj, certaj pasioj, identaj al la homaj pasioj kaj sentoj; ke ili estas sentemaj kaj dankemaj, venĝemaj kaj malamemaj, laŭ tio, ĉu oni kondutas kontraŭ ili bone aŭ malbone. Tiel estas, ĉar Dio, kiu faras nenion nekompletan, konsentis al la bestoj, kunuloj aŭ servantoj de la homo, societemajn inklinojn, kiuj tute ne ekzistas ĉe la sovaĝaj bestoj, vivantaj en solulejoj. Sed inter tiu

(*) Vd. en Nombroj, 22: 21 – 33. — *La Trad.*

ilia karaktero kaj tio, ke ili povus servi kiel perantoj, por transigi la planon de la Spiritoj, oscedas abismo: la malsameco de materioj.

"Vi scias, ke ni ĉerpas el la cerbo de la mediumo la elementojn, kiujn ni bezonas, por havigi al nia penso formon senteblan kaj kapteblan por vi; ĝuste per la materialoj, kiujn li posedas, mediumo tradukas nian penson en la vulgaran lingvon; nu, kiajn elementojn ni trovus en la cerbo de besto? Ĉu tie ekzistas vortoj, nombroj, literoj, iaj ajn signoj similaj al tiuj ĉe la homo, eĉ ĉe la homo malplej inteligenta? Tamen, vi diros, la bestoj komprenas la penson de la homo; ili eĉ divenas ĝin; jes, la dresitaj bestoj komprenas iujn pensojn, sed ĉu vi iam konstatis, ke ili reproduktas tiujn pensojn? Ne; el ĉi tio vi devas do konkludi, ke la bestoj ne kapablas servi al ni kiel interpretantoj.

"Resume: la mediumaj faktoj ne povas manifestiĝi sen la konscia aŭ preterkonscia kunhelpo de la mediumoj; kaj sole nur ĉe la enkarnuloj, Spiritoj kiel ni, ni povas trovi tiujn, kiuj povus servi al ni kiel mediumoj. Dresi hundojn, birdojn aŭ aliajn bestojn, ke ili plenumu tiajn aŭ tiajn ekzercojn, tio estas via, ne nia afero.

ERASTO."

NOTO. En la *Revue Spirite*, de Septembro 1861, estas detale priskribita unu procedo, uzata de la dresistoj de instruitaj birdoj, por igi ĉi tiujn preni el amaso da kartoj tiujn deziratajn.

———————

ĈAPITRO XXIII

# PRI LA OBSEDO

*Simpla obsedo. Fascinado. Subjugigo. Kaŭzoj de la obsedo. Rimedoj por kontraŭbatali la obsedon.*

**237.** Al la rifoj, kiujn prezentas la praktikado de Spiritismo, oni devas antaŭ ĉiuj alkalkuli la **obsedon**, t. e. la superregadon, kiun iuj Spiritoj scias havi super iuj homoj. Ĝi ĉiam fariĝas nur de la flanko de malsuperaj Spiritoj, kiuj strebas al superregado. La bonaj Spiritoj faras nenian perforton; ili konsilas, kontraŭbatalas la influon de la malicaj kaj, se oni ilin ne aŭskultas, ili foriĝas. La malicaj, kontraŭe, alkroĉiĝas al tiuj homoj, kiujn ili povos fari siaj potencatoj; se ili sukcesas superregi iun, ili identiĝas kun ties Spirito kaj kondukas lin kvazaŭ infanon.

La obsedo prezentas diversajn flankojn, kiujn estas tre necese distingi unu de alia, rezultantajn el la grado de la ĝeno kaj el la naturo de ĝiaj efikoj. La vorto **obsedo** estas iele ĝenerala termino, per kiu oni nomas ĉi tiun specon de fenomeno, kies plej ĉefaj variaĵoj estas: la **simpla obsedo**, la **fascinado** kaj la **subjugigo**.

**238.** La **simpla obsedo** okazas tiam, kiam iu malbonfarema Spirito imponas al mediumo, sin enmiksas, kontraŭ lia volo, en la komunikaĵojn, kiujn li ricevas, neebligas al li komunikiĝi kun aliaj Spiritoj kaj substituiĝas al tiuj, kiujn li elvokas.

Iu ne estas obsedita pro tio sola, ke lin trompas mensogema Spirito; eĉ la plej bona mediumo estas elmetita al tio, precipe en la unua tempo, kiam ankoraŭ

mankas al la novulo la necesa sperto, tiel same, kiel inter ni la plej honestaj homoj povas esti moktrompataj de friponoj. Oni do povas esti trompata, sed ne ĝustadire obsedita; obsedo kuŝas en la persisteco de Spirito, de kiu oni ne povas liberiĝi.

Ĉe la simpla obsedo la mediumo ja scias, ke li traktas kun trompema Spirito, kaj ĉi tiu sin ne kaŝas antaŭ li, tute ne maskas siajn malicajn intencojn kaj sian deziron ĉikani. La mediumo senpene rekonas tiun friponan agadon kaj, ĉar li sin tenadas garde, tial li malofte estas trompata. Ĉi tiu speco de obsedo estas do nur malagrabla kaj havas nenian alian malbonaĵon, ol starigi baron al la komunikiĝoj, kiujn oni dezirus tenadi kun seriozaj Spiritoj aŭ kun tiuj, por kiuj oni portas korinklinon.

Oni povas alkalkuli al ĉi tiu kategorio la okazojn de **fizika obsedo**, t. e. tiu, kiu konsistas en la bruaj kaj obstinaj manifestiĝoj de iuj Spiritoj, kiuj memvole aŭdigas frapojn aŭ aliajn bruojn. Pri ĉi tiu fenomeno mi parolis en la ĉapitro **Pri la spontaneaj fizikaj manifestiĝoj**. (§ 82.)

**239.** La **fascinado** naskas multe pli gravajn sekvojn. Ĝi estas iluzio, kaŭzita de la rekta agado de iu Spirito sur la menson de mediumo kaj iamaniere paralizanta lian juĝokapablon rilate la komunikaĵojn. Mediumo fascinita ne kredas, ke li estas trompata; la Spirito estas tiel lerta kaj inspiras blindan konfidon al li, konfidon, kiu malhelpas la mediumon vidi la friponaĵon kaj kompreni la absurdecon de siaj skribaĵoj, eĉ tiam, kiam ĝi ĵetiĝas en la okulojn de ĉiuj; la iluzio povas eĉ atingi ĝis tia grado, ke ĝi igas la mediumon trovi superbela la plej ridindan parolon. Estus eraro pensi, ke ĉi tiu speco de obsedo povas trafi nur simplanimajn, senklerajn kaj sensaĝajn homojn; ĝin evitas eĉ ne la homoj plej spritaj, plej instruitaj kaj plej inteligentaj en aliaj rilatoj, kio pruvas, ke tia eksternormaĵo estas efiko de ia kaŭzo ekstera, kies influon ili suferas.

Mi diris, ke la sekvoj de la fascinado estas multe pli gravaj; efektive, profitante de tiu iluzio, kiu el ĝi re-

zultas, la Spirito kondukas la mediumon, kiun li sukcesis superregi, kvazaŭ blindulon, kaj povas igi tiun akcepti la plej ekstravagancajn doktrinojn, la plej malverajn teoriojn, kvazaŭ la solan esprimon de la vero; eĉ plue, li povas instigi la mediumon al ridindaj, kompromitantaj kaj eĉ danĝeraj paŝoj.

Oni facile komprenas la absolutan diferencon inter la simpla obsedo kaj la fascinado; oni komprenas ankaŭ, ke la Spiritoj, kiuj okazigas ĉi tiujn du efikojn, devas diferenci inter si per sia karaktero. Ĉe la unua, la Spirito, kiu alligiĝis al la mediumo, estas nur ia estulo, kiu tedas pro sia persistemo kaj pri kiu la mediumo ardas de senpacienco por liberiĝi de li. Ĉe la dua okazas tute alie; por trafi tian celon, la Spirito devas esti lerta, ruza kaj ekstreme hipokrita, ĉar li povas trompi kaj esti akceptita nur pro la masko, kiun li scias surmeti, kaj per falsa mieno de virtulo. La altaj vortoj: karito, humileco kaj amo al Dio servas al li kvazaŭ kreditleteroj, sed tra ĉio ĉi li tralasas signojn de malsupereco, pri kiuj oni devas ja esti **fascinita**, por ilin ne rimarki; tial, kion li plej multe timas, tio estas la homoj, kiuj vidas tro klare, ke ili estu trompitaj. Lia taktiko estas do preskaŭ ĉiam inspiri al sia interpretanto la ideon eviti ĉiun ajn, kiu povus malfermi al la mediumo la okulojn; en tia maniero forigante ĉian kontraŭparolon, li estas certa, ke li ĉiam pravas.

**240.** La **subjugigo** estas ia ĉirkaŭpremo, kiu paralizas la volon de la homo, kiu ĝin suferas, devigante lin agadi kontraŭvole. Li troviĝas, unuvorte, sub efektiva jugo.

La subjugigo povas esti **morala** aŭ **korpa**. Ĉe la unua okazo, la subjugigito estas devigata fari ofte absurdajn kaj kompromitantajn decidojn, kiujn per ia iluzio li opinias saĝaj: ĝi estas kvazaŭa fascinado. Ĉe la dua okazo, la Spirito agas sur la materiajn organojn kaj estigas pretervolajn movojn. Ĝi elmontriĝas ĉe skribiva mediumo per senĉesa bezono skribi, eĉ en la malplej oportunaj momentoj. Mi vidis mediumojn, kiuj, manke de plumo aŭ krajono, ŝajnigis kvazaŭ ili skribas per fingro ĉie, kie

ajn ili troviĝis, eĉ en la stratoj, sur pordoj, sur muroj.

La korpa subjugigo kelkafoje iras pli malproksimen; ĝi povas instigi la mediumon al la plej ridindaj agoj. Mi konis sinjoron, nek junan nek belan, kiu, sub la potenco de tiaspeca obsedo, estis devigata de ia nerezistebla forto genuiĝi antaŭ junulino, por kiu li nutris nenian senton, kaj peti pri ŝia mano. Aliajn fojojn li eksentis sur la dorso kaj genukavoj fortan premon, kiu devigis lin, malgraŭ lia kontraŭstaro, stariĝi genue kaj kisi la teron sur publikaj lokoj kaj antaŭ la popolamaso. La konatoj de tiu homo rigardis lin kiel frenezulon, sed mi estas konvinkita, ke freneza li tute ne estis, ĉar li plene konsciis la ridindecon de tio, kion li kontraŭvole faradis, kaj de tio li terure suferadis.

**241.** Oni iam nomadis **posedo** la superregadon de malicaj Spiritoj, kiam ilia influo atingas ĝis la misfunkciado de la fakultoj. La posedo estus, laŭ mia opinio, sinonimo de la subjugigo. Mi ne uzas tiun terminon pro du motivoj: unue, ĉar ĝi kuntrenas la kredon al estuloj, kreitaj por malbono kaj eterne sin donantaj al malbono, dum ekzistas nur estuloj pli aŭ malpli neperfektaj, kiuj ĉiuj povas pliboniĝi; due, ĉar ĝi entenas ankaŭ la ideon, ke iu fremda Spirito ekposedas la korpon, ideon pri ia kuneloĝado, dum efektive ekzistas nur subpremo. La vorto **subjugigo** perfekte esprimas la penson. Sekve, laŭ mia kompreno, ekzistas ne **poseditoj**, en la vulgara senco de la vorto, sed ja **obseditoj**, **fascinitoj** kaj **subjugigitoj**.

**242.** La obsedo, kiel mi diris, estas unu el la plej grandaj rifoj de la mediumeco kaj ankaŭ unu el la plej oftaj; tial nenia klopodo estus troa, por ĝin kontraŭbatali, ĉar krom la personaj malutiloj, kiuj povas el ĝi rezulti, ĝi estas absoluta baro kontraŭ la boneco kaj vereco de la komunikaĵoj. Ĉar la obsedo, en kia ajn grado ĝi estas, ĉiam estas la efiko de ia subpremo, kaj ĉar tiun subpremon neniam faras bona Spirito, tial ĉia komunikaĵo, veninta per obsedita mediumo, fontas el suspektinda origino kaj meritas nenian fidon. Se okaze ĝi enhavas ion bonan, oni tion akceptu, sed oni forĵetu ĉion simple dubindan.

**243.** Oni rekonas la obsedon laŭ la sekvantaj karakteroj:

1-a: Persistado de iu Spirito komunikiĝi, ĉu la mediumo volas aŭ ne, per skribado, aŭdado, tiptologio k. a., neebligante al aliaj tion fari.

2-a: Iluzio, kiu, malgraŭ la inteligenteco de la mediumo, malhelpas lin konfesi la malverecon kaj ridindecon de la komunikaĵoj, kiujn li ricevas.

3-a: Kredo al la neeraremeco kaj al la absoluta identeco de la Spiritoj, kiuj komunikiĝas kaj kiuj, sub estimindaj kaj respektindaj nomoj, eldiras malveraĵojn aŭ absurdojn.

4-a: Konfido de la mediumo al la laŭdoj de la Spiritoj, kiuj komunikiĝas per li.

5-a: Inklino de la mediumo foriĝi de homoj, kiuj povas doni al li utilajn opiniojn.

6-a: Ofendetiĝo de la mediumo pro la kritiko de la komunikaĵoj, kiujn li ricevas.

7-a: Senĉesa kaj maloportuna bezono skribi.

8-a: Ĉia fizika premo, superreganta la volon de la mediumo kaj deviganta lin agi aŭ paroli kontraŭvole.

9-a: Persistaj bruoj kaj tumultoj ĉirkaŭ la mediumo, faktoj, kies kaŭzo aŭ objekto li estas.

**244.** Ĉe la danĝero de la obsedo oni demandus, ĉu la mediumeco ne estas io bedaŭrinda; ĉu ĝuste ĉi tiu kapableco ĝin ne naskas; unuvorte, ĉu ĝi ne estas pruvo pri la malutileco de la komunikiĝoj kun la Spiritoj? Mia respondo estas facila, kaj mi petas ĝin atente pripensi.

Ne la mediumoj kaj ne la spiritistoj elpensis la Spiritojn, sed ja la Spiritoj faris, ke ekzistu spiritistoj kaj mediumoj. Ĉar la Spiritoj estas nenio alia, ol la animoj de la homoj, tial ekzistas Spiritoj, de kiam ekzistas homoj; sekve de tio ili en ĉiuj tempoj havis utilan aŭ pereigan influon sur la homaron. La mediumeco estas por ili nur rimedo por manifestiĝo; ĉe manko de ĉi tiu kapableco ili manifestiĝas en multego da aliaj pli aŭ malpli kaŝitaj manieroj. Estus do eraro pensi, ke la Spiritoj influas nur per skribaj aŭ voĉaj komunikiĝoj; ilia influo estas ĉiumomenta, kaj tiuj homoj, kiuj sin ne

okupas pri Spiritoj, aŭ eĉ ilin ne kredas, estas elmetitaj al tiu influo, kiel la ceteraj, kaj eĉ pli ol la ceteraj, ĉar tiuj disponas nenion, kio ĝin kompensus. La mediumeco estas por la Spirito rimedo, por fari sin konata; se li estas malica, li sin ĉiam perfigas, kiel ajn hipokrita li estas. Oni do povas diri, ke la mediumeco ebligas vidi la malamikon vizaĝo kontraŭ vizaĝo, se tiel oni povas paroli, kaj batali kontraŭ li per liaj propraj armiloj; sen tiu kapablo li agas en la ombro kaj, profitante sian nevideblecon, li povas fari kaj efektive faras multe da malbono. Kiom da agoj, al sia propra malfeliĉo, la homo estas devigata fari, kaj kiujn li ne farus, se li havus ian rimedon, por instruiĝi! La nekredemaj ne pensas, ke ili parolas tiel vere, kiam ili diras pri iu, kiu obstine misvojas: "Lia malbona genio lin pereigas." Sekve, la konado de Spiritismo, anstataŭ ebligi superregadon al la malicaj Spiritoj, devas doni kiel rezulton, en pli aŭ malpli proksima tempo kaj kiam ĝi estos disvastiĝinta, **disbati tiun superregadon**, havigante al ĉiu homo la rimedojn, por sin gardi kontraŭ iliaj sugestoj; kiu subfalos al tiuj enblovoj, tiu ja plendu kontraŭ si mem.

Ĝenerala regulo: kiu ajn ricevas malbonajn komunikaĵojn de Spiritoj, ĉu skribajn, ĉu parolajn, tiu troviĝas sub malbona influo; tiu influon la persono ricevas, ĉu li skribas aŭ ne skribas, t. e. ĉu li estas aŭ ne estas mediumo, ĉu li kredas aŭ ne kredas la ekziston de iaj Spiritoj. La skribo havigas al li rimedon por certiĝi pri la naturo de la Spiritoj, kiuj agas sur lin, kaj por ilin kontraŭbatali, se ili estas malicaj, kio pli bone prosperas al li, se li sukcesas ekscii la motivon, kiu instigas ilin tiel agadi. Se li estas tiel blindigita, ke li mem ĝin ne komprenas, tiam aliaj personoj povas malfermi al li la okulojn.

Resume: la danĝero kuŝas ne en Spiritismo mem, ĉar ĉi tiu povas, kontraŭe, servi kiel kontrolilo kaj antaŭgardi kontraŭ tiu danĝero, kiun ni senĉese kaj preterkonscie riskas, sed en la fiera pretendemo de iuj mediumoj, tro ventanime opinii sin ekskluzivaj iloj de Superaj Spiritoj, kaj en tiu kvazaŭa fascinado, kiuj ne ebligas al ili kompreni la stultaĵojn, kies peranto ili estas. Eĉ

ne-mediumoj povas enkaptiĝi en tian reton. Mi faru komparon. Iu viro havas sekretan malamikon, kiun li ne konas kaj kiu kontraŭ li kaŝite distrumpetas kalumniojn kaj ĉion, kion la plej nigra malicemo povas elpensi. Li vidas sian riĉecon perdiĝi, siajn amikojn foriĝi, sian internan feliĉon renversita. Ne povante malkovri la manon, kiu lin frapas, li ne povas defendi sin kaj falas venkite; sed unu tagon tiu sekreta malamiko skribas ion al li kaj malgraŭ sia ruzeco sin perfidas: jen do malkaŝita lia malamiko, kaj nun li povas tiun konfuzi kaj rehonoriĝi. Tia sama estas la rolo de la malicaj Spiritoj, pri kiuj Spiritismo ebligas al ni ilin ekkoni kaj vanigi iliajn agojn.

**245.** La kaŭzoj de la obsedo diversas laŭ la karaktero de la Spirito; ĝi kelkafoje estas venĝo, kiun li faras al iu homo, kontraŭ kiu li portas resenton de sia lasta aŭ de iu antaŭa ekzistado; ofte, ankaŭ, li havas nenian alian motivon, ol la deziron fari malbonon: ĉar li suferas, tial li volas igi aliajn suferi; li sentas ian plezuron ilin turmentante, ilin ĉikanante; tial la senpacienco, kiun oni elmontras ĉe tio, ekscitas lin, ĉar tia estas lia celo, dum oni lacigas lin per pacienco; incitiĝante, kolerante, oni faras ĝuste tion, kion li volas. Tiuj Spiritoj iafoje agas el malamo kaj envio al bono, tial ili ĵetas sian malican rigardon sur la plej honestajn homojn. Unu el ili alkroĉiĝis kiel lapo al honorinda familio, al mi konata, kiun cetere li ne havis la plezuron trompi; pridemandita pri la motivo, kial li alligiĝis al tiaj bonkoraj homoj, anstataŭ al homoj malicaj kiel li, li respondis: **Ĉi tiuj lastaj ne vekas ĉe mi envion**. Aliajn kondukas ia fia kovardeco (*), kiu instigas ilin ekspluati la moralan malfortecon de iuj homoj, pri kiuj ili scias, ke tiuj estas nekapablaj kontraŭstari al ili. Unu el ĉi tiuj, kiu subjugigis tre malmulte inteligentan junulon, demandite pri la motivo de tiu elekto, respondis al mi: **Mi forte bezonas turmeti iun; prudenta persono min repuŝus, tial mi**

(*) Vd. la sglosaron en la fino de ĉi tiu verko. —*La Trad.*

**alkroĉiĝas al idioto, kiu neniom da forto kontraŭmetas al mi**.

**246.** Ekzistas obsedantaj Spiritoj sen malico, kiuj eĉ havas ian bonan flankon, sed kiuj fieras pri ia pseŭdoklereco; ili havas apartajn ideojn, apartajn sistemojn koncerne la sciencojn, la socian ekonomion, la moralon, la religion, la Filozofion, kaj volas, ke iliaj opinioj pezu pli ol ĉiuj aliaj. Por tio ili serĉas mediumojn sufiĉe kredemajn, por ilin akcepti kun fermitaj okuloj, kaj kiujn ili fascinas por neebligi al tiuj distingi veron de malvero. Ili estas la plej danĝeraj, ĉar la sofismoj kostas al ili neniom kaj povas kreditigi la plej ridindajn utopiojn. Sciante la prestiĝon de la laŭtaj nomoj, ili sentas nenian skrupuloj paradi per tiuj, antaŭ kiuj la homoj sin klinas, kaj sin ne retenas ĉe la sakrilegio nomi sin Jesuo, la Sankta Virgulino aŭ iu respektegata sanktulo. Ili penas imponi per ŝvelparolo, pli afekta ol profunda, traplektita per teknikaj terminoj kaj ornamita per la altaj nomoj “karito” kaj “moralo”. Ili sin gardas doni malbonan konsilon, ĉar ili ja scias, ke ili estus elpelitaj; tial, la homoj, kiujn ili ekspluatas, ilin per ĉiuj siaj fortoj defendas, dirante: “Vi klare vidas, ke ili ja diras nenion malbonan.” Sed la moralo por tiuj Spiritoj estas nura kreditletero kaj ilin la plej malmulte zorgigas; kion ili super ĉio volas, tio estas superregi kaj trudi siajn ideojn, kiel ajn kontraŭraciaj tiuj estas.

**247.** La sistememaj Spiritoj, en granda plimulto, amas kilometrajn skribojn kaj tial serĉas mediumojn, kiuj skribas facile kaj kiujn ili penas fari manipuleblaj kaj precipe entuziasmaj iloj, tiujn fascinante. Ili preskaŭ ĉiam estas ŝvelparolemaj, tre multevortemaj, penante kompensi kvaliton per kvanto. Ili amas dikti al siaj interpretantoj dikajn skribojn misdisgesteblajn kaj ofte apenaŭ kompreneblajn, kiuj feliĉe havas kiel kontraŭrimedon la materialan neeblecon esti legataj de la vulgarularo. La vere superaj Spiritoj estas parolmoderaj; ili diras multe per malmultaj vortoj; el tio sekvas, ke tiu miregiga troabundeco de vortoj devas esti ĉiam suspektata.

Oni neniam estas tro singardema ĉe la publikigo de tiaj skribaĵoj; la utopioj kaj ekscentraĵoj, per kiuj ili ofte svarmas kaj kiuj pikas la komunan saĝon, faras tre malagrablan impreson sur novulojn, naskante en ĉi tiuj malveran ideon pri Spiritismo, ne enkalkulante tion, ke ili estas armiloj, kiujn ĝiaj malamikoj uzas, por turni ĝin en ion ridindan. El tiuj publikigaĵoj kelkaj, kvankam ne malbonaj kaj ne venintaj el ia obsedo, povas esti rigardataj kiel malprudentaj, **malĝustatempaj** aŭ mallertaj.

**248.** Tre ofte okazas, ke iu mediumo povas komunikiĝi nur kun unu sola Spirito, kiu alligiĝas al li kaj respondas anstataŭ tiuj, kiujn oni elvokas per li. Tio ne ĉiam estas obsedo, ĉar ĝin eble kaŭzas ia manko de flekseblеco de la mediumo kaj lia aparta agordiĝemo rilate tian aŭ tian Spiriton. Obsedo mem ekzistas nur tiam, kiam la Spirito sin trudas kaj per sia volo forigas la aliajn, kion neniam faras bona Spirito. Ordinare la Spirito, kiu ekposedas mediumon por lin superregi, ne toleras la kritikan ekzamenon de liaj komunikaĵoj; kiam li konstatas, ke ili ne estas akceptataj kaj estas diskutataj, li ne foriĝas, sed inspiras al la mediumo la penson izoliĝi kaj eĉ ofte ĝin ordonas. Ĉiu mediumo, kiu ofendiĝas pro la kritikado de la komunikaĵoj, kiujn li ricevas, estas la eĥo de la Spirito, lin superreganta, kaj tiu Spirito ne povas esti bona, ĉar li inspiras al la mediumo nelogikan penson, t. e. rifuzi ekzameniĝi. La izoliĝo de mediumo estas ĉiam io bedaŭrinda por li, ĉar la komunikaĵoj, kiujn li ricevas, jam ne estas kontrolataj. Li devas ne nur lumigi al si la menson per aliulaj opinioj, sed studi ĉiajn komunikaĵojn, por kompari ilin inter si; enfermiĝante en tiujn, kiujn li ricevas, kiel ajn bonaj ili al li ŝajnas, li riskas fari al si iluzion pri ilia valoro, jam ne parolante pri tio, ke li ne povas ĉion koni kaj ke iliaj konsistoj preskaŭ neniam translimas unu saman rondon. (§ 192: **Mediumoj ekskluzivaj**.)

**249.** La rimedoj por kontraŭbatali la obsedon diversas laŭ la karaktero, kiun ĝi prenas sur sin. Efektiva danĝero ne ekzistas por ĉiu mediumo, firme konvinkita,

ke li havas aferon al mensogema Spirito, kiel okazas ĉe la simpla obsedo: tio estas por li nur io malagrabla. Sed ĝuste pro tio, ke ĝi estas io malagrabla, la Spirito havas ankoraŭ unu motivon por furiozi kontraŭ lin, celante lin turmentadi. En ĉi tiu okazo oni devas uzi du plej ĉefajn rimedojn: unue, klare montri al la Spirito, ke oni ne estas lia mokataĵo kaj ke por li estas **ne eble** trompi la personon; due, lacigi lian paciencon, montriĝante pli pacienca ol li; se li profunde konvinkiĝos, ke li perdas sian tempon, li fine foriĝos, same kiel la tedeguloj, kiujn neniu aŭskultas.

Sed ĉi tio ne ĉiam sufiĉas kaj povas daŭri longe, ĉar kelkaj Spiritoj estas persistemaj, kaj por tiuj nenion signifas monatoj kaj jaroj. Krom tio la mediumo devas fari varman alvokon al sia bona anĝelo kaj al la bonaj Spiritoj, kun kiuj li simpatias, kaj peti ilin helpi lin. La obsedantan Spiriton, kiel ajn malica li estas, la mediumo devas trakti severe, sed bonanime, kaj venki lin, preĝante por li. Se li estas efektive perversa, li unue primokos tiujn klopodojn, sed, per konstanta moraligado, li fine sin korektas. Ĝi estas entreprenenda konvertado, tasko ofte peniga, sendanka, eĉ naŭza, sed kies merito kuŝas en la malfacileco kaj kiu, se ĝuste farita, ĉiam havigas al la mediumo la plezuron esti plenuminta devon de karito kaj ofte tiun, ke li rekondukis erarintan animon sur la virtan vojon.

Estas prudente ankaŭ interrompi ĉiun skriban komunikadon, tuj kiam oni konstatas, ke oni havas aferon al malica Spirito, kiu volas cedi al nenia admono, por ne fari al li la plezuron esti aŭskultata. Ĉe iuj okazoj povas eĉ esti utile ĉesi skribi dum kelka tempo; oni kondutos laŭ la cirkonstancoj. Sed se la skribiva mediumo povas eviti tiujn rilatojn, detenante sin skribi, ne same estas kun la mediumo aŭdiva, kiun la obsedanta Spirito persekutas iafoje ĉiumomente per krudaj kaj obscenaj paroloj kaj kiu eĉ ne havas la savrimedon ŝtopi al si la orelojn. Cetere oni konfesu, ke iuj homoj amuziĝas ĉe la triviala parolo de tiaj Spiritoj, kiujn ili vigligas kaj al kiuj ili pikas la langon, ridante ties malsaĝaĵojn, ans-

tataŭ trudi al ili silenton kaj ilin moraligi. Miaj konsiloj ne povas taŭgi por homoj, kiuj volas mem droni.

**250.** Ne do danĝere, sed nur malagrable estas al ĉiu mediumo, kiu ne lasas sin trompi, ĉar trompata li ne povas esti; alie okazas ĉe **fascinado**, ĉar tiam la potencado de la Spirito super la homo, kiun li ekposedis, estas senlima. La sola, kion oni povas fari kun tiu homo, estas peni konvinki lin, ke li estas trompata, kaj turni lian obsedon en obsedon simplan, sed tio estas ne ĉiam facila, eĉ iafoje ne ebla. La influo de la Spirito povas esti tiel forta, ke ĝi faras la fasciniton surda por ĉia rezonado, kaj, kiam la Spirito inspiras iun krudan sciencan herezon, li iras ĝis la ekstremo igi la fasciniton dubi, ĉu ne la scienco eraras. Kiel mi diris, la fascinito ordinare tre malvolonte akceptas konsilojn; la kritiko lin pikas, lin incitas kaj igas lin abomeni tiujn, kiuj kun li ne dividas lian admiron. Suspekti lian inspiranton estas en liaj okuloj kvazaŭ profanado, kaj ĝuste tion la Spirito postulas, ĉar kion li volas, tio estas ja, ke ĉiuj kliniĝu antaŭ lia parolo.

Unu el ili eksterordinare fascinadis unu mian konaton; mi elvokis lin, kaj post kelke da fanfaronaĵoj vidante, ke li ne povas trompi min pri sia identeco, li fine konfesis, ke li ne estas la persono, kies nomon li ekprenis. Demandite, kial li tiel trompas tiun personon, li respondis per jenaj vortoj, kiuj ĝuste pentras la karakteron de tiaj Spiritoj: — **Mi serĉadis homon, kun kiu mi povus manovri: mi lin trovis kaj mi lin ne delasos**. Sed se oni klare montras al li la aferon, li kontraŭmetas: — **Tion ni ja vidos!** Ĉar neniu estas pli blinda ol tiu, kiu ne volas vidi, kiam oni konstatas la senutilecon de ĉia provo malfermi la okulojn al la fascinito, la plej bona, kion oni farus, tio estas forlasi lin kun liaj iluzioj. Oni ne povas resanigi malsanulon, kiu obstinas en la pluigado de sia malsano kaj plezuras en ĝi.

**251.** La korpa subjugigo ofte forprenas de la obsedito la energion necesan por superregi la malican Spiriton; tial iu krompersono devas enpaŝi en la aferon, agante ĉu per magnetismo, cŭ per la potenco de sia volo.

Se la obsedito ne kunhelpas, tiam tiu persono devas trudi aŭtoritaton super la Spirito; sed, ĉar tiu aŭtoritato povas esti nur morala, tial povas ĝin havi nur iu estulo **morale supera** ol la Spirito, kaj lia povo estas des pli efika, ju pli granda lia morala supereco, ĉar tiel li imponas al tiu Spirito, kiu do estas devigita kliniĝi antaŭ li. Jen kial Jesuo estis tiel potenca kaj elpeladis estulojn, kiujn en tiu tempo oni nomadis demonoj, t. e. obsedantajn malicajn Spiritojn.

Mi ĉi tie povas doni nur ĝeneralajn konsilojn, ĉar ekzistas nenia materiala procedo, precipe nenia formulo, nenia formala parolo, kiu havus la povon elpeli obsedantajn Spiritojn. Kio iafoje mankas al obsedito, tio estas ia sufiĉa fluidaĵa forto; en ĉi tiu okazo la magneta agado de bona magnetizanto povas tre utili al li. Estas tamen ĉiam konsiderinde, ke oni, per fidinda mediumo, petu la konsilojn de iu Supera Spirito aŭ de lia gardanta anĝelo.

**252.** La moralaj neperfektaĵoj de la obsedito iafoje estas baro al lia liberiĝo. Jen notinda ekzemplo, kiu povas servi kiel instruo al ĉiuj:

Jam de kelke da jaroj pluraj fratinoj estis viktimoj de tre malagrablaj vandalaĵoj. Iliaj vestoj estis senĉese disĵetataj en ĉiujn angulojn de la domo kaj eĉ sur la tegmentojn, tondataj, disŝirataj kaj distruataj, kia ajn ilia zorgo ilin tenadi enŝlosite. For de la mondo, en ia provinca vilaĝeto, tiuj sinjorinoj antaŭe neniam aŭdis pri Spiritismo. Ilia unua ekpenso nature estis supozi, ke trivialaj ŝercemuloj ilin ĉikanadas, sed tia persistado kaj iliaj antaŭzorgoj forbatis de ilia kapo tiun ideon. Nur post longa tempo dank'al kelkaj indikoj, ili opiniis, ke ili devas veni al mi, por ekscii la kaŭzon de tiuj difektoj kaj la rimedojn, kiuj rebonigus la ordon, se nur eble. La kaŭzo ne estis duba; la rimedoj estis pli malfacilaj. Tiu Spirito, kiu manifestiĝis per tiaj agoj, evidente estis malica. Elvokite, li montriĝis terure perversa kaj neatingebla por ĉiu bona sento. La preĝo tamen laŭŝajne efikis utile, sed post kelka tempo da interrompo la vandalaĵoj rekomenciĝis. Jen la konsilo, kiun Supera Spirito donis al mi pri ĉi tiu demando:

"La plej bona, kion tiuj sinjorinoj faru, estas peti siajn protektantajn Spiritojn ilin ne forlasi; miaflanke, mi ne donus al ili konsilon pli bonan ol tion, ke ili esploru la profundon de sia konscienco, por tie al si mem konfesi siajn kulpojn kaj zorge rigardi, ĉu ili ĉiam praktikadis la amon al la proksimulo kaj la kariton. Mi parolas ne pri la karito, kiu donas kaj disdonas, sed pri la karito de la lango, ĉar ili bedaŭrinde ne retenas la sian, kaj ne pravigas per siaj piaj agoj sian deziron liberiĝi de sia turmentanto. Ili tro multe amas klaĉadi pri sia proksimulo, kaj la ilin obsedanta Spirito nun faras venĝon kontraŭ ili, ĉar, kiam sur la Tero, li estis ilia propeka kapro. Ili nur serĉfosu en sia memoro, kaj ili tuj vidos, kun kiu ili traktas.

"Tamen, se ili sukcesos pliboniĝi, iliaj gardanĝeloj denove alproksimiĝos al ili kaj ties sola ĉeesto forpelos la malican Spiriton, kiu aparte alkroĉiĝis al unu el ili precipe tial, ĉar ŝia anĝelo-gardanto devis foriĝi pro iaj ŝiaj riproĉindaj faroj aŭ malnoblaj pensoj. Kion ili devas fari, tio estas varmaj preĝoj por la suferantoj kaj, super ĉio, praktikado de la virtoj, kiujn Dio ordonas al ĉiu laŭ lia stato."

Ĉe mia rimarko, ke ĉi tiuj vortoj ŝajnas al mi iom severaj kaj ke eble estas konsilinde ilin mildigi, por ke mi ilin sciigu al la sinjorinoj, la Spirito rediris:

"Mi devas diri tion, kion mi diras kaj kiel mi diras, ĉar tiuj personoj kutimas pensi, ke ili ne faras malbonon per la lango, kaj tamen ili multe da malbono faras. Tial estas necese frapi ilian spiriton en tia maniero, ke tio estu por ili serioza averto."

El tio dirita rezultas sekvoriĉa instruo, nome, ke la moralaj neperfektaĵoj estas motivoj por la agado de obsedantaj Spiritoj kaj ke la plej trafa rimedo por ilin forpeli estas la altiro de la bonaj per la farado de bono. La bonaj Spiritoj sendube estas pli potencaj ol la malicaj, kaj ilia volo sufiĉas, por forigi ĉi tiujn lastajn; sed ili helpas nur tiujn homojn, kiuj ilin helpas per siaj klopodoj por pliboniĝi, alie ili foriĝas, lasante la kampon libera al la malicaj Spiritoj, kiuj tiamaniere, ĉe iuj

okazoj, fariĝas puniloj, ĉar la bonaj lasas ilin agadi por tiu celo.

**253.** Oni tamen ne atribuu al la rekta agado de la Spiritoj ĉiajn ĉagrenojn, kiuj povas okazi; tiaj malagrablaĵoj estas ofte sekvoj de malzorgo aŭ neantaŭvidemo. Unu bredisto foje skribigis al mi, ke jam de dek du jaroj ĉiaspecaj malfeliĉoj frapadis lian brutaron: jen liaj bovinoj mortis aŭ ne plu liveris lakton, jen ia akcidento trafis liajn ĉevalojn, ŝafojn aŭ porkojn. Li faris multe da naŭtagaj preĝoj, kiuj ja nenion helpis, kiel ankaŭ nenion donis la mesoj kaj ekzorcaĵoj, kiujn li farigis. Tiam, laŭ la antaŭjuĝo de la kamparanoj, li konvinkiĝis, ke oni sorĉis liajn bestojn. Sendube opiniante, ke mi posedas sorĉelpelan povon pli fortan, ol tiu de la paroĥestro de lia vilaĝo, li petis mian opinion. Jen la respondo, kiun mi ricevis:

"La mortado aŭ la malsanoj de la brutaro de tiu homo rezultas el tio, ke liaj staloj estas infektitaj, kaj li ilin ne riparigas, ĉar tio kostas kelkan monon."

**254.** Mi finos ĉi tiun ĉapitron per la respondoj, kiujn la Spiritoj donis al kelke da demandoj kaj kiuj apogas tion, kion mi diris.

1-a: Kial iuj mediumoj ne sukcesas liberiĝi de malicaj Spiritoj, kiuj alkroĉiĝas al ili, kaj kial la bonaj Spiritoj, kiujn ili elvokas, ne havas sufiĉan povon por malproksime tenadi tiujn aliajn kaj por mem komunikiĝi?

"Vere estas ne, ke mankas povo al la bona Spirito, sed ofte, ke la mediumo ne estas sufiĉe forta, por kunklopodi; lia naturo pli taŭgas pro certaj rilatoj; lia fluidaĵo identiĝas prefere kun unu Spirito, ol kun alia. Jen kio havigas tian grandan superregadon al tiuj, kiuj volas lin trompi."

2-a: Ŝajnas al mi tamen, ke iuj homoj tre meritaj, kun neriproĉinda moraleco, estas, malgraŭ tio, malhelpataj komunikiĝi kun la bonaj Spiritoj.

"Tio estas elprovo; cetere, ĉu vi scias, ĉu ilian koron ne makulas iom da malbono? ĉu fiero iom ne superregas

lian ŝajnan bonecon? Montrante al la obsedito lian malfortan flankon, tiuj provoj devas instigi lin al humileco.

"Ĉu ekzistas sur la Tero iu homo, kiu povus esti rigardata kiel perfekta? Iu, kun plena ŝajno de virtulo, povas havi ankoraŭ multe da kaŝitaj difektoj, ian malnovan fermenton de neperfekteco. Ekzemple, vi diras pri iu, kiu ne faras malbonon, kiu estas lojala koncerne siajn sociajn rilatojn: "li estas brava, digna homo"; sed ĉu vi scias, ĉu liajn bonajn ecojn ne nigrigas fiero; ĉu ĉe li ne estas ia fundo de egoismo; ĉu li ne estas avara, ĵaluza, rankora, klaĉema, havanta multegon da aliaj mizeraĵoj, kiujn vi ne rimarkas, ĉar viaj rilatoj kun li ne donis al vi la oportunan okazon, por ilin malkovri? La plej potenca rimedo, por kontraŭbatali la influon de la malicaj Spiritoj, estas kiel eble plej alproksimiĝi al la naturo de la bonaj."

3-a: Ĉu la obsedo, kiu malhelpas mediumon ricevi la komunikaĵojn, kiujn li deziras, ĉiam estas signo de lia senindeco?

"Mi ne diris, ke tio estas signo de senindeco, sed ke ia baro povas malhelpi certajn komunikaĵojn; formovi tiun baron, troviĝantan en li, jen tio, pri kio li devas klopodi, alie liaj preĝoj, liaj petegoj nenion atingos. Ne sufiĉas al malsanulo diri al sia kuracisto: "havigu al mi sanon, mi volas farti bone"; kuracisto povas nenion, se malsanulo ne faras tion necesan."

4-a: Ĉu do la neebleco komunikiĝi kun iuj Spiritoj estus ia puno?

"Ĉe iaj okazoj ĝi povas esti efektiva puno, tiel same, kiel la ebleco komunikiĝi kun ili estas rekompenco, pri kiu vi devas klopodi, por ĝin meriti." (Vd. **Perdo kaj interrompo de la mediumeco**, § 220.)

5-a: Ĉu oni ne povas kontraŭbatali la influon de la malicaj Spiritoj ankaŭ moraligante ilin?

"Oni povas, sed tion oni ne faras kaj tion oni devas ne forgesi fari, ĉar ĝi ofte estas tasko, al vi donita kaj kiun vi devas karite kaj pie plenumi. Per saĝaj konsiloj oni povas instigi ilin al pento kaj plirapidigi ilian progreson."

— Kiel iu homo povas, en ĉi tiu rilato, havi pli grandan influon, ol la Spirito mem?

“La malicaj Spiritoj alproksimiĝas prefere al la homoj, kiujn ili intencas turmenti, ol al la Spiritoj mem, de kiuj ili kiom eble foriĝas. Ĉe ĉi tiu alproksimiĝo al la homoj, kiam ili trovas kelkajn, kiuj ilin moraligas, ili komence tiujn ne aŭskultas kaj ridas; poste, se oni scias ilin kapti, ili fine lasas sin kortuŝi. La altrangaj Spiritoj povas paroli al ili nur en la nomo de Dio, kaj tio ilin teruras. Sendube la homo ne havas pli grandan povon ol la Superaj Spiritoj, sed lia parolo pli bone identiĝas kun la naturo de tiuj aliaj Spiritoj, kaj, vidante la aŭtoritaton, kiun li povas havi super la malsuperaj Spiritoj, li pli klare komprenas la solidarecon inter la Ĉiela kaj la Tero.

“Cetere la aŭtoritato, kiun la homo povas havi super la Spiritoj, estas rekte proporcia al lia morala supereco. Li ne mastras la Superajn Spiritojn, eĉ ne tiujn, kiujn, ne estante superaj, estas tamen bonaj kaj helpemaj, sed li povas mastri la Spiritojn malsuperajn ol li pri moraleco.” (Vd. § 279.)

6-a: Ĉu pelita ĝis certa grado, la subjugigo povus rezultigi frenezon?

“Jes, ian frenezon, kies kaŭzo estas nekonata en la mondo, sed kiu havas nenian rilaton al la ordinara frenezo. Inter homoj, iujn oni konsideras frenezuloj, multaj estas nuraj obseditoj; ili bezonus moralan prizorgadon, dum per korpa kuracado oni faras ilin absolutaj frenezuloj. Kiam la kuracistoj bone konos Spiritismon, ili scios fari tiun distingon kaj resanigos pli da malsanuloj per ĝi, ol per duŝoj.” (§ 221.)

7-a: Kion pensi pri homoj, kiuj, vidante ian danĝeron en Spiritismo, opinias, ke la rimedo por antaŭforigi tian danĝeron estus malpermesi la komunikiĝojn kun la Spiritoj?

“Se ili povas malpermesi al iuj homoj komunikiĝi kun la Spiritoj, ili tamen ne povas malhelpi spontaneajn manifestiĝojn antaŭ tiuj samaj homoj, ĉar ja ili ne povas nuligi la Spiritojn, nek neebligi ties kaŝitan influon. Ili

similas tiajn infanojn, kiuj kovras al si la okulojn kaj tiam pensas, ke neniu ilin vidas. Estus frenezaĵo voli elĵeti aferon, kiu donas grandajn utilojn, tial, ĉar senprudentuloj povas ĝin misuzi; la rimedo por antaŭforigi tiujn malbonaĵojn estas, kontraŭe, fari ĝin funde konata.”

———————

ĈAPITRO XXIV

# PRI LA IDENTIGO DE LA SPIRITOJ

*Eblaj pruvoj de identeco. Distingo inter la bonaj kaj la malbonaj Spiritoj. Demandoj pri la naturo kaj la identeco de la Spiritoj*

## Eblaj pruvoj de identeco

**255.** La demando pri la identigo de la Spiritoj estas unu el la plej diskutataj, eĉ inter la adeptoj de Spiritismo; tiel estas, efektive, ĉar la Spiritoj alportas al ni neniajn legitimaĵojn, kaj oni scias, kiel facile iuj el ili prenas al si malproprajn nomojn; tial, krom la obsedo, tio ankaŭ estas unu el la plej grandaj malfacilaĵoj de la praktika Spiritismo. Cetere, ĉe multe da okazoj, la absoluta identigo estas demando akcesora kaj sen reala graveco.

La identigo de la Spiritoj de antikvaj personoj estas la plej malfacila, eĉ ofte ne ebla, kaj tiam oni devas limigi sin per pure morala konsiderado. Oni juĝas la Spiritojn, kiel la homojn, laŭ ilia parolo; se iu Spirito sin prezentas sub la nomo, ekzemple, de Fénelon, sed diras trivialaĵojn aŭ infanaĵojn, tiu evidente ne povas esti li; sed se li diras aferojn indajn de Fénelon, kiujn ĉi tiu ne rifuzus rekoni kiel siajn, tiam ekzistas, se ne ia materiala pruvo, almenaŭ ĉiu probableco morala, ke tiu estas ja li. Precipe en ĉi tiu okazo la reala identeco estas flanka demando; se la Spirito diras nur bonajn aferojn, malmulte gravas la nomo, sub kiu ili estas prezentataj.

Oni sendube kontraŭdiros, ke Spirito, kiu alprenus falsan nomon, eĉ nur por ia bona parolo, ja farus mistifikon, sekve li ne povus esti bona Spirito. Ĉi tie estas

iaj subtilaĵoj tre malfacile kapteblaj, kiujn mi nun provos elvolvi.

**256.** Laŭgrade kiel la Spiritoj puriĝas kaj supreniras en la hierarkio, la distingigaj karakteroj de ilia personeco iamaniere elviŝiĝas en la unuformeco de la perfekteco, sed ili tamen konservas sian individuecon; ĉi tio fariĝas kun la superaj kaj la puraj Spiritoj. En ĉi tiu situacio la nomo, kiun ili havis sur la Tero, dum unu el la multegaj **efemeraj** enkorpaj ekzistadoj, kiujn ili travivis, estas io absolute sensignifa. Ni rimarku ankaŭ, ke la Spiritoj estas altiratаj unuj al aliaj pro la simileco de siaj karakteroj, kaj tiel ili estigas intersimpatiantajn grupojn aŭ familiojn. Aliflanke, se oni konsideros la grandegan nombron da Spiritoj, kiuj ekde la origino de la tempoj certe atingis la unuajn rangojn, kaj se oni komparos tiun nombron kun la tiel malgranda nombro de la homoj, kiuj postlasis laŭtan nomon sur la Tero, tiam oni komprenos, ke el la Superaj Spiritoj, kiuj povas komunikiĝi kun ni, la plej multaj probable havas nomojn nekonatajn al ni; sed ĉar ni bezonas nomojn, por fiksi niajn ideojn, tial ili povas alpreni tiun de iu konata persono, kies naturo plej bone identiĝus kun la ilia; tial niaj gardanĝeloj plej ofte faras sin konataj sub la nomo de iu el la sanktuloj, kiujn ni respektegas, kaj ordinare sub la nomo de tiu, kun kiu ni plej kore simpatias. El tio sekvas, ke se ies gardanta anĝelo nomas sin Sankta Petro, nenio materiale pruvas, ke li estas ĝuste la apostolo kun ĉi tiu nomo: li povas esti tiu aŭ iu tute nekonata Spirito, apartenanta al familio de Spiritoj, el kiuj unu estas Sankta Petro. El tio sekvas ankaŭ, ke, kia ajn estas la nomo, per kiu oni elvokas sian gardanĝelon, li venas, ĉar lin altiras la penso: la nomo estas por li indiferenta.

Tio sama okazas ĉiam, kiam iu Supera Spirito propravole komunikiĝas sub la nomo de konata persono. Nenio pruvas, ke li estas ĝuste la Spirito de tiu persono; sed se li diras nenion, kio malkonfirmus la noblecon de ties karaktero, tiam ekzistas la **probablaĵo**, ke li estas ja tiu, kaj ĉiaokaze oni povas diri, ke, se ne tiu mem, li

ja estas iu samranga Spirito aŭ eĉ eble iu ties sendito. Resume: la demando pri la nomo estas akcesora; nomo povas esti konsiderata kiel nura signo de la rango, kiun la Spirito okupas en la hierarkio de tiuj estuloj.

Alie mienas la afero en la okazo, se iu Spirito el pli malalta ordo sin pave ornamas per respektinda nomo, por kreditigi sian parolon; ĉi tiu okazo estas tiel ofta, ke oni neniam troigus sian antaŭgardon kontraŭ tiaj substituiĝoj, ĉar, profitante el tiuj malpropraj nomoj kaj precipe uzante fascinadon, iuj sistememaj Spiritoj, pli fieraj ol kleraj, penas kredindigi la plej ridindajn ideojn.

La demando pri la identeco estas do, kiel mi diris, pli-malpli indiferenta, kiam la afero estas pri ĝeneralaj instruoj, ĉar la pli altaj Spiritoj povas anstataŭi unu alian sen ia konsekvenco. La Superaj Spiritoj konsistigas, por tiel diri, tutaĵon, kies anoj, kun malmultaj esceptoj, estas al ni tute ne konataj. Interesas nin ne ilia persono, sed ilia instruado; nu, se tiu instruado estas bona, ne gravas do, ke tiu, kiu ĝin donas, nomas sin Petro aŭ Paŭlo: oni taksas ĝin ne laŭ ĝia ŝildo, sed laŭ ĝia kvalito. Se iu vino estas malbona, la etiketo ne farus ĝin bona. Alie okazas ĉe intimaj komunikaĵoj, ĉar interesas nin la individuo, la persono mem; en ĉi tiu cirkonstanco estas pravigeble, ke oni penu certiĝi, ĉu la Spirito, veninta al ni vokite, estas ja tiu, kiun ni deziras.

**257.** La identigo estas multe pli facila en la okazo de nuntempaj Spiritoj, kies karakteron kaj kutimojn oni konas, ĉar ĝuste per tiuj kutimoj, de kiuj ili ankoraŭ ne havis la tempon por seniĝi, ili rekonigas sin, kaj mi tuj diru, ke tio estas ja unu el la plej certaj signoj de identeco. La Spirito sendube povas pruvi sian identecon, kontentigante la peton, kiun oni pri tio faris al li, sed li tiel agas nur tiam, se tio interesas lin mem; tiu peto lin ordinare ĉagrenas, kaj tial oni devas ĝin ne fari. Forlasinte sian korpon, la Spirito ne rezignas sian ofendiĝemon; vundas lin ĉiu demando, celanta lin elprovi. **Iajn demandojn oni ne kuraĝus adresi al li, se li sin prezentus kun karno kaj ostoj,** pro la timo atenci la decregulojn; kial do lin malpli respekti post lia elkarniĝo? Ĉu iun

sinjoron, kiu sin prezentas en salono, eldirante sian nomon, oni abrupte petus, ke li per legitimaĵoj pruvu, ke li estas ja tiu, sub la preteksto, ke ekzistas trompistoj? Tiu sinjoro sendube havus la rajton rememorigi al sia demandinto la regulojn de bonedukiteco. Ĝuste tiel la Spiritoj kondutas, ne respondante aŭ forirante. Ni prenu ekzemplon por komparo. Ni prezentu al ni, ke la astronomo Arago, ankoraŭ sur la Tero, sin prezentis en ia domo, kie lia persono ne estis konata, kaj ke oni lin impertinente alparolis jene: "Vi diras, ke vi estas Arago, sed, ĉar ni vin ne konas, tial bonvolu tion pruvi al ni, respondante kelkajn demandojn: solvu tian problemon de Astronomio; diru al ni vian patronomon, vian antaŭnomon, la nomojn de viaj infanoj, tion, kion vi faris en tia tago, je la tioma horo k. t. p." Kion, li respondus? Nu, kiel Spirito li faros same, kiel iam sur la Tero, kaj same kondutas la ceteraj Spiritoj.

**258.** Kvankam ili rifuzas respondi al infanecaj kaj ekstravagancaj demandoj, pri kiuj oni farus al si skrupulon tiujn adresi al ilia enkarna persono, tamen la Spiritoj ofte donas memvole nerefuteblajn pruvojn pri sia identeco per sia karaktero, kiu elmontriĝas el ilia parolo, per la uzado de vortoj, kiuj estis al ili kutimaj, per la citado de iuj faktoj, de apartaj aferoj en sia vivo, iafoje nekonataj al la ĉeestantoj, travivaĵoj, kies verecon oni povis konstati. La pruvoj pri identeco elfluas, krom tio, el multego da neatenditaj cirkonstancoj, kiuj ne ĉiam sin prezentas per unu fojo, sed dum la serio de la interparoloj. Estas do konsilinde ilin atendi, sed ne elmovi, zorge observante ĉiujn, kiuj povas rezulti el la konsisto de la komunikaĵoj. (Vd. la fakton raportitan en la § 70.)

**259.** Unu rimedo, kiun iafoje oni sukcese uzas, por certiĝi pri la identeco de iu komunikiĝanta Spirito, kiam li estas suspektinda, konsistas en tio, igi lin aserti, **en la nomo de Dio ĉiopova**, ke li ja estas tiu, pri kiu li diras, ke li estas. Ofte okazas, ke tiu, kiu sin prezentas sub malpropra nomo, ŝanceliĝas ĉe la sakrilegio kaj, komencinte skribi: **Mi asertas, en la nomo de** ..., li haltas kaj kolere ekfaras sensignifajn strekojn sur la papero

aŭ rompas la krajonon. Se li estas pli hipokrita, tiam li sin elturnas de la demando per mensa limigo, skribante ekzemple: **Mi certigas vin, ke mi diras la veron,** aŭ: **Mi asertas, en la nomo de Dio, ke tiu estas ja mi mem, kiu parolas al vi**, aŭ alie. Sed kelkaj ne estas tiel skrupulemaj kaj ĵuras ĉion, kion oni volas. Unu el tiaj komunikiĝis kun iu mediumo nomante sin **Dio**, kaj la mediumo, forte honorita per tia alta favoro, ne hezitis kredi lin. Elvokite de mi, li ne kuraĝis daŭrigi sian friponaĵon kaj diris: "Mi ne estas Dio, sed mi estas Lia filo." — Ĉu vi do estas Jesuo? ĉi tio estas ne probabla, ĉar Jesuo tro alte sidas, ke li uzus ian artifikon. Ĉu vi do kuraĝas aserti, en la nomo de Dio, ke vi estas la Kristo? "Mi ne diras, ke mi estas Jesuo; mi diras, ke mi estas filo de Dio, ĉar mi estas unu el Liaj kreitoj."

Oni devas el ĉi tio konkludi, ke la rifuzo de iu Spirito, certigi sian identecon en la nomo de Dio, estas ĉiam evidenta pruvo, ke la nomo, kiun li alprenis, estas friponaĵo, sed lia certigo estas ne senduba pruvo, sed nur probablaĵo.

**260.** Oni povas alkalkuli al la pruvoj pri identeco la similecon de la skribo kaj de la subskribo, sed, krom tio, ke ne ĉiuj mediumoj kapablas atingi tiun rezultaton, ĝi ne estas sufiĉa garantio; falsistoj ekzistas en la mondo de la Spiritoj, tiel same, kiel en ĉi tiu; ĝi estas do nur probablaĵo de identeco, kiu ricevas valoron nur dank'al la cirkonstancoj, kiuj ĝin akompanas. Tio sama fariĝas kun ĉiaj materialaj signoj, kiujn kelkaj homoj kredigas kvazaŭ talismanojn neimiteblajn por la mensogemaj Spiritoj. Por tiuj, kiuj kuraĝas trompe ĵuri en la nomo de Dio aŭ falsi subskribon, ia materiala signo ne povas esti baro. La plej bona el ĉiaj pruvoj pri identeco kuŝas en la parolo kaj en okazaj cirkonstancoj.

**261.** Oni sendube diros, ke se iu Spirito povas imiti subskribon, li do tue same povas imiti la parolon. Jes, ĝuste; mi vidis kelkajn, kiuj senhonte alprenis la nomon de la Kristo kaj kiuj, por kredigi la mistifikon, ŝajnigis la evengelian stilon kaj, nek al teksto nek al preteksto,

malavare disĵetadis jenajn tre konatajn vortojn: **Vere, vere mi diras al vi**; sed, ekzameninte la tuton **sen antaŭjuĝo**, esplorinte la fundon de la pensoj, vidinte apud belaj maksimoj pri karito infanecajn kaj ridindajn rekomendojn, oni devus ja esti **fascinita**, por erari pri tio. Efektive, kelkaj partoj de la materiala formo de la parolo povas esti imitataj, sed ne la penso; senklereco neniam imitos la veran klerecon, kaj malvirto neniam imitos la veran virton; la azeno ne povas longe kaŝi sian voston sub la felo de la leono. Tiam la mediumo kaj ankaŭ la elvokinto bezonas ja sian tutan sagacecon kaj sian tutan juĝokapablon, por malimpliki la veron for de la mensogo. Ili devas konvinkiĝi, ke la malicaj Spiritoj estas kapablaj je ĉiaj ruzaĵoj kaj ke ju pli alta estas la nomo, sub kiu iu Spirito sin prezentas, des pli da malkonfido li devas veki. Kiom da mediumoj ricevis apokrifajn komunikaĵojn kun la subskribo Jesuo, Maria aŭ de iu adorata sanktulo!

## Distingo inter la bonaj kaj la malbonaj Spiritoj

**262.** La absoluta identigo de la Spiritoj estas, en multe da okazoj, flanka, malgrava demando, sed ne tia estas la distingo inter la bonaj kaj la malbonaj Spiritoj; ilia individueco povas esti por ni indiferenta, sed ilia esteco mem, neniam. En ĉiuj instruaj komunikaĵoj ĝuste sur ĉi tiu punkto devas do koncentriĝi nia atento, ĉar nur ĝi povas havigi al ni la gradon de nia konfido al la manifestiĝanta Spirito, kia ajn la nomo, sub kiu li manifestiĝas. Ĉu la manifestiĝanta Spirito estas bona aŭ malbona? Al kiu rango de ilia hierarkio li apartenas? Jen la plej ĉefaj demandoj. (Vd.: “Spirita hierarkio”, en **La Libro de la Spiritoj**, § 100.)

**263.** Oni juĝas la Spiritojn, mi diris, same kiel oni juĝas la homojn, nome laŭ ilia parolo. Ni prezentu al ni, ke iu homo ricevis dudek leterojn de personoj, al li nekonataj; laŭ la stilo, laŭ la pensoj, unuvorte laŭ multego da signoj, li konkludas, kiuj estas instruitaj aŭ malkreraj, ĝentilaj aŭ malbone edukitaj, supraĵemaj, pro-

fundapensaj, frivolaj, fieraj, seriozaj, ventkapaj, sentimentalaj k. t. p. Same okazas koncerne la Spiritojn: oni devas rigardi ilin kiel korespondantojn, kiujn oni neniam antaŭe vidis, kaj demandi sin, kion oni pensus pri la sciaĵaro kaj la karaktero de iu homo, kiu dirus aŭ skribus tiajn aferojn. Oni povas preni kiel neŝanĝeman kaj senesceptan regulon, ke **la parolo de la Spiritoj estas ĉiam proporcia al la grado de ilia alteco**. La efektive superaj Spiritoj ne sole diras nur bonajn aferojn, sed ankaŭ tiujn diras per vortoj plej absolute liberaj de ĉia trivialeco. Kiel ajn bonaj estas tiuj aferoj, se eĉ unu sola esprimo, kiu montrus malnoblecon, ĝin makulas, tio estas senduba signo de malsupereco, kaj des pli prave, se la tuto de la komunikaĵo per sia maldelikateco vundas la decregulojn. La parolo ĉiam malkaŝas sian originon, ĉu per la penso, kiun ĝi esprimas, ĉu per la formo, kaj tial, eĉ se iu Spirito volus trompi nin pri sia pseŭdosupereco, sufiĉas iom longe konversacii kun li, por lin taksi.

**264.** Ankaŭ boneco kaj bonvolemo estas esencaj propraĵoj de la elpuriĝintaj Spiritoj; ili portas malamon nek kontraŭ la homoj, nek kontraŭ la ceteraj Spiritoj; ili bedaŭras la malfortaĵojn, kritikas la erarojn, sed ĉiam modere, sen galo kaj sen ofendemo. Se oni akceptas, ke la efektive bonaj Spiritoj povas voli sole nur bonon kaj diri sole nur bonajn aferojn, oni el tio konkludos, ke ĉio, kio en la parolo de la Spiritoj elmontras mankon de boneco kaj de bonvolemo, ne povas veni de iu bona Spirito.

**265.** La inteligenteco tute ne estas senduba signo de supereco, ĉar inteligenteco kaj moralo ne ĉiam iras duope. Iu Spirito povas esti bona, bonvolema, sed havi limitajn sciojn, dum iu inteligenta kaj klera Spirito povas esti tre malsupera pri moralo.

Multaj pensas, ke, demandante la Spiriton de iu, kiu estis kompetenta pri sia specialeco sur la Tero, oni pli certe ricevos la veron; ĉi tio estas logika, sed ne ĉiam vera. La sperto montras, ke la scienculoj, same kiel la aliaj homoj, precipe tiuj, kiuj elkarniĝis antaŭ nelonge,

ankoraŭ troviĝas sub la regado de la antaŭjuĝoj de sia enkorpa vivo: ili ne tuj liberiĝas de sia sistememeco. Povas do okazi, ke sub la influo de la ideoj, kiujn ili portis, kiam sur la Tero, kaj el kiuj ili faris al si titolon de gloro, ili vidas malpli klare, ol kiel ni pensas. Mi ne prezentas ĉi tiun principon kiel regulon, multe mankas ĝis tio; mi diras nur tion, ke oni ĝin konstatas kaj ke sekve ilia homa scio ne ĉiam estas pruvo pri ilia neeraremo kiel Spiritoj.

**266.** Submetante ĉiujn komunikaĵojn al skrupula ekzameno, profunde esplorante kaj analizante la penson kaj la esprimojn, kiel oni faras juĝante literaturan verkon, **senhezite** forĵetante ĉion, kio pekus kontraŭ la logiko kaj la komuna saĝo, ĉion, kio neigus la karakteron de la Spirito, kies manifestiĝon oni supozas, oni senkuraĝigas la trompemajn Spiritojn, kiuj fine foriras, intime konvinkite, ke ili ne povas nin trompi. Mi ripetas: ĉi tiu estas la sola rimedo, sed nepre efikanta, ĉar nenia malbona komunikaĵo povas rezisti al rigora kritiko. La bonaj Spiritoj neniam ofendiĝas pro tia kritiko, ĉar ili mem ĝin konsilas kaj neniel timas ĝin; nur la malicaj sentas sin de ĝi pikitaj kaj de ĝi dekonsilas, ĉar ili ĉion perdus, kaj per tio ili elmontras, kio ili estas.

Jen la konsilo, donita de Sankta Ludoviko en ĉi tiu rilato:

"Kiel ajn prava la konfido, kiun al vi inspiras la Spiritoj, kiuj prezidas en viaj laboroj, ni faras rekomendon, kiun neniam estas superflue ripetadi kaj kiun vi devus ĉiam tenadi en la memoro, kiam vi donas vin al viaj studoj, nome pesi kaj mature pripensi, submeti al la kontrolado de la plej severa prudento ĉiajn komunikaĵojn, kiujn vi ricevas; se iu punkto ŝajnas al vi suspektinda, duba aŭ malklara, nepre petu pri la necesaj klarigoj, por fari al vi firman opinion pri la afero."

**267.** Oni povas resumi la rimedojn por ekkoni la naturon de la Spiritoj en la sekvantaj principoj:

1-a: Nenia alia kriterio ekzistas por la taksado de la valoro de la Spiritoj, ol la komuna saĝo. Ĉia formulo,

kiun por tio donas la Spiritoj mem, estas absurda kaj ne povas veni de Superaj Spiritoj.

2-a: Oni taksas la Spiritojn laŭ ilia parolo kaj iliaj agoj. La agoj de la Spiritoj estas la sentoj, kiujn ili enblovas en nin, kaj la konsiloj, kiujn ili al ni donas.

3-a: Se oni akceptas, ke la bonaj Spiritoj povas diri kaj fari nur bonon, ĉio malbona ne povas veni de iu bona Spirito.

4-a: La parolo de la Superaj Spiritoj estas ĉiam digna, nobla, alta, miksita kun nenia trivialaĵo; ili ĉion diras simple kaj modeste, neniam sin gloras, neniam paradas per sia klereco nek per sia pozicio inter la ceteraj. La parolo de la malsuperaj aŭ vulgaraj Spiritoj ĉiam iom spegulas la homajn pasiojn; ĉia esprimo, kiu odoras malnoblecon, tromemfidon, arogantecon, fanfaronadon, galecon, estas karakteriza signo de malsupereco, aŭ de trompo en la okazo, se la Spirito sin prezentas sub respektinda kaj adorata nomo.

5-a: Oni ne juĝu la Spiritojn laŭ la materiala formo kaj la korekteco de ilia stilo, sed oni sondu ilian intiman estecon, oni zorge esploru iliajn parolojn, oni ĉi tiujn pesu malvarme, mature kaj sen antaŭjuĝo. Ĉia deklinigo pri logiko, prudento kaj saĝo povas allasi nenian dubon pri ilia origino, kia ajn la nomo, per kiu la Spirito sin ridinde vestas. (§ 224.)

6-a: La parolo de la altrangaj Spiritoj estas ĉiam unu sama, se ne laŭ la formo, almenaŭ laŭ la fundo. La pensoj estas samaj, kiuj ajn la tempo kaj la loko. Tiuj pensoj povas ricevi pli aŭ malpli vastan elvolvadon, laŭ la cirkonstancoj, la bezonoj kaj la facileco de komunikiĝo, sed ili ne kontraŭdiras sin mem. Se du komunikaĵoj, subskribitaj de la sama nomo, kontraŭas unu la duan, unu el ili estas evidente apokrifa, kaj la vera estas tiu, kiu NENIOM neigas la konatan karakteron de tiu persono. Inter du komunikaĵoj, subskribitaj, ekzemple, de Sankta Vincento de Paŭlo, kaj el kiuj unu predikus unuiĝon kaj kariton, dum la dua celus dissemadon de malkonkordo, nenia prudenta homo povus erari.

7-a: La bonaj Spiritoj diras nur tion, kion ili scias; pri tio, kion ili ne scias, ili silentas aŭ konfesas sian

nekompetentecon. La malicaj parolas pri ĉio kun memcerteco, neniel zorgante pri la vero. Ĉia okulfrapanta scienca herezo, ĉia principo, kiu vundas la naturan saĝon, elmontras la trompon, se la Spirito pretendas esti rigardata kiel klerulo.

8-a: Oni rekonas la frivolajn Spiritojn ankaŭ laŭ la facileco, kun kiu ili antaŭdiras la estontecon kaj precize sciigas faktojn, pri kiuj ne estas al ni konsentite ilin koni. La bonaj Spiritoj povas antaŭsentigi estontajn okazaĵojn tiam, kiam ĉi tiu sciiĝo estas utila, sed ili neniam difinas datojn. Ĉia antaŭsciigo pri iu okazaĵo por fiksa tempo estas signo de mistifiko.

9-a: La Superaj Spiritoj esprimas sian penson simple, malmultvorte; ilia stilo estas konciza, ne flanken metante la poezion de la ideoj kaj de la esprimoj, klara, komprenebla por ĉiuj, ne postulanta penon por esti komprenata; ili havas la lertecon diri multe da aferoj per malmulte da vortoj, ĉar ĉiu vorto havas sian apartan celon. La malsuperaj Spiritoj, aŭ pseŭdo-kleruloj, kaŝas sub la ŝvelparolo kaj emfazo la senenhavecon de sia penso. Ilia parolo estas ofte pretendema, ridinda aŭ malklara pro la granda klopodo, por ŝajni profunda.

10-a: La bonaj Spiritoj neniam ordonas: ili ne imponas, sed nur konsilas, kaj, se oni ilin ne aŭskultas, ili foriras. La malicaj estas ordonemaj; ili donas ordonojn, volas esti obeataj kaj restas spite ĉion. Ĉiu sin trudanta Spirito elperfidas sian originon. Ili estas ekskluzivemaj kaj absolutaj pri siaj opinioj kaj pretendas la privilegion de la vero. Ili postulas blindan kredon kaj ne konsilas la prudenton, ĉar ili ja scias, ke la prudento ilin senmaskigus.

11-a: La bonaj Spiritoj ne flatas; ili aprobas bonfaritaĵon, sed ĉiam kun mezurateco. La malicaj disverŝas troajn laŭdojn, stimulas fieron kaj vantamon, kvankam predikante humilecon, kaj penas **ekzalti la personan gravecon** de tiuj, kiujn ili volas enlogi al si.

12-a: La Superaj Spiritoj, **en ĉiaj aferoj**, sidas pli alte, ol la infanaĵoj de la formo. Nur la vulgaraj Spiritoj povas alligi gravecon al bagatelaĉaj detaletoj, neakordigeblaj kun efektive altaj ideoj. **Ĉia zorgega pre-**

**skribo** estas senduba signo de malsupereco kaj mistifiko de Spirito, kiu prenas al si imponan nomon.

13-a: Oni malfidu eksterkutimajn kaj ridindajn nomojn, kiujn prenas al si iuj Spiritoj, volantaj imponi al la kredemo; estus ekstrema absurdo preni serioze tiujn nomojn.

14-a: Oni malfidu ankaŭ Spiritojn, kiuj tro facile sin prezentas sub aparte respektegataj nomoj, kaj iliajn parolojn oni akceptu nur plej singarde; precipe en ĉi tiu okazo estas necesa severa kontrolo, ĉar tio ofte estas masko, kiun ili surmetas, por kredigi je supozataj intimaj rilatoj kun superegaj Spiritoj. Per ĉi tiu rimedo ili flatas la vantamon de la mediumo kaj tiun malvirton uzas, por ofte instigi lin al bedaŭrindaj aŭ ridindaj kondutoj.

15-a: La bonaj Spiritoj estas tre skrupulaj pri la kondutoj, kiujn ili povas konsili; en ĉiaj okazoj tiuj kondutoj havas ĉiam **seriozan kaj treege utilan celon**. Oni do devas rigardi kiel suspektindajn ĉiajn kondutojn, kiuj ne havas ĉi tiun karakteron aŭ estus kondamnitaj de la racio, kaj mature pripensi, antaŭ ol ilin preni, ĉar oni riskus malagrablajn mistifikojn.

16-a: Oni rekonas la bonajn Spiritojn ankaŭ per ilia saĝa mezurateco pri ĉio, kio povus kompromiti iun; profunde malplaĉas al ili senvualigo de malbono. Por la frivolaj aŭ malicaj Spiritoj estas plezuro reliefigi tiujn aferojn. Dum la bonaj Spiritoj penas mildigi erarojn kaj predikas indulgon, la malicaj ilin troigas kaj dissemas malamikiĝon per perfidaj duondiroj.

17-a: La bonaj Spiritoj konsilas nur bonon. Ĉia maksimo, ĉia konsilo ne **strikte konforma al la pura evangelia karito** ne povas esti faro de bonaj Spiritoj.

18-a: La bonaj Spiritoj neniam konsilas ion krom tute raciaj aferoj; ĉia rekomendo, kiu dekliniĝus de la **rekta linio de la natura saĝo** aŭ de la **senŝanĝaj leĝoj de la Naturo**, elmontras fermitkapan kaj sekve ne multe fidindan Spiriton.

19-a: La malicaj, aŭ simple neperfektaj, Spiritoj elperfidas sin ankaŭ per materialaj signoj, pri kiuj neniu povus erari. Ilia agado sur la mediumon estas iafoje

bruteca, estigante ĉe li krudajn kaj spasmajn movojn, ian febrecan kaj konvulsian agitiĝadon, kiu kontrastas kun la kvietanimeco kaj mildeco de la bonaj Spiritoj.

20-a: La neperfektaj Spiritoj ofte profitas komunikrimedojn, kiujn ili disponas, por inspiri fiajn konsilojn; ili ekscitas malkonfidon kaj malfavoremon kontraŭ ĉiuj, kiujn ili antipatias; la plej ĉefa objekto de ilia malamo estas tiuj homoj, kiuj povas malkaŝi iliajn friponaĵojn. La malfortanimaj homoj estas ilia celo por la kondukado en malbonon. Uzante alterne sofismojn, sarkasmojn, insultojn kaj eĉ materiajn signojn de sia kaŝita potenco, por pli bone konvinki, ili penas tiajn homojn deklini de la vojo de vero.

21-a: La Spiritoj de la homoj, kiuj sur la Tero havis unu solan absorban zorgon, ĉu materian, ĉu moralan, se ili ne liberiĝis de la influo de la materio, ankoraŭ troviĝas sub la potenco de la surteraj ideoj kaj kunportas parton el la antaŭjuĝoj, el la preferoj, **eĉ la manioj**, kiujn ili ĉi tie nutradis. Ĉi tio estas facile konstatebla el ilia parolo.

22-a: La scioj, per kiuj iuj Spiritoj sin ornamas ofte kun ia sinmontrado, ne estas signo de ilia supereco. La vera provilo, en ĉi tiu rilato, estas la senŝanĝa pureco de la moralaj sentoj.

23-a: Ne sufiĉas demandi iun Spiriton, por ekkoni la veron. Estas necese antaŭ ĉio scii, al kiu oni havas aferon, ĉar la malsuperaj Spiritoj, senkleraj estuloj, pritraktas frivole la plej seriozajn demandojn. Ankaŭ ne sufiĉas, ke iu Spirito estis granda homo sur la Tero, por ke li en la mondo de la Spiritoj havu la plej altegan sciaĵaron. Nur la virto povas, lin purigante, alproksimigi lin al Dio kaj plivastigi liajn sciojn.

24-a: La ŝerca parolo de la Superaj Spiritoj estas ofte subtila kaj pikanta, sed neniam triviala. Ĉe la mokemaj, sed ne malĝentilaj Spiritoj, la mordanta satiro estas ofte tute ĝustatempa.

25-a: Zorge esplorante, precipe koncerne la moralon, la karakteron de la sin prezentantaj Spiritoj, oni ekkonas ilian naturon kaj ekscias la gradon da konfido, kiun oni povas havi al ili. La natura saĝo ne povus erarigi.

26-a: Por juĝi la Spiritojn, tiel same, kiel por juĝi la homojn, ĉiu devas unue scii juĝi sin mem. Bedaŭrinde multaj homoj ekzistas, kiuj rigardas sian personan opinion kiel ekskluzivan mezuron de tio bona kaj de tio malbona, de tio vera kaj de tio malvera; ĉio, kio kontraŭdiras ilian manieron vidi la aferojn, iliajn ideojn, la sistemon, kiun ili kreis al si aŭ alprenis, estas malbona en iliaj okuloj. Al tiaj homoj evidente mankas la plej ĉefa kvalito por justa taksado, nome la ĝusteco de juĝado, sed tion ili tute ne imagas al si; tio estas la malbonaĵo, pri kiu oni faras al si la plej grandan iluzion.

Ĉiuj ĉi instruoj elfluas el la sperto kaj el la instruado de la Spiritoj; mi ilin nun kompletigos per la respondoj mem, kiujn ili donis pri la plej gravaj punktoj.

## 268. Demandoj pri la naturo kaj la identeco de la Spiritoj

I. Laŭ kiaj signoj oni povas ekkoni la superecon aŭ malsuperecon de la Spiritoj?

"Laŭ ilia parolo, tiel same, kiel vi distingas ventkapulon de saĝulo. Ni jam diris: la Superaj Spiritoj neniam kontraŭdiras sin mem kaj parolas nur bonajn aferojn. Ili volas nur bonon: jen ilia absorba zorgo.

"La malsuperaj Spiritoj ankoraŭ troviĝas sub la potenco de la materiaj ideoj; iliaj paroloj spegulas ilian senklerecon kaj neperfektecon. Nur la Superaj Spiritoj kapablas koni ĉiujn aferojn kaj ilin senpasie taksi."

II. Ĉu la klereco estas ĉiam senduba signo de la altrangeco de iu Spirito?

"Ne, ĉar se li ankoraŭ troviĝas sub la influo de la materio, li eble havas viajn malvirtojn kaj antaŭjuĝojn. Iuj homoj, en ĉi tiu mondo, estas enviemaj kaj fieraj: ĉu vi opinias, ke, forlasinte ĝin, ili seniĝus je tiuj malbonaĵoj? Foririnte de ĉi tie, la Spiritoj, precipe tiuj, kiuj portis tre profundajn pasiojn, restas ankoraŭ envolvitaj en ia atmosfero, kiu konservas ĉiujn tiujn malbonaĵojn.

"Tiuj nur kleraj Spiritoj estas pli timindaj ol la malicaj, ĉar la plej multaj kunigas ruzecon kaj fieron kun inteligenteco. Dank'al sia pseŭdo-klereco ili imponas al

la simpluloj kaj al la sensciuloj, kiuj senkontrole akceptas iliajn absurdajn kaj mensogajn teoriojn. Kvankam tiaj teorioj ne povas superforti la veron, ili tamen ja faras momentan malbonon, ĉar ili malhelpas la marŝon de Spiritismo, kaj la mediumoj sin mem volonte blindigas pri la indo de tio, kio estas al ili komunikata. Ĉi tiu estas afero, kiu postulas tre profundan studadon de la flanko de klarmensaj spiritistoj kaj de la mediumoj; distingi inter tio vera kaj tio malvera, jen demando, sur kiun oni metu sian tutan atenton."

III. Multe da protektantaj Spiritoj donas al si nomojn de sanktuloj aŭ de konataj personoj: kion oni pensu pri tio?

"Ĉiuj nomoj de la sanktuloj kaj de la konataj personoj ne sufiĉus, por doni unu protektanton al ĉiu homo. El la Spiritoj malmultaj havas nomon konatan sur la Tero, tial ili tre ofte donas al si neniun. Sed vi ordinare volas ian nomon; tiam, por kontentigi vin, ili alprenas tiun de tiu homo, kiun vi konas kaj respektas."

IV. Ĉu tiu alpreno de malpropra nomo ne povas esti rigardata kvazaŭ mistifiko?

"Ĝi estus mistifiko, se ĝin farus iu malica Spirito, kiu volus trompi, sed se tio estas por bono, Dio permesas, ke tio okazu inter samkategoriaj Spiritoj, ĉar ekzistas inter ili solidareco kaj analogeco de pensoj."

V. Sekve, se iu protektanta Spirito diras, ke li estas ekzemple Sankta Paŭlo, ne estas certe, ke tiu estas ja la Spirito mem aŭ la animo de la apostolo kun tiu nomo.

"Vi pravas, ĉar ekzistas miloj da homoj, al kiuj estas dirite, ke ilia gardanĝelo estas Sankta Paŭlo, aŭ iu alia; tamen kio grava tio estas, se la protektanta Spirito estas tiel altranga kiel Sankta Paŭlo? Mi diris al vi: ia nomo estas bezona, ili do alprenas iun ajn, por esti alvokataj kaj rekonataj, tiel same, kiel vi prenas baptonomojn, por diferenci de la ceteraj samfamilianoj. Ili ja povas alpreni ankaŭ tiujn de la ĉefanĝeloj Rafael, Miĥael k. a., kio estas tute malgrava.

"Krom tio, ju pli altranga estas la Spirito, des pli multobla estas la potenco de lia disradiado; kredu do,

ke iu protektanta Spirito, apartenanta al tre alta ordo, povas prizorgi centojn da enkarnuloj. Ĉe vi, sur la Tero, kelkaj notarioj prenas sur sin la aferojn de cent aŭ ducent familioj; kial do vi volus, ke ni, spirite parolante, estu malpli kapablaj por la morala direktado de la homoj, ol tiuj notarioj koncerne la materialan direktadon de iliaj interesoj?

VI. Kial la komunikiĝantaj Spiritoj ofte alprenas nomojn de sanktuloj?

"Ili identiĝas kun la kutimoj de la homoj, al kiuj ili parolas, kaj alprenas tiajn nomojn, kiuj farus sur la homojn la plej multe da impreso, konsidere al ties kredoj."

VII. Ĉu, elvokite, iuj Superaj Spiritoj ĉiam venas mem, aŭ, kiel kelkaj homoj pensas, ĉu venas nur senditoj de ili, komisiite por transdiri ilian penson?

"Kial do ili ne venus mem, se ili povas tion fari? Sed se la elvokita Spirito ne povas veni, tiu, kiu sin prezentas, nepre estas unu lia sendito."

VIII. Ĉu la sendito estas ĉiam sufiĉe instruita por respondi tiel, kiel respondus la Spirito, kiu lin venigis?

"La Superaj Spiritoj scias, al kiu ili konfidas la zorgon ilin anstataŭi. Cetere, ju pli altklasaj estas la Spiritoj, des pli ili kunfandiĝas per komuneco de pensoj, tiamaniere, ke en iliaj okuloj la personeco estas io indiferenta, kaj same devas esti ĉe vi. Ĉu vi do pensas, ke en la mondo de la Superaj Spiritoj ekzistas nur tiuj, kiujn vi konis sur la Tero kiel kapablajn vin instrui? Vi tiel forte inklinas rigardi vin kiel la tipojn de la Universo, ke vi ĉiam opinias, ke ekster via mondo nenio alia ekzistas. Vi efektive similas tiujn sovaĝulojn, kiuj, neniam forlasinte sian insulon, pensas, ke la mondo ne etendiĝas ĝis trans ĝia bordo."

IX. Mi komprenas, ke tiel estas en la okazo de serioza instruo; sed kial altrangaj Spiritoj permesas al malaltŝtupaj Spiritoj sin pave ornami per respektindaj nomoj, por konduki la homojn en eraron per ofte malicaj maksimoj?

"Ne kun la permeso de la altrangaj Spiritoj tiuj aliaj tiel kondutas; ĉu same ne okazas en via medio? Tiuj, kiuj tiamaniere trompas la homojn, estos punitaj pro sia

fiaĵo, estu certa, kaj ilia puno estos proporciigita al la graveco de la mistifiko. Cetere, se vi ne estus neperfektaj, vi havus apud vi nur bonajn Spiritojn, kaj se vi estas trompataj, vi devas plendi nur kontraŭ vi mem. Dio permesas, ke tio okazu, por provi vian persistemon kaj vian juĝokapablon, kaj instrui vin distingi veron de eraro. Se vi ĝin ne faras, vi do ne sidas sufiĉe alte kaj ankoraŭ bezonas la lecionojn de la sperto."

X. Ĉu Spiritoj nemulte evoluintaj, sed portantaj bonajn intencojn kaj la deziron progresi, iafoje ne estas komisiataj por anstataŭi iun Superan Spiriton, por ke ili havu okazon sin ekzerci en instruadon?

"Neniam en la grandaj grupoj, mi volas diri: en la grupoj seriozaj, kaj por ĝenerala instruado. Tiuj, kiuj tie sin prezentas, ĝin ĉiam faras meminiciate kaj, kiel vi diras, por sin ekzerci; tial iliaj komunikaĵoj, kvankam bonaj, ĉiam portas la stampon de ilia malsupereco. Ili estas komisiataj nur por nemulte gravaj komunikaĵoj kaj por tiuj, kiujn oni povas nomi personaj."

XI. La ridindaj komunikiĝoj de la Spiritoj estas iafoje traplektitaj per tre bonaj maksimoj; kiel klarigi ĉi tiun anomaliaĵon, kiu ŝajnas elmontri la samtempan ĉeeston de bonaj kaj de malicaj Spiritoj?

"La malicaj aŭ frivolaj Spiritoj ekkuraĝas ankaŭ eldiri sentencojn, ne ĝuste vidante ilian profundecon aŭ signifon. Ĉu, ĉe vi, ĉiuj, kiuj ilin eldiras, estas superaj homoj? Ne; la bonaj kaj la malicaj Spiritoj ne iras flanko ĉe flanko; vi konstatas la ĉeeston de la bonaj Spiritoj el la konstanta unuformeco de la bonaj komunikaĵoj."

XII. Ĉu la Spiritoj, kiuj kondukas en eraron, faras tion ĉiam konscie?

"Ne; bonaj, sed malkleraj, Spiritoj povas erari bonafide; kiam ili konscias sian nesufiĉecon de scioj, ili tion konfesas kaj diras nur tion, kion ili scias."

XIII. Kiam iu Spirito faras malveran komunikiĝon, ĉu li tion faras ĉiam en malica intenco?

"Ne; se li estas frivola Spirito, li sin amuzas ĉe mistifikado sen ia alia celo."

XIV. Povante trompi per sia parolo, ĉu iuj Spiritoj

povas ankaŭ, antaŭ la okuloj de vidiva mediumo, ekpreni malveran aspekton?

"Tio fariĝas, sed pli malfacile. Ĉiaokaze tio estas nur por celo, kiun la malicaj Spiritoj mem ne konas. Ili servas kiel instrumentoj por iu leciono. La vidiva mediumo povas vidi frivolajn kaj mensogemajn Spiritojn, tiel same, kiel aliaj tiujn aŭdas aŭ sub ties influo skribas. La frivolaj Spiritoj povas profiti de tiu humoro, por trompi lin per ŝajnaj aspektoj; tio dependas de la ecoj de la Spirito de la mediumo mem."

XV. Ĉu por ne esti trompita, sufiĉas al iu porti bonajn intencojn? kaj ĉu ankaŭ la seriozaj homoj, kiuj tute ne makulas siajn studojn per ia sento de vanta scivolemo riskas trompon?

"Evidente malpli ol aliaj, sed ĉiu homo havas iajn malfortajn flankojn, kiuj altiras la mokemajn Spiritojn: li sin opinias forta kaj ofte tia ne estas; li devas do malfidi la malfortecon, kiu naskiĝas el fiero kaj antaŭjuĝoj. Oni ne sufiĉe prenas en kalkulon ĉi tiujn du kaŭzojn, el kiuj la Spiritoj profitas; flatante la maniojn, ili estas certaj pri sia sukceso."

XVI. Kial Dio permesas, ke malicaj Spiritoj komunikiĝu kaj parolu malbonajn aferojn?

"Eĉ en tio plej malbona ekzistas instruo; ĉi tiun koncernas vin ĉerpi el tio. Estas ja necesaj ĉiaspecaj komunikiĝoj, por lernigi vin distingi inter la bonaj kaj la malicaj Spiritoj kaj servi al vi kiel via propra spegulo."

XVII. Ĉu la Spiritoj, per skribaj komunikaĵoj, povas inspiri malpravajn malkonfidojn kontraŭ iuj homoj kaj malpacigi amikojn inter si?

"Malicaj kaj enviemaj Spiritoj povas fari sur la kampo de malbono tion, kion faras la homoj mem; tial estas necese tenadi sin garde kontraŭ ili. Kiam la Superaj Spiritoj havas ion por riproĉi, ili estas ĉiam saĝaj kaj moderaj; ili diras nenion malbonan; ili admonas delikate. Se ili volas, ke, en sia intereso, du homoj ne plu vidu unu la duan, ili okazigos incidentojn, kiuj tiujn tute nature disigos. Ĉia parolo, kiu nepre dissemus malkonkordon kaj malkonfidon, estas ja faro de iu malica Spirito, kia ajn la nomo, per kiu li sin ornamus. Vi do nur sin-

garde akceptu la malbonon, kiun iu Spirito povas diri pri unu el vi, kaj malkonfidu ankaŭ vin mem kaj viajn antaŭjuĝojn. El la komunikiĝoj de la Spiritoj prenu nur tion bonan, grandan, racian kaj tion, kion via konscienco aprobas."

XVIII. El la facileco, kun kiu la malicaj Spiritoj sin enmiksas en la komunikiĝojn, ŝajnas, ke oni neniam estas certa, ke oni havas la veron.

"Ho ne, ĉar vi havas prudenton, por juĝi tiujn komunikiĝojn. Legante leteron, vi bone scias vidi, ĉu ĝin skribis krudulo aŭ bonedukito, stultulo aŭ klerulo; kial do vi ne povus same agi, kiam skribas al vi Spiritoj? Se vi ricevas leteron de forestanta amiko, kio pruvas al vi, ke ĝi estas ja de li? Lia skriba karaktero, vi diros; sed ĉu ne ekzistas falsitoj, kiuj imitas ĉiajn skribkarakterojn, friponoj, kiuj povas koni viajn aferojn? Tamen laŭ iaj signoj vi ne erarus. Same estas rilate al la Spiritoj. Prezentu do al vi, ke tiu estas iu amiko, kiu skribas al vi, aŭ ke vi legas la libron de iu verkisto, kaj juĝu laŭ sama procedo."

XIX. Ĉu la Superaj Spiritoj povus malhelpi la malicajn Spiritojn alpreni malverajn nomojn?

"Tion fari ili sendube povas; sed ju pli malicaj, des pli obstinegaj estas la Spiritoj, kaj ofte ili kontraŭstaras al ĉiaj ordonoj. Vi ja devas scii ankaŭ, ke por iuj homoj la Superaj Spiritoj sin interesas pli ol por aliaj, kaj kiam ili trovas tion necesa, ili scias antaŭgardi tiujn kontraŭ la trafo de la mensogo; kontraŭ tiuj homoj la trompemaj Spiritoj estas senpovaj.

XX. Kia estas la motivo de tia partieco?

"Tio estas ne partieco, sed justeco; la bonaj Spiritoj sin interesas por tiuj homoj, kiuj tiras profiton el iliaj konsiloj kaj serioze klopodas por sia propra pliboniĝo. Tiuj estas iliaj preferatoj, kaj ili tiujn helpas, sed pri tiuj, kun kiuj ili perdas sian tempon kun belaj paroloj, ili nemulte zorgas."

XXI. Kial Dio permesas al la Spiritoj fari la sakrilegion false alpreni respektegatajn nomojn?

"Vi povas demandi ankaŭ, kial Dio permesas al la homoj mensogi kaj blasfemi. La Spiritoj, same kiel la

homoj, havas sian liberan volon, kiel por bono, tiel ankaŭ por malbono, sed unujn kaj aliajn la justeco de Dio nepre trafos."

XXII. Ĉu ekzistas iaj efikaj formuloj por forpeli la mokemajn Spiritojn?

"Formulo estas materio; pli valoras bona penso al Dio."

XXIII. Iuj Spiritoj diris, ke ili havas neimiteblajn grafiksignojn, kvazaŭajn emblemojn, kiuj povas fari ilin rekoneblaj kaj ilin identigi: ĉu tio estas vera?

"La Superaj Spiritoj havas neniajn aliajn signojn, por fari sin rekoneblaj, ol la altecon de siaj ideoj kaj de sia parolo. Ĉiu Spirito povas imiti materialan signon. Koncerne la malsuperajn Spiritojn, ili sin elperfidas en tiom multe da manieroj, ke oni devas esti blinda, por lasi sin trompi."

XXIV. Ĉu la trompemaj Spiritoj ne povas ankaŭ falsi la penson?

"Ili falsas la penson, tiel same, kiel la scendekoraciistoj falsas la Naturon."

XXV. Ŝajnas do, ke estas ĉiam facile trovi la trompon per atenta studado.

"Tion ne dubu. La Spiritoj trompas nur tiujn, kiuj lasas sin trompi; sed oni devas havi okulojn de diamantisto, por distingi la veran ŝtonon de la falsa; nu, kiu ne scias distingi inter la pura kaj la falsita ŝtono, tiu sin turnas al gemisto."

XXVI. Kelkaj homoj lasas sin allogi per emfaza parolo, kontentiĝas per vantaj vortoj, eĉ prenas malverajn kaj vulgarajn ideojn por ideoj superbelaj; kiel tiuj homoj, kiuj ne kapablas juĝi eĉ verkojn de siaj similuloj, povas juĝi tiujn de la Spiritoj?

"Se tiuj homoj estas sufiĉe modestaj, por rekoni sian nekompetentecon, ili ne konfidas al si mem; se pro fiero ili opinias sin pli kapablaj, ol kiel ili estas, ili suferas punon por ilia stulta vantamo. La trompemaj Spiritoj bone scias, al kiuj ili venas. Ekzistas simplanimaj kaj malmulte instruitaj homoj, pli malfacile trompeblaj, ol aliaj sagacaj kaj kleraj. Flatante la pasiojn, ili faras el la homo ĉion, kion ili volas."

XXVII. Ĉu skribante, la malicaj Spiritoj sin iafoje elperfidas per pretervolaj materialaj signoj?

"Tiuj lertaj, ne; tiuj mallertaj konfuziĝas. Ĉia senutila kaj infaneca signo estas senduba montro de malsupereco; la Superaj Spiritoj faras nenion senutilan."

XXVIII. Multaj mediumoj ekkonas la bonajn kaj la malicajn Spiritojn laŭ la agrabla aŭ ĝena impreso, kiun ili ricevas ĉe ties alproksimiĝo. Mi demandas, ĉu la malagrabla impreso, la konvulsia agitiĝo, unuvorte la perturbostato, estas ĉiam signoj de la malbona naturo de la manifestiĝantaj Spiritoj.

"La mediumo spertas la sensaciojn el la stato, en kiu troviĝas la Spirito, venanta al li. Se feliĉa, la Spirito estas trankivla, facila, kvieta, saĝa; se malfeliĉa, li estas malkvieta, ekscitita, kaj tiu agitiĝo nature transiĝas en la nervan sistemon de la mediumo. Cetere, tia estas la homo sur la Tero: la bona estas flegma kaj trankvila, la malica estas konstante ekscitita."

*Rimarko.* Ekzistas mediumoj kun pli aŭ malpli granda nerva impresebleco; tial la agitiĝado ne povus esti rigardata kiel absoluta regulo; oni devas ĉi tie, kiel en ĉiaj aferoj, konsideri la cirkonstancojn. La ĝenanta kaj malagrabla karaktero de la impreso estas efiko de kontrasto, ĉar se la Spirito de la mediumo simpatias kun la manifestiĝanta malica Spirito, li malmulte aŭ neniom estas afekciata de ĉi tiu lasta. Oni tamen ne intermiksu la rapidecon de la skribado, dank'al la ekstrema manlerteco de iuj mediumoj, kaj la konvulsian agitiĝon, kiun povas sperti eĉ la mediumoj, malplej rapide skribantaj, ĉe la kontakto de neperfektaj Spiritoj.

———————

ĈAPITRO XXV

# PRI LA ELVOKOJ

*Ĝeneralaj konsideradoj. Spiritoj, kiujn oni povas elvoki. Maniero de parolado al la Spiritoj. Utileco de la apartaj elvokoj. Demandoj pri la elvokoj. Elvokoj de bestoj. Elvokoj de vivantoj. Homa telegrafio*

## Ĝeneralaj konsideradoj

**269.** La Spiritoj povas komunikiĝi propravole aŭ kontentigante nian peton, t. e. per elvoko. Kelkaj homoj pensas, ke oni devas sin deteni elvoki tian aŭ tian Spiriton kaj ke estas preferinde atendi tiun, kiu ja volas komunikiĝi. Ili sin bazas sur tiu opinio, ke, vokante unu difinitan Spiriton, oni ne estas certa, ke tiu, kiu sin prezentas, estas li mem, dum tiu, veninta memvole, je sia propra impulso, pli bone pruvas sian identecon, ĉar li tiamaniere esprimas sian deziron konversacii kun ni. Laŭ mia opinio ĉi tio estas eraro: unue, ĉar apud ni ĉiam staras Spiritoj, plej ofte malaltklasaj, kiuj nenion alian volas, ol komunikiĝi; due, kaj el ĉi tiu lasta motivo mem, ne voki iun difinitan Spiriton estas malfermi la pordon al ĉiuj, kiuj volos eniri. En kunsido, doni la parolon al neniu estas permesi ĝin al ĉiu ajn, kaj oni scias, kio el tio rezultas. La rekta alvoko al iu difinita Spirito estas ia ligilo inter li kaj ni: ni elvokas lin pro nia deziro kaj tiel ni starigas ian baron al la enŝoviĝemuloj. Sen ia rekta elvoko iu Spirito ofte havas nenian motivon, por veni al ni, escepte se li estas nia familiara Spirito.

Ĉiu el ĉi tiuj du kondutoj havas siajn preferindajn flankojn, kaj malbone estus nur tute forigi unu el ili. La spontaneaj komunikiĝoj portas nenian malutilon, kiam

oni mastras la Spiritojn kaj estas certa, ke oni ne lasas la malicajn superregi; se ne tiel, estas ofte utile atendi la bonvolon de tiuj, kiuj deziras manifestiĝi, ĉar ilia penso suferas nenian ĝenon kaj tiam oni povas ricevi mirindajn parolojn, dum la Spirito, kiun oni elvokas, eble ne estas preta paroli aŭ kapabla paroli laŭdezire. La skrupula ekzameno, kiun mi konsilis, estas cetere garantio kontraŭ malbonaj komunikiĝoj. En la regulaj kunsidoj, precipe en tiuj, en kiuj oni faras kontinuan laboron, ĉiam ĉeestas kutimaj Spiritoj, kiuj tie staras nevokite, ĉar dank'al la reguleco mem de la seancoj ili estas avizitaj. Tiam ili ofte prenas mem la parolon, por pritrakti ian temon, elvolvi iun proponon aŭ rekomendi tion, kion oni devas fari: oni ilin facile rekonas, ĉu laŭ la formo de ilia parolo, kiu estas ĉiam sama, ĉu laŭ ilia skribo, ĉu laŭ iuj kutimoj propraj al ili.

**270.** Dezirante komunikiĝi kun iu **difinita** Spirito, oni nepre devas elvoki lin (§ 203). Se li povas veni, oni ordinare ricevas kiel respondon: **Mi**, aŭ: **Jen mi**, aŭ ankaŭ: **Kion vi volas de mi**? Iafoje li rekte ekpritraktas la temon, anticipe respondante la demandojn, kiujn oni intencis fari al li.

Kiam iu Spirito estas elvokita la unuan fojon, estas konsilinde lin iom precize nomi. En la demandoj, farataj al li, oni sin detenu de sekaj kaj ordonaj formoj, kiuj estus por li motivo de foriro. Tiuj formoj devas esti karesaj aŭ respektaj, laŭ la Spirito, kaj ĉiaokaze elmontri bonvolemon de la elvokinto.

**271.** Oni ofte miras la pretecon, kun kiu sin prezentas iu elvokita Spirito, eĉ je la una fojo, kvazaŭ li estis avizita; tiel estas efektive tiam, kiam oni de antaŭe fikse pensas pri lia elvoko. Tiu penso estas ia anticipa elvoko, kaj ĉar apud ni ĉiam staras niaj familiaraj Spiritoj, kiuj identiĝas kun nia penso, tial ili preparas la vojon en tia maniero, ke, se nenio malhelpas, la Spirito, kiun oni volas voki, jam tie staras. Se ne tiel fariĝas, la familiara Spirito de la mediumo aŭ tiu de la demandonto aŭ tiu de unu el la kutimaj kunsidantoj lin venigas kaj por tio ne multe da tempo estas necesa. Se la el-

vokita Spirito ne povas veni tuj, la kuriero (la idolanoj dirus **Merkuro**) difinas limtempon, iafoje de kvin minutoj, kvaronhoro, unu horo, eĉ kelke da tagoj. Kiam la kuriero alvenis, li diras: **Li estas ĉi tie**, kaj tiam oni povas komenci fari la demandojn, kiujn oni volas adresi al li.

La kuriero ne ĉiam estas necesa peranto, ĉar la Spirito povas aŭdi rekte la voĉon de la elvokanto, kiel dirite en la § 282, demando V, pri la maniero de transsendo de la penso.

Dirante, ke oni faru elvokon en la nomo de Dio, mi intencas diri, ke mian rekomendon oni devas preni serioze, sed ne ventanime; tiuj, kiuj en ĝi vidus nenion krom ia senkonsekvenca formulo, farus plej bone detenante sin de tiela elvoko.

**272.** La elvokoj ofte prezentas al la mediumoj pli grandajn malfacilaĵojn, ol la spontaneaj diktatoj, precipe tiam, kiam oni deziras ekhavi precizajn respondojn al detalaj demandoj. Por tio estas necesaj specialaj mediumoj, samtempe **flekseblaj** kaj **pozitivaj**, kaj oni vidis (§ 193), ke ĉi tiuj lastaj estas tre malmultaj, ĉar, kiel mi diris, la fluidaĵaj rilatoj ne ĉiam tuj fariĝas kun la unue veninta Spirito. Tial estas utile, ke la mediumoj sin donu al detalaj elvokoj, nur certiĝinte pri la disvolviteco de sia kapableco kaj pri la naturo de la Spiritoj, kiuj ilin protektas, ĉar per mediumoj, malbone influataj, la elvokoj povas havi nenian aŭtentikecon.

**273.** La mediumoj ordinare estas multe pli serĉataj por elvokoj kun privata intereso, ol por komunikiĝoj kun intereso ĝenerala; ĉi tio estas komprenebla pro la ja natura deziro, kiun ĉiu havas, konversacii kun siaj karuloj. Mi pensas, ke en ĉi tiu rilato mi devas fari al la mediumoj kelke da gravaj rekomendoj. Unue, konsenti tiun deziron nur singarde antaŭ personoj, pri kies sincereco ili ne estas tute konvinkitaj, kaj vigli kontraŭ retoj, kiujn malbonintencaj homoj povus teksi, por ilin enkapti. Due, sub nenia preteksto volonti fari elvokon, se ili vidas, ke la peto celas la kontentigon de scivolo kaj intereso, sed ne seriozan intencon de la elvokanto; rifuzi

fari ĉian demandon senutilan aŭ ne apartenantan al la kadro de tiuj, kiujn oni racie povas fari al la Spiritoj. La demandoj devas esti formulataj klare, precize kaj sen kaŝita penso, se nur oni volas kategoriajn respondojn. Estas do necese forpuŝi ĉiujn, kiuj havas insidan karakteron, ĉar oni scias, ke al la Spiritoj ne plaĉas tiuj, kies celo estas ilin provi; insisti pri tiaj demandoj estas voli esti trompata. La elvokinto devas iri al la celo senhezite kaj malkaŝe, sen artifikoj kaj deturniĝoj; se li timas klarigi sian penson, li preferinde sin detenu de ĉia demando.

Estas ankaŭ konsilinde fari nur tre prudente elvokojn en la foresto de la personoj, kiuj ilin petis, kaj ofte estas preferinde ilin tute ne fari, ĉar nur tiuj personoj kapablas kontroli la respondojn, juĝi pri la identeco, elmovi klarigojn, se oportune, kaj elmeti incidentajn demandojn, naskitajn de la cirkonstancoj. Krom tio, la ĉeesto de tiuj personoj estas ia ligilo, kiu altiras la Spiriton, ofte ne inklinan komunikiĝi kun nekonatoj, por kiuj li havas nenian simpation. Unuvorte, la mediumo devas eviti ĉion, kio povus turni lin en konsultiston, kio, en la okuloj de multaj homoj, estas sinonimo de antaŭdiristo de la destino.

## Spiritoj, kiujn oni povas elvoki

**274.** Oni povas elvoki ĉiajn Spiritojn, al kiu ajn ŝtupo de la hierarkio ili apartenas: kiel la bonajn, tiel la malicajn; tiujn, kiuj forlasis la Teron antaŭ nelonge, kiel ankaŭ tiujn, kiuj faris sian migradon en plej malproksima tempo; kiel homojn klerajn, tiel la plej senfamajn; niajn parencojn, niajn amikojn, kiel ankaŭ tiujn, por kiuj ni estas indiferentaj; sed tio ne signifas, ke ili ĉiam volus aŭ povus kontentigi ian elvokon; ne parolante pri ilia propra volo aŭ pri la permeso, kiun ia supera potenco ne donis al ili, povas okazi, ke ili ne havas la eblon tion fari pro motivoj, pri kiuj ne ĉiam estas al ni konsentite, ilin penetri. Mi volas diri, ke ne ekzistas absoluta neebleco, kiu kontraŭus la komunikiĝojn, escepte de tio, pri kio mi tuj parolos. La baroj, kiuj

povas malhelpi iun Spiriton manifestiĝi, estas preskaŭ ĉiam individuaj kaj ofte originas el la cirkonstancoj.

**275.** El la kaŭzoj, kiuj povas malhelpi la manifestiĝon de iu Spirito, unuj estas al li personaj kaj aliaj eksterpersonaj. Inter la unuaj oni loku liajn okupojn aŭ la misiojn, kiujn li plenumas kaj de kiuj li ne povas detiriĝi, por cedi al niaj deziroj; en ĉi tiu okazo lia vizito estas nur prokrastita.

Oni devas konsideri ankaŭ lian propran situacion. Kvankam la reenkarniĝo ne estas absoluta baro, ĝi tamen povas esti malhelpo ĉe iuj momentoj, precipe tiam, se la enkarniĝo fariĝis en malsuperaj mondoj kaj se la Spirito mem estas malmulte elmateriiĝinta. En la superaj mondoj, kie la ligiloj de la Spirito kun la materio estas tre malfortikaj, la manifestiĝo estas preskaŭ tiel facila, kiel en la vaganta stato, kaj ĉiaokaze pli facila, ol en tiuj, kie la korpa materio estas pli kompakta.

La eksterpersonaj kaŭzoj kuŝas precipe en la naturo de la mediumo, en tiu de la elvokanto, en la medio, kie la elvoko estas farata, kaj fine en la trafota celo. Iuj mediumoj ricevas komunikaĵojn plej precipe de siaj familiaraj Spiritoj, kiuj povas esti pli aŭ malpli altrangaj; aliaj taŭgas kiel perantoj de ĉiaj Spiritoj; tio dependas de la simpatio aŭ antipatio, de la altiro aŭ repuŝo de la persona Spirito de la mediumo rilate al la libera Spirito, kiu povas preni lin kiel sian interpretanton plezure aŭ naŭze. Tio dependas ankaŭ, flanken metante la intimajn ecojn de la mediumo, de la grado da disvolviĝo de la mediumeco. La Spiritoj venas pli volonte, kaj precipe pli vaste esprimas sian penson, al tia mediumo, kiu antaŭmetas al li nenian materialan baron. Cetere, en egalaj moralaj kondiĉoj, ju pli facile iu mediumo skribas aŭ parolas, des pli ĝeneraliĝas liaj rilatoj kun la mondo de la Spiritoj.

**276.** Oni prenu en kalkulon ankaŭ la facilecon, kiun devas havigi la kutimo komunikiĝi kun tia aŭ tia Spirito; kun la tempo la libera Spirito identiĝas kun tiu de la mediumo kaj ankaŭ kun tiu de la vokanto. Flanken met-

ante la demandon pri simpatio, ekestas inter ili fluidaĵaj rilatoj, kiuj faras la komunikiĝojn pli tujaj. Tial unu sola intervidiĝo ne ĉiam estas tiel kontentiga, kiel dezirinde, kaj la Spiritoj mem ofte petas ankoraŭ unu elvokon. Spirito, kutime venanta, troviĝas tie kvazaŭ en sia domo; li familiariĝis kun siaj aŭdantoj kaj interpretantoj; li parolas kaj agadas pli libere.

**277.** Resume, el tio, kion mi ĵus diris, rezultas jeno: la kapablo elvoki ĉian ajn Spiriton ne kuntrenas por tiu Spirito la devon troviĝi al nia dispono; li povas veni ĉe unu momento kaj ne ĉe alia, per tia mediumo aŭ tia elvokanto, kiu plaĉas al li, sed ne per alia; li povas diri tion, kion li volas, ne povante esti devigata diri tion, kion li ne povas; li povas foriri ĉiam, kiam li ĝin trovas oportuna; fine, el kaŭzoj, dependantaj, aŭ ne, de lia volo, konstante veninte dum kelka tempo, li povas subite ĉesigi siajn vizitojn.

Pro ĉiuj ĉi kaŭzoj, kiam oni deziras voki ian novan Spiriton, oni devas demandi sian gvidanton-protektanton, ĉu tia elvoko estas farebla; en la okazo, se ĝi estas ne farebla, li plej ofte sciigas la kaŭzojn, kaj tiam oni senutile insistus.

**278.** Grava demando ĉi tie elmoviĝas, nome scii, ĉu estas aŭ ne estas malbone elvoki malicajn Spiritojn. Ĉi tio dependas de la celo, al kiu oni strebas, kaj de la aŭtoritato, kiun oni povas havi super ili. La malbonaĵo estas nenia, kiam oni vokas ilin por celo serioza, instrua kaj por ilin korekti; kontraŭe, ĝi estas tre granda, se el nura scivolo aŭ amuzo, aŭ se oni sin metas sub ilian ŝuon, petante de ili ian servon. La bonaj Spiritoj, en ĉi tiu okazo, ja povas doni al ili sian konsenton plenumi tion, kion oni petas de tiuj Spiritoj, sed poste severe punos la trobravulon, kiu kuraĝis voki ties helpon kaj kredi pli je ties potenco, ol je Dio. Oni vane promesus al si estonte fari bonan uzon el tiu helpo kaj maldungi la servanton post lia servo; tiu servo mem, kiun oni petis, kia ajn malgranda, estas efektiva interligo kun la malica Spirito, kaj ĉi tiu ne facile delasas sian kaptiton. (Vd. § 212.)

**279.** Aŭtoritaton super la malsuperaj Spiritoj havas nur la **morala supereco**. La malicaj Spiritoj sentas, ke la virtuloj ilin mastras; kontraŭ iu, kiu kontraŭmetas al ili nur la forton de sia volo, ian brutalan forton, ili luktas kaj ofte estas la venkintoj. Al homo, kiu penis trudi obeon al ribelema Spirito nur per sia volo, la Spirito respondis: **Lasu min en paco, vi kun viaj afektaĵoj de bravaĉulo, vi, kiu ne valoras pli ol mi; be, ŝtelisto, kiu predikus moralon al alia ŝtelisto**...

Oni miras, ke la nomo de Dio, alvokita kontraŭ ili, nenion helpas; la kaŭzon de ĉi tiu fakto sciigis Sankta Ludoviko per la sekvanta respondo:

"La nomo de Dio havas influon sur la neperfektajn Spiritojn nur tiam, se ĝin eldiras iu, kiu pro siaj virtoj povas ĝin aŭtoritate uzi; el la buŝo de tiu, kiu super la Spirito havas nenian moralan aŭtoritaton, ĝi estas tia vorto, kiel ĉia alia. Same okazas pri la sanktaj aferoj, kiujn oni kontraŭmetas al ili. La plej terura armilo fariĝas sendanĝera en manoj mallertaj en ĝia uzado aŭ nekapablaj manovri kun ĝi."

## Maniero de parolado al la Spiritoj

**280.** La grado da supereco aŭ malsupereco de la Spirito nature indikas la tonon, kiu decas al la parolado al ili. Estas evidente, ke ju pli altrangaj, des pli ili rajtas nian respekton, nian konsideron kaj nian submetiĝon. Ni devas tributi al ili ne malpli profundan estimon ol tian, kian ni estus tributintaj al ili ankoraŭ sur la Tero, sed pro aliaj motivoj: sur la Tero ni estus konsiderintaj ilian rangon kaj socian pozicion; en la mondo de la Spiritoj nia respekto sin turnas nur al la supereco morala. Ilia altrangeco mem starigas ilin super la vantaĵoj de niaj flataj formuloj. Ne per vortoj oni povas ricevi ilian bonvolemon, sed per la sincereco de sentoj. Estus do ridinde doni al ili titolojn, kiujn niaj moroj alprenis, por distingi inter si la rangojn, kaj kiuj, sur la Tero, povus esti flatintaj ilian indon. Se ili estas efektive superaj, ne nur ili alligas al tiaj titoloj nenian gravecon, sed eĉ tia titolado malplaĉas al ili. Bona penso estas al ili pli

agrabla ol la plej laŭdaj epitetoj; alie ili ne starus super la homaro. La Spirito de respekteginda ekleziulo, kiu sur la Tero estis kardinalo, homo virta, praktikanta la doktrinon de Jesuo, unu tagon respondis al persono, kiu lin vokis titolante lin monsinjoro: "Vi devus diri almenaŭ "eks-monsinjoro", ĉar ĉi tie Sinjoro estas unu sola, nome Dio; sciu, ke mi vidas tiajn, kiuj sur la Tero stariĝadis genue antaŭ mi, sed antaŭ kiuj mi mem hodiaŭ min klinas." (*)

Koncerne la malsuperajn Spiritojn, ilia karaktero indikas al ni la manieron, en kiu ni devas paroli al ili. El ili unuj, kvankam nedanĝeraj kaj eĉ bonintencaj, estas frivolaj, malkleraj, senkonsideraj; trakti ilin egale, kiel la seriozajn Spiritojn, kion faras iuj homoj, estus tio sama, kiel klini sin antaŭ iu lernejano aŭ iu azeno ridinde ornamita per doktora bireto. La familiara tono, per kiu oni ilin traktus, ne estus malŝatinda, kaj ili ne sentas sin pikitaj de ĝi; kontraŭe, ili ĝin volonte akceptas.

Inter la malsuperaj Spiritoj ekzistas tiaj, kiuj estas malfeliĉaj. Kiaj ajn la kulpoj, kiujn ili elaĉetas, iliaj suferoj estas titoloj des pli valoraj por nia kompatemo, ĉar neniu povas flati al si, ke lin ne trafas ĉi tiu parolo de la Kristo: "Kiu el vi estas senpeka, tiu una ĵetu sur ŝin ŝtonon" (**). La bonvolemo, kiun ni montras por ili estas fadiligo por ilia koro; ĉe manko de simpatio, ili devas trovi tian saman indulgon, kian ni volus por ni.

La Spiritoj, kiuj elmontras sian malsuperecon per la cinikeco de sia parolo, siaj mensogoj, la malsuperecon de siaj sentoj, la perfideco de siaj konsiloj, sendube estas malpli indaj je nia intereso ol tiuj, kies parolo atestas penton; al ili ni ŝuldas almenaŭ la kompaton, kiun ni sentas por la plej grandaj krimuloj. La rimedo por ilin silenti estas montri sin supera ol ili: ili sin fordonas nur al tiuj homoj, pri kiuj ili opinias, ke de tiuj ili havas

(*) En la franca lingvo "monsinjoro" estas "monseigneur", vorto kunmetita el "mon" (mia) kaj "seigneur" (sinjoro). — *La Trad.*

(**) Johano, 8: 7. — *La Trad.*

nenion por timi, ĉar la malicaj Spiritoj sentas, ke la virtuloj, kiel la Superaj Spiritoj, ilin superregas.

Resume, tiel senrespekte estus trakti kiel samrangulojn la Superajn Spiritojn, kiel ridinde estus havi egalan konsideron por ĉiuj senescepte. Ni respektegu tiujn, kiuj meritas respektegon, ni estu dankaj al tiuj, kiuj nin protektas kaj helpas, ni portu por ĉiuj ceteraj tian bonvolon kiun ni mem iam eble bezonos. Penetrante en la senkorpan mondon, ni lernas koni ĝin, kaj tiu konado ja gvidas nin en niaj rilatoj kun ĝiaj loĝantoj. La antikvuloj, en sia nesciado de la vero, starigis al ili altarojn; en niaj okuloj ili estas nuraj kreitoj pli aŭ malpli perfektaj, kaj altarojn ni starigas nur al Dio.

## Utileco de la apartaj elvokoj

**281.** La komunikaĵoj, kiujn oni ekhavas de tre altklasaj Spiritoj aŭ de tiuj, kiuj animis la eminentajn personojn de la antikvaj tempoj, estas grandvaloraj pro la profundaj instruoj, kiujn ili enhavas. Tiuj Spiritoj akiris al si tian gradon da perfekteco, kiu ebligas al ili ĉirkaŭpreni pli ampleksan sferon da ideoj, penetri en misterojn, kiuj translimas la ordinaran komprenpovon de la homaro, kaj sekve, pli bone ol aliaj, ensekretigi nin en iajn aferojn. El tio ne sekvas, ke la komunikiĝoj de Spiritoj el malpli alta ordo estas senutilaj: el tiuj observemo ĉerpas pli ol unu instruon. Por ekkoni la morojn de ia popolo, oni devas studi ĉiujn ĝiajn rangojn; iu ajn, kiu vidis nur unu ĝian flankon, ĝin apenaŭ konus. La historio de iu popolo ne estas tiu de ĝiaj reĝoj kaj sociaj eminentuloj; por ĝin taksi, oni devas vidi ĝin en ĝia intima vivado, en ĝiaj apartaj kutimoj. Nu, la Superaj Spiritoj estas la lumoj de la transtomba mondo; ilia alteco mem lokas ilin tiel super ni, ke nin teruras la distanco inter ili kaj ni. Spiritoj pli burĝaj (oni pardonu al mi ĉi tiun esprimon) faras por ni palpeblaj la cirkonstancojn de sia nova ekzistado. Ĉe tiuj la interrilato inter la vivo enkorpa kaj la vivo de Spirito estas pli intima, ni ĝin pli klare komprenas, ĉar ĝi tuŝas nin pli proksime. Eksciinte de ili mem, kio fariĝis, kion pensas,

kion spertas la homoj de ĉiaj sociaj rangoj kaj kun ĉiaj karakteroj, la virtaj kaj la malvirtaj, la grandaj kaj la malgrandaj, la feliĉaj kaj la malfeliĉaj de la mondo, unuvorte, la homoj, kiuj vivis inter ni, tiuj, kiujn ni vidis kaj konis, kies realan vivon, virtojn kaj mizeraĵojn ni konas, tiam ni komprenas iliajn ĝojojn kaj suferojn, ni kunsentas al ili kaj el tio ne ĉerpas moralan instruon des pli profitan, ju pli intimaj la rilatoj inter ili kaj ni. Pli facile ni metas nin sur la lokon de iu, kiu estis nia egalulo, ol sur tiun de iu, kiun ni vidas nur tra miraĝo de ia ĉiela gloro. La ordinaraj Spiritoj montras al ni la praktikan aplikadon de la grandaj kaj superbelaj veraĵoj, kies teorion instruas al ni la Superaj Spiritoj. Cetere, en la studado de ĉia scienco nenio estas senutila: Neŭtono eltrovis la leĝon pri la fortoj de la Univero en la plej simpla fenomeno.

La elvoko de la ordinaraj Spiritoj havas ankaŭ tiun bonaĵon, ekrilatigi nin kun suferantaj Spiritoj, kies doloron oni povas mildigi kaj kies progreson ni povas faciligi per utilaj konsiloj. Oni povas do fariĝi utila, samtempe instruante sin mem. Estas egoismo en la homo, kiu en siaj konversacioj kun la Spiritoj strebas nur al sia persona plezuro, kaj tiu, kiu rifuzas etendi helpan manon al la malfeliĉuloj, samtempe elmontras fieron. Kion utilas al li ricevi belajn rekomendojn de la eminentaj Spiritoj, se tio ne faras lin pli bona por si mem, pli karitema kaj pli bonvolema por siaj fratoj en ĉi tiu mondo kaj en la alia? Kio estus kun la kompatindaj malsanuloj, se la kuracistoj rifuzus tuŝi iliajn vundojn?

## Demandoj pri la elvokoj

**282.** I. Ĉu iu povas elvoki la Spiritojn, ne estante mem mediumo?

"Ĉiu povas elvoki la Spiritojn, kaj se tiuj, kiujn li vokas, ne povas manifestiĝi materiale, ili ja staras apud li kaj lin aŭskultas."

II. Ĉu la elvokita Spirito ĉiam kontentigas la vokon, al li faritan?

"Tio dependas de la kondiĉoj, en kiuj li troviĝas, ĉar ekzistas cirkonstancoj, en kiuj li ne povas tion fari."

III. Kiaj estas la kaŭzoj, kiuj povas malhelpi iun Spiriton veni ĉe nia voko?

"Unue, lia volo; ankaŭ lia enkorpa stato, se li estas en la karno, la misioj, per kiuj li eble estas komisiita, aŭ ankaŭ tio, ke li ne ricevis permeson por tien iri.

"Ekzistas Spiritoj, kiuj neniam povas komunikiĝi, nome tiuj, kiuj pro sia naturo mem ankoraŭ apartenas al la mondoj malsuperaj ol la Tero. Ankaŭ ne povas tiuj, kiuj troviĝas en punsferoj, krom per supera permeso donata nur por ia celo de ĝenerala utileco. Por ke iu Spirito povu komunikiĝi, estas necese, ke li estu atinginta la gradon da progreso de la mondo, kien li estas vokita, alie, fremda al la ideoj de tiu mondo, li tie havas nenian punkton de komparo. Ne same fariĝas kun tiuj, senditaj por misio aŭ elaĉeto en la malsuperajn mondojn: tiuj havas la ideojn necesajn por respondi demandojn."

IV. Pro kiaj motivoj povas esti rifuzata al iu Spirito permeso komunikiĝi?

"Tio povas esti provo aŭ puno por li aŭ por la vokinto."

V. Kiel Spiritoj, dise troviĝantaj en la Spaco aŭ en la diversaj mondoj, povas aŭdi la elvokojn, al ili faratajn el ĉiuj punktoj de la Universo?

"Ili ofte ricevas avizon de viaj familiaraj Spiritoj, sed ĉi tie okazas fenomeno, kiun estas malfacile klarigi al vi, ĉar vi ne povas ankoraŭ kompreni, kiel la penso transiras inter la Spiritoj. Kion mi povas diri al vi, estas tio, ke la Spirito, kiun vi elvokas, kiel ajn malproksime li staras, ricevas, por tiel diri, frapon de la penso kvazaŭ elektran afekcion, kiu turnas lian atenton al la flanko, de kiu venas la al li direktita penso. Oni povas diri, ke li aŭdas la penson, tiel same, kiel vi sur la Tero aŭdas la voĉon."

— Ĉu la universa fluidaĵo estas la portilo de la penso, same kiel la aero rilate la sonon?

"Jes, kun ĉi tiu diferenco, ke la sono povas aŭdiĝi nur en tre limita radio, dum la penso atingas ĝis la sen-

fineco. La Spirito, en la Spaco, similas vojaĝanton sur vasta ebenaĵo: tiu homo, subite aŭdinte sian nomon, sin turnas al la flanko, de kiu oni lin vokis.”

VI. Ni scias, ke distancoj malmulte signifas por la Spiritoj; tamen estas mirige, ke ili iafoje respondas al elvoko tiel rapide, kvazaŭ ili estus streĉe pretaj por tio.

“Efektive, ili iafoje tiaj estas. Se la elvoko estas antaŭdecidita, la Spirito estas antaŭe avizata kaj ofte tie sin trovas antaŭ la momento de la elvoko.”

VII. Ĉu la penso de la elvokanto estas pli aŭ malpli aŭdata, laŭ iaj cirkonstancoj?

“Sen ia dubo; Spirito, vokita de sento de simpatio kaj bondeziro, estas pli forte tuŝita; tio estas kvazaŭ ia amika voĉo, kiun li rekonas; sen tio la elvoko ofte **nenion donas**. La penso, elŝprucinta el la elvoko, frapas la Spiriton; se ĝi estas misdirektata, ĝi trafas la malplenaĵon. Fariĝas kun la Spiritoj tiel same, kiel kun la homoj: se la vokinto estas por ili indiferenta aŭ antipatia, tiam, kvankam lin aŭdinte, ili ofte ne venas al li.”

VIII. Ĉu la elvokita Spirito venas volonte aŭ devigite?

“Li obeas la volon de Dio, t. e. la ĝeneralan leĝon, kiu prezidas en la Universo. Tamen “devigite” ne estas ĉi tie la ĝusta vorto, ĉar li pesas mem, ĉu veni estas utile: ankaŭ en ĉi tiu rilato li uzas sian liberan volon. Supera Spirito venas ĉiam, kiam vokita por utila celo; li rifuzas respondon nur en rondoj da homoj malmulte seriozaj aŭ pritraktantaj ĉi tiujn aferojn kiel amuzon.”

IX. Ĉu iu Spirito povas rifuzi kontentigi la elvokon, al li faritan?

“Sendube; alie, por kio do lia libera volo? Ĉu vi pensas, ke ĉiuj estuloj de la Universo estas al via dispono? Vi mem, ĉu vi opinias, ke vi ja estas devigataj respondi al ĉiu, kiu ajn eldiras vian nomon? Dirante, ke li povas rifuzi veni, mi parolas pri la peto de la elvokinto, ĉar malsupera Spirito povas esti devigita veni laŭ la ordono de iu Supera Spirito.”

X. Ĉu la elvokanto disponas ian rimedon, por devigi iun Spiriton veni kontraŭvole?

“Neniam, se iu Spirito estas al li egala aŭ supera

pri moraleco; mi diras "pri **moraleco**", sed ne pri inteligenteco, alie la elvokinto havas nenian aŭtoritaton super li. Se li estas malsupera ol la elvokinto, ĉi tiu povas sukcesi, se ĝi estas por lia bono, ĉar tiam aliaj Spiritoj vin helpos." (§ 279.)

XI. Ĉu estas iel malutile elvoki malsuperajn Spiritojn, kaj ĉu, vokante ilin, oni povas timi, ke oni sin metus sub ilian potencon?

"Ili potencas nur tiujn, kiuj lasas sin potenci. Kiu estas helpata de bonaj Spiritoj, tiu havas nenion por timi; li imponas al la malsuperaj Spiritoj, sed ne ĉi tiuj al li. En soluleco la mediumoj, plej precipe la komencantoj, devas deteni sin de tiaj elvokoj." (§ 278.)

XII. Ĉu estas necesaj iaj specialaj disponoj por la elvokoj?

"La plej nepre necesa el ĉiaj disponoj estas la enmemiĝo, kiam oni volas havi aferon al seriozaj Spiritoj. Kun la fido kaj la deziro al bono oni havas pli da forto por elvoki la Superajn Spiritojn. Dum kelkaj momentoj da enmemiĝo altigante sian animon, oni identiĝas kun la bonaj Spiritoj kaj inklinigas ilin veni."

XIII. Ĉu la fido estas necesa por la elvokoj?

"La fido al Dio, jes; por la ceteraĵo la fido iam venos, se vi volas bonon kaj havas la deziron vin instrui."

XIV. Ĉu, kolektiĝinte kun komuneco de pensoj kaj intencoj, la homoj havas pli da povo, por elvoki Spiritojn?

"Kiam ĉiuj estas kolektiĝintaj por karito kaj bono, ili atingas grandajn aferojn. Nenio estas pli malutila al la rezultato de la elvokoj, ol la diverseco de pensoj."

XV. Ĉu estas utila la antaŭzorgo formi ĉenon, mano en mano, dum kelke da minutoj ĉe la komenco de la kunsidoj?

"Ĉeno estas materiala rimedo, kiu ne starigas unuigon inter vi, se ĉi tiu ne ekzistas en la penso; pli utile ol ĉio ĉi estas, ke ĉiuj unuiĝu per unu sola penso, samtempe kiel ĉiu de sia flanko voku bonajn Spiritojn. Vi ne scias ĉion, kion povus atingi serioza kunsido, el kiu estus forigita ĉiu sento de fiero kaj egoismo, kaj kie regus perfekta sento de reciproka koreco."

XVI. Ĉu estas preferindaj la elvokoj en fiksaj tag-oj kaj horoj?

"Jes, kaj, se eble, en unu sama loko: la Spiritoj tien venas pli volonte; tio estas via konstanta deziro, kio help-as la Spiritojn ekkomunikiĝi kun vi. La Spiritoj havas siajn okupojn, kiujn ili ne povas forlasi **subite** por via persona kontentiĝo. Mi rekomendas en unu sama loko, sed ne pensu, ke tio estas absoluta devo, ĉar la Spiritoj iras ĉien; mi volas diri, ke unu loko, difinita pro tio, est-as preferinda, ĉar tie la enmemiĝo estas pli perfekta."

XVII. Ĉu iuj objektoj, kiel medaloj kaj talismanoj, havas la povon altiri aŭ forpuŝi la Spiritojn, laŭ la kredo de kelkaj homoj?

"Ĉi tiu demando estas superflua, ĉar vi ja scias, ke la materio neniel agas sur la Spiritojn. Estu certaj, ke iu bona Spirito neniam konsilas tiajn sensencaĵojn. La efiko de la talismanoj, kiaj ajn ili estas, neniam ekzistis, krom en la imagemo de kredemuloj."

XVIII. Kion pensi pri la Spiritoj, kiuj difinas ren-devuojn en terurvekaj lokoj kaj por malfruegaj horoj?

"Tiuj Spiritoj sin amuzas pri la homoj, kiuj ilin aŭs-kultas. Estas ĉiam senutile kaj ofte danĝere cedi al si-milaj sugestoj: senutile, ĉar oni el tio gajnas nenion, krom esti mistifikita; danĝere, ne pro la malbono, kiun la Spiritoj povas fari, sed pro la influo, kiun tio povas havi sur malfortajn cerbojn."

XIX. Ĉu ekzistas tagoj kaj horoj pli favoraj por elvokoj?

"Por la Spiritoj tio estas tute indiferenta, kiel ĉio materia, kaj estus superstiĉo kredi la influon de tagoj kaj horoj. La plej favoraj momentoj estas tiuj, en kiuj la elvokanto povas esti malplej absorbita de siaj kutim-aj okupoj, kiam lia korpo kaj lia spirito troviĝas en la plej trankvila stato."

XX. Ĉu la elvoko estas por la Spiritoj io agrabla aŭ ĝena: Ĉu ili venas volonte, kiam oni ilin vokas?

"Ĉi tio dependas de ilia karaktero kaj de la motivo, por kiu ili estas vokataj. Kiam la celo estas laŭdinda kaj la medio estas simpatia por ili, tio estas por ili io agrabla, eĉ altiranta; la Spiritoj ĉiam sentas sin feliĉaj

pro la korinklino, kiun oni montras al ili. Por kelkaj estas granda feliĉo komunikiĝi kun la homoj, kaj tial ili suferas de la forgeso, en kiun ili falas. Sed, kiel mi diris, tio dependas de ilia karaktero; inter la Spiritoj ekzistas ankaŭ mizantropoj, al kiuj ne plaĉas esti ĝenataj kaj kies respondoj travidigas ilian galhumoron, precipe tiam, kiam ilin vokas homoj por ili indiferentaj, por kiuj ili sin ne interesas. Iu Spirito ofte havas nenian motivon, por veni, vokite de ia nekonato, por kiu li estas indiferenta kaj kiun preskaŭ ĉiam instigas nura scivolo; se li venas, li ordinare restas nelonge, escepte se la elvoko havas seriozan kaj instruan celon."

*Rimarko*. Estas homoj, kiuj elvokas siajn parencojn, sole nur por demandi ilin pri la plej ordinaraj aferoj de la materiala vivo, ekzemple: unu, por scii, ĉu li luigos aŭ vendos sian domon; alia, por scii, kian gajnon li ricevus de sia komercaĵo, la lokon, kie mono estas kaŝita, ĉu tia afero donos aŭ ne donos al li ian profiton. Niaj transtombaj parencoj sin interesas pro ni nur pro la korinklino, kiun ni portas por ili. Se nia tuta penso limiĝas je la kredo, ke ili estas sorĉistoj, se ni pensas pri ili, nur por peti de ili informojn, ili ja ne povas porti por ni grandan simpation, kaj ni ne devas miri la malmultan bonanimecon, kiun ili montras al ni.

XXI. Ĉu ekzistas ia diferenco inter la bonaj kaj la malicaj Spiritoj rilate al ilia servema rapideco por la kontentigo de nia elvoko?

"Ekzistas unu tre granda: la malicaj Spiritoj venas volonte nur tiam, se ili esperas superregi kaj trompi; ili forte incitiĝas, kiam devigitaj veni, por konfesi siajn erarojn, kaj nenion alian sopiras, ol foriri, simile al lernejano, kiun oni venigas, por lin korekti. Ili povas esti al tio devigataj de Superaj Spiritoj, por puno kaj por instruiĝo de la enkarnuloj. La elvoko estas ĝena por la bonaj Spiritoj, kiam ili estas senutile vokataj por vanaĵoj; tiam ili aŭ ne venas aŭ foriras.

"Vi povas diri, ke, en principo, la Spiritoj, kiaj ajn ili estas, ne amas, same kiel vi, servi kiel amuzilo por scivoluloj. Vi ofte, elvokante iun Spiriton, havas nenian alian celon, ol vidi, kion li diros al vi, aŭ demandi lin pri apartaj okazaĵoj de lia vivo, kiujn ne koncernas vin

koni, ĉar li havas nenian motivon, por fari al vi konfidencojn; ĉu vi pensas, ke li eksidus ĉe la pilorio, nur por fari al vi plezuron? Tion forbatu de via kapo: kion li ne estus farinta ankoraŭ sur la Tero, tion li des pli ne farus kiel Spirito.”

*Rimarko.* La sperto efektive pruvas, ke la elvoko estas ĉiam agrabla al la Spiritoj, kiam farita por serioza kaj utila celo. La bonaj plezure venas, por nin instrui; tiuj suferantaj trovas faciligon por ilia doloro ĉe la simpatio, kiun oni montras al ili; tiuj, kiujn ni konis, estas feliĉaj, ke ni ilin memoras. La frivolaj Spiritoj amas esti elvokataj de ventanimaj homoj, ĉar tio havigas al ili okazon sin amuzi pri tiuj; ili sentas sin malbone ĉe seriozaj homoj.

XXII. Ĉu, por manifestiĝi, la Spiritoj ĉiam bezonas elvokon?

“Ne, ili tre ofte sin prezentas nevokite, kio montras, ke ili venas volonte.”

XXIII. Kiam iu Spirito sin prezentas propravole, ĉu oni estas pli certa pri lia identeco?

“Tute neniel, ĉar la trompemaj Spiritoj ofte uzas ĉi tiun rimedon, por pli efike mistifiki.”

XXIV. Kiam oni per la penso elvokas ies Spiriton, ĉu tiu Spirito venas, eĉ tiam, se ne okazas manifestiĝo per skribado aŭ alimaniere?

“La skribado estas materiala rimedo, kiun la Spirito uzas, por atesti sian ĉeeston; altiras lin la penso, sed ne la emo skribi.”

XXV. Kiam iu malsupera Spirito manifestiĝas, ĉu oni povas devigi lin foriĝi?

“Jes, ne atentante lin. Sed, kiel vi volus, ke li foriĝu, se vi amuzus vin ĉe liaj fiaĵoj? La malsuperaj Spiritoj alligas sin al tiuj homoj, kiuj ilin plezure aŭskultas, kiel la stultuloj inter vi.”

XXVI. Ĉu elvoko, farita en la nomo de Dio, estas garantio kontraŭ la ensoviĝo de la malicaj Spiritoj?

“La nomo de Dio ne estas brido por ĉiuj malicaj Spiritoj, sed ĝi retenas multajn; per ĉi tiu rimedo vi ĉiam forigus kelke da ili, kaj des pli efike, se vi farus la el-

vokon el la fundo de la koro, sed ne kiel ian banalan formulon.”

XVII. Ĉu oni povus laŭnome elvoki samtempe plurajn Spiritojn?

“Estas en tio nenia malfacilaĵo, kaj se vi havus tri aŭ kvar manojn, por skribi, tri aŭ kvar Spiritoj respondus al vi unutempe; ĉi tio okazas tiam, kiam oni disponas plurajn mediumojn.”

XXVIII. Kiam pluraj Spiritoj estas elvokitaj samtempe, sed oni havas nur unu solan mediumon, kiu el ili respondas?

“Unu el ili respondas por ĉiuj, esprimante la kolektivan penson.”

XXIX. Ĉu unu sama Spirito povus, dum seanco, komunikiĝi samtempe per du mediumoj?

“Tiel facile, kiel inter vi ekzistas homoj, kiuj diktas samtempe plurajn leterojn.”

*Rimarko.* Mi vidis Spiriton samtempe per du mediumoj respondi la demandojn, kiujn oni faradis al li, per unu en la angla lingvo, per alia en la franca lingvo; la respondoj estis inter si identaj laŭ la senco, kelkaj eĉ la laŭvorta traduko unu de alia.

Du Spiritoj, elvokitaj samtempe de du mediumoj, povas tenadi inter si konversacion; ĉi tiu maniero de komunikiĝado ne estas por ili necesa, ĉar ili legas la penson unu de la alia, tamen ili iafoje volontas tion fari por nia instruado. Se ili estas malsuperaj Spiritoj, ĉar ili estas ankoraŭ penetritaj de la surteraj pasioj kaj de la enkorpaj ideoj, tial povas okazi, ke ili kverelas unu kun la dua kaj interŝanĝas fiparolojn, al si reciproke riproĉas la mizeraĵojn, kaj eĉ ĵetas krajonojn, korbojn, tabuletojn k. a. unu kontraŭ la duan.

XXX. Ĉu iu Spirito, elvokita samtempe al pluraj lokoj, povas en sama tempo respondi al demandoj, farataj al li?

“Jes, se li estas altklasa Spirito.”

— En ĉi tiu okazo, ĉu la Spirito disdividiĝas aŭ ĉu li ĝuas la kapablon de ĉieestado?

“La suno estas unu sola, tamen ĝi disradias cirkaŭen, portante malproksimen siajn radiojn, ne disdividiĝante: same estas kun la Spiritoj. La penso de la Spirito si-

milas ian fajreron, kiu malproksimen disĵetas sian helecon, kaj povas esti vidata el ĉiuj punktoj de la horizonto. Ju pli pura estas la Spirito, des pli lia penso **radias** kaj disvastiĝas, kiel la lumo. La malsuperaj Spiritoj estas treege materiaj; ili povas respondi nur al unu homo ĉiufoje kaj ne povas veni al iu loko, se ili estas vokitaj al alia.

"Vokite samtempe al du lokoj, iu Supera Spirito respondos ambaŭ elvokojn, se ĉi tiuj estas egale seriozaj kaj varmaj, alie li preferos la plej seriozan."

*Rimarko*. Tiel estas kun homo, kiu, ne delokiĝante, povas transsendi sian penson per signoj, vidataj en diversaj lokoj.

Dum kunsido de la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj, kie estis diskutita la demando pri la ĉieestado, iu Spirito propramove diktis la sekvantan komunikaĵon:

"Vi ĉi tiun vesperon demandis, kian rangon okupas la Spiritoj en sia hierarkio, rilate la ĉieestadon. Komparu nin kun ia aerostato, iom post iom altiĝanta en la aero. Dum ĝi rampas sur la tero, povas vidi ĝin nur tre malmultaj homoj ĉirkaŭe; laŭgrade kiel ĝi altiĝas, tiu rondo plivastiĝas rilate al ĝi, kaj kiam ĝi atingas certan alton, ĝi aperas al grandega nombro da homoj. Tiel estas kun ni; malica Spirito, ankoraŭ alkroĉita al la Tero, staradas en limita rondo, inter la homoj, kiuj lin vidas. Li altiĝu en la favorkoreco de Dio, li pliboniĝu, kaj li povos konversacii kun pluraj personoj samtempe; kaj kiam li fariĝis Supera Spirito, li povas disradii simile al la lumo de la suno, sin montri samtempe al pluraj personoj kaj en pluraj lokoj.

CHANNING."

XXXI. Ĉu oni povas elvoki la purajn Spiritojn, tiujn, kiuj elfinis la serion de siaj enkarniĝoj?

"Jes, sed ili tre malofte venas; ili komunikiĝas nur kun la puraj kaj sinceraj koroj, sed ne **kun la fieraj kaj la egoistaj**. Oni tial devas dubi, ĉu ne malsuperaj Spiritoj afektas tiun kvaliton, por pozi pli altajn gravulojn en viaj okuloj."

XXXII. Kiel klarigi, ke la Spiritoj de la plej glornomaj homoj venas tiel facile kaj familiare ĉe la elvoko de la homoj plej senfamaj?

"La homoj taksas la Spiritojn laŭ sia propra mezuro, kio estas eraro. Post la morto de la korpo la surteraj rangoj forviŝiĝas; distingo inter ili ekzistas nur pri boneco, kaj la bonaj iras ĉien, kie oni devas fari bonon."

XXXIII. Kiom da tempo devas pasi post la morto, por ke oni povu elvoki iun Spiriton?

"Oni povas tion fari en la momento mem de la morto, sed, ĉar en tiu momento la Spirito ankoraŭ troviĝas konfuzita, tial li nur neperfekte respondas."

*Rimarko.* Ĉar la daŭro de la konfuziteco diversas laŭ la Spirito, nenia tempo povas esti fiksita por elvokoj; tamen malofte post ok tagoj la Spirito ne konscias sian staton sufiĉe, por povi respondi; kelkafoje li povas tion tre bone fari du aŭ tri tagojn post la morto. Ĉiaokaze oni povas provi kun mezurateco.

XXXIV. Ĉu la elvoko estas pli peniga por la Spirito en la momento de la morto, ol iom poste?

"Jes, iafoje; tio estas kvazaŭ oni elŝirus vin el la dormo, antaŭ ol vi tute vekiĝis. Kelkaj tamen tute ne ĉagreniĝas pro tio, kaj tio eĉ helpas ilin eltiriĝi el la konfuziteco."

XXXV. Kiel la Spirito de infano, mortinta tre juna, povas doni plensciajn respondojn, se, kiam sur la Tero, li ankoraŭ ne konsciis sin mem?

"La animo de infano estas Spirito **ankoraŭ en la vindaĵoj de la materio**; liberiĝinte el la materio, li ĝuas la kapablojn de Spirito, ĉar la Spirito ne havas aĝon, kio pruvas, ke la infano jam antaŭe vivis. Tamen ĝis li troviĝos tute liberiĝinta, li povos konservi en sia parolo kelkajn trajtojn de la karaktero de la infanaĝo."

*Rimarko.* La influon de la korpo, kiun pli aŭ malpli longe sentas la Spirito de infano, kelkafoje sentas ankaŭ la Spirito de homoj, kiuj mortis frenezaj. La Spirito mem ne estas freneza, sed oni scias, ke iuj Spiritoj dum kelka tempo pensas, ke ili ankoraŭ troviĝas en ĉi tiu mondo. Ne estas do mirige, ke, ĉe frenezulo, la Spirito ankoraŭ suferas de la malhelpoj, kiuj dum sia surtera migrado baris la liberan manifestiĝadon de siaj pensoj, ĝis li estos tute ekster la materio. Ĉi tiu efiko diversas laŭ la kaŭzoj de la frenezeco, ĉar

kelkaj frenezuloj plene regajnas sian mensklarecon tuj post sia morto.

## Elvoko de bestoj

**283.** XXXVI. Ĉu oni povas elvoki la Spiriton de iu besto?

"Post la morto de besto la inteligenta principo, kiu ekzistis en ĝi, troviĝas en latenta stato kaj estas tuj utiligata de iuj Spiritoj, por tio komisiitaj, por animi novajn estaĵojn, ĉe kiuj ĝi daŭrigas sian ellaboriĝadon. Sekve, en la mondo de la Spiritoj ne ekzistas vagantaj bestoj, sed nur Spiritoj de homoj. Ĉi tio respondas vian demandon."

— Kiel do vere estus, ke, elvokinte bestojn, iuj homoj ricevis respondon?

"Elvoku rokon kaj ĝi respondos al vi. Multego da Spiritoj estas ĉiam pretaj preni la parolon por ĉio ajn."

*Rimarko*. El la sama motivo, se oni elvokos ian miton aŭ alegorian personon, ĝi respondos, t.e. iu respondos por ĝi, kaj la Spirito, kiu sin prezentos, ekprenos ĝian karakteron kaj manierojn. Unu tagon iu ekpensis elvoki *Tartufon*, kaj *Tartufo* tuj venis; eĉ plue: li parolis pri Orgono, Elmira, Damisa kaj Valerio, pri kiuj li donis sciigojn; li imitis la hipokritulon tiel lerte, kvazaŭ Tartufo estis efektive ekzistinta kiel reala persono. Li poste diris, ke li estas la Spirito de aktoro, kiu ludis tiun rolon. La frivolaj Spiritoj ĉiam ekspluatas la nespertecon de siaj demandantoj, sed ili sin detenas havi aferon al tiuj, pri kiuj ili scias, ke tiuj havas sufiĉan kapablecon, por senmaskigi iliajn mistifikojn, kaj kiuj ne fidus ilian parolaĵon. Same okazas inter la homoj.

Unu sinjoro havis en sia ĝardeno neston de kardeloj, por kiuj li sin tre interesis. Unu tagon la nesto malaperis. Certiĝinte, ke neniu el liaj samdomanoj kulpas tiun delikton, kaj ĉar li mem estis mediumo, li ekpensis elvoki la patrinon de la etuloj; ŝi venis kaj diris al li en tre bona franca lingvo: "Akuzu neniun kaj estu trankvila pri la sorto de miaj idetoj; okazis tio, ke la kato, saltante, renversis la neston; vi trovos ĉi tiun sub la herbaĵo kaj ankaŭ la birdetojn, kiujn la kato ne manĝis." Li iris kaj konstatis, ke la dirita estas vero. Ĉu oni el tio konkludu, ke tio estis la birdo, kiu respondis? Ne, certe, sed, simple, iu Spirito, kiu konis tiun okazaĵon. Ĉi tio montras, kiel oni devas malfidi ŝajnaĵojn kaj kiel ĝusta

estas la supre donita respondo: "Elvoku rokon kaj ĝi respondos al vi." (Vd. antaŭe la ĉapitron *Pri la mediumeco de la bestoj*, § 234.)

## Elvoko de vivantoj

**284.** XXXVII. Ĉu la enkarneco de la Spirito estas absoluta malhelpo al lia elvoko?

"Ne, sed estas necese, ke la stato de la korpo ebligu al la Spirito liberiĝi en tiu momento. Enkarniĝinta Spirito venas tiom pli facile, kiom pli altklasa estas la mondo, kie li staras, ĉar tie la korpoj estas malpli materiaj."

XXXVIII. Ĉu oni povas elvoki la Spiriton de vivanto?

"Jes, ĉar oni povas elvoki enkarniĝintan Spiriton. La Spirito de vivanto povas, en siaj momentoj de libereco, prezenti sin ankaŭ **ne elvokite**; ĉi tio dependas de lia simpatio por la homoj, kun kiuj li komunikiĝas." (Vd. en la § 116 la historion pri la sinjoro kun la flartabakujo.)

XXXIX. En kia stato restas la korpo de la homo, kies Spirito estas elvokita?

"Ĝi dormas aŭ nur dormetas; tiam la Spirito estas ja libera."

— Ĉu la korpo povus vekiĝi dum la forestado de la Spirito?

"Ne; la Spirito estas devigita **eniri en sian loĝejon**; se en tiu momento li konversacias kun vi, li disiĝas de vi kaj ofte diras al vi la motivon de sia foriro."

XL. Kiel la Spirito ekster sia korpo estas avizata, ke lia ĉeesto estas necesa?

"La Spirito de vivanta homo neniam estas tute apartiĝinta de la korpo; kiel ajn malproksimen li foriĝis, li sin tenadas ĉe la korpo per ia fluidaĵa ligilo, kiu servas por alvoki lin, kiam necese; ĉi tiu ligilo rompiĝas nur ĉe la morto."

*Rimarko*. Vidivaj mediumoj ofte vidis ĉi tiun fluidaĵan ligilon. Ĝi estas ia fosforeska trenaĵo, kiu de la Spirito iras en la direkto al la korpo, disfluiĝante en la aero. Kelkaj Spiritoj diris, ke per ĝi ili scias, kiuj ankoraŭ troviĝas alkroĉitaj al la enkorpa mondo.

XLI. Kio okazus, se, dum la dormo, kaj en la forestado de la Spirito, la korpo estus morte frapita?

"La Spirito estus avizita kaj revenus, antaŭ ol la morto plene efektiviĝus."

— Sekve ne povus okazi, ke la korpo mortus en la forestado de la Spirito kaj ke, ĉe sia reveno, ĉi tiu ne povus eniri: ĉu tiel?

"Jes; tio malobeus la leĝon pri la kuniĝo de la animo kun la korpo."

— Sed se la frapo estus subita kaj ne antaŭvidita?

"La Spirito estus avizita, antaŭ ol la morta frapo estus donita."

Rimarko. Demandite pri ĉi tiu fakto, la Spirito de iu vivanto respondis: "Se la korpo povus morti en la forestado de la Spirito, tio estus tro oportuna rimedo pro fari hipokritajn memmortigojn."

XLII. Ĉu la Spirito de iu homo, elvokita dum sia dormo, estas tiel libera komunikiĝi, kiel tiu de homo mortinta?

"Ne; la materio ĉiam pli aŭ malpli influas tiun Spiriton."

*Rimarko.* Unu homo, kiu sin trovis en tiu stato kaj al kiu estis farita ĉi tiu demando, respondis: *Mi estas ĉiam katenita al la ferglobo, kiun mi trenas post mi.*

— Ĉu en tiu stato la Spirito povus esti malhelpata veni, ĉar li troviĝas aliloke?

"Jes, povas okazi, ke la Spirito troviĝas en iu loko, kie plaĉas al li resti, kaj tiam li ne kontentigas la elvokon, precipe tiam, se la elvokon faris homo, kiu lin ne interesas."

XLIII. Ĉu estas tute ne eble elvoki la Spiriton de homo ne dormanta?

"Kvankam malfacila, tamen tio ne estas absolute ne ebla, ĉar, se la elvoko **efikas**, povas esti, ke tiu homo endormiĝos; sed la spirito povas komunikiĝi, kiel Spirito, nur en tiuj momentoj, kiam lia ĉeesto ne estas necesa por la inteligenta aktiveco de la korpo."

*Rimarko.* La sperto montras, ke elvoko, farita dum maldormo, povas naski dormon aŭ almenaŭ ian malvigliĝon proksiman al dormo, sed tia efiko povas fariĝi nur per tre energia volo kaj se ekzistas simpatioligiloj inter la du homoj, alie la elvoko nenion donas. Eĉ en tiu okazo, kiam la elvoko povus naski dormon, se la momento estas neoportuna, la persono, ne volante dormi, antaŭmetus reziston, kaj, se li pereas, lia Spirito konfuziĝus de tio kaj malfacile respondus. El tio sekvas, ke la momento plej oportuna por elvoko de vivanto estas tiu de lia natura dormado, ĉar tiam, estante libera, lia Spirito povas veni al tiu, kiu lin vokas, tiel same, kiel li povus iri aliloken.

Kiam la elvoko estas farata kun la konsento de la persono, kaj ĉi tiu penas endormiĝi por tio, povas okazi, ke tiu absorba zorgo malfruigas la dormon kaj perturbas la Spiriton; tial ankoraŭ preferinda estas la dormo ne trudita.

XLIV. Ĉu vivanto, kiu estis elvokita dormante, konscias tion ĉe sia vekiĝo?

"Ne; vi mem estas elvokataj pli ofte, ol kiom vi pensas. Nur lia Spirito ĝin scias kaj iafoje povas postlasi ĉe la persono ian malprecizan impreson, kvazaŭ de songô."

— Kiu povas elvoki nin, senfamajn estulojn?

"Vi eble en antaŭaj ekzistadoj estis personoj famaj en ĉi tiu aŭ en aliaj mondoj; povas elvoki vin ankaŭ viaj parencoj kaj amikoj en ĉi tiu mondo aŭ en aliaj. Ni prezentu al ni, ke via Spirito animis la korpon de la patro de alia persono: nu, kiam tiu persono elvokos sian patron, kiu estos elvokita kaj respondos, tiu estos via Spirito."

XLV. Ĉu, elvokite, la Spirito de vivanto respondas kiel Spirito aŭ laŭ la pensoj, kiujn li havas en maldormo?

"Ĉi tio dependas de lia grado en la hierarkio, sed li juĝas pli saĝe kaj havas malpli da antaŭjuĝoj, tute same, kiel la somnambuloj; tiu estas iom simila stato."

XLVI. Se la Spirito de somnambulo en magnetiza dormo estus elvokita, ĉu li estus pli klarmensa, ol tiu de alia persono?

"Li sendube respondus pli facile, ĉar li tiam troviĝas pli libera; ĉio estas kondiĉita al la grado da sendependeco de la Spirito rilate al la korpo."

— Ĉu la Spirito de somnambulo povus respondi al unu persono, kiu lin elvokus de malproksime, samtempe kiel li respondus buŝe al alia persono?

“La kapablecon komunikiĝi samtempe sur du malsamaj lokoj havas nur la Spiritoj tute liberiĝintaj el la materio.”

XLVII. Ĉu oni povus modifi la ideojn de iu persono en maldormo, agante sur lian Spiriton dum la dormo?

“Jes, iafoje; ne estante tiel forte ligita al la materio, li tiam estas pli sentema por la moralaj impresoj, kaj tiuj impresoj povas influi sur lian manieron rigardi la aferojn en lia ordinara stato. Bedaŭrinde ofte okazas, ke ĉe la vekiĝo la korpa naturo lin superregas kaj igas lin forgesi la bonajn intencojn, kiujn li eble prenis.”

XLVIII. Ĉu la elvokita Spirito de vivanto estas libera diri aŭ ne diri tion, kion li volas?

“Li posedas siajn kapablojn de Spirito, sekve sian liberan volon, kaj ĉar li tiam havas pli da sagaceco, tial li estas ja pli saĝa, ol en maldormo.”

XLIX. Ĉu, elvokinte lin, oni povus devigi iun personon diri tion, pri kio li dezirus silenti?

“Mi diris, ke la Spirito havas sian liberan volon, sed povas okazi, ke, kiel Spirito, la persono atribuas malpli da graveco al iaj aferoj, ol en sia ordinara stato; lia konscienco povas tiam paroli pli libere. Cetere, se li ne volas paroli, li ĉiam povas deturniĝi de la tedaĵoj forirante, ĉar oni ne povas reteni lian Spiriton, kiel oni retenus lian korpon.

L. Ĉu la Spiriton de vivanto iu alia Spirito ne povus devigi veni kaj paroli, tiel same, kiel fariĝas kun la liberaj Spiritoj?

“Ĉe la Spiritoj, ĉu de mortintoj, ĉu de vivantoj, ekzistas superregado nur kiel sekvo de supereco morala, kaj vi ja komprenas, ke iu Supera Spirito neniam subtenas mallojalan maldiskretaĵon.”

*Rimarko.* Ĉi tiu konfidekspluato estus efektiva malbonago, kiu ja nenion donus, ĉar oni ne povas elpreni sekreton al Spirito, kiu volus ĝin gardi, escepte se, instigite de ia sento de justeco, li konfesus tion, kion en aliaj cirkonstancoj li prisilentus.

Unu virino ekvolis per ĉi tiu rimedo scii de unu sia parenco, ĉu ties testamento ŝin favoras. La Spirito respondis: “Jes, mia kara nevino, kaj la pruvon pri tio vi baldaŭ havos.” Tio estis ja vera, sed post kelke da tagoj la parenco nuligis sian testamenton kaj estis sufiĉe malica, por sciigi ŝin pri tio, tamen ne sciante, ke ŝi lin antaŭe elvokis. Sendube ia instinkta sento instigis lin plenumi la decidon, kiun lia Spirito prenis laŭ la al li farita demando. Estas mallojalaĵo demandi la Spiriton de mortinto aŭ de vivanto pri tio, pri kio oni ne kuraĝus demandi lian personon, kaj tiu mallojalaĵo eĉ ne havas kiel kompenson la rezultaton, kiun oni celas.

LI. Ĉu oni povas elvoki iun Spiriton, kies korpo ankoraŭ kuŝas en la patrina sino?

“Ne; vi ja scias, ke en tiu momento la Spirito troviĝas en absoluta perturbostato.”

*Rimarko*. La enkarniĝo elplenumiĝas definitive nur en la momento, kiam la infano ekspiras; sed jam de post la embriigo la Spiriton, destinitan por animi la infanon, kaptas perturbo, kiu fariĝas ĉiam pli granda laŭmezure kiel proksimiĝas la naskiĝo kaj kiu prenas al li la memkonscion kaj sekve la kapablon respondi. (Vd. en *La Libro de la Spiritoj*: “Reveno al la enkorpa vivo; Kuniĝo de animo kun korpo”, § 344.)

LII. Ĉu iu trompema Spirito povus substituiĝi al tiu de iu vivanto, kiun oni elvokus?

“Ĉi tio ne estas duba kaj tre ofte okazas precipe tiam, kiam la intenco de la elvokinto ne estas pura. Efektive, la elvoko de vivantoj prezentas intereson nur kiel psikologia studo; estas konsilinde deteni sin de ĝi ĉiam, kiam ĝi ne povas doni pozitivan rezultaton.”

*Rimarko*. Se la elvoko de la liberaj Spiritoj ne ĉiam *efikas* — mi uzas ilian esprimon —, multe pli ofte tiel estas pri tiuj enkarniĝintaj; precipe en ĉi tiu okazo trompemaj Spiritoj ekokupas ties lokon.

LIII. Ĉu la elvoko de vivanto estas iel malutila?

“Ĝi ne ĉiam estas sendanĝera; tio dependas de la stato de la persono, ĉar se li estas malsana, oni povas per ĝi pliakrigi liajn suferojn.”

LIV. En kia okazo la elvoko de vivanto povas esti plej malutila?

“Oni devas deteni sin elvoki tre junajn infanojn, ankaŭ serioze malsanajn homojn kaj kadukajn maljunulojn. Unuvorte, ĝi povas esti malutila ĉiam, kiam la korpo estas tre malfortiĝinta.”

*Rimarko.* Ankaŭ la abrupta ĉeso de la intelektaj kapabloj dum maldormo povus esti danĝera, se la persono en tiu momento bezonus sian plenan spiritoĉeeston.

LV. Ĉu dum la elvokiteco de vivanto lia korpo spertas laciĝon kiel sekvon de la laboro, al kiu, kvankam forestanta, sin donas lia Spirito?

Unu persono, kiu troviĝis en tiu stato kaj kiu pensis, ke lia korpo laciĝas, respondis ĉi tiun demandon jene:

“Mia Spirito estas ia nelibera balono, ligita al fosto; mia korpo estas la fosto, ŝancelata de la skuoj de la balono.”

LVI. Ĉar la elvoko de vivantoj povas esti iel malutila, se farita ne prudente, ĉu tial ne estas danĝere elvoki iun Spiriton, pri kiu oni ne scias, ĉu li estas enkarniĝinta, kaj kiu povus ne troviĝi en favoraj kondiĉoj?

“Ne, la cirkonstancoj ne estas tiaj samaj; li venos nur, se li havos la kondiĉojn tion fari. Cetere, ĉu mi ne diris al vi, ke vi demandu, antaŭ ol fari ian elvokon, ĉu ĝi estas efektivigebla?”

LVII. Kiam, en la malplej oportunaj momentoj, ni eksentas nerezisteblan dormemon, ĉu ĝin kaŭzas tio, ke ni estas ie elvokataj?

“Tiel sendube povas esti, sed plej ofte ĝi estas pure fizika efiko, ĉu tial, ke la korpo bezonas ripozon, ĉu tial, ke la Spirito bezonas sian liberecon.”

*Rimarko.* Unu mia konatino, mediumino, unu tagon ekpensis elvoki la Spiriton de sia nepo, dormanta en la sama ĉambro. La identeco estis konstatita laŭ la parolo, la kutimaj esprimoj de la infano kaj la tre ĝusta raporto pri diversaj aferoj, kiuj okazis al li en la lernejo; ankoraŭ unu cirkonstanco ĝin konfirmis. La mano de la mediumino subite haltis meze de frazo kaj nenion plu ŝi povis skribi. En tiu mo-

mento la infano, duonvekiĝinta, sin ekturnadis sur sia lito; post kelke da momentoj li reendormiĝis kaj tiam la mano denove ekmoviĝis, daŭrigante la interrompitan konversacion. Farita en bonaj kondiĉoj, la elvoko de vivantoj pruvas, en la malplej kontestebla maniero, la apartan agadon de la Spirito kaj de la korpo, kaj sekve la ekziston de iu inteligenta principo ne dependanta de la materio. (Vd. en la *Revue Spirite*, de 1860, pĝ. 11 kaj 81, plurajn rimarkindajn ekzemplojn de elvokado de vivantoj.) (*)

## 285. Homa telegrafio

LVIII. Ĉu, sin reciproke elvokante, du homoj povus transsendi siajn pensojn unu al la dua kaj do interparoli?

"Jes, **kaj ĉi tiu homa telegrafio estos iam universala rimedo por interparolo**."

— Kial ĝi ne estus praktikata jam nun?

"Ĝi estas praktikebla por iuj homoj, sed ne por ĉiuj; estas necese, ke la homoj **elpuriĝu**, por ke iliaj Spiritoj liberiĝu el la materio, kaj tio estas ankoraŭ unu motivo, pro kiu oni faru elvokojn en la nomo de Dio. Ĝis tiam ĝi estas apartaĵo de la **elitaj animoj**, iel liberaj de la materio, da kiaj estas tre malmulte sur la Tero, ĉe la hodiaŭa stato de ties loĝantoj."

———————

(*) Pri la elvokado de vivantoj la eminenta politikisto kaj mediumo William Thomas Stead (1849 – 1912) postlasis al la mondo la plej rimarkindan dokumentaron. — *La Trad.*

ĈAPITRO XXVI

# PRI LA DEMANDOJ, KIUJN ONI POVAS FARI AL LA SPIRITOJ

*Enkondukaj rimarkoj. Demandoj simpatiaj aŭ antipatiaj al la Spiritoj. Demandoj pri la estonteco. Pri la pasintaj kaj estontaj ekzistadoj. Pri la moralaj kaj materialaj interesoj. Pri la sorto de la Spiritoj. Pri la sano. Pri la inventoj kaj eltrovoj. Pri la kaŝitaj trezoroj. Pri la aliaj mondoj*

## Enkondukaj rimarkoj

**286.** Neniel superflua estus la graveco, kiun oni atribuus al la maniero formuli la demandojn kaj des pli al la konsisto de la demandoj. Du aferoj estas konsiderendaj en tiuj, kiunj oni faras al la Spiritoj: la formo kaj la fundo. Koncerne la formon, ili devas esti formulataj klare kaj precize: neniom da demandoj kompleksaj. Sed estas ankoraŭ unu ne malpli grava punkto, nome la ordo en ilia aranĝo. Kiam iu temo postulas serion da demandoj, tiam estas plej grave, ke ili sinsekve interligiĝu metode, en tia maniero, ke unu nature elfluu de alia; tiam la Spiritoj respondas multe pli facile kaj klare, ol se ili estas prezentataj hazarde, abrupte pasante de unu objekto al alia. Tial estas ĉiam tre utile ilin antaŭe prepari, escepte de tio, se, dum la kunsido, oni intermetas aliajn, diktitajn de la cirkonstancoj. Krom tio, ke la redaktado certe estas pli bona, se farita trankvile, tiu prepara laboro estas, kiel mi jam diris, ia antaŭa elvokado, ĉe kiu la Spirito eble ĉeestis kaj kiu lin inklinigas respondi. Estas rimarkinde, ke la Spirito tre

ofte anticipe respondas iujn demandojn, kio montras, ke li ilin jam antaŭe konis.

La fundo de la demando postulas ankoraŭ pli serioz-an atenton, ĉar ofte respondo, ĝusta aŭ malĝusta, ja dependas de la demando. Kelkajn la Spiritoj ne povas aŭ ne devas respondi pro motivoj al ni nekonataj: estas do senutile insisti; sed tio, de kio oni precipe devas sin deteni, estas demandoj, celantaj provi ilian sagacecon. Kiam io ekzistas, oni diras, ili devas ĝin scii; nu, ĝuste tial, ĉar tiun ion vi ja konas aŭ havas mem la rimedojn konstati ĝian verecon, ili ne donas al si la penon res-pondi; tiu suspekto ilin pikas, kaj do oni ricevas nenion kontentigan. Ĉu ni ĉiutage ne havas pri tio ekzemplojn inter ni? Ĉu homoj superaj, konsciantaj sian valoron, plezurus respondante ĉiajn sensencajn demandojn, celant-ajn submeti ilin al ia ekzameno, kvazaŭ lernejanojn? La deziro fari adepto tian aŭ tian homon ne estas por la Spiritoj motivo por atenti vanan scivolon; ili ja scias, ke la konvinkiĝo pli aŭ malpli frue venos, kaj la ri-medoj, kiujn ili uzas, por ĝin venigi, ne ĉiam estas tiuj, ki-ujn ni supozas.

Prezentu al vi iun gravan sinjoron, okupitan de util-aj kaj seriozaj aferoj, senĉese turmentatan de la baga-telaĵaj demandoj de iu infano, kaj vi faros al vi ideon pri tio, kion la Superaj Spiritoj devas pensi pri ĉiaj ne-niaĵoj, kiujn oni rakontas al ili. El tio ne sekvas, ke oni ne povas ekhavi de la Spiritoj utilajn klarigojn kaj precipe tre bonajn konsilojn, sed ili respondas pli aŭ malpli bone laŭ sia scio mem, laŭ la intereso, kiun ni de ili meritas kaj la korligiteco, kiun ili portas por ni, kaj fine laŭ la celo, al kiu oni strebas, kaj la utileco, kiun ili vidas en la afero. Sed se nia tuta penso limiĝas je tio, konsideri ilin pli kapablaj, ol aliaj, utile informi nin pri la aferoj de ĉi tiu mondo, tiam ili ne povas havi por ni profundan simpation; ili do faras tre mallongajn vi-zitojn kaj ofte, laŭ la grado de sia neperfekteco, el-montras sian malbonhumoron, ke ili estis senutile ĝenitaj.

**287.** Iuj homoj pensas, ke estas preferinde deteni sin de demandoj kaj konsilinde atendi la instruon de la

Spiritoj, ĝin ne elmovante mem: tio estas eraro. La Spiritoj sendube donas spontaneajn vastampleksajn instruojn, pri kiuj oni farus malbone, se oni ilin malŝatus; sed kelkajn klarigojn oni ofte atendus tre longe, se oni ilin ne petus. Sen la demandoj, kiujn mi faris, **La Libro de la Spiritoj** kaj **La Libro de la Mediumoj** estus ankoraŭ verkotaj aŭ almenaŭ estus multe malpli kompletaj, kaj multego da tre gravaj problemoj estus ankoraŭ solvotaj. Anstataŭ ke ili eĉ la plej malmulte estus malutilaj, la demandoj estas tre utilaj el la vidpunkto de instruado, kiam oni scias ilin tenadi en la dezirataj limoj. Ili havas ankoraŭ unu bonaĵon, nome helpi senmaskigi la trompemajn Spiritojn, kiuj, pli fanfaronaj ol kleraj, malofte eltenas la provon de demandoj, farataj per streĉa logiko, per kiuj oni ilin repuŝas ĝis ilia lasta reduto. Havante nenion por timi ĉe tia kontrolado, la efektive superaj Spiritoj mem donas klarigojn pri malklaraj punktoj; la aliaj, kontraŭe, timante rilati kun pli forta partio, tre zorgas ilin eviti; tial tiuj Spiritoj ordinare rekomendas al la mediumoj, kiujn ili volas superpotenci kaj al kiuj ili volas akceptigi siajn utopiojn, deteni sin de ĉia diskutado pri iliaj instruoj.

Se oni bone komprenis tion, kion mi ĝis ĉi tie diris en ĉi tiu verko, oni jam povas fari al si ian ideon pri la rondo, en kiu estas konsilinde enfermi la demandojn, kiujn oni povas adresi al la Spiritoj; tamen, por pli da certeco, mi konigas malsupre la respondojn, donitajn pri la ĉefaj temoj, pri kiuj la malpli spertaj homoj ordinare inklinas demandi la Spiritojn.

## 288. Demandoj simpatiaj aŭ antipatiaj al la Spiritoj

I. Ĉu la Spiritoj volonte respondas la demandojn, faritajn al ili?

"Tio dependas de la demandoj. La seriozaj Spiritoj ĉiam plezure respondas tiujn, kiuj celas bonon kaj la rimedojn, por vin progresigi. La bagatelajn demandojn ili ne atentas."

II. Ĉu sufiĉas, ke iu demando estas serioza, por ricevi seriozan respondon?

"Ne, tio dependas de la Spirito, kiu respondas."

— Sed ĉu iu serioza demando ne forigas la frivolajn Spiritojn?

"Ne la demando forigas la frivolajn, sed **la karaktero de la demandanto**."

III. Kiaj demandoj estas plej antipatiaj al la bonaj Spiritoj?

"Ĉiaj, kiuj estas senutilaj aŭ faritaj el scivolo aŭ por provo; tiam ili ne respondas kaj foriras."

— Ĉu iuj demandoj estas antipatiaj al la neperfektaj Spiritoj?

"Nur tiaj, kiuj povas meti en lumon ilian senklerecon aŭ mistifikon, kiam ili penas trompi; alie ili respondas ĉion, ne zorgante pri la vero."

IV. Kion pensi pri tiaj homoj, kiuj vidas en la komunikiĝoj de la Spiritoj sole nur ian distrilon kaj tempopasigilon aŭ ian rimedon akiri al si malkaŝojn pri tio, kio ilin interesas?

"Tiuj homoj forte plaĉas al la malsuperaj Spiritoj, kiuj, kiel ili, volas sin amuzi kaj kiuj estas kontentaj, kiam ili mistifikis tiujn homojn."

V. Kiam la Spiritoj ne respondas iajn demandojn, ĉu tiel estas pro ilia volo aŭ tial, ke ia supera potenco malpermesas iajn malkaŝojn?

"Pro ambaŭ motivoj; ekzistas tiaj aferoj, kiuj ne povas esti malkaŝitaj, tiaj aliaj, kiujn la Spirito mem ne konas."

— Ĉu per forta insistado la Spirito fine respondus?

"Ne; al la Spirito, kiu ne volas respondi, estas ĉiam facile foriri. Tial vi devas atendi, kiam oni diras al vi, ke vi ĝin faru, kaj precipe ne voli obstine devigi nin respondi. Insisti, por ekhavi ian respondon, kiun oni ne volas doni al vi, estas trafa rimedo, por esti trompita."

VI. Ĉu ĉiuj Spiritoj kapablas kompreni la demandojn, kiujn oni faras al ili?

"Tute kontraŭe: la malsuperaj Spiritoj estas nekapablaj kompreni iujn demandojn, kio ne malhelpas ilin respondi bone aŭ malbone, tute same, kiel okazas ĉe vi."

*Rimarko*. En iuj okazoj, kaj kiam utile, ofte iu pli instruita Spirito venas helpe al la nescianta Spirito kaj inspiras al li tion, kion ĉi tiu devas diri. Oni facile konstatas ĉi tiun fakton laŭ la kontrasto de iuj respondoj kaj ankaŭ tiel, ke la malpli klera Spirito mem ĝin ofte konfesas. Ĉi tion faras nur la sinceraj malkleraj Spiritoj, sed ne tiuj, kiuj paradas per pseŭdo-klereco.

## 289. Demandoj pri la estonteco

VII. Ĉu la Spiritoj povas konatigi al ni la estontecon?

"Se la homo konus la estontecon, li malzorgus la nunecon.

"Ĉi tiu estas ankoraŭ unu afero, pri kiu vi ĉiam insistas, por ekhavi precizan respondon; tio estas granda eraro, ĉar la manifestiĝo de la Spiritoj ne estas ia divenrimedo. Se vi nepre volas ian respondon, ĝin donos iu petolema Spirito: tion ni diras al vi ĉiumomente." (Vd. en **La Libro de la Spiritoj**: "Konado de la estonteco", § 868.)

VIII. Ĉu tamen iafoje estontaj okazoj ne estas spontanee antaŭdirataj de la Spiritoj, kaj ili ja efektiviĝas?

"Povas esti, ke iu Spirito antaŭvidas aferojn, kiujn li opinias utile konigi, aŭ kiujn li havas la komision sciigi al vi; sed oni malkonfidu la trompemajn Spiritojn, kiuj sin amuzas farante antaŭdirojn. Nur la tuto de la cirkonstancoj ebligas taksi la gradon da fido, kiun meritas tiaj paroloj."

IX. Kiajn antaŭdirojn oni plej multe malfidu?

"Ĉiujn, kiuj ne celas ĝeneralan utilecon. La personaj antaŭdiroj povas preskaŭ ĉiam esti konsiderataj kiel apokrifaj."

X. Kion celas la Spiritoj, kiuj propramove antaŭdiras okazaĵojn, kiuj ne efektiviĝas?

"Ili tion faras ofte, por sin amuzi pri la homa kredemo, aŭ pri la teruro aŭ la ĝojo, kiun ili kaŭzas, kaj poste ili ridas pro la desapontiĝo. Tiuj mensogaj antaŭdiroj iafoje havas tamen pli seriozan celon, nome provi la homon, kiun ili koncernas, por ke oni vidu, kiel li ilin akceptas, kaj ĉu bonajn aŭ malbonajn sentojn ili vekas ĉe li."

*Rimarko.* Tia estas ekzemple la antaŭdiro pri io, kio povas flati la profitamon aŭ ambicion, kiel la morto de iu homo, la perspektivo pri ia heredaĵo k. a.

XI. Kial la seriozaj Spiritoj, kiam ili antaŭsentigas iun okazaĵon, ordinare ne difinas la daton de ĉi tiu? ĉu pro nepovado aŭ pro volo?

"Pro ambaŭ motivoj. En iaj okazoj ili povas **antaŭsentigi** iun fariĝon: ĝi tiam estas averto, kiun ili donas al vi. Pri la difinado de la tempo, ofte ili ne devas tion fari; ankaŭ ofte ili ĝin ne povas, ĉar ili ja ne scias mem. Iu Spirito povas antaŭvidi, ke io okazos, sed la ĝusta momento povas dependi de okazaĵoj, kiuj ankoraŭ ne fariĝis kaj kiujn nur Dio scias. La frivolaj Spiritoj, kiuj ne faras al si skrupulon trompi vin, difinas tagojn kaj horojn, ne zorgante pri la sukceso. Tial ĉia **detala** antaŭdiro devas esti por vi nefidinda.

"Ankoraŭ unu fojon: nia misio estas igi vin progresi; ni helpas vin tiom, kiom ni povas. Kiu petas la Superajn Spiritojn pri saĝo, tiu neniam estos trompita; sed ne pensu, ke ni perdus nian tempon aŭskultante ĉiujn viajn bagatelaĵojn kaj antaŭdirante vian sorton: ĉi tion ni lasas en la manoj de la frivolaj Spiritoj, kiuj plezuras ĉe tiaj aferoj, kvazaŭ petolaj infanoj.

"La Providenco strekis limojn al la malkaŝoj, kiuj povas esti farataj al la homo. La seriozaj Spiritoj prisilentas ĉion, kion estas al ili malpermesite konigi. Insistante pri ia respondo, oni elmetas sin al la mistifikoj de la malsuperaj Spiritoj, ĉiam pretaj ekkapti okazojn por insidi kontraŭ via kredemo."

*Rimarko.* La Spiritoj, per indukto, vidas aŭ antaŭsentas la estontajn okazaĵojn; ili tiujn vidas plenumiĝi dum tempo, kiun ili ne mezuras same, kiel ni; por precizigi ties momenton, ili devas alkonformiĝi al nia maniero kalkuli la tempon, kion ili opinias ne ĉiam necesa; el tio ofte naskiĝas kaŭzo de ŝajnaj eraroj.

XII. Ĉu ne ekzistas homoj, naturdotitaj per ia speciala kapablo, kiu ebligas al ili duonvidi la estontecon?

"Tiaj ja ekzistas, t. e. tiuj, kies animo liberiĝas el

la materio; tiam kiu vidas, tiu estas la Spirito; kaj kiam utile, Dio permesas al ili malkaŝi iajn aferojn por la bono; sed ankoraŭ ekzistas pli da trompistoj kaj ĉarlatanoj. Ĉi tiu kapablo estos iam pli ordinara."

XIII. Kion pensi pri la Spiritoj, por kiuj estas plezuro antaŭdiri al iu la tagon kaj horon de lia morto?

"Ili estas triviale spritaj, ja forte triviale spritaj Spiritoj, havantaj nenian celon, ol plezuri ĉe la timo, kiun ili kaŭzas. Neniu maltrankviliĝu pro tio."

XIV. Kiel do iuj homoj per ia antaŭsento estas avizataj pri la tempo de sia morto?

"Plej ofte tion ekscias iliaj Spiritoj mem dum siaj momentoj de libereco kaj, vekiĝinte, konservas pri tio ian intuicion. Preparitaj por tiu okazaĵo, la diritaj homoj do ne ricevas de tio teruron aŭ emocion. En tiu disiĝo de la animo for de la korpo ili vidas nur ŝangon de situacio, aŭ, se vi preferas, en pli vulgara lingvo, la forĵeton de vesto el maldelikata drapo kaj surmeton de vesto el silko. La timo antaŭ la morto malpliiĝos, laŭgrade kiel plivastiĝos la spiritisma kredo."

## 290. Demandoj pri la pasintaj kaj estontaj ekzistadoj

XV. Ĉu la Spiritoj povas al ni konatigi niajn pasintajn ekzistadojn?

"Dio iafoje permesas, ke ili estu malkaŝitaj, laŭ la celo; se por via edifo kaj instruo, tiam ili estas veraj, kaj, en ĉi tiu okazo, la malkaŝo estas farata preskaŭ ĉiam spontanee kaj tute neatendite; sed Li tion neniam permesas, por la kontentigo de vana scivolemo."

— Kial iuj Spiritoj neniam rifuzas fari tiajn malkaŝojn?

"Tio estas petolemaj Spiritoj, kiuj sin amuzas pri vi. Ĝenerale vi devas rigardi kiel malverajn, aŭ almenaŭ suspektindajn, ĉiujn tiaspecajn malkaŝojn, kiuj ne havas treege seriozan kaj utilan celon. La mokemaj Spiritoj plezuras flatante la memestimon per supozataj originoj. Kelkaj mediumoj kaj kredantoj akceptas kiel kontantan monon tion, kion oni diras al ili pri ĉi tiu afero, ne vid-

ante, ke la nuna stato de iliaj Spiritoj nenion pravigas la rangon, pri kiu ili pretendas, ke ili ĝin iam okupis: negrava vantamo, pri kiu sin amuzas kiel la homoj, tiel ankaŭ la petolemaj Spiritoj. Estus pli logike kaj pli konforma al la iom-post-ioma irado de la estuloj, se ili estus suprenirintaj, ol malsuprenirintaj, kio estus por ili pli honora. Por ke oni povu fidi tiajn malkaŝojn, estus necese, ke ili estu farataj memvole per diversaj medium-oj fremdaj unu al alia, kaj nesciantaj pri tio, kio estis antaŭe malkaŝita; tiam ja ekzistus evidenta motivo por kredo."

— Se ni ne povas ekscii nian antaŭan individuecon, ĉu tiel same estus do pri la speco de ekzistado, kiun ni travivis, pri la socia pozicio, kiun ni okupis, pri la bonaj kaj malbonaj kvalitoj, kiuj plej distingiĝis ĉe ni?

"Ne, tio povas esti malkaŝata, ĉar el tio vi povas ĉerpi profiton por via pliboniĝo; cetere, esplorante vian nunecon, vi mem povas el ĝi konkludi vian pasintecon." (Vd. en **La Libro de la Spiritoj**: "Forgeso pri la pasinteco", § 392.)

XVI. Ĉu io povas esti malkaŝita al ni pri niaj estontaj ekzistadoj?

"Ne; ĉio, kion iuj Spiritoj diros al vi pri tio, estas nura ŝerco, kaj ĉi tion oni komprenas: via estonta ekzistado ne povas esti anticipe difinita, ĉar ĝi estos tia, kiel vi mem ĝin estos preparintaj per via konduto sur la Tero kaj per la decidoj, kiujn vi estos farintaj, kiam vi estos liberaj Spiritoj. Ju pli malmulte vi devas elpagi, des pli feliĉaj vi estos. Sed scii, kie kaj kia estos tiu ekzistado, ni ripetas, estas ne eble, escepte de la speciala kaj malofta okazo de tiuj Spiritoj, kiuj troviĝas sur la Tero nur por plenumi gravan mision, ĉar tiam ilia vojo estas iamaniere antaŭe difinita."

## 291. Demandoj pri la moralaj kaj materialaj interesoj

XVII. Ĉu oni povas peti la Spiritojn pri konsiloj?

"Jes, sendube; la bonaj Spiritoj neniam rifuzas helpi ĉiun, kiu ilin fidplene elvokas, precipe koncerne la anim-

on; sed ili forpuŝas la hipokritulojn, **tiujn, kiuj, ŝajnante peti pri lumo, tamen plezuras en mallumo**.”

XVIII. Ĉu la Spiritoj povas doni konsilojn pri aferoj de privata intereso?

“Iafoje, laŭ la motivoj; ĝi dependas ankaŭ de la Spiritoj, al kiuj oni sin turnas por tio. La konsiloj, koncernantaj la privatan vivon, estas pli ekzakte donataj de la familiaraj Spiritoj, ĉar ili alligiĝas al la persono kaj sin interesas por liaj aferoj: ili estas la amikoj, tiuj al kiuj vi konfidencas viajn plej sekretajn pensojn; sed vi ofte tiel lacigas ilin per bagatelaĉaj demandoj, ke ili vin forlasas. Estus tiel absurde, se vi demandus pri intimaj aferoj Spiritojn por vi fremdajn, kiel se vi turnus vin al homo, kiun vi unue renkontus sur via vojo. Vi devus neniam forgesi, ke la bagateleco de la demandoj estas neakordigebla kun la supereco de la Spiritoj. Oni prenu en kalkulon ankaŭ la kvalitojn de la familiara Spirito, kiu povas esti bona aŭ malbona, laŭ sia simpatio por la homo, al kiu li ligiĝas. La familiara Spirito de malbona homo estas malica Spirito, kies konsiloj povas esti pereigaj, sed kiu foriĝas kaj cedas sian lokon al iu pli bona Spirito, se la homo mem pliboniĝas. Similaj kun similaj kuniĝas.”

XIX. Ĉu la familiaraj Spiritoj povas favori la materialajn interesojn per malkaŝoj?

“Jes, ili povas kaj iafoje ĝin faras laŭ la cirkonstancoj, sed estu certaj, ke la bonaj Spiritoj neniam volontas servi al la profitamo. La malicaj briligas antaŭ viaj okuloj multegon da logaĵoj, por stimuli vian profitamon kaj poste mistifiki vin per elreviĝo. Eksciu ankaŭ, ke se via elprovaĵo estas sperti tian aŭ tian travivaĵon, viaj protektantaj Spiritoj povas helpi vin elporti ĝin pli rezignacie, eĉ kelkafoje ili povas ĝin mildigi; sed en la intereso mem de via estonteco, ne estas al ili permesite deŝarĝi vin de ĝi. Tiel same, bona patro ne konsentas al sia infano ĉion, kion ĉi tiu deziras.”

*Rimarko*. Niaj protektantaj Spiritoj, en multe da cirkonstancoj, povas indiki al ni la plej bonan vojon, tamen ne gvidante nin per ia kondukŝnuro, ĉar tiel ni jam havus nen-

ian iniciativon kaj ne kuragŭs fari eĉ unu paŝon, ne petante ilian helpon, malprofite por nia perfektiĝo. Por progresi, la homo ofte bezonas havigi al si sperton per sia propra kostopago; tial la saĝaj Spiritoj donas al ni konsilojn, sed lasas nin konduti laŭ niaj propraj fortoj, kiel agas lerta edukisto rilate siajn disĉiplojn. En la ordinaraj cirkonstancoj de la vivo ili konsilas nin per inspiro kaj tiel ili lasas en niaj manoj la tutan meriton de la bono, kiel ankaŭ la tutan respondecon por la malbono, kiun ni faras.

Estus trouzi la indulgemon de la familiaraj Spiritoj kaj tute erari pri ilia misio ĉiumomente demandi ilin pri la plej ordinaraj aferoj, kiel faras iuj mediumoj. Kelkaj mediumoj por ia “jes” aŭ “ne”, ekprenas la krajonon kaj petas pri konsilo por la plej simpla ago. Tia manio signas malvastecon de ideoj kaj ankaŭ la pretendon pensi, ke ni ĉiam aŭtoritate disponus pri iu Spirito, havanta nenion alian por fari, ol zorgi pri ni kaj pri niaj bagatelaj interesoj. Krom tio, per tia konduto oni nuligus sian juĝokapablon kaj limigus sin al pasiva rolo sen profito por la nuna vivo kaj tute certe kun malprofito por la estonta progresado. Se infanaĵo estas demandi la Spiritojn por senvaloraj aferoj, ne malpli granda infanaĵo estas tiu de kelkaj Spiritoj, kiuj propramove sin okupas pri tio, kion oni povus nomi mastrumaj detaloj: tiuj povas esti bonaj, sed sendube ili estas ankoraŭ forte termensaj.

XX. Se iu homo, ĉe sia morto, lasis siajn aferojn embarasitaj, ĉu oni povus peti lian Spiriton helpi malimpliki ilin; kaj ankaŭ, ĉu oni povus demandi lin pri la efektiva havaĵo, kiun li postlasis, en la okazo, se tiu havaĵo ne estus konata, se tio estas en la intereso de la justeco?

“Vi forgesas, ke la morto estas la liberiĝo el la surteraj zorgoj; ĉu vi do pensas, ke la Spirito, kiu estas feliĉa de sia libereco, volonte venus rekroĉiĝi al sia kateno kaj okupi sin pri aferoj, kiuj lin jam ne koncernas, por kontentigi la profitamon de siaj heredintoj, kiuj eble ekĝojis pro lia morto, esperante, ke ĝi portu al ili profiton? Vi parolas pri justeco, sed justeco montriĝos en la disreviĝo de ilia avideco: tio estas la komenco de la punoj, kiujn Dio destinas por la avideco je la surteraj posedaĵoj. Cetere, la embarasoj, kiujn ies morto iafoje postlasas al aliaj homoj, estas parto de la elprovaĵoj de

la vivo, kaj neniu Spirito povas liberigi vin el ili, ĉar ili troviĝas en la dekretoj de Dio.”

*Rimarko*. La supre donita respondo sendube desapontos tiujn homojn, kiuj imagas al si, ke la Spiritoj havas por fari nenion, krom servi al ni kiel klarvidaj helpantoj, por gvidi nin, ne al la ĉielo, sed sur la Tero. Ankoraŭ unu konsidero subtenas ĉi tiun respondon. Se iu homo, pro malzorgo dum sia vivo, lasis en malordo siajn aferojn, verŝajne post sia morto li ilin ne pli atente prizorgos, ĉar li sendube estas feliĉa, ke li liberiĝis el la klopodoj, kiujn ili trudis al li, kaj kiel ajn malaltranga li estas, li atribuas al ili ankoraŭ malpli da graveco kiel Spirito, ol kiel homo. Rilate al la nekonata posedaĵo, kiun li eble postlasis, li havas nenian motivon por sin interesi por avidaj heredintoj, kiuj probable ne pensus plu pri li, se ili ne esperus profiti ion el ĝi; kaj se lin ankoraŭ okupas la homaj pasioj, li ja povas fari al si malican plezuron el la desapontiĝo de la heredintoj.

Se en la intereso de la justeco kaj de siaj karuloj iu Spirito opinias utile fari tiajn malkaŝojn, li ilin faras memvole, kaj por tio oni ne bezonas esti mediumo, nek sin turni al ia mediumo. La Spirito mem konatigas la aferojn per akcidentaj cirkonstancoj, sed neniam dank'al la peto, kiun oni faris al li, ĉar tiu peto ne povas ŝanĝi la specon de la provoj, kiun oni devas travivi; ĝi prefere kunhelpus por ĉi tiujn pli-pezigi, ĉar ĝi ĉiam estas signo de profitamo kaj montras al la Spirito, ke oni pensas pri li pro intereso. (Vd. § 295.)

## 292. Demandoj pri la sorto de la Spiritoj

XXI. Ĉu oni povas peti la Spiritojn pri klarigoj, rilataj al ilia situacio en la mondo de la Spiritoj?

“Jes, kaj ili volonte donas tiujn klarigojn, se la peton diktis simpatio aŭ la deziro esti utila, sed ne nura scivolemo.”

XXII. Ĉu la Spiritoj povas priskribi la naturon de siaj suferoj aŭ de sia feliĉo?

“Jes, tute ĝuste, kaj tiaj malkaŝoj estas granda instruo por vi, ĉar ili ensekretigas vin en la veran naturon de la estontaj punoj kaj rekompencoj; disbatante la malverajn ideojn, kiujn vi kreis al vi pri ĉi tiu subjekto, ili celas revigligi vian fidon kaj vian konfidon al la boneco de Dio. La bonaj Spiritoj estas feliĉaj priskribi al vi

la feliĉegon de la elektitaj animoj; la malicaj povas esti devigataj pentri siajn suferojn, por ke ilin tuŝu la pento, kaj en tio ili kelkafoje eĉ trovas ian mildigon de la doloroj: ili estas kiel malfeliĉulo, kiu ellasas sian lamentadon, esperante rivevi kompaton.

"Ne forgesu, ke la esenca, la sola celo de Spiritismo estas via pliboniĝo, kaj ĝuste por trafi tiun celon, estas permesite al la Spiritoj ensekretigi vin en la estontan vivon, prezentante al vi ekzemplojn, el kiuj vi povas tiri ian profiton. Ju pli vi identiĝos kun la mondo, vin atendanta, des malpli vi resopiros tiun, en kiu vi nun staras. Jen, resume, la efektiva celo de la revelacio."

XXIII. Ĉu, elvokante iun homon, kies sorton oni ne konas, oni povas ekscii de li mem, ĉu li ankoraŭ troviĝas sur la Tero?

"Jes, se la necerteco pri lia morto ne estas ia **neceso** aŭ provo por tiuj, al kiuj estas interese tion ekscii."

— Se li jam mortis, ĉu li povas konatigi la cirkonstancojn de sia morto en tia maniero, ke oni povu ĝin kontroli?

"Se li rigardas tiun sciigon kiel ion gravan, li ĝin faros; alie li malmulte zorgos pri tio."

*Rimarko*. La sperto montras, ke en ĉi tiu okazo la Spiriton neniel tuŝas la motivoj de la intereso, kiun oni povas havi, ekkoni la cirkonstancojn de lia morto. Se li ja forte deziras ilin malkaŝi, li ĝin faras mem, ĉu per iu mediumo, ĉu per vidaĵoj aŭ aperaĵoj, kaj tiam li povas doni la plej precizajn sciigojn; se ne, iu trompema Spirito povas tute bone mistifiki siajn demandantojn kaj amuziĝi, kondukante ilin al senutilaj esploroj.

Ofte okazas, ke la malapero de iu homo, kies morton oni ne povas oficiale konstati, alportas embarasojn al la familiaj aferoj. Nur en tiaj tre maloftaj kaj esceptaj okazoj mi vidis la Spiritojn montri la ĝustan vojon, plenumante la petojn, al ili faritajn. Se ili volus, ili sendube povus tion fari, sed tio ofte ne estas permesita al ili, se tiuj embarasoj estas provoj por tiuj homoj, kiujn interesus formovi tiujn barojn.

Estus do luli sin en ia ĥimera espero per ĉi tiu rimedo strebi al la ekposedo de heredaĵoj, ĉar ties pozitiva flanko estas la mono, kiun oni por tio elspezas.

Ne mankas Spiritoj pretaj flati similajn esperojn kaj farantaj al si nenian skrupulon instigi la homojn al klopodoj, el kiuj oni ofte estas tre feliĉa saviĝi interŝanĝe kontraŭ iom da ridindeco.

## 293. Demandoj pri la sano

XXIV. Ĉu la Spiritoj povas doni konsilojn por la sano?

"La sano estas kondiĉo necesa por la laboro, kiun oni devas plenumi sur la Tero; tial la Spiritoj sin volonte okupas pri ĝi; sed, ĉar inter ili ekzistas kleruloj kaj malkleruloj, ne estas konsilinde por tio, same kiel por ĉio alia, sin turni al tiu unue veninta."

XXV. Ĉu, turnante sin al la Spirito de iu medicina famulo, oni estas pli certa pri la ricevo de bona konsilo?

"La surteraj famuloj ne estas neeraremaj kaj ofte portas sistemajn ideojn, ne ĉiam ĝustajn, el kiuj la morto ilin ne tuj liberigas. La surtera scio estas preskaŭ nenio kompare kun la scio ĉiela. Nur la Superaj Spiritoj posedas ĉi tiun lastan scion; ne havante nomojn konatajn al vi, ili povas scii pri ĉio multe pli ol viaj scienculoj. Ne nur la scio faras superaj la Spiritojn, kaj vi forte mirus pri la rango, kiun iuj scienculoj okupas ĉe ni. La Spirito de iu scienculo povas do ne scii pli multe ol tiam, kiam li troviĝis sur la Tero, se li ne progresis kiel Spirito."

XXVI. Ĉu scienculo, fariĝinte Spirito, rekonas siajn sciencajn erarojn?

"Se li atingis gradon sufiĉe altan, por esti liberiĝinta el sia vantamo kaj kompreni, ke lia disvolviĝo ne estas kompleta, li ilin rekonas kaj humile konfesas; sed se li ankoraŭ ne estas sufiĉe libera el la materio, tiam li povas konservi kelkajn el la antaŭjuĝoj, pri kiuj li estis konvinkita sur la Tero."

XXVII. Ĉu iu kuracisto, elvokante tiujn siajn klientojn, kiuj mortis, povus ricevi de ili klarigojn pri la kaŭzo de ilia morto, pri la eraroj, kiujn li eble faris dum la kuracado, kaj tiel havigi al si iom pli da sperto?

"Jes, li povas, kaj tio estus por li utila, precipe tiam,

se li petus la helpon de instruitaj Spiritoj, kiuj anstataŭus la mankon de scioj de iuj malsanuloj. Sed por tio li devas fari tiun studadon serioze, konstante, por humana celo, sed ne kiel rimedon por senpene akiri scion kaj riĉecon.”

### 294. Demandoj pri la inventoj kaj eltrovoj

XXVIII. Ĉu la Spiritoj povas gvidi la homojn en la sciencaj esploroj kaj en la eltrovoj?

“La scienco estas verko de la genio; ĝi devas esti akirita nur per laboro, ĉar nur per laboro la homo iras antaŭen sur sia vojo. Kian meriton li havus, se sufiĉus al li demandi la Spiritojn, por ĉion scii? Por ĉi tiu prezo ĉiu ajn stultulo povus turniĝi en scienculon. Same estas kun la inventoj kaj eltrovoj en la industrio. Ankoraŭ unu konsidero: ĉiu afero devas veni en sia tempo kaj kiam la ideoj estas maturaj por ĝin ricevi. Se la homo havus tiun povon, li renversus la ordon de la aferoj, aperigante la fruktojn antaŭ la ĝusta sezono.

“Dio diris al la homo: “En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon” (*): admirinda figuro, kiu pentras la kondiĉon de la homo en ĉi tiu mondo. La homo devas progresi en ĉio per la penado de la laboro; se oni donas al li ĉion preta, por kio servus lia inteligento? Li estus kvazaŭ lernejano, kies taskon farus alia.”

XXIX. Ĉu la scienculo kaj la inventisto neniam estas helpataj de la Spiritoj en siaj esploroj?

“Ho, ĉi tio estas ja io tute alia. Kiam venis la tempo de ia eltrovo, la Spiritoj, komisiitaj por direkti ĝian iradon, serĉas la homon kapablan por konduki ĝin al sukceso kaj inspiras al li necesajn ideojn, sed, tiel, ke li havu la tutan meriton de sia laboro, ĉar tiujn ideojn li devas mem ellabori kaj konkretigi. Tiel estas kun ĉiuj grandaj laboroj de la homa inteligento. La Spiritoj lasas ĉiun homon en lia sfero; el tiu, kiu taŭgas nur por plugeti la teron, ili ne farus depongardanton de la se-

(*) Genezo, 3: 19. — *La Trad.*

kretoj de Dio; sed ili scias preni el la senfameco la homon kapablan por helpi la plenumon de iliaj planoj. Ne lasu vin do treni de scivolemo aŭ ambicio sur vojo, kiu ne estas la celo de Spiritismo kaj kiu finiĝus por vi per la plej ridindaj mistifikoj."

*Rimarko.* La pli profunda konado de Spiritismo kvietigis la febron de la inventoj, kiujn oni komence flatis al si fari per ĉi tiu rimedo. Oni eĉ iris ĝis la ekstremo peti la Spiritojn pri receptoj por tinkturi kaj elkreskigi la harojn, por kuraci kalojn sur la piedoj k. t. p. Mi vidis multe da homoj, kiuj kredis, ke ili per tio estas jam riĉaj, sed kiuj venis nur al pli aŭ malpli ridindaj procedoj. Tio sama okazas tiam, kiam oni volas kun la helpo de la Spiritoj penetri la misteron de la origino de ĉiuj ekzistaĵoj; pri ĉi tiuj aferoj iuj Spiritoj havas sian sistemon, kiu ofte ne valoras pli, ol tiu de la homoj, kaj pri kiu estas prudente ĝin ricevi nur kun la plej granda diskreteco.

## 295. Demandoj pri kaŝitaj trezoroj

XXX. Ĉu la Spiritoj povas fari, ke oni eltrovu trezorojn?

"La Superaj Spiritoj sin ne okupas pri tiaj aferoj, sed la Spiritoj mokemaj ofte indikas neekzistantajn trezorojn aŭ ankaŭ povas vidigi iun trezoron en unu loko, dum ĝi kuŝas en alia rekte kontraŭa; ĉi tio estas ja utila, nome por montri, ke la vera riĉeco venas el laboro. Se la Providenco destinas kaŝitajn riĉaĵojn por iu homo, ĉi tiu ilin trovos nature; alie, ne."

XXXI. Kion pensi pri la kredo al Spiritoj, gardantaj kaŝitajn trezorojn?

"La Spiritoj, ankoraŭ ne tute liberiĝintaj el la materio, alkroĉiĝas al la aĵoj. Avaruloj, kiuj kaŝis siajn trezorojn, povas ilin plu vigle observi kaj gardi post sia morto; kaj la perplekseco, kiun ili spertas, vidante, ke oni forprenas ilian riĉaĵon, estas unu el iliaj punoj, ĝis ili komprenos, ke tiuj trezoroj estas jam senutilaj por ili. Ekzistas ankaŭ Spiritoj de la Tero, komisiitaj por direkti ties internajn transformiĝojn kaj el kiuj, kiel alegorion, oni faris la gardantojn de la naturaj riĉaĵoj."

*Rimarko*. La demando pri la kaŝitaj trezoroj troviĝas en tia sama kategorio, kiel tiu pri la nekonataj heredaĵoj; tre malsaĝa estus tiu, kiu kalkulus je la supozataj malkaŝoj, kiujn povas fari al li la ŝercemuloj de la nevidebla mondo. Mi jam diris, ke kiam la Spiritoj volas aŭ povas fari tiajn malkaŝojn, ili agas propramove, kaj por tio ili ne bezonas mediumojn. Jen pri tio unu ekzemplo:

Unu sinjorino, post tridek jaroj da geedza vivo, vidviniĝis kaj jen ektroviĝis en la danĝero esti baldaŭ elpelita el sia hejmo, sen iaj rimedoj, de siaj vicfiloj, al kiuj ŝi estis anstataŭinta la patrinon. Ŝia malespero jam atingis la supron, kiam unu vesperon ŝia edzo ekaperis al ŝi kaj diris, ke ŝi iru kun li en lian kabineton; tie li montris al ŝi sian paperŝrankon, kiu ankoraŭ estis sub la leĝaj sigeloj, kaj per efiko de duobla vidado li igis ŝin vidi ĝian internon; li montris al ŝi sekretotirkeston, kiun ŝi ne konis kaj kies mekanismon li instruis al ŝi, kaj diris: "Mi antaŭvidis, kio nun okazas, kaj volis asekuri vian sorton; en ĉi tiu tirkesto kuŝas miaj lastaj disponoj; mi transdonas al vi la fruktuzon de ĉi tiu domo kaj rento de...". Tuj poste li malaperis. En la tago, kiam la sigeloj estis forprenitaj, neniu povis malfermi tiun tirkeston; la sinjorino tiam sciigis, kio al ŝi okazis. Ŝi malfermis ĝin laŭ la instruo de sia edzo kaj trovis la testamenton, kiel li informis al ŝi.

## 296. Demandoj pri la aliaj mondoj

XXXII. Kiom da konfido oni povas havi al la priskriboj, kiujn la Spiritoj faras pri la diversaj mondoj?

"Tio dependas de la grado da **efektiva** progreso de la Spiritoj, kiuj faras tiujn priskribojn, ĉar vi ja komprenas, ke ordinaraj Spiritoj estas tiel nekapablaj por informi vin pri tio, kiel, ĉe vi, iu malklerulo por priskribi ĉiujn landojn de la Tero. Vi ofte prezentas pri tiuj mondoj sciencajn demandojn, kiujn tiuj Spiritoj ne povoscias solvi. Se ili estas sinceraj, ili parolas pri tiuj mondoj laŭ siaj personaj ideoj; se frivolaj Spiritoj, ili amuziĝas farante ekstravagancajn kaj fantaziajn priskribojn, des pli, ĉar tiuj Spiritoj, ne malpli provizitaj per imagemo en sia nuna vagado, ol iam sur la Tero, ĉerpas el tiu kapablo la rakonton pri multe da aferoj, kiuj havas nenion realan. Vi tamen ne pensu, ke estas tute ne eble ekhavi kelkajn klarigojn pri tiuj mondoj; la bonaj Spi-

ritoj ja plezuras priskribante iliajn loĝantojn, kiel instruon destinitan por via pliboniĝo, kaj admonas vin iri la vojon, kiu povas konduki vin al tiuj mondoj. Tio estas rimedo, por fiksi viajn ideojn pri la estonteco kaj por ne restigi vin en necerteco."

— Kiel oni povas kontroli la ĝustecon de tiuj priskriboj?

"La plej bona kontrolo estas la akordo, kiu povas ekzisti inter ili; sed memoru, ke ili celas vian moralan pliboniĝon kaj ke, sekve, vi povas esti la plej bone informataj, ne pri la fizika aŭ geologia mieno de tiuj mondoj, sed ja pri la morala stato de iliaj loĝantoj. Ĉe viaj nunaj scioj vi efektive ne povus tion kompreni; ĉi tiu studado neniom utilus al via progresado sur la Tero; ĝin vi havos ĉiun eblecon fari, kiam vi tie troviĝos."

*Rimarko.* La demandoj pri la fizika konsisto kaj pri la elementoj de la astroj trovas lokon en la kadro de la sciencaj esploroj, pri kiuj la Spiritoj ne devas ŝparigi al ni la klopodon ilin fari; alie iu astronomo trovus tre oportune peti la Spiritojn fari la kalkulojn anstataŭ li, kion li sendube sin detenus konfesi. Se la Spiritoj povus, per ia malkaŝo, ŝparigi al ni la klopodojn por iu eltrovo, ili probable tion farus favore al iu scienculo sufiĉe modesta, por sincere rekoni ĝian originon, prefere ol por la profito de la fieruloj, kiuj ilin forneas kaj al kies memestimo ili, kontraŭe, ofte ŝparas disreviĝojn.

———————

ĈAPITRO XXVII

# PRI LA MALAKORDOJ KAJ PRI LA MISTIFIKOJ

## Pri la malakordoj

**297.** La kontraŭuloj de Spiritismo ne ĉesas opozicii al ĝi, dirante, ke ĝiaj adeptoj ne akordas inter si, ke ili ne havas la samajn kredojn; unuvorte, ke ili sin reciproke kontraŭdiras. Se, ili argumentas, la instruado estas donata al vi de la Spiritoj, kiel do ĝi ne estas unu sama? Nur serioza kaj profunda studado de ĉi tiu scienco povas redukti tian argumenton al ĝia ĝusta valoro.

Mi rapidu driri, antaŭ ĉio, ke tiuj malakordoj kiujn iuj homoj parade elmontras, ordinare estas pli ŝajnaj, ol realaj, ke ofte ili kuŝas prefere sur la supraĵo, ol sur la fundo de la aferoj, kaj ke sekve ili estas neniel gravaj. Tiuj malakordoj fluas el du fontoj, nome la homoj kaj la Spiritoj.

**298.** La malakordoj el homa fonto estis sufiĉe klarigitaj en la ĉapitro **Pri la sistemoj**, § 36, al kiu mi faras referencon. Ĉiu certe komprenas, ke en la komenco, kiam la observoj estis ankoraŭ nekompletaj, aperis opinioj, ne akordantaj pri la kaŭzoj kaj sekvoj de la spiritismaj fenomenoj, opinioj, kies tri kvaronoj jam falis ĉe pli serioza kaj profunda studado. Ekster malmulte da esceptoj kaj ne konsiderante iajn kelke da homoj, kiuj ne facile rezignas la ideojn, kiujn ili karesadis aŭ naskis, oni povas diri, ke hodiaŭ ekzistas konsento inter la grandega plimulto el la spiritistoj, almenaŭ rilate la ĝenerelajn principojn, krom, eble, pri kelke da sensignifaj detaloj.

**299.** Por kompreni la kaŭzon kaj la valoron de la

malakordoj, venantaj de la Spiritoj, oni devas identiĝi kun la naturo de la nevidebla mondo kaj esti studinta ĉiujn flankojn de tiu mondo. Ĉe la unua rigardo povas ŝajni mirige, ke la Spiritoj ne pensas ĉiuj same, sed tio povas surprizi neniun, kiu scias la senliman nombron de la ŝtupoj, kiujn ili devas iradi, antaŭ ol atingi la supron de la ŝtuparo. Supozi, ke ili egale taksas la aferojn, estus imagi, ke ili ĉiuj staras sur unu sama nivelo; pensi, ke ili ĉiuj devas vidi ĝuste, estus akcepti, ke ili ĉiuj venis al la perfekteco, kio ne estas, kio ja ne povas esti, se nur oni konsideras, ke ili estas nenio alia ol la homaro, demetinta sian korpan envolvaĵon. Ĉar Spiritoj, apartenantaj al ĉiuj kategorioj, povas manifestiĝi, tial sekvas, ke iliaj komunikaĵoj portas la stampon de ilia senklereco aŭ klereco, de ilia morala malsupereco aŭ supereco. Konduki al la distingo inter tio vera kaj tio malvera, inter tio bona kaj tio malbona, jen la celo de la instruoj, kiujn mi donis.

Oni ne forgesu, ke inter la Spiritoj, kiel inter la homoj, ekzistas pseŭdo-kleraj kaj duonkleraj, fieraj, tromemfidaj kaj sistememaj. Ĉar nur la Superaj Spiritoj kapablas ĉion koni, tial por la ceteraj, same kiel por ni, ekzistas misteroj, kiujn ili klarigas laŭ sia maniero, laŭ siaj ideoj, kaj pri kiuj ili povas fari al si pli aŭ malpli ĝustan opinion, kiun ili rigardas kiel aferon de memestimo, klopodante por ĝin starigi super ĉiuj aliaj, kaj kiun ili amas ripeti en siaj komunikaĵoj. La eraro venas de tio, ke kelkaj el iliaj interpretantoj tro ventanime alprenis opiniojn kontraŭajn al la natura saĝo kaj tiujn opiniojn disvastigis sub sia respondeco. La malakordoj, venantaj de la Spiritoj, havas do nenian alian kaŭzon, ol la malsamecon de inteligento, de scioj, de juĝokapablo kaj de moraleco de iuj Spiritoj, ankoraŭ nekapablaj ĉion koni kaj ĉion kompreni. (Vd. en **La Libro de la Spiritoj**: “Enkonduko”, § XIII; “Konkludo”, § IX.)

**300.** Kion do helpas la instruado de la Spiritoj, iuj diros, se ĝi he havigas al ni pli da certeco, ol la instruado de la homoj? La respondo pri ĉi tiu demando estas facila. Ni ne kun sama konfido ricevas la instruadon

de ĉiuj homoj, kaj inter du doktrinoj ni preferas tiun, kies aŭtoro ŝajnas al ni la pli klarvida, la pli kompetenta, la pli saĝa, la malpli influebla por la pasioj; same oni agu kun la Spiritoj. Se inter ili ekzistas tiaj, ne staranțaj super la homaro, multe da aliaj ĝin superas, kaj ĉi tiuj lastaj povas doni al ni instruojn, kiujn ni vane serĉus ĉe la plej instruitaj homoj. Distingi inter tiu elito kaj la amaso de la malsuperaj Spiritoj, jen, pri kio oni devas diligenti, se oni volas instruiĝi, kaj ĝuste al ĉi tiu distingo kondukas la ĝisfunda konado de Spiritismo. Sed tiuj instruoj estas ja ĉirkaŭlimitaj, kaj se ne estas konsentite al la Spiritoj scii ĉion, des pli prave tiel devas esti kun la homoj. Ekzistas do aferoj, pri kiuj oni ilin vane demandus, ĉu tial, ke estas al ili malpermesite malkaŝi tiajn aferojn, ĉu tial, ĉar ili mem ĉi tiujn ne scias kaj pri kiuj ili povas doni nur sian personan opinion; nu, tiujn personajn opiniojn la fieraj Spiritoj prezentas kvazaŭ absolutajn veraĵojn. Precipe pri tio, kio devas resti kaŝita, kiel la estonteco kaj la origino de la ekzistaĵoj, ili plej obstine insistas, por ŝajnigi posedon de la sekretoj de Dio; tial ĝuste pri ĉi tiuj punktoj oni trovas la plej grandan nombron da malakordoj. (Vd. la antaŭan ĉapitron.)

**301.** Jen la respondoj, kiujn la Spiritoj donis al la sekvantaj demandoj rilataj al la malakordoj:

I. Ĉu unu sama Spirito, komunikiĝante en du grupoj, povas pri unu sama objekto doni al ili interkontraŭajn respondojn?

"Se la opinioj kaj pensoj en tiuj grupoj estas malsamaj, tiam la respondo povas veni kripligita, ĉar ili troviĝas sub la influo de malsamaj aroj da Spiritoj: la respondoj ne estas do interkontraŭaj, sed memkontraŭa la maniero respondi."

II. Oni komprenas, ke iu respondo povas esti kripligita; sed kiam la kvalitoj de la mediumo esceptas ĉiun ideon pri ia malbona influo, kiel do Superaj Spiritoj uzas esprimojn malsamajn kaj malakordajn pri unu sama objekto antaŭ tute seriozaj homoj?

"La efektive superaj Spiritoj sin mem neniam kon-

traŭdiras, kaj ilia parolo estas ĉiam sama **antaŭ samaj homoj**. Ĝi povas esti alia laŭ la homoj kaj la lokoj; sed oni atentu, ke la malakordo estas ofte nur ŝajna: ĝi kuŝas prefere en la vortoj, ol en la penso, ĉar, pesante la aferon, oni vidas, ke la fundamenta ideo estas unu sama. Krom tio unu sama Spirito povas respondi malsame pri la sama temo, laŭ la grado da perfekteco de la elvokintoj, ĉar ne ĉiam estas konsilinde, ke ĉiuj ricevu la saman respondon, dank'al la neegaleco de ilia progreso. Ĝi estas ĝuste tiel, kiel se iu infano kaj iu klerulo farus al vi unu saman demandon: vi sendube respondus al la unua kaj al la dua en tia maniero, ke ili komprenus kaj estus kontentaj; kvankam vorte ne samaj, la respondoj tamen en la fundo estus unu sama.

III. Por kia celo seriozaj Spiritoj ŝajnas kreditigi ĉe unuj homoj ideojn kaj eĉ antaŭjuĝojn, kiujn ili diskreditas ĉe aliaj?

"Estas necese, ke ni fariĝu kompreneblaj. Se iu homo havas neŝanceleblan konvinkon pri ia doktrino, eĉ se malvera, estas necese, ke ni deturnu lin de tiu konvinko, sed iom post iom; tial ni ofte uzas **liajn esprimojn** kaj ŝajnigas dividi liajn ideojn, por ke li subite ne konfuziĝu kaj ne ĉesu instruiĝi ĉe ni.

"Cetere ne estas bone tro abrupte vundi la antaŭjuĝojn; ĉi tio estas la plej bona rimedo ne esti aŭskultata; tial la Spiritoj ofte parolas laŭ la opinio de siaj aŭdantoj, por ilin iom post iom konduki al la vero. Ili alkonformigas sian parolon al la homoj, kiel vi mem agas, se vi estas iom lerta oratoro; tial ili ne parolas al ĉino aŭ al mahometano same, kiel al franco aŭ kristano, ĉar ili estus tute certaj, ke ili estus repuŝitaj.

"Oni ne konsideru malakordo tion, kio ofte estas nur parto de la ellaborado de la vero. Ĉiuj Spiritoj havas sian taskon, difinitan de Dio; ili ĝin plenumas laŭ la kondiĉoj, kiujn ili opinias alkonformaj al la bono de tiuj, kiuj ricevas iliajn komunikaĵojn."

IV. La malakordoj, eĉ se ŝajnaj, povas ĵeti dubojn en la Spiriton de iuj homoj; kian kontrolon oni povas fari, por ekkoni la veron?

"Por distingi inter eraro kaj veraĵo, oni devas funde

esplori tiujn respondojn kaj pri ili longe kaj serioze meditadi; ĝi estas tuta studado, kiun oni devas fari. Por tio tempo estas necesa, kiel por la studado de ĉiuj aferoj.

"Studu, komparu, funde esploru; ni senĉese diras al vi, ke la konado de la vero kostas ĉi tiun prezon. Kiel vi volas veni al la vero, se vi signifoklarigas ĉion laŭ viaj malvastaj ideoj, kiujn vi prenas kiel grandajn ideojn? Sed ne malproksima estas la tago, kiam la instruado de la Spiritoj estos ĉie unuforma, kiel pri la ĉefaj aferoj, tiel ankaŭ pri la detaloj. Ilia misio estas detrui la eraron, sed tio nur grade povas veni."

V. Ekzistas homoj, kiuj havas nek la tempon, nek la talenton necesajn por serioza kaj ĝisfunda studado kaj kiuj sen ia ekzameno akceptas ĉion, kion oni instruas al ili. Ĉu ne estas por ili malutile kreditigi erarojn?

"Ke ili faru bonon kaj ne faru malbonon estas la plej ĉefa afero; por ĉi tio ne ekzistas du doktrinoj. Bono estas ĉiam bono, ĉu vi faru ĝin en la nomo de Alaho, ĉu de Javeh, ĉar ekzistas nur unu sola Dio por la Universo."

VI. Kiel Spiritoj, kiuj ŝajnas progresintaj pri inteligento, povas havi evidente malverajn ideojn pri iaj aferoj?

"Ili havas sian propran doktrinon. Tiuj, kiuj ne estas sufiĉe progresintaj, sed kiuj pensas, ke ili tiaj estas, prenas siajn ideojn por la vero: tute same kiel inter vi."

VII. Kion pensi pri la doktrinoj, laŭ kiuj nur unu sola Spirito povus komunikiĝi, kaj ke tiu unu Spirito estas Dio aŭ Jesuo?

"La Spirito, kiu tion instruas, estas Spirito, kiu volas superpotenci kaj tial li penas kredigi, ke li estas la sola, kiu povas komunikiĝi; sed tiu malfeliĉa, kiu kuraĝas alpreni la nomon de Dio, kare elpagos sian fierecon. Koncerne tiujn doktrinojn, ili refutas sin mem, ĉar ili kontraŭas la plej bone konstatitajn faktojn. Nenian seriozan ekzamenon ili meritas, ĉar radikojn ili ne havas.

"La prudento diras al vi, ke bono fluas el bona fonto kaj malbono el fonto malbona; kiel do vi volus, ke bona arbo donu malbonajn fruktojn? Ĉu vi iam ŝiris vinberojn el pomarbo? La malsameco de la komunikaĵoj est-

as la plej evidenta pruvo pri la diverseco de ilia origino. Cetere tiuj Spiritoj, kiuj pretendas, ke nur ili povas komunikiĝi, forgesas diri, kial la ceteraj ne povus tion fari. Ilia pretendo estas la neigo de tio, kion Spiritismo havas plej belan kaj plej konsolan: la rilatoj inter la mondo videbla kaj la mondo nevidebla, inter la homoj kaj la estuloj, kiuj estas por ili karaj kaj kiuj do estus por ili senrevene perditaj. Tiuj rilatoj estas tio, kio alkonformigas la homon al lia estonteco, tio, kio disigas lin de la materia mondo; forigi tiujn rilatojn estas redronigi lin en la dubon, kiu estas lia turmento, estas nutri lian egoismon. Zorge esplorante la doktrinon de tiaj Spiritoj, oni en ĝi sur ĉiu paŝo konstatas nepravigeblajn malakordojn, stampon de ilia nesciado pri la plej evidentaj aferoj kaj sekve sendubajn signojn de ilia malsupereco.

La SPIRITO DE VERO."

VIII. El ĉiuj malakordoj, kiujn oni rimarkas en la komunikaĵoj de la Spiritoj, unu el la plej frapantaj estas tiu rilata al la reenkarniĝo. Se la reenkarniĝo estas neceso de la vivo de Spirito, kial do ne ĉiuj Spiritoj ĝin instruas?

"Ĉu vi do ne scias, ke ekzistas Spiritoj, kies ideoj troviĝas ankoraŭ enfermitaj en la nuneco, tute same, kiel estas kun multe da homoj sur la Tero? Ili pensas, ke ilia nuna stato devas daŭri ĉiam; ili ne vidas trans la rondon de sia perceptado kaj ne zorgas pri tio, de kie ili venis kaj kien ili iras, kaj tamen ili devas sperti la agadon de la leĝo de neceso. La reenkarniĝo estas por ili neceso, pri kiu ili pensas nur en la momento, kiam ĝi venas. Ili ja scias, ke la Spirito progresas, sed kiamaniere? jen problemo por ili. Sekve, se vi ilin demandos pri tio, ili parolos pri la sep ĉieloj, kuŝantaj unu super alia kvazaŭ etaĝoj; kelkaj eĉ parolos al vi pri ia fajra sfero, pri ia sfero el steloj, ankaŭ pri la urbo de la floroj, pri la urbo de la elektitaj animoj."

IX. Mi konceptas, ke la malmulte progresintaj Spiritoj povas ne kompreni ĉi tiun demandon; sed kiel do Spiritoj, kies morala kaj intelekta malsupereco estas al ĉiuj konata, propramove parolas pri siaj diversaj ekzist-

adoj kaj pri sia deziro reenkarniĝi, por elaĉeti sian pasintecon?

"En la mondo de la Spiritoj okazas aferoj, kiujn por vi estas tre malfacile kompreni. Ĉu en via mondo ne ekzistas homoj, apenaŭ sciantaj pri unuj aferoj, sed havantaj klaran kapon pri aliaj; tiaj homoj kun pli da prudento, ol da instruo, kaj aliaj pli spritaj ol juĝokapablaj? Ĉu vi ne scias ankaŭ, ke iuj Spiritoj plezuras tenante la homojn en nesciado, tamen tute ŝajnigante, ke ili tiujn instruas, kaj kiuj profitas el la facileco, kun kiu oni fidas iliajn parolojn? Ili povas allogi tiujn, kiuj ne iras ĝis la fundo de la aferoj, sed kiam oni ilin alpremas al la muro per rezonado, tiam ili nelonge tenadas sian rolon.

"Oni krom tio konsideru la singardon, kun kiu la Spiritoj ordinare proklamas la veron: tro viva kaj tro subita lumo blindigas, anstataŭ prilumi. Ili do povas, en iuj okazoj, opinii utile ĝin disverŝi nur grade, laŭ la tempoj, la lokoj kaj la homoj. Moseo ne instruis ĉion, kion instruis la Kristo kaj la Kristo mem diris multe da aferoj, kies kompreno estis antaŭdestinita por la venontaj generacioj. Vi parolas pri la reenkarniĝo, kaj miras, ke ĉi tiu principo ne estas instruata en iuj landoj; sed memoru, ke en iu lando, kie reĝas la antaŭjuĝo pri haŭtkoloro, kie la sklaveco estas enradikiĝinta en ĝiaj moroj, oni repuŝus Spiritismon pro ĉi tio sola, ke ĉi tiu Doktrino proklamis la reenkarniĝon, ĉar la ideo, ke iu, kiu nun estas mastro, povus fariĝi sklavo, kaj inverse ŝajnus monstra. Ĉu ne estus pli bone akceptigi unue la ĝeneralan principon, por poste tiri ĝiajn konsekvencojn? Ho homoj, kiel tro proksime vi vidas, ke vi ne povas taksi la planojn de Dio! Sciu, ke nenio okazas sen Lia permeso kaj sen ia celo, kiun vi ofte ne kapablas pentri. Mi diris al vi, ke unueco fariĝos en la kredo al la Spiritoj; estu certa, ke ĝi fariĝos kaj ke la malkonsentoj, jam nun malpli profundaj, iom post iom forviŝiĝos, laŭgrade kiel la homoj instruiĝos, kaj ke ili tute malaperos, ĉar tia estas la volo de Dio, kiun la eraro ne povas superforti.

La SPIRITO DE VERO."

X. Ĉu la eraraj doktrinoj, kiujn iuj Spiritoj povas instrui, ne havas kiel efikon malfruigi la progreson de la vera sciado?

"Vi volus ekhavi ĉion senpene; sciu do, ke ekzistas nenia kampo, kie ne kreskus fiherbo, kiun la plugisto devas elsarki. Tiaj eraraj doktrinoj estas frukto de la malsupereco de via mondo; se la homoj estus perfektaj, ili do akceptus nur tion veran; la eraroj similas la falsajn ŝtonojn, kiujn nur iu sperta okulo scias distingi de la veraj. Vi devas do ricevi instruadon, por distingi tion veran de tio malvera; nu, la malveraj doktrinoj havas la utilon ekzercadi vin en la distingo inter la vero kaj la eraro."

— Ĉu tiuj, kiuj sekvas la eraron, ne malfruiĝas en sia progresado?

"Se ili sekvas la eraron, ili do ne estas sufiĉe progresintaj, por kompreni la veron."

**302.** Atendante ĝis fariĝos unueco, ĉiu pensas, ke li havas la veron kun si kaj asertas, ke vera estas nur tio, kion li scias, iluzio, kiun la trompemaj Spiritoj ja subtenas; sur kio do homo senpartia kaj sen kaŝita intereso povas sin bazi, por fari al si ian opinion pri la afero?

"Nenia nubo ombras la plej puran lumon; la plej valora diamanto estas tiu senmakula; juĝu do la Spiritojn laŭ la pureco de iliaj instruoj. Unueco fariĝos sur la flanko, kie bono estis neniam miksita kun malbono; sur ĉi tiu flanko la homoj konsentos inter si sub la potenco de la faktoj, ĉar ili konvinkiĝos, ke la vero troviĝas ĝuste tie. Rimarku ankaŭ, ke la fundamentaj principoj estas ĉie la samaj kaj devas kunigi vin en unu komunan penson: la amon al Dio kaj la faradon de bono. Kia ajn do la maniero de progresado, kian oni imagas pri la animoj, la fina celpunkto estas unu kaj la rimedo, por ĝin trafi, estas ankaŭ unu: fari bonon; nu, ne ekzistas du manieroj fari bonon. Se leviĝas plej ĉefaj malkonsentoj rilate al la principo mem de la Doktrino, vi disponas regulon certan por ilin taksi, nome: la plej bona doktrino estas tiu, kiu plej bone kontentigas la koron

kaj la prudenton, tiu, kiu havas la plej multajn elementojn, por konduki la homojn al bono: tiu, mi certigas vin, la venkonta doktrino.

La SPIRITO DE VERO."

*Rimarko.* La malakordoj, konstatitaj en la komunikaĵoj de la Spiritoj, povas origini el jenaj kaŭzoj: el la neklereco de iuj Spiritoj; el la trompemo de malsuperaj Spiritoj, kiuj el petolemo aŭ malicemo diras la malon de tio, kion ie diris la Spirito, kies nomon ili uzurpas; el la volo de la Spirito mem, kiu parolas laŭ la tempoj, la lokoj kaj la homoj, kaj kiu povas opinii utile ne ĉion diri al ĉiuj; el la nesufiĉeco de la homa lingvo, por esprimi la aferojn de la senkorpa mondo; el la nesufiĉeco de la komunikrimedoj, kiuj ne ĉiam ebligas al la Spirito konigi sian tutan penson; laste, el la signifo, kiun ĉiu povas atribui al iu vorto aŭ klarigo, laŭ siaj ideoj, siaj antaŭjuĝoj aŭ la vidpunkto, laŭ kiu li rigardas la aferon. Nur la studado, la observado, la sperto kaj la ofero de ĉiu sento de memestimo povas instrui la homon distingi inter si tiujn diversajn nuancojn.

## Pri la mistifikoj

**303.** Se estas malagrable esti trompata, des pli esti mistifikata; sed la mistifikado estas unu el la malbonaĵoj, kontraŭ kiu oni la plej facile sin antaŭgardas. La rimedoj, por fiaskigi la ruzaĵojn de la trompemaj Spiritoj elfluas el ĉiuj antaŭaj instruoj; tial pri la mistifikado mi diros malmulte. Jen la respondoj de la Spiritoj pri ĉi tiu afero:

I. La mistifikoj estas unu el la plej malagrablaj rifoj de la praktika Spiritismo; ĉu ekzistas ia rimedo, por sin antaŭgardi kontraŭ ili?

"Ŝajnas al mi, ke vi povas mem trovi la respondon en ĉio, kion oni instruas al vi. Jes, certe, por tio ekzistas simpla rimedo, nome peti Spiritismon nur pri tio, kion ĝi povas kaj devas doni al vi. Ĝia celo estas la morala plibonigo de la homaro; tiel longe, kiel vi ne forkliniĝas de tiu celo, vi neniam estos trompataj, ĉar ne ekzistas du manieroj, por kompreni la veran moralon, tiun, kiun povas akcepti ĉiu saĝa homo.

"La Spiritoj venas vin instrui kaj gvidi sur la vojo

de bono, sed ne sur la vojo de la honoraĵoj kaj de la riĉeco, aŭ por kontentigi viajn mizerajn pasiojn. Se oni neniam petus de ili ian vanaĵon aŭ ion ekster la kadro de iliaj fakoj, oni donus nenian oportunan okazon al la trompemaj Spiritoj. El ĉi tio vi devas konkludi, ke kiu estas mistifikata, tiu ricevas nenion alian ol tion, kion li meritas.

"La rolo de la Spiritoj estas ne tio, informi vin pri la aferoj de ĉi tiu mondo, sed vin sekure gvidi pri tio, kio povas utili al vi por la transtomba. Kiam ili parolas pri la ĉi tieaj aferoj, tiel estas, ĉar ili ĝin opinias necesa, sed ne kontentigante ian peton de vi. Se vi vidas en la Spiritoj la anstataŭantojn de la divenistoj kaj sorĉistoj, tiam vi estos ja trompataj.

"Se al la homoj sufiĉus turni sin al la Spiritoj, por ĉion scii, ili jam ne havus sian liberan volon kaj deturniĝus de la vojo, difinita de Dio al la homaro. La homo devas agadi per si mem; Dio sendas la Spiritojn, ne por ebenigi al la homo la materialan vojon de la vivo, sed por prepari al tiu la vojon de la estonteco."

— Sed kelkaj homoj demandas nenion, tamen ili estas malnoble trompataj de Spiritoj, kiuj venas memvole, ne alvokite.

"Ili ja demandas nenion, tamen konsente aŭdas, aferoj, kiuj ambaŭ estas unu. Se ili kun rezervo kaj malkonfido akceptus ĉion, kio dekliniĝas de la plej ĉefa objekto de Spiritismo, la frivolaj Spiritoj ne tiel facile prenus ilin por iaj stultuloj."

II. Kial Dio permesas, ke sinceraj homoj, kiuj bonafide akceptas Spiritismon, estu mistifikataj? Ĉu tio ne estas tiel malutile, ke ĝi povus ŝanceli ilian kredon?

"Se tio ŝancelus ilian kredon, ilia fido ne estus do tre solida. Kiuj rezignus Spiritismon pro simpla desapontiĝo, tiuj montrus, ke ili ĝin ne komprenas kaj ne inklinas al ĝia serioza parto. Dio permesas la mistifikojn, por elprovi la persistemon de la veraj adeptoj kaj puni tiujn, kiuj el Spiritismo faras ian amuzilon.

La SPIRITO DE VERO."

*Rimarko*. La ruzeco de la mistifikemaj Spiritoj iafoje translimas ĉion, kion oni povas nur imagi. La arto, kun kiu ili teksas siajn insidojn kaj kombinas la rimedojn por persvadi, estus io kurioza, se la afero estus ĉiam nur pri senkulpaj petolaĵoj; sed tiuj mistifikoj povas porti malagrablajn sekvojn al homoj, kiuj sin ne tenas garde kontraŭ ili. Mi estas tre feliĉa, ke mi povis *ĝustatempe* malfermi la okulojn al pluraj homoj, kiuj bonvolis peti mian opinion, kaj ŝparigi al ili ridindajn kaj kompromitantajn agojn. El la rimedoj, uzataj de tiuj Spiritoj, oni devas loki sur la unua vico, kiel la plej oftajn, tiujn, kiuj celas tenti la profitamon, ekzemple konigon pri supozataj kaŝitaj trezoroj, la anoncon de heredoj aŭ aliajn fontojn de riĉeco. Oni krom tio rigardu kiel suspektindajn precipe la antaŭdirojn por fiksa tempo kaj ankaŭ ĉiajn precizajn indikojn rilatajn al materialaj interesoj; deteni sin de ĉiu paŝo preskribita aŭ konsilita de la Spiritoj, kiam la celo ne estas eminente racia; neniam lasi sin blindigi per la nomoj, kiujn la Spiritoj alprenas, por iom ŝajnigi veraj siajn parolojn; malfidi trokuraĝajn sciencajn teoriojn kaj sistemojn, unuvorte, ĉion, kio deflankiĝas de la morala celo de la manifestiĝoj. Mi kunmetus tutan plej kuriozan volumon el la historio pri ĉiuj mistifikoj, kiuj fariĝis konataj al mi.

ĈAPITRO XXVIII

# PRI TROMPOJ KAJ ARTIFIKOJ. PRI ĈARLATANISMO KAJ ĴONGLADO

*Profitamaj mediumoj. Trompoj en la spiritismaj fenomenoj*

## Profitamaj mediumoj

**304.** Ĉar ĉio povas fariĝi objekto de ekspluatado, nenio miriga estus tio, se oni volus ekspluati ankaŭ la Spiritojn; restas ekscii, kiel ili akceptus la aferon, se oni iam provus fari tian ekspluaton. Mi antaŭ ĉio diru, ke nenio taŭgus pli por la ĉarlatanismo kaj ĵonglado, ol tia metio. Se ekzistas falsaj somnambuloj, multe pli ekzistus da falsaj mediumoj, kaj ĉi tiu sola fakto estus fundamentita motivo por suspekto. La neprofitamo, kontraŭe, estas la plej kategoria respondo, kiun oni povas kontraŭmeti al tiuj homoj, kiuj vidas en la faktoj nenion alian ol ian lertan manovron. Ne ekzistas ĉarlatanismo neprofitama; kia estus do la celo de homoj, kiuj mistifikus sen ia profito, des pli prave tiam, kiam ilia ĉiekonata honorindeco starigas ilin super ĉiu suspekto?

Se la gajno, kiun iu mediumo rikoltus el sia kapablo, povas esti objekto de suspekto, tio ne estus atesto, ke tia suspekto havus ian bazon; li povus do havi efektivan kapablon kaj tre sincere konduti, postulante pagon. Ni vidu, ĉu en ĉi tiu okazo oni laŭracie povas atendi ian kontentigan rezultaton.

**305.** Se oni klare komprenis tion, kion mi diris pri la kondiĉoj necesaj, por ke iu servu kiel interpretanto de la bonaj Spiritoj, pri la multenombraj kaŭzoj, kiuj

povas ĉi tiujn forigi, pri la cirkonstancoj, ne dependantaj de ties volo, kiuj ofte malebligas ilian venon, unuvorte pri ĉiuj **moralaj** kondiĉoj, kiuj povas influi la konsiston de la komunikaĵoj, kiel do oni povas supozi, ke iu Spirito, kiel ajn malmulte altranga, estus en ĉiu momento al la dispono de iu entreprenisto de seancoj kaj submetita al liaj postuloj, por kontentigi la scivolemon de la unue veninta homo? Oni scias la abomenon de la Spiritoj kontraŭ ĉio, kio odoras profitamon kaj egoismon, ilian malŝaton al la materialaj aferoj, kaj oni volus, ke ili helpu komerci per ilia ĉeesto! Naŭzas pensi pri tio, kaj oni ja devus tre malmulte koni la naturon de la mondo de la Spiritoj, por opinii, ke tio estas ebla. Sed, ĉar la frivolaj Spiritoj estas malpli skrupulemaj kaj ĉiam serĉas al si okazojn, por sin amuzi pri ni, tial sekvas el tio, ke se oni ne estas mistifikata de malvera mediumo, estas tre probable, ke oni estus trompata de kelkaj el tiaj Spiritoj. Ĉi tiuj konsideroj sufiĉas, por mezuri la gradon da fido, kiun oni devus konsenti al tiaj komunikaĵoj. Cetere, kion hodiaŭ helpus pagataj mediumoj, se, en la okazo, se iu ne estas mem mediumo, li povas trovi tiun kapablon en sia familio, ĉe siaj amikoj aŭ konatoj?

**306.** Profitamaj mediumoj estas ne nur tiuj, kiuj povus postuli fiksan pagon; la intereso ne ĉiam konsistas en la espero de ia materiala gajno, sed ankaŭ en la ĉiaspecaj ambiciaj rigardoj, sur kiuj oni povas fundamenti personajn esperojn. Ĉi tio estas ankoraŭ unu malbonaĵo, kiun la mokemaj Spiritoj tre bone scias kapti kaj el kiu ili profitas kun efektive rimarkindaj lerteco kaj ruzeco, lulante per trompaj iluzioj la homojn, kiujn tiel ili metas sub sian ŝuon. Resume, la mediumeco estas kapableco, konsentita por bono, kaj la bonaj Spiritoj foriĝas de ĉiu ajn, kiu pretendus fari el ĝi ian saltotabulon, por trafi ĉion ajn, kio ne respondus al la planoj de la Providenco. Egoismo estas kancero de la socio; la bonaj Spiritoj batalas kontraŭ ĝi, tial oni ne povas pensi, ke ili ĝin helpus. Ĉi tio estas tiel racia, ke senutile estus insistadi plu pri ĉi tiu afero.

**307.** La mediumoj por fizikaj efikoj ne apartenas

al ĉi tiu kategorio; ĉi tiujn efikojn ordinare okazigas malpli skrupulemaj malsuperaj Spiritoj. Mi ne diras, ke tiuj Spiritoj pro tio estas necese malbonaj: iu povas esti ŝarĝoportisto kaj tre honesta homo. Tia mediumo, kiu volus ekspluati sian kapablecon, povus do disponi plurajn Spiritojn, kiuj helpus lin sen tro da malvolonto; sed tie montriĝas ankoraŭ unu malbonaĵo. La mediumo por fizikaj efikoj, same kiel tiu por inteligentaj komunikiĝoj, ricevis sian kapablon ne por sia plezuro; ĝi estas al li konsentita sub la kondiĉo, ke li faru el ĝi bonan uzon; se li ĝin ekspluatas, ĝi povas esti forprenita for de li aŭ turniĝi en lian malprofiton, ĉar efektive la malsuperaj Spiritoj estas subuloj de la Superaj.

La malsuperaj Spiritoj tre amas mistifiki, sed ne amas esti mistifikataj. Se ili volonte konsentas je ŝercado, je scivolaferoj, ĉar ili amas amuziĝi, ili kiel la aliaj, ne amas esti ekspluatataj, nek servi kiel kunludantoj, por pligrandigi la enspezon, kaj ĉiumomente montras, ke ili havas sian propran volon, ke ili agas, kiam kaj kiel ŝajnas al ili bone, el kio rezultas, ke la mediumo por fizikaj efikoj estas ankoraŭ malpli certa pri la reguleco de la manifestiĝoj, ol la skribiva mediumo. Pretendi okazigi fenomenojn en difinitaj tagoj kaj horoj estus elmontri la plej profundan nesciadon de la aferoj. Kion do li faru, por gajni sian monon? Ŝajnigi la fenomenojn. Tio estas ja rimedo, kiun uzas ne nur tiuj, kiuj el ĝi faras konfesitan metion, sed eĉ laŭŝajne simplanimaj homoj, kiuj opinias ĉi tiun rimedon pli facila kaj oportuna, ol laboro. Se la Spirito donas nenion, tiam li plenigas la mankon: la imagemo estas tiel fekunda, kiam la afero estas pri gajno de mono! Kiel laŭrajta motivo de suspekto, la intereso rajtigas rigoran ekzamenon, pro kiu oni ne povus ofendiĝi, ne vekante suspekton. Sed tiel laŭrajta estas la suspekto en ĉiu tiu okazo, kiel ofenda kontraŭ honorindaj kaj neprofitamaj homoj.

**308.** La mediumeco, eĉ limigita al fizikaj manifestiĝoj, ne estas konsentita, por ke iu parade elmontru ĝin en foiraj teatroj, kaj kiu ajn pretendus mastri la Spiritojn, por ilin prezenti antaŭ la publiko, tiu povas tute

juste esti suspektata kiel ĉarlatano aŭ kiel pli aŭ malpli lerta prestidigitatoro. Tiel oni komprenu la aferon ĉiam, kiam oni vidos anoncojn de supozataj seancoj de **Spiritismo** aŭ de **Spiritualismo** kontraŭ pokapa pago; kaj oni memoru la rajton, kiu oni havigas al si ĉe la eniro (*).

El ĉio antaŭa ni konkludas, ke la plej solida garantio kontraŭ ĉarlatanismo estas la plej absoluta neprofitamo; se ĉi tiu ne ĉiam certigas la bonecon de la inteligentaj komunikaĵoj, ĝi tamen senigas la malicajn Spiritojn je potenca agrimedo kaj fermas la buŝon al iuj kalumniantoj.

**309.** Restus tio, kion oni povus nomi la "amatoraj ĵonglaĵoj", t. e. la senkulpaj trompoj de iuj trivialaj ŝercemuloj. Oni sendube povus ilin fari kvazaŭ tempopasigilon, en amuzaj kaj frivolaj kunvenoj, sed ne en seriozaj kunsidoj, en kiujn oni akceptas nur seriozajn homojn. Cetere ĉiu ajn povas fari al si plezuron el momenta mistifiko; sed oni devus havi eksterordan paciencon, por ludi tian rolon dum tutaj monatoj kaj jaroj, kaj ĉiufoje dum pluraj sinsekvaj horoj. Nur ia intereso povus havigi tiun persistadon, kaj la intereso, mi ripetas, vekas suspekton pri ĉio.

**310.** Oni eble diros, ke iu mediumo, kiu oferas al la publiko sian tempon por la intereso de la afero, ne povas oferi ĝin kontraŭ nenio, ĉar li bezonas vivi. Sed ĉu li ĝin oferas por la afero aŭ por **si mem**, kaj ĉu ne tial, ke li vidas en tio ian enspezigan metion? Por ĉi tiu prezo ĉiam ekzistas sindonaj homoj. Ĉu li do disponas nur tian mongajnilon? Ni ne forgesu, ke la Spiritoj, kia ajn ilia supereco aŭ malsupereco, estas ja la animoj de la mortintoj, kaj ke, se la moralo kaj la religio trudas kiel devon la respekton al ties restaĵoj, ankoraŭ pli granda estas la devo respekti ties Spiritojn.

Kion oni dirus pri iu, kiu eltirus iun korpon el ĝia tombo kaj ĝin publike elmontrus kontraŭ mono, ĉar tiu

(*) Tiu rajto, tiu "qu'on achète en entrant", estas tiu, kiun ĉiu "aĉetas al si" ĉe la eniro en teatron, aŭ similan ejon, nome aplaŭdi aŭ prifajfi. — *La Trad.*

korpo estus tia, ke ĝi vekus la vidamon? Ĉu elmontri la Spiriton estas malpli malrespekta ol la korpon, sub la preteksto, ke estas kurioze vidi, kiel iu Spirito agas? Kaj ja rimarku, ke la prezo de la seĝoj estus proporcia al la lertaĵoj, kiujn li povus fari, kaj al la allogo de la spektaklo. Certe, eĉ se sur la Tero li estus komediisto, li neniam ekpensus, ke post sia morto li trovus ian entrepreniston, kiu por sia sola profito igus lin senpage ludi komedion.

Oni ne forgesu, ke kiel la inteligentaj, tiel ankaŭ la fizikaj manifestiĝoj estas permesitaj de Dio sole nur por nia instruado.

**311.** Flanken metante ĉi tiujn moralajn konsiderojn, mi neniel kontestas, ke povas ekzisti honorindaj kaj konsciencaj profitamaj mediumoj, ĉar ekzistas honestuloj en ĉiuj medioj; mi parolas nur pri ekspluato. Sed oni ja konsentas, pro la motivoj, kiujn mi montris, ke la ekspluatato estas pli pravigebla ĉe la pagataj mediumoj, ol ĉe tiuj, kiuj, rigardante sian kapablon kiel gracon, uzas ĝin nur por fari servon al aliulo.

La grado da konfido aŭ da malkonfido, kiun oni povas konsenti al pagata mediumo, dependas antaŭ ĉio de la estimo, kiun postulas lia karaktero kaj moraleco, kaj ankaŭ de la cirkonstancoj. Mediumon, kiu por ia eminente serioza kaj utila celo estus malhelpata uzi sian tempon en alia maniero, kaj, pro ĉi tiu motivo, **sen ia laboro**, oni ne povas miksi kun elprofitanta mediumo, tiu, kiu intence farus el la mediumeco pandonan arbon. Laŭ **la motivo kaj la celo** la Spiritoj povas do kondamni, absolvi aŭ favori; ili juĝas la intencon prefere ol la materialan fakton.

**312.** Ne same estas pri la somnambuloj, kiuj uzas sian kapablon por enspezo. Kvankam tiu ekspluatado estas elmetita al trouzoj kaj la neprofitamo estas pli granda garantio de sincereco, tamen ilia sintenado estas alia, ĉar agas iliaj propraj Spiritoj; ĉi tiuj do ĉiam troviĝas al ilia dispono, kaj efektive ili ekspluatas sin mem, ĉar ili estas liberaj disponi siajn personojn laŭvole, dum la eks-

pluatemaj mediumoj ekspluatas la animojn de la forpasintoj. (Vd. § 172, **Somnambulaj mediumoj**.)

**313.** Mi ja scias, ke mia severeco kontraŭ la profitamaj mediumoj alamasigas kontraŭ min ĉiujn, kiuj ekspluatas aŭ estas tentataj ekspluati tiun novan enspezilon, kaj faras ilin, kiel ankaŭ iliajn amikojn, kiuj aliĝis al ilia partio, miaj nerepacigeblaj malamikoj; mi konsoliĝas rememorante, ke la vendistoj, elpelitaj de Jesuo el la templo, certe ne rigardis lin per simpatiaj okuloj. Mi havas kontraŭ mi ankaŭ tiujn homojn, kiuj ne konsideras la aferon kun tia sama seriozeco, kiel mi; tamen mi pensas, ke mi rajtas havi opinion kaj ĝin eldiri, kaj tiun opinion mi devigas neniun alpreni. Se grandega plimulto ĝin akceptis, ŝajnas do, ke oni trovis ĝin ĝusta, ĉar mi efektive ne vidas, kiel oni povus pruvi, ke ne ekzistas pli da ŝancoj trovi trompojn kaj trouzojn ĉe la ekspluatado, ol ĉe la neprofitamo. Rilate al mi, se miaj skribaĵoj kunhelpis por diskrediti en Franclando kaj en aliaj landoj la profitaman mediumecon, mi pensas, ke tio ne estis unu el la plej malgrandaj servoj, kiujn ili faris al la serioza Spiritismo.

## Trompoj en la spiritismaj fenomenoj

**314.** La homoj, kiuj ne akceptas la realecon de la fizikaj manifestiĝoj, ordinare atribuas la estigitajn efikojn al trompoj. Ili sin bazas sur tio, ke la lertaj prestidigitatoroj faras aferojn, kiuj ŝajnas miregindaĵoj al tiu, kiu ne konas ties sekretojn; el tio ili konkludas, ke la mediumoj estas nuraj ĵonglistoj. Mi jam refutis ĉi tiun argumenton, aŭ pli bone, ĉi tiun opinion, precipe en miaj artikoloj pri S-ro Home kaj en la numeroj de la **Revue**, de Januaro kaj Februaro 1858; ĉi tie do mi diros pri tio iajn kelke da vortoj, antaŭ ol paroli pri io pli serioza.

Estas cetere atentinda unu konsidero, kiun ne preterlasos iu ajn, kiu iom pripensos la aferon. Ekzistas, sendube, miregige lertaj prestidigitatoroj, sed tiuj estas tre malmultaj. Se ĉiuj mediumoj farus ĵonglaĵojn, oni

ja devus konfesi, ke ĉi tiu arto en malmulte da tempo plej eksterordinare progresis kaj subite fariĝis plej vulgara, ĉar ĝi estus kunnaskiĝinta kun homoj, kiuj ĝin tute ne imagis en si, eĉ kun infanoj.

Ĉu el tio, ke ĉarlatanoj vendas drogojn sur publikaj lokoj kaj ke eĉ kuracistoj, ne irante sur la promenejojn, trompas la konfidon de siaj klientoj, sekvas, ke ĉiuj kuracistoj estas ĉarlatanoj kaj estas vundita la respekto, kiun meritas la kuracista klaso? Ĉu el tio, ke homoj vendas tinkturojn por vino, sekvas, ke ĉiuj vinkomercistoj estas falsistoj kaj ne ekzistas vino pura? Oni ekspluatas ĉion, eĉ la plej respektindajn aferojn, kaj oni povas diri, ke ankaŭ la trompo havas sian genion. Sed la trompo ĉiam havas ian celon, ian materialan intereson: kie ekzistas nenio por gajni, tie ekzistas nenia intereso trompi. Tial mi diris, parolante pri la pagataj mediumoj, ke la plej bona el ĉiaj garantioj estas absoluta neprofitamo.

**315.** El ĉiuj spiritismaj fenomenoj tiuj, kiuj plej taŭgas por trompo, estas la fenomenoj fizikaj, pro motivoj, kiujn estas utile konsideri. Unue tial, ke, direktiĝante al la okuloj pli frapante, ol al la inteligento, ili estas tiuj, kiujn la prestidigitatoro la plej facile povas imiti. Due, tial, ke, ekscitante, pli ol la aliaj, la scivolemon, ili pli taŭgus por allogi la vulgarularon, kaj sekve estas ja pli fruktodonaj. El ĉi tiu duobla punkto de vidado la ĉarlatanoj do havas ĉiun intereson ŝajnigi tiaspecajn manifestiĝojn; la spektatoroj, pleje fremdaj al ĉi tiu scienco, tien ordinare venas, por serĉi al si ian amuzon prefere, ol seriozan instruon, kaj oni ja scias, ke oni ĉiam pagas pli malavare amuzanton, ol instruanton. Sed krom tio ekzistas ankoraŭ ne malpli kategoria motivo. Se la prestidigitarto povas imiti materialajn efikojn, por kiuj estas necesa nur lerteco, mi ĝis hodiaŭ ne vidis en ĝi la kapablon improvizi, kiu postulas ne ordinaran dozon da inteligento, kaj ankaŭ ne tiun kapablon verki tiujn belajn kaj altegajn diktatojn, ofte plenajn de oportunaj paroloj, kiujn la Spiritoj donas en

siaj komunikaĵoj. Ĉi tio rememorigas al mi la sekvantan fakton.

Unu tre konata beletristo unu tagon venis al mi kaj diris, ke li estas tre bona skribiva mediumo **intuicia** kaj ke li sin metas al la dispono de la Spiritisma Societo. Kutimante akcepti en la Societon nur tiujn mediumojn, kies kapablojn mi mem konas, tial mi petis lin bonvoli antaŭe submeti sin al provoj en aparta kunsido. Li efektive venis; tie pluraj spertaj mediumoj donis unuj disertaciojn, aliaj rimarkinde precizajn respondojn pri proponitaj demandoj kaj objektoj, nekonataj al ili. Kiam venis la vico al tiu sinjoro, li skribis iajn kelke da sensignifaj vortoj, diris, ke li tiun tagon ne estas en taŭga humoro, kaj poste ni lin plu neniam vidis. Li sendube trovis, ke la rolo de mediumo por inteligentaj efikoj estas pli malfacile ludebla, ol kiel li kredis.

**316.** En ĉio la plej facile trompeblaj homoj estas tiuj, ne apartenantaj al la ofico. Tiel same okazas en Spiritismo: tiuj, kiuj ĝin ne konas, estas facile trompataj de ŝajnaĵoj, dum antaŭa atenta studado ilin inicas ne nur pri la kaŭzo de la fenomenoj, sed ankaŭ pri la normaj kondiĉoj, en kiuj povas okazi tiuj faktoj, kaj tiamaniere havigas al ili la rimedojn, por malkovri ian trompon, se ĝi ekzistas.

**317.** La friponaj mediumoj estas forte riproĉataj, kiel ili ja meritas, en jena letero, kiun mi publikigis en la **Revue**, de Aŭgusto 1861:

"Parizo, la 21-an de Julio 1861.

"Sinjoro,

"Oni povas malkonsenti pri iuj punktoj kaj tute konsenti pri aliaj. Mi ĵus legis, sur la pĝ. 213 de la lasta numero de via revuo, konsiderojn pri la trompo en spiritualismaj (aŭ spiritismaj) eksperimentoj, konsiderojn, kiujn mi estas feliĉa dividi per ĉiuj miaj fortoj. Tie ĉia malakordo koncerne teoriojn kaj doktrinojn disfumiĝas kvazaŭ per sorĉa frapo.

"Mi ne estas tiel severa, kiel vi, kontraŭ mediumoj,

kiuj digne kaj dece akceptas ian pagon kiel kompenson por la tempo, kiun ili dediĉas al ofte longedaŭraj kaj lacigaj eksperimentoj; sed severa mi estas tiel, kiel vi — kaj tia severeco neniel estas tro granda —, kontraŭ tiuj, kiuj tiam anstataŭigas, ĉe okazo, per friponaĵo kaj trompo la mankon aŭ nesufiĉecon de la promesitaj kaj atenditaj rezultatoj.

"Miksi tion falsan kun tio vera, kiam la afero estas pri fenomenoj, ricevitaj kun la kunhelpo de la Spiritoj, estas litere fiaĵo, kaj forviŝiĝus la konscienco de iu mediumo, kiu pensus, ke li povas ĝin senskrupule fari. Kiel vi perfekte rimarkigis, **tio estas diskreditigi la aferon ĉe la spirito de sendecidaj homoj, se la trompo estas konstatita**. Mi aldiras, ke tio estas plej bedaŭrinde kompromiti la honorindajn homojn, kiuj donas al la mediumoj la abnegacian helpon de siaj scioj kaj kompetenteco, garantiantoj de ilia sincereco, kaj kiuj iamaniere patronas la mediumojn; tio estas fari kontraŭ tiuj homoj efektivan mallojalaĵon.

"Ĉiu mediumo, kiun oni pruvus kulpa pri trompaj manovroj, kiu — mi uzas iom trivialan esprimon — estus surprizita kun la mano en la sako, meritus esti forpelita de la spiritualistoj aŭ spiritistoj en la tuta mondo, por kiuj estus rigora devo ilin senmaskigi aŭ senhonorigi.

"Se estos por vi interese, sinjoro, enmeti ĉi tiujn kelkajn liniojn en vian revuon, ili estas al via dispono.

"Akceptu, k. t. p. — **Mathieu**."

**318.** La spiritismaj fenomenoj ne estas ĉiuj same facile imiteblaj, kaj ekzistas tiaj, kiuj klare spitas la tutan lertecon de la prestidigitarto; tiaj estas plej precipe la senkontakta movado de objektoj, la levo de pezaj korpoj en la aeron, la frapoj, sonantaj el diversaj flankoj, la aperaĵoj k. a., escepte se oni uzas artifikojn kaj koluzion. Tial mi diras, ke kion oni devas fari en tia okazo, tio estas atente observadi la cirkonstancojn kaj precipe preni en kalkulon la karakteron kaj la socian rangon de la homoj, kaj ilian celon kaj intereson pri trompado: ĉi tiu estas la plej bona el ĉiaj kontroloj, ĉar

ekzistas cirkonstancoj, kiuj forigas ĉiun motivon por suspekto. Mi do pensas, principe, ke oni devas malkonfidi ĉiun ajn, kiu farus el tiuj fenomenoj ian spektaklon aŭ objekton de scivolo aŭ amuzo, kaj kiu pretendus ilin laŭplaĉe kaj en la ĝusta momento okazigi, kiel mi jam klarigis. Mi opinias ne superflue ripeti, ke la nevideblaj inteligentoj, kiuj manifestiĝas al ni, havas tre delikatajn sentojn kaj nepre volas montri al ni, ke ankaŭ ili havas sian liberan volon kaj sin ne submetas al niaj kapricoj. (§ 38.)

Sufiĉos al mi atentigi pri kelkaj artifikoj uzataj, aŭ uzeblaj en iuj okazoj, por igi sin gardi kontraŭ la trompo la sincerajn observantojn. Pri tiuj homoj, kiuj obstine juĝas sen funda esplorado, estas perdo de peno klopodi por ilin forkonvinki de ilia eraro.

**319.** Unu el la plej ordinaraj fenomenoj estas la frapoj en la interno mem de la ligno, kun aŭ sen movado de la tablo aŭ de alia uzata objekto. Ĉi tiu efiko estas unu el tiuj plej facile imiteblaj, ĉu per la kontakto de la piedoj, ĉu per kraketigado en la meblo; sed estas utile konigi aparte karakteran ruzeton. Sufiĉas apogi ambaŭ manojn plate sur la tablo, tiel proksimajn unu al la dua, ke la ungoj de la dikfingroj firme kuntuŝiĝu; tiam, per tute ne rimarkebla muskolagado oni interfrotas la ungojn, aŭdigante sekan brueton, tre similan al tiuj de la interna tiptologio. Tiu brueto resonas en la ligno, naskante perfektan iluzion. Neniel malfacile estas tiamaniere aŭdigi tiom da frapoj, kiom dezirate, tamburadon k. a., respondi demandojn per “jes” aŭ “ne”, per nombroj aŭ eĉ per montrado de alfabetaj literoj.

Se oni estas antaŭavertita, estas tre facile konstati la trompon. Ĝi estas ne ebla, se la manoj ne kuntuŝiĝas kaj se oni estas certa, ke nenia alia kontakto povos okazigi la brueton. Cetere la realaj frapoj havas tiun karakterizaĵon, nome ke ili laŭplaĉe ŝanĝas sian lokon kaj tembron, kio ne povas okazi, kiam ili venas de la citita kaŭzo aŭ de alia simila; ke ili forlasas la tablon, por aŭdiĝi en alia meblo, kiun neniu tuŝas, sur la muroj, la

plafono k. a., kaj respondas improvizitajn demandoj. (Vd. § 41.)

**320.** La senpera skribado estas ankoraŭ pli facile imitebla. Ne parolante pri la bone konataj ĥemiaĵoj, por aperigi skribon post kelka tempo sur blanka papero, kion oni povas malhelpi per plej simplaj antaŭzorgoj, povus okazi, ke per lerta ĵonglado oni anstataŭigus unu paperon per alia. Povus okazi ankaŭ, ke tiu, kiu volas trompi, estus tiel lerta, ke li deturnus la atenton de la ĉeestantoj, dum li skribus iajn kelke da vortoj. Iu diris al mi, ke li eĉ vidis tiel skribi per peceto da grafito kaŝita sub la ungo.

**321.** La alportado de objektoj ne malpli taŭgas por ĵonglado, kaj oni povas esti facile trompata de iu pli aŭ malpli lerta ĵonglanto, eĉ se tiu ne estas profesia prestidigitatoro. En la § speciala, kiun mi skribis pri tio (§ 96), la Spiritoj mem difinis la esceptajn kondiĉojn, en kiuj ĝi povas fariĝi; el tio oni do povas konkludi, ke ĝia **facila** kaj **laŭplaĉa** ricevo estas almenaŭ suspektinda. Kun la senpera skribado estas tute same.

**322.** En la ĉapitro pri la **Specialaj mediumoj** mi menciis, laŭ la Spiritoj, tiujn mediumajn kapablojn ordinarajn kaj maloftajn. Oni do malfidu tiujn mediumojn, kiuj flatus al si, ke ili tre facile disponas ĉi tiujn lastajn aŭ kiuj ambicias multe da tiaj kapabloj, pretendo, kiu nur tre malofte estas efektvia.

**323.** La inteligentaj manifestiĝoj estas, laŭ la cirkonstancoj, tiuj plej fidindaj, tamen ankaŭ ili ne estas liberaj de imitado, almenaŭ tiuj banalaj kaj vulgaraj. Oni pensas, ke ili havas pli grandan garantion, se la mediumoj estas mekanikaj, ne nur pro la sendependeco de la ideoj, sed ankaŭ kontraŭ artifikoj; tial kelkaj personoj preferas la perilojn materialajn. Nu, ĉi tio estas eraro. La trompo enŝoviĝas ĉien: ni ja scias, ke lerte oni povas laŭplaĉe direkti eĉ korbon aŭ tabulon skribantan, tute ŝajnigante memvolajn movojn. Kio forigas ĉian dubon, tio estas la esprimitaj pensoj, ĉu ili venas

de mediumo mekanika, intuicia, aŭdiva, paroliva aŭ vidiva. Iuj komunikaĵoj troviĝas tiel ekster la ideoj, la scioj kaj eĉ la inteligenteco de la mediumo, ke oni strange devus iluzii sin mem, por kredi, ke ili venis de li. Mi rekonas en la ĉarlatanismo grandan lertecon kaj fekundajn rimedojn, sed mi ankoraŭ ne rekonas en ĝi la kapablon havigi scion al malklerulo aŭ spritecon al stultulo.

Resume, mi ripetas, la plej bona garantio kuŝas en la konata moraleco de la mediumoj kaj en la neekzistado de ĉiaj kaŭzoj de materiala intereso aŭ de memestimo, kiuj povus stimuli ĉe ili la praktikadon de siaj mediumaj kapabloj, ĉar ja tiaj samaj kaŭzoj povas instigi ilin ŝajnigi la havadon de tiaj kapabloj, kiujn ili ne posedas.

ĈAPITRO XXIX

# PRI LA GRUPOJ KAJ SOCIETOJ DE SPIRITISTOJ

*Pri la grupoj ĝenerale. Pri la ĝustasencaj societoj. Studotemoj. Konkurado inter la societoj*

## Pri la grupoj ĝenerale

**324.** La spiritistaj grupoj povas esti tre utilaj pro tio, ke ili ebligas instruadon per interŝanĝo de pensoj, per demandoj kaj rimarkoj, kiujn ĉiu povas fari kaj el kiuj ĉiu profitas; sed por ĝuigi ĉiujn dezirindajn fruktojn, ili postulas specialajn kondiĉojn, kiujn mi nun pririgardos, ĉar estus eraro similigi ilin al la ordinaraj societoj. Cetere, ĉar tiaj grupoj estas ja kolektivoj, tio, kio ilin koncernas, estas la natura sekvo de la supre donitaj instruoj; ili devas preni al si la samajn antaŭzorgojn kaj antaŭgardi sin kontraŭ tiaj samaj malfacilaĵoj, kiel la individuo. Tial mi faris ĉi tiun ĉapitron la lasta.

La spiritistaj grupoj havas diversan karakteron laŭ la celo atingota, kaj tial la esenco de unu ankaŭ devas esti malsama, ol tiu de alia. Laŭ sia speco ili povas esti **frivolaj, eksperimentaj** aŭ **instruaj**.

**325.** La **frivolaj grupoj** estas kolektiĝoj de homoj, vidantaj nur la amuzan flankon de la manifestiĝoj kaj plezurantaj ĉe la ŝercoj de malseriozaj Spiritoj, al kiuj forte plaĉas tiaj kunvenoj, kie ili agas tute libere kaj kiujn ili ĉiam ĉeestas. Tie oni demandas pri ĉiaj banalaĵoj, oni petas la Spiritojn antaŭdiri homajn sortojn, oni elprovas ilian sagacecon pri diveno de aĝoj aŭ de tio, kion oni havas en la poŝo, pri malkaŝo de sekretetoj kaj pri multego da aliaj samvaloraj aferoj.

Tiaj grupoj havas nenian gravecon, tamen, ĉar kelkaj frivolaj Spiritoj estas tre inteligentaj kaj ili ĝenerale estas senkonsideraj kaj gajhumoraj, tie ofte okazas tre kuriozaj aferoj, el kiuj iu observema homo povas ĉerpi al si kelkan profiton. Kiu vidis nur tion kaj juĝus la mondon de la Spiritoj laŭ ĉi tiu montro, tiu farus al si pri ĝi ideon tiel malĝustan, kian farus tiu, kiu juĝus la tutan loĝantaron de iu granda urbo laŭ tiu de iaj kvartaloj. La sola simpla saĝo diras, ke altklasaj Spiritoj ja ne povas veni al tiaj kunvenoj, kie la spektatoroj ne estas pli seriozaj ol la aktoroj. Se oni volas sin okupi pri frivolaĵoj, oni ja elvoku Spiritojn senkonsiderajn, same kiel oni invitus histrionojn, por amuzi iun societon; estus profanado tien inviti respektegatajn estulojn, miksi sanktaĵon kun profanaĵo.

**326.** La **eksperimentaj grupoj** celas pli speciale la okazigon de fizikaj manifestiĝoj. En la okuloj de multaj, ili estas spektaklo pli ĝuste kurioza ol instrua; la nekredemaj foriras de tie pli mirante, ol konvinkite, se ili vidis neniajn aliajn fenomenojn, kaj ilia penso sin turnas tute al la serĉado de friponaĵoj, ĉar, komprenante nenion el tiuj faroj, ili volonte imagas al si la ekzistadon de iaj artifikoj. Alie estas kun tiuj, kiuj studis; tiuj jam antaŭe akceptas la eblecon de la fenomenoj, kaj pozitivaj faktoj poste alportas aŭ kompletigas al ili la konvinkon. Se fariĝas artifikoj, ili estas kapablaj tiujn malkaŝi.

Malgraŭ tio, tiaj eksperimentoj prezentas utilan flankon, kiun neniu povus ignori, ĉar ĝuste ili ebligis la eltrovon de la leĝoj, kiuj kontrolas la nevideblan mondon, kaj, laŭ la opinio de multaj homoj, ili nekontesteble estas grava motivo de konvinko; sed mi asertas, ke nur per si mem ili ne kapablas ensekretigi iun en la spiritisman sciencon, tiel same, kiel la sola vido je iu sprita mekanismo ne povas lernigi Meĥanikon al iu, ne konanta ĝiajn leĝojn. Se tamen tiuj kunsidoj estus kondukataj metode kaj saĝe, ili donus multe pli bonajn rezultatojn. Mi post momento revenos al ĉi tiu objekto.

**327.** La **instruaj grupoj** havas tute alian karakter-

on, kaj ĉar ili estas tiuj, el kiuj oni povas ĉerpi la veran instruon, mi tial pli insistos pri la kondiĉoj, kiujn oni devas kontentigi.

La unua estas tiu, ke ili estu ĉiam seriozaj en la plena senco de la vorto. Oni devas konvinkiĝi, ke la Spiritoj, al kiuj oni volas paroli, havas tute apartan naturon; ke, ĉar majesta ne povas kuniĝi kun triviala kaj ankaŭ ne bono kun malbono, tial se oni volas ricevi bonajn aferojn, oni devas sin turni al bonaj Spiritoj. Sed ne sufiĉas elvoki bonajn Spiritojn: nepre necese estas troviĝi en kondiĉoj favoraj al tio, ke ili **bonvolu veni**; nu, Superaj Spiritoj ne venas al kunvenoj de ventkapaj kaj supraĵemaj homoj, tute same, kiel ili tien ne venus, kiam ili vivis sur la Tero.

Societo estas vere serioza nur tiam, se ĝi sin okupas pri aferoj utilaj, esceptinte ĉiujn ceterajn; se ĝi celas ricevi eksterordinarajn fenomenojn el scivolemo aŭ por amuziĝo, eble venos tiuj Spiritoj, kiuj okazigas tiajn fenomenojn, sed la ceteraj foriĝas. Unuvorte, kia ajn estas la karaktero de iu kunsido, al ĉi tiu ĉiam venas Spiritoj pretaj kunhelpi ĝiajn intencojn. Ĉia serioza kunsido deflankiĝas do de sia celo, se ĝi forlasas instruon por amuzo. La fizikaj manifestiĝoj, kiel mi diris, estas iel utilaj; kiuj volas vidi, tiuj ĉeestu eksperimentajn kunsidojn; kiuj volas kompreni, tiuj ĉeestu studokunsidojn; tiel ĉiuj povos kompletigi sian spiritisman instruitecon, same kiel, en la studado de la medicino, unuj sekvas kursojn, aliaj vizitadas klinikojn.

**328.** La instruado pri Spiritismo ne konsistas nur en la morala instruado, donata de la Spiritoj, sed ankaŭ en la studado de la faktoj; koncernas ĝin la teorio de ĉiaj fenomenoj, la serĉado de la kaŭzoj kaj, kiel sekvo, la konstato de tio ebla kaj de tio neebla; unuvorte, la observado de ĉio, kio povas progresigi la sciencon. Nu, estus absoluta eraro pensi, ke la faktoj limiĝus al fenomenoj eksterordinaraj; ke atentindaj estas sole nur tiuj, plej frapantaj la sentumojn. Faktoj sur ĉiu paŝo montriĝas en la inteligentaj komunikaĵoj kaj ne povus esti ignorataj de homoj, kunvenintaj por studado. Tiuj fakt-

oj, kiujn estas ne eble elkalkuli, ŝprucas el multego da okazaj cirkonstancoj; kvankam malpli reliefaj, ili tamen estas plej interesaj por iu observanto, kiu en ili trovas aŭ la jesigon de iu konata principo aŭ la malkaŝon de iu principo nova, kiu ebligas al li iom pli profunde penetri en la misterojn de la nevidebla mondo. Ankaŭ ĉi tio estas filozofio.

**329.** La studokunsidoj, krom tio, estas treege utilaj al la mediumoj por inteligentaj manifestiĝoj, precipe al tiuj, kiuj serioze deziras perfektiĝi kaj tien ne venas kun stulta pretendo al neeraremo. Grandaj rifoj de la mediumeco estas, kiel mi diris, la obsedo kaj la fascinado; tiuj mediumoj povas do tre bonfide fari al si iluzion pri la merito de tio, kion ili ricevas, kaj oni komprenas, ke la trompemaj Spiritoj povas agadi tute libere, kiam ili traktas nur kun iu blindulo. Tial ili forigas la mediumon for de ĉia kontrolo kaj, se necese, ili igas lin abomeni ĉiun ajn, kiu povus lin klerigi. Dank'al la soluligo kaj fascinado, ili povas igi lin akcepti ĉion, kion ajn ili volas.

Ne estus superflue ripeti: ĉi tie leviĝas ne ia simpla malhelpo, sed pereigilo; jes, mi diras, efektiva pereigilo. La sola rimedo, kiun havas la mediumo, por ĝin eviti, estas tio, ke la de li ricevitajn komunikaĵojn analizu homoj sen kaŝita intereso kaj bondezirantaj, kiuj, tion farante flegme kaj senpartie, povas malfermi al li la okulojn kaj igi lin vidi tion, kion li mem ne povas rimarki. Nu, ĉiu mediumo, kiu timas tian juĝon, jam iras la vojon de obsedo; tiu, kiu pensas, ke la lumo estas farita nur por li, troviĝas tute sub tiu jugo; se li rigardas kiel ofendajn la rimarkojn, se li ilin repuŝas, se li ilin koleras, ne dubebla estas do la malica naturo de la Spirito, kiu lin inspiras.

Mi jam diris, ke iu mediumo povas ne havi la sciojn necesajn, por kompreni erarojn; li povas lasi sin trompi per patosaĵoj kaj pretendema parolado, esti delogata per sofismoj, ĉio ĉi plej bonfide. Tial, manke de propra lumo, li devas modeste peti aliajn pri helpo, laŭ jenaj proverboj, nome: "pli da okuloj, pli da certeco" kaj " pri propra

afero neniu juĝas libere". Ĝuste en ĉi tiu rilato la kunsidoj estas por mediumo tre utilaj, se nur li estas sufiĉe saĝa, pro elaŭdi opiniojn, ĉar tie troviĝas homoj pli instruitaj, ol li, kaj kiuj kaptas la ofte tiel subtilajn nuancojn, per kiuj la Spirito elperfidas sian malsuperecon.

Ĉiu mediumo, kiu sincere deziras ne esti mokataĵo de mensogo, devas do peni labori en kunsidoj seriozaj kaj tien alporti tion, kion li aparte ricevas, kaj danke akcepti, eĉ peti la kritikan ekzamenon de la komunikaĵoj, kiujn li ricevas. Se lin ĉikanas trompemaj Spiritoj, ĉi tio estas la plej certa rimedo, por ke li liberiĝu de ili, montrante al ili, ke ili ne povas lin trompi. Cetere mediumo, kiu koleras pro la kritikado, estas des malpli prava ĉe tiu kolero, ke lia memestimo estas tie neniel tuŝita, ĉar ja tio, kion li diras, ne estas lia frukto, kaj por ĝi li ne respondas pli, ol kiel li respondus, se li voĉlegus versojn de ia poetaĉo.

Mi insistis pri ĉi tiu punkto, ĉar malhelpo ĝi estas kiel por la mediumoj, tiel ankaŭ por tiuj kunvenoj, kie estas grave ne konfidi ventanime ĉiajn perantojn de la Spiritoj. La kunhelpo de ĉiu obsedita aŭ fascinita mediumo estus por ili pli malutila ol utila; ili do tiajn ne akceptu. Mi pensas, ke mi jam sufiĉe elvolvis ĉi tiun temon, por ke estu al ili ne eble erari pri la karakteroj de la obsedo, se la mediumo mem ne povas ĝin rekoni; unu el la plej frapantaj estas sendube la pretendo esti la sole prava kontraŭ ĉiuj. La obseditaj mediumoj, kiuj ne volas konfesi tiun sian staton, similas tiajn malsanulojn, kiuj faras al si iluzion pri sia malsaneco kaj pereas, ĉar ili rifuzas submetiĝi al saniga kuracado.

**330.** Serioza grupo devas havi kiel celon forigi la mensogemajn Spiritojn; ĝi erarus, opiniante sin ŝirmita kontraŭ ili dank'al sia celo kaj la kvalito de siaj mediumoj: tion ĝi ne atingos tiel longe, ĝis ĝi troviĝos en favoraj kondiĉoj.

Por la klara kompreno de tio, kio okazas en ĉi tiu cirkonstanco, mi petas la leganton bonvolu releti tion diritan en la § 231, pri la **Influo de la medio**. Oni prezentu al si ĉiun homon kvazaŭ ĉirkaŭitan de kelke da

nevideblaj kompaniuloj, kiuj identiĝas kun li pro sia karaktero, siaj gustoj kaj siaj inklinoj; sekve ĉiu homo, veninta en iun grupon, estas akompanata de Spiritoj, simpatiantaj kun li. Laŭ sia nombro kaj karaktero tiuj akompanantoj povas fari sur la kunsidantojn kaj la komunikaĵojn bonan aŭ malbonan influon. Perfekta estus tiu grupo, kies ĉiuj anoj, portante egalan amon al bono estus akompanataj nur de bonaj Spiritoj; se perfekteco estas ne ebla, la plej bona kunveno estas tiu, en kiu bono superas malbonon. Ĉi tiu aserto estas tro logika, ke mi bezonu insisti pri ĝi.

**331.** Grupo estas kolektiva estaĵo, kies kvalitoj kaj propraĵoj estas la rezultanto de ĉiuj tiuj de ĝiaj anoj, formante kvazaŭ faskon; nu, tia fasko estas des pli fortika, ju pli homogena ĝi estas. Se oni bone komprenis tion diritan (§ 282, demando V) pri la maniero, kiel la Spiritoj estas avizataj pri nia elvoko, oni facile komprenas la potencon de la asociado de la pensoj de la ĉeestantoj. Se Spiriton iamaniere frapas la penso, kiel nin la voĉo, dudek homoj, kuniĝinte en unu sama intenco, nepre havas pli multe da forto, ol unu sola; sed por ke ĉiuj pensoj kunhelpu por unu sama celo, ili devas vibri unisone, kunfandiĝi, por tiel diri, en unu solan, kio ne povas okazi sen agordiĝo.

Aliflanke, veninte en tute simpatian medion, iu Spirito sentas sin pli senĝena; trovante tie nur amikojn, li tien venas pli volonte kaj pli volonte respondas la demandojn. Kiu ajn atente sekvis inteligentajn manifestiĝojn de Spiritoj, tiu povis konvinkiĝi pri ĉi tiu veraĵo. Se la pensoj kontraŭas unu alian, el tio rezultas interfrapiĝo de ideoj malagrabla por la Spirito kaj sekve malutila al la manifestiĝo. Same fariĝas al homo, parolanta antaŭ kunvenantaro: se li sentas, ke ĉiuj pensoj estas por li simpatiaj kaj bondeziraj, la impreso, kiun li ricevas de ili, reagas sur liajn proprajn ideojn kaj havigas al ĉi tiuj pli da vervo. La unuanimeco de tiu kunhelpo faras sur lin ian magnetizan agadon, kiu pligrandigas liajn rimedojn, dum la indiferenteco aŭ la malamikemo lin konfuzas kaj paralizas: tiamaniere la aplaŭdoj

elektras la geaktorojn; nu, la Spiritoj, multe pli impres-eblaj, ol la homoj, devas esti multe pli forte influataj de la medio.

Ĉia spiritista grupo devas do inklini al la kiel eble plej granda homogeneco; oni ja komprenu, ke mi parolas pri tiuj, kiuj volas atingi seriozajn kaj vere utilajn rezultatojn; se oni volas simple ricevi komunikaĵojn ĉiajn ajn, ne zorgante pri la kvalitoj de tiuj, kiuj ilin donas, ĉiuj ĉi tiuj antaŭrimedoj estas ne necesaj, sed tiam oni ne plendu pri la kvalito de la produkto.

**332.** Ĉar enmemiĝo kaj komuneco de pensoj estas esencaj kondiĉoj de ĉia serioza kunsido, oni ja komprenas, ke tro granda nombro da ĉeestantoj devas esti unu el la kaŭzoj, plej kontraŭantaj la homogenecon. Certe tiu nombro havas nenian absolutan limon, kaj oni konsentas, ke cent homoj, sufiĉe enmemiĝintaj kaj atentaj, troviĝas en pli bonaj kondiĉoj, ol dek senatentaj kaj bruantaj; sed evidente estas ankaŭ, ke ju pli granda tiu nombro, des pli malfacile oni plenumas tiujn kondiĉojn. Cetere la sperto pruvas, ke intimaj rondetoj ĉiam estas pli favoraj al belaj komunikaĵoj, pro la motivoj, kiujn mi ĵus donis.

**333.** Estas ankoraŭ unu konsiderenda kondiĉo, nome la akurateco de la kunsidoj. En ĉiuj ĉiam staras Spiritoj, kiujn oni povus nomi **kutimaj vizitantoj**, esprimo, en kiun mi ne enkalkulas tiujn Spiritojn, kiuj troviĝas ĉie kaj en ĉion sin enmiksas; tiuj kutime vizitantaj estas protektantaj Spiritoj kaj tiuj, kiujn oni plej ofte demandas. Oni ne pensu, ke tiuj Spiritoj havas nenion alian por fari, ol aŭskulti nin; ili havas siajn okupojn kaj, krom tio, eble ili en la momento troviĝas en kondiĉoj ne favoraj por elvokado. Kiam la kunsidoj okazas en ĉiam samaj tagoj kaj horoj, ili pretiĝas por tien veni kaj malofte tie ne estas. Kelkaj eĉ ekstremigas la akuratecon; ili ofendiĝas ĉe malfruiĝo de horkvarono, kaj se ili mem difinas la momenton de la kunsido, oni vane ilin vokus kelkajn minutojn pli frue. Mi tamen aldonu, ke kvankam la Spiritoj preferas akuratecon, tiuj efektive superaj ne estas tiel ĝisfunde detalemaj. La postulo de rigora

akurateco estas signo de malsupereco, kiel ĉio infaneca. Ekster la interkonsentitaj horoj ili sendube povas veni, kaj ja ili volonte venas, se la celo estas utila; sed nenio estas pli malutila al bonaj komunikaĵoj, ol ilin elvoki nek al teksto, nek al preteksto, kiam tia fantazio venas al ni en la kapon kaj precipe sen ia serioza motivo; ĉar ili ne estas devigataj submeti sin al kapricoj, povas tial okazi, ke ili ne faras al si la klopodon veni al ni, kaj precipe tiam aliaj eble ekprenas ilian lokon kaj nomon.

## Pri la ĝustasencaj societoj

**334.** Ĉio, kion mi diris pri la grupoj ĝenerale, aplikiĝas nature al la regule starigitaj societoj; ĉi tiuj tamen devas bataladi kontraŭ iaj specialaj malfacilaĵoj, naskitaj de la ligiloj mem inter iliaj anoj. Ĉar mi ricevis plurajn petojn pri ilia organizado, mi donos ĉi tie la koncernan klarigon per kelke da vortoj.

Spiritismo, apenaŭ naskiĝinta (*), estas ankoraŭ tre diverse pririgardata, en sia esenco tro malmulte komprenata de granda nombro da adeptoj, por havigi fortikan ligilon inter la anoj de tio, kion oni povas nomi ia asocio. Tia ligilo povas ekzisti nur inter tiaj homoj, kiuj vidas en ĝi la moralan celon, ĝin komprenas kaj **ĝin alprenas al si mem**. Inter tiaj, kiuj vidas en Spiritismo nur faktojn pli aŭ malpli kuriozajn, ne povus ekzisti serioza ligilo; se ili starigas la faktojn super la principoj, ia simpla malkonsento pri la maniero rigardi la faktojn povas ilin dividi. Same ne estas koncerne la unuajn, ĉar pri la morala demando ne povas ekzisti du vidmanieroj; tial estas rimarkinde, ke ĉie, kie ili renkontas unu alian, ia reciproka konfido altiras unu al alia; la reciproka bondeziremo, reganta inter ili, forigas la ĝenatecon kaj sindevigon, kiuj naskiĝas el la ofendiĝemo, el la fiero, kiu sentas sin pikita ĉe la plej malgranda kontraŭdiro, el la egoismo, kiu rilatigas ĉion al si.

Iu societo, kie ĉiuj egale portus tiujn bonajn sentojn,

(*) Ĉi tion la Aŭtoro skribis en 1860. — *La Trad.*

kie ĝiaj anoj kolektiĝus, celante kleriĝi per la instruoj de la Spiritoj, sed ne esperante ĉeesti pli aŭ malpli interesajn aferojn, aŭ por superstarigi sian personan opinion, tia societo, mi diras, estus ne nur efektivigebla, sed eĉ nerompebla. La ankoraŭ granda malfacileco kolekti multenombrajn elementojn, homogenajn el ĉi tiu vidpunkto, igas min diri, ke, por la intereso de la studoj kaj por la bono de la afero mem, la spiritistoj devus sin organizi prefere en malgrandajn, ol en grandajn kolektiĝojn. Korespondante inter si, vizitante unu alian, interkonigante siajn observojn, tiaj grupoj povas jam nun estigi la kernon de la granda spiritista familio, kiu iam kunligos ĉiujn opiniojn kaj kunigos la homojn en unu solan senton de frateco, sigelitan de la kristana karito.

**335.** Ni jam vidis, kiel grava estas por la ricevo de bonaj rezultatoj la sameco de sentoj; tiu sameco estas necese des pli malfacile atingebla, ju pli granda la nombro da kunsidantoj. En malgrandaj grupoj la anoj pli bone konas unu alian, oni estas pli certa pri la elementoj, aliĝintaj al la rondo; tie la silento kaj la koncentriĝo estas pli facilaj kaj ĉio okazas kvazaŭ en familio. La multenombraj kolektiĝoj ne akordas kun intimeco pro la diverseco de siaj anoj; ili postulas specialajn kunvenejojn, monrimedojn kaj administran meĥanismon nenecesajn en la malgrandaj grupoj; la malsameco de karakteroj, ideoj kaj opinioj tie pli frapante pentriĝas kaj plifaciligas al la tumultemaj Spiritoj tie dissemi malkonkordon. Ju pli multenombra la kolektiĝo, des pli malfacile kontentigi ĉiujn; ĉiu volus, ke la laboroj estu kondukataj laŭ lia plaĉo, ke oni prefere pritraktu aferojn, kiuj plej multe lin interesus; kelkaj pensas, ke la titolo de societano havigas al ili la rajton trudi sian manieron vidi la aferojn, kaj de tio kvereletoj, kaŭzo de maltrankvilo, kiu pli aŭ malpli frue naskas malkonkordon, poste la forfiniĝon, sorton de ĉiaj societoj, kia ajn ilia celo. La malgrandaj grupoj ne estas elmetataj al similaj variadoj. La pereo de iu granda societo estus ŝajna malsukceso por la afero Spiritismo, kaj la malamikoj de ĉi tiu ĝin certe profitus por siaj atakoj; la estingiĝo de malgranda

grupo forpasas nerimarkite, kaj cetere se unu malaperas, aliaj dudek naskiĝas; nu, dudek grupoj, enkalkulantaj po dek kvin ĝis dudek homoj, pli multe atingos kaj multe pli faros por la propagando, ol unu societo el tricent ĝis kvarcent anoj.

Oni sendube diros, ke la anoj de iu societo, kiuj agus tiel, kiel mi ĵus diris, ne estus veraj spiritistoj, ĉar la unua devo, kiun la Doktrino trudas al siaj adeptoj, estas karito kaj bonvolemo. Jes, tute ĝuste, kaj tial homoj, kiuj tiel kondutas, estas spiritistoj prefere laŭnome, ol fakte; ili certe ne apartenas al la tria kategorio (Vd. § 28) kaj tute ne meritas la nomon spiritistoj. Ĉi tie sin prezentas unu konsidero ne malgrava.

**336.** Ni ne forgesu, ke Spiritismo havas malamikojn, kiujn interesas bari ĝian iradon kaj kiuj strabe rigardas ĝiajn sukcesojn; la plej danĝeraj estas ne tiuj, kiuj atakas ĝin malkaŝe, sed tiuj, kiuj agadas en la ombroj, tiuj, kiuj per unu mano ĝin karesas kaj per la dua ĝin disŝiras. Tiuj maliculoj enŝoviĝas ĉien, kie ili esperas fari malbonon; sciante, ke "unueco estas forteco", ili penas detrui ĝin, ĵetante malpacigilojn en la medion. Kiu scias do, ĉu tiuj, kiuj en la grupoj semas konfuzon kaj malkonkordon, ne estas provokantaj agentoj, kiujn interesas malordo? Sendube ili ja estas nek veraj nek bonaj spiritistoj; bonon ili neniam povas fari kaj da malbono ili povas fari multe. Oni komprenas, ke multe pli facile estas por ili enŝoviĝi en grandnombrajn kolektiĝojn, ol en malgrandajn grupojn, kie ĉiuj sin reciproke konas. Dank'al surdaj intrigoj, rimarkataj de neniu, ili dissemas dubon, malkonfidon kaj malamikecon; sub la masko de hipokrita intereso por la afero ili kritikas ĉion, ili starigas kaŝitajn interkonsiliĝojn kaj koteriojn, kiuj baldaŭ rompas la harmonion de la tuto: jen kion ili intencas. Rilate tiajn homojn, apelacii al iliaj sentoj de karito kaj frateco estas paroli al memvolaj surduloj, ĉar ilia celo estas ja disbati tiujn sentojn, kiuj estas la plej grandaj baroj kontraŭ iliaj intrigoj. Tia situacio, malagrabla en ĉiaj societoj, ankoraŭ pli tia estas en la societoj de spiritistoj, ĉar, se ĝi ne naskas rompon, ĝi tamen

kaŭzas maltrankvilon, neakordigeblan kun enmemiĝo kaj atento.

**337.** Se la grupo iras malbonan vojon, oni eble diros, ĉu saĝaj kaj bonintencaj homoj ne ĝuas la rajton de kritiko kaj lasu vivi la malbonon, dirante nenion, aprobu ĝin per sia silento? Sendube tio estas ilia rajto: pli ol tio, devo; sed se ilia intenco estas bona, ili eldiras sian opinion konvene kaj bonvoleme malkaŝe, sed ne duonvorte; se neniu sekvas ilin, ili foriras, ĉar oni ne komprenus, ke iu, havante nenian kaŝitan penson, obstine restadus en societo, kie oni farus aferojn, kiujn li konsiderus nekonvenaj.

Oni povas do starigi kiel principon, ke ĉiu ajn, kiu en iu societo de spiritistoj instigas al malordo aŭ malkonkordo, ĉu malkaŝe, ĉu kaŝite, per ĉiaj ajn rimedoj, estas aŭ provokanta agento aŭ almenaŭ malbona spiritisto, kiun oni devas plej baldaŭ elpeli el la societo; sed tion ofte kontraŭas la ligiloj mem, kune tenantaj ĉiujn anojn, kaj tial estas konsilinde sin deteni de nerompeblaj ligiloj: la virtuloj estas ĉiam sufiĉe ligitaj inter si, la malbone intencantaj estas tiaj ĉiam tro multe.

**338.** Krom tiuj homoj, konataj kiel malicemaj, kiuj enŝoviĝas en la kunvenojn, estas ankaŭ tiaj, kiuj pro sia karaktero mem kunportas maltrankvilon ĉien, kie ili troviĝas; oni do estu plej prudenta, enlasante novajn anojn. Tiuj plej ĝenaj, en ĉi tiu okazo, estas ne tiuj fremdaj al la afero, eĉ ne tiuj ĝin ne kredantaj: konvinkiĝon oni ricevas nur per sperto, kaj ekzistas homoj, kiuj bonafide deziras instruiĝi. Tiuj, kontraŭ kiuj oni precipe devas sin gardi, estas tiuj homoj kun antaŭe preta sistemo, la obstinaj nekredemuloj, kiuj dubas ĉion, eĉ evidentaĵojn; la fieruloj, kiuj pretendas posedi solaj la senlernan lumon, volas ĉie trudi sian opinion kaj malŝate rigardas ĉiun ajn, kiu ne pensas tiel, kiel ili. Ne lasu vin trompi de ilia laŭŝajna deziro instruiĝi; pli ol unu forte sin ĝenus devi konfesi, ke li eraras. Gardu vin precipe kontraŭ tiuj tedaj parolistoj, kiuj ĉiam volas eldiri la lastan vorotn, kaj kontraŭ tiuj, al kiuj plaĉas nur

kontraŭdiremo: unuj kaj aliaj igas perdi tempon sen ia profito, eĉ ne por ili mem. La Spiritoj ne amas vortojn senutilajn.

**339.** Ĉar estas necese antaŭforigi ĉian kaŭzon de konfuzo kaj distro, tial iu sin organizanta societo de spiritistoj devas plej atente zorgi pri la disponoj taŭgaj por forpreni de la instigantoj de malorodo la rimedojn malutili kaj por plej faciligi ties forigon. La malgrandaj grupoj bezonas nur tre simplan disciplinan regularon por la ordo de la seancoj; la regule starigitaj societoj postulas pli kompletan organizon; la plej bona estas tiu, kiu havas la malplej komplikitan radaron. Ĉiaj ajn povos ĉerpi tion, kio estas al ili aplikebla, aŭ tion, kion ili opinias utila, el la regularo de la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj, kiun mi malsupre represas.

**340.** La societoj, ĉu malgrandaj, ĉu grandaj, kaj ĉiaj grupoj, kiel ajn gravaj ili estas, havas antaŭ si alian malhelpon. La instigantoj de konfuzo troviĝas ne nur en ilia medio, sed ankaŭ en la nevidebla mondo. Kiel ekzistas Spiritoj protektantaj asociojn, urbojn kaj popolojn, tiel ankaŭ malicaj Spiritoj alligiĝas al grupoj, kiel al la homoj; ili ligiĝas unue al tiuj pli malfortaj, pli alireblaj, el kiuj ili penas fari ilojn, kaj iom post iom ili penas ĉirkaŭsieĝi la homamasojn, ĉar ilia malica ĝojo estas proporcia al la nombro de la homoj sub ilia jugo. Ĉiam do, kiam en iu grupo iu falas en ian reton, oni rekonu, ke malamiko troviĝas en la tendaro, ke lupo iras en la ŝafejo, kaj oni devas sin tenadi garde, ĉar ja tre probable tiu multigos siajn provojn; se oni tion ne senkuraĝigos per energia kontraŭstaro, obsedo fariĝos kvazaŭ infekta malsano, kiu montriĝas ĉe la mediumoj per la malordo de la mediumeco kaj ĉe aliaj per la malamikemo de la sentoj, la perverseco de la konscienco kaj la detruo de la harmonio. Ĉar la plej potenca kontraŭrimedo de ĉi tiu veneno estas karito, tial ĝuste kariton ili penas sufoki. Oni do ne restu senfare, ĝis ĉi tiu malbonaĵo fariĝos neforviŝebla; oni eĉ ne atendu la unuajn simptomojn, sed precipe oni penu ĝin antaŭforigi. Por ĉi tio

ekzistas du rimedoj, kiuj estas efikaj, se bone uzataj: la preĝado el tuta koro kaj la atenta studado de la plej malgrandaj signoj, elmontrantaj la ĉeeston de trompemaj Spiritoj; la unua altiras la bonajn Spiritojn, kiuj ame helpas nur tiujn, kiuj ilin helpas per sia fido al Dio; la dua montras al la malicaj, ke ili havas aferon al homoj sufiĉe klarvidantaj kaj saĝaj, ke tiuj ne lasas sin trompi. Se iu el la anoj fariĝos kaptaĵo de obsedo, ĉiuj penoj devas jam de la unuaj montroj celi la malfermon de liaj okuloj, ĉe la timo, ke tiu malbonaĵo fariĝos pli serioza por havigi al li la konvinkon, ke li estas trompata, kaj la deziron kunhelpi tiujn, kiuj penas lin liberigi.

**341.** La influo de la medio estas sekvo de la naturo de la Spiritoj kaj de ties maniero agi sur la estulojn vivantajn sur la Tero; el tiu influo ĉiu povas mem dedukti la kondiĉojn plej favorajn por iu societo, kiu aspiras gajni la simpation de la bonaj Spiritoj kaj ricevi nur bonajn komunikaĵojn, forpelante tiujn malicajn. Tiuj kondiĉoj kuŝas ĉiuj en la morala humoro de la ĉeestantoj kaj resume konsistas en la jenaj punktoj:

Perfekta interkonsento de vidpunktoj kaj sentoj;

reciproka bonvolemo inter ĉiuj membroj;

rezigno pri ĉia sento kontraŭa al la vera kristana karito;

unu sola deziro, nome, instruiĝi kaj pliboniĝi per la instruado de la bonaj Spiritoj kaj profitado el iliaj konsiloj. Kiu estas konvinkita, ke la Superaj Spiritoj manifestiĝas por nia progresigo, sed ne por nia plezuro, tiu komprenas, ke ili ja foriĝas de tiuj homoj, kiuj limas sin per admirado de ilia stilo, kolektante el tio nenian frukton, kaj kiuj altiriĝas al la seancoj nur laŭ la pli aŭ malpli granda intereso, kiun la kunsidoj povas prezenti konforme al ĉies aparta gusto;

forigo de ĉio, kio en la komunikaĵoj, pri kiuj oni petis la Spiritojn, celus nur la kontentigon de scivolo;

respektaj enmemiĝo kaj silento dum la konversacioj kun la Spiritoj;

kuniĝo, per la penso, de ĉiuj ĉeestantoj ĉe la elvoko de Spiritoj;

kunlaborado de la mediumoj de la kunsido pri rezigno de ĉia sento de fiero, de memestimo kaj de superstaro, kaj kun la sola deziro esti utilaj.

Ĉu ĉi tiuj kondiĉoj estas tiel malfacile plenumeblaj, ke oni povas trovi neniun, kiu ilin alfrontus? Mi tion ne pensas; mi kontraŭe esperas, ke la efektive seriozaj grupoj, kiaj ekzistas jam en pluraj lokoj, multiĝos, kaj mi ne hezitas diris, ke ĝuste al ili Spiritismo devos danki sian pli viglan disvastiĝon; kunigante la honestajn kaj konsciencajn homojn, ili silentigos la kritikantojn, kaj ju pli puraj estos iliaj intencoj, des pli respektataj ili estos de siaj kontraŭuloj: **kiam mokado atakas bonon, ĝi jam ne igas ridi, sed fariĝas malŝatinda**. En similaj grupoj, sub la potenco de la faktoj, ekestos efektiva simpatioligilo kaj reciproka solidareco, kiuj kunutilos por la ĝenerala progresado.

**342.** Estus eraro pensi, ke tiuj grupoj, kie oni sin okupas pli speciale pri fizikaj manifestiĝoj, troviĝas ekster tiu frata interkonsento kaj esceptas ĉian seriozan penson; se ili ne postulas tiel rigorajn kondiĉojn, tamen ne senriske oni ilin ĉeestus ventanime, kaj oni erarus, kredante, ke la kunhelpo de la ĉeestantoj estas tute nula; pruvas la kontraŭon la fakto, ke tiaj manifestiĝoj, eĉ pere de potencaj mediumoj, ne povas okazi en certaj medioj. Ankaŭ por tio ekzistas do kontraŭstarantaj influoj, kaj tiuj influoj povas kuŝi nur en la malsameco aŭ malamikemo de la sentoj, kiuj paralizas la klopodojn de la Spiritoj.

La fizikaj manifestiĝoj, kiel mi diris, estas tre utilaj; ili malfermas al observanto vastan kampon, ĉar ili estas tuta speco de eksternormaj fenomenoj, kiuj montriĝas antaŭ niaj okuloj kaj kies sekvoj estas nekalkuleblaj. Iu grupo povas do okupi sin pri ili por tre seriozaj celoj, sed ĝi ne povus trafi sian celon, ĉu kiel studon, ĉu kiel rimedon por konvinko, se ĝi ne prenus al si favorajn kondiĉojn: la unua estas ne la fido de la ĉeestantoj, sed ilia deziro instruiĝi sen kaŝita penso, sen jam antaŭe preta decido repuŝi eĉ ion evidentan; la dua estas la limigo de ilia nombro, por eviti la miksiĝon de hete-

rogenaj elementoj. Se la fizikajn manifestiĝojn okazigas ordinare malpli progesintaj Spiritoj, ili tamen havas celon ne malpli providencan, kaj la bonaj Spiritoj ilin favoras ĉiam, kiam ili povas doni utilan rezultaton.

## Studotemoj

**343.** Kiam oni elvokas siajn parencojn kaj amikojn, aŭ iun faman homon, por kompari iliajn opiniojn en la transtombo kun tiuj, kiujn ili havis sur la Tero, oni ofte renkontas kelkan embarason, por tenadi konversaciojn, escepte se oni kontentigas sin per banalaĵoj kaj frivolaĵoj. Multaj pensas, ke **La Libro de la Spiritoj** elĉerpis la serion de la demandoj pri moralo kaj filozofio: tio estas eraro, tial eble estas utile indiki la fonton, el kiu oni povas ĉerpi studotemojn, por tiel diri, senlimajn.

**344.** Se la elvoko de gloraj homoj kaj de la Superaj Spiritoj estas treege utila pro la instruo, kiun ili povas doni al ni, tiu de la vulgaraj Spiritoj tamen ne estas malpli profita, kvankam ili ne kapablas solvi grandampleksajn demandojn; pro sia malsupereco mem ili klopodas, kaj ju pli malgranda la distanco inter ili kaj ni, des pli da rilatoj ni trovas inter nia propra kaj ilia situacio, jam ne enkalkulante tion, ke ili ofte prezentas al ni plej interesajn karakterizajn trajtojn, kiel mi klarigis supre, § 283, parolante pri la apartaj elvokoj. Tio estas do neelĉerpebla fonto de observoj, eĉ se oni konsideras nur tiujn homojn, kies vivo prezentas kelkan apartaĵon koncerne la manieron de ilia morto, la aĝon, bonajn aŭ malbonajn ecojn, ilian feliĉan aŭ malfeliĉan pozicion sur la Tero, kutimojn, mensan staton, k. a.

Ĉe la altklasaj Spiritoj plivastiĝas la kadro de la studoj; krom la psikologiaj demandoj, kiuj estas limitaj, oni povas proponi al ili ankaŭ senfinan multegon da moralaj problemoj pri ĉiaj situacioj en la vivo, pri la plej bona konduto en tia aŭ tia cirkonstanco, pri niaj reciprokaj devoj k. a. La valoro de la instruo, kiun oni ricevas pri ia ajn subjekto: morala, historia, filozofia aŭ

scienca, dependas tute de la stato de la Spirito demandata; koncernas nin la juĝo.

**345.** Krom la ĝuste nomataj elvokoj ankaŭ la spontaneaj diktatoj prezentas senliman nombron da studobjektoj; por tiaj diktatoj estas necese atendi la temon kiun la Spiritoj volos pritrakti. En ĉi tiu okazo povas labori samtempe pluraj mediumoj. Iafoje oni povas elvoki ian difinitan Spiriton; plej ofte oni atendas tiujn, kiuj volos sin prezenti, kio okazas ofte en la plej neantaŭvidita maniero. Tiuj diktatoj povas poste doni motivon por multego da demandoj, kies temoj estas tiamaniere antaŭe preparitaj. Ili devas esti zorge komentariataj por la studado de ĉiuj pensoj, kiujn ili enhavas, kaj por la konstato, ĉu ili havas stampon de vereco. Severe farata, tiu ekzameno estas, kiel mi diris, la plej bona garantio kontraŭ la enŝoviĝo de trompemaj Spiritoj. Pro tio, kiel ankaŭ por la instruado de ĉiuj, oni povos diskonigi la ricevitajn komunikaĵojn ekster la kunsidon. Kiel oni vidas, tie ekzistas neĉesanta fonto de treege seriozaj kaj instruaj elementoj.

**346.** La laboroj de ĉiu seanco povas obei la sekvantan programon:

1-e: Legado de la nete kopiitaj komunikaĵoj de la Spiritoj, ricevitaj en la antaŭa seanco.

2-e: **Diversaj raportoj**. Korespondaĵoj. Legado de komunikaĵoj, ricevitaj ekster la seancoj. Rakontado pri faktoj, interesantaj Spiritismon.

3-e: **Studolaboroj**. Spontaneaj diktatoj. Diversaj demandoj kaj moralaj problemoj, proponataj al la Spiritoj. Elvokoj.

4-e: **Diskutado**. Kritika kaj analiza studado de la komunikaĵoj. Diskutado pri la diversaj punktoj de la spiritisma scienco.

**347.** La nove fonditaj grupoj kelkafoje spertas la ĉeson de siaj laboroj pro manko de mediumoj. Certe la mediumoj estas unu el la esencaj elementoj de la spiritistaj grupoj, sed ne ia nepre necesa elemento; oni erarus,

se oni opinius, ke sen mediumoj oni povas fari nenion. Sendube homoj, kiuj kunsidas nur por eksperimentoj, povas sen mediumoj fari nenion alian ol kiel en koncerto muzikistoj sen instrumentoj; sed tiuj, kiuj celas seriozan studon, havas antaŭ si multegon da temoj, kiuj ilin okupus, tiel utilaj kaj profitaj, kiel se ili povus agadi per si mem. Cetere la societoj, kiuj havas mediumojn, povas okaze troviĝi sen ili, kaj estus bedaŭrinde, se ili pensus, ke tiam ili devas estingiĝi. La Spiritoj mem povas iam kaj iam konduki ilin en tian situacion, por instrui ilin forlasi la mediumojn. Mi diras plue: tiel estas tial, ke, por profiti el la ricevitaj instruoj, estas necese dediĉi kelkan tempon al la meditado pri tiuj instruoj.

La sciencaj societoj ne ĉiam disponas ilojn por observoj, tamen tio ne malhelpas, ke ili havu temojn por diskutado; ĉe manko de poetoj kaj oratoroj la beletraj societoj legas kaj komentarias verkojn de antikvaj kaj modernaj aŭtoroj; la religiaj societoj meditas pri la Sankta Skribo; la societoj de spiritistoj devas same agi kaj ili ĉerpos grandan profiton por sia progreso arangante kunsidojn, en kiuj oni legus kaj komentarius ĉion, kio koncernas Spiritsmon, por aŭ kontraŭ ĝi: el tia diskutado, en kiun ĉiu alportas la kontingenton de siaj meditadoj, elŝprucas lumradioj, kiujn ne rimarkas individua legado.

Krom la specialaj verkoj ankaŭ la gazetoj svarmas per faktoj, rakontoj, okazaĵoj, trajtoj de virtoj aŭ malvirtoj, kiuj starigas gravajn moralajn problemojn, kies solvon nur Spiritismo povas doni; tio estas ankoraŭ alia rimedo, por montri, ke Spiritismo rilatas al ĉiuj branĉoj de la socio.

Mi asertas, ke iu societo de spiritistoj, kiu organizus siajn laborojn laŭ ĉi tiu programo, elserĉante al si la necesajn materialojn, ne trovus tempon sufiĉan por senperaj komunikiĝoj de la Spiritoj; tial mi turnas sur ĉi tiun punkton la atenton de la vere seriozaj societoj, de tiuj, kiuj interesiĝas pli pri sininstruado, ol pri serĉado de ia tempopasigilo. (Vd. § 207, en la ĉap. **Pri la formado de la mediumoj**.)

## Konkurado inter la societoj

**348.** La grupoj, kiuj sin okupas sole nur pri inteligentaj manifestiĝoj, kaj tiuj, kiuj sin donas al la studado de fizikaj manifestiĝoj, havas ĉiu sian apartan mision. Nek la unuaj nek la duaj enhavus la veran spiriton de Spiritismo, se ili sin reciproke rigardus strabe, kaj tiu, kiu unua ĵetus ŝtonon sur la alian, per tio sola montrus la malbonan influon, kiu ĝin regus. Ĉiuj devas kunagi, kvankam per vojoj malsamaj, por la komuna celo, nome por la serĉado kaj la propagando de la vero; ilia antagonismo, nura efiko de superekscitita fiero, havigante armilojn al la nigrigantoj, povus nur malutili la aferon, kiun ili penas defendi.

**349.** Ĉi tiuj lastaj konsideroj aplikiĝas same al ĉiaj grupoj, kiuj povus ne interkonsenti pri kelkaj punktoj de la Doktrino. Kiel mi diris en la ĉapitro pri la **Malakordoj**, la plej multaj el tiaj nekonsentoj rilatas nur al akcesoraĵoj, eĉ ofte al nuraj vortoj; tio estus do infanaĵo, se iuj apartiĝus de aliaj, ĉar ili ne tute same opinius. Ankoraŭ pli malbone ol tio estus, se la diversaj grupoj aŭ societoj de unu urbo sin reciproke rigardus envie. Oni komprenas envion inter homoj interkonkurantaj kaj povantaj materiale malutili unu alian, sed se spekulacio ne ekzistas, tiam la envio povas esti nenio alia, ol malnobla konkurado de memamo. Ĉar, ĉion konsiderante, nenia societo povas ja kolekti en sin ĉiujn adeptojn, tiuj, portantaj efektivan deziron disvastigi la veron kaj kies celo estas ekskluzive morala, devas plezure vidi multiĝi grupojn, kaj se fariĝas konkurado inter ili, ĝi devas esti por la farado de la plej granda bono. Tiuj, kiuj pretendus havi la privilegion de la vero escept-ante la ceterajn, devus ĝin pruvi, prenante kiel devizon: **Amo kaj Karito**, ĉar tia estas la devizo de ĉiu vera spiritisto. Ĉu ili volas fanfaroni pri la supereco de la ilin helpantaj Spiritoj? ili ĝin pruvu per la supereco de la ricevataj instruoj kaj per la uzo, kiun ili faras el tiuj paroloj: jen nefiaskanta kriterio por distingi tiujn, kiuj iras la plej bonan vojon.

Iuj Spiritoj, pli tromemfidaj ol prudentaj, iafoje provas altrudi stangajn kaj nepraktikeblajn sistemojn, en la ombro de respektegataj nomoj, per kiuj ili paradas. La simpla saĝo baldaŭ faras juston al tiuj utopioj, sed dume ĉi tiuj povas dissemi dubon kaj necertecon inter la adeptoj; de tio ofte venas ia kaŭzo de momentaj malkonsentoj. Krom la rimedoj, kiujn mi indikis por juĝi tiujn sistemojn, ekzistas ankoraŭ unu kriterio, kiu taksas ilian valoron: tiu estas la nombro da adeptoj, kiujn ili varbas. La prudento diras, ke el ĉiuj sistemoj tiu, kiun la homamasoj renkontas plej simpatie, devas troviĝi pli proksime de la vero, ol tiu, kiun la plimulto repuŝas kaj kies vicoj ĉiam plimalmultiĝas. Estu do certaj, ke, kiam la Spiritoj ne konsentas, ke oni diskutu iliajn instruojn, tiel estas tial, ke ili komprenas ties malfortecon.

**350.** Se Spiritismo, kiel anoncite, devas prosperigi la aliiĝon de la homaro, tio povas okazi nur per la pliboniĝo de la homamasoj, pliboniĝo, kiu siavice fariĝos grade, iom post iom, nur dank'al la pliboniĝo de la individuoj. Kion helpas kredi la ekziston de la Spiritoj, se tiu kredo ne faras la homon pli bona, pli bonvolema kaj pli indulgema por siaj similuloj, pli humila kaj pli paciencema ĉe la sortobatoj? Kion utilas al avarulo esti spiritisto, se li estas ĉiam ankoraŭ avara; al fierulo, se li estas ĉiam tromemfida; al enviulo, se li estas plue enviema? Ĉiuj homoj povus do kredi la manifestiĝojn de Spiritoj, sed la homaro tamen plue staradus; sed tiaj ne estas la decidoj de Dio. Nur al la providenca celo devas strebi ĉiuj seriozaj societoj de spiritistoj, enkolektante ĉiujn, kiuj portas samajn sentojn; tiam inter ili ekzistas unuiĝo, simpatio, frateco, sed ne ia vana kaj infaneca antagonismo de memestimo, de vortoj prefere ol faktoj; tiam ili estos fortikaj kaj potencaj, ĉar ili sin apogos sur neŝancelebla bazo: la bono por ĉiuj; tiam ili estos respektataj kaj silentigos la stultan mokadon, ĉar ili parolos en la nomo de la evangelia moralo, kiun ĉiuj respektas.

Tia estas la vojo, pri kiu mi klopodas, por igi Spi-

ritismon iri ĝin. La standardo, kiun mi alte levas, estas tiu de la **kristana kaj humana Spiritismo**, ĉirkaŭ kiu mi estas feliĉa vidi jam tiom da homoj en ĉiuj lokoj de la Tero, ĉar ili komprenas, ke tie troviĝas la tabulo de savo, la protekto de la publika ordo, la signo de epoko nova por la homaro. Mi invitas ĉiujn societojn de spiritistoj kunhelpi por tiu granda afero; de unu al la alia fino de la mondo ili eletendu fratajn manojn, kaj ili laĉos la malbonon en nemalimplikeblaj maŝoj.

ĈAPITRO XXX

# REGULARO DE LA PARIZA SOCIETO POR SPIRITISMAJ STUDOJ

## fondita la 1-an de Aprilo 1858

*kaj permesita per ordono de S-ro Polica Prefekto de la 13-an de Aprilo 1858, laŭ la letero de Lia Ekscelenco la Ministro por Internaj Aferoj kaj Ĝenerala Sekureco*

*Noto*. Kvankam ĉi tiu regularo estas frukto de la sperto, mi ĝin donas ĉi tie ne kiel ian absolutan leĝon, sed nur por faciligo de fondado de societoj, kiuj el ĝi povos ĉerpi disponojn, kiujn ili trovos utilaj kaj aplikeblaj al iliaj propraj cirkonstancoj. Kiel ajn simpligita la organizado de societoj, ĝi tamen povas esti ankoraŭ multe pli simpligita en la okazo, se tiuj estas ne regule starigitaj societoj, sed simplaj intimaj kolektiĝoj, kiuj bezonas nur preni disponojn pri ordo, antaŭzorgo kaj reguleco en la laboroj.

Mi prezentas ĝin ankaŭ por la orientiĝo de tiuj homoj, kiuj volus ekrilati kun la Pariza Societo, ĉu kiel korespondantoj, ĉu kiel anoj de ĉi tiu Societo.

### Ĉapitro I — *Celo kaj konsistigo de la Societo*

*Art. 1-a*. La Societo celas la studadon de ĉiaj fenomenoj, rilatantaj al la manifestiĝoj de Spiritoj, kaj ilian aplikadon al la moralaj, naturaj, historiaj kaj psikologiaj sciencoj. Estas malpermesite pritrakti en ĝi demandojn politikajn, religiopolemikajn kaj pri socia ekonomiko.

Ĝi prenas al si la titolon: *Pariza Societo por Spiritismaj Studoj.*

*Art. 2-a*. La Societo konsistas el anoj titolaj, liberaj kaj korespondantaj.

Ĝi povas asigni la titolon de honora membro al tiuj homoj, loĝantaj en Franclando aŭ en la eksterlando, kiuj pro sia pozicio aŭ laboroj povas fari al ĝi eminentajn servojn.

La honoraj membroj estas ĉiujare submetataj al reelekto.

*Art. 3-a.* La Societo akceptas nur tiujn homojn, kiuj simpatias ĝiajn principojn kaj la celon de ĝiaj laboroj, tiujn, jam inicitajn en la fundamentajn principojn de la spiritisma scienco aŭ serioze portantajn la deziron instruiĝi. Sekve, ĝi esceptas ĉiun ajn, kiu povus porti malpacigilojn en la sinon de ĝiaj kunsidoj, ĉu el malamikemo aŭ sistema kontraŭemo, ĉu el ĉia alia kaŭzo, kaj tiel fari, ke oni perdu tempon en senutilaj diskutoj.

Ĉiuj anoj ŝuldas unu al alia bonvolon kaj bonkonduton, kaj en ĉiaj cirkonstancoj ili devas loki la ĝeneralan bonon super la demandoj personaj kaj de memestimo.

*Art. 4-a.* Por esti akceptita kiel libera ano oni devas adresi al la Prezidanto skriban peton, rekomende subskribitan de du titolaj anoj, kiuj fariĝas garantiantoj de la intencoj de la petanto.

La petletero devas mallonge informi: 1-e, ĉu la petanto jam posedas iajn konojn pri Spiritismo; 2-e, la staton de lia konvinko pri la fundamentaj punktoj de ĉi tiu scienco; 3-e, lian sindevigon absolute alkonfomiĝi al ĉi tiu regularo.

La peto estas submetata al Komitato, kiu ĝin ekzamenos kaj ĉe okazo proponos la akcepton, prokraston aŭ malakcepton.

La prokrasto estas severe necesa pri ĉiu kandidato, kiu ankoraŭ nenion scias pri la spiritisma scienco kaj ne simpatias la principojn de la Societo.

La liberaj anoj rajtas ĉeesti ĉiujn kunsidojn, partopreni en la laboroj kaj diskutoj, celantaj studadon, sed en nenia okazo ili havas decidan voĉon koncerne la aferojn de la Societo.

La liberaj anoj estas tiaj nur por la jaro, en kiu ili estas akceptitaj, kaj ilia restado kiel membro de la Societo devas esti konfirmata ĉe la fino de tiu unua jaro.

*Art. 5-a.* Por esti titola ano, la persono devas esti estinta, almenaŭ dum unu jaro, libera ano, esti ĉeestinta pli ol la duonon de la nombro de la kunsidoj, kaj esti doninta, dum tiu tempo, sendubajn pruvojn pri siaj scioj kaj konvinkoj rilate Spiritismon, sian konsenton pri la principoj de la Societo kaj sian deziron en ĉiaj cirkonstancoj konduti kontraŭ siaj kolegoj laŭ la principoj de la karito kaj de la spiritista moralo.

La liberaj anoj, kiuj regule ĉeestis, dum ses monatoj, la

kunsidojn de la Societo, povos esti akceptataj kiel titolaj anoj, se ili kontentigas la ceterajn kondiĉojn.

La akcepto estas proponata de la Komitato mem, kun la konsento de la ano, se krom tio ĝin apogas tri aliaj titolaj anoj. Poste ĝi estas anoncata de la Societo, se aprobita per sekreta baloto, post buŝa raporto de la Komitato.

Nur la titolaj anoj havas decidan voĉon kaj ĝuas la rajton konsentitan per la Art. 25-a.

*Art. 6-a.* La Societo, se ĝi opinios tion oportuna, limigos la nombron de la liberaj anoj kaj de la titolaj anoj.

*Art. 7-a.* Korespondantaj anoj estas tiuj, kiuj, ne loĝante en Parizo, tenadas rilatojn kun la Societo kaj havigas al ĝi dokumentojn utilajn por ĝiaj studoj. Ili povas fariĝi membroj per propono de unu sola titola ano.

## Ĉapitro II — *Administrado*

*Art. 8-a.* La Societo estas administrata de Prezidanto-direktoro, helpata de la anoj de la estraro, kaj de Komitato.

*Art. 9-a.* La estraro konsistas el: 1 Prezidanto, 1 Vicprezidanto, 1 Ĉefsekretario, 2 Helpsekretarioj kaj 1 Kasisto.

Krom tiuj povas esti nomata unu aŭ pli ol unu honora Prezidanto.

Ĉe foresto de la Prezidanto kaj de la Vicprezidanto la kunsidoj povas esti prezidataj de unu el la anoj de la Komitato.

*Art. 10-a.* La Prezidanto-direktoro devas plej zorge sin doni al la interesoj de la Societo kaj de la spiritisma scienco. Koncernas lin la ĝenerala direktado kaj la alta kontrolado de la administrado, kiel ankaŭ la konservado de la arkivoj.

La Prezidanto estas elektata por tri jaroj kaj la ceteraj anoj de la Komitato por unu jaro, senlime elekteblaj.

*Art. 11-a.* La Komitato konsistas el la anoj de la estraro kaj el aliaj kvin titolaj anoj, elektitaj prefere el inter tiuj, kiuj efike kunhelpis en la laboroj de la Societo, plenumis servojn al la afero Spiritismo aŭ elmontris bonvolan kaj akordigan spiriton. Tiuj kvin anoj estas, kiel la estraranoj, elektataj por unu jaro kaj reelekteblaj.

La Komitato estas laŭrajte prezidata de la Prezidanto-direktoro aŭ, ĉe ties foresto, de la Vicprezidanto aŭ de tiu el ĝiaj anoj, difinita por tiu prezido.

La Komitato havas la taskon antaŭe ekzameni ĉiajn administrajn kaj aliajn demandojn kaj proponojn, submetotajn al la Societo; ĝi kontrolas la enspezojn kaj elspezojn de la Societo kaj la kontojn de la Kasisto, permesas la ordinarajn

elspezojn kaj faras ĉiajn ordodisponojn, kiujn ĝi opinias necesaj.

Krom tio, ĝi ankaŭ ekzamenas la laboraĵojn kaj studotemojn, proponitajn de la societanoj, ilin preparas mem, kaj difinas la tagordon de la kunsidoj, konsente kun la Prezidanto.

La Prezidanto ĉiam povas malhelpi, ke iaj temoj estu pritraktataj kaj enmetataj en la tagordon, escepte se li volas ilin submeti al la Societo, kiu laste decidos.

La Komitato regule kunvenas antaŭ la malfermo de la kunsidoj, por ekzameni kurantajn aferojn, kaj ankaŭ en ĉia alia momento, kiun ĝi opinios oportuna.

La anoj de la estraro kaj de la Komitato, kiuj senavize forestis dum tri sinsekvaj monatoj, estas konsiderataj kiel rezignintaj siajn funkciojn, kaj oni devas fari la necesajn paŝojn por ilin anstataŭigi.

*Art. 12-a.* La decidoj, ĉu de la Societo, ĉu de la Komitato, estas farataj laŭ la absoluta plimulto el la ĉeestantaj anoj; ĉe egaleco de voĉoj, decidos la voĉo de la Prezidanto.

La komitato povas fari decidon ĉe la ĉeesto de kvar el siaj anoj.

La sekreta baloto estas deviga, se tion postulas kvin anoj.

*Art. 13-a.* Ĉiujn tri monatojn ses anoj, elektitaj el inter la titolaj aŭ liberaj anoj, estas difinitaj por la funkcio de *komisaroj.*

La komisaroj havas la taskon prigardi la ordon kaj bonan iradon de la kunsidoj kaj kontroli la rajton de eniro de ĉia fremda homo, kiu sin prezentas, por ĉeesti la kunsidon. Por ĉi tio la difinitaj anoj aranĝiĝos tiamaniere, ke unu el ili ĉeestu la malfermon de la kunsidoj.

*Art. 14-a.* La societa jaro komenciĝas la 1-an de Aprilo.

La nomado de la estraranoj kaj komitatanoj okazas en la unua kunsido de Majo. La funkciantaj anoj daŭrigas siajn funkciojn ĝis tiu tempo.

*Art. 15-a.* Por la elspezoj de la Societo la titolaj anoj pagas ĉiujare 24 fr., kaj tiuj liberaj, 20 fr.

La titolaj anoj, ĉe sia akcepto, pagas per unu fojo la kromsumon de 10 fr.

La kotizo estas pagata tuta por la kuranta jaro.

La anoj, akceptitaj en la daŭro de la jaro, devas pagi, en tiu unua jaro, nur por la trimestroj ĝis la fino de la jaro, inkluzive tiun, en kiu ili estas akceptitaj.

Se edzo kaj ekzino estas akceptataj kiel liberaj aŭ titolaj anoj, estas postulataj por ambaŭ nur unu kotizo kaj duono.

Ĉiujn ses monatojn, la 1-an de Aprilo kaj la 1-an de

Oktobro, la kasisto donas al la Komitato kalkulan raporton pri la uzado de la mono kaj la financa stato de la Societo.

Paginte la kurantajn elspezojn por luado kaj aliajn devigajn ŝuldojn, la Societo, se restas saldo, difinos la uzon de ĉi tiu.

*Art. 16-a.* Al ĉiuj akceptitaj anoj, liberaj aŭ titolaj, estas donata akceptokarto, mencianta ilian kategorion. Tiu karto restas en la manoj de la Kasisto, de kiu la nova ano povas ĝin preni, pagante sian kotizon kaj la enirsumon. La nova ano povas ĉeesti la kunsidojn nur post la elpreno de sia karto. Se li tion ne faris ĝis post unu monato post sia akcepto, li estas konsiderata kiel eksiĝinta.

Estos konsiderata kiel eksiĝinta ankaŭ ĉiu ano, kiu ne pagis sian jaran kotizon en la unua monato de la renoviĝo de la societa jaro, post kiam estis vana iu avizo de la Kasisto.

## Ĉapitro III — *Pri la kunsidoj*

*Art. 17-a.* La kunsidoj de la Societo okazos ĉiun vendredon je la oka horo vespere, esceptante ian ŝanĝon se necese.

La kunsidoj estas privataj aŭ ĝeneralaj; ili neniam estas publikaj.

Ĉiu, kiu en ia ajn rolo estas parto de la Societo, devas en ĉiu kunsido enskribi sian nomon en liston de la ĉeestantoj.

*Art. 18-a.* Silento kaj enmemiĝo estas severe postulataj dum la kunsidoj kaj precipe dum la studoj. Neniu povas preni la parolon, ne ricevinte ĝin de la Prezidanto.

Ĉiaj demandoj al la Spiritoj devas esti farataj pere de la Prezidanto, kiu povas rifuzi ilin meti, laŭ la cirkonstancoj.

Estas speciale malpermesitaj ĉiaj demandoj frivolaj, kun persona intereso, el nura scivolemo aŭ celantaj elprovi la Spiritojn, kiel ankaŭ ĉiuj, kiuj ne celas ĝeneralan utilecon el la vidpunkto de la studoj.

Estas malpermesitaj ankaŭ ĉiaj diskutoj, kiuj deturnus la kunsidon for de ĝia pritraktata speciala temo.

*Art. 19-a.* Ĉiu ano rajtas postuli, ke estu admonata ĉiu ajn, kiu translimus la konvenecon en la diskutoj aŭ en ia maniero malordigus la kunsidojn. La admono estas tuj submetata al voĉdonado; se aprobita, ĝi estas registrata en la protokolo.

Tri admonoj en la daŭro de unu jaro laŭrajte kuntrenas la elsocietigon de la koncerna ano, kia ajn lia kategorio.

*Art. 20-a.* Nenia komunikaĵo de Spirito, ricevita ekster

la Societo, povas esti legata, antaŭ ol ĝi estis submetita, ĉu al la Prezidanto, ĉu al la Komitato, kiu povas konsenti aŭ rifuzi ĝian legadon.

Devas esti konservata en la arkivoj kopio de ĉiu ekster-societa komunikaĵo, kies legado estis permesita.

Ĉiuj komunikaĵoj, ricevitaj dum la kunsidoj, apartenas al la Societo; la mediumoj, kiuj ilin ricevis, povas preni al si kopion el ili.

*Art. 21-a.* La privataj kunsidoj estas rezervataj al la societanoj kaj okazas en la unua, en la tria kaj, eventuale, en la kvina vendredo de ĉiu monato.

La Societo rezervas por la privataj kunsidoj ĉiujn demand-ojn, kiuj koncernas ĝiajn administrajn aferojn, kaj ankaŭ la studotemojn, kiuj postulas pli grandajn trankvilecon kaj kon-centriĝon, aŭ kiujn ĝi opinias utile esplori pli profunde, an-taŭ ol ilin pritrakti en la ĉeesto de fremduloj.

Rajtas ĉeesti la privatajn kunsidojn, krom la titolaj kaj liberaj anoj, ankaŭ la korespondantaj anoj, tiam troviĝantaj en Parizo, kaj la mediumoj, servantaj al la Societo.

Nenia homo fremda al la Societo estas enlasata en la privatajn kunsidojn, krom esceptaj okazoj kaj kun antaŭa konsento de la Prezidanto.

*Art. 22-a.* La ĝeneralaj kunsidoj okazas en la dua kaj en la kvara vendredo de ĉiu monato.

En la ĝeneralajn kunsidojn la Societo permesas la en-lason de fremdaj aŭdantoj, kiuj povas ilin ĉeesti kiel gast-oj, ne partoprenante en ili. Tiun permeson ĝi povas forpreni ĉiam, kiam ĝi trovos tion oportuna.

Neniu povas ĉeesti la kunsidojn kiel aŭdanto, antaŭe ne prezentite de iu societano al la Prezidanto, ano, kiu fariĝas garantianto de lia zorgo nek malordigi, nek interrompi la laborojn.

La Societo akceptas kiel aŭdantojn nur tiujn homojn, kiuj aspiras fariĝi ĝiaj anoj aŭ simpatias ĝiajn laborojn, kaj su-fiĉe inicitajn en la spiritisman sciencon, por ilin kompreni. La akcepto devas esti absolute rifuzata al ĉiu ajn, kiu estus altirata de tiuj laboroj el scivolemo aŭ kies opinioj estus malamikaj al la Societo aŭ la Spiritismo.

Al la aŭdantoj la parolo estas malpermesita, krom la esceptaj okazoj laŭ la juĝo de la Prezidanto. Kiu iel ajn malaranĝus la ordon aŭ elmontrus malbonvolon kontraŭ la laboroj de la Societo, tiun oni povus inviti foriri, kaj, en ĉiu okazo, la fakto estus menciita en la listo de la akceptitoj kaj lia eniro estus malpermesita en estonta tempo.

Ĉar la nombro de la aŭdantoj devas esti limita laŭ la

disponeblaj lokoj, tiuj, kiuj povos ĉeesti la kunsidojn, devas esti antaŭe enskribitaj en registron, difinitan por tio, kun mencio de ilia adreso kaj de la ano, kiu ilin rekomendas. Sekve, ĉia enirpeto devas, plurajn tagojn antaŭ la kunsido, esti adresita al la Prezidanto, kiu sola ekspedas la akcepto-kartojn, ĝis la listo estos kompleta.

La enirkartoj povas utili nur por la indikita tago kaj por la nomitaj personoj.

La eniro ne povas esti konsentata al la sama aŭdanto por pli ol du kunsidoj, escepte de permeso de la Prezidanto kaj ĉe esceptaj okazoj. Unu sama ano ne povas samtempe prezenti pli ol du personojn. La eniroj, konsentitaj de la Prezidanto, ne havas limon.

La aŭdantoj ne estas enlasataj post la malfermo de la kunsido.

## Ĉapitro IV — *Diversaj disponoj*

*Art. 23-a*. Ĉiuj anoj de la Societo ŝuldas al ĝi sian kunlaboron. Sekve, ili estas invitataj kolekti en siaj kampoj de observoj tiujn malnovajn aŭ novajn faktojn, kiuj povas rilati al Spiritismo, kaj ilin noti. Ili bonvolu ankaŭ informiĝi, laŭ sia povo, pri la konateco de tiuj faktoj.

Ili estas invitataj ankaŭ konatigi al ĝi ĉiajn publikigaĵojn, kiuj povas pli aŭ malpli rekte rilati al la objekto de ĝiaj laboroj.

*Art. 24-a*. La Societo, kiam ĝi opinios tion oportuna, submetos al kritika ekzameno la diversajn verkojn, publikigitajn pri Spiritismo. Por tio, ĝi komisios unu el siaj anoj, liberan aŭ titolan, por fari al ĝi raporton, kiu ĉe okazo estos presita en la Revue Spirite.

*Art. 25-a*. La Societo aranĝos al si specialan bibliotekon el verkoj, kiuj estos al ĝi donacitaj aŭ kiujn ĝi mem akiros.

La titolaj anoj povos en la sidejo de la Societo legi ĝiajn librojn aŭ esplori ĝiajn arkivojn, en por tio difinitaj tagoj kaj horoj.

*Art. 26-a*. Ĉar la Societo konsideras, ke ĝia respondeco povas esti morale kompromitita de privataj publikaĵoj de ĝiaj anoj, tial neniu, en ĉia ajn skribaĵo, povas uzi la titolon de ano de la Societo, sen ties antaŭa permeso kaj antaŭ ol ĝi legos la manuskripton. La Komitato prenos sur sin la faradon de raporto pri tio. Se la Societo juĝos la skribaĵon neakordigebla kun ĝiaj principoj, tiam la aŭtoro, aŭdite, estos invitata, ĉu modifi ĝin, ĉu rezigni ĝian publikigon, ĉu, fine,

sin ne konatigi kiel anon de la Societo. Se li sin ne submetos al la farota decido, li povos esti elpelita el la Societo.

Ĉia skribaĵo, kiun iu ano de la Societo publikigos anonime kaj sen ia montro, laŭ kiu oni povus rekoni lin kiel ĝian aŭtoron, estos enkalkulata en la ordinarajn publikigaĵojn, kies juĝon la Societo rezervas al si. Tamen, ne dezirante malhelpi la liberan eldiron de personaj opinioj, la Societo invitas ĉiujn siajn membrojn, kiuj intencus eldoni tiajn publikigaĵojn, antaŭe peti ĝian duonoficialan opinion, en la intereso de la scienco.

*Art. 27-a.* Dezirante tenadi en sia sino la unuecon de principoj kaj la reciprokan bonvolemon, la Societo povos elpeli el si ĉian anon, kiu estus kaŭzo de malkonkordo aŭ malkaŝe ekbatalus kontraŭ ĝi per skribaĵoj, kompromitantaj la Doktrinon, per revoluciaj opinioj aŭ per konduto, kiun ĝi ne povus aprobi. La elpelo estos tamen decidita nur post senefika duonoficiala avizo kaj post kiam estos aŭdita la akuzita ano, se li opinios utile klarigi sian konduton. La decido estos farita almenaŭ de tri kvaronoj de la ĉeestantaj anoj, per sekreta baloto.

*Art. 28-a.* Iu ano, kiu memvole foriĝos en ĉiu ajn tago de la jaro, ne povos repostuli la diferencon de la kotizoj, kiujn li pagis; tiu diferenco estos redonata en la okazo de elpelo, decidita de la Societo.

*Art. 29-a.* Ĉi tiu regularo povos esti modifita, se por tio estos motivo. La proponoj por modifoj povos esti farataj al la Societo nur per la organo de ĝia Prezidanto, al kiu ili devos esti trandonataj kaj en la okazo, se ili estas akceptitaj de la Komitato.

La Societo povas, ne modifante sian regularon rilate ties esencajn punktojn, fari ĉiajn aldonajn disponojn, kiujn ĝi opinios utilaj.

ĈAPITRO XXXI

# DISERTACIOJ DE SPIRITOJ

Mi kunigis en ĉi tiu ĉapitro kelke da spontaneaj diktatoj, kiuj povas kompletigi kaj konfirmi la principojn, enhavatajn en ĉi tiu verko. Mi povus esti prezentinta multe pli grandan nombron da ili, sed mi limigis min je tiuj, pli speciale rilatantaj al la estonteco de Spiritismo, al la mediumoj kaj al la kunsidoj. Mi donas ilin ankaŭ kiel instruon kaj kiel tipojn de efektive seriozaj komunikaĵoj. Mi finas la ĉapitron per kelke da apokrifaj komunikaĵoj, sekvataj de la rimarkoj taŭgaj por ilia rekonigo.

## Pri Spiritismo

I

Fidu la bonecon de Dio kaj estu sufiĉe klarvidaj, por kompreni la preparojn de la nova vivo, kiun Li destinas por vi. Ne estos al vi donite, estas vere, ĝui tiun vivon en la nuna ekzistado, sed ĉu vi ne estos feliĉa, se vi ne vivos denove sur ĉi tiu planedo, rigardante de supre la verkon, kiun vi estos komencinta kaj kiu disvolviĝos antaŭ viaj okuloj? Sur vi estu la kiraso de firma fido, senhezita kontraŭ la baroj, kiuj, ŝajnas, leviĝos kontraŭ la konstruaĵon, kies fundamentojn vi metas. La bazo, sur kiu ĝi staras, estas solida: la unuan ŝtonon metis la Kristo. Kuraĝon do, arkitektoj de la dia Majstro! Laboru, konstruu, kaj Dio kronos vian laboraĵon, sed memoru, ke la Kristo malkonfesas kiel sian disĉiplon ĉiun ajn, kiu portas kariton nur sur la lipoj. Ne sufiĉas kre-

di: estas necese precipe doni ekzemplon de boneco, bonvolemo kaj abnegacio, sen kio via fido estos senfrukta por vi.

SANKTA AŬGUSTENO.

II

La Kristo mem prezidas en ĉiaspecaj nun plenumataj laboroj, por malfermi al vi la tempon de renoviĝo kaj perfektiĝo, antaŭdiratan de viaj spiritaj Gvidantoj. Se, efektive, vi direktos la okulojn, ekster la manifestiĝoj de la Spiritoj, al la nuntempaj okazaĵoj, vi senhezite rekonos la anoncantajn signojn, kiuj nerefuteble montros, ke estas alvenintaj la antaŭdiritaj tempoj. Ekestas komunikoj inter ĉiuj popoloj; post la disbato de la materiaj baroj la moralaj malhelpoj, kiuj kontraŭstaras la unuiĝon de la popoloj, la politikaj kaj religiaj antaŭjuĝoj rapide forviŝiĝos, kaj la regado de frateco fine stariĝos solide kaj daŭre. Rimarku, ke jam hodiaŭ la suverenoj mem, pelate de ia nevidebla mano, prenas — io antaŭe neaŭdita de vi! — la iniciativon de reformoj, kaj reformoj, venantaj de supre kaj spontanee, estas multe pli rapidaj kaj daŭraj ol tiuj, venantaj de malsupre kaj elprenitaj per forto. Malgraŭ antaŭjuĝoj de infaneco kaj edukado, malgraŭ la kulto al memoro, mi antaŭsentis la nunan tempon; mi pro tio estas feliĉa kaj ankoraŭ pli feliĉa, ke mi venas, por diri al vi: Fratoj, kuraĝon! Laboru por vi kaj por la estonteco de viaj karuloj; laboru precipe por via persona pliboniĝo, kaj vi ĝuos, en via unua ekzistado, feliĉon, kiun vi apenaŭ povus imagi kaj pri kiu estus por mi malfacile ĝin komprenigi al vi.

CHATEAUBRIAND.

III

Mi pensas, ke Spiritismo estas tute filozofia studo de la sekretaj kaŭzoj, de la internaj movoj de la animo, ĝis hodiaŭ malmulte aŭ neniom difinitaj. Ĝi prefere klarigas, ol ĝi malkaŝas novajn horizontojn. La reenkarniĝo kaj la elprovaĵoj, kiujn la Spirito travivas, antaŭ ol atin-

gi la plej altan celon, estas ne malkaŝoj, sed grava konfirmo. Frapas min la veraĵoj, kiujn ĉi tiu rimedo konigas; mi diras "rimedo" intence, ĉar, laŭ mia sento Spiritismo estas ilo, kiu disbatas la barojn de la blindeco. La zorgo pri la moralaj demandoj estas ankoraŭ tute kreota; oni diskutas pri politiko, kiu agitas la ĝeneralajn interesojn, oni diskutas pri la privataj interesoj aŭ flamas ĉe la atakado aŭ la defendo de personoj; la sistemoj havas siajn partianojn aŭ siajn misfamigantojn, sed la moralaj veraĵoj, tiuj, kiuj estas la pano de la animo, la pano de la vivo, estas forlasitaj en la amasiĝinta polvo de la jarcentoj. En la okuloj de la popolamaso ĉiaj perfektigoj estas utilaj, escepte de tiu de la animo; ties edukado, ties altigo estas ĥimeroj taŭgaj, la plej multe, por okupi la liberajn horojn de la pastroj, de la poetoj, de la virinoj, ĉu kiel modo, ĉu kiel instruobjekto.

Se **Spiritismo** revivigas **Spiritualismon**, ĝi do havigos al la socio la impeton, kiu donas al unuj la internan dignon, al aliaj rezignacion, al ĉiuj la neceson altiĝi al la Superega Estulo, forgesita kaj ne konata de Siaj sendankaj kreitoj.

J.-J. ROUSSEAU.

IV

Se Dio sendas Spiritojn, por instrui la homojn, tiel estas por klarigi al ĉi tiuj iliajn devojn, por al ĉi tiuj montri la vojon, kiu povas malplilongigi iliajn elprovaĵojn kaj sekve plirapidigi ilian progresadon; nu, kiel la frukto atingas maturecon, tiel ankaŭ la homo venos al perfekteco. Sed krom la bonaj Spiritoj, kiuj deziras vian feliĉon, ekzistas ankaŭ la Spiritoj neperfektaj, kiuj deziras vian malfeliĉon; dum unuj vin pelas antaŭen, aliaj tiras vin malantaŭen. Via atento devas tute sin turni al la distingo inter unuj kaj aliaj, kaj la rimedo estas facila: nur penu kompreni, ke nenio, venanta de iu bona Spirito, povas malutili iun ajn, kaj ke ĉio malbona povas veni nur de iu malica Spirito. Se vi ne aŭskultas la saĝajn konsilojn de la Spiritoj, kiuj deziras vian feliĉon,

se vi ofendiĝas ĉe la veraĵoj, kiujn ili povas diri, estas do evidente, ke konsilas vin malicaj Spiritoj. Nur la fiero sola povas malhelpi, ke vi vidu vin tiaj, kiaj vi estas; sed se vi ĝin ne vidas mem, aliaj vidas ĝin anstataŭ vi, kaj tial vin mallaŭdas ne nur la homoj, kiuj ridas vin post via dorso, sed ankaŭ la Spiritoj.

FAMILIARA SPIRITO.

V

Via Doktrino estas bela kaj sankta; la unua signilo estas starigita, kaj solide starigita. Nun vi devas nur ekmarŝi; la vojo antaŭ vi estas granda kaj majesta. Feliĉa tiu, kiu venos al la haveno; ju pli da prozelitoj li estos farinta, des pli multe estos al li kalkulite, sed por tio estas necese alpreni al si la Doktrinon ne malvarme: estas necese enporti flamon kaj tiu flamo duobliĝos, ĉar Dio estas kun vi ĉiam, kiam vi faras bonon. Ĉiuj, kiujn vi enkondukos, estos aliaj ŝafoj, revenintaj en la ŝafejon; kompatindaj iom devojiĝintaj ŝafoj! Kredu ja, ke tiu plej skeptika, plej ateista, fine, plej nekredema, nepre havas en la koro anguleton, kiun li volonte kaŝus antaŭ si mem. Nu, tian anguleton estas necese serĉi, estas necese trovi; ĝuste tiun vundeblan flankon estas necese ataki; ĝi estas breĉeto, kiun Dio intence lasas malfermita, por faciligi al Sia kreito la rimedon reveni en Lian sinon.

SANKTA BENEDIKTO.

VI

Ne senkuraĝiĝu antaŭ iaj baroj, iaj kontraŭdiroj.

Neniun turmentu per ia ajn insisto; la konvinko venos al la nekredemaj nur per via abnegacio, per via toleremo kaj per via karitemo por ĉiuj senescepte.

Gardu vin precipe, ke vi ne perfortu ies opinion, eĉ ne per via parolo aŭ per publikaj manifestadoj. Ju pli modestaj vi estos, des pli facile vi sukcesos fari vin estimataj. Nenia persona instigilo agigu vin, kaj vi trovos en viaj konsciencoj ian altiran forton, kiun nur bono havigas.

Laŭ la ordono de Dio la Spiritoj laboras por la progresado de ĉiuj senescepte; vi, spiritistoj, tion saman faru.

SANKTA LUDOVIKO.

## VII

Kia institucio homa, eĉ dia, ne renkontis barojn venkendajn, skismojn, kontraŭ kiuj ĝi devis batali? Se via ekzistado estus nur ia ekzistado malgaja kaj mortanta, oni vin ne atakus, sciante, ke vi nepre pereos de unu momento al alia; sed ĉar via vivipovo estas vigla kaj aktiva, ĉar la spiritisma arbo havas fortikajn radikojn, tial oni supozas, ke ĉi tiu povas vivi longe kaj oni provas ĝin haki. Kion atingos tiuj enviuloj? Ili dehakos maksimume iajn kelke da branĉoj, kies stumpoj reburĝonos kun nova suko kaj estos pli fortaj ol iam.

CHANNING.

## VIII

Mi nun parolos al vi pri la firmeco, kiun vi devas havi en viaj spiritismaj laboroj. Citaĵo pri ĉi tiu temo estas al vi jam farita; mi konsilas al vi ĝin kore studi kaj apliki al vi ĝian spiriton, ĉar, kiel Sankta Paŭlo, tiel ankaŭ vi estos persekutataj, ne en karno kaj osto, sed en spirito. La nekredemuloj, la viatempaj fariseoj vin insultos, vin mokos, sed vi timu nenion, tio estos provo, kiu vin plifortikigos, se vi scios konfidi vin al Dio, kaj iam vi vidos viajn klopodojn sukcesintaj. Tio estos por vi granda venko en la tago de la eterno, sed ne forgesu, ke en ĉi tiu mondo ĝi estas jam konsolo por tiuj, al kiuj mortis parencoj kaj amikoj; scii, ke ili estas feliĉaj, ke oni povas komunikiĝi kun ili, estas feliĉo. Marŝu do antaŭen; plenumu la mision, kiun Dio donas al vi, kaj ĝi estos al vi kalkulita en la tago, en kiu vi venos antaŭ la Ĉiopovan.

CHANNING.

IX

Mi venas, kiel iam, al la devojiĝintaj filoj de Izrael, alporti al vi veron kaj disbati la mallumon. Aŭskultu min. Spiritismo, kiel iam mia parolo, devas atentigi la nekredantojn al tio, ke super ili regas la neŝanĝebla vero: la Dio bona, la Dio granda, kiu ĝermigas la planton kaj levas la ondegojn. Mi revelacias la dian doktrinon; kiel rikoltisto, mi ligis en garbojn la bonon dissemitan en la homaro, kaj mi diris: Venu al mi, vi ĉiuj, kiuj suferas!

Sed la sendankaj homoj deturniĝis de la vojo rekta kaj larĝa, kiu kondukas al la regno de mia Patro, kaj prenis la malglatajn vojetojn de la malpieco. Mia Patro ne volas neniigi la homan rason; Li volas, ke, helpante unuj aliajn, mortintoj kaj vivantoj, tio estas, mortintoj laŭ la karno, ĉar morto ne ekzistas, vi kunlaboru unuj kun la aliaj kaj ke ne plu la voĉo de la profetoj kaj de l'apostoloj, sed la voĉo de tiuj, kiuj jam ne estas sur la Tero, admonu: Preĝu kaj kredu! ĉar la morto estas la reviviĝo, kaj la vivo estas provado elektita, dum kiu la virtoj, kiujn vi okaze kulturadis, kreskos kaj disvolviĝos kiel la cedro.

Malfortaj homoj, kiuj komprenas la mallumon de viaj intelektoj, ne forpuŝu la torĉon, kiun la dia boneco metas en viajn manojn, por lumigi vian vojon kaj vin rekonduki, perditajn infanojn, al la sino de via Patro.

Mi estas tro tuŝita de kompato al viaj suferoj, al via grandega malforteco, por ne etendi helpeman manon al la malfeliĉaj devojiĝintoj, kiuj, vidante la ĉielon, falas en la abismon de l'eraro. Kredu, amu, meditu pri l'aferoj revelaciataj al vi; ne miksu la lolon kun la bona grajno, utopiojn kun veraĵoj.

Spiritistoj! amu, jen la unua admono; instruu vin, jen la dua. Ĉiuj veraĵoj troviĝas en Kristanismo; la eraroj, enradikiĝintaj en ĝi, havas homan originon; kaj jen el trans la tombo, kiun vi opiniis la neniiĝo, voĉoj krias al vi: Fratoj! nenio pereas; Jesuo Kristo estas la venkanto de la malbono, estu venkantoj de la malpieco.

*Rimarko*. Ĉi tiu komunikaĵo, ricevita per unu el la plej bonaj mediumoj de la Spiritisma Societo de Parizo, estas subskribita de nomo, kiun la respekto permesas al mi malkaŝi nur kun ĉiu rezervo, tiel granda estus la altega favoro de ĝia aŭtentikeco kaj tial, ĉar oni ĝin tro ofte trouzis en evidente apokrifaj komunikaĵoj; tiu nomo estas Jesuo el Nazaret. Mi neniel dubas, ke li povas manifestiĝi; sed se la vere superaj Spiritoj tion faras nur en esceptaj cirkonstancoj, la prudento malpermesas al mi kredi, ke la plej purega Spirito respondus al la elvoko de ĉiu ajn; ĉiaokaze estus profanaĵo atribui al li ian parolon ne indan de li.

Pro ĉi tiuj konsideroj mi ĉiam detenis min publikigi ion, kio portus tiun nomon, kaj mi pensas, ke neniu estus tro prudenta en rilatas al tiaspecaj publikigoj, kiuj estas aŭtentikaj nur laŭ memestimo kaj kies plej malgranda malbonaĵo estas havigi armilojn al la kontraŭuloj de Spiritismo.

Kiel mi diris, ju pli alte staras la Spiritoj en la hierarkio, des pli nekonfide ilia nomo devas esti ricevata; oni devus havi grandan dozon da fiero, por flati al si, ke oni posedas la privilegion de iliaj komunikiĝoj kaj por opinii sin inda konversacii kun ili tute same, kiel kun siaj egaluloj. En la supra komunikaĵo nur unu aferon mi konstatas, nome la nekontesteblan superecon de la parolo kaj de la pensoj; al ĉiu mi lasas la zorgon juĝi, ĉu tiu, kies nomon ĝi portas, ĝin ne forneus. (*)

## Pri la mediumoj

X

Ĉiuj homoj estas mediumoj, ĉiu havas apud si iun Spiriton, kiu lin gvidas al bono, kiam li scias tiun aŭskulti. Nu, ĉu kelkaj homoj komunikiĝas senpere kun

(*) Anstataŭ traduki la komunikaĵon, publikigitan en la originalo de ĉi tiu verko, ni preferis represi preskaŭ egalan mesaĝon el "La Evangelio laŭ Spiritismo", Ĉap. VI; tion ni faris, ĉar ĉi tiu lasta aperis pli malfrue ol "La Libro de la Mediumoj", resp. en 1864 kaj en 1861, kaj tre verŝajne Kardec poste trovis pli bona la duan, ol la unuan formon. Ni rimarku ankaŭ, ke en "La Evangelio laŭ Spiritismo" Kardec malkaŝis la Aŭtoron de tiu komunikaĵo, t.e. "La Spiriton de Vero", alian nomon de Jesuo. — *La Trad*.

tiu Spirito per aparta mediumeco, ĉu aliaj lin aŭdas nur per la voĉo de la koro kaj de la intelekto, tio ne estas grava: tio estas iu familiara Spirito, kiu ilin konsilas. Nomu lin spirito, prudento, inteligento, ĝi estas tamen ia voĉo, kiu respondas al via animo kaj diras al vi bonajn parolojn; okazas nur, ke vi ilin ne ĉiam komprenas. Ne ĉiuj scias agi laŭ la konsiloj de la prudento, ne de tiu prudento, kiu pli bone treniĝas kaj rampas, ol ĝi iras, tiu prudento, kiu perdiĝas meze en materialaj kaj malnoblaj interesoj, sed tiu prudento, kiu levas la homon super si mem, kiu transportas lin en nekonatajn regionojn; sankta flamo, kiu inspiras la artiston kaj la poeton, dia penso, kiu altigas la filozofon, impeto, kiu pelas la individuojn kaj popolojn, prudento, kiun la vulgarularo ne povas kompreni, sed kiu suprenportas la homon kaj alproksimigas lin al Dio, pli ol iu alia kreaĵo, intelekto, kiu scias konduki lin de la konataĵo al nekonataĵo kaj kiu igas lin fari la plej superbelajn aferojn. Aŭskultu do tiun internan voĉon, tiun bonan genion, kiu senĉese parolas al vi, kaj vi iom post iom sukcesos aŭdi vian gardantan anĝelon, kiu etendas al vi la manon el la supro de la ĉielo. Mi ripetas: la interna voĉo, kiu parolas al la koro, estas la voĉo de la bonaj Spiritoj, kaj ĝuste el ĉi tiu vidpunkto ĉiuj homoj estas mediumoj.

CHANNING.

## XI

La mediumeco estas kapablo tiel malnova, kiel la mondo. La profetoj estis mediumoj; la misteroj en Eleŭziso baziĝis sur la mediumeco; la Ĥaldeoj, la Asirianoj havis mediumojn; Sokrato estis direktata de Spirito, kiu inspiradis al li mirindajn principojn de lia filozofio: li aŭdadis ties voĉon. Ĉiuj popoloj havis siajn mediumojn, kaj la inspiroj al Johana d'Arc estis nenio alia, ol la voĉo de bonfarantaj Spiritoj, kiuj ŝin gvidadis. Tiu kapablo, kiu nun disvastiĝas, fariĝas pli malofta dum la mezaj jarcentoj, sed ĝi neniam ĉesis. Swedenborg kaj liaj adeptoj faris multenombran skolon. La Franclando de la lastaj jarcentoj, mokema kaj okupita de ia filozo-

fio, kiu, pretendante ekstermi la ekscesojn de la religia netoleremo, sufokadis per ridindigo ĉion, kio estis ideala, Franclando devis forpuŝi Spiritismon, kiu ne ĉesis progresadi en la nordo. Dio permesis tiun bataladon de la ideoj pozitivaj kontraŭ la ideoj spiritualismaj, car la fanatikeco estis fariĝinta armilo de ĉi tiuj lastaj. Nun, kiam la progresoj de la industrio kaj de la sciencoj disvolvis la arton de bonvivado, ĝis tia grado, ke la materialaj inklinoj fariĝis superregantaj, Dio volas, ke la Spiritoj revenu por la interesoj de la animo; Li volas, ke la perfektiĝo de la homo morala fariĝu tio, kio ĝi ja devas esti, t. e. la fino kaj la celo de la vivo. La homa Spirito iras necesan vojon, bildon de la gradiĝo, kiun trapasas ĉio, kio loĝatigas la videblan kaj la nevideblan Universon. Ĉia progreso venas en sia tempo; la tempo de la morala altiĝo venis por la homaro; tiu altiĝo ne plenumiĝos ankoraŭ dum viaj tagoj, sed danku la Sinjoron, ke vi ĉeestas la benatan aŭroron.

PIERRE JOUTY (patro de la mediumo).

## XII

Dio komisiis min, por plenumi mision ĉe la kredantoj, kiujn Li favoras per la mediumato (*). Ju pli da gracoj ili ricevas de la Plejalta, des pli da danĝeroj ili travivas, kaj tiuj danĝeroj estas des pli grandaj, ĉar ili naskiĝas el la favoroj mem, kiujn Dio al la homoj konsentas. La kapabloj, kiujn la mediumoj posedas, gajnigas al ili laŭdojn de la homoj; gratuloj, flataĵoj — jen ilia rifo. Tiuj samaj mediumoj, kiuj devus ĉiam tenadi en la memoro sian antaŭan nekapablecon, ĝin forgesas; ili eĉ estas pli kuraĝaj: kion ili ŝuldas nur al Dio, tion ili atribuas al sia propra merito. Kio do okazas? La bonaj Spiritoj ilin forlasas, ili fariĝas ia marioneto de la malicaj kaj jam havas nenian kompason, por sin orienti; ju pli kapablaj ili fariĝas, des pli instigataj ili estas alskribi al si meriton, kiu ne apartenas al ili, ĝis Dio ilin

(*) *Mediumato*: vd. la glosaron. — *La Trad.*

punas, forprenante de ili kapablon, kiu al ili povas de tiam esti nur fatala.

Mi ne povas deteni min memorigi al vi, ke vi rekomendu vin al via gardanĝelo, por ke li helpu al vi ĉiam gardi vin kontraŭ via plej kruela malamiko, nome fiero. Memoru ja, vi, kiuj estas feliĉaj esti la perantoj inter la Spiritoj kaj la homoj, ke, sen la apogo de via dia Majstro, vi estos punataj pli severe, ĉar vi estas pli favoritaj.

JOHANA D'ARC.

XIII

Kiam vi volos ricevi komunikaĵojn de bonaj Spiritoj, estas grave, ke vi preparu vin por tiu favoro per enmemiĝo, per puraj intencoj kaj per la deziro fari bonon, celante la ĝeneralan progresadon, ĉar memoru, ke egoismo estas baro kontraŭ ĉiu paŝo antaŭen. Memoru, ke se Dio permesas al kelkaj el vi ricevi la blovon de iuj el Liaj infanoj, kiuj pro sia konduto sciis meriti la feliĉon kompreni Lian senliman bonecon, tiel estas tial, ĉar Li ja volas, laŭ nia peto kaj konsidere al viaj bonaj intencoj, havigi al vi la rimedojn iradi antaŭen sur via vojo. Nu, mediumoj, profitu el tiu kapablo, kiun Dio bonvolis konsenti al vi. Fidu la pacanimecon de nia Majstro; ĉiam praktikadu kariton; neniam laciĝu praktiki ĉi tiun superegan virton, kiel ankaŭ toleremon. Viaj agoj ĉiam harmoniu kun via konscienco, kaj tiel vi havos senduban rimedon multobligi vian feliĉon en ĉi tiu pasema vivo kaj prepari ankoraŭ multege pli dolĉan ekzistadon.

Tiu mediumo, ĉe vi, kiu ne sentus en si sufiĉan forton por persisti en la spiritisma instruado, sin detenu, ĉar, ne profitigante la lumon, kiu lumigas al li, malpli pardoninda li estas, ol iu alia, kaj li devas elpagi sian blindecon.

PASCAL.

XIV

Mi hodiaŭ parolos al vi pri la neprofitamo, kiu devas esti unu el la esencaj kvalitoj de la mediumoj, tiel

same, kiel la modesteco kaj la sinoferemo. Dio donis al ili tiun kapablon, por ke ili helpu la dissemadon de la vero, sed ne, por ke ili negocu per ĝi; tiel dirante, mi ne parolas nur pri tiuj, kiuj volus ĝin ekspluati, kiel ili ekspluatus ian ordinaran talenton, kiuj ekprenus la rolon de mediumoj, same kiel oni faras sin dancisto aŭ kantisto, sed pri ĉiuj, kiuj pretendus uzi ĝin por iaj ajn profitaj celoj. Ĉu estas racie kredi, ke bonaj Spiritoj, kaj des malpli Superaj Spiritoj, kiuj kondamnas profitamon, konsentas esti pretaj al spetakloj, kaj, kiel kunludantoj, sin metas al la dispono de ia entreprenisto de manifestiĝoj de Spiritoj? Ankaŭ neracie estas supozi, ke bonaj Spiritoj povas favori fieron kaj ambicion. Dio permesas al ili komunikiĝi kun la homoj, por ĉi tiujn forpreni el la surtera ŝlimejo, sed ne por servi kiel iloj al la mondaj pasioj. Li do ne povas vidi plezure tiujn, kiuj deturnas de ĝia efektiva celo la naturdoton, kiun Li donas al ili, kaj mi asertas al vi, ke ili estos punataj, ankoraŭ en ĉi tiu mondo, per la plej amaraj disreviĝoj.

DELPHINE DE GIRARDIN.

## XV

Ĉiuj mediumoj estas nekontesteble vokitaj, por servi al la afero Spiritismo laŭmezure de sia kapableco, sed malmultaj estas tiuj, kiuj ne lasas sin implikiĝi en la kaptilo de memestimo: ĉi tiu estas provilo, kiu malofte ne efikas; tial, inter cent mediumoj vi apenaŭ trovos unu, kiel ajn maleminenta li estas, kiu sin ne opiniis, en la unua tempo de sia mediumeco, vokita al la ricevo de plej altaj aferoj kaj antaŭdestinita por grandaj misioj. Tiuj, kiuj subfalis al tiu vanta espero — kaj ilia nombro estas granda —, fariĝas nepra kaptaĵo de obsedantaj Spiritoj, kiuj ilin baldaŭ subjugigas, flatante ilian fieron kaj ilin kaptante je ilia malforta flanko; ju pli alte ili volis leviĝi, des pli ridinda estas ilia falo, se nur ĝi ne estas pereiga por ili. La grandaj misioj estas konfidataj nur al elektitaj, kaj Dio mem lokas tiujn homojn, sen ilia peno ĝin serĉi, en la medio kaj pozicio, kie ilia kunhelpo povos esti efika, Mi ne ĉesos rekomendi al la

nespertaj mediumoj malfidi tion, kion iuj Spiritoj povos diri al ili, tuŝante la supozatan rolon, al kies ludado ili estus vokitaj, ĉar se ili prenos ĝin serioze, ili rikoltos nur desapontiĝojn en ĉi tiu mondo kaj severan punon en la alia. Ili ja konvinkiĝu, ke en la modesta kaj senfama sfero, kie ili estas lokitaj, ili povas fari grandajn servojn, helpante al la konvertado de nekredantoj aŭ konsolante afliktitojn; se ili devos eliri el ĝi, ili estos kondukataj de ia nevidebla mano, kiu preparos la vojon, kaj metitaj en la lumrondon, por tiel diri, pretervole. Ili memoru jenajn vortojn: "Kiu sin plialtigos, tiu estos humiligita; kaj kiu sin humiligos, tiu estos plialtigita" (*).

La SPIRITO DE VERO.

## Pri la societoj de spiritistoj

*Noto*. El la sekvantaj komunikaĵoj kelkaj estas ricevitaj en la Pariza Societo por Spiritismaj Studoj aŭ destinitaj por ĝi; aliaj, transdonitaj al mi de pluraj mediumoj, enhavas ĝeneralajn konsilojn pri la kunsidoj, ties konsistigo kaj la barojn, kiujn tiuj povas renkonti.

XVI

Kial vi ne komencas viajn kunsidojn per ĝenerala elvokado, ia preĝo, kiu inklinigus la ĉeestantojn al enmemiĝo? ĉar, sciu ja, sen enmemiĝo vi ricevos nur leĝerajn komunikaĵojn; la bonaj Spiritoj venas nur tien, kie oni ilin vokas fervore kaj sincere. Jen kion vi ne sufiĉe komprenas; koncernas do vin doni la ekzemplon; vin, kiuj, se vi volas, povas fariĝi unu el la kolonoj de la nova konstruaĵo. Ni plezure sekvas viajn laborojn kaj vin helpas, sed kondiĉe, ke vi de via flanko kunlaboru kun ni kaj montriĝu indaj je la misio, al kies plenumo vi estas vokitaj. Unuiĝu do en faskon, kaj vi estos fortaj, kaj la malicaj Spiritoj vin ne povos venki. Dio amas la simplajn en spirito, kio ne signifas la stultajn, sed

(*) Mateo, 23: 12. — *La Trad.*

tiujn, kiuj abnegacias sin mem kaj venas al Li sen fiero. Vi povas fariĝi lumilo por la homaro. Sciu do distingi inter la bona semo kaj la lolo; semu nur la bonan semon kaj gardu vin, ke vi ne dissemu la lolon, ĉar la lolo malhelpos la bonan semon burĝoni kaj vi respondus por la tuta malbono, kiun ĝi estos naskinta; tiel same, vi respondus por la pereigaj doktrinoj, kiujn vi eble propagandus. Memoru, ke iun tagon la mondo povos havi okulojn fiksitajn sur vi; agu do tiel, ke nenio malpliigu la brilon de la bonaj aferoj, kiuj venos el via sino; tial ni rekomendas al vi peti Dion helpi al vi.

SANKTA AŬGUSTENO.

Al la peto, ke li bonvolu dikti iun formulon de ĝenerala alvokado, Sankta Aŭgusteno respondis:

Vi scias, ke ekzistas nenia absoluta formulo; Dio estas tro granda, por alligi pli da graveco al vortoj, ol al la penso. Nu, ne kredu, ke sufiĉas diri iajn kelke da vortoj, por forpeli la malicajn Spiritojn. Gardu vin precipe, ke vi ne faru el tiuj vortoj unu el tiuj banalaj formuloj, kiujn oni recitas nur por trankviligi sian konsciencon; la efikeco de iu formulo kuŝas en la sincereco de la sento, kiu ĝin eldiras; ĝi troviĝas precipe en la unuanimeco de la intenco, ĉar neniu el tiuj, kiuj ne partoprenus en ĝi per la koro, povus ĉerpi el ĝi ian profiton kaj ankaŭ profitigi el ĝi aliajn. Redaktu ĝin do vi mem kaj submetu ĝin al mi, se vi volos; mi vin helpos.

*Noto*. La sekvanta formulo de ĝenerala alvoko estas redaktita kun la kunhelpo de tiu Spirito, kiu kompletigis ĝin en pluraj lokoj:

"Dio Ĉiopova, ni petas Vin venigi al ni bonajn Spiritojn, por nin helpi, kaj forpeli tiujn, kiuj povus konduki nin en eraron; donu al ni la lumon necesan, por distingi inter vero kaj mistifiko.

"Forpelu ankaŭ la malicajn Spiritojn, kiuj povus dissemi malkonkordon inter ni, vekante ĉe ni envion, fieron kaj ĵaluzon. Se kelkaj el tiaj provus enŝoviĝi ĉi tien, en Via nomo ni petegus ilin foriri.

“Bonaj Spiritoj, kiuj prezidas en niaj laboroj, volontu veni instrui nin kaj faru nin obeemaj al viaj konsiloj. Faru, ke ĉia persona sento estingiĝu en ni antaŭ la penso pri la ĝenerala bono.

“Ni petas precipe..., nian ĉefan protektanton, bonvoli alporti al ni hodiaŭ sian kunhelpon.”

XVII

Miaj amikoj, lasu min doni al vi konsilon, ĉar vi paŝas sur nova kampo, kaj se vi iros la vojon, kiun mi montras al vi, vi ne deflankiĝos. Oni diris al vi ion ja veran kaj kion ni volas rememorigi al vi, nome, ke Spiritismo estas nenio alia ol moralo, kaj ke ĝi devas ne transpaŝi, aŭ nur malmulte, la limojn de la Filozofio, se ĝi ne volas fariĝi objekto de scivolemo. Flanken metu la demandojn de sciencoj: la misio de la Spiritoj estas ne tio, solvi ilin, ŝparigante al vi la penon de la esploroj, sed klopodi por fari vin pli bonaj, ĉar nur tiel vi efektive progresos.

SANKTA LUDOVIKO.

XVIII

Oni mokis la turniĝantajn tablojn, sed oni neniam mokos la filozofion, la saĝecon kaj la kariton, kiuj lumas en la seriozaj komunikaĵoj. Tio estis la antaŭĉambro de la scienco; tie, enirante, ĉiu devas delasi siajn antaŭjuĝojn, tute same, kiel oni ĉe enirejo demetas sian mantelon. Mi ne trovas superflue admoni vin fari el via kunsidejo seriozan centron. Aliloke oni faru fizikajn eksperimentojn, **aliloke oni observu, aliloke oni aŭdu, sed ĉe vi oni komprenu kaj amu**. Kiel vi pensas, kio vi estas en la okuloj de la Superaj Spiritoj, kiam vi igas tablon turniĝi aŭ leviĝi? Lernejanoj. Ĉu scienculo pasigas la tempon ripetante la abocon de la scienco? Vidante vin strebi al komunikaĵoj seriozaj, oni, kontraŭe, rigardas vin kiel homojn seriozajn, kiuj serĉas la veron.

SANKTA LUDOVIKO.

Demandite, ĉu per tia parolo li intencis malaprobi la fizikajn manifestiĝojn, Sankta Ludoviko respondis:

"Mi ne povus malaprobi la fizikajn manifestiĝojn, ĉar, se ili okazas, tiel estas kun la permeso de Dio kaj por utila celo; dirante, ke ili estis la antaŭĉambro de la scienco, mi asignas al ili ilian efektivan lokon kaj mi konfesas ilian utilecon. Mi kondamnas nur tiujn, kiuj faras el ili ian ilon por amuzo kaj scivolobjekton, ne rikoltante el ili la instruon, kiu estas ilia sekvo; tiuj rilatas al la filozofio de Spiritismo, kiel gramatiko al la literaturo, kaj kiu atingis certan gradon en iu scienco, tiu ne plu perdas tempon, ripetante ĝiajn elementojn."

XIX

Miaj amikaj kaj fidelaj kredantoj, mi estas ĉiam feliĉa povi direkti vin sur la vojo de bono; tio estas agrabla misio, kiun Dio konfidas al mi kaj pri kiu mi estas fiera, ĉar esti utila estas ĉiam rekompenco. La spirito de karito kunligu vin, kiel la karito donanta, tiel ankaŭ la karito amanta. Montru vin paciencaj ĉe la insultoj de la nigrigantoj; estu firmkoraj en bonfarado kaj, precipe, humilaj antaŭ Dio. Nur humileco altigas: ĝi estas la sola grandeco, kiun Dio rekonas. Nur tiam la bonaj Spiritoj venos al vi, alie la Malbonulo ekposedas vian animon. Estu benitaj en la nomo de la Kreinto, kaj vi kreskos en la okuloj de la homoj, samtempe kiel en la okuloj de Dio.

SANKTA LUDOVIKO.

XX

Unueco donas fortecon: estu unuiĝintaj, por esti fortaj. Spiritismo ĝermis, elmetis profundajn radikojn kaj etendos sur la Tero siajn bonfarantajn branĉojn. Vi devas fariĝi nevundeblaj por la venenaj sagoj de la kalumnio kaj de la nigra falango de la malkleraj, egoistaj kaj hipokritaj Spiritoj. Por ke vi tion atingu, reciprokaj indulgemo kaj bonvolemo regu en viaj interrilatoj, viaj malfortaĵoj estu preterviditaj, estu rimarkitaj nur viaj

bonaj kvalitoj; la torĉo de la sankta amikeco kunigu, prilumu kaj varmigu viajn korojn, kaj vi rezistos al la senpotencaj atakoj de malbono, same kiel la neŝanceblebla roko al la fuzioza ondo.

SANKTA VINCENTO DE PAŬLO.

XXI

Miaj amikoj, vi volas aranĝi grupon da spiritistoj, kaj mi ĝin aprobas, ĉar la Spiritoj ne povas vidi plezure mediumojn, kiuj staradas izolite. Dio donis al ili tiun noblegan kapablon ne por ili solaj, sed por la ĝenerala bono. Komunikiĝante kun aliaj, ili havas multegon da oportunaj okazoj instruiĝi pri la merito de la mesaĝoj, kiujn ili ricevas, dum, solaj, ili pli ĝuste troviĝas sub la potenco de memsogemaj Spiritoj, kiuj pli plezuras, ke ili ne estas sub ia kontrolo. Jen mia parolo al vi, kaj se fiero vin ne regas, vi tion komprenos kaj el tio profitos. Jen nun al la ceteraj.

Ĉu vi bone konscias, kio devas esti grupo da spiritistoj? Ne, ĉar en via fervoro vi pensas, ke tio plej bona estas kolekti la kiel eble plej grandan nombron da homoj, por ilin konvinki. Seniluziiĝu: ju pli malmultaj vi estos, des pli multe vi atingos. Precipe per la morala aŭtoritato, kiun vi havos, vi altiros al vi la nekredantojn, multe pli efike, ol per la fenomenoj, kiujn vi ricevos. Se vi altiros nur per la fenomenoj, oni venos por vidi vin nur el scivolemo kaj vi trovos scivolulojn, kiuj vin ne kredos kaj vin ridos; se inter vi oni vidos nur homojn estimindajn, eble oni ne tuj vin kredos, sed oni vin respektos, kaj respekto ĉiam inspiras konfidon. Vi estas konvinkitaj, ke Spiritismo devas alporti moralan reformon; via grupo la unua donu la ekzemplon de la kristanaj virtoj, ĉar en ĉi tiu tempo de egoismo ĝuste en la societoj de spiritistoj la vera karito devas trovi rifuĝon (*). Tia devas esti, miaj amikoj, grupo da veraj

(*) Mi konas sinjoron, kiu estis akceptita en konfidoficon en grava firmo, ĉar li estis sincera spiritisto. Oni opiniis, ke lia kredo estas garantio de lia moraleco. — *Noto de la Aŭtoro*.

spiritistoj. Ian alian fojon mi donos al vi novajn konsilojn.

FÉNELON.

## XXII

Vi demandis min, ĉu la multo da grupoj en unu sama regiono ne povus naski konkuradon malutilan por la Doktrino. Pri tio mi respondas al vi, ke homoj, penetritaj de la veraj principoj de tiu Doktrino, vidas ĉe ĉiuj spiritistoj ne konkurantojn, sed fratojn; tiuj, kiuj vidus strabe aliajn grupojn, montrus, ke ĉe ili ekzistas ia kaŝita penso je intereso aŭ memestimo kaj ke ilin ne gvidas la amo al vero. Mi asertas al vi, se estus ĉe vi tiaj homoj, ili baldaŭ inter vi dissemus tumulton kaj malkonkordon. La vera Spiritismo havas kiel devizon **bonvolemon kaj kariton**; ĝi esceptas ĉian alian konkuradon krom tiu de la bono, kiun oni povas fari. Ĉiuj grupoj, kiuj skribos tiun devizon sur sia standardo, povos unu al alia etendi la manojn kiel bonaj najbaroj, kiuj ne estas malpli amikaj, kvankam ne loĝante en la sama domo. Tiuj, kiuj pretendos posedi la plej bonajn Spiritojn kiel gvidantojn, devos ĝin pruvi, elmontrante la plej bonajn sentojn. Inter ili okazu batalo, sed batalo de animgrandeco, abnegacio, boneco kaj humileco; kiu unua ĵetus ŝtonon sur alian, tiu vidigus, nur per tio, ke li estus instigata de malicaj Spiritoj. La kvalito de la sentoj, kiujn du homoj portas unu por la dua, estas la provilo, kiu konatigos la kvaliton de la Spiritoj, kiuj ilin helpas.

FÉNELON.

## XXIII

Silento kaj enmemiĝo estas kondiĉoj esencaj por ĉiaj seriozaj komunikaĵoj. Tion vi neniam atingos de tiuj, altiritaj al viaj kunsidoj nur el scivolemo; invitu do la scivolulojn iri amuziĝi aliloke, ĉar ilia distriĝo estus kaŭzo de konfuzo.

Toleru nenian konversacion, dum Spiritoj estas demandataj. Vi iafoje ricevas komunikaĵojn, kiuj postulas

de vi seriozajn kontraŭparolojn kaj ne malpli seriozajn respondojn de la elvokitaj Spiritoj, kiuj, ja kredu, ĉagreniĝas ĉe la kontinuaj flustradoj de iaj ĉeestantoj. El tio venas nenio kompleta nek efektive serioza; ankaŭ la skribanta mediumo mem tiam spertas momentojn de distriĝo, tre malutilajn por lia servado.

SANKTA LUDOVIKO.

XXIV

Mi parolos al vi pri la neceso, ke vi en viaj kunsidoj observu la plej grandan regulecon, t. e. ke vi evitu ĉian konfuzon, ĉian malkonsenton de ideoj. Malkonsento favoras la substituiĝon de la malicaj Spiritoj anstataŭ la bonaj, kaj preskaŭ ĉiam la unuaj kaptas la proponitajn demandojn. Aliflanke, en kunsido, en kiu partoprenas elementoj diversaj kaj nekonataj unu al alia, per kia rimedo eviti interkontraŭajn pensojn, distriĝon aŭ, ankoraŭ pli malbone, ian mokan indiferentecon? Tian rimedon, efikan kaj trafan, mi ja volus trovi. Ĝi eble troviĝas en la koncentrado de la fluidaĵoj, ĉirkaŭantaj la mediumojn. Ili solaj, sed precipe tiuj, kiuj estas amataj, retenas la bonajn Spiritojn en la kunsido, sed ties influo apenaŭ sufiĉas, por forpeli la bandon de la frivolaj Spiritoj. La laboro de la ekzamenado de la komunikaĵoj estas bonega; neniam superflue estas profunde esplori la demandojn kaj precipe la respondojn; erari estas facile, eĉ por tiuj Spiritoj, portantaj la plej bonajn intencojn. La malrapideco de la skribado, dum kiu la Spirito deturnas sin de la temo, tuj kiam li ĝin konceptis, la ŝanĝiĝemo kaj indiferenteco por iaj interkonsentitaj formoj, ĉiuj ĉi motivoj kaj multe da aliaj trudas al vi la devon ne absolute fidi tion, kion vi ricevos, kaj ĝin ĉiam submeti al ekzamenado, eĉ tiam, kiam tio estas la plej aŭtentikaj komunikaĵoj.

GEORGO (familiara Spirito).

XXV

Por kia celo vi plej ofte petas komunikaĵojn de la

Spiritoj? Por ekhavi belajn literaturaĵojn, kiujn vi montros al viaj konatoj kvazaŭ specimenojn de via talento; vi ilin avare konservas en viaj albumoj, sed en viaj koroj ili ni trovas lokon. Ĉu vi kredas, ke nin tre flatas veni pozi en viaj kunsidoj, kvazaŭ en ia konkurso, fari turniron de elokventeco, por ke vi povu diri, ke la seanco estis tre interesa? Kion vi profitus, kiam vi trovis mirinda iun komunikaĵon? Ĉu vi pensas, ke ni venus, por ricevi viajn aplaŭdojn? Seniluziiĝu; ni ne amas amuzi vin en unu maniero, pli, ol en alia. De via flanko ankoraŭ tie estas scivolemo, kiun vi vane maskas; nia celo estas plibonigi vin. Nu, kiam ni konstatas, ke niaj paroloj ne donas fruktojn kaj ke ĉio ĉe vi limiĝas je ia senrezulta aprobo, ni serĉas pli obeemajn animojn; ni tiam lasas veni anstataŭ ni tiujn Spiritojn, kiuj volas nenion alian, ol paroli, kaj tiaj ne mankas. Mirigas vin, ke ni konsentas al ili preni nian nomon: kio grava ĝi estas por vi, se ja en tio ekzistas por vi nenia diferenco? Sed sciu, ke ni tion ne permesus rilate al tiuj, por kiuj ni portas efektivan intereson, t. e. al tiuj, kun kiuj ni ne perdas nian tempon; tiuj estas niaj preferatoj, kaj ni gardas ilin kontraŭ mensogo. Se vi do estas tiel ofte trompataj, rilatigu tion nur al vi mem. Laŭ ni la serioza homo estas ne tiu, kiu sin detenas ridi, sed tiu, kies koro estas tuŝata de niaj paroloj, tiu, kiu pri ili meditas kaj el ili profitas. (Vd. § 268, demand. XIX kaj XX.)

MASSILLON.

## XXVI

Spiritismo devas esti ia egido kontraŭ la spirito de malkonkordo kaj disputado, sed tiu spirito jam de eterne svingadas sian torĉon super la homoj, ĉar ĝi envias la feliĉon, kiun havigas paco kaj unueco. Spiritistoj! ĝi povos do penetri en viajn kolektiĝojn, kaj, ne dubu, ĝi penos tie dissemi malamon, sed ĝi estos senpova kontraŭ tiuj, kiuj portas la veran kariton. Tenadu vin do garde kaj senĉese vigle staradu ĉe la pordo de via koro, kiel ankaŭ ĉe tiu de viaj kolektiĝoj, por tien ne enlasi la malamikon. Se viaj penoj estas senfortaj kontraŭ tiu eks-

tera, dependas ĉiam de vi bari kontraŭ la malamiko la eniron en vian animon. Se inter vi leviĝus malharmonioj, tiujn povus instigi nur malicaj Spiritoj; tiuj do, kiuj plej altgrade portos la senton pri devoj, kiun al ili trudas la ĝentileco kaj ankaŭ la vera Spiritismo, montriĝu kiel la plej paciencaj, la plej dignaj kaj la plej akordigemaj. La bonaj Spiritoj iafoje povas permesi tiajn batalojn, por havigi, kiel al bonaj, tiel ankaŭ al malbonaj, oportunan okazon por elmontriĝi, por disigi la bonan semon for de la lolo, kaj ili estos ĉiam sur tiu flanko, kie ekzistos la plej multe da humileco kaj da vera karito.

SANKTA VINCENTO DE PAŬLO.

XXVII

Senkompate repuŝu ĉiujn tiujn Spiritojn, kiuj sin trudas kiel ekskluzivajn konsilantojn, predikante disigon kaj izoladon. Tio estas preskaŭ ĉiam vantamaj kaj senmeritaj Spiritoj, kiuj inklinas imponi al malfortanimaj kaj kredemaj homoj, ilin malavare flatante per ekscesaj laŭdoj, por ilin fascini kaj tenadi sub sia potenco. Tio estas ordinare Spiritoj, soifantaj povon, kiuj, publikaj aŭ privataj despotoj, kiam sur la Tero, ankoraŭ volas havi viktimojn, kiujn ili tiranus post la morto. Entute malfidu komunikaĵojn, kiuj havas karakteron de mistikismo kaj strangeco aŭ preskribas ekstravagancajn ceremoniojn kaj agojn: tiam ĉiam ekzistas prava motivo por suspekto.

Aliflanke, kredu, ke kiam iu veraĵo devas esti malkaŝita al la homaro, ĝi estas, por tiel diri, tuj komunikata en ĉiuj seriozaj grupoj, posedantaj seriozajn mediumojn, sed ne al tiaj aŭ tiaj, ekceptinte ĉiujn ceterajn. Neniu estas mediumo perfekta, se li estas obsedita, kaj ekzistas evidenta obsedo, kiam iu mediumo kapablas ricevi komunikaĵojn nur de unu difinita Spirito, kiel ajn alte ĉi tiu penas sin mem loki. Sekve, ĉiu mediumo, ĉiu grupo, kiu opinias sin privilegiita per komunikaĵoj, kiujn ili solaj povas ricevi, kaj kiu, aliflanke, estas devigita fari agojn, kiuj ĝislimas superstiĉon, sendube troviĝas sub la mano de obsedo, el la plej bone karakterizitaj, precipe

tiam, kiam la superreganta Spirito paradas per nomo, kiun ĉiuj, Spiritoj kaj enkarnuloj, devas honori kaj respekti, kaj pri kiu ni devas ne permesi, ke ĝi estu ĉiuokaze kompromitita.

Estas nekontesteble, ke, submetante al la provilo de la prudento kaj de la logiko ĉiujn donitaĵojn kaj ĉiujn komunikaĵojn de la Spiritoj, oni facile formetus tion absurdan kaj eraran. Iu mediumo povas esti fascinita, iu grupo povas esti trompata, sed la severa kontrolado de la ceteraj grupoj, la akirita scio kaj la alta morala aŭtoritato de la grupestroj, la komunikaĵoj de la ĉefaj mediumoj kun stampo de logiko kaj aŭtentikeco de niaj plej bonaj Spiritoj, baldaŭ juste juĝos tiujn mensogajn kaj ruzajn diktatojn, venintajn de bando da trompemaj aŭ malicaj Spiritoj.

ERASTO (disĉiplo de Sta. Paŭlo).

*Rimarko.* Unu el la distingigaj trajtoj de tiuj Spiritoj, kiuj volas sin trudi kaj fari, ke estu akceptitaj eksterkutimaj kaj sistemaj ideoj, estas tio, ke ili pretendas — estus bone, se ili solaj havus tian opinion — esti pravaj kontraŭ ĉiuj. Ilia taktiko konsistas en tio, eviti diskutadon, kaj kiam ili vidas sin venkobatitaj per la nerezisteblaj armiloj de la logiko, tiam ili malŝate rifuzas respondi kaj ordonas al siaj mediumoj foriĝi el tiuj grupoj, kie iliaj ideoj ne estas akceptataj. Tiu izolado estas io plej fatala por la mediumoj, ĉar ili sen kontraŭbatalo suferas la jugon de tiuj obsedantaj Spiritoj, kiuj ilin gvidas kvazaŭ blindulojn kaj ilin ofte kondukas sur pereigaj vojoj.

## XXVIII

La falsaj profetoj ne troviĝas nur inter la enkarnuloj: tiaj estas ankaŭ, kaj ja en pli granda nombro, inter la fieraj Spiritoj, kiuj, sub la masko de amo kaj karito, dissemas malpacon kaj malfruigas la liberigan klopodadon de la homaro, malhelpe interĵetante siajn absurdajn sistemojn, kiujn ili trudas per siaj mediumoj; kaj por pli efike fascini tiujn, kiujn ili volas mistifiki, por pligravigi siajn teoriojn, ili sin senskrupule ornamas per nomoj, kiujn la homoj eldiras nur respektoplene, per tiuj

de juste respektegataj sanktuloj, kiel de Jesuo, de Maria, eĉ de Dio mem.

Tio estas ili, kiuj dissemas la fermenton de antagonismo inter la grupoj, ili, kiuj instigas ĉi tiujn izoliĝi unu de alia kaj sin reciproke rigardi strabe. Nur tio sufiĉus, por ilin senmaskigi, ĉar, tiel agante, ili mem plej formale neas la verecon de tio, kio ili pretendas esti. Blindaj estas do la homoj, kiuj lasas sin implikiĝi en tia abomeninda kaptilo.

Sed ekzistas aliaj rimedoj, por ilin ekkoni. Spiritoj de tiu klaso, pri kiu ili diras, ke ili apartenas al ĝi, devas esti ne nur tre bonaj, sed plej altgrade logikaj kaj racionalaj. Nu, pasigu iliajn sistemojn tra la kribrilo de la racio kaj de la simpla saĝo, kaj vi vidos, kio restos el tio. Konsentu do kun mi, ke ĉiam, kiam iu Spirito indikas kiel riparilon kontraŭ la malbonaĵoj de la homaro aŭ kiel rimedojn, por atingi ties transformiĝon, utopiajn kaj nepraktikeblajn aferojn, infanecajn kaj ridindajn disponojn, kiam li formulas sistemon, kiun kontraŭdiras la plej ordinaraj elementoj de la scienco, tiu povas esti nur malklera kaj mensogema Spirito.

Aliflanke, estu certa, ke se la vero ne ĉiam estas estimata de la individuoj, ĝi tia estas ĉiam de la komuna saĝo de la popolamasoj, kaj ankaŭ ĉi tio estas kriterio por juĝado. Se du principoj kontraŭdiras unu la duan, vi povos taksi ilian propran valoron, serĉante tiun, kiu renkontas pli da eĥo da simpatio; estus, efektive, nelogike akcepti, ke iu doktrino, kies anoj estas ĉiam malplinombraj, estus pli vera, ol tiu, kiu kreskus rilate la nombron de siaj adeptoj. Volante, ke la vero venu al ĉiuj, Dio ne enfermas ĝin en ia malvasta kaj limita rondo, sed aperigas ĝin en diversaj lokoj, por ke ĉie la lumo estu apud la mallumo.

ERASTO.

*Rimarko.* La plej bona garantio, ke iu principo estas la esprimo de la vero, estas tio, ke ĝi estas instruata kaj malkaŝata de diversaj Spiritoj per mediumoj ne konataj unu al alia kaj en diversaj lokoj, kaj ankaŭ, ke ĝi estas konfirmata de la prudento kaj sankciata de la aliĝo de la plej granda

nombro da homoj. Nur la vero povas doni radikojn al iu doktrino; iu erara sistemo povas ja varbi kelke da partianoj, sed, ne havante la unuan kondiĉon de vivipovo, ĝi estas efemera. Oni do ne maltrankviliĝu pro ĝi: ĝi pereas dank'al siaj propraj eraroj kaj nepre falos antaŭ la potenca armilo de la logiko.

## Apokrifaj komunikaĵoj

Multe da komunikaĵoj ekzistas tiel absurdaj, kvankam subskribitaj de la plej respektindaj nomoj, ke la plej ordinara komuna saĝo pruvas ilian falsecon; sed ekzistas aliaj, en kiuj la eraro estas maskita sub bonaj aferoj, kiuj faras iluzion kaj iafoje malhelpas kapti ĝin ĉe la unua rigardo; tiuj tamen ne rezistus al serioza ekzameno. Mi citos nur kelkajn el ili kiel specimenon.

XXIX

La eterna kaj senĉesa kreado de la mondoj estas por Dio ia ĉiama ĝuo, ĉar Li senhalte vidas Siajn radiojn fariĝi kun ĉiu tago pli lumaj en feliĉo. Antaŭ Dio ekzistas nek nombro nek tempo. Jen kial centoj aŭ miliardoj estas antaŭ Li nek pli nek malpli, unuj rilate aliajn. Li estas patro, kies feliĉo konsistas en la opa feliĉo de Liaj infanoj, kaj ĉe ĉiu sekundo de kreado Li vidas novan feliĉon fandiĝi en la ĝenerala feliĉo. Nek halto nek interrompo en tiu eterna movado, en tiu senĉesa granda feliĉo, kiu fruktigas la Teron kaj la Ĉielon. El la mondo oni konas nur malgrandan parton, kaj vi havas fratojn, kiuj vivas en regionoj, en kiujn la homo ankoraŭ ne sukcesis penetri. Kion signifas tiuj ondoj da rostanta varmo kaj da mortiga malvarmo, kiuj paralizas la penojn de la plej harditaj homo? Ĉu vi naive kredas, ke tie estas la limo de via mondo, kie vi ne povas pluen iradi per viaj bagatelaj rimedoj? Ĉu vi do povus ekzakte mezuri vian planedon? Ne kredu tion. Sur via planedo ekzistas pli da lokoj nekonataj, ol da konataj. Sed, ĉar estas senutile dissemi plue ĉiujn viajn malbonajn instituciojn, ĉiujn viajn malbonajn leĝojn, agojn kaj ekzistadojn, tial ekzistas limo, kiu vin haltigas tie kaj tie kaj kiu

vin haltigos tiel longe, ĝis vi devos transporti la bonajn semojn, kiujn faris via libera volo. Ho ne, vi ja ne konas tiun mondon, kiun vi nomas la Tero. Vi vidos jam de via ekzistado grandan komenciĝon de pruvoj pri ĉi tiu komunikaĵo. Jen sonos la horo, kiam montriĝos alia malkaŝo, ol la laste farita; jen plivastiĝos la rondo de via konata Tero, kaj kiam la tuta gazetaro kantos tiun Hosanon en ĉiuj lingvoj, tiam vi, kompatindaj infanoj, tion estos eksciintaj, antaŭ ol tiuj mem, kiuj donos sian nomon al la nova Tero.

VINCENTO DE PAŬLO.

*Rimarko*. El la vidpunkto de stilo ĉi tiu komunikaĵo ne rezistas al kritiko. La malkorektaĵoj, la pleonasmoj, la neperfektaj dirmanieroj falas en la okulojn al ĉiu eĉ plej malmulte instruita; sed tio neniel kondamnus la nomon, per kiu ĝi estas subskribita, se oni konsideras, ke tiuj neperfektaĵoj povus esti atribuitaj al la nesufiĉa kapableco de la mediumo, kiel mi jam montris. Kio estas de la Spirito, tio estas la ideo; nu, dirante, ke sur nia planedo ekzistas pli da lokoj nekonataj, ol da konataj, kaj ke ia nova kontinento estas eltrovota, li elmontras la plej profundan malklerecon. Sendube oni povas trans la glaciaj regionoj eltrovi iajn kelke da nekonataj teranguletoj, sed diri, ke tiuj regionoj estas loĝataj kaj ke Dio ilin kaŝis antaŭ la homoj, por ke ĉi tiuj ne enportu tien siajn malbonajn instituciojn, tio estas kredi la blindan konfidon de tiuj, en kiujn li enverŝus tiajn absurdojn.

## XXX

Miaj infanoj, nia mondo materia kaj la mondo spirita, kiun tiel malmultaj ankoraŭ konas, formas kvazaŭ du telerojn de la eterna pesilo. Ĝis hodiaŭ niaj religioj, niaj moroj kaj niaj pasioj tiel mallevis la teleron de malbono, por levi tiun de bono, ke oni vidas malbonon regi absolute sur la Tero. Jam de jarcentoj unu sama plendo elĝemas el la buŝo de la homo, kaj la nepra konkludo estas, ke Dio estas maljusta. Kelkaj eĉ kuraĝas nei la ekziston de Dio. Vi vidas ĉion tie ĉi kaj nenion tie; vi vidas la superfluaĵon, kiu vundas la bezonon, la oron, brilantan ĉe la koto; ĉiujn plej frapantajn kontrastojn,

kiuj devus pruvi al vi vian duopan naturon. De kie ĉi tio venas? Kies eraro ĝi estas? Jen kion oni devas esplori trankvile kaj senpartie; kiam oni sincere deziras trovi bonan rimedon, tiam oni ĝin trovas. Nu, malgraŭ tiu regado de malbono super bono, per via propra kulpo, kial vi ne vidas, ke la ceteraĵo ĝuste iradas la linion, strekitan de Dio? Ĉu vi vidas la sezonojn en malordo? varmon kaj malvarmon senkonsidere interfrapiĝi? la lumon de la suno forgesi prilumi la Teron? la grundon forgesi en sia sino la semojn, kiujn la homo tien enmetis? Ĉu vi vidas la ĉeson de la multego da konstantaj mirakloj, okazantaj antaŭ viaj okuloj, ekde la elŝpruco de la herbero ĝis la naskiĝo de la infano, la estonta matura homo? Ĉio iras bone sur la flanko de Dio, sed ĉio iras malbone sur la flanko de la homo. Kia estus la rebonigilo de tio? Ĝi estas tre simpla: alproksimiĝi al Dio, sin reciproke ami, unuiĝi, interkompreniĝi kaj trankvile iradi la vojon, kies signilojn oni vidas per la okuloj de la fido kaj de la konscienco.

VINCENTO DE PAŬLO.

*Rimarko.* Ĉi tiu komunikaĵo estas ricevita en tiu sama rondo, kiel la antaŭa, sed kia diferenco, ne nur pri la ideoj, sed ankaŭ pri la stilo! Ĉio ĉi tie estas ĝusta, profunda, saĝa, kaj Sankta Vincento de Paŭlo ĝin certe ne malkonfesus al si; tial oni povas sen timo ĝin atribui al li.

## XXXI

Nu, infanoj, densigu viajn vicojn! t. e. via solida unueco estu via forteco. Vi, kiuj laboras por la starigo de la granda konstruaĵo, viglu kaj ĉiam klopodu por firmigi ĝian fundamenton, kaj tiam vi povos levi ĝin tre alte, tre alte! La plimultiĝo estas grandega sur nia tuta planedo; sennombra kvanto da prozelitoj vice staras sub nia standardo; ankaŭ multe da skeptikuloj, eĉ el la plej nekredemaj, alproksimiĝas.

Iru, infanoj; marŝu kun brava, fidoplena koro; la vojo, kiun vi iras, estas bela; ne malrapidu; iru ĉiam la

rektan linion, servu kiel gvidantoj al tiuj post vi: ili estos feliĉaj, tre feliĉaj!

Marŝu, infanoj! Vi ne bezonas la forton de la bajonetoj, por subteni vian aferon: vi bezonas nur fidon. Kredo, frateco kaj unueco, jen viaj armiloj; kun ĉi tiuj vi estas fortaj, pli potencaj, ol ĉiuj grandaj potenculoj de la Universo, kuniĝintaj, malgraŭ iliaj vivantaj fortoj, iliaj flotoj, iliaj kanonoj kaj ilia mitrajlo!

Vi, kiuj bataladas por la libereco de la popoloj kaj por la revirtiĝo de la granda homa familio, iru vi infanoj; kuraĝon kaj persiston. Dio helpos al vi. Bonan nokton, ĝis revido.

NAPOLEONO.

*Rimarko.* Napoleono estis, sur la Tero, konsiderema kaj serioza homo. Ĉiuj konas lian simplan kaj koncizan stilon; li estus strange degenerinta se, mortinte, li estus fariĝinta multvortema kaj burleska. Ĉi tiu komunikaĵo eble estas de la Spirito de ia soldato, kiu estis nomata Napoleono.

## XXXII

Ne, oni ne povas transiri de unu religio en alian, kiam oni havas nenian, kiu povus kontentigi unutempe la komunan saĝon kaj la propran inteligenton kaj precipe havigi al la homo nunajn konsolojn. Ne, oni ne ŝanĝas sian religion, oni falas de la stulteco kaj superregado en la saĝecon kaj liberecon. Antaŭen, antaŭen, nia malgranda armeo! antaŭen, kaj ne timu la malamikajn kuglojn: tiuj, kiuj vin mortigos, ankoraŭ ne estas fanditaj, se nur vi ĉiam troviĝos, el la tuta koro, sur la vojo al Dio, t. e. se vi volas ĉiam bataladi pace kaj venke por la bonstato kaj la libereco.

VINCENTO DE PAŬLO.

*Rimarko.* Kiu rekonus Sanktan Vincento de Paŭlo laŭ ĉi tiu parolo, laŭ ĉi tiuj pensoj sen interligo kaj senco? Kion signifas jenaj vortoj: “Ne, oni ne ŝanĝas sian religion, oni falas de la stulteco kaj superregado en la saĝecon kaj liberecon”? Laŭ liaj kugloj, ankoraŭ ne fanditaj, mi forte sus-

pektas, ke tiu Spirito estis tiu sama, kiu supre subskribis Napoleono.

## XXXIII

Infanoj de mia kredo, kristanoj de mia doktrino, forgesita pro la interesoj de la ondoj de la filozofio de la materialistoj, sekvu min sur la vojo al Judujo, sekvu la kalvarion de mia vivo, rigardu miajn malamikojn nun, vidu miajn suferojn, miajn turmentojn kaj mian sangon, verŝitan por mia fido.

Infanoj, spiritualistoj de mia nova doktrino, estu pretaj por elteni, por spiti la ondojn de la malbonsorto, la sarkasmojn de viaj malamikoj. La fido marŝos, senĉese sekvante vian stelon, kiu kondukos vin sur la vojon de la eterna feliĉo, tiel same, kiel la stelo per la fido gvidis la reĝojn de Oriento ĝis la kripo. Kiaj ajn estas viaj sortobatoj, kiaj ajn viaj penoj kaj la larmoj, kiujn vi estos verŝintaj sur tiu ekzilejo, faru al vi kuraĝon, konvinkiĝu, ke la ĝojo, kiu plenigos vin en la mondo de la Spiritoj, staros multe super la turmentoj de via pasema ekzistado. La valo de malĝojo estas valo, kiu nepre malaperos, por cedi sian lokon al brilanta restadejo de ĝojo, frateco kaj unueco, kien vi venos dank'al via bona obeo al la sankta revelacio. La vivo, miaj karaj fratoj en tiu terglobo, tute prepara, ne povas daŭri pli, ol la tempon necesan, por ke oni vivu bone preparita por tiu vivo, kiu neniam povos finiĝi. Amu unu alian, amu vin reciproke tiel, kiel mi amis vin kaj kiel mi vin ankoraŭ amas. Fratoj, kuraĝon, fratoj! Mi benas vin; en la Ĉielo mi vin atendas.

JESUO.

En ĉi tiuj brilantaj kaj lumaj regionoj, kien la homa penso apenaŭ povas veni, la eĥo de viaj kaj miaj paroloj frapis mian koron.

Ho, de kia ĝojo mi sentas min inundita, vidante vin, la daŭrigantojn de mia doktrino! Ne, nenio eĉ malproksime egalas la ateston de viaj bonaj pensoj! Vi vidas, infanoj: la renoviga ideo, kiun mi iam ĵetis en la mond-

on, persekutata, momente haltigita sub la premo de tiranoj, de nun iradas sen baroj, prilumante la vojojn al la homaro, tiel longe droninta en mallumo.

Ĉia granda kaj abnegacia ofero, miaj infanoj, pli aŭ malpli frue donis siajn fruktojn. Mia martireco tion pruvis al vi: mia sango, verŝita por mia doktrino, savos la homaron kaj forviŝos la erarojn de la grandaj kulpuloj!

Estu benitaj, vi, kiuj hodiaŭ prenas al vi lokon en la revirtiĝinta familio! Antaŭen, kuraĝon, infanoj!

JESUO.

*Rimarko.* Sendube nenio malbona estas en ĉi tiuj du komunikaĵoj, sed ĉu la Kristo iam uzis tian afektan, emfazaĉan kaj patosan parolon? Oni komparu ilin kun tiu antaŭa (*), subskribita per tiu sama nomo, kaj oni vidos ĉe kiu flanko estas la stampo de aŭtentikeco.

Ĉiuj ĉi komunikaĵoj estas ricevitaj en la sama rondo. Oni rimarkas en la stilo ian familian mienon, identajn parolturnojn, la samajn ofte ripetatajn esprimojn, kiel ekzemple antaŭen, antaŭen, infanoj, k. a., el kio oni povas konkludi, ke ilin diktis unu sama Spirito sub malsamaj nomoj. Tamen en tiu rondo, cetere tre konscienca, sed iom tro kredema, oni faradis nek elvokojn nek demandojn; ĉion oni atendadis de spontaneaj komunikaĵoj, kaj tio certe ne estas garantio de indenteco. Per demandoj iom premaj kaj kun streĉa logiko oni facile estus remetinta tiun Spiriton sur lian lokon; sed li sciis, ke li havas nenion por timi, ĉar oni demandis lin pri nenio, kaj sen la kontrolo, kun fermitaj okuloj oni akceptadis ĉion, kion li diradis. (Vd. § 269.)

## XXXIV

Kiel bela estas la Naturo! Kiel saĝa estas la Providenco en sia antaŭvidemo! Sed via blindeco kaj viaj homaj pasioj malhelpas vin preni al vi paciencon el la saĝeco kaj boneco de Dio. Vi lamentas ĉe la plej malgranda nubo, ĉe la plej eta malfruiĝo de viaj antaŭvidaĵoj; sciu do, senpaciencaj dubemuloj, ke nenio okazas

(*) La antaŭa mesaĝo, n-ro XV, estas subskribita de la Spirito de Vero. — *La Trad.*

sen ia motivo ĉiam antaŭvidita, ĉiam antaŭdecidita por la profito de ĉiuj. La kialo de tio antaŭa estas pro tio, por disneniigi, homoj kun hipokritaj timoj, ĉiujn viajn antaŭvidojn pri jaro malfavora por viaj rikoltoj.

Dio ofte inspiras al la homoj maltrankvilecon pri la estonteco, por ilin instigi al antaŭvidemo, kaj vidu, kiel grandaj estas la rimedoj, por kompletigi viajn timojn, intence dissemitajn kaj kiuj plej ofte kaŝas pensojn avidajn prefere, ol ian penson de saĝa provizo, inspiritan de humana sento por la malgrandaj. Vidu la rilatojn inter la nacioj, el tio rezultantajn; vidu kiaj transakcioj devos efektiviĝi; kiom da rimedoj kunhelpos, por antaŭforigi viajn timojn! ĉar, vi scias, ĉio estas interligita, kaj tial grandaj kaj malgrandaj venos al la laboro.

Tiam, ĉu vi ne vidas jam en tiu tuta movado ian fonton de kelka komforto por la plej laboranta klaso de la ŝtatoj, klaso vere interesa, kiun vi, la granduloj, vi, la ĉiopovuloj de tiu Tero, rigardas kiel homojn arbitre tajleblajn, kreitajn por la kontentigo de viaj kapricoj?

Nu, kio okazas post tiu tuta iroreiro de unu poluso al la dua? Tio, ke, post kiam oni estas bone provizitaj, tiu tempo ofte ŝanĝiĝas; la suno, obeante la penson de sia Kreinto, en kelke da tagoj maturigis viajn grenkampojn; Dio metis abundecon tien, kie via avidemo pensadis pri nesufiĉeco, kaj spite al vi la malgrandaj povos vivi; kaj, tion ne konsciante, vi estis la kaŭzo de la abundeco.

Tamen okazas — Dio ĝin iafoje permesas —, ke la malbonaj sukcesas en siaj avidaj projektoj, sed tiam tio estas instruo, kiun Dio volas doni al ĉiuj; tio estas la homa antaŭvidemo, kiun Li volas stimuli; tio estas la eterna ordo, kiu prezidas en la Naturo, estas la kuraĝo kontraŭ la okazaĵoj, kiujn la homoj devas imiti kaj rezignacie elteni.

Koncerne tiujn, kiuj el kalkulemo profitas el la malfeliĉegoj, kredu, tiuj estos punitaj. Dio volas, ke ĉiuj Liaj kreitoj vivu; la homo devas neniam amuzi sin per la bezono kaj komerci per la superfluaĵo. Justa en Siaj bonfaroj, granda en Sia indulgemo, tro bona por via nedankemo, Dio, en Siaj projektoj, estas nepenetrebla.

BOSSUET. ALFRED DE MARIGNAC.

*Rimarko.* Ĉi tiu komunikaĵo ja havas nenion malbonan; ĝi eĉ enhavas profundajn filozofiajn ideojn kaj tre saĝajn konsilojn, kiuj povus trompi, pri la identeco de la aŭtoro, homojn, ne multe kompetentajn pri literaturo. La mediumo kiu ĝin ricevis, submetis ĝin al la kontrolo de la Spiritisma Societo de Parizo, kaj oni unuanime deklaris, ke ĝi ne povas esti de Bossuet. Konsultite, Sankta Ludoviko respondis: "Ĉi tiu komunikaĵo, per si mem, estas bona, sed ne kredu, ke ĝin diktis Bossuet. Skribis ĝin iu Spirito, eble iom sub ties inspiro, kaj subskribis la nomon de tiu granda episkopo, por ĝin pli facile akceptigi; sed laŭ la parolo vi devas rekoni la substituiĝon. Ĝi estas de tiu Spirito, kiu metis sian nomon apud tiun de Bossuet." Demandite pri la motivo, kiu instigis lin tiel agi, tiu Spirito respondis: "Mi deziris skribi ion, por rememorigi min al la homoj; vidante, ke tio ne multe helpos, mi volis aldoni al mia parolo la prestiĝon de iu granda nomo. — Sed ĉu vi ne pensis, ke oni malkovros, ke ĝi ne estas de Bossuet? — Kiu ĝuste scias la aferojn? Vi eble erarus. Aliaj malpli sagacaj ĝin estus akceptintaj."

Efektive la facileco, kun kiu iuj homoj akceptas ĉion, kio venas el la nevidebla mondo sub la egido de iu granda nomo, estas tio, kio kuraĝigas la trompemajn Spiritojn. Vanigi la ruzaĵojn de ĉi tiuj, jen tio, sur kio oni devas fiksi sian tutan atenton, kaj tion atingi oni povas nur per la helpo de la sperto, akirita per serioza studado. Tial mi senĉese ripetas: studu, antaŭ ol praktiki, ĉar tiu estas la sola rimedo, por ne akiri sperton per sia propra kostopago.

ĈAPITRO XXXII

# SPIRITISMA GLOSARO

AGENERA. (El la greka lingvo: **a**, seniga prefikso, kaj **geiné**, **geinomai**, generi: kiu ne estas generita). Rilata al variaĵo de la palpebla aperaĵo; rilata al la stato de iuj Spiritoj, kiuj povas momente preni la formojn de vivanta homo ĝis tia grado, ke ili faras plenan iluzion.

FRAPANTA. Oni tia nomas tiun Spiriton, kiu malkaŝas sian ĉeeston per diversaspecaj frapoj kaj bruoj.

MEDIANIMA. Vd. **Mediuma**.

MEDIANIMECO. Vd. **Mediumeco**.

MEDIUMO. (El la latina lingvo: **medium**, rimedo, peranto). Homo kapabla servi kiel peranto inter la Spiritoj kaj la homoj.

MEDIUMATO. Providenca misio de la mediumoj. Ĉi tiu vorto estas kreita de la Spiritoj. (Vd. Ĉap. XXXI, komun. XII.)

MEDIUMECO. Kapableco de la mediumoj. Sinonimo de **medianimeco**. Ĉi tiuj du vortoj estas ofte uzataj indiferente; se oni volas fari ian distingon, oni povas diri, ke **mediumeco** havas sencon pli ĝeneralan, kaj **medianimeco**, sencon pli limitan, ekz-e: li havas la kapablecon **mediumeco**; la **mekanika medianimeco**.

PERISPIRITO. (El la greka lingvo: **peri**, ĉirkaŭ.) Duonmateria envolvaĵo de la Spirito. Ĉe la enkarnuloj ĝi servas kiel ligilo aŭ perilo inter la Spirito kaj la materio; ĉe la vagantaj Spiritoj ĝi konsistigas la fluidaĵan korpon de la Spirito.

PNEŬMATOFONIO. (El la greka lingvo: **pneuma**, aero, blovo, vento, spirito kaj **phoné**, sono, voĉo.) Voĉo de la Spiritoj; buŝa komunikado de la Spiritoj sen la helpo de la homa voĉo. (*)

PNEŬMATOGRAFIO. (El la greka lingvo; **pneuma** — Vd. Supre — kaj **grapho**, mi skribas.) Senpera skribado de la Spiritoj sen la helpo de la mano de mediumo. (**)

PSIKOFONIO. Komunikado de la Spiritoj per la voĉo de paroliva mediumo.

PSIKOGRAFO. (El la greka lingvo: **psike**, papilio, animo, kaj **grapho**, mi skribas.) Tiu, kiu faras psikografion; skribiva mediumo.

PSIKOGRAFIO. Skribado de la Spiritoj per la mano de mediumo.

REENKARNIĜO. Reveno de la Spirito al la enkorpa vivo; la plureco de ekzistadoj estas bazita sur la reenkarniĝo.

SEMATOLOGIO. (El la greka lingvo: **sema**, signo kaj **logos**, parolo.) Signoparolo, signolingvo. Komunikado de la Spiritoj per la movado de inertaj korpoj.

SPIRITO. Laŭ la speciala senco en la Spiritisma Doktrino, **la Spiritoj estas tiuj inteligentaj estuloj de la Kreitaĵaro, kiuj loĝas en la Universo ekster la materia mondo kaj kiuj konsistigas la mondon nevideblan**. Ili estas ne estuloj el speciala kreado, sed la animoj de tiuj, kiuj vivis sur la Tero aŭ en aliaj mondoj kaj kiuj demetis sian korpan envolvaĵon.

SPIRITISMO. Doktrino, fondita sur la kredo al la ekzsto de la Spiritoj kaj al ties manifestiĝoj.

---

(*) Ordinare oni diras simple "senpera voĉo". — *La Trad.*

(**) Ordinare oni diras simple "senpera skribado". — *La Trad.*

SPIRITISTO. Homo, kiu havas aferojn al Spiritismo; adepto de Spiritismo; tiu, kiu kredas la manifestiĝojn de la Spiritoj. **Bona, malbona spiritisto; la Spiritista Doktrino**.

SPIRITUALISMO. Oni uzas ĉi tiun vorton en senco kontraŭa al tiu de materialismo; kredo al la ekzisto de la spirita kaj senmateria animo. **Spiritualismo estas la bazo de ĉiuj religioj**.

SPIRITUALISTO. Homo, kiu rilatas al spiritualismo; partiano de spiritualismo. Estas **spiritualisto** ĉiu, kiu kredas, ke ne ĉio en ni estas materio, kio neniel kuntrenas la kredon al la manifestiĝoj de la Spiritoj. Ĉiu **spiritisto** estas necese **spiritualisto**, sed oni povas esti **spiritualisto**, sed ne **spiritisto**; la materialisto estas nek unu, nek alia. Oni diras: la **spiritualista** doktrino; verko, skribita laŭ la **spiritualismaj** ideoj; la **spiritismaj** manifestiĝoj okazas per la agado de la Spiritoj sur la materion; la **spiritisma** moralo elfluas el la instruado, donata de la Spiritoj. Ekzistaj **spiritualistoj**, kiuj mokas la **spiritistajn** kredojn.

En ĉi tiuj ekzempoj la substituiĝo de la vorto **spiritualisto** (k.s.) anstataŭ **spiritisto** (k.s.) naskus evidentan konfuzon.

STEREOTIPO. (El la greka lingvo: **stereos**, solida.) Kvalito de la palpeblaj aperaĵoj.

TIPTOLOGO. (El la greka lingvo: **tipto**, mi frapas.) Mediumo kapabla por tiptologio.

TIPTOLOGIO. Esprimomaniero per frapoj; maniero de komunikado de la Spiritoj. **Alfabeta tiptologio.**

VAGANTECO. Stato de Spiritoj vagantaj, t.e. ne enkarniĝintaj, dum la intertempoj de iliaj enkorpaj ekzistadoj.

Nun ni klarigas la vorton *kovardeco*, kiun ni uzis en la § 245:

Ni tie uzis la esprimon "fia kovardeco" por traduki la

francan vorton "lâcheté", ĝustadire "malkuraĝo". Ĉi tiu vorto nin tute ne kontentigas, laŭ la sekvo mem de tiu periodo. Ekz-e: se viro batas infanon; se iu lando, per bone provizita armeo, invadas alian, kiu ne povas kontraŭstari al la invadinto; se iu estro ĉikanas subulon, sciante, ke ĉi tiu ne povus rebati la perfortaĵon, k.t.p., tiu viro, tiu lando, tiu estro *ne* estus "malkuraĝaj". Vere, neniu el ili "kuraĝus" fari ion similan al alia tiel aŭ pli forta, ĉar ĉiu domaĝas sian vivon; sed el tio, ke ili "ne kuraĝus", konkludi, ke ili estus "malkuraĝaj", ni sentas, ke tio ne estus la ĝusta termino. Tial, ni permesas al ni proponi vorton, kiuj taŭge esprimus tiun ideon, nome la adjektivon *kovarda* kaj la substantivon *kovardeco* kaj *kovardaĵo*. — *La Trad.*

**FINO**